# Historio de la mondolingvo : tri jarcentoj da serĉado

Drezen, Ernest, Karlovič (1892-1937) Autor

Adres URL obiektu

https://polona.pl/preview/92f2e9fb-116d-443a-b080-fb23a3a90dc1

Data wygenerowania dokumentu pdf

11.02.2024

POLONA/

Domena publiczna

## Informacje

Tytuł ujednolicony

Historio de la mondolingvo : tri jarcentoj da serĉado

Autor

Drezen, Ernest, Karlovič (1892-1937) Autor

Data powstania dokumentu

1931

Prawa do utworu

Domena Publiczna. Wolno zwielokrotniać, zmieniać i rozpowszechniać oraz wykonywać utwór, nawet w celach komercyjnych, bez konieczności pytania o zgodę. Wykorzystując utwór należy pamiętać o poszanowaniu autorskich praw osobistych Twórcy.

Źródło

Biblioteka Narodowa

LENINGRADA ŜTATA HISTORI-LINGVISTIKA INSTITUTO
LINGVA KOMISIONO DE SOVETRESPUBLIKARA ESPERANTISTA UNIO

E. DREZEN

# HISTORIO

# DE LA

# MONDOLINGVO

## TRI JARCENTOJ DA SERĈADO

*Dua Esperanto-Eldono*

La unuan Esperanto-eldonon de la verko tradukis, prilaboris kaj redaktis
N. Hohlov kaj N. Nekrasov

„EKRELO“—Leipzig 1931

E. DREZEN

# HISTORIO
## DE LA
# MONDOLINGVO

„EKRELO“ — Leipzig 1931

III 1.586.198

BIBLIOTEKA NARODOWA BN
1.586.198
1987 K 1410/6

mgr Jan Nowakowski

## ANTAŬPAROLO

Tiu ĉi verko, dediĉita al historio kaj analizo de evoluo de la mondolingva ideo, estis komencita de mi antaŭ 20 jaroj. En la nuna prezentata al la legantoj formo ĝi estas la sesa prilaboro kaj fakte la sesa plikorektigo kaj plikompletigo de la samesenca studo ruslingva, publikigita iam unuafoje en gazeto «Kotlin» (Kronŝtadt, 1911, N-oj 203 kaj 204).

En la jaro 1922, jam multe pli ampleksigitan, ĝin eldonis en tri apartaj broŝuroj la Centra Komitato de Sovetrespublikara Esperantista Unio.

En la jaro 1925, sub titolo «En serĉado de universala lingvo», ĝi estis reeldonita ankoraŭ pli ampleksaforme la trian fojon de la eldonejo «Zemlja i Fabrika» (ZIF).

Dum la jaroj 1926—27 mi entreprenis esencan kaj ĝisfundamentan revizion de ĉiuj miaj laboroj sur la kampo de la mondolingva historio. Tiuj ĉi laboroj kondukis min al multaj bibliotekoj kaj arkivejoj, en kiuj mi povis trovi kaj ricevi originalajn eldonaĵojn kaj dokumentojn utilajn por mia verko. Inter la fontoj profunde esploritaj necesas speciale noti la riĉegajn librokolektojn en Moskva Biblioteko je la nomo de V. I. Lenin, en Biblioteko de Moskva Ŝtata Universitato kaj en Berlina Prusa Ŝtat-Biblioteko.

Samtempe stariĝis vasta korespondo kun diversaj fakuloj en la kampo mondolingva, kiuj liveris multajn novajn faktojn kaj korektigojn. Speciale gravajn servojn tiutilate al mi faris H. Muravkin kaj P. Stojan (LK).

Rezulte en la jaro 1928 la verko estis reeldonita ruslingve la kvaran fojon — jam de la Ŝtata Scienca Administrejo (Glavnauka RSFSR) kun speciala antaŭparolo de akademiano N. I. Marr, aŭtoro de la jafetida lingvoteorio.

En sia nova formo la verko kaŭzis tre simpatiajn reeĥojn inter tiuj diverslandaj kompetentuloj, kiuj kapablis legi la rusan tekston. Samtempe ariĝis nombro da deziroj, ke la verko estu eldonita esperantolingve.

Post faritaj intertraktoj estis decidita, ke la esperanten tradukita verko aperos komence en sinsekvaj N-oj de la gazeto «La Nova Epoko» kaj poste estos aranĝata libroforme per la sama kompostaĵo. La verko komencis aperi en «La Nova Epoko» de oktobro 1928 kaj finiĝis en junio 1930.

La tradukon de la verko efektivigis N. Hohlov (LK) kaj ĝeneralan redakton plenumis N. Nekrasov (LK). Tamen la tasko de la tradukinto kaj de la redaktinto estis pli ampleksaj ol simple traduki kaj redakti. Dum la procedo de la tradukado, kiu finiĝis nur en la majo de jaro 1930, la tradukanto kaj la redaktanto aldonis al la verko plurajn detalojn

antaŭe nekonitajn kaj ankaŭ novaĵojn pri lingvosistemoj aperintaj post la jaro 1927 k. t. p.

Prave konstatis la «Internacia Pedagogia Revuo», recenzante la verkon post kiam ĝi estis finpresita en la «Nova Epoko», ke la verko estis «multe prilaborita kaj kompletigita per novaj faktoj kompare al la ruslingva originalo». Tiel rezultis la ree kreskinta kvina eldono de la verko.

Oni povis atendi, ke post fino de la presado de la «Historio de la Mondolingvo» en «La Nova Epoko» ĝi estos baldaŭ represata libroforme laŭ la sama kompostaĵo. Tamen tio ne okazis. Pro personaj kaj politikaj konsideroj la direktantaro de la nuna SAT ordonis al la presejo senprokraste frakasigi la kompostaĵon de la verko kaj eĉ postulis jure registritan ateston pri efektivigo de tiu ĉi barbara ago.

Sed kiel kelkfoje okazas, la rezulto de tiu ĉi ago montriĝis tute mala al la intencoj de la agantoj.

Nun — precize 20 jarojn post sia unuafoja apero en presita formo, konservante eĉ ĝis nun kelkajn partojn neŝanĝitaj laŭ la unua presita teksto — tiu ĉi verko aperas jam la sesan fojon. Kaj ĝi aperas en formo kaj kun enhavo multe pli perfekta ol tio estus ebla ĉe simpla represo el «La Nova Epoko».

La «Historio», presita en «La Nova Epoko», kaŭzis ankoraŭ pli multajn reeĥojn ol la rusa teksto. Estis ricevitaj pluraj korektigoj kaj aldonaj faktoj. Speciale necesas noti valorajn informojn ricevitajn de D. Szilagyi (Budapest) kaj F. Epstein (Hamburg). En fino de la jaro 1929 aperis la fundamenta «Bibliografio de Universala Lingvo», ellaborita kaj komentariita de P. Stojan. En tiu verko Stojan konstatas la helpon, kiun faris al li ruslingva kvara eldono de la «Historio de la Mondolingvo». Nun mi kun ankoraŭ pli granda kontentiĝo devas konstati, ke nur pro la verko de Stojan mi sukcesis detale kontroli kaj revizii la tutan tekston de la «Historio de la Mondolingvo».

La tradukon faritan kaj kompletigitan mi ree fundamente prilaboris, korektigis kaj kompletigis. Estas faritaj pluraj aldonoj, rilatantaj same al la delonge pasinta tempo kiel al la lastaj jaroj. Estas enkondukitaj novaj elementoj de la sociologia kaj do ne nur lingva analizo de diversaj lingvosistemoj. La libro denove pliampleksiĝis; eĉ la konsisto de la apartaj ĉapitroj estas rekonstruita.

Al la verko estas aldonita alfabeta nomaro de la aŭtoroj kaj de la lingvosistemoj. En la fino de la verko nun estas donita listo de la ĉefaj fontoj, uzitaj ĉe preparado de la verko kaj uzeblaj de la legantoj por ĉerpi pluajn informojn.

En la teksto mem estas donitaj detalaj notoj, el kiu fonto tiu aŭ alia informo aŭ komuniko estas ricevita. La notoj metitaj en krampoj (—) montras numeritajn indikojn al la listo de la fontoj, kiu troviĝas en la fino de la libro. Per la samaj notoj (—) estas montritaj la bibliotekoj, kie troviĝas tiu aŭ alia indikita verko.

E. Drezen

Moskvo, 5.III.1931.

Jan Nowakowski

# HISTORIO DE LA MONDOLINGVO

I.

# LINGVO, ĜIA ROLO KAJ ĜIA EVOLUO

En ĉiu nuntempa alt-evoluinta lingvo la pratempe elemente naskiĝinta parolo leviĝis al la nivelo de nacia lingvo — parte dank'al historio de la lingvoevoluo el la jam preta materialo, kiel ni tion observas ĉe la romanaj kaj germanaj popoloj, parte dank'al intermiksiĝo de la popoloj, kiel ĉe la angla lingvo, parte dank'al koncentrigo de dialektoj ĉe iu popolo, kio eventas sur bazo de ekonomia kaj politika koncentrigo.

Estas memkompreneble, ke la individuoj siatempe kapablos plengrade kontroli tiun ĉi produktaĵon de la homgenro.

K. Marx

**Lingvo kiel ligilo**

Lingvo estas ilo de interligo kaj interkompreno, helpante en la organizo de la laborprocedoj kaj agoj kiel de apartaj laboruloj, tiel same de la ope aŭ kolektive kunigitaj. Lingvo do estas ilo, kiu akcelas la efektivigon de tiu aŭ alia rezulto en la produktado.

En sia senĉesa vivbatalo la primitiva homaro palpe, paŝon post paŝo, lernis labori kaj utiligi diversajn ilojn kaj instrumentojn. La iloj kaj instrumentoj, utiligataj en la laboruzo de la homaro, difinis ĝiajn vivtradiciojn, nivelon de ĝia kulturo, ĝiajn bezonojn kaj ŝancojn.

Sur la bazo de la eltrovoj, kiujn atingis la primitiva tekniko kaj primitivaj labormetodoj, elkreskis la tuta kulturo de la homaro.

Kaj simile al tio, kiel aperis kaj senĉese perfektiĝis la primitivaj teknikaj iloj — aperis kaj senĉese perfektiĝis la instrumento de interligo kaj interkompreno — la lingvo.

**Homo — sociema besto**

La leĝo de la senĉesa kaj persista vivbatalo rezultigis tion, ke jam de la pratempo la homo ĉiam sin trovis en la rondo de samuloj, vivis komunume, laboris komunume, batalis por la vivo kaj penadis en la gajno de la nutraĵo. Primitivaj laborkolektivoj kaj primitivaj grupoj da ĉasistoj ĉiam povis esperi nekompareble pli grandajn prosperojn en la ĉasado, ol iu ĉasisto-solulo.

La ĉasistoj ope-kunigitaj povis entrepreni pelĉasadojn kaj embuskojn por la bestoj pli ampleksajn kaj sekve pli valorajn, laŭ la kvanto da felaĵo kaj viando. Kiam la homo solvis la sekreton de la fajro, estis multe pli facile subteni kaj gardi ĝin por la tuta gento, ol por ĉiu aparta gentano. Sammaniere kreskis la forto kaj rezisto kontraŭ la atakoj de la sovaĝaj bestoj, en la komuna kolektiva sindefendo.

Ĉiuj tiuj fortoj, prenitaj kune, faris ekonomian bazon por la firma genta unuiĝo de la primitivaj ĉasistoj-homoj. La unuopuloj pereis pro sia malforto kaj disigiteco. La forto estis flanke de la firme komuna,

samcela organizaĵo. Per sia komuna laboro, la apartaj homoj preparis vojon por la plua evoluo de la homaro. La kolektiva laboro fariĝis faktoro plej akcelanta ĉi tiun evoluon.

Tuŝante la saman temon, F. E n g e l s skribis:

«La evoluo de la laboro, pro neceso, akcelis pli firman kunigon de la socianoj, ĉar dank' al ĝi fariĝis pli oftaj la ŝancoj de la reciproka helpo en la komuna agado kaj por ĉiu sociano montriĝis pli klara la utileco de tia komuna agado. Mallongdire, la pli proksimaj al ni prahomoj venis al la fakto, kiam ili eksentis bezonon d i r i  i o n  u n u  a l  a l i a».

La bezono krei ian instrumenton — ilon, por transdoni diversajn sciigojn kaj pensojn, kreskis el la fakto mem de la kolektiva laboro. La kolektiva laboro difinis do ankaŭ la efektivigon de tiu ĉi bezono.

**La prakomencaj elementoj de la lingvo**

Nebula estas ankoraŭ la prakomenco de la lingvo. Tamen sendube tiu prakomenco estis ligita kun la kolektiva laboro. Tiun tezon akceptas ĉiuj modernaj lingvistoj sociologoj.

Iom fantazie, sed tamen sufiĉe rezone diras A. B o g d a n o v:

«Kiam homo plenumas ian sian penon, tiam tiu ĉi peno influas liajn spiran kaj gorĝan aparatojn kaj instigas lin al certaj sonoj. Ekzemple, kiam lignohakisto hakas per sia hakilo, lia sono estas: «ha»; kiam la ŝiptiristoj «burlakoj» de rivero Volga ĉiuj ope streĉas la tirŝnuregon, aperas profunda krio: «uhh»; ĉe la okcidenteŭropaj laboristoj, dum levado de io peza — «hopp», aŭ «hop-la»; ĉe la ŝipistoj, turnantaj la kapstanon kun la ankroĉeno — «ho-hop»; ĉe la pavimistoj en Tunisio dum mallevo de la peza ramilo, eliĝas krio: «ap-a» ktp.

Eĉ se ni ne vidas la laborantojn, sed aŭdas la similajn «laborajn interjekciojn» — ni scias, kion faras la laborantoj; estas por ni plene kompreneblaj signoj de la laboragoj, kvankam oni ne povus nomi ilin veraj «vortaj signoj»; ili diferencas de la vortoj per sia arbitra, elementa karaktero.

La dumlaboraj krioj servis kiel bazo, sur kiu en la pluaj epokoj evoluis la lingvo, kontentiganta certajn bezonojn de la homoj: «por diri ion unu al alia».

Akcepto de tiuj ĉi ideoj de B o g d a n o v esence eĉ ne kontraŭdiras al la konjekto, ke la unua homa pralingvo — estis signa, kiu nur poste evoluis al la lingvo buŝa, parola.

Ĉiuokaze la unuaj lingvo-similaj sonoj estis intime ligitaj kun la efektivigataj kolektive laborprocedoj.

Komplikiĝintaj kaj multiĝintaj manieroj de la laboro sekvigis aperon de certaj sonoj, karakterizaj por tiu aŭ alia laborago.

Aperis sonoj esprimantaj la agojn; la nombro de tiuj sonoj kreskis kaj variis, konforme al la ŝanĝo de la bazaj laboragoj, konforme al la ŝanĝo de tiuj aŭ aliaj formoj de la homa ekzistado.

La plimulto de la objektoj kaj aĵoj, pri kiuj la prahomo devis kaj povis havi ideojn, kaj pri kiuj li povis voli «diri ion», estis per si mem la objektoj de liaj laboragoj. Tiaj objektoj — ideoj estis: nutraĵo, ligno, fajro, ĉasaĵo kaj aliaj. Pro tio per la pluaj sonoj estis eldiritaj ankaŭ ideoj pri tiuj aŭ aliaj objektoj kaj aĵoj de la labora medio.

Sonoj, kiuj transdonis la ideojn pri la apartaj laboragoj kaj apartaj objektoj de la laborefiko — estis do la prakomencaj elementoj de la homa lingvo.

Akomodante sin al la vivkondiĉoj de koncerna homa kolektivo, al ties produktivaj ŝancoj, al ties tekniko kaj vivtradicio, kreiĝis lingvo de tiu ĉi kolektivo.

Lingvo estis instrumento, ligilo, kaj simile al ĉiuj aliaj iloj estis determinata per la koncernaj produktivaj kaj ekonomiaj formoj de la ekzistado.

Evoluo de la lingvo

Simile al metodoj kaj manieroj de l' uzado ĉe aliaj iloj — ankaŭ la uzmanieroj de la lingvo estis transdonataj de generacio al generacio. Konsekvence al tio estis konservata en certa grado la hereda tradicio de la lingvoformoj. La sperto de la antaŭaj generacioj estis konservata ĉe la generacioj postaj. En la lingvo konserviĝis ioma konstanteco, laŭhereda tradicio de la lingvaj (sonaj) formoj, kun senco, en ili esprimata.

Sed la sperto de la antaŭuloj havas valoron kaj signifon nur en la okazo, se oni povas ĝin utiligi, se la ŝanĝo de la produktantaj kaj ekonomiaj faktoroj ne kondukas al ŝanĝo de laborkondiĉoj kaj vivmaniero. Se kontraŭe — tiam la sperto mem kaj ĝiaj konsistaj partoj fariĝas jam ne plu bezonaj. La ideoj, formoj kaj manieroj, ligitaj al la sperto de la pasintaj epokoj, ricevas ŝanĝojn aŭ tute malaperas el la novaj vivkutimoj kaj vivmaniero, kiuj naskiĝas pro la ŝanĝiĝintaj ekonomiaj faktoroj.

Ĉio ĵus dirita rilatas ankaŭ procedon de la laŭgrada lingvoevoluo. Neaplikado kaj neutiligo de iu parto el la antaŭa sperto kondukas al malapero de certaj ideoj. Kompletigo de la laborsperto havas kiel sekvon pliriĉigon de la lingvo, aperon de novaj ideoj kaj novaj lingvoformoj kun ili ligitaj.

La prakomenca labora sperto de la homaro estis tre malgranda. Konforme al tio malgranda estis la nombro da vortoj kaj ideoj, por kiuj ekzistis la esprimoj en primitivaj lingvoj. La indiĝenoj de Aŭstralio kaj de kelkaj sovaĝaj gentoj de Afriko kaj Ameriko uzas ĝis nun por siaj bezonoj ne pli ol 250—300 vortoj.

La lingvisto Max Müller per vico da komparoj venis al konkludo, ke la bazaj prakomencaj elementoj, sur kies fundamento elkreskis ĉiuj modernaj lingvoj estis 120 sonkunmetaĵoj — radikoj, ĉiuj proksime ligitaj al la primitivaj labormanieroj kaj agoj.

Aliaj lingvistoj opinias, ke la nombro de tiuj komencaj son - kunmetaĵoj estis eĉ pli malmulta.

Pliriĉigo de la laborsperto, perfektigo de la teknikaj laboriloj kaj evoluo de la produktivaj fortoj rezultigis la nombran kreskon de la bazaj lingvoelementoj. En la modernaj lingvoj, enhavantaj esprimojn por ĉiuj necesaj idoj de la nuntempa labora kaj teknika bezonaro, oni jam kalkulas pli ol 100.000 bazaj ideoj kaj vortoj.

Lingvo, kiel kreitaĵo de certaj rilatoj de la produktado kaj de difinitaj formoj de la vivmaniero, povis naskiĝi kaj naskiĝis en ĉiuj okazoj, kiam la kolektiva kunlaboro de la prapatroj de la nuna homo prezentis por tiu-ĉi naskiĝo sufiĉan kaŭzon kaj donis sufiĉajn ŝancojn por enmeti ĝin en taŭgan formon.

Tial estas supozebla ekzistado en la antikva tempo de certa nombro da memstare aperintaj lingvoj, servintaj por la rilatoj kaj interkompreno de koncernaj grupoj da unuope loĝantaj prahomoj.

Diferenciĝo kaj disdividiĝo de la lingvoj

Sed kun la nombra kresko de la prahomaro kaj de ĝiaj apartaj grupoj — gentoj kaj triboj, vastiĝis teritoriaj limoj de la lokoj, enloĝitaj de homoj. En diversaj lokoj, konforme al ties geografiaj kaj naturhistoriaj ŝancoj, la homoj estis devigataj variigi siajn labormetodojn kaj kutimojn. La variigo de la produktantaj kaj laboraj metodoj kondukis siavice al vastiĝo de la sperto kaj al pliriĉiĝo de la lingvo, kiun ili uzis.

La elfalo de kelkaj elementoj de la antaŭa sperto kaj de iuj pli frue adaptitaj labormetodoj kaŭzis formortadon de kelkaj apartaj antaŭaj

lingvoformoj. Malsamaj vojoj en la evoluo de la labormetodoj kaj laborsperto ĉe diversaj grupoj de la homaro kondukis al ŝanĝiĝo de la lingvoformoj, al apero de novaj dialektoj kaj lingvoj.

**Limoj de la lingvo**

La teritoriaj limoj en la uzado de iu lingvo kutime difiniĝis per teritorio kun komuna tradicio, kun komunaj ŝancoj en la produktado kaj kun komunaj metodoj de la laboro.

Nur ĉe la tute samaj kondiĉoj de la vivmaniero povis konserviĝi la tute samaj produktiloj, kaj en ilia nombro ankaŭ la tute samaj lingvoformoj.

**Asimiliĝo, kunfandiĝo de la lingvoj**

Tial se sur la sama teritorio loĝis malsamaj popoloj kun malsama vivmaniero kaj malsamaj kutimoj en la produktado, hereditaj el la pasinta tempo — en tiu okazo la malsamaj popoloj konservis la malsamajn lingvojn laŭ siaj vivmaniero kaj laborkutimoj.

Ĉe la senĉesa nomada migrado de apartaj homaj komunumoj— gentoj, triboj kaj popoloj — de unu loko al alia, diversaj grupoj, uzante malsamajn labormetodojn kaj malsamajn lingvojn, interkomunikiĝis kaj kontaktiĝis. Se en tiuj cirkonstancoj, pro reciproka interŝanĝo de la laborsperto kreiĝis sama vivmaniero, se havis lokon unuiĝo de la laborsperto ĉe la kontaktiĝantaj grupoj kaj popoloj, la lingvoj de tiuj popoloj venis al neevitebla kunfandiĝo - asimiliĝo. La lasta fenomeno forestis nur tiam, kiam pro diversaj kaŭzoj la vivmaniero kaj labormetodoj de la popoloj, loĝantaj sur la sama teritorio, restis memstaraj kaj malsimilaj.

Se okazis procedo de la kunfandiĝo-asimiliĝo de la lingvoj, tiam kreiĝis iu nova lingvo, pli akomodita kaj konforma al la unuigita laborsperto de la gentoj kaj popoloj, ligitaj per komuneco de la teritorio kaj per unueco de la laborprocedoj.

Ĉe la kunfandiĝo-asimiliĝo de la lingvoj, en la nova lingvo ricevis pligravecon kaj prefereblan staton la konsistaj elementoj de la lingvo de tiu gento aŭ popolo, kies vivmaniero en la koncernaj cirkonstancoj estis pli stabila, pli konforma al la mastrumaj ŝancoj de la koncerna teritorio, de la lingvo de tiu popolo, kies respektiva teknika kulturo estis sur pli alta ŝtupo de la progreso. La lingvoj de la popoloj venkintaj aŭ konkerintaj mem tre ofte asimiliĝis, aŭ estis elpelitaj flanke de la lingvo de la venkita popolo, kiu staris sur pli alta ŝtupo de la teknika progreso kaj estis akomodiĝinta al pli raciaj metodoj de la mastrumado kaj laboro.

**Lingvoj ekzistantaj**

Ĉiuj lingvoj de la nun vivantaj popoloj kaj ankaŭ la lingvoj de la popoloj, pli frue vivintaj kaj nun malaperintaj, prezentas per si rezulton de treege komplika kunagado de diversaj labormedioj kaj diversaj laborspertoj, ligitaj al la multmanieraj formoj de la vivo ĉe la diversaj grupoj de l' homaro, kiuj reciproke interkontaktiĝis. La proksimeco de kelkaj lingvoj, ilia posedo de la formoj, samaj aŭ proksimaj laŭ sia enhavo aŭ konstruo, atestas, ke la vivmaniero de tiuj popoloj kaj ilia laborsperto estis ĝenerale samspeca kaj havas komunajn radikojn. Similekzemple estas proksimaj la lingvoj slavaj: rusa, serbo-kroata, ukrainia, bulgara, pola k. a., kiuj havis en la pasintaj epokoj unu saman prafontan lingvon, kiu estis lingvo de la popolo, iam vivinta sur unu komuna teritorio.

La antaŭuloj de la lingvoj modernaj, la lingvoj greka, latina, gota k. a. postlasis siajn restaĵojn en la literaturo kaj diversaj skribaĵoj, konservitaj ĝis nun. Komparante ĉi-tiujn literaturojn kaj skribaĵojn, oni povas juĝi pri la grado de reciproka proksimeco de tiuj lingvoj kaj kiel sekvon el tio: pri la gradoj de la proksimeco de la vivmaniero ĉe la popoloj, uzintaj ĉi-tiujn lingvojn.

La kompara lingvoscienco, utiligante ĉi tiun metodon de la esploro de diversaj lingvoj, ricevas eblecon fari vicon da valoraj konkludoj pri la historia pasinteco kaj historia evoluo de la homaro.

**Miksitaj lingvoj, ĵargonoj**

La nuntempa ekzisto sur la terglobo de ĉirkaŭ 800 diversaj lingvoj kaj kelkmil dialektoj — signifas, ke en la nuna momento ekzistas sur la terglobo tia sama nombro da malsamaj vivmanieroj kaj labormedioj, kiuj aperis pro la plej diversforma reciproka kunagado de la spertoelementoj, malapero de ideoj, de la diferenciĝo kaj asimiliĝo. Sed kiam la apartaj popoloj, uzantaj por siaj vivbezonoj malsamajn lingvojn, tamen venis al kelk-ia kontakto — ili kvazaŭ per la vivo mem faris kelkajn miksitajn dialektojn, ĵargonojn, bezonajn por la interkompreniĝo de la reprezentantoj de tiuj malsamaj popoloj. Sub tiuj ĵargonoj oni klasifikas la mezepokan ĵargonon de la Mediteraneaj marbordoj «Lingua franka» (miksaĵo el la franca, hispana, itala, greka, turka, araba k. a.) kaj la modernajn: Ĉinuk, Pidgin-English, kaj tiun rusĉinan lingvon, kiu estas konata al ĉiuj loĝintoj en la Ekstrema Oriento kaj ki malgraŭ ĝia ŝajna absurdeco, tamen posedas siajn proprajn gramatikajn regulojn kaj eĉ esceptojn.

Karakteran trajton de tiuj miksitaj lingvoj-ĵargonoj prezentas la m a l v a s t a m e d i o por ilia apliko, ilia helpa destino. Ili estas uzataj nur ĉe la rilatoj de la malsampopolaj reprezentantoj, el kiuj ĉiu parolas en la rondo de la samgentanoj sian gepatran lingvon.

Ĉiu aparta lingvo estas submetata al la samtempa efiko de la faktoroj diferencigaj kaj asimiligaj. En la frua epoko de la homa evoluo, en la epoko de ĝia infaneco, la faktoroj de la lingvodiferencigo efikis tre forte. La maldensa loĝantaro de la terglobo, foresto aŭ malfacileco de trafiko kaj de rilatoj inter apartaj teritorioj estis kaŭzoj por la mastruma apartiĝo de la nombre malgrandaj gentoj kaj popoloj. La mastrum-ekonomia apartiĝo kaŭzis apartiĝon de la lingvoformoj.

Tute kontraŭan tendencon en la lingvoevoluo oni povas observi nuntempe. Kulturo kaj civilizacio de apartaj popoloj komencas ensorbi elementojn de iuj internaciaj, tuthomaraj kulturo kaj tekniko. La alta tekniko kaj mekanikigo de la produktiloj, efektivigitaj en la landoj eŭropaj, per forto de la historia neceso, estas transportata kaj transplantata al aliaj, kulture kaj teknike malpli progresintaj landoj. Kiel sekvon de tio ni observas en la tuta mondo senduban internaciiĝon de la produktantaj metodoj kaj labormanieroj kaj kiel rezulton — plifortiĝon en la asimiliĝo de la plej diversaj lingvoformoj. La plifortigitajn formojn de la asimiliĝo, kiam la samaj parolturnoj kaj formoj aperas en la malsamaj lingvoj, oni povas difini kiel internaciiĝon de la lingvo. Bazan kaŭzon por la simila asimiliĝo donas tio, ke la ideoj, malpropraj al la lokaj vivkondiĉoj, transportataj el fremda vivkutimo kaj el fremdaj landoj, ne povas esti tuj esprimataj per la posedataj en la koncerna lingvo lokaj lingvoformoj kaj parolturnoj. Krom tio, la nacilingvaj terminoj por tiuj «importitaj» ideoj montrus sin nekompreneblaj al tiu, kiu importas tiujn ideojn; por la aborigenoj la similaj novbakitaj naciaj terminoj restus tute egale nekonataj, novaj kaj destinitaj esti aparte, memstare lernataj, kune kun la ideoj, kiujn ili esprimas.

Ĝuste pro tiuj kaŭzoj malprosperas en la rusa lingvo la provoj anstataŭi tiajn internaciajn terminojn kiel «galoŝo», «aŭtomobilo», k. a. per la vortkombinoj de la gepatrolingva origino: m o k r o s t u p, s a m o ĥ o d, k. a. Kaj se en la oficiala lingvo, en la milita kaj administra uzado la vorto «samokatĉik» (biciklisto) trovis ioman aplikon, tamen en la ĝenerala, ĉiutaga vivo certe ne ekzistas iu espero forigi la sufiĉe internacian terminon «velosipedist» (biciklisto). Samekzemple

la germanaj terminoj «Kraftwagen» por aŭtomobilo, «Fernsprecher» por telefono k. a., naskitaj de la ŝovinisma agitado, havas nenian esperon anstataŭi la respektivajn internaciajn formojn. La berlinanoj, kiel antaŭe, malgraŭ siaj personaj aŭ politikaj vidpunktoj kaj konvinkoj, ĉiam daŭrigas nomi la aŭtomobilon ne per la peza, germanigita «Kraftwagen», sed per simpla kaj facila internacia «Aŭto».

La popoloj, elirantaj sur la vojon de la memstara ŝtata progreso, nepre prunteprenas por siaj bezonoj novajn vortojn ĉu de la nacio, sub kies regado ili antaŭe troviĝis, ĉu el la internaciigita provizo de la vortoj. Tiun sorton havas la nacioj de Ukrainio, Blankrusio, Latvio, Litovio, Ĉeĥoslovakio k. a. Tiun sorton havas ankaŭ la ĵus aŭtonomiĝintaj nacioj: ĉuvaŝa, karela, baŝkira k. a.

La koloniaj kaj aziaj popoloj, kontaktiĝante kun la eŭropanoj kaj aliĝante al la internacia eŭropa kulturo kaj tekniko, estas devigataj lerni la eŭropajn lingvojn kaj preni el ili terminaron, uzatan en la adoptata eŭropa tekniko. Ĉi tiuj internaciaj esprimoj kaj formoj komencas ludi pli kaj pli grandan rolon en la evoluo de la naciaj lingvoj. En diversaj lingvoj estas multaj centoj kaj miloj da internaciaj vortoj, kiuj diferencas en diversaj landoj nur iomete. Sufiĉas, se ni montros kelkajn el ilia nombro: lampo, telegrafo, telefono, radio, estrado, lustro, lokomotivo, ktp.

Similaj esprimoj kaj terminoj iafoje ne nur akompanas la enkondukon de novaj ideoj, sed eĉ konkuras kun la pli frue ekzistintaj pure nacilingvaj terminoj por tiuj aŭ analogaj ideoj kaj eĉ pelas ilin el la uzado.

Karaktera ekzemplo tiurilate povas esti ruslingvaj vortoderivaĵoj: «poloĵenije» kaj «sostojanije» — la unua de la vorto «leĵatj» (kuŝi), la dua de la vorto «stojatj» (stari). Nuntempe ĉi tiuj du derivaĵoj perdis siajn antaŭajn signifojn kaj la ideoj, per ili esprimataj, tute malklariĝis. Aliflanke kelkaj internaciaj terminoj ĝustigis la ideojn, difinatajn per tiuj du vortoj. Tiuj internaciaj terminoj estas:

a) situacio (troviĝi en «poloĵeniije»),
b) tezo (proponata «poloĵenije»),
c) pozicio (okupata «poloĵenije»),
d) stato (status) — («sostojanije» proprasence),
e) statuto («poloĵenije», «ustav»).

En la donita ekzemplo la rusa lingvo aŭ ne ĝuste difinas per la du «rusaj» terminoj kvin ideojn, aŭ uzas ses terminojn: du «rusajn» kaj kvar «internaciajn» (la termino «stato — s t a t u s» ne estas enkalkulata), anstataŭ la kvin terminoj tute ekzaktaj, sed de pure internacia deveno.

Pruvante per la faktoj la senĉesan asimiliĝon de ĉiuj lingvoj kaj la enpenetron en ĉiujn lingvojn de pli kaj pli granda nombro da internaciaj terminoj, oni povus supozi la nepran estontecan kunfandiĝon de ĉiuj lingvoj kaj starigon de unu komuna lingvo, konforme al la bezonoj de la moderna tuthomara kulturo kaj tekniko. Sed eĉ se la internaciaj formoj en niaj lingvoj ludas ĉiam pli kaj pli grandan rolon, — tiu fakto estas ankoraŭ tre malproksima ĝis la kristaliĝo de la komuntuthomaraj lingvoformoj.

**La parola tradicio**

La asimiliĝon kaj internaciiĝon de la ekzistantaj lingvoj kontraŭstaras la lingva tradicio, ludanta en la historio de la lingvoevoluo tre efikan rolon. Ankoraŭ en la antikveco la faktoro de la lingva tradicio havis sian haltigan influon rilate al asimiliĝo de la lingvoj. Ĉi tiu haltiga influo sin bazis, ĉefe, sur la sperto kaj tradicio, transdonataj buŝe de unu generacio al alia.

La tradicio estas pozitiva elemento rilate la utiligon de la laborsperto de la antaŭaj generacioj. Sed oni devas konsideri, ke la lingva tradicio, en sia esenco, precipe akcelas la konservadon kaj neŝanĝeblon de la lingvoformoj. La influo de la tradicio rilate la konservadon de la senca enhavo, kiun oni enmetas en tiun aŭ alian formon, estas multe pli malforta. El tio rezultas laŭgrada ŝanĝo de ideoj, ligitaj al tiu aŭ alia formo, kaj apero en la lingvo de tuta vico da malkonformaĵoj, «idiotismoj» kaj malĝustaĵoj. Tial la dume ricevita sperto en la natura lingvokonstruado ne donas motivojn por esperi rapidan kaj facilan procedon de la kunfandiĝo de la lingvoj kaj arbitran naskiĝon de iu nova, la tuthomara.

**Skriba lingvo**

La bezono transdoni pensojn al lokoj malproksimaj kreis lingvon skriban. La skriba lingvo signifas komencon por la enmiksiĝo en la naturan evoluon de la lingvo per artefaritaj, kreitaj de la homo, leĝoj. La unua skriba lingvo (hieroglifoj de egiptoj, ĉinoj, antikvaj meksikianoj k. a.) esprimis tute neniajn vortojn, sed nur simbolojn, kiuj devis elvoki la sonan rememoron kaj per ĝi koncernan bildon de la transdonata ideo aŭ penso mem.

Simila ideografa skribo ne povis akceli la senŝanĝan konservadon de la respektivaj sonkombinoj. Ni vidas ke ĉe la ĝenerala komuneco de la ĉina skribo por la tuta Ĉinio, ĝin uzas ne malpli ol 7 diversaj popoloj de Ĉinio, kun diversaj lingvoj.

Aperinta post la hieroglifoj sona alfabeto, estante per si mem neniel perfekta, ankaŭ ne ekzakte transdonis la prononcadon, diversajn akcentojn kaj ties variaĵojn. Neperfekta alfabeto kaj neperfekteco en la transdono de la sono per la signo, simile al la antaŭaj simbolaj signoj, fiksis por la ideoj certajn grafikajn (skribajn) esprimojn, sed ne garantiis nevarieblecon de la koncernaj sonesprimoj.

Ĉiuokaze la ekzisto de la difinitaj skriboformoj, precipe de la laŭsona skribolingvo, estis faktoro, plifortiganta la influon kaj signifon de la lingva tradicio. Paralele kun la parola tradicio kreiĝis tradicio de la skriba lingvo.

Malsamaj alfabetoj kaj diversaj manieroj en la prononcado de la skribita lingvaĵo, faris kaj faras certajn barojn por la lingva asimiliĝo — do al la plua internaciiĝo de la lingvoj. La internaciaj terminoj en diversaj landoj, dank' al la malsamaj prononcoleĝoj, akiras tute neinternaciajn sonajn formojn.

En la anglolingva sonformo «internejŝ'nal» (laŭ la vortaro de John Walker: «in-ter-na-shun-al») ĉu iu facile rekonas la internacian terminon «international»; malgraŭ tio, ke tiu ĉi termino estas skribata en ĉiuj eŭropaj lingvoj, uzantaj la latinan alfabeton (en tiu nombro ankaŭ en la angla lingvo) tute same.

Partaj reformoj — simpligo de alfabeto kaj ortografio, estas sendube ebl aj, sed ili estas akompanataj per grandaj perdoj kaj penoj kaj devas esti konsiderataj jam kiel arta reguligo de la lingvoevoluo. En 1918 jaro en Rusio estis forigitaj du arkaikiĝintaj literoj ѣ (jatj) kaj i, sed se tiun relative malgravan reformon akompanis multaj obstakloj, oni devus venki nekompareble pli multan nombron da obstakloj dum la plisimpligo kaj konformigo de la prononcado kaj skriba lingvo en tiaj lingvoj, kiel franca aŭ angla.

**Gramatiko**

La lasta kaj sendube plej grava, pro sia rezisto, faktoro, kiu haltigas la evoluon de la lingvoj laŭ la vojo de ilia internaciiĝo, estas gramatiko.

La reguloj de gramatiko estas necesaj por konservi la utilajn por koncerna evolugrado de la lingvo metodojn de la skriba lingvo kaj por, laŭeble, forigi la superfluajn kaj malutilajn. Sed samtempe kun tio,



BIBLIOTEKA NARODOWA BN

la gramatiko estas ĉefa haltigilo en la internaciiĝo de la lingvo. Se en la lingvon, pro nepraj cirkonstancoj kaj neceso, penetras tiuj aŭ aliaj fremdlingvaj, internaciaj vortoj, ili estas en la nacilingva gramatiko aliigataj kaj alifasonigataj. Se la elementoj de internaciigo en la leksikona materialo de la modernaj lingvoj estas sufiĉe multenombraj, la elementoj de internaciigo en la gramatikoj de la modernaj lingvoj forestas aŭ estas treege malmultaj.

**Elementoj de la lingvokonstruo, haltigantaj la internaciiĝon**

Do, la alfabeto, skriba lingvo kaj gramatiko, ekzaktigante la lingvoformojn, leĝe reguligante kaj fiksante ilin, subtenas la ekzistantan buŝan tradicion en la kontraŭstaro de la lingvo al fremdaj influoj kaj en certa grado konservas la ekzistantaj lingvojn de la influo de la faktoroj internaciigaj.

La elementoj, kiuj formas la lingvan tradicion: la parola tradicio, alfabeto, reguloj de la skribo kaj gramatiko, malhelpas la kunfandiĝon de la lingvoj, faras tiun kunfandiĝon neebla ĉe la nuntempa stato de ilia plua evoluo.

Ĉe la ĝenerala instruiteco la forto kaj influo de la lingva tradicio des pli multe grandiĝas.

Do la ekzistantaj formoj de la konstruo de diversaj lingvoj ne montras iun vojon al la plua laŭforma lingva internaciiĝo.

**La latina kaj aliaj mondlingvoj**

Estas vero, ke partan rolon de la mondlingvo ludis siatempe la lingvoj de la grandaj kulturaj nacioj. Tiuj lingvoj en diversaj epokoj kaj por diversaj lokoj estis: ŝumera, sanskrita, hebrea kaj pli poste greka. La romaj legionanoj dum la senĉesaj venkoriĉaj militoj de la respubliko kaj poste de la imperio, ĉie propagandis kaj vastigis la vulgaran roman lingvon. La superaj klasoj de la venkitaj popoloj baldaŭ akceptis la lingvon de la venkintoj, kiuj alportis kun si altan kulturon. Sed sekvis tion la invado en la Okcidentan Eŭropon de la gotoj kaj de aliaj germanaj gentoj. Komenciĝis la nova Babelo; la lingvoj kunfandiĝis, ŝanĝiĝis kaj en la mezepoko la latina lingvo fariĝis posedaĵo nur de la superaj instruitaj klasoj.

En la XVII jarcento la mortinta latina lingvo sin montras jam malsufiĉa por la bezonoj de la eŭropa civilizacio. La juna eŭropa burĝaro, rapide kreskanta kaj plifortiĝanta, anstataŭis la uzadon de la latina lingvo per uzado de disvolviĝantaj naciaj literaturaj lingvoj. Eĉ la kripligoj kaj barbarismoj, kiujn enkondukis en la latinan lingvon famaj scienculoj, ne povis ĝin savi. La monda lingvo, almenaŭ por diplomatio kaj superaj klasoj fariĝis lingvo franca.

Ĉiuj tiuj, atingintaj siatempe provizoran sukceson, naciaj lingvoj kaj en ties nombro ankaŭ lingvo latina, pretendis esti «mondaj». Kaj ĉiuj ili siavice, estis forigitaj de la lingvoj de aliaj popoloj, pli prosperaj progrese kaj kulture. La konkurado inter diversaj popoloj malhelpis al iu nacia lingvo fariĝi efektiva tutmonda lingvo. Tio estas tre komprenebla fakto: la akcepto de la lingvo de iu popolo kiel tutmonda donus al tiu popolo kaj ĝiaj anoj grandvalorajn privilegiojn, dum la aliaj popoloj restus sen videbla profito.

## II

## LA ARTA REGULIGO DE LA LINGVOEVOLUO

> Por ni, adeptoj de la nova lingvoscienco — estas tute sendubaj: la kreo de la lingvo per kolektivo kaj la evoluo de apartaj, diferenciĝintaj en kondiĉoj de antaŭhistoria socio, lingvoj al la estonta komuna lingvo, same kiel tio, ke la homaro, akcelante unuecon de la ekonomio kaj de la senklasa socio, ne povas ne entrepreni science preparitajn agojn por plirapidigi tiun mondan procedon.
>
> Akademiano N. Marr. 1927.

**Primariaj elementoj en la reguligo de la lingvo**

La alfabeto, reguloj de ortografio kaj gramatiko estas bazaj reguliloj de la lingvo, konscie starigitaj kaj konscie alprenitaj de la homo. Tiuj reguliloj, esprimitaj per serio da gramatikaj reguloj kaj leĝoj, havas sian rektan destinon, firmigi certajn formojn de la lingvo kaj iksi certan ordon por ilia konstruo kaj uzado.

Alfabanke — ĉi-tiuj foje starigitaj kaj restantaj neŝanĝeblaj, malfsamaj ĉe diversaj lingvoj, reguliloj haltigas la plu-n evoluon de la lingvo kaj unuavice haltigas la rimarkeblan internaciiĝon de la lingvoj, kondukantan al ilia estonta kunfandiĝo.

Sed se tiuj reguliloj de la lingvo estas produktaĵoj de la konscia kreado de la homo, kaj kies kreon kaŭzis certaj neceso kaj bezono, tiam aperas demando, ĉu la lingvo estas ĝenerale io netuŝebla kaj ĉu oni ne povus organizite ŝanĝi, akomodi kaj rekonstrui la leĝojn kaj regulojn de ortografio kaj gramatiko, difinantaj la lingvoformojn, neniel imitante tiun elementan, naturan evolucn, kiun ni ŝajne observas en la procedo de la evoluo de la ekzistantaj lingvoj.

**Lingvo popola kaj lingvo literatura**

Por plene solvi ĉi tiun demandon, ni devas akcepti, ke tio, kion ni nunmomente nomas lingvo de certa popolo esence estas kolekto de diversaj lingvoj, dialektoj kaj parolmanieraj kaj unuavice:

1. lingvo parola — popola, lernata de infano ĉe siaj gepatroj, kaj —

2. Lingvo literatura, lernata en lernejo kaj per librolegado.

Ĉiu el tiuj lingvoj, popola kaj literatura, povas esti siavice disklasigita je kelkaj novaj subspecoj.

Tiel ekzemple, parolmaniero — lingvo de apartaj lokoj, provincoj, distriktoj, eĉ de vilaĝaj komunumoj kaj vilaĝoj posedas siajn proprajn ecojn kaj diferencas de la lingvo, parolmaniero de la najbaraj regionoj.

Sammaniere lingvo literatura, uzata de apartaj homoj, apartaj homgrupoj kaj literaturaj tendencoj, estas certagrade malsimila al la lingvo de aliaj aŭtoroj, aliaj homgrupoj, sociklasoj kaj tendencoj.

Propradire, ĉiu sociklaso, ĉiu laborkolektivo, ĉiu homo, en certaj limoj, kreas «sian lingvon», tiun lingvon, kiun li uzas kaj per kiu li interkompreniĝas kun la samrondanoj.

Sed se la individua kreo en la popola lingvo perdiĝas kaj restas nerimarkita, sin montrante nur kiel pli aŭ malpli akceptitaj kaj aplikitaj novaj enkondukaĵoj, — la individua kreo en la lingvo literatura estas rimarkebla kaj ofte oni povas konstati la aŭtoron, iniciatinton de tiuj aŭ aliaj ŝanĝoj kaj aldonoj, enkondukitaj en la lingvon kaj pli poste en ĝin enradikiĝintaj.

Krom tio la skriba, presita kreo de la novaj lingvoformoj estas ĉiam pli efika, havas pli multajn ŝancojn disvastiĝi, fariĝi socia kaj enradikiĝi, ol la individua, nefiksata skribe kreo de la novaj formoj en la lingvo popola — parola.

Konsekvence al tio, se ni volas konstati la faktojn de la arta reguligo de la lingvo konforme al tiu aŭ alia bezono kaj al taskoj, starigataj per la vivo — ni devas nin turni unuavice, kompreneble, al la lingvo skriba, libra, literatura.

**Kreado de la literaturaj lingvoj**

Konscie organizitan reguligon de la lingvo en pli aŭ malpli granda rilato vidis ĉiuj literaturaj lingvoj de ĉiuj kulturiĝintaj popoloj, en ties nombro ankaŭ la lingvo rusa.

Ankoraŭ en la IX. jarcento du, tiel nomataj «apostoloj» kaj «klerigintoj» de la slavoj, la fratoj C i r i l o kaj M e t o d o, prilaboris regularon por la ortografio kaj gramatika fundamento de la slava lingvo laŭ la dialekto de la macedoniaj slavoj. Per tio ili kreis laŭesence la tutslavan parolon, la tutslavan literaturan lingvon, kiun uzas la orienta ortodoksa eklezio ĝis nun.

Sed plej karaktera tiurilate estas historio de la germana literatura, aŭ t. n. «nova suprogermana lingvo», en fina formo fiksita per la traduko de la biblio, kiun faris L u t h e r. Antaŭ la Reformacio la germanoj ne havis komunan literaturan lingvon. En diversaj regionoj de la germana imperio dominis apartaj parollingvoj, konserviĝintaj eĉ ĝis nun. Kiam oni bezonis uzi iun tutimperian lingvon, oni uzis por tiu ĉi celo lingvon latinan. Nur komencante de la fino de la XIII. jarcento la paktoj kaj dekretoj de la tutimperia signifo estas redaktataj jam en la lingvo germana. Sed iajn ekzaktajn, fiksitajn formojn tiu ĉi kancelaria lingvo ne havis. Por la unua fojo, en la imperiestra kancelario en Praha, kie en tiu epoko dominis la miksita — inter la suda kaj mezgermana — dialekto, oni komencis prilabori la normojn kaj bazajn regulojn por la tutgermana skriba lingvo. Poste, en la jaro 1490 oni faris oficialan interkonsenton de la du regnaj kancelarioj — de la imperiestra kaj tiu de la saksa Kurfürst — pri la uzado de tiu ĉi lingvo en la reciproka, oficiala korespondo. Al la sama tempo rilatas ĝia gramatika prilaboro. La sekretario de la imperiestro Maksimiliano H a n s K r a c h e n b e r g e r skribis latine la unuan «gramatikon de la germana lingvo».

Samtempe la oficiala, prilaborita en la kancelarioj, lingvo penetris en lernejojn, en la librojn kaj privatan interkorespondon. La invento de la presarto akcelis la pluan disvastigon de la komune akceptita, komprenata tra la tuta Germanio, lingvo. Sur multaj presitaj libroj de tiu kaj sekvantaj epokoj ekzistas surskriboj, ke la libro estas presita «en vera, ĝenerala germana lingvo». Sed malgraŭ la komunaj lingvoformoj apartaj diferencoj de la lokaj dialektoj daŭris, konservataj eĉ en presitaj libroj. Komencante tradukon de la biblio, L u t h e r unue sekvis la ĝeneralan uzatan lingvon, sed plue li ekuzis novajn, tre ofte artefaritajn formojn, senigitajn de la troaj dialektaj koloroj. La leksi-

kono, sintakso kaj stilo de la moderna germana literatura lingvo entute estas kreaĵo de L u t h e r. En la unua periodo al kelkaj lokaj eldonoj de la biblio de L u t h e r oni aldonis eĉ apartajn «listojn de fremdaj vortoj», uzataj de L u t h e r, sed nekonataj en la koncerna loko. Tamen jam post jarcento la lingvo de L u t h e r fariĝas oficiale akceptita en ĉiuj regionoj de Germanio kaj eĉ en Svisio. La germana literatura lingvo, ne apartenanta al iu regiono de Germanio kaj arte konstruita, okupis apartan situacion inter la popolaj dialektoj. La evoluo de tiu ĉi lingvo en pluaj epokoj estis direktata teorie, gramatike, sed ne per elementa evoluo, propra al la popolaj parollingvoj.

Analoge kuraĝan kaj pure artan efikon ricevis en pli malfrua epoko, komence de la jaro 1901, lingvo hungara, ĝis tiam nekulturata. Sufiĉas, se ni notos ke ĝis la jaro 1843 oficiala lingvo de la hungariaj lernejoj estis lingvo latina. F e r e n c z K a z i n c z y estis iniciatinto de la nova movado en la hungara literaturo. Li volis fari la lingvon riĉa, ĝusta, elasta. L i k r e i s a m a s o n d a n o v a j v o r t o j. Parto de ili kun la tempo foriĝis el la uzado, sed granda parto da novaj esprimoj kaj vortoj, mankintaj en la hungara lingvo, laŭ bona iniciato de K a z i n c z y, enradikiĝis kaj ekvivis.

**Konscia kreo de modernaj lingvoj. Sanskrita lingvo**

Ni vidas ke la vojo de decida, konscia enmiksiĝo en la regionon de la lingvokonstruo estas neniel esceptebla, ke tiu ĉi vojo jam estis trairita de kelkaj literaturaj lingvoj de diversaj popoloj.

La artefaritaj normoj kaj formo, dum tiu ĉi vojo prilaboritaj kaj starigitaj, ne nur influis evoluon de la lingvo kaj fiksis ties ioman unuecon, sed ankaŭ akcelis starigon de komuna interkomprenilo por la personoj, uzantaj diferencajn popolajn dialektojn kaj parolmanierojn. La historio tamen konas ankoraŭ aliajn, pli karakterajn ekzemplojn, kiam la homa racio, konsiderinte koncernajn bezonojn, — konstruis el la lingva materialo de la pasintaj epokoj jam tute novajn preskaŭ tute ne ekzistintajn artajn formojn de novaj lingvoj.

Tiamaniere, en la historio de la lingvoevoluo ni eltrovas ne nur vojojn de la evoluo, sed ankaŭ vojojn revoluciajn — konscian, pripensitan kaj interkonsentitan lingvokreon.

Bonegan ekzemplon de simila konscia kreado, de konkorda efiko al la lingvo flanke de la novaj reguligaj elementoj prezentas la lingvo s a n s k r i t a.

En la nordorienta Hindio, en la valo de Pendshab, antaŭ kvar mil jaroj vivis popolo, veninta tien el iu nekonata loko. La geografia kaj vivtradicia komuneco de la gento sekvigis la ekziston de komuna lingvo, nomita de la antikvuloj lingvo veda. Iom post iom la teritorio, okupita de tiu ĉi popolo, vastiĝis kaj etendiĝis tra la valo de rivero Ganges kaj tra la tuta Hindia duoninsulo. En la daŭro de sia miljara historio la popolo, pro multaj lokaj cirkonstancoj, dividiĝis teritorie kaj disfalis je nombro da apartaj gentoj. Konforme al tio dividiĝis ankaŭ la veda lingvio.

En tiu malproksimega epoko portantoj de la kulturo kaj de lingvaj tradicioj estis scienculoj-pastroj. Ĉiu aparta gento kreis sian propran skolon de pastroj. Ĉiu pastra skolo havis apartajn regulojn de la prononcado de la antikvaj sanktaj tekstoj. Tiuj reguloj plifortigis la disiĝon kaj diferencigon de la multenombraj dialektoj.

Naskiĝis neceso krei komunan lingvon, kiu ligus la diversajn gentojn. El la antaŭaj malsamaj reguloj de prononcado, deklinado, konjugacio kaj vortoderivado iom post iom estis formitaj unuformaj bazoj de unu komuna lingvo. Tiu ĉi lingvo ricevis la nomon «Sanskrito», kio signifas: perfekta, purigita.

Bramano P a n i n i en IV. jarcento antaŭ nia ero, kompletigis ĉi tiun ellaboron de harmonia gramatiko kaj de komuna skriba lingvo. [1] La laboro de P a n i n i konsistis el mallongaj sentencoj, nombre ĉirkaŭ 4000. En ili per pure abstraktaj matematikaj manieroj, rememorigantaj sistemon de la algebraj signoj, estas disvolvata la tuta konstruo de la sanskrita lingvo.

Sanskrito estas precipe riĉa je vokaloj, kio donas al ĝi grandan sonecon. Ĝi posedas vokalojn longajn, mallongajn kaj diftongojn (entute 13).

P a n i n i difinas la kvaliton de la sonoj tiamaniere:

1. Ĉiu konsonanto estas duone pli mallonga ol la mallonga vokalo.
2. La longa vokalo, aŭ diftongo (aj, aŭ) estas duoble pli longa ol la mallonga vokalo.

La loko por akcento en Sanskrito ne estis fiksita.

Laŭ la regularo de P a n i n i, la akcento sin bazas sur la tonlevigo en la akcentata silabo de la vorto, t. e. la akcento estas muzika.

La sonoj estas submetataj al ŝanĝo ĉe ilia reciproka renkontiĝo interne de la vorto. Ĉiuj tiuj ŝanĝoj estas ĝuste reguligataj per gramatiko, ekz.: a+i=e; a+u=o, ktp.

En la deklinado oni distingas 3 genrojn, 3 nombrojn (ununombro, dualo kaj multenombro) kaj 8 kazojn. Krom tio, la deklinado varias laŭ la vokaloj, enirantaj en la bazon de la deklinataj vortoj.

Apartaj reguloj ekzistas por la deklinado de la numeraloj kaj pronomoj.

Ĝenerale, malgraŭ la komplikeco de la lingvoformoj, ĉiuj ili estas prilaboritaj kaj reciproke harmoniigitaj per la koncernaj gramatikaj reguloj.

Dum la dekoj kaj centoj da jaroj en tiun duone artefaritan, aŭ ĉiuokaze arte reguligitan lingvon, estis tradukita ĉio, kio estis valora en la literaturo de Hindio. La lingvo mem fariĝis propraĵo de ĉiuj kleraj hindoj.

La antikva veda lingvo samtempe en la popolamaso daŭre disiĝis kaj formis la tiel nomitajn prakritajn dialektojn.

Sed la ekzisto de Sanskrito helpis al Hindio, malgraŭ ties diverseco en la vivamiero kaj vivformoj, konservi unu komunan kulturon. La homa racio tiuokaze sciis konscie direkti la lingvokonstruon laŭ la al ĝi bezona vojo; per la kreo de la novaj lingvoformoj enkonduki en la vivon de certa kolektivo konscian kreelementon.

La naturaj lingvoj ekzistis, havis propran literaturon kaj memstaran evoluon. Kaj la artefarita Sanskrito ekzistis samtempe kaj paralele kun la lingvoj naturaj, kiel siaspeca helpa literatura lingvo.

Dank' al la flekseblo de la lingvokonstruo, fine priformita de P a n i n i, tiu ĉi lingvo ne pereis kaj daŭre ekzistas en la bramana literaturo ĝis nun.

**Lingua Geral**

Troviĝas alia grava eksperimento de la lingvokonstruo, en la skalo de tuta duonkontinento; la hispanoj, almilitintaj Brazilion, kun la celoj de pli intensiva ekspluatado de la lando, estis devigitaj interrilati kun la indiĝenoj, havintaj laŭ sia vivmaniero kaj historio nenion komunan kun la hispanoj. Krom tio ankaŭ la multenombraj, malsamaj dialektoj de la indiĝenoj malhelpis al la hispanoj en la plua konkerado de la lando. Ne atendante la venontan pogradan evoluon en la asimiliĝo de la lingvoj, la instruitaj jezuitoj, pioniroj de la hispana kulturo en XVI. jarcento, kreis la vortaron, alfabeton kaj gramatikon de lingvo

[1] «Mondo», Stockholm, 1915, № 6. p. 42 ([47]).

facile akireblan por ambaŭ: hispanoj kaj aborigenoj. Tiu ĉi lingvo sub la formo de «Lingua Geral Brazilica» [1] ekzistas en Brazilio ĝis nun, servante al la diversgenta kaj diverskolora loĝantaro de la centraj regionoj de Sudameriko.

Ĵargonoj («Argot»)

Kiel ekzemplo de alia «arta» lingvokreo sur la bazo ne de literaturaj lingvoj, sed de popolaj parollingvoj, estas la ĵargonoj de ŝtelistoj— «argots» (elpar. argo),.

Tiuj ĵargonoj estas kreataj kaj uzataj de apartaj rondoj da personoj, laŭ ties specifikaj bezonoj. Sian originon ili komencas en la grizaj praepokoj. Imitante la parolan ĉifritan lingvon — tiuj ĵargonoj posedas ĉion, kion devas posedi popola parollingvo, kaj samtempe forestas eĉ iu dubo pri la artefariteco de tiuj lingvoj, kreitaj per konscia ŝanĝo kaj akomodo de la respektivaj lingvoformoj, bezonaj por la koncerna rondo da personoj.

Al la sama tipo de la lingvoj oni devas alkalkuli la t. n. lingvon de «ofenja'oj» (vilaĝaj kolportistoj), kreitan verŝajne en la gubernio de Vladimir de la nomitaj kolportistoj kaj uzatan de ili por siaj konsultaĵoj kaj interparoloj, t. e. por tiuj okazoj, kiam la senco de tiuj interparoloj devas esti kaŝita de la fremduloj.

Troviĝas historiaj sciigoj, ke en Ukrainio, dum la naciaj bataladoj kontraŭ Polio, la fugintaj servutuloj ukrainoj, sin maskante per rolo de almozuloj, elpensis sian propran lingvon. Tiu ĉi lingvo ankoraŭ en la fino de la pasinta jarcento restis konata inter la Galiciaj kaj Podoliaj «Kobzaroj» (almozuloj-minstreloj, kantantaj siajn kantojn sub akompano de okkorda muzikilo «Kobza»).

Bibliografio de ĉiuj eŭropaj ĵargonoj estas notita ĉe W a g n e r en «Die Litteratur der Gauner- und Geheimssprache» (Dresden, 1861).

Ebleco de la konscia konstruo de la lingvo

El ĉiuj cititaj ekzemploj devas esti farita konkludo pri la ebleco de la konscia interveno en la procedojn de la natura lingvoevoluo kaj ne nur de la lingvo literatura, sed ankaŭ de la lingvo popola, parola.

Simila interveno estas rekta rezulto de la konscia kompreno de realaj postuloj kaj bezonoj de la momento, starigataj antaŭ la interkomprenilo kaj ligilo — la lingvo. Tiamaniere, la organizita efiko al la lingvo, ĝia arta reguligo kaj konstruo estas eblaj kaj koncepteblaj — sed celkonformaj ili estas nur en plena konscio rilate al la starigita celo, en plena konscio pri la ekzistantaj bezonoj kaj eblecoj de la bonapliko de la lingvo.

Malkonfido kontraŭ artefarita, konscie kreita, konstruita kaj sciencereguligita lingvo similas superstiĉon de la malklera vilaĝano, haltiganta la vagonaron. La scienco pri la lingvo, sin okupanta per ĝia analizo, la scienco pri la sociaj taskoj de la lingvo — donas neniajn kaŭzojn por nei eblecon de ĝia arta konstruo, de ĝia sintezo. Kiel ni vidas, okazas tute kontraŭe — la sperto de la pasinteco konfirmas la eblecon de simila konstruo.

Se ni eĉ konjektus, ke la lingvo natura estas organismo, kiu servas al niaj bezonoj same, kiel en la cirkonstancoj de sia eble ekzistado servas iu ŝarĝporta besto, perfektiĝanta en sia natura evoluo, en tiu rilato la artefarita lingvo estus kvazaŭ lokomotivo, aŭtomobilo, servanta al niaj bezonoj en la de ni difinitaj cirkonstancoj. Por la lokomotivo kaj aŭtomobilo ĉi tiuj cirkonstancoj estas reloj kaj ŝoseo, por la artefarita lingvo — la taskoj de ni donitaj al tiu ĉi lingvo: priservi pli aŭ malpli grandan homkolektivon, kiun kunligas certaj komunaj inte-

[1] F. Fr. L e b z e l t e n. «Katholische Missionäre als Naturforscher und Aertzte», Wien, 1902.

2*

resoj kaj kiu sentas bezonon por komuna interkomprenilo. Esenco de la lingvo ne estas esenco de la organismo de iu ŝarĝbesto — esenco de la lingvo entenas iun organizitan teknikan forton, kiu servas por difinita bezono.

Se ni metos ĉevalon en la vivkondiĉojn de kamelo, la ĉevalo ne eltenos kaj fariĝos aŭ senutila, aŭ iom post iom kaj tre malrapide komencos akomodiĝi al la novaj formoj de l'ekzistado.

La natura lingvo en la tute novaj cirkonstancoj de l'ekzistado aŭ sin montros senutila, aŭ iom post iom rekonstruiĝos.

Lingvon, konstruitan konscie, estas pli facile akomodi al la necesaj vivo- kaj ekzistoformoj.

F o u r i e r skribis siatempe pri iuj marleonoj, kiuj pro la leĝoj de neceseco nepre aperos kaj estos uzataj por transporto de multpezaj ŝarĝoj. Tamen F o u r i e r kaj al li similaj ne ĝisvivis tiujn leonojn. La homa genio, ne atendante aperon de la marleonoj, kreis ion pli perfektan: vapormaŝinon kaj oceanan vaporŝipon.

Se ni akceptas la eblecon de la arta konstruo kaj reguligo de la lingvoj, se ni konas tiujn mankojn, kiujn havas la modernaj naturaj lingvoj— nature stariĝas demando: ĉu ne estus eble, jam nun, per iu difinita vojo, forigi tiujn mankojn kaj la koncernajn lingvojn reguligi, enkondukinte novajn regulojn, kiuj difinus skemon kaj konstruon de la lingvo. Por respondi al tiu ĉi demando — ni devas reveni al la farita de ni divido de ĉiu lingvo je lingvoj popola-parola kaj literatura. Estas evidente ke la popola-parola lingvo estas «produktaĵo de la medio, cirkonstancoj kaj rilatoj de la produktado», ĝi estas interligilo, kies uzmetodojn oni akiras tute aŭtomate en la infaneco.

T i u n l i n g v o n n e e s t a s e b l e r o m p i, d e t r u i k a j r e f o r m i, n e r e f o r m a n t e l a m e d i o n, c i r k o n s t a n c o j n k a j r i l a t o j n d e l a p r o d u k t a d o.

Tial, parolante pri la arta raciigo de la lingvoj, ni devas konsideri, kompreneble, nur racikonformigon de la literatura lingvo.

Ni scias ke fakte ekzistas ekzemploj, kiam oni faris serion da malgrandaj, partaj reformoj en kelkaj literaturaj lingvoj. Al tiaj reformoj rilatas la reformo de la rusa alfabeto, efektivigita en la jaro 1918. Tiaj reformoj sendube estas tre utilaj. Sed ĉiu kompleta reformprojekto por iu literatura lingvo ĉiam renkontas la tuj aperantan kontraŭstaron de la medio, cirkonstancoj kaj rilatoj de la produktado, ĉar lingvoj literaturaj estas nenio alia ol surkonstruaĵo super la lingvoj naciaj, popolaj. Kaj reformi, reguligi radikale ĉi tiun surkonstruaĵon, ne ŝanĝante ĝian bazon — lingvon popolan — certe estas afero malfacilega, se oni ne volas disŝiri la ligilojn inter la du specoj de la sama lingvo — literatura kaj popola. La historio de la raciigaj provoj ĉe la lingvoj naturaj estas respektinda kaj havas sufiĉan aĝon. Ekzistas ne malpli ol 7 projektoj de baza reformo por la lingvo rusa, 7 projektoj por la lingvo angla, 4 por la franca, 5 por la germana, 2 por la itala kaj po 1 por la sveda kaj hispana.

La moderna lingvoscienco kapablas teorie solvi problemojn pri la pli perfektaj konstruformoj de la lingvoj. S e d ĝ i n e k a p a b l a s d e v i g i i u n p o p o l o n, e k s t e r l a b e z o n o j d e t i e s v i v m a n i e r o k a j l a b o r m e d i o, f a r i ŝ a n ĝ o j n e n l a l i n g v o d e t i u p o p o l o.

Tial fari veran kaj fundamentan raciigon de iu (literatura) lingvo estas neeble, ĉar tiu raciigita (literatura) lingvo perdus sian ligitecon kun la popolo — portanto de la bazaj formoj de la koncerna lingvo.

Venontaj perspektivoj de la lingvoevoluo kaj formigo de nova tutmonda lingvo

Sed se rilate la ekzistantajn naturajn lingvojn ĉiuj provoj de ilia arta rekonstruo kaj reguligo en la nunaj cirkonstancoj kaj en la nuna tempo estas tre malmulte efikaj, kaj se ni devas nin limigi nur per malgrandaj, partaj preformoj, — multe pli grandajn perspektivojn montras al ni la regiono de la konstrueblo de nova lingvo, kies aperon antaŭdifinas la tuta progreso de l'homaro kaj de ĝia kulturo.

La nuntempa stato de la tekniko, kulturo kaj industriigo entenas en si sendubajn remisojn por la apero de la tutmonda internacia lingvo. En la tuta mondo, kun ĉiam pli kreskanta rapideco, sur la bazo de la komunaj metodoj en la ekspluatado de la naturfortoj kaj en la maŝinapliko — kreiĝas samformaj laborkutimoj kaj metodoj. Ne plu ekzistas iu kontinento aŭ lando, kiu ne partoprenus en la tutmonda ekonomio kaj trafiko.

Sed pro la foresto de komuna — de ĉiuj akceptita — lingvo en granda grado perdiĝas la ebleco utiligi niajn teknikajn atingaĵojn en regionoj de la kunligo kaj transdono de la penso.

Telegrafo kaj telefono, radio-telegrafo kaj radio-telefono povas transdoni la homan penson, esprimitan per vortoj, trans miloj da kilometroj — de unu monda ekstremaĵo al alia, — sed foresto de la tutmonda lingvo tro ofte malhelpas nin en la utiligado de la sin prezentantaj vastaj eblecoj.

La kolose progresintaj mondrilatoj kaj rimedoj de la trafiko, ĉe la fakto, ke ĉiuj landoj partoprenas en la tutmonda mastrumado, estas per si mem sufiĉa premiso por konfirmi la maturiĝintan bezonon de tutmonda lingvo. Ni do havas nenian rajton ignori la reale ekzistantan kaj senĉese kreskantan bezonon de la internacia, tutmonda lingvo.

La fakto, ke ekzistas la laborista «Internacio», montras al ni, ke, pro multaj objektivaj kialoj, iu serioze kaj mondskale entreprenas la unuigon de la socia mastrumado. Post la efektivigo de tiu ĉi unuigo, krom la klasaj limoj, nepre falos ankaŭ limoj regnaj. Devos fali ankaŭ la nun ekzistantaj okcent «lingvolimoj» inter la popoloj.

Kiel unu el la bazelementoj de ĉiu aparta kapitalisma regna organismo estas regna lingvo, oficiala interne de la regno por la regnaj institucioj kaj civitanoj (malgraŭ tio, ĉu ĝi al ĉiuj estas la gepatra, aŭ ne) kaj elektita por servi kiel batalilo kontraŭ la alilanda konkurado en la propra merkato. Similekzemple por la tutmonda organismo, por monda ekonomia sistemo, teknike kaj ideologie estas bezona komuna tutmonda lingvo. La problemo de tiu mondlingvo devas esti nepre starigita per la forto de aktualaj cirkonstancoj.

Se la politika «Internacio» estas bezono de la multaj milionoj el ĉiuj landoj, la sama bezono kreas ĝeneralajn objektivajn premisojn por la kreo de tutmonda lingvo.

Tiamaniere, antaŭ la aplika lingvoscienco konturiĝas nuntempe tasko pli komplika kaj vasta, ol tiuj, kiujn solvis P a n i n i en Hindio kaj la hispanaj jezuitoj en Brazilio.

La problemo de la internacia, tutmonda lingvo stariĝas plenkreske antaŭ la nuntempa homaro.

Kaj se ni venas al konkludo, ke malgraŭ ĉiuj ekzistantaj objektivaj premisoj, en la nuna momento, pro la fakto de la nuntempa lingva tradicio, ni ne povas esperi baldaŭan asimiliĝon de la ekzistantaj lingvoj kaj baldaŭan formiĝon de unu komuna internacia lingvo — ni devas esplori per kiaj rimedoj de la arta interveno kaj reguligo ni povus plirapidigi ĉi tiun procedon de la formigo de nova tutmonda lingvo.

La starigitan problemon ni devas disigi per ekzaktaj limoj kaj esplori laŭ du diversaj pozicioj: 1. ĉu estas eble akceli la asimiliĝon de

la ekzistantaj lingvoj, t. e. ilian internaciiĝon, kaj 2. ĉu estas eble jam nun efektivigi iun internacian lingvon, konforman al la nuntempa kulturo kaj tekniko kaj al la moderna vivmaniero.

**Rimedoj de organizita akcelo de la lingva internaciiĝo**

Jam la ekzisto en niaj literaturaj lingvoj de tiaj artaj reguliloj kiel alfabeto, ortografio kaj gramatikaj reguloj — porparolas tion, ke ne estas esceptita ebleco de la organizita interveno en regionon de la literaturaj lingvoj por ilia evoluigo kaj speciale por ilia internaciigo. Por tiu celo unuavice devus esti forigitaj kaj laŭeble malfortigitaj la influoj, haltigantaj la internaciiĝon: 1. la lingva tradicio, 2). specialaj alfabetoj kaj 3. gramatiko.

Sekvantaj bazaj rimedoj ĉiukaze povus esti efektivigitaj mondskale, rilate al ĉiuj literaturaj lingvoj:

a) simpligo de ortografio,

b) unuigo de la literaro sur la internacia bazo de latina alfabeto,

c) internaciigo kaj interproksimigo de la terminaro por diversaj sciencoj kaj sciencaj disciplinoj,

d) enkonduko de la samaj nomoj por mezuriloj, diversaj normigiloj ktp.

La enkondukon de tiuj efikiloj devus antaŭiri esploroj kaj eltrovoj de la koncernaj sciencaj organoj.

Ke la nomitaj rimedoj estas fakte bezonaj kaj tute senĝene efektiveblaj —atestas tion, kiel parta efektivigo de tiuj rimedoj en diversaj landoj kaj ĉe diversaj popoloj, tiel ankaŭ senĉesaj kaj ĉiulandaj provoj de ilia plua efektivigado.

En la rusa lingvo estis atingita kaj efektivigita tre esenca simpligo de la gramatiko kaj ortografio kaj rezulto de tio estis faciligo de la lerno de tiu ĉi gramatiko mem. En Anglio kaj Usono kelkaj societoj, propagandantaj simpligitan ortografion, batalas jam ne unuan jardekon por la reformo de la angla gramatiko. Simila movado, ne tiom vastdimensia, ekzistas ankaŭ en Germanio. La diverssignaj alfabetoj de diversaj lingvoj tra la mondo komencas esti anstataŭigataj per latina alfabeto. Paralele kun la serboj, ĝis nun uzantaj «cirilan» alfabeton, la samlingvaj al la serboj kroatoj uzas por tiu ĉi lingvo latinan alfabeton. Ĉiuj serbaj lernejoj instruas la uzadon de la kroata latina alfabeto. Multaj japanaj kaj ĉinaj tekstoj, same kiel sanskritaj, estas nuntempe presataj per latinaj literoj. En Japanio la societo «Roma-dzi», propaganta latinan alfabeton, havas centmilojn da adeptoj kaj eldonas siajn specialajn ĵurnalojn. Lastatempe en Azerbajdĵana, Tatara, Krimea, Baŝkira, Kazaka, Kirgiza kaj Uzbeka sovetrespublikoj per la registaraj dekretoj la araba alfabeto estis anstataŭigita per latina. La kunveninta en la jaro 1925 Turkologia kongreso esprimis deziron vidi tiun anstataŭigon efektivigita ĉiuloke inter la popoloj, uzantaj ĝis nun la araban alfabeton.

Ne tiom favora kaj ne tiom brilekzempla estas la progreso en la regiono de la internaciigo de terminaro kaj de la starigo de internaciaj normigiloj. Sed eĉ tie ĉi multaj paŝoj estis faritaj. Kelkaj naciaj koj misionoj por starigo de normigiloj ankaŭ pluraj internaciaj kongresoj jam kunligas kaj kunrezultigas sian sperton. La kunrezultigo de tiu ĉi sperto nepre finkondukos kiel al samformaj normigiloj, tiel same a samforma teknikaterminaro.

La ĉi supre nomitaj, kompare facile efektivigeblaj rimedoj, malgraŭ ilia relativa negraveco, plirapidigos la procedon de internaciiĝo ĉe la ekzistantaj lingvoj. Sed plirapidigante ĉi tiun procedon, ni tamen ne povasn kaj ne devas esperi la baldaŭan kaj finan kuniĝon de la lingvoj. La fina internaciiĝo kaj unuiĝo de la lingvoj sekvos nur kiel rezulto

de la fina internaciiĝo kaj unuiĝo de la ĝis nun ekzistantaj diversformaj labormedio kaj vivo.

Problemo de la internacia helpa lingvo

Nun ni turnu nin al la dua, supre de ni starigita demando: ĉu estas eble jam nun akcepti iun internacian lingvon, kiu konformiĝus al la nuntempaj bezonoj, kulturo kaj tekniko.

Konsiderante ĉion suprediritan pri la dependo de la lingvo de certaj cirkonstancoj de la vivmaniero kaj de la labora medio, ni devas tuj fari konkludon, ke se estus formebla simila internacia lingvo, — oni farus ĝin neniaokaze kiel unu solan tutmondan lingvon, por kies ekzisto ne estas ankoraŭ sufiĉaj premisoj. Ni povas paroli nur pri la akcepto de lingvo helpa (ekskluzive literatura), destinata por la internaciaj rilatoj. Simila helpa lingvo devus servi kiel siaspeca organiza akomodilo al la ekzistantaj senĉese kreskantaj rilatoj inter apartaj landoj kaj popoloj.

La formigo de simila «dua lingvo» en speco de certa lingva surkonstruaĵo, kontentiganta la ekzistantajn bezonojn por la tutmonda internacia lingvo, metos tiun lingvon en staton sendependan de la influo de apartaj vivtradicio kaj vivkondiĉoj de diversaj popoloj. Helpa, «dua por ĉiuj», ne natura (kaj ne popola) lingvo ricevos eblecon de regulplana evoluo, konforme al la specialaj taskoj antaŭ ĝi metitaj.

Por ĉiu homo «la dua» lingvo, ĉu lingvo de iu alia popolo, ĉu iu lingvo artefarita, kiel Esperanto, — estos aldona interligilo, ne forigganta lian propran nacian (popolan) lingvon. Uzadon de tia dua helpa lingvo la homo akiras — malsame de la lingvo popola — tute konscie, kun la difinita celo faciligi interkomprenon kun personoj, kiuj ne komprenas lian nacian lingvon.

Tia konscia ekposedo de la dua helpa (literatura) lingvo forigas de la lingvo minacon, ke ĝi dialektiĝu, ĉar ĝia ĉefa regulilo estos la komuna literaturo kaj ne la tradicia parola uzado.

En tiu rilato ĉiu homo povas havi propran, ordinare unu nacian lingvon kaj krom tio kelkajn helpajn, la duajn lingvojn.

La enkonduko de tia internacia helpa lingvo, konstruita pro konsidero de la faktoj de internaciiĝo en la modernaj liñgvoj, devas esti necesa interspaca kunliganta ŝtupo inter la kulturoj de diversaj popoloj, kaj devas plirapidigi la direktatan per la historio procedon de l'internaciiĝo.

La internacia helpa lingvo en niaj vivcirkontancoj devas esti lingvo de transira periodo, kiam ŝanĝiĝas la malnovaj mastrumaj kaj ekonomiaj rilatoj, kiam la malnovo ne estas ankoraŭ tute mortinta, kiam konservas sian forton kaj sian signifon apartaj naciaj lingvoj, sed kiam samtempe kun la dirito, naskiĝas kaj kreiĝas nova kulturo, novaj mastrumaj rilatoj.

Ĉefaj postuloj, starigataj antaŭ la internacia lingvo

Simila helpa internacia lingvo, evidente, devas esti:

a) facile akirebla por diversaj popoloj (sekve konstruita el elementoj, konsiderantaj ĉiujn esencajn flankojn de la ekzistantaj tradicioj kaj de la laŭplana internaciigo);

b) racia; similanta al ĝuste funkcianta mekanismo por transdono de l'parolo; preciza laŭ la konstruo; senescepta kaj simpla, konforma al la bezonoj kaj taŭga por uzado de vastaj popolamasoj;

c) esprimanta ankaŭ nuancojn de lingvoj naciaj, t. e. akomodebla al la tradukoj.

La arte konstruita internacia lingvo devas esti plene akomodebla al la nuntempaj bezonoj kaj vivmaniero. Simpla, laŭ skema gramatiko kaj koncerna kolekto da leksika materialo devas en granda mezuro simpligi kaj faciligi ĝian lernadon, kompare kun naciaj, naturaj lingvoj.

**Neebleco de la akcepto de iu natura lingvo por la internacia**

La supraj postuloj, kies starigo antaŭ la internacia helpa lingvo estas nepra, per si mem esceptigas ĉiun penson pri tio, ke kiel internacia lingvo povus esti akceptita iu el la naciaj naturaj lingvoj.

La lingvo internacia devas esti facile akirebla, facile komprenebla por ĉiuj nacioj egale. Ĝi devas esti elementa, simpla, fleksebla kaj facile lernebla en la plej altaj gradoj, akomodita per la nuntempaj vivkondiĉoj kaj vivpostuloj.

Sed la formoj de ĉiuj naturaj (ankaŭ de literaturaj) lingvoj estas malfacile akireblaj, postulas por sia plena kompreno penetron en la vivtradiciojn de la koncernaj popoloj kaj entenas en si tiun historian surbolaĵon, kiun la popoloj renkontis sur la vojo de sia evoluo.

Estas neniel mirinde, ke la angloj dezirus vidi tutmonde akceptita internacia lingvo sian anglan, la francoj — francan, la germanoj — germanan ktp. Tute nature ĉiu homo preferus uzi kiel tutmondan tiun lingvon, kiun li plej bone posedas, kiun li plej ofte uzas kaj al kiu li plej bone alkutimiĝis.

Sendube, la enkonduko de iu el la ekzistantaj lingvoj por la rolo de la tutmonda helpa lingvo kreus por la respektiva nacio kaj ĝiaj anoj multajn privilegiojn. Pro tiu ĉi simpla konsidero, la samaj kialoj, kiuj instigas por la celoj de la ekonomia superrego disvastigi «sian» lingvon, — instigas ankaŭ ĉiumaniere kontraŭstari al la disvastigo kaj enradikigo de la «fremda» lingvo.

Tiu ĉi ekonomia momento, kune kun la fakto de la malfacileco kaj komplikeco de la ekzistantaj lingvoj, paralizas antaŭtempe ĉiujn penojn enkonduki iun nacian lingvon kiel ĝenerale devigan kaj solan lingvon de la internaciaj rilatoj.

Oni kelkfoje provas montri, ke la homaro, nuligonta la diferencon inter nacioj premantaj kaj premataj, organizonta novan soci-ordon sen ekspluatantoj kaj ekspluatatoj, — povus facile akcepti kiel lingvon komunan, internacian iun ajn nacian lingvon—ĉu anglan, ĉu francan k. t. p.

Tamen tia supozo neniagrade konformus al la senco de justeco kaj egaleco inter la nacioj. L e n i n asertis, ke «naciaj kaj ŝtataj diferencoj inter popoloj kaj landoj... estos ekzistantaj ankoraŭ tre kaj tre longe eĉ post la efektivigo de proletara diktatoreco en la skalo tutmonda» (vol. XVII, p. 178). «Nek unu privilegion havu iu nacio, iu lingvo!» — skribis L e n i n en sia artikolo «Laborista klaso kaj la nacia problemo» (vol. XVI, p. 389). Estas evidente, ke ĉe efektivigo de la konjekto pri ĝenerala akcepto de iu natura lingvo — tre longe ankoraŭ iu certa nacio ĝuus certajn prerogativojn kaj povus ŝpari la tempon, kiun la aliaj nacioj uzus por studo de tiu elektita lingvo.

Tial ankaŭ J. S t a l i n, plej bona marksista konanto de la nacia problemo, asertis, ke «la estonta komuna lingvo estos nek rusa, nek germana, sed io alia.» ([43]).

Por solvi la problemon pri unu tutsola lingvo komuna eĉ tiuj ĉi aŭtoritatoj de la moderna marksismo konjektas, ke devos okazi io tute alia ol akcepto de «iu natura popola» lingvo por la internacia uzado.

**Neebleco adopti iun lingvon mortan latinan kaj grekan**

La aserto pri la malfacileco kaj komplikeco de la naturaj lingvoj rilatas ankaŭ ĉiujn tiel nomatajn mortajn lingvojn — unuavice la latinan kaj antikve-grekan, kiuj estas neŭtralaj — ne apartenantaj al iu aparta popolo, sed kiuj estas tute fremdaj por la modernaj tekniko kaj kulturo, mortaj por la nuntempa vivo kaj vivkutimoj. Efektive, en la latina lingvo forestas esprimoj por la nuntempaj ideoj: naztuko, telegrafo, lokomotivo kaj por ĉio tio, kio estas esenca en nia moderna civilizacio.

El la frazo: «prenu el la poŝo naztukon kaj viŝu la pantalonon» restas konataj en la latina lingvo nur: «prenu kaj viŝu».

Krom tio la tuta lingvostrukturo, longaj gramatikaj periodoj el Cicerono, plej bone konformaj al la socia vivtradicio de la antikva Romo, ŝajnos absurdaj en nia tempo de maŝinoj, kronometroj kaj ekzakte kalkulitaj movoj. Latina kaj antikva greka lingvoj mortis kune kun la vivtradicioj de tiu epoko, kiam ili ankoraŭ estis lingvoj «vivantaj». Revivigi ĉi tiujn lingvojn ne estas eble, samkiel sensence estus peni kaj neeble revivigi la vivmanierojn de la epokoj de Cicerono aŭ Sokrato.

P. Stojan[40]) citas longan liston da scienculoj kaj profesoroj de la latina lingvo, kiuj rekomendis aplikon de la latina lingvo kiel universala, sed... siajn proprajn studojn ili preferis skribi nacilingve. Ĉiuj tiuj proponoj neniel enhavis ion konkretan, kio ebligus efektivigi revivigon de la mortinta delonge lingvo por la rolo tutmonda.

Analizante diversajn eblajn vojojn por realigi la internacian universalan lingvon, ni konstatis, ke neniu «natura» lingvo (ĉu «morta», ĉu «vivanta») povas esperi sukcesi en tiu rolo. Do restas la sola elirvojo— provi helpi al realigo de tiu internacia lingvo per iu rimedo revolucia, arta, konscie organizata.

Kaj la homara genio jam delonge perceptis eblecon de tia vojo. Pri la serĉadoj tiurilataj, pri la faritaj eltrovoj, eksperimentoj, provoj— rakontas la sekvontaj ĉapitroj de tiu ĉi libro.

---

## III

## LA UNUAJ PROVOJ KAJ PROJEKTOJ DE LA UNIVERSALAJ LINGVOJ ĜIS XVIII. JARCENTO

La artefarita lingvo estas ebla kaj oni povas trovi la sciencon, de kiu ĝi dependas. Kun la helpo de tiu lingvo vilaĝano juĝos pri la esenco de l'aferoj pli facile ol nuntempe juĝas la filozofoj.

René Descartes. 1629

La ideo pri la universala lingvo estas unu el la plej fruaj ideoj, kiuj okupis la historian homaron. Ĝi estas fakto tre natura. Interrilatante kun la fremdlingvaj popoloj, la homoj ofte vidis en la malsamlingveco nevenkeblan baron. Eĉ la prahomo de la plej grizaj fruepokoj devis senti la utilecon de l'ekzisto de iu ĝenerala, komuna lingvo, kiun ĉiuj homoj povus kompreni kaj uzi.

Ne komprenante kiamaniere okazis tio, ke la laŭvide samaj anoj de la tuthomara familio parolas lingvojn malsamajn, malhelpantajn la ĝeneralan interkompreniĝon, la antikva homo povis klarigi tion nur kiel punon, senditan de dio al la homoj. Sed kia krimo povis kaŭzi tiom kruelan punon por la homaro?

Tiu ĉi ideo ĉe la antikvaj — verŝajne eĉ ĉe la prahistoriaj — popoloj akceptis formon de bela legendo pri la «Babela turo» kaj «malsamiĝo de la lingvoj». La biblio, same kiel ankaŭ la persaj kaj asiriaj legendoj(40) rakontas ke la homoj, havante unu ĝeneralan lingvon kaj tial sentante sin potencaj, ekrevis atingi la ĉielon; kaj la dio, decidinte ne nur puni ilin, sed ankaŭ senigi ilian potencon, faris la malsamiĝon de la lingvoj. La homoj, ne plu interkompreniĝantaj, ne povis efektivigi sian grandiozan projekton. Tio, kion oni estis povintaj entrepreni per ĉies komunaj fortoj, ne estis efektivigebla pro ilia diseco.

**Profeto Zefaniah** En la tempo de la historia prosperado de Judio, unu el la bibliaj profetoj, Zefaniah, en la VII. jarcento antaŭ nia ero, aŭguris la redonon de unu komuna, «purigita» lingvo al la homaro. (Biblio, Zefaniah, ĉap. 3, v. 9).

**Galenus** Ekzistas historiaj notoj, ke en la II. jarcento de nia ero la roma filozofo kaj medicina scienculo Claudius Galenus (nask. en la jaro 131) ankaŭ konstruis iun sistemon de signoj por preciza komuniko de diversaj ideoj(40).

**Abatino — Hildegardis** Laŭ la konserviĝintaj analaj notoj, unu el la mezepokaj gravuloj de la eklezio, la abatino de la monaĥinejo de Rupertberg apud Bingen, Hildegardis[1] (1098—1178), aŭtorino de serio da natursciencaj verkoj, prilaboris eĉ la tutan sistemon de universala skriba kaj parola

[1] J. Schmelzeis, «Das Leben u. die Werke der h. Hildegardis», Freiburg, 1879.

lingvo: tiu ĉi «Ignota lingua per simplicem hominem Hildegardem prolata» memorigas laŭ sia strukturo pli malfruajn projektojn de la XIX. jarcento. Ĝia alfabeto havis 32 literojn. La plimulto de la vortoj (substantivoj) finiĝis per z.: a i g o n z — dio, aiganz — anĝelo, p a r i z — patro, m a r i z — patrino, j u z — homo ktp. La tuta vortaro enhavis ĝis 900 vortojn.

Tute prave, neante iun valoron de tiu ĉi «nekonata lingvo de Hildegardis parolata», L. E i n s t e i n[1] konjektas, ke la tuta verkaĵo, kreita dum la periodo de la krucmilitoj, devis servi kiel nova pentekosta miraklo por religia entuziasmigo de la tiutempa malklerularo.

Balaibalan

Araba ŝejko M o h y i e d d i n en la XI. jarcento de l'islama heĝiro (XVI. jarcento de nia ero), kiel diras la tradicio, ellaboris universalan lingvon «Balaibalan[2]». Bedaŭrinde la detaloj de lia lingvo ne ĝisvivis nian epokon.

Latino macaronico

Vivinta en la j. 1491—1544 monaĥo Teofilo Hieronimo F o l e n g o simpligis skolastikan latinon, kompletiginte ĝin per ĉiutage uzataj popolvortoj, vulgaraj kaj ordinaraj esprimoj. N o d i e r[3] citas eĉ specimenon de tiu nova lingvo: «Vado per hunc boshum solus chiamando zaninam, ut chiamat vitulum vacea smarrita summu». Ĝi estis kvazaŭ— provo refirmigi la poziciojn de la latina lingvo, kiel «lingvo monda». Estis provo ĝin adaptigi al la bezonoj de la XVI. jarcento. Tamen la provo neniel sukcesis kaj estis forgesita.

Nostradamus (1555)

Malkovro de novaj kontinentoj, pliviġligo de la okcident-orienta trafiko devis veki la komprenon pri neceso de iu nova universala lingvo, taŭga por uzado de diversaj nacioj. Kiel esprimanto de tiu vekita komprenо venis la mezepoka kuracisto kaj astrologo Michel N o t r e-D a m e (N o s t r a d a m u s), antaŭdirinta en sia verko «Centuries» (Lyon, 1555) aperon de nova kultura lingvo inter latinaj kaj orientaj popoloj(40).

XVII. jarcento

Pli vigle atenti la problemon de la universala lingvo oni komencis en la XVII. jarcento, en la epoko, kiam pograde formortadis la mezepoka latina lingvo kaj kun ĝi la skolastiko.

Ankoraŭ la granda hispana humanismano V i v e s en X libro de sia verko «De disciplinis» (1532 j.) skribis: «Estus avantaĝo por la homaro, se ekzistus nur unu sola lingvo, kiun ĉiuj popoloj povus apliki... Tiu unueca lingvo estu bonsona, bonformita kaj esprimoriĉa... Pereus iam la lingvo latina, tiam rezultus el tio konfuzego en ĉiuj branĉoj sciencaj kaj artaj, kaj grava fremdiĝo inter la homa gento». [4]

Kelkaj gravaj kaj brilaj pensuloj de tiu epoko, fondintaj la empiriajn kaj praktikajn sciencojn de la epokoj sekvintaj, haltigis sian atenton ĉe la problemo de la universala lingvo, kaj pro konsideroj racionalismaj akceptis la eblecon de ĝia artefara kreo, iafoje eĉ prilaborante la fundamentojn de tia artefarita lingvo.

La XVII. jarcento estis jarcento de la decidplena trarigardo por ĉiuj antaŭaj scioj kaj opinioj. La plej saĝaj kapoj de l'homaro konvulsie serĉis la vojojn al kiel eble plej bona konstruo de la homa vivo. La juna, venanta al potenco sociklaso — la urbanaro, la burĝaro deziris sin bazi ne sur abstraktaĵoj, nek sur tradicioj, sed sur vera realaĵo. La nova scienco de tiu siatempe fortoplena sociklaso estis penetrita de l'kredo je siaj fortoj kaj bonŝancoj.

---

1 L. L. Einstein, «Frühere Weltsprache-Versuche» en «Rund um die Welt (Zi vol lölik)». Wien-Berlin 1888, III j., n-o 3, p. 35—38 (47 .)

2 F. Bergmann, «Résumé d'études d'ontologie génerale et de linguistique génerale». Paris, 1875, p. 422.

3 C. Nodier, «Du langage factice, appelé macaronique», Paris, 1834.

4 «Internacia Pedagogia Revuo», Dresden, 1930, № 4—6, p. 75—47.

La scienculoj, pro la relativa limigiteco de l'tiutempaj scioj, estis samtempe teknikistoj, fizikistoj, matematikistoj, filozofoj kaj lingvistoj. Ili akrasente perceptis la mankojn en la ekzistantaj lingvoj, kreskintaj kiel naturelementoj kaj nur iomgrade cedintaj al la organiza efiko de l'homa racio. Ili opiniis tute ebla faro—anstataŭi la elemente-kreitajn lingvojn per pli perfektaj kaj pli raciaj iloj por la transdono de l'homa penso. Tiu pli perfekta lingvo, laŭ ilia opinio, jam sole pro siaj ecoj kaj perfektaĵoj, devus forigi kaj anstataŭi la lingvojn naturajn.

**René Descartes (1629)**

Unu el la unuaj, René Descartes (elp. René Dekart) en sia letero de la 20-a de novembro 1629, al abato Mersenne[1], responde al la demando pri la universala artefarita lingvo, konfirmas la opiniatan eblecon krei tian lingvon kaj eĉ skizas ĝian ĝeneralan skemon:



Statuo de R. Descartes, skulptita de Nieuwerkerke, en Tours, Francio

«Tiu lingvo havus nur unu specon de konjugacio, deklinacio kaj vortkonstruo. Ĝi tute ne havus la formojn neplenajn aŭ neregulajn, aperantajn pro nia kutimo al kripligo. La ŝanĝo de la verboj kaj la vortkonstruo devus esti formataj per afiksoj, aldonataj al la komenco aŭ finiĝo de l' radikvortoj. Ĉi tiuj afiksoj troviĝus en la ĝenerala vortaro. Eĉ la simplaj kapoj, uzante ĉi tiun vortaron en la daŭro de ses monatoj, libere ekposedus la similan lingvon.»

Tiuj ideoj de Descartes brile formulas la principojn en la konstruo de la plej bonaj modernaj sistemoj de la artefaritaj lingvoj. Tamen el la posta parto de la letero de Descartes evidentiĝas, ke la universala lingvo en lia percepto—estis io simila al logika ŝlosilo por la homaj ideoj. Ĝi estas filozofia sistemo aprioria, neniel ligita kun la ekzistantaj naturaj lingvoj kaj ties konstruo.

Descartes pensis, ke—

«oni devus starigi metodan sistemon por ĉiuj pensoj - ideoj, simile al la metode starigita ordo por la natura vico de la nombroj. Samkiel oni povas en unu tago lerni en iu nekonata lingvo nomi kaj skribi ĉiujn nombrojn ĝis senfineco, la nombrojn, kiuj ĉiuokaze estas senfina vico da vortkombinoj, samtiel devus esti eltrovita la ebleco konstrui ĉiujn vortojn, necesajn por esprimi ĉion, kio venas kaj povas veni en la homan cerbon. La eltrovo de tiu lingvo dependas de la vera filozofio. Nur ĝi povus nombri ĉiujn pensojn - ideojn de la homoj kaj klasifiki ilin per sistema ordo, samtempe farante ilin klaraj kaj simplaj. Ĉio dependas de la eltrovo de tiuj simplaj ideoj, kiuj estas propraj al la percepto de ĉiu homo kaj el kiuj sin kombinas ĉio, kion la homoj pensas...»

---

1 R. Descartes, «Oeuvres complètes», Paris 1897, édition Cerf, v. I, pĝ. 76 [45]. Pri M. Mersenne kaj pri liaj ideoj rilate al la eventuala mondolingvo vidu lian duvoluman verkon «Harmonie universelle», Paris, 1636-1637.

Ankaŭ alia fama filozofo, L e i b n i t z, volis montri la vojojn por starigo de la tutmonda lingvo. Siajn ideojn la juna, tiutempe dudekjara L e i b n i t z esprimis unuafoje en la jaro 1666 per la lingvo latina, en la disertacio pri la arto de la kombino [1]. **Leibnitz (1666)**

L e i b n i t z postulis de la artefarita lingvo kiel eble plej grandan filozofiecon. Li revis pri la lingvo «ilo de l' racio». La vortoj devus ne nur esprimi la ideojn, sed ankaŭ fari okulvideblaj iliajn korelativecojn, t. e. ebligi ilian derivadon per algebraj transformoj kaj anstataŭigi la rezonadon per formuloj.

La konstrubazoj de tiu ĉi «logika algebro» troviĝis en la aksiomo: ĉiuj komplikaj ideoj estas kombinaĵoj el ideoj simplaj, same kiel ĉiuj divideblaj nombroj estas rezultoj de la multobligo de la nombroj nedivideblaj. La interkunigo de la ideoj estas analogia al la matematika multobligo, kaj la disigo de la ideo je ties simplaj elementoj estas analogia al la disigo de iu nombro je ties primariaj produktantoj. Se ni figuros la simplajn ideojn per nedivideblaj nombroj, tiam la ideoj komplikaj estos rezulto de ĉia ilia multobligo. Estas klare ke ĉiam oni povas trovi sufiĉan kvanton da nedivideblaj nombroj por kiu ajn granda nombro da simplaj bazideoj. Tiamaniere ĉiuj logikaj veraĵoj estus figurataj per veraĵoj aritmetikaj [2].


Leibnitz

Ĉe disvolvo de tiuj siaj ideoj L e i b n i t z havis certajn antaŭirintojn, inter kiuj ŝajne plej rimarkinda estis la mezepoka filozofo Raymund L u l l (1235—1315), provinta en formo de kabala alfabeto doni tabelojn de universalaj principoj kaj klasojn de ideoj [3]. C. B a u e m k e r konstatas, ke ankaŭ pli malfrue la samaj provoj de sistemigo kaj klasifiko de ideoj estis farataj de Agrippa v o n N e t t e s h e i m, Giordano B r u n o, J. H. A l s t e d — instruisto de J. A. K o m e n s k i k. a. [4]. Similaj ideoj okupis ankaŭ la grandan matematikiston B. P a s c a l, kiu en sia verko «Traite du triangle arithmetique» (Paris 1665) parolas kelkloke pri la kombinatoriko parenca al la ideoj de L e i b n i t z ([40]).

Se R. D e s c a r t e s donis sole la ideon de la konstruo de logika, filozofia lingvo, L e i b n i t z jam montris konkretajn manierojn de tiu ĉi konstruo.

---

[1] Leibnitz, «Opera omnia», Genève, 1768, v. VI, pĝ. 267 (45).

[2] Ĉi tiuj ideoj de la genia Leibnitz pli poste estis disvolvitaj de tuta vico da logikuloj. Nuntempe la «algebro de logiko» — matematika logiko, atingis sufiĉan gradon de disvolviĝo. Stanley Jevons eĉ konstruis specialan logikan maŝinon. Se oni prenas per la klavaro de tiu ĉi maŝino la bazajn «premisojn», oni povas facile ricevi ankaŭ ĉiujn deduktojn kaj «konkludojn». Sian pluan evoluon la matematika logiko ŝuldas al la laboroj de B. Russell, kiu sukcesis sufiĉe ampleksigi la regionojn de la matematika logiko (logiko de l'klasoj kaj rilatoj). La deduktoj de la matematika logiko faris profundan influon por la solvo de kelkaj plej malklaraj problemoj de matematiko.

[3] «Raymundi Lulli opera en quae ad adinuem tam ab ipso artem universalem scientarum artiumque omnium brevi compendio etc...» Argentinae, 1592.


[4] «Allgemeine Geschichte der Philosophie». Leipzig, 1909.—C. Bauemker, «Die Europaeische Philosophie des Mittelalters», p. 367.

Sed ĉar la matematika maniero de ideesprimado ankoraŭ ne povis doni la sonan formon de la lingvo, tial L e i b n i t z samtempe supozis figuri siajn logikajn ciferajn formulojn per certaj sonkombinoj.

Li projektis la naŭ ciferojn anstataŭi per naŭ konsonantoj de la latina alfabeto: b, c, d, f, g, h, l, m, n, kaj la pluajn klasojn (1, 10, 100, 1000, 10 000) per kvin vokaloj: a, e, i, o, u. La unuojn de la pli altaj klasoj li projektis figuri per diftongaj kunmetaĵoj. Kiam estus bezone, ĉe la simila anstataŭo, elparoli aŭ skribi iun nombron, sufiĉus elparoli la konsonantojn de la nombroj de unuoj en ĉiu klaso en la kombino kun la vokaloj, karakterizantaj la koncernajn klasojn. Ekzemple la nombro okdek unu mil tricent sepdek kvar estus skribata kaj elparolata laŭ la sistemo de L e i b n i t z: «mubodilefa».

La ideo pri la universalaj skribsignoj okupis la grandan pensulon ĝis lia morto; sed la nevenkeblaj baroj en la prilaboro de la logika lingvo konfuzis L e i b n i t z - on kaj malhelpis al li prilabori ĝis la fino tiun projekton [1].

Necesas mencii ankoraŭ alian kampon de lingvoprojektado, en kiu laboris L e i b n i t z, sed kiu restis ĝis lasta tempo malmulte konata. L e i b n i t z postlasis grandan amason da manuskriptoj, neniam eldonitaj, konservataj nun en la biblioteko de Hanovero.



Jan Amos Komensky (Comenins)
(1592—1670)

En la j. 1901—1903 L. C o u t u r a t laboris en tiu biblioteko kaj sukcesis publikigi el la manuskriptoj de L e i b n i t z du volumojn kun 1300 paĝoj; tamen restis ankoraŭ 1000 paĝoj ne publikigitaj, temantaj ekskluzive pri la problemo mondolingva.

El tiuj neeldonitaj manuskriptoj evidentiĝas, ke L e i b n i t z, projektante racian matematikan lingvon, samtempe provis konstrui praktikan internacian lingvon sur bazo de la latina kun multe simpligita regula gramatiko. Tiu ĉi projekto estis ellaborita sufiĉe detalej sed neniam ĝi estis publikigita ka, tial forgesita ([40]).

**Jan Amos Komensky**

La plej granda ĉeĥa scienculo, filozofo kaj pedagogo, J a n A m o s K o m e n s k y, en la dua duono de la sama XVII jarcento en sia libro «Via lucis» [2] (1641 j.) profetis la tempon, kiam la homaro ĝuos la uzadon de universala helpa lingvo, nekompareble pli facila kaj akirebla, ol niaj lingvoj naturaj. Pri la sama ideo li parolis ankaŭ pli malfrue en la V-a parto «Panglottia» de sia verko «Panaugia» [3] (1662). Tamen de tiu ĉi verko konserviĝis nur apartaj fragmentoj.

**A. Kochansky**

Fama pola scienculo matematikisto A d a m A d a m a n d y K o c h a n s k y (1631—1700), bibliotekisto de la reĝo Jan III. So-

[1] Vidu leteron de Leibnitz, skribitan du jarojn antaŭ lia morto al Remond de Montmort, en «Opera omnia», Genève, 1768, v. V., pĝ. 7, 8. ([45])

[2] Ĝis nia tempo konserviĝis nur 3 ekzempleroj de tiu ĉi verko—en Praha, Oxford kaj Hamburg.

[3] Dr. Jan Novak, «Jan Amos Komensky», Praha, 1921. ([47])

bieski, en siaj verkoj, skribitaj en la jaro 1680, prituŝis ankaŭ la problemon de universala lingvo. En tiuj verkoj, ĝis nun aperintaj presite nur en citaĵoj, li diras pri laboroj de A. Kircher kaj starigas bazajn principojn por konstruo de simpligita lingvo. S. Dickstein eĉ asertas, ke Kochansky mem prilaboris sistemon de universala lingvo [1].

P. Stojan (⁴⁰) citas titolon de la koncerna verko de Kochansky — «Catalogus inventorum singularium».

Ankaŭ en la interkorespondo de Kochansky kun Leibnitz (1691—94) renkontiĝas lokoj, rilatantaj la ideon de universala lingvo.

Descartes kaj Leibnitz estis la fondintoj de la ideo pri la kreo de filozofia lingvo. Ankaŭ ili la unuaj teorie bazis la dezirindecon krei la tuthomaran lingvon. Sed jam antaŭ ili montriĝis apartaj provoj konstrui lingvojn artefaritajn.

Inter tiuj pioniroj de la nova ideo ni renkontas la nomojn de la plej famaj scienculoj kaj pensuloj, samkiel la nomojn de personoj, kiuj por ĉiam malaperis el la memoro de l' homoj.

Grandparto de la unuaj projektoj de artefaritaj lingvoj estis konstruata laŭ la ĝeneralaj bazaj premisoj pri la nesufiĉa logikeco en la konstruo de la ekzistantaj lingvoj kaj pri la ebleco de sintezo de la tuta kvanto da homaj ideoj kaj imagoj el iu nombro da bazaj «pensideoj» kaj «pensradikoj». Tiutipaj sistemoj estis komplete artefaritaj, elpensitaj de siaj aŭtoroj, kaj la ĉefa celo estis provo krei logike unuigitan sistemon da signoj aŭ sonoj kaj eltrovi, laŭ la esprimo de Leibnitz, «alfabeton de homa penso».

Leibnitz en siaj konkretaj proponoj provis utiligi serion da simplaj, nedivideblaj nombroj kaj nombrokombinojn, aperantajn kiel rezulto de la multobligo de la nombroj simplaj. Ĉi tiujn siajn logikajn ciferajn projektojn Leibnitz vestis per certaj sonaj formoj. Li imitis aliaj pliposta j projektintoj de matematikaj lingvoj. Tamen la baza postulo de Descartes kaj Leibnitz — filozofieco kaj logikeco de la lingvo kaj de lingvokombinaĵoj — povis esti efektivigebla eĉ sen la uzo de ciferaj matematikaj formuloj, per la anstataŭo de la ciferoj per iuj aliaj signoj aŭ esprimoj. Tiuj signoj kaj esprimoj siavice povis esti ĉu nur skribaj kaj ne utiligeblaj por la buŝa uzo, ĉu skribaj kaj buŝaj samtempe, do taŭgaj ankaŭ por la homa parolo.

La esenco de la problemo krei logikan lingvon koncentriĝis al efektivigo de certa kiel eble plej ekzakta kaj kompleta klasifiko de ĉiuj ideoj, konforme al certaj bazaj simptomoj.

Siavice, la lingvosistemoj de tiu speco estas jen lingvoj ekskluzive skribaj, aŭ — kiel oni komencis nomi ilin, laŭ la bonkomenco de Maimieux (elp. Majmjé), lingvoj pazigrafiaj, — jen samtempe skribaj kaj parolaj.

**Universala gramatiko**

Kiom forta estis en tiu epoko ĉies celado al racionaligitaj aŭ almenaŭ racie klarigeblaj formoj de la lingvo, oni povas vidi el tio, ke dum la tutaj XVII., XVIII. kaj en komenco de XIX. jarcentoj aperis en Francio specialaj logikaj filozofiaj gramatikoj kaj lernolibroj de la lingvo (laŭ la ekzemplo de tiel nomata «Grammaire générale de Port Royal»). En ĉiuj tiuj gramatikoj, nesufiĉaj por rekonstrui la ekzistantajn lingvojn, estis farataj provoj de kontraŭa maniero — pravigi per logikaj konsideroj kaj postuloj de la racio ĉiujn esceptojn kaj nelogikaĵojn de la ekzistantaj lingvoj. Samtempe estis kreita preskaŭ speciala

[1] «Academia pro Interlingva», Torino, 1924, n-o 4, pĝ. 13, 14. (⁴⁷)

fakscienco, celanta starigi la primariajn formojn de la pralingvo (lingua primaeva), kiu, laŭ la opinio de la tiamaj filozofoj, devis enteni ĉiujn elementojn de la senduba kaj evidenta logikeco kaj filozofieco. Tre riĉa listo de respektiva literaturo, koncerne la problemojn de la filozofia gramatiko kaj primitiva pralingvo, estis aldonita al la libro de Vater (23).

Tre ofte la laboroj, koncernantaj la ĝeneralan lingvofilozofion, la ĝeneralan gramatikon kaj serĉadon de «primitiva lingvo», estis erare klasifikataj kiel laboroj por la kreo de universala lingvo. Similajn erarojn faras eĉ kelkaj esploristoj de la lasta tempo. Bonŝance la necesan klarecon pri la plimulto de similaj laboroj nun liveras la fundamenta verko de P. Stojan (40), en kiu apartaj fakoj estas rezervitaj por logistiko kaj algoritmo (138 verko-nomoj) kaj por universala gramatiko (114 verko-nomoj).

**Kritiko de la filozofiaj sistemoj**

Ĉefa manko de la filozofiaj sistemoj estas ilia abstrakteco kaj teorieco, pro kio la elementoj de similaj lingvoj havas nenian bazon en la nuntempa vivo kaj dependas nur de persona plaĉo de iliaj eltrovintoj.

Krom tio la filozofiaj lingvoj posedis kelkajn aliajn, tute neeviteblajn organikajn difektojn. Ili estis konstruataj laŭ la erara supozo, ke la tutan kvanton da homaj bazideoj oni povas fari el negranda kvanto da ideoj elementaj, aŭ ke oni povas krei iun absolutan klasifikon de ideoj, senduban kaj tute ekzaktan, sendependan de la persona plaĉo aŭ de subjektiva konsidero de apartaj eltrovintoj.

Kiel rezulto de tia konsidero, la sistemoj de filozofiaj lingvoj prezentas el si serion da rebusoj, kies solvo kaj ĝusta senco ne ĉiam estas kompreneblaj kaj kapteblaj.

La teorioj idealismaj, metitaj en la fundamenton de la projektoj de tuthomara filozofia lingvo, ne povis alkonduki al io alia, ol al malsukceso kaj fiasko.

**La unuaj citoj pri projektoj de artefaritaj lingvoj**

Nuntempe estas jam neeble eltrovi la aŭtoron, kiu publikigis la unua, laŭ la tempo, siajn vidpunktojn kaj projektojn pri la universala lingvo. Episkopo Wilkins, en unu sia libro, dediĉita al la problemo de la prilaboro de tutmonda sistemo de skribsignoj por ĉiuj popoloj kaj de sekreta skriblingvo [1], parolas pri iu «mortinta episkopo», kiu pli frue ellaboris projekton de universala muzika lingvo, bazita sur son- kaj not-kombinoj. Kion prezentis la nomita projekto kaj kiu estis la «mortinta episkopo» — ne estas konate. Povas esti ke ĝi estis Alex Top, la aŭtoro de la libro «The olive leaf» (1603), pri kiu ni trovas citaĵon en franclingvaj fontoj [2].

Ferrari (31) citas Teodoron Bibliander (aŭ Buchmann) kun ties verko «De ratione communi omnium linguarum et litterarum», rilatanta al la j. 1548. Laŭ la atesto de Chr. Breithaupt [3], Bibliander simile al kelkaj pluaj aŭtoroj sin okupis nur pri la problemoj de lingvofilozofio, sekretlingvo kaj pri nenio pli.

P. Stojan (40) konstatas, ke Bibliander traktis ĝeneralajn problemojn de komuna lingvo kaj de ideografio.

Léon Bollack (10) diras pri skizo de tutmonda skribolingvo-pazigrafio de la fama itala matematikisto Nicolo Tartaglia el Venezia, kiun li devenigas el la jaro 1550 kaj el lia libro «Invenzioni diversi». Tamen skrupula trarigardo de tiu ĉi libro (ĝia vera nomo:

---

[1] Wilkins, «Mercury or the secret and swift messenger», 1641.

[2] Vidu: «Bibliothèque de Poche par une Société de gens de lettres», eld. de «Curiosités philologiques», Paris, 1855, p. 6.

[3] Chr. Breithaupt. «Ars decifratoria sive scientia occultas scripturas», Helmstadii, 1737 (46).

«Questii e inventioni diverse», 1554) samkiel de aliaj ital- kaj latin-lingvaj verkoj de tiu ĉi aŭtoro montris nenion, kio konfirmus la komunikon de Bollack.

Ankaŭ P. Stojan ([40]) ne notas iun verkon de Tartaglia. Cetere en sia unua verko «Ars Combinatoria» (1666 j.) Leibnitz citas inter siaj antaŭuloj iun Tartalea.

J. Becher en siaj libroj (vidu pp. 37—39) nomas kiel siajn antaŭirantojn germanan teologon kaj historiiston Johanon Trithemius[1], A. Kircher, alkemiiston Mikaelon Majer kaj Spicelius, kiu estis bona fakulo pri la ĉina skribo. Pri la verkoj de la lasta en tiu regiono ni ne sukcesis trovi iajn materialojn, eĉ en liaj ceteraj verkaĵoj. Same en la verkoj de M. Majer[2] ni trovis nenion, konfirmantan la komunikon de Becher. A. Kircher estas konata de ni laŭ la pli malfrue (1663) aperinta lia libro. Pri Trithemius parolas ankaŭ Herman Hugo[3], kiu citas lian verkon «De poligraphia», evidente laŭ la franca traduko. Tamen en la konataj libroj de Trithemius estas nenio, krom absurda intermikso de la reguloj de sekretskribo kaj de instrukcioj, kiamaniere «per anstataŭo de iuj literoj per aliaj skribi diversmaniere en la sama lingvo». Baillet ([13]) en sia libro, same kiel Breithaupt (en «Ars decifratoria) atestas ke la libro de Trithemius elvokis grandan bruon kaj kaŭzis ke oni komencis suspekti lin, ke li sin okupas pri kabalistiko kaj nekromantio. Post kiam la matematikisto Ch. Boville, traleginte ĉi libron, proklamis, ke li nenion en ĝi komprenas kaj ke ĝi estas entute rezulto de diabla obsedo, la originala libro estis solene forbruligita.

Charma ([7]) citas la libron de Francis Bacon[4], kiu, laŭdire, entenas prilaboron de universala lingvo. Tamen ankaŭ ĉi tie (VI. ĉapitro de I. volumo) estis donitaj nur skemoj de sekreta skribo kun malgravaj aludoj pri la ebleco krei universalan skribon. Estas plej verŝajne, ke Bacon ne transiris la limojn de la penoj koncerne la logikan klasifikon de apartaj aĵoj kaj ideoj. Baillet kaj Harris (en «Hermes...») parolas pri similaj laboroj de Bacon kaj Campanella ĝuste en la fako de logika klasifiko kaj de starigo de la bazoj por filozofia gramatiko.

**Sekretaj skribsistemoj, kodoj, internaciaj stenografioj kaj universalaj alfabetoj**

Tre malnovaj estas la provoj, celantaj sekretigi la skribiton per uzo de iu speciala signaro. Kaj dum la jarcentoj de mezepoko, speciale dum la XVI jarcento, vaste ekfloris diversaj tiurilataj proponoj.

Estis faritaj projektoj de sekreta skribo taŭga nur por unu aparta lingvo. Sed estis facile prezenti similan projekton taŭgan por diversaj lingvoj kaj eĉ por diversaj alfabetoj.

Tiamaniere naskiĝis la universalaj sekretaj skribsistemoj, el kiuj poste venis la ideo pri pazigrafio—universala skribo taŭga por komuniki la pensojn kaj ideojn, ne ligite kun iu ajn lingvo parola kaj natura.

Jam en pli malfrua epoko, de post la jaro 1870, aperis multaj verkoj, celantaj starigon de iu speciala kodo-sistemo por ŝpari la monon ĉe

---

[1] Ni konas la latinan eldonaĵon: Trithemius, «Steganographia ars per occultam scripturam animi sui voluntatem absentibis aperiendi certa», Francofurti, 1608—kaj la francan tradukon: M. J. Tritheme, «Le poligraphie et universelle écriture cabalistique», traduit par Gabr. Collange, Licorne, 1625 ([45]). Kvin aliaj libroj de Thrithemius estas registritaj de P. Stojan ([40]).

[2] Michaele Majero, «Arcana Arcanissima hoc est hieroglyphica aegyptiograeca» ([45]). Stojan ([40]) notas kiel eldonjaron de tiu ĉi libro la jaron 1614.

[3] Herman Hugo, «De prima scribendi origine et universa rei literarie antiquitate», Antverpiae, 1617 ([45]).

[4] Fr. Bacon, «De dignitate et augmentis scientarum», 1624 ([45]).

telegrafaj rilatoj. Fakte tiuj kodoj, se ili estas rezervitaj por uzado ne nur unulingva, sed kelklingva, prezentas el si laŭesence certajn universalajn pazigrafiojn, destinitajn por uzado en specialaj okazoj (ĉe la telegrafado).

P. Stojan (40) donas liston de proksimume 50 kodsistemoj, ĉefe destinitaj por unulingva uzado.

Same antikvaj, kiel la provoj sekretigi la skribiton, estis la provoj plirapidigi la skribadon. La unuaj stenografiaj sistemoj celis mallongigi kaj plirapidigi la skribadon en apartaj naciaj lingvoj. Poste jam venis ideoj krei iun sistemon de universala stenografio taŭga por ĉiuj lingvoj. P. Stojan (40) en sia listo citas 61 verkojn, koncernantajn la universalan stenografion. Ankaŭ tiuj provoj estis en samtempa ligo kun la provoj krei universalan skriban lingvon-pazigrafion. Multaj aŭtoroj de la universalaj stenografi-sistemoj samtempe okupiĝis ankaŭ pri la problemo mondlingva.

Apud la provoj krei universalajn stenografi-sistemojn necesas noti ankaŭ la penadojn krei universalan alfabeton. Ofte tiuj penadoj estis komence rezulto de pure persona utiligo de specialaj signoj por transskribi tekstojn el diversaj lingvoj. Jam poste el tia praktika persone — individua apliko povis veni tendencoj vastigi «sian propran» sistemon inter la aliaj homoj kaj eldoni tiacele specialajn traktaĵojn.

Tiel ekzemple jam M i c h a e l i s en la mezo de XVIII jarcento parolis pri unu el siaj amikoj, kiu uzis alfabeton transdonantan la sonojn de ĉiuj lingvoj [1].

Estas nature, ke la projektantoj de nova alfabeto ofte venis al pli vasta ideo de raciigita mondlingvo kaj ke ambaŭ tiuj ideoj ĉiam ĝermis en profunda intimeco.

Unu el la aŭtoroj de simila universala alfabeto, italo P. G a l a t e r i [2], en la subtitolo de sia projekto starigas demandon: «kial diversaj popoloj, kiujn kunligas la energio de vaporo, ne povus havi komunan lingvon, kiel ili havas komunan muzikon, kies alfabeto estas muziknotoj kaj kies gramatiko estas muzikaj tempo, tonoj kaj akordoj. G a l a t e r i opinias, ke universala alfabeto estas unua paŝo al universala lingvo.

Ankoraŭ en la jaro 1918 C h. L u t t y en New York aperigis sian projekton de universala alfabeto, akcelante «baldaŭan aperon de nova tuteŭropa lingvo». Detalan liston de pli ol 140 verkoj pritraktantaj problemon de universala alfabeto, komencante de la XV jarcento kaj ĝis la nuna epoko, donas P. S t o j a n (40). Inter la projektintoj de similaj universalaj alfabetoj ni trovas la nomojn de konata franca lingvisto C. V o l n e y (1819), de la lingvisto, simpatianta al la ideo mondlingva M a x M u l l e r (1854) k. t. p.

**Aliaj komencaj provoj sur la kampo de artefarita lingvo**

L e i b n i t z en siaj filologiaj notoj [3] indikas iun S k y t t i u s (supozeble pseŭdonomo): «Skyttius kun escepta fervoro sin donis al la lingvolernado. Li asertis ke estas eble el ĉiu lingvo ekstrakti ion esencan kaj el tio ekstraktita konstrui universalan lingvon, el kiu estos eble derivi ĉiujn aliajn lingvojn. Li pensas ke la valoro de tiaj laboroj estos ne mapli ol 30 000 taleroj».

La sama L e i b n i t z en sia letero al T h o m a s B u r n e t [4] parolas pri valoraj laboroj de iu anglo (Sethward), kiun en alia loko

[1] M. Michaelis, «De l'influence des opinions sur le langage et du langage sur les opinions». Breme, 1762, p. 152.
[2] Pierre Galateri, «Essai d'un alphabet commun», Torino (46).
[3] Leibnitz, «Opera omnia», Genève, 1768, vol. VI, pĝ. 298 (45).
[4] Leibnitz, «Opera omnia», vol. VI, pĝ 267 (45).

jam en la XIX. jarcento indikas ankaŭ prof. J. Schmid (18). En «Bibliographia Britannica» de 1825 j., tamen, troviĝas neniaj informoj pri laboroj de tiu ĉi aŭtoro.

Moser (24) nomas inter la antaŭuloj de Leibnitz iun André. Ni trovas ateston, ke tiu ĉi André estas la konata pedagogia kaj politika reformemulo Johann Valentin Andreä (1586—1654) — aŭtoro de la kristanisma utopia «Rei publicae Christianopolitanae descriptio», aperinta en 1619 j. [1].

En sia «Magazin für allgemeine Sprache» (1815—1820, Dillingen) Schmid nomas sekvantajn aŭtorojn de universala skribsistemo: Jean Villiers (Paris 1587), Jean Douet (Paris 1627), kaj H. Justell (London, 1657 kaj 1661). Tamen estas tre verŝajne, ke ankaŭ tie ĉi la afero ne elpaŝis la limojn de ĝenerala pritraktado de la mondolingva problemo kaj de sistemoj sekretskribaj. Koncernan verkon de J. Villiers [2] registras P. Stojan (40).

En sia letero al abato Mersenne, Descartes parolas pri iu folio-prospekto de nekonata aŭtoro en latina lingvo, kiun abato Mersenne sendis al li el Holando kaj en kiu estis prezentitaj bazaj principoj de la konstruo de artefarebla universala lingvo.

Tiu ĉi folio-prospekto ne ĝisvivis nian tempon, sed, juĝante laŭ la letero de Descartes, ĝi jam en tiu epoko servis al la celoj de propagando kaj agitado por la universala lingvo.

Herman Hugo (1617)

Estas supozeble ke la aŭtoro de tiu ĉi folio estis Herman Hugo, kiu publikigis en 1617 la unuan laŭ la tempo al ni konatan libron, pritusantan la problemon de universala lingvo [3].

La libro de Hugo estis dediĉita al iu provincialo de la jezuita ordeno «Carolus Skribemi» kaj por ĝia eldono estis ricevita speciala patento de holanda vicreĝo, laŭ la kutimoj de tiu epoko.

En IV. ĉapitro de sia libro «De numero literarum» li traktas pri diversaj specoj kaj kvantoj de skribsignoj ĉe diversaj popoloj kaj en diversaj lingvoj. Li skribas: «La ĉinoj kaj japanoj, kies lingvoj estas tiel malsamaj kiel lingvoj hebrea kaj belga, tamen havas librojn kaj skribaĵojn, kiuj estas libere legeblaj kaj kompreneblaj por la ambaŭ nacioj, dank' al la sameco de la signoj».

Kiel konkludon al tiu ĉi ĉapitro Hugo starigas la demandon: «Kio do estas pli bona, ĉu havi la literajn signojn por apartaj sonoj, kiel ĉe popoloj eŭropaj, ĉu la apartajn signojn por ideoj, kiel ĉe koreanoj?» — kaj decidplene li parolas kontraŭ la ideografia skribo, defendante la vidpunkton de fonetika alfabeto. En 1774 la libro de Hugo estis reeldonita en franca lingvo. (34)

En la aldonoj al la franclingva eldono de la verkaro de Descartes (1897) [4] estas notitaj ankaŭ aliaj francaj aŭtoroj: historiografo Sorel (1579—1674) [5], al kiu interalie estas alskribata lia informo pri la laboroj kaj proponoj en la fako de la universala lingvo de unu el «Valles» kaj «sieur le Maire» kaj de F. Besnier, kiu eldonis eĉ specialan libron pri la koncerna problemo [6]. P. Stojan (40) avertas kontraŭ eraro ofte farata, kiam la aŭtoro de tiu libro estas konfuzata kun F. Bernier — fizikisto, vivinta inter la jaroj 1640—1688.

[1] «Internacia Pedagogia Revuo», Dresden, 1930, N-o 5—6, p. 75 (47).

[2] Jean Villiers, «Ses intelligences exhibantes...»

[3] Herman Hugo, «De prima scribendi origine et universa rei literarie antiquitate», Antverpiae, 1617.

[4] Descartes, «Oeuvres complètes», Paris, Cerf, 1897, vol. I, pĝ. 82 (45).

[5] Sorel, «De la perfection de l'homme», 1653, pĝ. 346.

[6] F. Besnier, «La reunion des langues ou l'art de les apprendre toutes par une seule», 1674. Anglalingva traduko sen montro de l'aŭtoro aperis en Oxford, 1675.

3*

**Samuel Hartlib (1647)** D-ro Westy Gibbon en la libro «Bibliography of Shorthand» kaj ankaŭ L. Bollack ([10]) citas iun, al ni nekonatan verkon de aŭtoro, pritusinta la problemon de la universala lingvo, Samuel Hartlib, «A common writing whereby two, although noth understanding one the other's language, yet by the help there of may communicate their minds one the another, composed by a well-wisher to learning». Bollack indikas eĉ la jaron de l' eldono de tiu ĉi libro — 1647.

F. Epstein el Hamburg asertas, ke laŭ lia konvinko «la laboroj de Komensky kaj Hartlib estas identaj».

**P. Digbeus (1653)** Aldone al tio, Graves kaj Schmid (en sia «Magazin»...) indikas la libron de hispano P. Digbeus «Arithmeticus nomenclator mundi omnes nationes ad linguarum et sermonis unitatem, auctore linguae (quod mirere) Hispano quodam vere, ut dicitur, muto». Romae, 1653 («Aritmetika nomindikilo, kiu faciligas al ĉiuj nacioj de la mondo unuigon de la lingvo kaj parolo...»).

La projekto de Digbeus estas sistemo pure filozofia, bazita sur klasifiko de l' ideoj. Ĝin ilustras ĉi sekvanta transskribo de la unuaj vortoj el la kristana konfesia preĝo: «Mi kredas je diopatro...» — , XXXIX. 4. XLII. 8. III. 1.

La saman verkon, evidente, citas ankaŭ Becher en sia libro «Methodus didactica», aludante la plagiaĵon, faritan laŭ liaj verkoj de L. Kircher kaj de «iu hispano».

**Thomas Urquhart (1653)** En 1653 Thomas Urquhart en Londono donis en la angla lingvo fundamentajn regulojn de nova filozofia parollingvo [1].

Kiel estas konate, en la jaro 1774 tiu ĉi verko estis represita. Ĝi eniris en la verkaron de Urquhart, eldonitan entute en kvanto da 92 ekzempleroj por kolektantoj-amatoroj. Eldonis ĝin la societo de bibliofiloj «Maitland Club». En ĝeneralan vendadon tiu ĉi eldonaĵo ne estis prezentita. En la katalogoj de Berlina regna biblioteko estas indikitaj la verkoj de Urquhart el jaroj 1651, 1653 kaj 1834.

**Cave Beck (1657)** En la jaro 1657, same en Londono, Cave Beck eldonis france kaj anglolingve du librojn, traktantajn prilaboron de projekto de universala skribsistemo [2].

**Pazigrafiaj sistemoj de la universala skribo** Pazigrafio, kiel ni jam supre diris, oni nomas universalan, ekskluzive skriban lingvon — sistemon da signoj, destinitaj por esprimado kaj transdonado de pensoj.

Skribante per ciferoj ĉiujn vortojn, ĉiujn afiksojn de iu lingvo, oni povas ĉiun vorton skribi per respektiva cifernombro. Se okazas, ke tiuj nombroj por la signife samaj vortoj de malsamaj lingvoj estos identaj, tiam oni havas ciferan pazigrafion.

Se la ordo, donita al la ideoj, celas sekvi certan logikan klasifikon, oni havas pazigrafion filozofian. En la kontraŭa okazo oni havas pazigrafion empirian.

Krom la ciferaj pazigrafioj, povas ekzisti pazigrafioj alispecaj, riceveblaj el kombinaĵoj de diversaj literoj aŭ signoj. Ilia esenco kaj bazkonstruo ĉiuokaze restas la sama.

Anstataŭante ciferojn aŭ signojn de pazigrafio per facile prononceblaj literoj, oni povas fari sonan lingvon, do transformon de pazigrafio je pazilalio.

---

1 Thomas Urquhart, «Logopandecteison, or an introduction to the Universal Language», London, 1653.

2 Anglolingva eldono: Cave Beck, «The Universal Character by which all nations may understand one anothers conceptions», London, 1657.

Bazante sin per ekzemploj de ĉina skribo kaj de egiptaj hieroglifoj, multaj eltrovintoj de universala skribo, komence de la samtempuloj de L e i b n i t z, trovis nebezona aŭ almenaŭ nedeviga, ke la ligilo de interhoma kompreno sin vestu per formoj sonaj. Tial ne en ĉiuj nepre projektoj de pazigrafioj iliaj aŭtoroj starigis la anstataŭeblon de la pazigrafiaj ciferoj kaj signoj per facile prononceblaj literoj.

*Kritiko de pazigrafioj*

La ĉefa manko de ĉiaspecaj pazigrafioj estas kompleta artefariteco kaj teorieco de ilia konstruo, ilia malkonformeco al la realaj vivbezonoj kaj al la ekzistantaj formoj de l' homa interrilatado.

En tiu rilato objektiva juĝo pri ĉiuj provoj krei pazigrafiajn sistemojn tute koincidas kun la juĝo pri la provoj en la konstruo de la filozofiaj lingvosistemoj. La lingvo, destinita por internacia uzado, simile al ekzistantaj lingvoj naciaj, devas esti egale aplikebla kiel por skribaj, tiel ankaŭ por parolaj rilatoj. La akcepto por la tuthomara uzo de lingvo ekskluzive skriba, sed ne parolebla, estus senduba paŝo malantaŭen sur la vojo de l' trafika progreso.

*Joh. Becher (1661)*

En la jaro 1661 aperis verko de germana scienculo kemiisto, kuracisto kaj politiko-ekonomisto Johano-Joaĥimo B e c h e r (nask. en 1635). Tiu ĉi verko entenis plenfinitan proponon pri organizo de skriba formo de l' interhomaj rilatoj [1].

La libro, laŭ la tendencoj de tiu epoko, estis dediĉita al unu el mondfortuloj — al ĉefepiskopo de Nürnberg, Johano-Filipo. Akcentante la gravecon de l' skribo kaj de skribsignoj por la interhomaj rilatoj kaj konsiderante la necesecon de la universala lingvo senduba, B e c h e r opiniis necesa la pluan evoluon de skribsistemo por plena liberigo de ĝiaj signoj de ilia kunligiteco kun formoj sonaj kaj kun buŝa parolo de iu nacia lingvo.

La libro mem sin dividas je du partoj: L e x i c o n kaj I n d e x, el kiuj la unua servas por esprimado de leksikonaj elementoj (t. e. de vortoj kaj ideoj) kaj la dua — por esprimado de la gramatikaj nuancoj kaj fleksioj. La tuta sistemo de B e c h e r sin bazas sur uzado de la 10 ciferaj signoj. Jam tion solan B e c h e r konsideras progreso, kompare kun 24 literoj de la latina alfabeto. En la vortaro de sia sistemo B e c h e r numeras en konsekvenca alfabeta ordo ĉiujn latinajn vortojn kaj nomojn. Entute li donas tiamaniere 10 283 numerajn formulojn, el kiuj 9432 servas al vortoj-ideoj kaj la ceteraj (komence de 9493-a kaj plu) servas al propraj nomoj, al nomoj de la landoj kaj urboj. El tio sekvas, sendube nenia logika klasifiko. Al latina vorto b i b e r e (trinki) kunrespondas n-o 939, por b i b l i a (biblio) — 940; v i p e r (vipuro) — 9200 kaj por v i r (viro) — 9201 ktp. B e c h e r supozis, ke la nombro da vortoj kaj ideoj, bezonata esti esprimita cifere estas limigebla en ĉiuj lingvoj, sed en sia sekvinta libro li mem konfesis la erarecon de tiu supozo.

En la dua parto de la libro troviĝas indicoj ankaŭ ciferaj, entute 172, kiuj prezentas el si laŭvican numeradon de apartaj gramatikaj formoj; ekzemple por 6 kazoj de ununombro (singularo) la ciferoj: 1, 2, 3, 4, 5, 6, por la samaj kazoj de multenombro (pluralo): 7, 8, 9, 10, 11 kaj 12, kaj fine por la verbaj ŝanĝoj diversmanieraj: de 13 ĝis 167. La ciferoj, esprimantaj bazideojn estis dividataj de la ciferoj, signantaj gramatikajn fleksiojn per komo; unu vorto de alia — per dupunkto.

Finfine B e c h e r proponis siaspecan manieron ŝanĝi la ciferajn esprimojn per esprimoj pli komplikaj pere de apartaj signoj.


---

[1] Joh. J. Becheri-Spirensis, «Character pro notitia linguarum universali inventum steganographicum hactenus inauditum», Francofurti, 1661.

Kiel estas videble el la suba tabelo, ĉiun ciferesprimon oni povas esprimi per la sama signo, enhavanta signifon de certa nombro kaj provizita per kelkaj diversmaniere lokitaj streketoj kaj punktoj.

En 1664 jaro B e c h e r ree revenis al sia ideo pri la universala lingvo en sia libro, eldonita germanlingve. En la jaro 1674 tiu ĉi libro reaperis en dua eldono [1].

Ĝi prezentas por ni apartan intereson, kiel dokumento, donanta la historion de la koncepto pri la ideo de l' universala lingvo ĉe B e c h e r. En la antaŭparolo al tiu ĉi libro, celanta montri novajn vojojn kaj metodojn de pedagogio, B e c h e r montras, ke la neceseco, pro la forto de aĵoj kaj cirkonstancoj, devigas al tio, ke oni akceptu al si celon starigi iun universalan lingvon («allgemeine Mittelsprache») kaj ke latina lingvo estas tro malfacila por bone plenumi ĉi tiun rolon.




Signaro de J. J. Becher

La tuta unua ĉapitro de la libro estas plene dediĉita al analizo de la problemo pri diverseco de la lingvoj, pri ilia malfacileco kaj pri tio, kiamaniere simpligi ilian komprenon per iu artefarita vojo.

B e c h e r montras, ke estas multe pli facile akiri kaj uzi ciferan skriblingvon, konsistantan el 10 signoj, ol iun sistemon de hieroglifa skribo, kie la bazsignoj estus multe pli multenombraj.

Li parolas plue: «Iu respektinda sinjoro (legu: ĉefepiskopo Johano, al kiu estis dediĉita la nomita libro de B e c h e r) foje diris al mi, ke valorus multajn milojn kaj ke li mem volonte oferus ion por tiu ĉi afero, se estus eble prezenti la ĉinajn aŭ aliajn hieroglifajn skribojn en tia aspekto, ke ili — per iu maniero — faciligu al la homoj komprenadon de diversaj lingvoj de ĉiuj homoj kaj popoloj. Mi promesis doni min fervore al tiu ĉi afero kaj provi ĝin fari, kaj oni promesis al mi por tio princan rekompencon.» La tutan jaron, tage kaj nokte — rakontas B e c h e r mem — li laboris por solvi la taskon, centon da diversaj metodoj li aplikis, tralegis ĉiujn librojn, kiuj povus doni al li iajn sciindaĵojn, elspezis multe da mono kaj fine eĉ malsaniĝis. Finfine li haltis ĉe la supredonita sistemo de cifera lingvo. Li mem difinas sian laboron, kiel «inventaĵon, kiu dum unu tago, al ĉiu legi- kaj skribi-pova homo, donos eblecon kompreni ĉiujn lingvojn de la tuta mondo». Kiel plej bonan pruvon por sia sistemo B e c h e r opinias tion, ke «ĉiun leteron, skribitan per lia sistemo, ĉiu germana sinjorino povas en kelkaj horoj per speciala vortaro deĉifri». Post fino de tiu ĉi laboro, ĝi estis presita kaj dediĉita al la inspirinto de tiu ĉi ideo, ĉefepiskopo Johano. La dediĉo estis akceptita, la episkopo aprobis la finon de la laboro, gratulis al B e c h e r kaj «ĝi estis mia tuta rekompenco». B e c h e r ne povas

[1] «Metodus didactica seu clavis et praxis super novum organum philologicum — das ist Gründliches Beweis dass die Weg unu Mittel welche die Shuhlen bisshers ins gemein gebracht vergeblich ablaufen samt Anleitung zu einem besseren». Zweyte edition, Francofurti, 1674 ([45]).

kaj ne volas kaŝi sian ofendiĝon kontraŭ la avara episkopo. Li deklaris ke li povus fari sian verkon multe pli kompakta. Anstataŭ la antaŭaj 10 folioj por ĝia preso nun estus bezone nur du, sed estante trompita pro la unua eldono, li ne volas aperigi la novan: «Mi uzos mian tempon estonte pli utile kaj ne donos min tiel facile al la persvadoj de grandaj sinjoroj».

La unua libro de B e c h e r estis tradukita en la anglan [1] (sub la nomo «The Universal Character») kaj en la germanan lingvojn ([34]). La aŭtoro ricevis multajn aprobajn leterojn el Anglio, Holando kaj Francio, tamen li konstatas, ke estis multaj aprobantoj, sed malmultaj subtenantoj. En sia dua libro li nomas nur germanan matematikiston kaj fizikiston, jezuiton G a s p a r o n S h o t t ([13]), eldoninton kaj aŭtoron de «Schola Steganographica» (Nürnberg, 1665), kiu laŭdire volis reeldoni la verkon de B e c h e r en ĉiuj lingvoj sub komuna titolo «Mercurius Polyglottus». Li projektis eldoni en ĉiu lingvo po du vortaroj por la ĉifrigo kaj deĉifro de la ciferaj formuloj. Sed S h o t t mortis (1666) ne plenuminte tiun taskon.

En la postparolo al la libro de S h o t t ni renkontas mencion pri la farata korektado de «Mercurius», sed parolante multe kaj detale pri T r i t h e m i u s kaj K i r c h e r, S h o t t tute ne nomas pri B e c h e r.

B e c h e r antaŭvidis la eblecon dislokigi en la vortaroj vortojn-ideojn ne nur laŭ alfabeta ordo, sed ankaŭ laŭ ilia senco en ordo logika, dividante ilin je 8 fundamentaj grupoj. Li pensis pri anstataŭo en sia lingva sistemo de la cifersignoj per literoj germanaj aŭ latinaj. Tiun estontan universalan parollingvon li nomas «Harmonia linguarum».

Interalie li diris ankoraŭ unu, treege valoran, penson, kiu servas ĝis nun kiel pruvo pri la ebleco de neŝanĝebla universala helpa lingvo, nome ke: «ĉiu lingvo povas esti lernebla per du metodoj: kiel lingvo gepatra kaj kiel lingvo dua — do arta por la lernanto». Kaj tiu ĉi dua lingvo estas laŭsence neŝanĝebla.

La sistemo de B e c h e r estas la unua de ni konata provo krei empirian ciferan pazigrafion. Samtempe kun tiu ĉi projekto aperis la unua plene ellaborita projekto de aprioria filozofia skriba kaj parola lingvo.

La nomita verko estis publikigita en la jaro 1661, anglolingve, en Londono. Ĝin publikigis la instruita pedagogo G e o r g o D a l g a r n o (mortis en 1687) [2]. **Dalgarno (1661)**

La sistemo de filozofia lingvo de D a l g a r n o estas bazita sur logika klasifiko de ideoj. En la projekto de D a l g a r n o ĉiuj ideoj kaj konceptoj estas dividitaj je 17 fundamentaj klasoj, signataj per 17 latinaj kaj grekaj literoj. Ĉiu el tiuj literoj servas kiel majusklo por ĉiuj vortoj de sia klaso. Jen parto el la listo de tiuj klasoj, estanta samtempe kvazaŭ alfabeto de la lingvo:

A — ekzistaĵoj-objektoj, H — substancoj, E — fenomenoj, I — konkretaj estaĵoj (kunigo de A kaj E), O — solidaĵoj, T — fenomenoj rilatantaj racion, K — fenomenoj politikaj, S — fenomenoj sociaj.

Ĉiu el la 17 fundamentaj klasoj dividiĝas je subklasoj, diferencantaj unu de alia ankaŭ en sia dua litero. Ekzemple, la subklasoj de l' klaso K (fenomenoj politikaj): K a — oficaj rilatoj, K η — justicaj rilatoj, K e — afero juĝenda, K i — roloj de la geprocesanoj, K o —

[1] «Bibliotheca Britannica», 1824, vol. II ([45]).
[2] Dalgarno, «Ars Signorum, vulgo character universalis et lingua philosophica qu (qua) poterunt nomines diversissimorum idiomatum» etc., London, 1661.

rolo de la juĝisto, K γ — krimoj, K u — milito. S k a — religio (litero S en tiu ĉi okazo ludas helpan rolon, pro la foresto de plene logika senco).

Ĉiu subklaso plue dividiĝas: S k a m — difavoro, S k a n — beata ĝuo, S k a f — adori, S k a b — juĝi, S k a d — peti, S k a g — ofero ktp. N η k a, N η k, N η k o, laŭ la sama sistemo signifas vice: ĉevalo, azeno, mulo ktp. N, laŭ la «alfabeto de homideoj» de D a l g a r n o signifas «vivanta estaĵo», — «besto», k — kvarpieda, kaj la lasta litero estas simbolo por la nomo de la besto. Tiamaniere la projekto de D a l g a r n o devas esti konsiderata kiel unu el la klasifikantaj sistemoj de homideoj, kiuj poste abunde aperis en diversaj epokoj kaj diversaj sceincoj.

Estas treege malfacile memori similajn kolektojn da vortoj. Tio kontraŭstaras la fundamentan econ de l' homa memoro: ju pli proksima estas la senco de la vortoj — des pli malsama estu ilia formo.

La sistemo de D a l g a r n o el ĉiuj ceteraj filozofiaj sistemoj devas esti konstatita kiel relative simpla. La verko de D a l g a r n o en limigita nombro da ekzempleroj estis reeldonita en la jaro 1834 de Glasgow'a societo de bibliofiloj «Maitland Club». Por privata vendo ĝi ne estis destinita [1].

**Voss (1663)**

**La universalaj gestaj lingvoj**

En la jaro 1663 holanda filologo I s a a c V o s s tuŝis en sia libro [2] problemon pri la bezono prilabori universalan sistemon de gestosignoj, en speco de la nuntempaj gestalfabetoj de surdmutuloj.

Per si mem la ideo ne estis tute nova. Jam en la antikvaj tempoj la fama roma pedagogo Q u i n t i l l i a n u s (naskiĝis ĉirkaŭ la j. 35 de nia epoko) nomis la gestojn «lingvo komuna por ĉiuj homoj» kaj diris, ke la sistemo de gestado aperis en la epoko de antikvaj herooj. En tiu tempo la gestado estis instruata en lernejoj kaj oni tre atentis la kapablon ĝin uzi. A t h e n e i s, greka retoro, vivinta ĉirkaŭ la j. 200 de nia epoko, parolas eĉ pri ekzisto de speciala klasifiko de gestoj.

En pli malfrua tempo historiisto de eklezio, anglo B e d a V e n e r a b i l i s, vivinta en la j. 672—735, skribis interesan traktaĵon sub titolo «Pri la fingra lingvo» [3].

Ankaŭ la ĵus citita aŭtoro de artefarita lingvo, D a l g a r n o (verŝajne ne sen influo de la ideoj de V o s s, ĉar ambaŭ tiuj libroj aperis en Oxford) eldonis specialan libron, dediĉitan al edukado de surdomutuloj [4], en kiu li skribis: «ĉar mi havas tiun opinion, ke nia okulo estas same komprenema kaj perceptokapabla kiel nia orelo, tial mi ne vidas ian kaŭzon, kial ni ne povus fari la manon samtiel bona ilo, kiel nia lango. Kiel la lango faras kaj ripetas artikule la sonojn, tiel same oni povas per la mano figuri se ne belajn, do almenaŭ bone kompreneblajn signojn.»

Ankaŭ L e i b n i t z lasis post si indekson de diversaj signoj kaj gestoj, kompreneblaj por ĉiuj [5]. Similaj projektoj estis faritaj ankaŭ en pli malfrua tempo.

---

[1] «Bibliophile Belge», 1845, vol. II, Bruxelles, pĝ. 31, kaj «Edinburg Rewiew», 1835, vol. LXII.

[2] Isaac Vossius, «De poematum cantu et viribus rhytmi», Oxonii, 1663.

[3] Beda, «Dactylogia tractatus de loquela per gestum digitorum», Cologne 1688.

[4] Dalgarno, «Didascalocophus or the Deaf and Dumb man's tutor», Oxford, 1680.

[5] Leibnitz, «Opera omnia», Genève, 1768, vol. VI, pĝ. 207. (45)

P. Stojan ([40]) registris 34 librojn, koncernantaj la problemon pri gestlingvo. Sed la eblecoj de la gestuzo esence estis pli limigitaj ol la eblecoj de aplikado de pazigrafiaj sistemoj. Ne sen kaŭzo dum sia laŭgrada evoluo la homo pli kaj pli multe la gestan transdonon de la pensoj anstataŭis per la sona. Se apartaj sovaĝaj popoloj ĝis nia tempo aplikas la gestojn por ekzaktigi kaj kompletigi la sencon de sia parolo, tion kaŭzas ne deziro forigi la sonojn per gestoj, sed la malriĉeco kaj malsufiĉeco de ilia sona lingvo.

En ambaŭ specoj de la projektitaj universalaj interkompreniloj — gestado kaj pazigrafio — estis io komuna: signo anstataŭ sono. Tial la subtenantoj de la pazigrafia ideo facile fariĝis ankaŭ subtenantoj de universala gestolingvo.

En la jaro 1663 aperis projekto de universala skribo, kiun ĉiu povus legi en sia lingvo, verkita de angla markizo de Worcester [1]. **Worcester (1663)**

E i n s t e i n ([16]) datumas sub 1667 analogian projekton de P e t e r P o r e l e, sed tiu ĉi informo estas dubinda. Pri la verko de Porele kaj lia persono nenio estas al ni konata. **Peter Porele (1667)**

En la jaro 1663 aperis verko de ĉinologo, jezuito K i r c h e r [2], pri kiu parolas B e c h e r kaj C h a r m a ([7]). V a t e r ([23]) en sia listo de pazigrafia literaturo metas post la nomo de K i r c h e r la titolon de lia libro «Oedipus Aegyptiacus». Pri ĝi ankaŭ parolas B r e i t h a u p t, sed en la listo de S t o j a n ([40]) ĝi ne troviĝas. **A. Kircher (1663)**

En la unue nomita libro, en ties unua parto, verkita sub moto «Linguarum omnia ad unam reductio», K i r c h e r ripetas la ideojn de B e c h e r kaj proponas specifikajn ciferajn signojn por ĉiuj vortoj, esprimoj kaj iliaj variaĵoj, renkonteblaj en diversaj lingvoj. Apartaj ŝanĝoj (verbaj kaj kazaj), ne enirintaj la ĝeneralan vortaron, estas alsignataj per kondiĉaj signoj, ekzemple la kazoj — per majuskloj de la latinaj nomoj de la kazoj: N, G, D, A, ktp., provizitaj per streketo.

La libro enhavas kvinlingvan vortaron (latinan, italan, francan, hispanan kaj germanan) por traduko el tiuj lingvoj en la poligrafiajn signojn de K i r c h e r kaj renverse. La ciferaj signoj de K i r c h e r en laŭgrade kreskanta ordo sekvas la alfabetan vortordon de la latina vortaro. Sekve en la vortaroj de aliaj lingvoj tiu ĉi konsekvenca ordo estas neeviteble rompata. La ciferaj signoj kombiniĝas el la romaj kaj arabaj ciferoj — la unuaj de I ĝis XXXII, la duaj de 1 ĝis 38. Tiamaniere, ekzemple, laŭ la latina vortaro oni havas: Anglia — II. 14; annus — II. 15; animus — II. 16. La dua parto de la verko de K i r c h e r estas simpla transpono de la projektoj de sekreta skribo, proponita de T r i t h e m i u s.

Kiel ni jam konstatis, en tiu ĉi frua epoko, kiam formiĝis la ideo de la universala lingvo, la problemoj de sekreta skribo plej proksime kunplektiĝis kun la problemoj de pazigrafio. En la kritika almanako de B a i l l e t estas komuniko, ke la aŭtoro de la sistemo de sekretskribo (steganografio) T r i t h e m i u s havis multajn imitantojn. Detalan liston de la verkintoj en tiu fako donas en siaj libroj B r e i t h a u p t [3], C h V e s i n [4] kaj P. S t o j a n ([40]). La lasta donas liston el 51 verkoj, dediĉitaj al la problemo de la sekreta skrib-sistemo. Mul-

---

[1] Marquis de Worcester, «Century of the names and scantling of... inventions», 1663

[2] Athanasii Kircheri, «Poligraphia nova et universalis et combinatorica arte detecta», 1663 ([45]).

[3] Christian Breithaupti, «Ars decifratoria sive scientia occultas scripturas solvendi et legendi», Helmstadii, 1737 ([46]).

[4] Ch. Fr. Vesin, «Trait d'obscurographie», Paris, 1838 ([45]).

taj al la aŭtoroj de similaj projektoj de sekretskribo poste estis erare alkalkulataj al la'aŭtoroj de la sistemoj de artefarita lingvo. Aparte multajn erarojn en tiu rilato enlasis prof. G. F e r r a r i ([31]).


Wilkins (1668)

En la jaro 1668 angla episkopo W i l k i n s, aktiva partopreninto de la Granda angla revolucio (li estis interalie edzo de fratino de C r o m w e l l), kaj ankoraŭ en la 1641 j. pritraktinta la problemon de kriptografio kaj sekreta pazigrafio, publikigis sian grandiozan kaj harmonian sistemon de filozofia skriba kaj parola lingvo [1]. La ideoj kaj konceptoj ĉe W i l k i n s estis dividitaj je 40 klasoj, plue dividataj je subklasoj kaj specoj. De la ideoj ĝeneralaj estis transiro al la ideoj apartaj kaj duagradaj. Ĉiuj klasoj, subklasoj kaj specoj, samkiel la gramatikaj formoj, estis signataj aŭ per specialaj signoj, aŭ — en la buŝa uzado — per specialaj sonkombinoj. Ĉiu pli detalriĉa klaso, subklaso aŭ speco estis esprimata per pli granda nombro da signoj aŭ sonoj, ol la klaso antaŭstaranta, en kiu troviĝis ideoj de pli ĝenerala senco.

W i l k i n s en sia libro donis tekstojn, transskribitajn per liaj signoj en lia lingvo. Kun certa atento kaj volo oni povas sen granda malfacileco deĉifri tiujn tekstojn kaj kompreni ilin.

En la almanako, eldonita de A n d r e a s M ü l l e r en la jaro 1681, kie troviĝas la preĝo «Patro nia» en ĉiuj lingvoj, estas donita tiu ĉi preĝo ankaŭ en la lingvo de W i l k i n s, en ties pazigrafia kaj parola formoj.

Ĉi-sube ni donas la kvaran kaj kvinan strofon de tiu ĉi preĝo en la lingvo Wilkins:



Jo velpi rαl αi ril potoi hαi faba raty.
Na to sγelyγs lαlα hαi balgar me αi ia sγeldyγs lαles valgar rγdi.

Ĝenerale la projekto de W i l k i n s estas plua kaj pli detala prilaboro de la ideoj de D a l g a r n o, kiu siavice, por siaj filozofiaj konstruaĵoj plene akceptis la kartezianan (Descartes-anan) mondpercepton [2].

La pazigrafiaj signoj de W i l k i n s prezentas per si horizontalajn, rektajn kaj rompitajn liniojn kun iliaj diversaj variaĵoj en la mezo kaj ĉe la finaĵoj, kaj kun enmetitaj inter ili malgrandaj signoj, cirkletoj, punktoj, literetoj kaj ciferoj, esprimantaj tiujn aŭ aliajn gramatikajn formojn aŭ montrantaj la vortderivon.

Koncerne la gradon de perfekteco en la lingvosistemo de W i l k i n s, M a x M ü l l e r ([21]) skribis ĉirkaŭ la jaro 1870, ke «ĉio kreita de W i l k i n s estas tiel sprita kaj ke, se ni konsideros, ke ĉio - ĉi estis farita 200 jarojn antaŭ ni kaj krom tio de unu sola homo sen helpantoj, ni juĝos plej indulge pri ĉio, kio ŝajnas en la nuna tempo malperfekta en tiu ĉi klasifikinto de la homaj scioj».

La gramatikaj nuancoj estis montrataj per la signoj de W i l k i n s k u n ĝusteco kaj ekzakteco pli grandaj, ol en iu alia el la ekzistantaj lingvoj.

La formigo de apartaj vortoj estis farata laŭ jena ordo por disigo de la ideoj: D e — elemento, D e b — la unua subdivido de la ele-

---

[1] John Wilkins, «An Essay towards a real character and a Philosophical Language, with an alphabetical Dictionary», London, 1668.

[2] Descartes, «Oeuvres complètes», Paris, Cerf, 1897, vol. I, pĝ. 82 ([45]).

mentoj — fajro, D e b a — konsistiga parto de fairo — flamo, D e t — kvina subdivido de la elementoj — ĉielaj fenomenoj, D e t a — ĉielarko, D a — dio, D u a — dieca, D o — ŝtono, D u o — ŝtona ktp.

Kiel siajn antaŭirantojn en la fako de prilaboro de filozofia gramatiko, W i l k i n s nomas: 1. S c o t u s, «Grammat. speculativa», 2. Caramuel kun lia «Grammatica audax» kaj 3. Campanella[1]. El la aŭtoroj, antaŭ li prilaborintaj diversajn sistemojn de artefaritaj lingvoj, li citas la nomojn de P h. L a b b é, B e c h e r kaj K i r c h e r.

W i l k i n s montris ĉiujn malfacilaĵojn de la gramatikoj de la ekzistantaj lingvoj kaj speciale la malfacilaĵojn de la gramatiko latina. Tial li opiniis sia plej necesa tasko — ellabori rigore filozofian gramatikon, mankantan en la scienco, citante la nomon de B a c o n, kiu samtempe kun C a m p a n e l l a prilaboris sistemojn de logika klasifiko.

La libro de W i l k i n s estis ĉe ĝia apero renkontita kun granda favoro flanke de la Brita regna akademio de sciencoj. La akademio, komisiis al C h r i s t o p h e W r e n, la 18-an de majo de la jaro 1668, fari specialan raporton pri tiu ĉi libro. Pro tiu fakto B a i l l e t eĉ atribuis al W r e n memstaran prilaboron de aparta sistemo de artefarita lingvo[2].

Por presado de la libro de W i l k i n s estis ricevita speciala privilegio de la reĝo, konfirmita per la akto de la 13 de aprilo de la jaro 1668. Tamen el la tuta nombro da lernintoj de tiu ĉi sistemo, laŭ la atesto da L e i b n i t z (18), nur la eltrovinto mem kaj H. R o b e r t B o y l i povis paroli per la noveltrovita lingvo kaj ĝin kompreni.

L. E i n s t e i n (16) fuŝante citas iun B o y l e, kiu sukcese kvazaŭ studis iun jam multe pli malfruan sistemon de pazigrafio de G. K a l m a r (1772 j).

Oni ne devas pensi, ke W i l k i n s konsideris sian lingvon idealo de perfekteco. Li ne asertis senerarecon de siaj logikaj konstruaĵoj kaj opiniis necesa la pluan kolektivan prilaboron de sia lingvo, neplenumeblan per la forto de unu sola homo.

La plejparto el la presitaj ekzempleroj de la libroj kaj de la manuskriptoj de W i l k i n s estis detruita de incendio, pro kio la verko de W i l k i n s ne ricevis vastan propagandon. L e i b n i t z klarigis la ĝeneralan malsukceson de la sistemoj de W i l k i n s kaj D a l g a r n o per ilia komuna eraro, nome per tio ke ili ne akceptis por la bazo de siaj sistemoj ciferajn esprimojn.

En pli posta tempo oni faris oftajn riproĉojn por la verko de W i l k i n s, nomante, ĝin plagiato de la verko de D a l g a r n o[3]. A n t o i n e W o o d eĉ asertas[4], ke D a l g a r n o antaŭ la presado de sia libro komunikis al W i l k i n s ĝian enhavon kaj ke W i l k i n s malbonuzis ĉi tiun fakton. La saman opinion havas C h. N o d i e r en sia libro «Melanges... 1825». Sed riproĉi al W i l k i n s por iu plagiato estas nenia rezono. Vere, en sia verko li eĉ ne citas la nomon de D a l g a r n o, sed liaj antaŭaj laboroj (Messenger, 1641) montras, ke la ideo krei universalan lingvon al li venis ĉiuokaze memstare kaj pli frue ol al D a l g a r n o.

Jam de ni nomita A n d r e a s M ü l l e r en la jaro 1681 anoncis, ke li eltrovis metodon, per kiu sen iu granda peno, dum kelkaj semaj- **A. Müller (1681)**

[1] Campanella, «Grammatica philosophica» (1610?), part. 3, cap. 1, pĝ. 297.
[2] Descartes, «Oeuvres complètes», Paris, Cerf, 1897, vol. I, pĝ. 82 (45).
[3] «Le Bibliophile Belge», Bruxelles, 1846, vol. III, pĝ. 481 (45).
[4] «Atheneum Oxonii», vol. XI, pĝ. 506.

noj oni povas ellerni la ĉinajn hieroglifojn kaj akomodi ilin por la internacia uzo. Por sia eltrovo li volis ricevi 2000—6000 talerojn, garantiante redonon de la monusmo, en la okazo de malsukceso. B e r g e r ([19]) opinias ke M ü l l e r fakte eltrovis metodon por pli facila lernado de la ĉinaj hieroglifoj. Ke en tiu ĉi supozo povis kuŝi certa vero—tion pruvas la antaŭ ne longe farita eltrovo, fakte anstataŭanta jarojn da lernado de la ĉinaj hieroglifoj per limigita nombro da monatoj.

Ceteraj pazigrafioj en la fino de la XVII jarcento

Post la nomitaj aŭtoroj J o h. S t u r m (1676)[1] kaj jezuito d e B e r m o n v i l l e[2] en Parizo (1687) publikigis siajn provojn krei «universalan skribsistemon». S t u r m plene akceptis la ideojn de B e c h e r. En lia trilingva vortaro, laŭ la ordo de la latina vortaro estis numeritaj ĉiuj vortoj; per apartaj signoj estis akomoditaj ĉiuj gramatikaj fleksioj [3]. Tiamaniere, ĉiu frazo povis esti esprimita per konformaj ciferoj. Ekz.: «124,1. 14,15. 172,4» signifas: 124—dio; 1—nominativo; 14 — ami, 15—tria persono de la estanta tempo; 172 konkordo, 4—akuzativo, kaj la tuta frazo estas: «dio amas konkordon».

Faranta terurajn erarojn kaj tute ne montranta la fontindikojn, L. E i n s t e i n ([16]) parolas pri J o h a n U p p e r d o r f (1679—1680), jezuito B e s u i e r (1684) kaj C a r a m u e l v o n L o b k o w i t z (1687), kiuj laŭdire aperigis siajn projektojn de pazigrafioj.

Rilate la unuajn du aŭtorojn kaj ties verkojn, ni trovis nenie iajn informojn, nek eĉ en la koncernaj enciklopediaj vortaroj.

P. S t o j a n ([40]) iakaŭze en sia aldona listo de lingvo-projektoj citas J. U p p e n d o r f (1669 j.).

Estas supozeble ke la B e s u i e r estas kripligita nomo B e s n i e r, kiu fakte en la jaro 1674 aperigis libron temantan pri universala lingvo.

Ankaŭ la informojn pri C a r a m u e l v o n L o b k o w i t z oni devas akcepti kun granda dubo. C a r a m u e l (kies laika nomo estas Johann von Lobkovitz) estis hispana prelato kaj teologo, vivinta en 1606 — 1682, t. e. mortinta 5 jarojn antaŭ la jaro, indikita de E i n s t e i n. En la bibliografia almanako de A. B a i l l e t ([13]) ni trovis nur informojn, ke C a r a m u e l prilaboris la problemojn de ritmo, sekretskribo, mistikaj nombroj kaj de cifera klasifiko de ideoj, kiu povus fariĝi komuna por ĉiuj lingvoj. Lia libro (Steganographia) aperis en 1630 samtempe en Bruselo kaj Kolonjo kaj estis dediĉita ĉefe al apologio de la verkoj de T r i t h e m i u s.

Ni notu ankoraŭ laborojn de franca jezuito scienculo P h i l i p p e L a b b é, kies nomon, kiel tiun de l'aŭtoro de projekto de universala lingvo, citas W i l k i n s kaj M o n b o d d o ([20]).

Ph. Labbé

L e i b n i t z [4] en la jaro 1709 diras, ke L a b b é volis krei universalan lingvon el la simpligita latina, t. e. jam ne sur filozofia, aprioria bazo. S c h m i d en «Magazin...» donas jam pli plenan nomon de la respektiva verko de L a b b é : «Grammatik einer sehr leichten allgemeinen Sprache der Missionen und der Gewerben», tamen sen indiko de la jaro kaj loko de publikigo.

---

[1] Joh. Crist. Sturmius, «Specimen edens novi artificii scribendi etc.», Norimbergae, 1676.

[2] De Bermonville, «Nouvelle decouverte d'une Langue Universelle pour les négociants et le secret de lire d'hebreu sans points», Paris, 1687.

[3] «Academia pro interlingua», Torino, 1924, n-o 5, pĝ. 7 ([47]).

[4] «Die philosophischen Schriften von G. Leibnitz, herausgegeben von C. J. Gerhart», vol. VII, pĝ. 36.

P. Stojan([40]) iakaŭze supozas, ke la verko estis publikigita en la j. 1650.

Labbé starigis 12 fundamentajn regulojn por sia aposterioria sistemo de la lingvo. La vortaro estis plene prenita el la latina.

Aldone al tiu ĉi tuta listo de la projektoj, Vater ([23]) citas ankoraŭ pri de Vienne kun lia publikigaĵo pri universala skribsistemo [1].

Tamen ĉi tie temas nur pri ĝenerala pritrakto de la problemo.

Entute Vater donas kelkajn tre valorajn bibliografiajn citaĵojn pri la problemo, rilatantajn al la XVII. kaj al la sekvinta XVIII. jarcentoj.

Inter la unuaj esploristoj, penantaj en la daŭro de la XVII. jarcento solvi la problemon de universala lingvo, troviĝas granda nombro da jezuitoj kaj ekleziuloj. Tiu ĉi fenomeno trovas por si klarigon en la specifika vivkonstruo de tiu epoko. La klereco en granda grado estis unu el privilegioj ĝuste de la pastraj rondoj. Krom tio la ordeno de jezuitoj, pretendanta je tutmonda signifo, laŭnecese bezonis iun universalan interkomprenilon. Sed dum la jezuitoj havis kiel sian malvaste praktikan taskon — krei pazigrafian skribsistemon, plejparte empirian, laŭ la tipo de Becher, la plej bonaj pensuloj de la jarcento — Leibnitz, Descartes kaj Wilkins, kredante je la forto de homa racio, serĉis la solvon en racionaligo de la lingvo, en kreo de filozofiaj kaj parolaj lingvosistemoj.

Sed jam en tiu tempo troviĝis homoj, kiuj rigardis en la estontecon per pli penetra rigardo.

**Bernard Lamy (1670)**

Bernard Lamy, adepto de Descartes, skribis en la jaro 1670:

«Mi pensas ke la intenco de tiuj, kiuj volas proponi novan lingvon, estas, ke tiu ĉi lingvo havu malgrandan nombron da vortoj. Ĉiu el la vortoj, sisteme signita, permesos derivi la aliajn vortojn rilatantajn al la unua. La vortoj ne havos deklinaciajn ŝanĝojn, apartaj vortetoj montros la gramatikajn ŝanĝojn kaj la tri genrojn. Ekzistos nur du konjugacioj: unu por aktiva, alia por pasiva modoj... La tuta gramatiko de tiu lingvo estos facile lernebla en tre mallonga tempo [2]».

TralegINTE la priskribon de la vojaĝoj de Jaques Thevenot kaj eksciinte pri la aparta simpleco de la tataro-mongola gramatiko, en la sekvintaj eldonoj de sia libro Lamy —skribas:

«Por krei tian lingvon sufiĉus, kiel tion proponas Thevenot, akomodi al la ekzistantaj lingvoj ĉi tiun gramatikon de la tatara lingvo.»

Lamy forĵetas ne nur ĉiujn pazigrafiajn esplorojn, sed eĉ la filozofiajn projektojn. Antaŭ li skiziĝas novaj, pli perfektaj kaj simplaj formoj de racionaligita aposterioria lingvo.

---

[1] «Mercure de France», Jul. XXX, 1685.

[2] Bernard Lamy, «La réthorique ou l'art de parler», 1 edition, Paris, 1670, t. I, ch. 9 ([45]).

IV

## LA XVIII JARCENTO KAJ PROJEKTOJ DE TIU EPOKO

Diverseco de la lingvoj estas unu el la plej grandaj malfeliĉoj de la vivo. Voltaire.

La XVII. jarcento, en la personoj de siaj plej bonaj portantoj de la krea penso, ĵetis al la homaro novajn ideojn, starigis antaŭ la homaro novajn, pli vastajn celojn. La XVIII. jarcento, simboligita per ekfloro de la racionalismo, brile finiĝis per la granda franca revolucio kaj per la de ĝi proklamitaj tuthomaraj idealoj. Same en la regiono de la plua disvolviĝo de l'ideo pri universala lingvo, la XVIII. jarcento ne restis malplena loko.

La komencitaj en la antaŭa jarcento esploroj daŭris kun la samaj fervoro kaj diligento. Kelkaj amatoroj — diletantoj, kelkaj scienculoj dediĉis siajn verkojn al la ĉarme alloga revo pri la tutmonda unulingveco.

**Carpophorophilus (1732)** La jaro 1732 estas signita per siaspeca apero de nekonata aŭtoro, kiu sendis siajn proponojn anonime en la redakcion de germana scienca ĵurnalo [1]. L. Couturat kaj L. Leau (9) fiksas la aperdaton de tiu ĉi projekto al la jaro 1734, sed evidente, restis al ili nekonata la unua germana teksto de la propono, kiu jam pli poste, en 1734, tradukita en la latinan lingvon, estis efektive ree publikigita en la latina eldono de tiu ĉi ĵurnalo [2]. En tiu ĉi dua publikigo aperis ankaŭ la pseŭdonimo de la aŭtoro «Carpophorophilus», forestanta en la unua germana teksto.

En siaj proponoj, tuŝantaj la problemon de la universala lingvo, konsistantaj el 15 alineoj sur malgranda nombro da malgrandformataj paĝoj, la aŭtoro prezentas la gramatikon de la de li projektata lingvo kaj la fundamentajn principojn de ties konstruo.

La ĉefa postulo, kiun obeas la aŭtoro ĉe la konstruo de sia lingvo, estas: la universala lingvo devas esti simpla, klara kaj sen esceptoj. Konforme al tiu ĉi postulo li projektas respektivajn korektojn en la latina lingvo. Tiamaniere, ĝi estas la unua laŭtempe, al ni konata (se ni esceptos Ph. Labbé kaj ne publikigitajn laboraĵojn de Leibnitz) aposterioria sistemo de artefarita lingvo, konstruita sur la bazo de la natura, kvankam jam morta, latina lingvo.

---

[1] «Deutsche Acta Eruditorum — Der Geschichte der Gelehrten», Leipzig, 1732, vol. XV, n-o 169, pĝ. 46—52 (45).

[2] «Actorum eruditorum, que Lipsiae publicantur supplementa», tomus X, Lipsiae, 1734, n-o 1, 42—46 pĝ. La artikolo de Carpophorophilus: «Novum inveniendae Scripturae Oecumenicae Consilium» (45).

Ĝia alfabeto konsistas el 16 literoj: a, b, d, e, f, g, h, i, k, l, m n, o, r, s, u; el la literoj, sonantaj simile: b kaj p, d kaj t, f kaj v, estas konservataj po unu, la akcento estas metata ĉiam sur la antaŭlasta silabo, la adjektivoj, same kiel la adverboj restas neŝanĝataj. La kazoj formiĝas per prepozicioj, ha, he, ho — la samaj por la ununombro kaj multenombro; la lasta formiĝas per finiĝo im ,ekzemple: la nominativo en la ununombro estas: h a d o m u s (domo), la dativo de la multenombro: h i d o m u s i m (al domoj). La verbaj formoj estas ŝanĝeblaj nur en tempoj: e g o a m o — mi amas, d u a m o — ci amas, n o s a m o — ni amas, ktp. Troviĝas neniuj esceptoj en la reguloj de la gramatiko.

Kiel ekzemplan tekston de'sia lingvo la aŭtoro donas la preĝon «Patro nia»: «O baderus noderus, ke esso in seluma fakdade fankadus ha nominade duis ad fenade ha rennanda duus, ha fo landa duus».

Ĝi estas nur skizo, nur skemo de lingvo, sed skemo sendube pli praktika kaj facile akirebla, ol ĉiuj aliaj al ĝi samtempaj filozofiaj kaj pazigrafiaj projektoj. Sed malgraŭ siaj superaĵoj, ĝi estis baldaŭ forgesita, ĉar oni konsideris ĝin kiel pekan kripligon de la latina lingvo.

En la jaro 1736 D. S o l b r i g publikigas germanlingve sian projekton de cifera pazigrafio [1], bazita sur la principo de uzado de ciferkombinoj. En la libro de V a t e r ([23]) kaj en la artikoloj de C a r p o p h o r o p h i l u s tamen troviĝas indiko pri alia, pli frua (1726) latinlingva eldono de la sama verko «Scriptura Oecumenia...» D. Solbrig (1736)

En la berlina regna biblioteko troviĝas verkoj de S o l b r i g pri la sama problemo, eldonitaj en Salzwedel en la jaroj 1725 kaj 1727.

Iom pli frue, en la jaro 1720, en «Journal Litteraire de l'année 1720», nekonata aŭtoro proponis similan projekton. Laŭ atesto de C. B e r g e r ([19]) tiu ĉi projekto kune kun la projekto de S o l b r i g estas imitaĵoj de la cifera lingvo de B e c h e r. Anonimaj c zigrafioj

Pri analoga projekto, ankaŭ el la XVIII jarcento, parolas D w i n - R a y ([3]) sen cito de la aŭtoro kaj eldonjaro: en Bath estis presita libro «The Description and Explanation of an universal character or manner of writing that may de intelligibile to the inhabitants of every country, although ignorant of each other language».

P. S t o j a n ([40]) supoze notas kiel eldonjaron de tiu lasta libro la j. 1710.

Amasa entuziasmiĝo pri la ideoj de cifera pazigrafio en la dua duono de la XVII. kaj en la unua de la XVIII. jarcentoj povas esti facile klarigebla. La miraĵo de universala ĉina skribsistemo ŝajnis esti nekontraŭstarebla pro la pruvo de sia ekzistado kaj pro la simpleco de sia efektivigo. Inter la eŭropaj scienculoj, aldone al tio, regis certeco ke pli bona kaj pli perfekta ideografia skribsistemo povus enradikiĝi eĉ en Ĉinio mem.

En la jaro 1750 L. R i c h e r i en Italio aperas kun sia sistemo de memstare ellaborita pazigrafio [2]. L. Richeri (1750)

En la jaro 1755 traktaĵon pri la problemo de universala lingvo publikigas W i l l el Altona [3]. Will (1755)

La fama franca geometro M a u p e r t u i s en la III volumo de siaj verkoj, eldonitaj en 1756, en Lyon, skizas sistemon de sintezaj grama- P. Maupertuis (1756)

---

[1] David Solbrig, «Allgemeine Schrift oder Art die Ziffern zu schreiben», Coburg, 1736.

[2] Ludovico Richeri, «Alfabeto della natura e dell'arte», 1750.

[3] Will. «De lingua universali», Altona, 1755.

tiko kaj lingvo. En la disertaĵo, dediĉita al diversaj manieroj de la homa ideesprimado [1], M a u p e r t u i s skribas:

«Se ĉiuj substantivoj havus unu finiĝon, se la nombrojn kaj kazojn (genro ne estas atentinda) karakterizus ĉiam la samaj literoj, anstataŭantaj niajn deklinadojn se ĉiuj adjektivoj havus unu konstantan finiĝon, kaj la adverboj—alian, se ĉiuj verboj havus unu infinitivon, aldonante al kiu apartajn literajn, oni povus formi ĉiujn tempojn, se ekzistus iu simila lingvo — ĝia tuta gramatiko prezentus el si tre malgrandan nombron da reguloj. Ĉiuj vortoj estus facile kompreneblaj pro siaj konstruo kaj finiĝo. Sendube, tiu lingvo estus nekompareble pli facila ol ĉiuj lingvoj modernaj. Pere de la gramatiko, kiun oni povus akiri dum unu horo kaj kun bona vortaro — oni povus legi, kompreni kaj skribi en tiu lingvo.»

Tiaj estis principoj de M a u p e r t u i s. Nia kono de la nuntempaj projektoj de artefaritaj lingvoj konfirmas la tutan vivkapablon kaj bazitecon de la konstatoj de M a u p e r t u i s.

Entute oni devas substreki la esceptan klarecon de la rezonado de M a u p e r t u i s. En la sama disertaĵo, iom pli supre, li skribas, ke la filozofia sistemo de universala lingvo sendube havos neniun sukceson, ĉar la filozofiaj perceptoj kaj esprimoj de D e s c a r t e s estus fremdaj kaj nekompreneblaj por la pli malfruaj N e w t o n kaj L o c k.

Per evoluigo de la celado al prefera perfektigo de solaj gramatikaj formoj kelkaj scienculoj penis daŭrigi la esplorojn de siaj antaŭuloj kaj eltrovi skemon de universala gramatiko.

Plej grava el laborantoj sur tiu kampo estis franco C o u r t d e G e b e l i n [2], kiu starigis kiel sian apartan celon: elpreni la elementojn de la universala gramatiko el ĉiuj lingvoj kaj per konforma maniero akceli ilian pluan evoluon.

**J. H. Lambert (1764)**

Germana fizikiisto kaj filozofo L a m b e r t (1728—1777) en la II parto de sia ĉefverko [3], konstatas ke la problemo de universala lingvo kaj de la arta reguligo de la lingvoj estas plene maturiĝinta.

P. S t o j a n ([40]) registris 4 pliajn verkojn de L a m b e r t, en kiuj li pritraktis la ideojn de logistiko kaj idea klasifiko — laŭ maniero iniciatita de L e i b n i t z.

**Michaelis (1759)**

Kiom pli serioze oni komencis trakti la tutan problemon de la universala lingvo, montras speciala disertaĵo pri la problemo de la lingvo, de M. M i c h a e l i s, prezentita de li en la jaro 1759 al la Prusa akademio.

La disertaĵo de Michaelis, verŝajne germanlingva, ne estis eldonita, sed ĝiaj franca [4] kaj angla tradukoj aperis en la jaroj 1762 kaj 1769.

En la franclingva eldono (kompletigita kompare al la germana) la parto kvara de tiu ĉi disertaĵo estas dediĉita al analizo de la demando: ĉu estas inventebla scienca lingvo?

Ne neigante ĉiujn mankojn de la naturaj lingvoj, M i c h a e l i s opinias, ke oni povas ilin forigi nur en lingvo filozofia, ĉu parola, ĉu skriba, sed li dubas, ĉu estas eble eltrovi tiun lingvon? M i c h a e l i s ne vidas kaj ne scias alian solvon de la problemo, krom tiu, kiu estis supozata de liaj samtempuloj, adeptoj de la aprioria metodo. Tute juste

---

[1] «Dissertation sur les différents moyens dont les hommes se sont servis pour exprimer leurs idées». Oeuvres de Maupertuis, Lyon, 1756, vol. III, pĝ. 467 ([45]).

[2] Court de Gebelin, «Histoire naturelle de la parole», Paris, 1776 ([45]).

[3] Joh. Heinr. Lambert, «Neues Organon oder Gedanken über die Erforschung und Berechnung der Wahren», Leipzig, 1764, II. Teil, «Semiotik», S. 42 ([45]).

[4] M. Michaelis, «Dissertation sur l'influence des opinions sur le langage et du langage sur les opinions», Bremen, 1762 ([45]).

li montras ke estas neeble atingi la plenan kaj nediskuteblan sistemigon de la ideoj, esprimataj per vortoj. Kiel ekzemplon li montras la ideon pri geedziĝo, ligitan kun la ideo pri eduko de la infanoj, kiuj ideoj estas tre diversaj ĉe la popoloj monogamiaj kaj poligamiaj. En la ekzistantaj ideoj kaj en ilin esprimantaj vortoj estas tro multe da kondiĉaĵoj. La ideo, esprimata per vorto, estas difinata ne nur per la vorto mem, sed ankaŭ per ĝenerala loko de la vorto en iu konkreta frazo (per ordo de la vortoj).

Michaelis antaŭvidas la neeviteble embriiĝontajn novajn ideojn kaj novajn konceptojn, kies apero alportos ankaŭ novajn formojn de la lingvo. Sed ĉiu filozofia lingvo esence estas lingvo ŝtonigita. Ĝi povas esti lingvo de iu sekto, lingvo de iuj doktrinanoj, sed ne lingvo de la scienco nek, des pli, lingvo universala.

Tiamaniere Maupertuis kaj Michaelis reciproke suplementas unu la alian: la unua montras la venontajn formojn de la tuthomara lingvo, la alia — submetas al severa kaj nerifutebla kritiko la penadojn filozofisisteme konstrui la vortaran materialon de tiu ĉi lingvo.

Unu el la unuaj pioniroj de l'enciklopediismo, Faiguet de Villeneuve en la fama enciklopedio de la sciencoj, artoj kaj metioj de 1765, eldiras siajn opiniojn pri la ebleco krei racionalan aposteriorian lingvon, aŭ kiel li nomas ĝin: «Langue nouvelle». **Faiguet (1765)**

La artikolo de Faiguet prezentas skizon de racionaligita kaj simpligita gramatiko.

La nova lingvo, laŭ opinio de Faiguet, devas havi nek artikolojn, nek diversecon de la genroj. La adjektivoj, «simile al la adverboj» devas esti neŝanĝeblaj. La substantivoj en la multenombro finiĝas per s. La kazojn anstataŭas prepozicioj. La personaj pronomoj: jo, to, lo, no, vo, zo. La verboj ŝanĝiĝas laŭ la tempoj, sed restas neŝanĝataj laŭ la personoj kaj nombroj. Estas rimarkindaĵo, ke la verbaj finiĝoj: de tempo estanta -as, pasinta -is, estonta -os, participo -ont- koincidas kun la formoj, tute memstare akceptitaj multe pli malfrue por la lingvo Esperanto. Ĝenerale la projekto de Faiguet estas praktika realigo de la plano de Mopertuis. Faiguet ne faris provojn ellabori la vortaron, opiniante «ke tian entreprenon povus plenumi nur la sciencakademioj de Eŭropo, kondiĉe ke ilin subtenos la organoj de regna aŭtoritateco».

La anglo William Jones, fama orientalisto, prezentis en la jaro 1769 traktaton pri la universala gramatiko, servonta eventuale al starigo de filozofia kaj universala lingvo [1]. **W. Jones (1769)**

En la jaro 1771, en sia nova verko («An Essay toward...») li daŭrigis disvolvi siajn ideojn.

En la sama jaro 1769, en Dublin, N. Chamberlaine publikigas alian traktaĵon pri logistiko kaj filozofia lingvo [2]. En kelkaj bibliografiaj indikiloj, en kies nombro estas ankaŭ «Bibliographia britannica» de 1824, la eldonjaro de tiu ĉi libro estas erare montrita, kiel 1679. **N. Chamberlaine (1769)**

Francesco Soave en la jaro 1772 esploras la problemon de «la kimera ideo pri universala lingvo [3]». **F. Soave (1772)**

---

[1] Jones, «The philosophy of words, containing among other a plan for a universal and philosophical language», London, 1769.

[2] Nath. Chamberlaine, «Tractatus de litteris et lingua philosophica», Dublin, 1769.

[3] Francesco Soave, «Ricerche intorno all'instituzione naturale di una societa e di una lingua», Milano, 1772.
En la j. 1774 aperis la sama libro en Roma sub nomo glice Ceresiano.

La aŭtoro opiniis ebla krei, sed ne enkonduki la lingvon universalan.

Tiu ĉi libro estis reeldonita sub literoj P. S. en la jaro 1816, en Milano, en la eldono de la verkaro de jezuito S o a v e (mortis en j. 1806).

**G. Kalmar (1772)**

En la jaro 1772 hungaro Kalmàr eldonas latinlingve sian projekton de originala filozofia skriba lingvo [1], por kiu li utiligis la skribsignojn de diversaj popoloj — precipe tiujn de Malabar.

La nomita libro enhavas ĝeneralan parton de gramatiko de pazigrafia lingvo kaj kiel suplementojn: modelajn tradukojn (pli vere skribajn «transponojn») el diversaj aŭtoroj.

La ĉefa manko en la sistemo de K a l m à r estas multeco da bazaj signoj, kiujn antaŭ ilia presado oni devis prepari laŭ speciala mendo. Tiu ĉi obstaklo neigis la alian «pozitivan» econ de la sistemo — ĝian mallongecon.


B e r g e r ([19]), analizante la projekton de K a l m à r, kritikas la arbitran kaj sensisteman elekton de diversaj signoj, ties malfacilan ellerneblon kaj neestetikecon.

La nombron de la fundamentaj signoj K a l m à r supozis limigi per 400 signoj, prenitaj el la alfabetoj de diversaj popoloj, el kemio, algebro ktp.

Tiamaniere, ekzemple, en lia sistemo My signifas homon, t — tempon, b — benon, r — skribon. Vaste uzis K a l m à r mallongigitajn vortojn por nomoj, landoj, reĝoj ktp., ekz. Ru — Rusio.

Kiel ekzemplon de la skribsistemo de K a l m à r ni donas la tradukon de sekvanta frazo:

«La (ĉielaj) solidoj efikas unu la alian per tri diversaj manieroj: aŭ per ilia senpera kontakto, kiel ĉe ordinara kolizio...»



En la franclingva antaŭparolo al sia latinlingva libro K a l m à r diras, ke li preparis por preso kiel manuskripton grandan verkon da 40 folioj, kiu enhavas la «etimologiajn, sintaksajn, poeziajn, retorikajn kaj matematikajn» regulojn de lia lingvo. Samtiel li intencis publikigi france kaj latinlingve la vortaron, ampleksantan manuskripte 60 foliojn, sed la efektivigon de tiu ĉi projekto li dependigis de la sukceso de la supozita antaŭabono. K a l m à r ne sukcesis vidi la pluan realiĝon de sia projekto. La tempolimo por lia eksterlanda forpermeso finiĝis kaj li estis devigita reveni sian patrion, Hungarion. Jam en la jaro 1774 li aperigis en Wien germanlingve «Gramatikajn regulojn de la universala lingvo», en kiu estis cititaj reeĥoj de la gazetaro al la unua latinlingva eldono. Unu jaron antaŭe, en Romo, aperis lia unua itallingva verko [2]. Elĉerpaĵo el tiu ĉi verko estis presita tuj post ĝia apero, laŭ la atesto de G i g l i, (1818 j.) en la «Nova literatura ĵurnalo de Italio [3]».

---

[1] Georg Kalmar, nobile hungaro de Tapoltzafo, «Praecepta grammatica atque specimina l Knguae philosophicae», Berlin, 1772 ([45]).

[2] G. G. Kalmar, «Pecetti di grammatica per la lingua filosofia universale...», Koma, 1773 ([46]).

[3] «Nuovo Giornale dei letterati d'Italia», tomo V, sett. e ottobre, 1773.

La fama scienculo C o n d o r c e t en la jaro 1774 dediĉas kelkajn paĝojn al esploro de la problemo de filozofia sistemo de la lingvo, identigante tiun lastan kun algebro [1]. Entute kaj ĝenerale C o n d o r c e t estis adepto de l'ideoj, donitaj de L e i b n i t z kaj li nur volis pliprofundigi ilin. **Condorcet (1774)**

La universala lingvo en imago de C o n d o r c e t devus esti formita el esprimoj, difinantaj simplajn kaj ĝeneralajn ideojn, kiuj, siavice, devus doni la eblecon por la plej diversaj kombinoj en la esprimado de la ideoj komplikaj kaj kompleksaj. C o n d o r c e t opinias, ke tia lingvo ne estas kimero, sed reala eblaĵo, ke en kelkaj faksciencoj (ekz. en kemio) ĝi jam embriiĝis kaj ke en la estonteco ĝi servos, kontinue pliperfektiĝante, al la plua progreso de la sciencoj.

En pluraj publikigaĵoj de la enciklopediistoj apud traktado pri logistiko kaj universala gramatiko estas tuŝata ankaŭ la problemo de universala lingvo. Estas informoj, ke eĉ la gvidanto mem de la enciklopediistoj, d'A l a m b e r t, ĉirkaŭ la jaro 1770 prilaboris proponojn, koncernantajn la starigon de universala lingvo (10).

P. S t o j a n (40) notas verkaĵon de D. C h o f i n «Amusements Litteraires» (Halle, 1770), kiu kvazaŭ pritraktis la problemon pri universala skribo. Tamen laŭ L. E i n s t e i n (16) D. S. C h o f i n en plej bona okazo apenaŭ priparolis la mondlingvajn ideojn de L e i b n i t z.

Laŭ atesto de P. S t o j a n (40) iu J. B u s c h en la j. 1787 en speciala libro pritraktis la avantaĝojn de la nacio, kies lingvo iĝus universala [2]. Tre verŝajne temas pri la sama aŭtoro, kiu, signinte sin G. E. Busch, iom pli malfrue dediĉis artikolon en la «Jarlibro de la sciencsukcesoj» («Jahrbuch des Fortschrittes der Wissenschaft», 1799, II. Th., S. 534—53 ) al la problemo de kreota pazigrafio. **Busch (1787—1799)**

La enciklopediisto C o n d i l l a c (elp. Kondiljàk) eldiris siajn opiniojn pri logika aprioria lingvo. Al la sama temo ankoraŭ pli profunde li revenas post la Franca revolucio en sia libro «Lingvo de la kalkuloj». [3] **Condillac (1780)**

P. S t o j a n (40) atestas, ke alia pli frua verko de C o n d i l l a c «Traité des sensations» sugestis al P. J. C h a n g e u x la ideon krei filozofian lingvon, bazitan sur ideologia sistemo de koncentraj zonoj, sferoj kaj surfacoj. P. J. C h a n g e u x publikigis en la j. 1767 siajn ideojn pri tiu temo kaj speciale pri ideografio kun sinoptikaj kaj analitikaj tabeloj [4]. **P. Changeux 1767**

En la jaro 1779 germana fizikisto K r i s t i a n o B e r g e r aperigis sian verkon pri la problemo de universala lingvo [5]. **D-ro K. Berger (1779)**

Por atingi la finan solvon de la problemo de universala lingvo, B e r g e r opiniis necesa intervenon de registaroj, sen ĝi la simila provo ne elirus el la limoj de esploroj ĉe kelkaj apartaj personoj. Limigi sin per sola cifera signado de la vortoj kaj ideoj, kiel tion faris B e c h e r kaj liaj adeptoj, B e r g e r pensas neeblaĵo. Li skribas: «Simila cifera lingvo estos facile komprenebla kaj oni facile ĝin skribos, se oni nur havos ĉiam

---

[1] Condorcet, «Esquise diun tableau historique de progrès de liesprit humain», Paris, 1774 (45).

[2] J. Busch, «Ueber die Frage gewinnt ein Volk in Absicht auf seine Aufklaerung dabey wenn seine Sprache zur Universal-Sprache wird», Berlin 1787 (48).

[3] Condillac, «Art de penser», 1768 kaj «Langue des calculs», Paris, 1796.

[4] Changeux, «Traité de extremes ou élements de la science de la realité», t. II, Amsterdam, 1767, p. 289—323.

[5] Dr. Christ. Gottlieb Berger, «Plan zu einer überaus leichten, unterrichtenden und allgemeinen Rede und Schriftsprache für alle Nationen», Berlin, 1779 (45).

4*

apude la respektivajn vortarojn, sed sen tiuj ĉio fiaskos, ĉar estas bezona escepte bona memorkapablo por ne erari meze de multaj miloj da nombroj». La literaj vortoj estas pli facile memoreblaj, ĉar kun ili pli proksime ligiĝas la sonaj kunrilatoj. La sola preferaĵo de la ciferSignoj kompare kun aliaj pazigrafiaj signoj troviĝas, laŭ opinio de Berger, en la ebleco pli facile vicigi la ciferajn signojn en severe konsekvenca ordo.

Li citas la opinion, eldiritan de Leibnitz, ke «ekskluzive skriba, ne parolata, lingvo estas lingvo sen animo». Pro tio Berger faras jenan aserton: «Kiu volus krei perfektan skriban lingvon, tiu devus antaŭe krei perfektan parolan lingvon.» Tamen difinitajn, konkretajn proponojn li ne donas kaj sin limigas per ĝenerala trarigardo de la pli frue kreitaj sistemoj de artefaritaj lingvoj kaj per apartaj notoj, similaj al: «la pazigrafiaj signoj de Wilkins estas por mi pli plaĉaj o lia lingvo», aŭ: «la universala lingvo devas esti lingvo plej koncentrigi la, en kiu per malgranda nombro da vortoj oni povus esprimi tiom, kiomt en aliaj lingvoj oni esprimus per granda nombro da vortoj». Laŭ opinio de Berger, ĝi devas esti riĉega lingvo kun treege simpla gramatiko: kun unu deklinacio por ĉiuj tri genroj, kun neŝanĝeblaj vortradikoj kaj sen iu escepto, sen memstaraj kontraŭsencaj aŭ negativaj vortoj (ekz.: bona—malbona, alta — malalta, — ĉiuj similaj vortoj formiĝas pere de respektivaj gramatikaj afiksoj), kun unuforma konjugacio en la tri tempoj ktp.

Finfine Berger fiksas sian elekton ĉe aparta sistemo de pazigrafiaj signoj, taŭgaj kiel por esprimado de ideoj, tiel same por trasdono de ciferoj kaj literoj, t. e. por legado. Elektante tiujn signojn, li permesas al si plenan arbitrecon kaj tute forgesas pri la ĵus indikita valora observo, ke la samtempa al li scienco jam akceptis serion da internaciaj pazigrafiaj signoj, kiel ekzemple la signoj de la mezepoka alkemio kaj de astronomiaj formuloj:

▽ = akvo
▽ = fajro
○ = oro
☽ = arĝento
♀ = kupro (en la astronomio=Venuso).

Berger proponas muldi por la presejoj tute identajn signojn de la sube montrita speco (a), en kiuj la vertikala linio konformiĝus al la kresto kaj la sep horizontalaj punktoj kaj linioj — al apartaj kavaĵetoj, en kiujn laŭ la bezono oni povus fiksi tiujn aŭ aliajn simplajn pazigrafiajn signojn: streketojn, cirklojn, duoncirklojn, komojn ktp. Entute ekzistis 24 specoj da helpaj flankaj signoj. La ĝenerala aspekto de la pazigrafiaj signoj de Berger estas kiel ĉi sube, simila al la ses signoj de la signaro (b)


Ĉiu signo de Berger krom la esprimo de certaj ideoj, povas montri ankaŭ nombrojn (v. signon c). Laŭ la alfikso de la helpa signo, montranta ciferon, al tiu aŭ alia loko (a, b, c, d, e, aŭ f) de la vertikala linio, rezultiĝas unu-, du-, tri- ktp. -signaj nombroj. Milionoj do, kiel sessignaj nombroj, rezultiĝas tiamaniere tre simple. Por montri la nombrajn signojn estas metata horizontala streketo super la tuta signo.

Por esprimi diversajn tempoperiodojn Berger proponas jenan pure apriorian filozofian sistemon:

a —estanta tempo (nuna momento),
e —horo,
o —tago,

ai —semajno,
i —monato
oi—jaro,
au —jarcento,
é —jarmilo,
u —miliono da jaroj,
í —eterneco.

Tiaj estas bazaj principoj por la konstruo de racionala pazigrafio, laŭ la opinio de B e r g e r. B e r g e r ne donas vortaron por la de li proponata sistemo de pazigrafio kaj sin limigas nur per kruda skizo de la suprenomitaj bazaj principoj. La aŭtoro havis planon por la plua prilaboro kaj ekzaktigo de sia sistemo, sed ĉu li sukcesis tion efektivigi— ni ne scias. Ĉiuokaze nenia plua verko de B e r g e r estis presita kaj la Prusa akademio de sciencoj, al kiu la libro estis dediĉita, kvar jarojn




a b c

Signaro de Berger

poste, la 3-an de junio 1784, aljuĝis la premion al R i v a r o l kaj M. S c h w a b por iliaj disertacioj pri la «Universaleco de la franca lingvo»—«Universalité de la langue française» [1] ([40]).

**Ideo de la universala lingvo ĉe la pensuloj de la XVII jarcento**

En grandskalaj verkoj kaj vortaroj de la francaj pensuloj el tiu ĉi antaŭrevolucia epoko ni trovas penson pri universala lingvo. Ni renkontas ĝin ankaŭ ĉe V o l t a i r e ([40]). B e a u z é e en la jaro 1789 dediĉas al universala lingvo grandan artikolon en «Dictionnaire de grammaire et de littérature» (Liège). Laŭ artikolo en hungara esperantogazeto P. S t o j a n ([40]) notas, ke en la jaro 1791 iun projekton de universala lingvo prezentis F. K e m p e l e n. Cetere, laŭ la sama S t o j a n, tiu ĉi F. K e m p e l e n en la jaro 1781 publikigis en Wien la verkon «La méchanisme de la parole».

Ankaŭ G. B. V i c o (1668—1744), itala filozofo, juristo, historiisto kaj kritikisto, unu el plej distingaj sociologoj, antaŭperceptinta kelkajn teoriajn konceptojn de la marksismo, — pritraktis en sia plej fundamenta verko «Principii di una scienza nuova d'intorno alla comune natura dele nazioni» (1-a eld. en 1725, la IV-a, korektigita, en la jaro 1744) la problemon de la lingvo. La lingva enhavo — laŭ V i c o dependas de la socia ideologio, de la kolektiva konscio de la homoj. La lingvoj kaj ideoj evoluas laŭ certaj vojoj, sekvante la evoluon de aĵoj, de «materia kulturo»— laŭ la nuntempa frazeologio. Laŭ V i c o estus jam nun eble krei «unu intelektan vortaron». En tiuj ideoj de granda sociologo de la XVIII jarcento respeguliĝas same la kredo je homa intelekto, kiu kapablos krei novan perfektan lingvon. Estas interese noti, ke V i c o kunlaboris al la Leipzig-aj «Acta Eruditorum», en kiuj estis publikigita la proponoj de C a r p h o r o p h i l u s (1732 j.). [2]

Iom pli poste, en la jaro 1774, M o n b o d d o en sia libro [3] ([20]) donas seriozan atenton al la problemo pri kreo de artefarita lingvo kaj en la XIII. ĉapitro de II. volumo submetas al detala analizo la projek-

[1] Larousse, «Grand Dictionnaire de XIX siècle».
[2] Vidu artikolon de Maksimovskij en la IV vol. de «Arkivo de Marx kaj Engels» (ruslingve). Moskvo, 1929.
[3] Lord Monboddo, «Origin and progress of language», Edinburgh, 1774.

ton de Wilkins. Kaj en la XIV. ĉapitro de la sama volumo, li aparte substrekas la eblecon kaj bezonon de la arta reguligo de ĉiuj lingvoj kaj unuavice de ties gramatikoj.

Tia rilato flanke de certa kvanto da scienculoj kaj lingvistoj de tiu tempo trovas por si klarigon en ilia celado al starigo de filozofiaj kaj logikaj lingvonormoj. Celante la racionalan komentariadon de la formoj ĉe la ekzistantaj lingvoj, tiuj aŭtoroj en plia aŭ malplia grado konscie kaj klare traktis la problemon de universala lingvo, en kiu forestus kontraŭdiroj kaj logikaj absurdaĵoj, propraj al la lingvoj naturaj. Tre signifan, laŭ sia kompleteco, indekson de ĉiuj ekzistantaj verkoj pri la problemo donas en sia libro pri universala lingvo-scienco J. Vater (23).

Aparte necesas noti la francan historiiston Ch. de Brosse; kiu, verkinte profundan verkon pri la lingva mekanismo [1], rekomendis, ne elpensadi artefaritan lingvon kaj speciale la lingvon ciferan. De Brosses insistis pri tio, ke oni serĉu bazon de universala lingvo en naturaj lingvoj mem. Tiuj ideoj — tre kuraĝaj por sia tempo — estas fakte la ideoj, kiuj inspiras la plej modernajn el la nunaj mondolingvistoj.

La fortsonoraj akordoj de la granda franca revolucio, pro kiuj embriiĝis en la koroj de la plej bonaj homoj de tiu epoko la ideo pri tutmonda unuiĝo de l'homaro, estigis nombron da novaj adeptoj kaj propagandistoj por la ideo de universala lingvo.

**Ampere (1793)** Juna, dekokjara Ampère, la estonta granda fizikisto, kreis en la j. 1793, filozofian sistemon de lingvo kaj eĉ skribis kelkajn poemojn en «sia» lingvo. Tiu ĉi lia verko ne estis presita [2].

**Delormel (1795)** En la j. 1795 — en la 3-a jaro de la franca revolucio — civitano Delormel prezentis al la Nacia Konvencio projekton de universala lingvo [3].

Delormel celis «kunigi la homojn kaj popolojn per delikataj ligiloj de frateco», pere de komuna, logika kaj regula lingvo, ĉar la naciaj lingvoj «prezentas ĉiupaŝe malregulaĵojn, kiuj faras tiujn lingvojn malfacilaj kaj postulas daŭran tempon por ilia ellerno». Treege grava estas ankoraŭ unu frazo de Delormel, ke li «ne konsideras en tiuj vortoj—lingvon, kiu forigus aŭ anstataŭigus la aliajn». Firmiĝis la ideo de universala helpa lingvo. Ĝi estas granda merito de Delormel.

En sia raporto al la Konvencio Delormel montras ke lia projekto posedas du preferaĵojn: 1. ĝi akcelas la klasifikon de la homaj ideoj kaj de la elementoj de ekzaktaj sciencoj, kaj 2. ĝi proksimigas la starigon de artefarita universala lingvo, simila al la universala maniero de kalkulo.

La gramatiko kaj vortaro de lia lingvo estas tute aprioriaj. La vortaro estas bazita sur logika klasifiko de ideoj, kun decimala bazo. Tial la alfabeto enhavas dek vokalojn kaj dudek konsonantojn. Pro tio oni devas rekoni Delormel kiel antaŭeltrovinton de la nun ekzistantaj bibliografiaj sistemoj kun la decimala klasifiko de ideoj kaj konceptoj (9), se ni ne kalkulos iometajn skizprojektojn, koncernantajn la decimalan klasifikon, kiujn entenas la projekto de Berger, ĝis fino ne prilaborita.

---

1 Ch. de Brosses, «Traité de la formation mechanique des langues». Paris, 1765. Nova eldono de la j. 1801, la rusa traduko de A. Nikolskij estis eldonita en la j. 1821—22 de la S. Peterburga Akademio de sciencoj.

2 Littré, «Biographie d'Ampère» en «Essay sur la philosophie des sciences», Paris, 1843.

3 Delormel, «Projet de la langue universelle présenté à la Convention nationale», l'an III (1795), Paris.

Same kiel D a l g a r n o kaj W i l k i n s, D e l o r m e l dividas ĉiujn ideojn je bazaj klasoj, signataj per apartaj literoj. La pluaj subklasifikoj de la ideoj kaj ties respektivaj vortoj formiĝas per aldono al la unua litero de la literoj sekvantaj kaj per enmeto de apartaj literoj.

Ekzemple:

| | |
|---|---|
| Ava | —gramatiko |
| Ave | —litero |
| Alve | —vokalo |
| Adve | —konsonanto; l kaj d estas enmetataj meze |
| Avi | —silabo |
| Avo | —akcento |
| Avau | —vorto |
| Alvau | —nomo |
| Alavau | —ĝenerala nomo |
| Alevau | —propra nomo |
| Alivau | —radikvorto |
| Alidvau | —derivita vorto |
| Alizvau | —kunmetita vorto |

La Konvencio, en sia kunsido de la 26 de Brumero de III jaro (la 16-an de novembro de 1794), aŭskultinte la raporton de D e l o r m e l, «respektante la majestecon de la ideo, kiun prilaboris multaj scienculoj de la lasta jarcento», sendis la projekton de D e l o r m e l al la komisiono de popolklerigo.

«Ni devas nur deziri», ekkriis dum la kunsido de la Konvento civitano B a r a i l o n, «ke la petanto (Delormel) povu helpi al la homaro trovi sin mem, forigi la izolecon de apartaj popoloj» [1].

La projekto de D e l o r m e l estis entombigita en la komisiono de la Konvencio. La monda reakcio sufokis Francion. La heroa revolucia popolo estis devigita flankenmeti siajn kulturajn provojn, por defendante sin, preni armilojn en la manojn.

Ĉe L. E i n s t e i n en artikoloj presitaj en «Rund um die Welt» (1888) kaj ankaŭ en kelkaj aliaj lokoj ni trovas la nomon D e l o r m e l erare ŝanĝita je D e - C o r n e l ([40]).

Sed la ideo de la universala lingvo ne estis forgesita. En la j. 1797 eksmajoro, invalido de la germana infanterio, de M a i m i e u x, loĝanta en Parizo, aperis publike kun sia zorge pripensita kaj prilaborita projekto de universala skribo [2]. **De Maimieux (1797)**

La unuan fojon en tiu ĉi libro la universala skriba lingvo estas nomata «pazigrafio». Ankoraŭ en la j. 1789, en la kapitala eldonaĵo de la enciklopedistoj «Dictionnaire de grammaire et de littérature» (Liége), kie oni parolas pri la universala lingvo, la termino «pazigrafio» ne estas renkontata. La aŭtoroj, sekvintaj post d e M a i m e u x, komencas doni ĉi tiun nomon al ĉiuj siaj respektivspecaj projektoj.

La enhavon de la libro de M a i m e u x, antaŭiras letero de la gvidanto de la Pariza instituto por surdmutuloj, R. A. S i c a r d, datumita la 7-an de sept. 1797. S i c a r d parolas pri multaj jaroj, malŝparitaj de la aŭtoro por la elfaro de lia sistemo de pazigrafio kaj ankaŭ pri la granda socia interesiĝo koncerne la eldonatan verkon, pri kiu oni faris provizoran anoncon jam en novembro de 1795. S i -

[1] «Moniteur», 27 brumaire III (17. XI.1794), pĝ. 245 ([45]).

[2] «Pasigraphie ou premiers élements du nouvel art-science d'écrire et d'imprimer en une langue de manière à etre lu et entendu dans toute autre langue sans traduction, inventés, et redigés par J. de M., ancien major d'infanterie allemande. D'édition originale comme l'édition en langue allemand à Paris», Bureau de Pasigraphie, 1797 ([45]).

card konfirmas, ke li estis promesinta redakti la verkon de Maimieux, sed fakte, pro sia laborŝarĝiteco, ne povis plenumi tiun ĉi promeson. Plue li antaŭdifinas la neceson eldoni grandan pazigrafian vortaron: «Grand Nomenclateur», kun ekzakta klasifiko de ideoj kaj konceptoj. Sicard, komunikante pri siaj laboroj en tiu direkto, diras, ke certa kvanto da preparaj materialoj jam estas de li kolektita.

Sed nenio sekvis ĉi tiun promeson. Kelkajn tagojn antaŭ la skribo de tiu ĉi letero — la 18-an de Fruktidoro (4-a de sept. 1797) — en Parizo okazis renverso, kiu rezultigis la kondamnon (ekzilon al Cayenne) por la membroj de Direktorio Carnot kaj Barthélemy (rojalisto) kaj krome por redaktoroj kaj eldonistoj de 42 gazetoj. Inter la kondamnitaj eldonistoj troviĝis ankaŭ Sicard (li eldonis «Annales catholiques»). Kvankam Sicard sukcesis sin savi per eskapo, sed tiu ĉi okazintaĵo, verŝajne, ĉesigis lian pluan kunlaboradon kun Maimieux.

En kelkaj malnovaj listoj kaj indeksoj de la franclingvaj eldonaĵoj estas citata preskaŭ analogia laŭ sia nomo libro, eldonita en la sama 1797 jaro sub ĝenerala redakto de la eltrovinto (Maimieux) kaj Sicard; pri la enhavo de tiu ĉi libro unuafoje estas parolate ankoraŭ en la j. 1796, en «Annales religieuses (catholiques)», (vol. I, pĝ. 621), sed Kerckhoffs ([34]) asertas, ke tiu ĉi libro entute ne estis eldonita. Povas esti ĝian aperon malhelpis ĝuste la politika katastrofo, trafinta Sicard. Ĉiuokaze la afero de la propagando por la nova pazigrafio estis tre vaste planita. En Parizo estis establita speciala Oficejo de Pazigrafio, ĉe kiu estis organizitaj sub la gvido de Maimieux specialaj pazigrafiaj kursoj, konsistintaj el 12 prelegoj. Maimieux en la antaŭparolo al sia libro diras, ke dum sia malsano, antaŭirinta la aperon de la libro kaj komence de la momento, kiam oni publikigis la anoncon pri la estonta eldono de la libro, li ricevis preskaŭ 6000 leterojn el diversaj landoj, kiuj atestis la senpaciencan atendadon de lia verko.


Por kontentigi la deziron de la legantoj, la verko estis publikigita en ne tute kompleta aspekto. Per tio estas klarigeblaj apartaj eraroj kaj mankoj en la korektado, renkontataj en la libro. Sed Maimieux trotaksis la facilecon de sia sistemo. Schmid ([18]) diras ke fakte eĉ dum 24 horoj (neniel dum 12, kiel asertis Maimieux) estas neeble ellerni la sistemon de Maimieux.

Por la bazo de sia sistemo Maimieux prenis logikan klasifikon laŭ la dekdusigna sistemo. En ĝi estas analogieco kaj samtempe malsameco de la projekto de Maimiuex kontraŭ la aliaj projektoj de ciferaj lingvoj. En tiu kaj alia okazo oni manipulas per difinita nombro da konstantaj signoj (10 aŭ 12), kiuj en certaj kombinoj donas la esprimojn por difinitaj ideoj kaj perceptoj. La malsameco kuŝas en la pli grandaj ĉe Maimieux klasifikaj eblecoj, ĉar por la bazo de lia klasifika sistemo estis akceptita pli granda nombro: en la decimala sistemo per kombino de du signoj el la dek oni povas esprimi 00—99, entute 100 ideojn; en la dekdusigna sistemo per du signoj oni povas esprimi 144, kaj per tri signoj (anstataŭ mil) entute 1728 ideojn kaj konceptojn.

La pazigrafiaj signoj de Maimieux, konformaj al la ciferoj de la sistemo de Leibnitz, estas donitaj sur la p. 57.

La kombinaĵoj el 3, 4 kaj 5 signoj formis la tutan vortaron de la lingvo. La vortoj (ideoj) el tri signoj (1-a grupo) prezentis per si interjekciojn (ekz. : ho, ho ve!) kaj neŝanĝeblajn partojn de la parolo (ekz.: antaŭ, malantaŭ, bone, malbone ktp.). La vortoj el 4 signoj (2-a grupo,)


donis esprimojn por objektoj, agado kaj abstraktaj ideoj. Kaj la vortoj el 5 signoj esprimis ĉion, kio ne enkadriĝis en la 1-a aŭ 2-a grupoj. Por esprimi la gramatikajn ŝanĝojn estis uzataj aldonaj signoj: punkto, komo, streketo ktp. La tuta gramatiko konsistis el 12 reguloj.



1 2 3 4 5 6 7 8 9 10 11 12


Pazigrafia gamo de Maimieux

La ĝenerala aspekto de la skribo estis jena:





Vcrto „Pazigrafio“ en signoj de Maimieux

La preferindecoj kaj oportunaĵoj de la sistemo de cifersignoj en la laŭgrada vico ĉe la kombino de pazigrafiaj ciferaj vortaroj estis de M a i m i e u x konservitaj. En lia vortaro apartaj skribitaj vorto venas en la sama rigore laŭsekva ordo:



Mallonga pazigrafia vortaro, aldonita al la libro por ĝia pli bona utiligo, estis dividita je apartaj fakoj por la esprimoj konsistantaj el 3, 4 kaj 5 signoj. Laŭ la metodo de M a i m i e u x per pazigrafiaj signoj estis enĉifrataj ne nur ideoj kaj konceptoj, sed eĉ landnomoj, propraj nomoj ktp., sed tio estis pli vere ne enĉifrado, sed apliko de nova pazigrafia sona alfabeto, akomodita por elparolo; tiel ekzemple la nomo L e i b n i t z laŭ la sistemo de M a i m i e u x estis jene skribata:



En la sama 1797 jaro estis publikigita germanlingve verko de J. v o n M o r a t h, dediĉita al la nova dekdusigna sistemo de pazigrafio [1].

Supozeble J. v(on) M (orath) estas identa kun J (oseph) d(e) M(aimieux). En la prilaboro de granda pazigrafia vortaro «Grand Nomenclateur» partoprenis scienculoj de ĉiuj sciencaj fakoj kaj el ĉiuj landoj de Eŭropo, sed tiu verko ne publikiĝis. El la presejo aperis nur 10 folioj da suplementoj al «mallonga nomenklaturo», enhavata en la unua libro de M a i m i e u x. Post kelkaj monatoj, sekvintaj la aperon de la libro de M a i m i e u x, la 13-an de nivozo de VII. jaro (la 2-an de januaro 1798) en la konsilantaro de senioroj estis juĝata la peto de J o s. S u r e a u, verŝajne de iu el adeptoj de M a i m i e u x, dediĉita al la dekdusigna sistemo de pazigrafio — universala skribo. G a r a t, la estinta ministro de justico de la Konvencio, en sia parolado bonvenigis la projekton kaj ideon de S u r e a u. La konsilantaro de senioroj decidis presigi la paroladon de G a r a t en aparta presfolio. Bedaŭrinde, krom

[1] J. Von Morath, «Pasigraphie oder Grundlegung der Kunst die 12 Zeichen so zu schreiben, dass alle Nationen es verstehen können», Paris und Altona, 1797.

la protokolo de tiu ĉi kunveno en «Journal des Débats» de la 5-a de januaro 1798, tiu ĉi penado lasis neniajn aliajn postsignojn [1].

F. M. Dumont de Boneville perfektigis la sistemon de Maimieux («Noématopasigraphilalie ou méthode complète de pasigraphilalie d'après le système de pasigraphie de M. de Maimieux»), transforminte ĝin je parolebla lingvo, sed tiu ĉi lasta verko verŝajne ankaŭ restis en sola manuskripto. En la j. 179) aldone al la lernolibro de pazigrafio de Maimieux estis eldonitaj ankoraŭ tri lecinoj, transformantaj la pazigrafion je pazilalio, t. e. je parollingvo. Tiu ĉi eldonaĵo havas titolon «De pasigraphie et pasilalie» (48). Firmas Péries [2] diras pri la dua eldono de la libro de Maimieux, rilatanta al la jaro 1801.

En la j. 1808 en Parizo Maimieux publikigas franclingve sian ĝeneralan karton de pazigrafio. Iom pli poste, en la j. 1811 certan reprilaboron kaj aldonon donas Firmas Péries sub ĝenerala nomo «Pazitelegrafio». (r. p. 68—69)

Al Maimieux sendube apartenas respektinda loko en la historio de la pazigrafiaj eksperimentoj. Li la unua sciis veki la ĝeneralan interesiĝon pri la ideo de pazigrafio kaj pere de ĝi pri la ideo de universala lingvo. Apartaj adeptoj de liaj ideoj, kiel Firmas Péries, trovis ebla eĉ nomi lin la dua Leibnitz. Li estis elektita kiel membro en la Sciencakademion en Haarlem kaj, kvankam sensukcese, estis proponita kiel membrokandidato por la Sciencakademio de Francio.

**De Gerando (1799)**

Samtempe kun la laboroj de Maimieux, karakterizon de la ideo de universala lingvo donas De Gerando en sia verko pri la arto de pensado [3].

En tiu ĉi verko la aŭtoro antaŭvidis ĉiujn eblecojn kaj malhelpojn por internacia lingvo, kiun li konsideras dezirinda kaj konstruebla, sed neniam enkondukebla por universala uzado. Evidente lia verko tiris al si certan intereson, ĉar la saman jaron, kiam ĝi estis eldonita, De Gerando prelegis pri la sama temo en la «Instituto de la respubliko» Ankaŭ en pli postaj siaj verkoj De Gerando revenas al pritraktado de la problemo pri la lingvo universala (40).

**Grotefend (1799) kaj J. Vater (1799 — 1801)**

En Germanio aperas tiutempe mallonga skizo de pazigrafio, verkita de H. F. Grotefend [5] (filologo, fakulo pri la asira kojnoskribo) en Göttingen kaj la verko de J. S. Vater (germana filologo kaj teosofo, 1771—1826) en Weisenfels [6]. La unua aŭtoro estas erare nomata de Einstein (16) kiel Grotenfeld.

Ambaŭ tiuj aŭtoroj prezentas per si grandan retroiron al la ciferaj signoj, siatempe proponitaj de Becher. La ideon pri utiligo de iuj aliaj signoj, kiel proponis Wilkins, Kalmàr aŭ Maimieux, Grotefend kaj Vater malakceptas. Tiamaniere en la pazigrafio de Vater diversaj ideoj estis signitaj: dio — 51 111, kameno — 71 253, horloĝo — 91 161, ktp. La skizo de Grotefend estas treege supraĵa kaj ĝi ne transpasas la starigon de bazaj tezoj por simpligita gramatiko kaj klasifiko de sciencoj: filologiaj sciencoj — 2,

---

[1] «Lingvo Internacia», Paris, 1907, pĝ. 322—323 (47).

[2] Comte de Firmas Péries, «Pasitélégraphie», Stuttgart, 1811.

[3] De Gerando, en sia «Des signes et de l'Art de penser», 1799, III, 15; IV, 11 kaj 15.

[4] J. De Gérando, «Les vices de la nomenclature pasigraphique. Memoire lu a l'Institut National, Prairial, An VIII (1799). Paris.

[5] Grotefend, «Commentatio de pasigraphia sive scriptura universali», Göttingae, 1799 (46).

[6] Joh. Severin Vater, «Pasigraphie und Antipasigraphie etc.», Weisenfels, 1799. Wild (17) asertas, ke la unua eldono dé tiu ĉi libro okazis en la jaro 1795, en Wien sub la titolo «La Pasigraphie»; la 3-a eldono — en la j. 1809 (49).

aplikaj sciencoj — 3, natursciencoj — 6, matematikaj sciencoj — 26, fizikaj sciencoj — 111, ktp. Apartan intereson prezentas por ni alia libro de V a t e r, eldonita du jarojn pli malfrue ([23]), en kiu li, krom la ĝenerala analizo de la problemoj pri «universala lingvistiko, pri origino kaj evoluo de la lingvoj», analizas ankaŭ problemojn de pazigrafio kaj donas tre signifan, laŭ sia kompleteco, indekson de la verkoj, rilatantaj al la de ni esplorata problemo, kaj aparte al la demando pri filozofio de la lingvo kaj al filozofia «universala» gramatiko.

La vidpunktoj de V a t e r por la rolo de universala lingvo estas tute klaraj: ideala universala lingvo estas kimero; koncerne la filozofian pazigrafion, li opiniis ke la grado de ĝia ekposedo dependos de la grado de mensevoluo de la lernanta individuo, do alivorte la pazigrafio restos la lingvo de scienculoj kaj neniam estos populara interkomprenilo.

**La laboro de la Rusia Sciencakademio**

En tiu ĉi epoko la ideo de la universala lingvo penetris ankaŭ en Rusion. La tipa reprezentantino de la «klereca absolutismo», ĉarino K a t e r i n a  l a  D u a, ekzilante eminentajn intelektulojn kiel R a d i ŝ ĉ e v kaj enkondukante servutecon en la sudaj provincoj de la imperio, daŭre interesiĝis (precipe antaŭ sia surtroniĝo kaj en la unuaj jaroj de regado) pri la evoluo de l'ideoj, venantaj el la Okcidento.

Estas interese noti, ke K a t e r i n a korespondis kun V o l t a i r e, kiu en siaj leteroj sugestis al ŝi ideon pri almilito de Konstantinoplo kaj pri restarigo de la lingvo greka, kiel lingvo tutmonda [1].

Laŭ ordono de K a t e r i n a estis kreita ĉe la Rusia Sciencakademio komisiono, al kiu oni komisiis esploron de la lingvoj kaj aranĝadon de respektivaj komparaj vortaroj, celante la difinon de la ĝeneralaj kaj fundamentaj formoj de ĉiuj lingvoj. K a t e r i n a mem kompilis listojn de egalsignifaj vortoj en diversaj lingvoj kaj por tiu celo ŝi donis kelkajn komisiojn al siaj ambasadoroj, guberniestroj kaj korespondantoj.

La laboro de la akademia komisiono ne estis alkondukita ĝis iuj finaj konkludoj kaj nur en la j. 1787 aperis en la mondon «Linguarum totius orbis vocabularia comparativa» (Petersburg) enhavanta la tekstojn kaj vortojn en ducent, proksimume, lingvoj [2].

**J. De-Ria (1788)**

Unu jaron pli malfrue sviso J. R. D e - R i a de Baulmes, aperis publike en Peterburgo, kun sia klasifiko de signoj (ne ideoj) kaj kun sia universala alfabeto, akomodita por fonetika transskribo de ĉiuj lingvoj [3].

Tra la tuta libro de D e - R i a paralele kun la originala franca teksto sekvas la sama teksto, ree presita franclingve, sed kun ŝanĝita fonetika transskribo. Por sia transskriba sistemo la aŭtoro uzas alfabeton el 24 literoj.

8 vokaloj: a, &, e, i, ⊙ o, u, y

16 konsonantoj: b, d, f, v, g, j, k, l, m, n, p, r, s, t, x, z

La tri novaj vokaloj: &, ⊙ kaj y transdonas la sonojn: mezan inter a kaj e, inter i kaj o, kaj tiun de Esperanta — u.

Kia estas la ekstera aspekto de la «korektita» franca lingvo kun nova fonetika transskribo, oni povas juĝi laŭ la ĉi suba titolo de la libro: «Pal&z do syo&santo e katro fon&tro y la dekriro tyto l&z lango du mondo komo on l& parlo.

---

[1] «Le temps» 2 mai 1869, Paris.

[2] Dr. Max Müller, «Vorlesungen über die Wissenschaft der Sprache», Leipzig, 1863, I. Serie, pĝ. 117 kaj 118.


[3] J. P. De-Ria de Baulmes en Suisse, «Palais de soixante quatre fenêtres, ces fenêtres éclairent au Dictionnaire universel, qui est à la suite de ce magnifique Palais ou l'Art d'écrire toutes les langues du monde comme on les parle», Petersburg, MDCCLXYXVII (1788) ([45]).

Ellaborante sian fonetikan alfabeton, la aŭtoro ne intencis fari iun rompon en la gramatika konstruo de la franca lingvo. Ĉiuj gramatikaj malfacilaĵoj kaj ĉiuj esceptoj de la ekzistanta lingvo estas de li konservataj en sia tuto.

La 60-jara D e - R i a konfesas sian nepreparitecon rilate la sciencojn kaj ankaŭ tion ke «en sia laboro li plejparte orientiĝis laŭnature, sed ne laŭarte».

La proponata de li sistemo de transskribo, laŭ lia aserto, posedas ĉiujn indecojn kaj neniun mankon: «ĉiuj skribos kiel legas kaj legos, kiel skribas; al la infanoj tio faciligos la lernadon de lingvoj». La enhavo de la libro kun liaj oftaj sinturnoj al la «eterna lumo» ktp. malkaŝas en la aŭtoro, ke li estas mistikemulo, iluminato aŭ framasono, kiuj— ĝeneraldire, — estis sufiĉe multenombraj en tiu tempo. Al siaj 24 literoj, grupigitaj je tri grupoj po 8 literoj, D e - R i a emas atribui iun apartan mistikan signifon.

Al tiuj tri grupoj da litersignoj li aldonas ankoraŭ 5 grupojn da aldonaj signoj: la ciferan grupon — 1, 2, 3, 4, 5, 6, 7, 8, tri grupojn da muziknotaj signoj — ut (do), re, mi, fa, sol, la, si, ut — en tri diversaj oktavoj kaj fine grupon da naturaj signoj, «enhavantaj en si la bazajn formojn, renkontatajn en la naturo, kiujn eĉ ĝi ne kapablas ŝanĝi»:



Vico de naturaj signoj de De-Ria

La tiamaniere ricevitaj kompletaj 64 signoj estas tiuj «64 fenestroj», kiujn havas «la belega lingva palaco» de D e - R i a.

Akceptinte la tezon, ke per tiu ĉi sistemo estas esprimitaj ĉiuj eblaj signoj kaj sonoj, D e - R i a venas al konkludo, ke ankaŭ ĉio, ekzistanta sur la tero — «ĉiuj elementoj, tero, fajro, aero kaj akvo en ĉiuj siaj kombinaĵoj devas kaj povas esti figuritaj kaj esprimitaj per tiu ĉi alfabeto».

Kiel pruvon por riĉeco de sia sistemo, li donas sennombrajn kombinaĵojn de la literkunigoj kun unu litero a: a, ab, ad, af, an, ba, da, fa, va, abd, abf, abdf, bddfa, ddka, bdla kaj fine eĉ tiajn kiel: aaaabdfz.

Tiamaniere ricevitajn literajn kaj sonajn kombinojn li nomas universala vortaro («Dictionnaire Universel»). Sur la 63-a paĝo de sia libro D e - R i a skribas: «estas necese sekvi la vojon, kiun mi faris, la vojon de la universala vortaro kaj tiam ni finfine venos en la landon de ĉiuj lingvoj, en la landon de lingvo universala. Ĝi estos tiu bela lando, kie ĉiuj 8 belaj sonoj de la naturo interkombiniĝos per ĉiuj eblaj manieroj».

Ĉe tiu starigo de la problemo, por krei la universalan lingvon, oni devus fari nur unu aferon: fari liston da ĉiuj eblaj sonkombinoj kaj poste doni al ili tiujn aŭ aliajn sencajn signifojn.

D e - R i a komprenis la malfacilecon de la tasko: «mi devas krei universalan vortaron, sed mi min trovas nur sur la vojo, kondukanta al fina kompletigo de mia laboro, kiu povas sin montri iam utila por la universala lingvo kaj por la tuta homaro».

Kaj li ne eraris: irante per tiu vojo, li devus labori multajn jarojn kaj tamen ĉiuj eblaj, senlimaj laŭ la nombro, kombinoj el 24 sonoj kaj literoj estus tute ne elĉerpitaj. Kaj, krom tio, tiujn nombre senlimajn

sonkombinojn bezonas neniu lingvo. La nombro da esprimendaj ideoj kaj konceptoj, estas limigita en ĉiuj lingvoj per certaj limoj.

D e - R i a ne povis en sia libro esprimi eĉ ĉiujn sonkombinojn kun litero a.

Tial li lasas malfermita la demandon pri la estonta universala lingvo kaj, komprenante la tutan praktikan senbezonecon de sia libro, li skribas: «la universala vortaro estas nur indikilo de ĉiuj eblecoj, kiuj povus esti donitaj per kombinaĵoj el la 8 ĉiam belaj kaj mirindaj sonoj de la naturo».

La libro de D e - R i a lasis nenian postsekvon en la plua prilaboro de la projektoj de universala lingvo, sed ĝi estas karaktera montrilo por la konsekvenca evoluo de la kreanta homa penso.

Post cent jaroj la aŭtoro de Esperanto, D-ro Z a m e n h o f, kiel li skribis en sia letero al N. B o r o v k o [1], komencis sian ellaboron de la artefarita lingvo per provoj, en kiuj li uzis la elementajn sonkombinojn.

Du jarojn antaŭ la apero, de la verko de D e - R i a, ankaŭ en Rusio (en Riga), en la jaro 1785, aperis germanlingva traduko de la libro de lordo M o n b o d d o(20), en kiu la problemo de la filozofia lingvo laŭ la tipo de W i l k i n s estis starigita multe pli reliefe.

C . Wolke (1797)

En la j. 1797, la estinta membro de la akademia komisiono, fama lingvisto W o l k e, tiutempe profesoro de la Peterburga universitato, publikigis sian projekton pri la kreo de universala skriba lingvo [2].

En la baza tezaro W o l k e revenas al la projekto de cifera pazigrafio de B e c h e r, kun tiu, tamen, malsama trajto, ke ĉe la fino de XVIII. jarcento por ĉiuj vidiĝis evidenta la neebleco limigi la nombron de bazaj ideoj, senĉese kreskantan kun la kresko de la homa kulturo. Tial W o l k e jam dekomence rifuzas apliki iun similan limigon.

Laŭ la projekto de W o l k e por ĉiu lingvo estis bezona aparta vortaro, kiu devus enteni en si ĉiun vorton kun ĉiuj el ĝi formitaj gramatikformaĵoj. Por korespondi kun alilanduloj oni devus anstataŭ ĉiu vorto noti la paĝon de la vortaro kaj la numeron, sub kiu troviĝas tiu ĉi vorto en la vortaro de la adresito; tiam ĉiu, deziranta tralegi la skribiton, devus serĉi en la vortaro de sia lingvo la paĝon kaj numeron, proprajn al la donita vorto. Sed estus absurdaĵo dismeti ĉiujn vortojn en la vortaroj de malsamaj lingvoj sur la samaj paĝoj kaj sub la samaj numeroj. Tial en ĉiu vortaro devus troviĝi numeroj, propraj al tiu aŭ alia vorto en la vortaroj de aliaj popoloj kaj tiam, ĉe ekzisto de nur 16 naciaj vortaroj, oni devus al ĉiu gramatika formo de la vorto aldoni por indiko ĉirkaŭ 130 ciferojn kaj literojn (16). La lasta do estus tute neplenumebla. P. S t o j a n (40) citas ankoraŭ unu franclingvan verkon de W o l k e, datitan 1805 j. [3].

Tgransar

S t a m a t i a d i s en la gazeto de la grekaj esperantistoj [4] komunikas pri projekto de ankoraŭ unu aprioria lingvo «Sehlerai», ellaborita de armeno T g r a n s a r. La libro de Tgransar portis la nomon «Alphabetarion Ansailanzar Sehlerai» kaj estis eldonita en Smyrna. La eldonjaro de la libro ne estas konata, sed laŭ la havataj informoj ĝi

---

[1] «Lingvo Internacia», Uppsala, 1896, n-o 6—7, pĝ. 117 (47).

[2] C. H. Wolke, «Erklärung, wie die wechselseitige Gedanken-Mitheilung allen kultivierten Völkern des Erdkreises oder die Pasigraphie möglich und ausüblich sei...», Dessau, 1797.

[3] C. W o l k e,—«Communications des connaisances des languse et des idées», 1805 (S. Petersburg).

[4] «Bizantio», 1921, sept.-okt., Konstantinoplo.

estis publikigita en ĉiu okazo ne pli malfrue ol ĉe la fino de XVIII jarcento.

Aparta eco de tiu ĉi sistemo estas ĝia racia alfabeto el 19 konsonantoj de tute nova speco. Krom tio ĝi posedas multajn vokalojn. «Sehlerai» en tiu ĉi lingvo signifas — «movo de penso, intelekto». Ekzemplo de la lingvo: «Rum shai yran bes lerai vom, shaiz il le sam» (=En mondo estu prefere unu scienca lingvo).

Profesoro de Erivana Pedagogia instituto Adĵarian—asertas, ke sub la pseŭdonimo Tgransar — kasiĝis Petros Tenger, armena monaĥo, izoliĝinta en propre konstruita monaĥejo apud Smirna.

Per tio ni finas jam sufiĉe longan indekson de la projektoj de artefarita universala lingvo kaj de la traktaĵoj, dediĉitaj al tiu ĉi problemo en XVIII. jarcento.

Malgraŭ la tuta skrupuleco, kun kiu ni rilatis al nia tasko, ni absolute ne estas certaj, ke ni sukcesis fiksi ĉion, kio signis ĝis la komenco de la XIX. jarcento antaŭenmovon de la ideo pri artefarita universala lingvo. Ankaŭ P. Stojan (40), bonuzinta fontojn, kiuj ne estis por ni alireblaj, citas tutan aldonan liston de personoj — Schwenter, Philiphe le Prieur, J. P. Ludewig, J. Frisch, M. Armand, Prieur de la Marne, D. J. Traygia, Ders — rilatantaj al la XVI—XVIII jarcentoj, pri kies laboroj ricevi iujn certajn informojn li ne sukcesis.

La ideo de universala lingvo pli kaj pli enpenetris la konscion de la homoj. Praktike estis elprovitaj ĉiuj eblaj vojoj por ĝia ebla konstruo: 1. pazigrafia, 2. apriorie-filozofia kaj eĉ 3. aposteriorie-eksperimenta. Al la porbatalantoj de la universala lingvo en XIX. jarcento restis nur elekti la plej perfektan kaj praktikan vojon kaj kuraĝe ekiri ĝin.

## V.

## LA PROJEKTOJ EL LA PERIODO 1800—1850

> Ĉiuj lingvoj alportos siajn plej valorajn elementojn al la lingvo de unueco, kiu ne estos la primitiva teksaĵo de la franca, sed riĉa kaj lukse bela, sole inda al la homara socio, ĉar ĝi unuigos en si la genion de ĉiuj popoloj.
>
> C. Fourier.

La ideo de universala lingvo kun la tempo komencis trovi ĉiam pli grandan nombron da adeptoj. En tiu nombro troviĝis eĉ filozofo Kant (10), kiu ligis la ideon de helpa lingvo kun la ideo de tutmonda malarmiĝo de la popoloj.

Pri la ideo de universala lingvo komencas interesiĝi oficialaj sciencoj. Prelegoj kaj raportoj pri universala lingvo flanke de la scienculoj fariĝas ĉiam pli oftaj. Plue ni citos el ili nur la plej valorajn kaj gravajn.

Pli ampleksan liston de ĉiuj—ion ajn kaj ie ajn dirintaj kaj skribintaj pri la ideo de la lingvo universala oni povas trovi en la registrolibro de P. Stojan (40).

Aparte intensan movadon por la ideoj de pazigrafio kreis en Francio la detale prilaborita projekto de Maimieux.

**Butet (1801)**

La 23-an de septembro 1801 en la memoraĵoj de la instituto de Francio («Memoires de l'Instittut») Butet enpresas skizon de sia pazigrafio, parenca al la projektoj de Maimieux kaj Becher. Bollack (10) erare nomas en sia listo de la artefaritaj lingvoj la aŭtoron de tiu ĉi projekto — Budet, kaj la projekton mem datumas per la jaro 1798.

Evidente pluraj eraroj, farataj de Bollack rezultas el nekontrolitaj eraraj indikoj, donitaj de Einstein en liaj skizoj pri frutempaj mondlingvaj projektoj, kiuj estis presitaj en volapüka gazeto «Zi vol lölik», Wien, 1888.

**Moussand (1803)**

En la jaro 1803 abato Moussaud submetas al analizo la problemon de universala lingvo en sia libro [1]. Moussaud, sin bazante per la ekzemplo de la ĉinaj hieroglifoj, opinias, simile al H. Hugo (1617 j.), ebla la starigon de la sama ideografia skribsistemo por la tuta mondo kaj skribas: «oni povas esperi, ke niaj posteuloj estos pli feliĉaj kaj kapablos efektivigi la intiman penson de Leibnitz, kiun li mem ne povis efektivigi». Rilatante la pazigrafian sistemon de Maimieux, li ĝenerale simpatias al ĝi, sed diras, ke la aferkerno troviĝas ne en teorio, sed en praktiko: «vanaj estas ĉiuj laŭdoj, se neniu uzos ĉi tiun sistemon.

[1] L'abbé Moussaud, «L'alphabet raisonné ou explication de la fi ure des lettres» Paris, 1803, vol. II, pĝ. 349—357 (45).

Restante aprobanto de pazigrafio, M o u s s a u d limigas la regionon de ĝia aplikado kaj faras antaŭrimarkon, ke ĝi estas destinata por sciencoj, matematiko, juro kaj medicino, sed neniel por poezio, kiu sen sonoj kaj sonparolo estas absurda.

Chambry (1805)

En la Enciklopedio de XIX. jarcento de L a r o u s s e («Encyclopédie de XIX. siècle») troviĝas indiko, ke iu C h a m b r y perfektigis la sistemojn de M a i m i e u x kaj B u t e t kaj ke Pariza kelta societo (La société celtique de Paris) en la j. 1805 premiis C h a m b r y per medalo por lia seslingva vortaro, en kiu ĉiuj vortoj estis signitaj per ciferaj esprimoj. La sistemo de la ciferaj signoj, simpligita de C h a m b r y, alkondukis al tio, ke anstataŭ 10 238 nombroj uzitaj de B e c h e r, ilia kvanto estis malmultigita ĝis 1354 ([18]). Per tio, kiel diras S c h m i d «estis atingita ĉio, kion povas doni la cifera lingvo».

Z. Hourwitz (1801)

En la j. 1801 tradukisto de la Nacia biblioteko en Parizo Z. H o u r w i t z aperas kun originalspeca projekto de skriba lingvo-poligrafio [1]. Por la bazo de sia lingvo li prenas latinan lingvon, «kies vortaroj estas haveblaj, ĉar presitaj en ĉiuj lingvoj». Simile al B e c h e r kaj K i r c h e r li proponas fari laŭordan numeradon de ĉiuj latinaj vortoj laŭ la alfabeta ordo, ekz. 300 — domo (domus), 30 — trinki (bibere), celante konservi neniajn principojn de la logika numerado.

Pro tio ke la ekzistantaj vivantaj lingvoj en siaj rezervoj de la vortoj estas pli riĉaj ol la latina, H o u r w i t z do proponas malgrandigi per koncernaj parafrazoj la nombron de haveblaj vortoj, por ke ilia kvanto estu egala por ĉiuj lingvoj.

La laboro de B e c h e r videble restis por H o u r w i t z nekonata. Kio rilatas la analogian kaj samnoman laboron de K i r c h e r, li, «por eviti la riproĉojn pro la plagiato», en la antaŭparolo al sia libro diras, ke la laboron de K i r c h e r li eksciis jam post la preso de sia libro. Li konfesas la similecon de sia projekto al tiu de K i r c h e r, ĉar en la ambaŭ okazoj estas proponite fari la laŭordan numeradon de la vortaroj, sed «K i r c h e r volis esprimi en sia vortaro ĉiujn gramatike ŝanĝeblajn formojn de la bazaj ideoj — vortoj». Ĉi tion lastan H o u r w i t z opinias tute nebezona kaj pensas ke lia metodo ĝenerale permesas uzi ne nur la speciale kompilitan, sed ankaŭ ordinarajn vortarojn.

H o u r w i t z proponas simpligi la gramatikan konstruon de la lingvoj ĝis ebla limo, konservante nur la plej necesajn formojn kaj permesante neniajn esceptojn. Li montras, ke tute vane kaj spite normala racio la adeptoj de «la racia gramatiko» (grammaire raisonné) penas pruvi, ke la konstruo de la ekzistantaj lingvoj, ilia ortografio kaj ĉiuj en ili renkontataj esceptoj respondas al la postuloj de racio. H o u r witz detale prilaboris la sistemon de sia gramatiko, sed donis nur ideon por la ellaboro de plena vortaro, kiun li nomas «Vocabulaire homographique».Lia gramatiko povas esti akomodita kiel al la estonta, ankoraŭ elloborota cifera poligrafio, tiel same al la ekzistantaj lingvoj. Kiel ekzemplo de ĝia strukturo povas esti la jeno: la nominativo specialan signon ne havas kaj la kazoj genitiva, dativa, akuzativa kaj ablativo estas signataj per respektivitaj literoj: g, d, a, ab, starigataj antaŭ la vorto aŭ ties cifera esprimo; tiamaniere, se ni prenos la vorton m a t e r, m è r e aŭ p a t r i n o, aŭ la nombron 3000, kiu signifu — laŭplaĉe: p a t r o, tiam la deklinaciaj formoj de ĉi tiuj vortoj estos:

---

[1] Zalkind Hourwitz, «Polygraphie ou l'art de correspondre a l'aide d'un dictionnaire dans toutes les langues, même dans celles dont on ne possède pas seulement les lettres alphabétiques», Paris, an 9 (1801) ([42]).

| | | |
|---|---|---|
| nom. | mater . . . . | 3000 |
| gen. | g mater . . . . | g 3000 |
| dat. | d mater . . . . | d 3000 |
| ak. | d mater . . . . | a 3000 |
| abl. | ab mater . . . . | ab 3000 |

Por diversspecaj derivitaj vortoj Hourwitz proponas uzi specialajn signojn — kolektivajn, multobligajn ktp., kiuj anstataŭus per si la respektivajn gramatikajn partetojn — prefiksojn kaj sufiksojn; tiel ekz. por formado de la adjektivoj el substantivoj super la lastaj oni skribu la signon ∽.

argent̃ = arĝenta.

Laŭ tiuj ĉi reguloj, ekz. la frazo «nia geedziĝo apartenas al la feliĉaj» (=nia geedziĝo estas feliĉa) povas esti skribita: «E geedziĝo z aparteni d feliĉa», aŭ germane:

«E Ehe z zugehören d glücklich».

Uzante la vortarojn de diversaj lingvoj, elektante el ili respektivajn radikvortojn kaj akomodante ilin per la konformaj «poligrafiaj» gramatikaj signoj, oni povas sukcesi, ke ĉiu frazo estu facile deĉifrigebla por ĉiuj legantoj en aliaj lingvoj, se nur ili konas la gramatikajn formojn de la poligrafio; sed simila surogato de lingvo, certe, ne povis esti lingvo parolebla. La pluan prilaboron de siaj ideoj Hourwitz dependigis de tio, kiamaniere ili estos renkontitaj de la publiko. La ideoj de Hourwitz ne havis sukceson, kaj liaj pluaj laboroj al ni ne estas konataj.

El Francio la entuziasmiĝo por la projektoj de pazigrafio transdoniĝis al aliaj landoj de Eŭropo kaj unuavice al Germanio.

**Schellenberg (1805)**

En la j. 1805 Anton Otto Schellenberg el Arnheim komunikis en «Reichsanzeiger», ke li elpensis novan sistemon de pazigrafio kaj ke li intencas vendi ĝian sekreton por unu kaj duono miliono da gineoj. «Fakte, en la pli posta tempo li faris rabaton je 500 000 pundoj, sed eĉ por tiel rabatita prezo neniu volis ekkoni lian sekreton», rakontas Schmid (18).

**Näther (1805)**

En la sama 1805 j. J. Z. Näther publikigis sian sufiĉe originalan projekton [1]. En la antaŭparolo al sia libro Näther komunikas, ke Schellenberg en «Reichsanzeiger» petis lin sin deteni de ĝia aperigo. Sed ĉar Schellenberg ne trovis ebla malkaŝi la sekreton de sia elpensaĵo, tial Näther decidis publikigi sian projekton. Sian sistemon Näther penis konstrui sur la samaj bazoj, kiel estis konstruitaj la antikvaj egiptaj hieroglifoj, t. e. sur la plej simileca desegno de apartaj objektoj kaj fenomenoj. Entute la sistemo de tiu ĉi skriba lingvo ne estis prilaborita ĝis la fino.

Pro tiu okazo Schmid diras: «Näther pli multe desegnas ol skribas, li tute ne atentas la fundamentan econ de la lingvo kaj finfine tro multon dependigas de la diligenteco kaj persona gusto de siaj legantoj» (18).

Kiel ekzemplo por la supraĵa rilato de Näther al la prilaborata sistemo povas esti jena citaĵo el lia libro: «La nomoj de arboj, fruktoj,

[1] J. Z. Näther, «Versuch einer ganz neuen Erfindung von Pasigraphie oder die Kunst zu schreiben und zu drücken, dass es von allen Nationen der ganzen Welt in allen Sprachen eben so leicht gelesen werden kann als die Zahlencharakter 1, 2, 3 in Form einer Sprachlehre...», Görlitz, 1805 (45).

bestoj, birdoj, legomoj kaj vermoj pli bone estas pazigrafiataj per ilia desegnado. Por grandaj bestoj oni povas desegni nur ties kapojn kun punkto anstataŭ la forestanta parto, por tiamaniere montri, ke en la donita okazo estas supozata ne nur la kapo, sed la tuta besto; la malgrandajn bestojn, birdojn kaj vermojn estas eble desegni plenkorpe».


En alia loko li donas similan rimarkindan konsilon: «ĉar apartaj kreskaĵoj estas tre similaj unu al alia, tial estas necese tre zorge desegni iliajn foliojn, florojn, florovariojn kaj radikojn». Por pli klara transdono de pensoj kaj ideoj N ä t h e r rekomendas uzi, kiam necesas, farbojn kaj nur en la antaŭparolo, kiu estis skribata jam post la kompostado de la libro, li sukcesas «eltrovi novan metodon, kiel desegni diversajn kolorojn kaj nuancojn per kombino de apartaj punktoj».

Por faciligi la transdonon de abstraktaj ideoj per siaj signoj, N ä t h e r rekomendas uzi la figurmanierajn esprimojn, «kiel oni kutimas fari tion en la Oriento». Ekzemple anstataŭ la frazo: «li kondutas virtan kaj honestan vivmanieron», oni devas parafrazi la frazon je: «liaj piedoj paŝas laŭ la vojo de la virto». Tian parafrazitan frazon estas facile desegni per la konforma bildo-desegnaĵo.

Krom la ideografiaj signoj, kiuj reale desegnas la konkretaĵojn, N ä t h e r estis devigata uzi nombron da specialaj signoj kaj figuroj por transdono de kelkaj abstraktaj ideoj kaj perceptoj. La similajn signojn li uzas ankaŭ por transdono de certaj gramatikaj ideoj, ekz.:

| | | |
|---|---|---|
| • mi. | | ni // . |
| ci .. | multobliga signo // | vi // .. |
| li ... | | ili // ... |

Kiel aspektas la pazigrafiaj signoj de N ä t h e r, ni povas vidi el la sekvantaj bildoj, prenitaj okaze el lia libro:



Peto (peticio) [supra linio]
Atesto pri la incendio [meza linio]
Letero de murdisto, minacanta per bruligo [malsupra linio].

Presado de tiaj libroj en presejoj certe estas tre malfacila kaj multkosta; iu alia libro, presita per la signoj de N ä t h e r, neniam aperis.

La projektoj de la periodo 1805-1806 j.

En la jaro 1805 en Wien A. H e t z publikigis verkon pri universala lingvo. Bollack (34) sub la sama 1805 j. datumas pazigrafian projekton de E d m u n d s, sed tie ĉi ekzistas evidente kronologia eraro. Fakte, la aŭtoro de aprioria projekto G e o r g o E d m u n d s (1855—1856) estas ellasita de B o l l a c k. En la j. 1806, en Parizo, de V i s m e [1] eldonas sian traktaĵon pri la universala muzika lingvo.

Burmann (1807)

En la j. 1807 profesoro de matematiko B u r m a n n en Mannheim publikigis sian programon de «pangrafio» [2], en kiu oni ne povas ne rimarki imitaĵon de la projektoj de De-Ria kaj de M a i m i e u x. La eldonitan broŝuron B u r m a n n dissendadis al ĉiuj interesiĝantoj pri la demando, en espero ricevi certan subtenon, necesan por la eldono de la kompleta verko, kies presado kostus tre altan sumon, pro la neceso fari specialajn presosignojn.

---

[1] De Visme, «Pasiologie ou de la musique comme langue universelle», Paris, 1806.
[2] Burmann, «Programme de la Pangraphie. Partie fondamentale de la caracteristique, syntactique sistème de notation universelle», Mannheim, 1807 (46).

Pri la rolo de universala skribo B u r m a n n skribis ankaŭ en sia didakta poemo «Ostens Mystens Schule», sed ĝi restis al ni nekonata. Li opiniis «uzi kiel bazon de la universala skribsistemo 12 plej simplajn signojn (tiel nomatajn «pangramojn»), similajn al la elementaj signoj de D e - R i a. Per kombinado de tiuj signoj li volis transdoni ankaŭ la sonojn kaj pensis ke tiu ĉi projekto devus kontentigi la postulojn de V o l n e y[1] — eltrovi la alfabeton, taŭgan por la lingvoj de ĉiuj popoloj. Por bazi sian opinion B u r m a n n citas P l u t a r ĥ-on, kiu en la «Dialogoj de Platono» per la buŝo de P l a t o n o diras ke la antikvaj grekoj skribis per 11 bazaj signoj.

Plue li donas nomaron de la diversaj skrib- kaj komunik-manieroj: 1. aritmografio (laŭ la decimala aŭ iu alia kalkulsistemo), 2. glossografio (fonetika skribo), 3. stenografio (mallongigita skribo), 4. kriptografio (sekreta skribo), 5. telegrafio (videbla signala skribo), 6. akustografio (signalskribo per taktoj kaj sonoj), 7. muzikografio (muzikaj skribo-notoj) kaj fine, 8. teknika ideografio (simbolaj signoj en la scienco.)

Sian sistemon de pangrafio B u r m a n n rilatigas al aparta speco de telegrafio, artibuas al ĝi diversajn valorojn kaj opinias ebla utiligi ĝin en diversaj cirkonstancoj diversmaniere.

Por tio li «kiel neriproĉebla patro de familio, aŭtoro kaj socia aganto, garantias sin per sia honesta vorto».

Plian prilaboron tiu ĉi programo tamen ne ricevis.

**Burja, Niethammer (1808)**

Fine, en la jaro 1808, en Berlin kaj Nürnberg aperis samtempe du verkoj — de A. B u r j a[2] kaj de F. I. N i e t h a m m e r[3], dediĉitaj al la analizo de la fundamento de eventuala universala lingvo. La du lastaj aŭtoroj decideme akceptas la vidpunkton, ke la universala lingvo devas esti ne nur skriba, sed ankaŭ parolado sona. N i e t h a m m e r proponis prilabori tian sistemon de signoj, per kiuj oni povus skribi tiel rapide, kiel oni pensas, sed evidente ĉe tiu ideo li pensis pri la rapidigita sona skribo, simila al la moderna stenografio. La filozofia projekto de B u r j a estas prilaborita pli detale kaj laŭplane. Ĝi estas bazita sur la uzo de 225 bazaj «radikaj» sonoj: e — esti, s — pensi, syo — helpi, j — vivi, m — ami, n — bele, d — agrable, dr— naĝi, k — alte, kt — forte ktp.

Ĉiuj vortoj estas dividitaj je 5 grupoj: 1. animaloj, 2. kreskaĵoj, 3. senviva materio, 4. ecoj, kvalitoj kaj 5. agoj.

Ĉiu vorto estas formata el kombino de du radikaj sonoj, inter kiuj estas metata vokalo. Ĉe tio rezultiĝas absurdaĵoj, similaj al j e l i k a= =suno, t.e. io alta kaj varmega.

**J. M. Schmid (1807)**

Certan intereson pro la pripensiteco de la temo prezentas la verkoj de J. S c h m i d, aperintaj en la j. 1807 germane kaj latine[4]. Ĉi tiuj libroj prezentas rerakonton de la lekcioj, legitaj de S c h m i d en la liceo de Dillingen, en la j. 1807. S c h m i d, malsimilante al la plimulto de projektemuloj de pazigrafio, venis al la provo solvi la problemon preparite kaj konante la plimulton de la antaŭaj projektoj (18).

La ĝeneralan direkton en la serĉado de la aŭtoroj de filozofiaj pazigrafiaj sistemoj li opinias korekta, sed li ne povas kaŝi tiun cirkonstancon,

---

1 «Moniteur», 1805, octobre 23 et 24.

2 Abel Burja, «Die Pasilalie oder kurzer Grundrisz einer allgemeinen Sprache», Berlin, 1808 (48). (Vidu ĉe: Werner Fraustädter: «Die internationale Hilfssprache. Eine kurze Geschichte der Weltsprache-Bestrebungen», Husum, 1910 (47).

3 Fr. Iman. Niethammer, «Ueber Pasigraphik und Ideographik», Nürnberg, 1808.

4 J. M. Schmid, «Cogitationum clator completus scientificus Pasigraphiae inserviens», Dillingen, 1807. (De la sama: «Vollständiges wissenschaftliches Gedankenverzeichnis zum Behuf einer allgemeinen Schriftsprache», Dillingen, 1808) (45).

ke la «ekzistantaj projektoj estas treege malsimilaj kaj kontraŭdiras unu la alian».

Sian pazigrafian sistemon Schmid konstruas sur 250 simplaj signoj, «kiujn ellerni kaj kompreni uzi oni povas en iuj 3 monatoj». La analogiajn pensojn kaj ideojn li opinias necesa signi per identaj signoj, rifuzante tamen postuli ilian absolutan kaj logike senriproĉan konformitecon. Tiamaniere formiĝas lia indekso de pensoj kaj ideoj «Gedankenverzeichnis» kiu prezentas el si siaspece kompletigitan pazigrafian alfabeton.

Li estas devigita konfesi, ke por la homo neinstruita aŭ nesufiĉe instruita, uzi tiun «duonfilozofian» pazigrafion ne estos eble, ĉar ĝia uzado estas ligita al posedo de certa nivelo en la ĝeneralaj sciencoj.

P. Stojan ([40]) notas, ke en la j. 1815 en Wien J. Schmidt (supozeble la sama Schmid) aperigis libron «Pasigraphische Versuche».

De la j. 1815 ĝis 1820 Schmid aperigis 9 numerojn de speciala ĵurnalo «Magazin für allgemeine Sprache» ([48]), en kiu li donis kelkajn valorajn sciigojn pri la antaŭirintaj projektoj de universala lingvo.

En la jaro 1827 en sia nova libro [1] Schmid rekomendis novan metodon en la instruo de lingvoj: lerni la vortojn ne laŭ la vortaro kaj alfabeta ordo (similaj vortoj kaj malsimilaj ideoj), kiel oni praktikis fari en lia tempo, sed laŭ certaj kompleksoj kaj grupoj da similaj ideoj (kaj de malsimilaj vortoj). Ĉe tia lernometodo lia pazigrafia metodo dividi la ideojn je certaj bazaj grupoj, devus doni, laŭ opinio de Schmid, tre valorajn rezultojn. Simila takso de la problemo estis provita ankoraŭ en la j.1666 de Becher en la libro «Metodus didactica». Schmid nur profundigis kaj evoluigis la ideojn de Becher ĝis ilia logika fino.

**A. Riem kaj Stein (1809)**

En la j. 1809 aperis germanlingve samtempe du libroj, ambaŭ dediĉitaj al problemoj de pazigrafio kaj revuo de laboroj en tiu fako — de A. Riem [2] kaj Stein [3]. Laŭ la atestoj de Firmas Péries, A. Riem montris la samajn vidpunktojn kaj ideojn, kiel Becher, nomante la universalan vortaran numeradon «universala kanono». La verko de Stein restis al ni nekonata, kvankam pri ĝi kun sufiĉa ĝusteco komunikas Einstein ([16]). Erare sub tiu ĉi jaro datumas Bollack (en la libro «Resumé théorique de la langue Bleu», pĝ. 120) laboron de iu Prieur. Verŝajne tio estas simpla ortografia kripligo de la nomo de A. Riem.

Laŭ P. Stojan ([40]) en la sama 1809 j. aperis en Mannheim ankoraŭ unu libro «Ueber Schriftsprache und Pasigraphie», traktanta pri projektoj de diversaj pazigrafiistoj.

**Firmas Péries (1811)**

Laboro, kiu faras certan resumon por la pazigrafiaj sukcesoj de la antaŭiranta periodo, estas la eldonita franclingve libro de Firmas Péries [4]. En la enkonduka parto de sia libro Firmas Péries donas detalan revuon de antaŭirintaj projektoj kaj proponoj. La baza kaj konkluda partoj de la libro estas dediĉitaj al priparolo de la sistemo de Maimieux.

P. Stojan ([40]), citante tiun libron, notas supozon, ke la nomo de l'aŭtoro estas simpla pseŭdonomo (Firma Speries—Firmaj esperoj).

---

[1] J. Schmid, «Grundsätze für allgemeine Sprachlehre», Dillingen, 1827.

[2] A. Riem, «Aphorismen über Sinnen Sprache vermitteln aller sinnlichen und Ideensprache. Ein Mittel, verlorene Sinne zu ersetzen, die zum Auflassen der Ideen nötig sind», Mannheim, 1809.

[3] Stein, «Ueber Schriftsprache und Pasigrafie», München, 1809.

[4] Comte de Firmas Péries, «Pasitélégraphie», Stuttgart, 1811 ([46]).

En la unuaj 12 partoj (lecionoj) estas donataj la samaj 12 lecionoj de la al ni jam konata pazigrafia sistemo de M a i m i e u x. La lastaj partoj (de la 13-a ĝis 17-a) enhavas klarigojn pri la metodoj de transformo de pazigrafio, per helpo de 26 literoj — je pazilalio — parola lingvo.

F i r m a s P é r i e s detaligas la ĝeneralajn klarigojn de M a i m i e u x, enhavatajn en lia «ĝenerala karto de pazigrafio» (1808) kaj celas akomodi la sistemon de Maimieux por telegrafado, t. e. por transdono je distanco pere de iuj konformaj signoj. Pro la transformo de pazigrafio je pazilalio rezultiĝis tro sovaĝaj vortformiĝoj, ekz.: 1 — baba, 2 — babe, 3 — babi, 4 — babo, 10 — ababa, 20 — ababe, 90— abavi, 93 — ebadoe, aŭ la internacia vorto «astronomo» kiu ricevis preskaŭ arablingvan transskribon: «El-en-ambaval».

**La Kopenhaga Sciencakademio (1811)**

Laŭ komuniko de L. E i n s t e i n ([16]) la, interesigita per la penadoj efektivigi la tuthomaran skribsistemon, Kopenhaga Sciencakademio en la jaro 1811 proponis premion por la plej facila kaj facile efektivigebla projekto de tutmonda pazigrafio, sed tiu ĉi premio neniam trovis indan laŭreaton.

Tamen krom E i n s t e i n nenie ni sukcesis trovi iun aludon pri tiu ĉi fakto.

**Rosenhein, Maggazini, Lindau (1815—1817)**

Analizon de ecoj, bezonaj al universala filozofia lingvo, donas en la j. 1815, en sia libro, R o s e n h e i n [1]. Laŭ apartaj, nekontrolitaj informoj, la problemon de universala lingvo tuŝis en la j. 1816 italo Maggazini. Universalan ŝlosilon por ĉiuj lingvoj eldonis iu L i n d a u [2].

**Sicard (1808—1811)**

En la j. 1811 nekonata aŭtoro (povis esti S i c a r d) en la libro, eldonita de la Pariza Instituto de surdomutuloj [3] ligas la problemon de universala skribsistemo — pazigrafio — kun problemo pri ebleco krei universalan lingvon de gestoj, uzataj de surdomutuloj.

La problemo de la gestoj, kiel iloj por interkompreno kaj eduko, estis speciale teorie prilaborita de S i c a r d jam en la j. 1808 [4].

Kaj en tiu libro li esprimis opinion, ke eble la gestlingvo donos bazon por starigo de la lingvo universala, prirevita de la homaro.

**Tracy (1817)**

Konata franca scienculo kaj liberalo, amiko de L a F a y e t t e, D. d e T r a c y en siaj verkoj prituŝis la demandon de universala lingvo [5]. Parolante pri la filozofiaj sistemoj de artefarita lingvo, antaŭirintaj lin, li kategorie asertas, ke «universala (scienca) lingvo estas same neebla, kiel eterna memmovado (perpetuum mobile)», ĉar en neniaj cirkonstancoj tiu lingvo estos senriproĉe perfekta.

En unu el siaj raportoj al la Akademio [6] li evoluigis la saman vidpunkton rilate al la pazigrafio. Preninte tion kiel elirpunkton kaj opiniante malnecesa prilaboron de scienca lingvo, taŭga nur por scienculoj, T r a c y venas al la penso ke «eble estus pli bone, anstataŭ serĉi novan pli perfektan lingvon, doni al la lingvoj ekzistantaj dezirindajn kaj ĉe ili mankantajn ecojn kaj kvalitojn». Kio koncernas la universalan lingvon, T r a c y opinias ĝin ekskluzive lingvo gesta, formita el agoj, movoj kaj sonimitoj. Simila lingvo povus esti transdonata, certe, ankaŭ per sonoj aŭ per iuj signoj, sed la reala efektivigo de similaj supozoj ŝajnas al T r a c y nur malmulte realigebla.

---

[1] Rosenhein, «Ueber die Eigenschaften einer allgemeimen Sprache», Königsberg, 1815.
[2] Lindau, «Thot oder Allgemeiner Sprachschlüssel», Berlin, 1817.
[3] X..., «La clef de toutes les langues», Paris, Institut des sourds et muets, 1811.
[4] R. A. Sicard, «Théorie des signes pour l'instruction des sourds et muets», Paris, 1808.
[5] Destutte de Tracy (paire de France), «Elements d'idéologie», Paris, 1817,
[6] Institut «Mémoires Scienc. Mor. et phil.» III, p. 548.

Tiuj lastaj ideoj de T r a c y estis ligitaj kun liaj pli fruaj laboroj pri la universala gramatiko [1].

**P. Laromiguière (1818)**

Pli optimisme rigardas la problemon de universala lingvo alia franca filozofo L a r o m i g u i è r e, samtempulo de T r a c y [2]: «Se ni havus ĝustan indekson de elementaj ideoj, propraj al homa racio, tiaokaze la projekto de universala lingvo ĉesus esti kimero». L a r o m i g u i è r e protestas kontraŭ la dominanta konvinko, ke la iniciatinto de la ideo de universala lingvo estas L e i b n i t z, kaj diras, ke D e s c a r t e s tuŝis la problemon multe pli frue.

Sed la filozofia lingvo, laŭ opinio de L a r o m i g u i è r e, ne povas esti lingvo parola, alie ĝi senevite disfalos je dialektoj. Tiamaniere li venas al logika konkludo, ke la universala lingvo devas esti aŭ skriba aŭ gesta, kaj ke la signoj de tiu ĉi lingvo devas esti ne alfabetaj, sed ideografiaj, t. e. ili devas transdoni ne literojn kaj sonojn, sed senpere ideojn kaj konceptojn, formante la pli komplikajn el malpli komplikaj. Simpatioj de L a r o m i g u i è r e klare sin klinas al la proponoj de la instituto por surdomutuloj, al la gesta lingvo, esprimebla ankaŭ per skribitaj signoj. Kaj kvankam li hezitas difini, kiaj skribitaj signoj povus transdoni la ideojn de galanteco, idioteco, afabla rideto aŭ kuntiriĝo de brovoj — de ĉio tio, kion oni povas transdoni per gestoj, sed en tio li konfidas la aŭtoritaton de «sufiĉe bone sin rekomendintaj indaj gvidantoj de la Instituto por surdomutuloj».

**M. Gigli (1818)**

Italo M. G i g l i [3], en la j. 1818, publikigis sian projekton pri kreo de artefarita filozofia lingvo. La libro de G i g l i dividiĝas je du partoj, el kiuj la unua estas dediĉita al analizo de la gramatikaj elementoj de la lingvo, la dua — al analizo de la elementoj de vortaro. G i g l i opiniis, ke efektivigi la ideon de universala lingvo sen helpo de registaroj ne estas eble. Li proponis al ĉiuj simpatiantoj formi societon por ellaboro de nova lingvo (lingua nuova), pensante ke 4 aŭ 5 jaroj estos sufiĉaj por, kun subteno de la registaroj, enplanti en ĉiujn landojn de civilizita Eŭropo universalan filozofian lingvon.

La simplan, sed apriorian gramatikon de G i g l i akompanis treege malsimpla kaj komplika vortaro. Por ekzemplo ni montru la sistemon de kalkulado: 0 — ze, 1 — na, 2 — vu, 3 — tre, 4 — fe, 5 — fi, 6 — sse, 7 — la, 8 — to, 9 — no, 19 — nano, 28 — vuto, tamen 128—ne «navuto», sed «navuzevuto», en kiu la sufikso «vuze» signifas centon. Sammaniere: 4057 — fenatrezefila, en kiu «natreze» signifas milon.

El la projekto fondi societon por universala lingvo venis nenia rezulto. La libro de G i g l i, juĝante laŭ ĉio, ne diskoniĝis ekster la limoj de Italio. La pli malfruaj aŭtoroj eĉ ne citas la verkon de G i g l i.

**I. Gati (1820)**

Konata hungara scienculo, pastro I. G a t i [4] (1749—1843) ankaŭ laboris pri la problemoj de sekreta skribo, universala lingvo kaj skribo. Li tre zorge kaj profunde aliris al la trakto de la problemo kaj nur en la j. 1820, estante 72-jara, G a t i publikigis en Budapest parton de sia laboro hungarlingve. En siaj unuaj pazigrafiaj skizoj G a t i dividas la de li aplikatajn signojn je: 1. naturaj, ekz.: C — nova luno, U — bankuvo, Z — falĉilo, O — suna disko, T — hakilo... kaj 2. arte formataj el ceteraj literoj, ciferoj, interpunkciaj signoj kaj signoj matematikaj. En pluaj laboroj li tamen forĵetis la ideon uzi pazigrafiajn signojn kaj,

[1] Destutte de Tracy, «Grammaire Génerale», Paris, 1803. Chap. VI «Caractères d'une langue bien faite».

[2] P. Laromiguière, «Leĉons de philosophie», Paris, 1820, edit. 2, vol. II, leĉ. IX, pĝ. 309—324.

[3] Mariano Gigli, «Lingua filosofico universale pei dotti preceduta della analisi del linguaggio», Milano, 1818 (46).

[4] Gati Istvan, «A steganographianek... Philosophica vagy universalis nyelvnek, Pesten, 1820. Vidu «La Policisto», Budapest, 1924, n-o 1—2.

ellaborante sian sistemon, sin limigis per la uzo de 7 vokaloj kaj 24 konsonantoj — la unuaj por signi la animalojn, kaj duaj — por ĉiuj aliaj malvivaj objektoj. La ekstera aspekto de tiu ĉi filozofia sistemo estas jena:: «Tof sa Zagy tög, e tög, ton togmo böpmornas böpnya Egyptme» («Mi estas via gvidanto, via dio, kiu elkondukis vin el la lando Egipta»).

La pluan evoluon de la ideo de universala lingvo la sistemo de Gati ne inflluis.

Estas interese noti, ke tiu projekto estis forgesita eĉ de hungarlandanoj.

A. Rethy (1821)

Devas esti citita ankoraŭ la latinlingva skizo-projekto de universala filozofia lingvo, farita de profesoro de greka lingvo, hungaro R e t h y, publikigita en la j. 1821 en Wien [1].

K e r c k h o f f s ([34]) kaj post li aliaj ([10]), anstataŭ A. R e t h y ial citas iun A. S h t e t y, datumante lian projekton, eldonitan en Wien kaj samnoman al la projekto de R e t h y per la j. 1825. Juĝante laŭ ĉio, neniu A. S h t e t y ekzistis.

Kiel devizan surskribon por sia libro R e t h y prenas la vortojn de S k i t t i u s, notitajn de L e i b n i t z. Tiu ĉi projekto estas dediĉita al Hungario — «la amata patrio de la aŭtoro». Al la simpla gramatiko de sia lingvo R e t h y alkonstruas komplikan, konstruitan laŭ apriorie-filozofiaj principoj, vortaron. Rezulte por diversaj ciferoj li formas jenajn malfacile memoreblajn kaj prononceblajn esprimojn: 1 — Ä, 2 — A, 3 — O, 4 — Ö, 5 — Ë, 6 — E, 7 — J, 8 — U, 9 — Ü, 100 — Ah, 200 — Äh, ktp. kaj por la kemiaj elementoj kies nomado estas elektita laŭ la respektivaj konataj klasifikaj reguloj: Äzh — plateno, Ozh — arĝento, Özh — fero...

Scott (1831)

En la Prusia regna biblioteko estis lastatempe eltrovita la sola al ni konata, datita per la j. 1831, libro de virino — S. Scott, kiu laboris pri la problemoj de la lingvokonstruo [2].

S c o t t proponis ellabori sistemon de universala skribo, kiun oni povus samtempe kaj en iom ŝanĝita aspekto uzi kiel sekretan skribon kaj rapidskribon, kiel muzikan signallingvon kaj kiel lingvon por surdomutuloj. Por la bazo de la sistemo estis prenitaj 6 vokaloj kaj 18 konsonantoj. Ĉi tiuj literoj estis signitaj per punktoj kaj streketoj. La aŭtorino promesis premiojn por pliperfektigo de la sistemo, «kreita servi al la afero de la virina emancipiĝo» (!?).

En Wien ekzistis eĉ speciala homografia presejo.

P. S t o j a n ([40]) iakaŭze supozas, ke S. S c o t t estas nura pseŭdonomo.

Anonimaj projektoj de 1820—1831

G e r b e r en sia libro, eldonita en la j. 1832 citas du rilatantajn al tiu tempo anonimajn kaj al ni nekonatajn projektojn: «Synglosse» (eld. en Karlsruhe en 1826) kaj «Sprachwurzeln» (eld. en Augsburg, en 1831).

P. S t o j a n komunikis al ni siatempe la nomon de la aŭtoro de la unua projekto — J. F a b e r, sed en liaj listoj ([40]) forestas same la cito pri «Synglosse», kiel pri ĝia supozata aŭtoro.

---

[1] Andreo Rethy, «Lingua Universalis communi omnium nationum usui accomodata», Viennae, 1821 ([46]).

[2] Lady Sophie Scott, «Homographie», Wien, 1831 ([48]).

**Matraya (1831)**

G i u s e p p e M a t r a y a en la j. 1831 eldonis en la lingvoj latina, itala, franca, portugala, angla kaj germana — lernolibron de «Itala genigrafio»[1].

Tiu ĉi projekto prezentas retroiron, kompare kun kelkaj aliaj, pli perfektaj sistemoj de universala skribo. Rilate la vortaron ĝi estas ne pli ol imitaĵo de la cifersignoj de B e c h e r kaj K i r c h e r; nur la genigrafia gramatiko kaj ĝiaj formoj estas pli zorge prilaboritaj. La vortoj konforme al la vortordo de latina vortaro, dividiĝas je grupoj, po 25 vortoj en ĉiu. La grupoj estas signataj per laŭorda vico de ciferoj. En la limoj de la grupo ĉiu vorto estas signata per laŭorda litero de alfabeto de A ĝis Z, staranta antaŭ la cifera signo de la grupo; ekzemple: akademio — U.1, lingvo — P. 202.

La partoj de parolo estas signataj per ciferoj: 1 — substantivo, 2 — adjektivo, 3 — pronomo, 4 — adverbo, ktp., ĉi tiuj aldonaj ciferoj estas starigataj super la literoj de la radikoj, simile al la matematika signado de gradoj de potenco. Ekzemple la esprimo «akademia lingvo» estos skribita $U^2$. 1 — $P^1$. 202. «Lingvista (lingva) akademio» $P^2$. 202 — $U^1$.1. Per aliaj ciferaj aŭ literaj signoj, enmetataj inter la litero kaj cifero de la radiko, estas signataj la verbaj ŝanĝoj kaj ceteraj gramatikaj formoj. La vortoj estas interdividataj per streko.

Por skribi genigrafie kaj por kompreni la skribitan, estus necese antaŭe presi la vortaron de genigrafio en ĉiuj lingvoj. Tion plenumi M a t r a y a ne sukcesis.

P. S t o j a n ([40]) notas kun signo demanda — kvazaŭ la franca traduko de la verko de M a t r a j a aperis en Parizo.

**F. A. Gerber (1790—1832)**

En la sama tempo — aperis — la projekto de F. A. G e r b e r, detale prilaborita ankoraŭ en 1790[2].

La aŭtoro rakontas, ke sian projekton li ekprilaboris ankoraŭ en la j. 1785, estinte en la universitato de Heidelberg, kune kun aliaj studentoj. En la j. 1790 la plano por la ellaboro de la lingvo kune kun la «kritiko de universala klasifiko» estis prezentita al la germana societo de Kur-Pfalz. La societo laŭdis la laboron de G e r b e r, sed dubis koncerne ĝian utilecon. La aŭtoro post tio ĉesis fari pluajn esplorojn, ĝis ekkono de la laboroj de M a i m i e u x. Li skribis al la lasta leteron, sed M a i m i e u x montris sian nean opinion pri la ideoj de G e r b e r, ĉar ili estis tute kontraŭaj al liaj propraj. G e r b e r kreis samtempe skriban kaj parolan lingvon, ĉe kio li celis elekti la vortarajn kaj gramatikajn formojn en granda grado disvastigitajn kaj proprajn al la plimulto de naturaj lingvoj. G e r b e r, en certa rilato, estas antaŭiranto por la modernaj artefaritaj lingvoj: Volapük, Esperanto kaj de la plej lastatempaj novlatinaj projektoj. La alfabeto de lia lingvo estis greko-latina. La difinita artikolo estas diversa ĉe la tri genroj: lo, li, la. La deklinacio havas unu-, du- (dual) kaj multenombrajn formojn. La numeraloj: 1 - en, 2 - dwoi, 3 - troi, 4 - karoi, 5 - penoi, 6 - sesoi, 10 - deksoi ktp. Kiel ekzemplo el tiu ĉi lingvo povas servi jena frazo, treege rememoriganta la saman frazon en la nuntempa Esperanto: «bonai vinai a bonaif vinaif data bonain potain e filetain tostain» — «bonaj vinoj al bonaj vinoj donas bonajn trinkaĵojn kaj belajn tostojn». Sed ne nur en la jaro 1790, ankaŭ pli malfrue, post 40 jaroj,

---

[1] Giuseppe Matraya, «Genigrafia italiana — Nuovo metodo de scrivere quest idioma affinché riesca identiamente leggibile in tutti gli altri del mondo», Lucca, 1831 ([43]).

[2] F. A. Gerber, «Plan einer Pasigraphie oder allgemeine Bezeichnungs-Kunst, Auszug aus den weitgehenden Bearbeitungen von 1790—1792 und 1831», Bruchsal, 1832 ([43]).

tiu ĉi projekto ekinteresigis neniun. Eĉ pli — oni tute forgesis pri ĝia ekzisto. Nur en la nuna tempo G. Muravkin eltrovis la libron de Gerber en la Berlina regna biblioteko.

Herpain (1843)

Belgiano Herpain en la jaro 1843 publikigis sian originalan verkon, dediĉitan al fiziologia lingvo [1]. La aŭtoro diras, ke universala lingvo devas esti regula, facila kaj utila. Sed fakte ĝuste la facileco en tiu ĉi lingvo mankas. La lingvo havas 22 konsonantojn kaj 11 vokalojn (el la nombro de la lastaj 5 estas signataj per ciferoj: 1=é, 2=e, 5=u...). Sian projekton la aŭtoro konstruas sur «la principoj de embriiĝo kaj ĝenerala evoluo de la mondo». Tial la libron antaŭas traktaĵo pri kosmogonio kaj pri fiziologia evoluo de l' ideoj kaj de ilia esprimado.

Jen estas ekzemplo el la lingvo «Lugar»: Lugar ral miga d loger (Lugar estas imito de la lingvo de naturo).

Grosselin (1836)

Ne malpli malsukcesa ol la projekto de Matraya, estis alia projekto de cifera lingvo de Grosselin, publikigita en la j. 1836 [2]. La lingvo de Grosselin enhavas en sia vortaro 1500 vortojn-radikojn kaj 100 prefiksojn por gramatikaj formoj. La nombroj estas dividitaj je centoj kaj ĉiu el tiuj grupoj unuigas ideojn, en io analogiajn. Ekzemple: de 101 ĝis 200 — klasoj de animaloj, de 201 ĝis 300 — specoj de animaloj, 301 ĝis 500 — klasoj kaj specoj de kreskaĵoj ktp. La nombroj karakterizantaj la gramatikajn distingaĵojn, kiel en la sistemo de Matraya, estas starigataj sur la loko de potencgradoj, ekz.: 1047 — maljuna, 9 — fariĝi, 1047 [9] — maljuniĝi.

Por ricevi el simila pazigrafia kaj duonfilozofia cifera sistemo de la lingvo sistemon de lingvo parola, la ciferoj en certa ordo estis anstataŭataj per literoj—la ciferoj de radikaj nombroj — per konsonantoj: p, f, m, t, s, ch, k, n, l, z kaj la ciferoj de gramatikaj nombroj per vokaloj kaj duonvokaloj: a, e, o, ou, eu, i, ai, ei, oi, é. Por faciligi la prononcadon de la radikvortoj estis permesite, sekvante certajn sufiĉe komplikajn regulojn, enmeti inter la konsonantoj difinitajn vokalojn, ekz.: 201—homo — frp—frap.

Tiu ĉi lingvo, ne povanta eliri el la limoj de siaj 1500 fundamentaj vortoj, havas nek belecon, nek harmonion, nek sufiĉan riĉecon.

Ĉe Stojan ([40]) ni trovas noton, ke en alia verko la aŭtoro proponis «Tonographie» — 30 signojn por noti sentojn, emociojn, ĝis nun ne esprimeblajn en la skriba lingvo.

Francaj projektoj (1834—1838)

Ĉiujare la nombro de la verkoj en la fako de universala lingvo daŭre kreskis.

En la j. 1834 Le Mesl publikigis skizon de raciigita lingvo [3]; Renou en la j. 1836 publikigas en aparta libreto kaj poste en ĵurnala artikolo ĝeneralan analizon de pazigrafiaj sistemoj [4], kaj fine aperas anonimaj aposterioriaj, bazitaj sur latina lingvo, parizaj skiz-projektoj de la jaro 1837 [5] kaj tiu de Denis de L. P. en la j. 1838 [6].

Speciale originala kaj kuraĝa por sia tempo estis la unua propono. La aŭtoro esprimis deziron, ke okazu speciala kunveno de repre-

---

[1] S. Herpain, «Première Epitre d'Usamen à ses contemporains. Langage physiologique (Lugar)», Nivelles, Brabant, 1843 ([48]).

[2] Aug. Grosselin, «Système de langue universelle Grammaire abregée, precedée d'un discours», Paris, 1836.

[3] Le Mesl, «Considerations philosophiques sur la langue française, suivies de l'esquise d'une langue bien faite», 1834.

[4] J. M. Renou, «Traité de l'art d'écrire en une langue de manière à ètre entendu d'ans une autre langue sans traduction», Lyon, 1836; kaj «Journal des Villes et des Campagnes», 28 aout, 1836.

[5] «Esquise d'une langue universelle», Paris, 1837.

[6] Denis de L. P., «Système d'une langue universelle», Paris, 1838.

zentantoj de la divers-naciaj akademioj, kiu fiksu «la grandajn principojn de la lingvo universala». P. S t o j a n ([40]), diras, ke laŭ lia scio «ĝi estis unua ideo pri kolektiva solvo de mondlingva problemo». Sed kiel ni vidis, jam G i g l i en la jaro 1818 proponis krei asocion por ellaboro de la nova lingvo.

Por tiu ĉi tempoperiodo estas aparte karakteriza trajto, ke la aŭtoroj de aposterioriaj projektoj, simile al C a r p o p h o r o p h i l u s, hontis proponi siajn, kiel oni nomis tiam, «projektojn de kripligo de naturaj lingvoj», sub siaj propraj nomoj.

**J. Schipfer (1839)**

Nur en la j. 1839 en Germanio germane kaj anglolingve estis publikigitaj lernolibroj de nova «komunika lingvo» [1], kies aŭtoro, J. S c h i p f e r, kun la levita viziero, eliras por defendi la ideon de aposterioria konstruo de universala helpa lingvo.

Por tiu ĉi lingvo servis kiel bazo la formoj kaj radikoj ne de la malviva latina, sed de vivanta franca vortaro kun simpligitaj gramatiko kaj ortografio. La avantaĝon por la franca lingvo la aŭtoro akceptas kiel nature konsekvencan el tiu pozicio de la «internacia lingvo, kiun en la altaj sociaj rondoj havas tiu ĉi lingvo». S c h i p f e r ne intencis anstataŭi per sia lingvo lingvojn naturajn. Universala lingvo — estas lingvo helpa. Al la prilaboro de la lingvoformoj, laŭ opinio de S c h i p f e r, oni devus altiri la scienculojn el ĉiuj landoj.

Ĉiuj vortoj de komunika lingvo, escepte de pronomoj kaj numeraloj, estas de pure franca deveno, ekzemple: fasilman (facilement)—facile, batailja (bataille)—batalo, deklinacioj kaj konjugacioj estas de unu speco kaj sen iuj esceptoj. La sama principo estas konservata en ĉiuj aliaj reguloj de gramatiko. Modeloj de gramatikaj formoj estis donitaj en la aldono — kompara tabelo de gramatikaj distingaĵoj. Laŭ sia naturo la komunika lingvo estas tre proksima al la modernaj projektoj kaj tial ĝi estis nekompareble pli facila por lernado ol la aliaj pazigrafiaj, filozofiaj kaj miksitaj (laŭ la tipo de Solresol, v. p.80) projektoj.

Ĝia sola senduba manko estis ĝeniga nepro uzi la vortaran materialon de sola franca lingvo.

Sed tiam la pensoj ne estis favoraj por la «kripligo» de la ekzistantaj lingvoj. Krom tio ĉe la momento de la publikigo S c h i p f e r estis preskaŭ 80-jara. En tiu aĝo estis malfacile atendi lian sufiĉan aktivecon por la afero de propagando de la ideoj de aposterioria lingvo.

La promesitaj de li vortaroj kaj krestomatio ne estis aperigitaj.

**A. Renzi (1840)**

En la j. 1840 (la jaro estas indikita de K e r c k h o f f s ([34]), en la libro la jaro ne estis indikata) en Parizo aperis treege ampleksa, je 900 kaj pli paĝoj, libro de profesoro de itala lingvo A. R e n z i [2], kiu revivigis preskaŭ komplete la ideon de W o l k e. La libro prezentas per si paralelan vortaron italo-franco-anglan por 3000 gravaj verboj kun ĉiuj formoj de ties konjugacio. Per tiu materialo estis plenigitaj la unuaj 540 paĝoj de la libro. Ĉar la paralela — per apudaj kolonoj — presado de la verboj en 3 lingvoj esceptas la eblecon de ilia laŭalfabeta ordigo, tial al tiu ĉi vortaro estis aldonitaj alfabetaj indeksoj de la verboj en ĉiuj tri lingvoj.


Plue estis donitaj po 80—90 paĝoj al la tri vortaroj (itala, franca kaj angla) de la ofte uzataj vortoj kaj frazoj, ĉe kio la vortoj kaj frazoj de ĉiu lingvo estas provizitaj per paralela traduko en du aliajn lingvojn.

---

[1] J. Schipfer, «Versuch einer Grammatik für eine allgemeine Communications Sprache», Leipzig, 1839.
De la sama: «A grammar for an international language», Wiesbaden 1839.


[2] A. Renzi, «Le polyglotte improvise ou l' art d'écrire les langues sans les apprendre avec 3000 verbes conjugés», Paris ([45]).

En la ceteraj rilatoj la tasko estas solvata de R e n z i simple: ĉiu esprimo (verba formo, vorto aŭ parto de frazo) estas signita per numero de respektiva paĝo, sur kiu ĝi estas presita. Kaj tial ke sur ĉiu paĝo estas presitaj po 60 verbaj formoj, vortoj kaj esprimoj — R e n z i uzas aldone jenajn du seriojn da helpaj signoj.



15 signoj de 1-a serio — 4 signoj de 2-a serio

Sesdek vortoj kaj esprimoj, presitaj sur ĉiu paĝo, estas signitaj en laŭsekva ordo per jena malascendanta vico de signoj.



Tiamaniere la grupoj po 4 vortoj en laŭsekva ordo estas signitaj per 15 signoj de la unua serio kaj interne de tiuj grupoj por diferencigo de la vortoj servas la 4 signoj de la dua serio.

Por esprimo de la vortoj kaj ideoj, presitaj en liaj vortaroj, R e n z i proponas skribi la signojn apude starantajn kun respektiva vorto kaj super la signo skribi numeron de koncerna paĝo.

Apartaj vortoj aŭ esprimoj pro tio akceptas jenan aspekton:

| | |
|---|---|
| 663<br>⌉ — kiel vi fartas? | 37<br>_ — ami |
| 705<br>⊣. — mi havas la honoron | 37<br>\\= — vi amas |
| 705<br>\\.. — mi ne scias, kion diri | 37<br>\\. — mi amas |
| | 37<br>\\.. — vin amas |

Uzante ĉi tiun vortaron, ĝian verban parton, kaj ankaŭ la vortaron de sia nacia lingvo, oni povas enĉifri per koncernaj signoj ĉiujn necesajn esprimojn. Post la ricevo de simila ĉifrita letero, alilandulo, por kompreni la skribitan, devos en la vortaro de la sendinto trovi la paĝon kaj konformajn signojn kaj rigardi, kia traduko rezultiĝas por tiuj signoj en la lingvo de la adresito. Uzi ĉi tiun sistemon de interkorespondo oni povas nur, se la ambaŭ korespondantoj posedas la vortarojn en la lingvo de la sendinto kaj de la ricevinto. Nur en tiu kondiĉo oni povus laŭ la paralelaj tradukaj tekstoj traduki la enhavon de ricevataj leteroj.

Tiamaniere la koncernaj signoj por la sama esprimo estos malsamaj, depende de tio, el kiu lingvo la esprimo estas tradukata (aŭ — en kia parto de la vortaro: franca, itala aŭ angla, ni serĉas ĉi tiun esprimon), sed la traduko en ĉiun el tiuj tri lingvoj estos la sama.

Oni ne povas diri pri R e n z i, ke li donas sistemon de lingvo en tia aspekto, kiel ni ordinare komprenas la lingvon. Li mem nomas sian projekton nur ilo de interkompreno, sed en tiu aspekto la projekto estis multe pli malperfekta kaj komplika, ol eĉ tia primitiva sistemo

de universala skribsistemo, kia estis, ekzemple, la «genigrafio» de M a t r a y a.

**Nekonataj projektoj kaj eldonaĵoj dum la jaroj (1832—1848)**

Necesas ankoraŭ noti serion da laboraĵoj malpli konataj, kiuj rilatas al la sama periodo. P. S t o j a n ([40]) citas kun demandosigno pazigrafion de L e H a r i v e l (1839 j.).

En la j. 1840, kiel komunikas K e r c k h o f f s ([34]), aperis projekto de universala cifera, skriba kaj parola lingvo «Phonarithmon» de W. H e n s l o w e [1] kaj pli malfrue, en la j. 1844, estis publikigita skizo de aprioria sistemo de skriba kaj parola lingvo «Orbidaie» de B a z i n [2].

Laŭ la informoj el la sama fonto ([34]), la jaro 1842 estis atestanto de apero de la unua ekstereŭropa (en Ameriko) traktaĵo de S. G. H o w e, dediĉita al la problemo de internacia lingvo [3], kaj fine skizoprovo de filozofia lingvo de E. G r o v e s ([2]) estis eldonita en la j. 1846 en Dublin.

Al la jaroj 1832—48 P. S t o j a n ([40]) rilatigas pazigrafiajn laborojn kaj 4 librojn de P. J o n a i n. Inter ili — «Pasigraphie» (1837 j.) kaj «Hemi-Pasigraphie» (1848 j.). Tamen donante tiujn ĉi indikojn P. S t o j a n iakaŭze eĉ ne komunikas la eldonlokon de tiuj libroj, nur mallonge konstatante, ke «nek C o u t u r a t, nek D r e z e n konis tiun aŭtoron».

Ni havas ankaŭ informon, ke la fondinto de ribelema religia sekto «Sionskaja Vestj» (Ciona Anunciacio), pli poste ekzilita de la registaro de Nikolao 1-a al Soloveckij monaĥejo, Nikolaj Sozontoviĉ I l j i n celis krei universalan lingvon [4]. Ne ekzistas pruvoj por tiu ĉi aserto, kvankam oni povas pensi, ke la religie-mistikaj ideoj de I l j i n pri «Universala frateco» kaj liaj provoj prepari komunan alfabeton [5] — povis esti ligitaj ĉe li kun alia ideo pri universala lingvo.

**E. Vidal (1844)**

Malsame, kiel la plimulto de la projektintoj de artefaritaj lingvoj, kiuj donis nur ĝeneralajn skizojn de la bazaj principoj, E. T. V i d a l en la j. 1844 publikigis detale kaj zorge ellaboritan projekton de universala analitika lingvo [6], kiu prezentis per si grandan volumon je 400 kun kelkaj paĝoj. La analitika lingvo de V i d a l prezentas per si miksaĵon de ĉiuj principoj de ciferaj, pazigrafiaj kaj filozofiaj sistemoj. La aŭtoro mem diras ke en lia lingvo la ciferoj kaj literoj estas iom identaj.

La alfabeto konsistas el 33 literoj (en ilia nombro 13 vokaloj), en ĝin estis enkondukitaj kelkaj ciferoj, ekz. 7, 8 kaj 9 por la diftongoj, uj, ej kaj aj. La samaj literoj en certa konsekvenco, sed sen iu sistemo, konformiĝas al difinitaj ciferaj signifoj.

Pri la strukturo de tiu ĉi lingvo oni povas juĝi laŭ sekvantaj reguloj, kiujn obeas la aŭtoro: 1. ĉiu vorto, konsistanta el unu litero, se tiu ĉi litero-konsonanto, estas pronomo, sed se tiu ĉi litero estas vokalo, tiam la vorto estas verbo, 2. ĉiu vorto el tri literoj, finiĝanta per i aŭ o — estas pronomo, per e — prepozicio, per 2 (legu — u) aŭ oe — adverbo ktp. Tiamaniere la pronomoj m i, c i, l i, ŝ i en la lingvo

---

[1] W. H. Henslowe, «The Phonarithmon», London, 1840.

[2] Bazin, «Orbidâie, ou lettres et mots éminement propres á constituer une langue universelle», Lyon, 1844.

[3] En «American institute of instruction», Boston, 1842.

[4] «Pravoslavnoje Obozrenie», 1867, t. XXIII — kaj rusa Enciklopedis vortaro de Brockhaus kaj Effron, duonvolumo 59, pĝ. 153.

[5] La artikolo de N. Iljin «Obŝĉaja azbuka v prirode ĉelovjeka», en gazeto «Majak», 1842, vol. VI, junio.

[6] E. F. Vidal, «Langue universelle et analitique», Paris, 1844.

de Vidal estas: v, 6 (legu — r), g kaj d. La vortoj dividiĝas je 20 fundamentaj klasoj. Ĉiuj vortoj de unu klaso komenciĝas per la sama litero. La unuaj dekdu klasoj plene ripetas la bazajn klasifikajn dividojn, akceptitajn de Maimieux en lia pazigrafio. La ceteraj 8 klasoj neeviteble intermiksiĝas kun la unuaj kaj nur malhelpas la ekzaktecon de la klasifika sistemo de Vidal. La vortaro entenas nur substantivojn, la aliaj partoj de parolo estas derivataj de tiuj lastaj.

Bredshaw (1847) Simplig-projektoj de angla lingvo

En la j. 1847 James Bredshaw en Londono proponas kiel universalan lingvon simpligitan anglan lingvon [1].

Ne estas malinterese ekscii, ke rilate la reformitan anglan lingvon Bredshaw havis siajn antaŭirintojn. En la libro de Harris [2] ni trovas noton pri la fama Doktoro Swift, kiu ankoraŭ en la jaro 1711 prezentis al la lordo trezoristo de Anglio «Projekton de korekto, perfektigo kaj ĝustigo de la lingvo». Analogiajn proponojn, laŭ la sama atesto enhavas la skizo de mortinta en la j. 1787 Lawth («A short introduction to English grammar»).

La simpliĝo de la ekzistantaj lingvoj estas afero racia kaj utila. Ĝi devas esti farata seninterrompe kaj ju pli konsekvence kaj decideme ĝi estas efektivigata — des pli bone estas, sed en tiu okazo la afero de la lingva perfektigo restas afero nur de tiu popolo, kies lingvo estas perfektigata.

En Anglio dum la lastaj jardekoj laboras speciala societo por propagando de simpligita ortografio «Simplified spelling society». La laboro de tiu ĉi societo sendube estas tre utila kaj ĝi donas certajn rezultojn, sed tamen tiu ĉi laboro ne prezentas por la angla lingvo perspektivojn por ke oni akceptu ĝin en estonteco kiel lingvon internacian.

Parolante speciale pri la provoj simpligi la anglan lingvon kaj adaptigi ĝin al la rolo de la lingvo universala, ni devas klare kompreni, ke fakte simila provo estus ago kontraŭprogresa kaj reakcia. Ĉiu popolo praktikas certan lingvon, en kiu esprimiĝas kulturtrezoroj de tiu popolo kaj servas kiel certa kulturiga instrumento por anoj de tiu popolo. Ĉiu artefarita ŝanĝo povas koncerni nur la skriban literaturan lingvon.

Provo reformi la parolan lingvon, uzatan de milionaj amasoj, estus malutila kaj kontraŭprogresa, ĉar se tiu reformo efektiviĝus, tiaokaze vastaj popolamasoj por certa tempo sentus gravajn ĝenojn alkutimiĝante al novaj formoj de la lingvo, kiun ili lernis dum sia infaneco. Sed ankaŭ la provo reformi la literaturan anglan lingvon estus ago kontraŭprogresa, reakcia. Tiu reformo de la lingvo literatura (ne parola) devus koncerni unuavice la ortografion. Kaj ĝuste la angla ortografio ebligas kompreni al internacia publiko la vortojn «corporation», «international» k. t. p. Ĉe la reformo de la ortografio la vortoj «interneŝnel» kaj «korporejŝen» restus ne komprenataj por la eksterlanda publiko. Tio kaŭzus kvazaŭ certan malproksimigon, izoligon por la angla lingvo, kulturo kaj popolo for de aliaj lingvoj kaj lingvo-kulturoj, obeantaj la leĝon de poioma sia internaciiĝo.

Ĉiuokaze simila al tiu de Bredshaw sistemo de simpligita moderna lingvo estas sendube pli altvalora ol la projektoj pazigrafiaj. Sed, eĉ ne atentante la argumentojn de ni ĵus donitajn, necesas konstati, ke ilia unuflanka gravitado al iu nacia lingvo ne donis kaj ne donas al ili eblecon konkiri la popularecon ankaŭ ekster sia propra lando.

[1] James Bredshaw, «A scheme for making the English language the internationa language of the world», London, 1847.

[2] J. Harris, «Hermes ou recherches philosophiques sur la grammaire universelle» traduit par Fr. Thurot, Paris, an. IV (1796), pĝ. CXVI ([45]).

Kaj en siaj propraj landoj tiaj projektoj estas konsiderataj kiel simpaj lingvo-kripligoj.

**La projektoj de tutslava lingvo**

Estis provoj reformi ankaŭ aliajn lingvojn. Al similaj provoj apartenis ekzemple la projekto de S c h i p f e r — reformi la francan lingvon (1839 j.).

Nun ni pritraktu iom similajn provojn reformi la slavajn lingvojn por krei — ne lingvon universalan, sed tutslavan. En tiuj provoj estas sentebla tute alia kaŭzo kaj gvidmotivo ol en la nacie ŝovinistaj kaj imperialismaj provoj simpligi kaj poste universaligi la simpligitajn eŭropajn ĉeflingvojn — la anglan, francan, germanan.

La slavaj popoloj ekster Rusio troviĝis sub premo de aliaj nacioj. Speciale peze tiun premon sentis la popoloj de iama Aŭstrio — de Dalmacio kaj Slovenio. Tiu premo ankoraŭ pli fortiĝis pro la nacia dividiteco de la slavoj. Do, rezulte, inter la intelektuloj de tiuj popoloj povis veni ideo, ke la slavoj, unuigitaj per lingvo komuna, estus pli rezistokapablaj kaj pli sukcesus en siaj bataladoj por nacia, kultura kaj politika liberiĝo. Provoj ellabori similan tutslavan lingvon estis farataj jam delonge. Ili havas sian apartan historion [1]. La unua el tiuj provoj rilatas al la sama jaro, kiam aperis la unuaj de ni konataj, detale ellaboritaj sistemoj de pazigrafioj — de D a l g a r n o kaj de B e c h e r.

En la j. 1661 kroata pastro J. K r i z a n i ĉ, ekzilita Siberion, kunmetis gramatikon de interslava literatura lingvo. P. S t o j a n atestas ke tiu ĉi libro estis eldonita en la sesa jardeko de la pasinta jarcento kaj ke la «Ruski jezyk» de K r i z a n i ĉ estas detale ellaborita lingvosistemo, por kies bazo estis prenitaj lingvoj serbo-kroata kaj rusa. B l a s i u s C u m e r d e i (Blaz Kumerdey) en la j. 1793 ellaboris sur la bazo de la slovena lingvo projekton de gramatiko por ideala komunslava lingvo. Tiu ĉi projekto ne estis presita. G. S a p e l (1744—1807) ellaboris ankaŭ projekton de gramatiko por interslava skriba lingvo. P. S t o j a n ([40]) enrubrikas la ellaboron de tiu ĉi projekto sub la j. 1790. Troviĝis ankaŭ proponoj pli simplaj, kiuj provis akceptigi por la interslava literatura lingvo — lingvon rusan (J u n g m a n n, P o g o d i n, L a m a n s k i).

P. S t o j a n indikas ankaŭ la rilatantan jam al pli malfruaj tempoj pluan nomaron de aliaj aŭtoroj de la interslavaj lingvo-projektoj: de slovako J o a n H e r k e l [2] (1826), de sloveno M a t i j a, M a j a r [3] kaj de serbo P e t a r T o m i ĉ (1885).

La sama komunikas pri ne konata laboro en lingvo angla (sen cito de dato kaj loko), farita de K o p i t a r — «Regular Russian». En la libro de D-ro I. P r i j a t e l j «Slovena literaturo» [4] en la ĉapitro dediĉita al fama slovena verkisto B a r t o l o m e j K o p i t a r (1780—1844) ni povas ĉerpi rektan aludon, ke la aŭtoro de tiu ĉi libro (Regular Russian) povas esti ĝuste tiu B. K o p i t a r kaj la dato de ĝia apero povas esti fiksita ĉe la j.j. 1810—1820, kun la eldonloko — Wien.

Kiel ni vidas, ĉiuj ĉi proponantoj devenis el nacioj sudslavaj kaj el slavoj subaŭstriaj.

---

[1] Vidu «Revue Cosmoglotique». Budapest, 1912, № 1, p. 12—13; A. Budiloviĉ, «Obŝĉeslovjanskij Jazyk na rjadu drugih jazykov», Varŝava, 1891, kaj lian «Ueber die litter. Einheit der Slawen», S. Petersburg, 1879.

[2] J. Herkel, «Zaklady Vseslovanskeho Jazyka», Wien, 1826.

[3] M. Majar, «Uzajemni Pravopis Slavjanski», Ptaha, 1865.

[4] D-r Ivan Prijatjelj, «Slovenačka Knjizewnost», Beograd, 1920.

Jam pro tute aliaj motivoj — ne de nacia liberiĝo, sed de kreskanta rusa imperialismo kaj nacia ŝovinismo estis prezentataj projektoj de Jungmann (40), Pogodin kaj Lamanski rekomendantaj akcepti la lingvon rusan kiel interslavan literaturan lingvon.

Se en la unuaj jarcentoj de sia ekzisto la ideo de universala lingvo trovis adeptojn solulojn inter la scienculoj kaj pensuloj, superiĝantaj en la pensnivelo de ilia samtempa socio, ĉe la mezo de XIX jarcento ni devis konstati ĉiam pli grandiĝantan penetron de tiu ĉi ideo en ĉiam pli kaj pli vastajn amasojn de la socio.

**La kresko de la intereso por la problemoj de universala lingvo**

Seriozaj verkoj kaj notoj de aliaj personoj, ne aŭtoroj de artefaritaj lingvoj, servas por tio kiel bona pruvo. La franclingva traktaĵo de Fontana pri universala skribo [1]; la originalaj esploroj de Ch. Nodier [2] en la analizo de apartaj sistemoj de artefarita lingvo; lia certeco pri tio, ke tiu ĉi lingvo, eĉ estante de tipo filozofia, nepre venos kaj ekzistos; kaj ankaŭ lia artikolo, pruvanta ke «la artefaritaj formoj, kulturataj de apartaj aŭtoroj seninterrompe penetras en la vivantan popolan parolon kaj iatempe eĉ akcelas la kreon de apartaj dialektoj kaj ĵargonoj»; ampleksa ĉapitro pri la problemo de raciigita lingvo en la verko de franca filozofo Charma (7); seriozaj artikoloj en grava angla ĵurnalo [3]; opinioj de Spencer pri tiu ĉi problemo, rerakontitaj de li en lia «An Autobiography» [4] (1843), speciale interesaj pro sia energia kontraŭstaro al la fleksi-sistemo de la eŭropaj lingvoj, kaj fine, la vidpunktoj pri utileco de la estonta universala lingvo, «de korektita, de unu el la plej bonaj», kiujn publikigis la fondinto de la filozofia skolo de pozitivistoj — Auguste Comte [5], — ĉio montras kreskon de la specifika pezo de la nova ideo.

Eĉ en Rusio de la epoko de Nikolao I. troviĝis homoj, sekvintaj la evolucn de tiu ĉi ideo. En la moskva biblioteko je la nomo de Lenin certa kvanto da libroj, traktantaj la problemon de universala lingvo, estis siatempe ricevita el la biblioteko de Vlad. Fed. Odojevskij (1803—1869) verkisto kaj rimarkinda batalanto por la sociaj ideoj de sia tempo. Kolektadi la nomitajn librojn, eldonitajn en diversaj landoj kaj en diversa tempo, estis eble nur pro posedo de certa simpatio kaj intereso por la en ili traktata problemo.

La kresko de la intereso al la ideo de universala lingvo estas klarigebla per la kresko de la bezono de tia lingvo kaj per tio, ke la esplorantoj de diversaj formoj de universala lingvo jam preskaŭ tuŝis la sojlon de la rekta solvo de la problemo — la konstruan formon de la lingvo, kreita laŭ la formoj kaj modeloj de lingvoj naturaj.

De la individuecaj ciferaj vortarsistemoj, devenintaj el sekretaj skribsistemoj kaj stenografio, tra la samgrade individuecaj filozofiaj kaj empiriaj sistemoj de pazigrafio, provinte ĉiujn eblajn manierojn por fari el pazigrafio lingvojn paroleblajn oni iom post iom forĵetis ĉion neakomodeblan, lernis penetri en la profundon de la lingvo-strukturo, kaj sin pretigis solvi la problemon: ĉu estas eble krei lingvon filozofian, kiu kontentigus ĉiujn mensojn, similus al lingvoj naturaj kaj estus uzebla en la praktika vivo. La sekvinta jarcentkvarono estis oferita por la fina solvo de tiu problemo.

---

1 A. Fontana, «De la pasigraphie», Marseille, 1850.

2 Vidu la artikolojn de Ch. Nodier en «Bulletin des Bibliophiles», Paris, 1835, n-o 18:«De quelques langues artificielles»., «Mélanges, tirés d'une petite bibliothéque» Paris, 1825 kaj «Notions élémentaires de linguistique», Bruxelles, 1834 (45).

3 «Chamber's Edinburgh Journal», n-o 26—29, artikolo «A Universal language».

4 Vidu «Internacia Scienca Revuo», Paris, 1906, № 28, p. 128.

5 Auguste Comte, «Systéme de politique positive», Paris, 1854, tome IV, pĝ.75—76 (45).

## VI

## LA PROJEKTOJ EL LA PERIODO 1850—1880, ANTAŬIRINTAJ LA APERON DE VOLAPÜK

Universala lingvo estus komuna bonfaraĵo kaj forte akcelus la unuiĝon kaj fratecon de la popoloj. (El forgesita rezolucio de la 2-a kongreso de l' I-a Internacio).

Sudre (1817—1866)

Ankoraŭ en la j. 1817 lerneja instruisto en Soreze (Francio) J e a n S u d r e decidis provi krei novan universalan lingvon, preninte por ĝiaj bazaj elementoj 7 bazajn muziknotojn, la samajn en la tuta mondo kaj fakte internaciajn. Post dek jaroj, en la j. 1827, sian ankoraŭ ne finitan laboron S u d r e prezentis por trarigardo al la Pariza Artakademio. Dum 40 kaj kelkaj jaroj pli li penadis plej zorge prilabori la terion, gramatikon kaj vortaron de sia lingvo. Nur en la jaro 1866, jam 4 jarojn post la morto de S u d r e, estis publikigita lena lernolibro — vortaro de la muzika lingvo «Solresol» [1].

El la muziknotoj, prezentantaj silabojn de la lingvo, estis kunmetataj vortoj de la lingvo, gramatikaj fleksioj kaj fine — kompletaj frazoj. La vortaro de Solresol estis kunmetita apriorie, sed ĝi ne estis bazita, simile al la filozofiaj sistemoj, sur logika klasifiko. La vortoj konsistis el 1, 2, 3, 4 kaj 5 silaboj, laŭ tio, ĉu ili estis formitaj per kombino de 1, 2, 3, 4 aŭ 5 muziknotoj.

La kombinaĵoj el 1 kaj 2 muziknotoj faris partetojn kaj pronomojn: si — jes, do — ne, re — kaj, mi — aŭ, sol — cia, ktp. La plej uzataj vortoj formiĝis el kombino de tri notoj: doredo — tempo, doremi — tago, dorefa — semajno, doresol — monato, dorela — jaro, doresi — jarcento. Kombinaĵoj el 4 notoj estis dividitaj je klasoj, laŭ la komenca noto; tiel ekzemple la klaso «do» rilatis homon materian kaj moralan, klaso «re» — familion, mastrumon kaj tualeton, klaso «mi» — agojn de la homo kaj liajn mankojn, ktp.

Kiam iu vorto estis verbo, tiam la nomo de la objekto, persono, adjektivo kaj adverbo, devenanta de tiu verbo, formiĝis per akcento sur la 1-a, 2-a, 3-a kaj 4-a silabo de la vorto.

E k z e m p l e:

sirelasi — establi, fondi
sírelasi — konstitucio
sirélasi — konstituanta (konsistiga)
sireládi — konstitucia
sirelasí — laŭ la konstitucio.

[1] Jean François Sudre, «Langue musicale universelle par le moyen de laquellle (aprés seulement trois mois d' étude) tous les differents peuples de la terre,les aveugles, les sourds et les muets peuvent se comprendre réciproquement», Paris, 1866.

La ideo kontraŭa esprimiĝis per renversita ordo de la silaboj en la koncerna vorto, ekzemple: misol — bono, solmi — malbono, sollasi — supreniĝi (ascendi), silasol — malsupreniĝi (malascendi). Por transdoni laŭ la bezono per tiu ĉi lingvo proprajn nomojn kaj geografiajn terminojn, estis antaŭvidita la anstataŭo de la literoj de alfabeto per apartaj notoj.

Per tiu ĉi lingvo oni povis skribi, paroli, oni povis ludi ĝin per iu muzikinstrumento. Por la surdomutuloj kunlaboranto de S u d r e, V i n c e n t G a j e w s k i ellaboris specialan sistemon de la manmovoj, donantaj alfabeton de Solresol por surdomutuloj. Fine, la sep fundamentaj koloroj, egaligitaj al respektivaj muziknotoj, donis la eblecon de kolora kaj luma signalado en tiu lingvo, aŭ de telegrafio, kiel oni ĝin tiam nomis.

S u d r e dum duonjarcento traveturis la tutajn Francion kaj Anglion, propagandante sian lingvon. La Instituto de Francio — supera scienca institucio de la lando — kvarfoje (en la jaroj 1827, 1833, 1839 kaj 1856) formis komisionojn, konsistantajn eĉ el tiaj scienculoj, kiel A r a g o kaj E. B u r n o u f, kiuj ekkonis la laborojn de S u d r e kaj donis pri ili favorajn konkludojn. La franca ĝeneralstabo (marŝalo S o u l t e) kaj militŝipa supera komandantaro rekomendis la enkondukon kaj parte eĉ enkondukis la ellernon de signalaj kaj lumaj kombinaĵoj de Solresol en la franca armeo kaj ŝiparo.

Al S u d r e esprimis siajn simpatiojn kaj lin instigis V i c t o r H u g o, A. L a m a r t i n e kaj A l e k s a n d r o H u m b o l d t. En la j. 1855, ĉe la tutmonda ekspozicio li estis premiita per 10 000 frankoj, ĉe la Londona ekspozicio de j. 1862 — per honora medalo. S u d r e estis enkondukita al la kortego de Napoleono III. Ankaraŭ unu premio je 50 000 frankoj estis al li aljuĝita pro la raporto de generalo M a r n o t (1839), sed ĝin li neniam ricevis.

Post la morto de S u d r e lia edzino daŭrigis la aferon de sia edzo. Ŝi fondis en Parizo societon por propagando de Solresol. En la j. 1886 aperis nova eldono de lernolibro de Solresol. La filo de V i n c e n t G a j e w s k i, B o l e s l a w G a j e w s k i en la j. 1902 publikigis gramatikon de la muzika lingvo.

Solresol posedis gravajn avantaĝojn kompare kun la pazigrafioj kaj filozofiaj lingvoj. Ĝi estis pli simpla ol la filozofiaj sistemoj. Ĝi estis jam parola lingvo. Sed tamen ĝi havis ankaŭ grandan malavantaĝon — ĝi ne estis pli facila, sed multe pli malfacila ol iu el la naciaj lingvoj. Ĝi estis al ili fremda laŭ sia spirito kaj konstruo. Oni devis lerni ĝin de la komenco parkere. Tute senbaza estis la aserto, ke ellerni Solresol oni povus sen aparta penado dum ne pli ol tri monatoj. La ebleco de ĝia aplikado estis limigita jam pro la 7 silaboj-notoj en la lingvo. En ĝia praktikado ofte sin montris malordiĝoj kaj malregulaĵoj.

B. Sotos-Ochando (1845—1885)

La unua en la vico de la projektoj filozofiaj, kiuj laŭforme pliproksimiĝis al la formoj de l' ekzistantaj lingvoj staras la sistemo de pastro S o t o s-O c h a n d o. La kreo de tiu ĉi sistemo rilatas la jaron 1845(8). La hispana originalo aperis en Madrid en la j. 1852 [1], la franca traduko de T o u z e, en Parizo — en la j. 1865. F e r r a r i tamen rilatigas la unuan eldonon de tiu ĉi projekto al la j. 1848 (31), sed ĝi ne estas al ni konata.

P. S t o j a n (40) konstatas, ke la libro prezentas represon de 5 artikoloj de l'aŭtoro el «El Heraldo» de la j. 1845.

[1] Bonifacio Sotos-Ochando, «Proyecto y ensayo de una lengua universal», 2 ed., Madrid, 1852.

La ideo krei universalan lingvon naskiĝis ĉe Sotos-Ochando jam en lia maljuna aĝo, kaj li vidis sian taskon en «starigo de plena konformeco inter la natura kaj logika ordo de la klarigitaj objektoj kaj la alfabeta ordo de la vortoj, uzataj por la esprimado». Al sia lingvo Sotos-Ochando inklinas atribui rolon de lingvo helpa kaj precipe por scienculoj kaj korespondantoj.

Diversaj specoj de la vortoj estas distingeblaj laŭ ilia fina litero. La gramatiko estas simpla kaj skema. La vortoj estas konstruataj laŭ la tipoj el sistemo de Dalgarno kaj de aliaj filozofiaj sistemoj, sur la bazo de malascendanta klasifiko de la ideoj. Ĉe tio rezultiĝas jena malascendanta ĉeno: A — materiaĵoj neorganaj, Ab — materiaj objektoj, Aba — simplaj solidaĵoj, aŭ elementoj kaj plue — Ababa — oksigeno, Ababe — hidrogeno, Ababi — azoto, Abaca — telurio ktp.

La lingvo de Sotos-Ochando estis sendube lingvo, sed ne nur lingva transformaĵo de pazigrafia sistemo. Tamen memori ĉi tiun amason da similaj sonoj kaj vortoj ne estis eble.

La socia oficiala situacio de pastro Ochando, estinta edukinto de la reĝa familio, scienculo kaj politikisto ([8]), la detala prilaboro de la projekto — donis al la nova lingvo ioman disvastiĝon. La unua laŭ la tempo, se ni ne konsideru la pazigrafian sistemon de Maimieux, lingvo de Sotos-Ochando dum la periodo de la j. 1852 ĝis 1865, disvolvis realan propagandon: donis 6 lernolibrojn kaj librojn al ĝi dediĉitajn en hispana lingvo kaj tri tradukojn de tiuj libroj en la lingvon franca. La pariza ĵurnalo «Tribune de Linguistes» en la j. 1859 enhavis tre laŭdajn recenzojn pri tiu ĉi lingvo. En la j. 1861—1864 fondiĝinta Societo por tutmonda lingvo aperigis sub la redaktado de Lope Gisbert sian «Bultenon» (2 vol., 480 p.), sed poste la movado komencis malvigliĝi. En la jaro 1862 Sotos Ochando publikigis «Nomenclatura del reino vegetal»; poste sen montro de jaro ankoraŭ aperis lia «Apendice sobre nomenclaturas cientificas», 16-paĝa broŝuro, kaj la agitado por tiu lingvo ŝajne ĉesiĝis.

Aliaj egalvaloraj projektoj deturnis la atenton de tiu ĉi inventaĵo. Pluan fojon montriĝis, ke eĉ la plej perfekta filozofia sistemo individuece ellaborita ne povas gajni praktikan akcepton de tia nombro da aliaj individueoj, ke ĝi (tiu nombro) garantiu vere praktikan ekuzon kaj disvolvon de la lingvo. En la j. 1885 Vinaverde y Domineck[1] aperigis en Madrid la lastan libron, dediĉitan al la lingvo de Sotos-Ochando.

**C. Letellier (1852—1886)**

Scienculo-lingvisto C. Letellier en la jaro 1852 komencas serion da siaj publikigaĵoj, dediĉitaj al detale prilaborita projekto de filozofia sistemo de internacia konvencia lingvo[2]. Li estis la unua aŭtoro, akceptinta por la nomo de sia lingvo la vorton «internacia». En tuta vico da dikaj volumoj kaj apartaj broŝuroj, eldonitaj en Caen (Francio), ĝis la jaro 1886, la aŭtoro daŭre evoluigis sian sistemon. En la bazon de ĝia konstruo Letellier metas jenan tezon: «La literoj aŭ signoj, el kiuj konsistas la teoria vorto, devas montri certan analizon de la ideo, kiun pretendas doni tiu ĉi vorto». Ĉiu vorto en la rezulto de tia tezo devas konsisti el literoj, difinantaj ĝian lokon en la logika klasifika sistemo de la ideoj kaj konceptoj de Letellier.

---

[1] Vinaverde y Domineck, «Compendio de la lengua de Sotos-Ochando», Madrid, 1885.

[2] C. A. Letellier, «Cours complet de langue universelle, offrant en même temps une methode facile et sûre pour apprendre et pour comparer en quelques mois toutes les littératures mortes et vivantes», Caen, 1852—1855, 4 vol.

Laŭ sia konstruo la lingvo de Letellier ne estas pli bona ol aliaj filozofiaj projektoj kaj ĝi posedas kelkajn, komunajn al ĉiuj ili, mankojn. Kiel karakterizan rebuson el la sistemo de Lettellier ni citu la vorton vag: v signifas adverbon, a — jeson, certigon, g — ion absolutan, kaj entute: vag estas adverbo de absoluta jeso, certigo, tio estas: jes. Eble tiaspecaj rebusoj havas sian edukan valoron, sed tamen ellerni kaj simple memori la vorton «jes» estas ĉiel pli facile, ol sin turni al tiaj «sciencaj» konstruoj de la plej elementaj ideoj.

La kompleta lernolibro de la lingvo, en 4 volumoj enhavis 1984 paĝojn. Jam el tio fariĝas evidente, ke tiu ĉi «internacia» lingvo per sia komplikeco kaj malfacileco superis ĉiujn lingvojn «naciajn», naturajn.

**La hispanaj projekto (1852)**

Samtempe kun la projekto de Letellier, en la sama jaro 1852, aperis en Hispanio projekto de iu Pedro Lopez Martinez[1], stimulita verŝajne per analogiaj verkoj de Sotos Ochando. Laŭ informoj el Hispanio oni povas konstati, ke tiu aŭtoro restis ĝenerale nekonata[2].

P. Martinez decide rompis kun la tradicia serĉado de lingvo filozofia kaj celis konstrui simpligitan aposteriorian lingvon. La vortojn por tiu ĉi lingvo la aŭtoro prenas precipe el romanaj lingvoj, sed kun certa almikso de vortoj, devenantaj el lingvoj germanaj. La gramatiko de tiu ĉi projekto, malgraŭ ĝia ĉiuflanka aspiro por simpleco, restas tamen sufiĉe komplika; ekzemple la verbaj formoj varias laŭ la tempoj, nombroj kaj personoj. Jen ekzemplo de vortderivo: mano — viro, mana — virino, mane — homo, manes — homoj.

Jen komenco el «Telemako»: Calipso no posei consolar seu`da be partite da Uliso. Na lie aflitio, la san trobei infelise da eser inmortal.»

**La simpligita lingvo germana (1853)**

Iu anonima D-ro L., en la jaro 1853, en Berlino projektas la simpligon de germana lingvo, destinota por la rolo de lingvo universala[3]. La bazaj korektaĵoj de la germana lingvo, laŭ la projekto de D-ro L., celis reguligon de la ortografio, forigon de majuskloj ĉe la substantivoj kaj simpligon de la gramatiko. Sed pro ĉio tio devis rezultiĝi nur kripligo de la germana parolmaniero kaj neniagrade tiu lingvo germana estus fariĝinta pli facile akceptebla por aliaj nacioj, kiel lingvo tutmonda[4].

La kritikaj rimarkoj faritaj de ni rilate al provoj simpligi la anglan lingvon (v.p. 77) — konservas sian forton ankaŭ por ĉiuj similaj provoj — simpligi la germanan lingvon.

La anonima aŭtoro D-ro L. estas D-ro Lichtenstein, kiu samjare (1853) en Breslau eldonis alian libreton, defendantan ideon pri simpligo de germana lingvo[5].

**Rambosson (1853)**

En la sama jaro 1853 Rambosson en Parizo publikigas projekton de universala sistemo de gestolingvo kaj skribo[6]. En la jaro 1856 li faris en la Pariza societo de sciencoj kaj artoj bone bazitan prelegon, kial, laŭ lia opinio, lingvo universala ne povas esti parolata. La projekto de Rambosson estis logika kaj praktika kompletigo de la

---

[1] Pedro Lopez Martinez, «Projekto o Bases de lengua universal», San Lucar de Barameda, 1852.

[2] «Progreso», Paris, 1909, aŭgusto n-o 18, pĝ. 363, kaj ankaŭ ĉe: Werner-Fraustódter, «Die internationale Hifssprache», Husum, 1910 ([47]).

[3] Dr. L., «Weltdeutsch», Berlin, 1853.

[4] Karl Lentze, «Die Weltsprache», Leipzig, 1886, paĝ. 16—17 ([47]).

[5] Dr. Lichtenstein, «Pasilogie oder Weltsprache», Breslau, 1853; 2-a eldono — Breslau, 1859.

[6] Rambosson, «Langue universelle, langage mimique, mimé et écrit, développement philosophique et pratique», Paris, 1853.

Rambosson, «Discours sur la langue universelle», Paris, 1856.

6*

ideoj, kiujn eldiris, en la komenco de la jarcento, S i c a r d kaj kiuj estis subtenataj de T r a c y kaj L a r o m i g u i e r e. Krome, li elpensis alfabeton por transskribo de la koncernaj gestosignoj.

**La internacia lingvista societo (1856—1858)**

Kiel montrilo, atestanta la kreskon de atento al la ideo de universala lingvo, estis tiu fakto, ke la fondita en la j. 1856, en Francio, Interna-cia lingvista societo, celinta interalie reformon de la franca ortografio, elektis komitaton el 23 personoj ($^{8}$), al kiu ĝi komisiis prilabori la pro-jekton de aprioria universala lingvo.

Tio estis jam fiksa signo, ke krom apartaj izoluloj pri la problemo de lingvo universala komencis okupiĝi jam certaj kolektivoj, ke ansta-taŭ individua solvo de la problemo oni komencis jam serĉi por ĝi kolek-tivan solvon.

La unua raporto al la societo pri universala lingvo estis farita en ĝi la 3-an de julio de j. 1856. Vere, el tiuj klopodoj rezultis nenio, ĉar la lingvista societo de la unua momento akceptis vidpunkton subteni la filozofiajn sistemojn, kaj la artikoloj — raportoj de C a s i m i r H e n r i c y en «Tribune de Linguistes»[1] en la j. 1858, enhavantaj resuman raporton de la komitato, estis la lasta resono de tiu ĉi entre-preno. Sed eĉ la iniciato mem de la ĵurnalo estis en certa grado tre ek-zempla. La lingvista societo intencis pere de tiu ĉi ĵurnalo «disvastigi inter la homoj la ideon de universala lingvo, kies bezono komencis ĉi esti sentata; priesplori la bazojn de tiu ĉi lingvo, grupigi ĝiajn elemen-tojn kaj prepari la vojojn por ĝia firmigo».

La komitato, formita de la societo, formulis la postulojn, prezenta-tajn por universala lingvo. Ĝi unuvoĉe akceptis, ke «tiu ĉi lingvo devas posedi sciencan karakteron kaj samtempe esti klara, simpla, facila racia, logika, filozofia, riĉa, eŭfonia kaj elasta, kapabla por la plu evoluo».

Estis evidente, ke neniu el la antikvaj kaj modernaj lingvoj pose das samtempe ĉiujn tiujn kvalitojn kaj kontentigas ĉiujn tiujn kondi ĉojn. Pro tio — la mortintaj kaj naturaj lingvoj rezulte estis unuvoĉ rekonitaj kiel maltaŭgaj por plenumi la rolon de universala lingvo Post tio la komitato transiris al esploro de la problemo, ĉu ne estu eble akcepti iun el la plej disvastigitaj kulturaj vivantaj lingvoj, ĝi plibonigiinte, riĉiginte kaj farinte en ĝi konformajn ŝanĝojn. Tia vid punkto havis kelkajn adeptojn, sed la komitato ĝenerale venis al l konkludo, ke tiaspeca vidpunkto havas nenian valoron, ĉar «la lingvo tiamaniere perfektigita, fariĝus nerekonebla kaj kune kun tio, restu malracia, nelogika, arbitra kaj malfacila».

Restis fari elekton inter la sistemoj de lingvo aposterioria, konsi stanta el partoj kaj fragmentoj, radikoj kaj sonimitaj vortoj, prenita el diversaj mortintaj kaj vivantaj lingvoj, kaj de lingvo aprioria, t. e konstruita el novaj elementoj. La komitato akceptis la decidon, k ĉiuj sistemoj aposterioriaj estas «malbonaj» ĉar la naturaj lingvoj «kor formiĝas ne al la nuna stato de sciencoj, sed al primitiva kaj embri stato de la civilizacio».

Ne venis ankoraŭ al la scienculoj-lingvistoj la kompreno, ke lingv mem estas produkto de certa socio kaj kiel tia — nepre devas respegul la pasintajn periodojn de la homara evoluo. La komitato celis krei ling von modernan, tute liberan de iu ne racia — kvankam historie necesa - heredaĵo. Tial ĝi voĉdonis «por la kreo de nova aprioria lingvo. Ti racia lingvo devis esti nomenklaturo, samsenca al la universala klas fika sistemo, t. e. ties — filozofia». Poste la komitato submet

[1] «Tribune de Linguistes», Paris, 1858, 1-re année, pp. 17—39, 65—105, 129—1

al kritiko ĉiujn al ĝi konatajn sistemojn de artefarita lingvo. Ĝi esploris la projektojn de Dalgarno kaj Wilkins, la «ridindan projekton de enciklopedio» (Faiguet de Villeneuve), kiu estis laŭ ĝia opinio nur «komika kripligo de la franca lingvo», «la unuan seriozan kaj praktikan projekton» de Delormel, la «tute konformajn al la principoj de universala lingvo» pazigrafiojn de Maimieux kaj Hourwitz; projekton de Le Mesl — «la plej bonan teorion de la lingvo, el la publikigitaj ĝis nun, tute konforman al la baztezoj de la komitato»; la projekton de Vidal — «kuraĝan plagiaton de la pazigrafia sistemo de Maimieux» kaj projektojn de kelkaj aliaj aŭtoroj.

**La projektoj, prezentitaj al la Lingvista Societo**

La komitato esploris ankaŭ kelkajn proponojn de siaj propraj membroj. Ĝi donis kategorian nean verdikton por la vidpunkto de Letellier[1] el Amiens, kiu opiniis ke la primitiva lingvo estis lingvo kelta kaj tial pretendis trovi la vortsencon per la disigo de koncerna vorto je literoj. Ekzemple: chat (kato) — besto ĉarma kaj amuza, rat (rato) — besto malgracia kaj grincanta. La komitato je la dua fojo donis malaprobon pri la opinio de sia membro Vaillant el Bukareŝto (laŭ Stojan (40), 1840—1858 j.?), kiu pensis, ke «universala lingvo ekzistas, ke oni devas nur elpreni ĝin el la internaciaj elementoj kaj radikoj de la ekzistantaj lingvoj», t. e. pri la opinio, kiu estis esence kontraŭa al la baza direkto de la komitato. La saman verdikton ricevis iu Gagne por sia aposterioria sistemo «Monopanglotte[2]».

La lastaj projektoj, esploritaj de la komitato, estis tiuj de Letellier el Caen kaj de Sotos-Ochando. La dua ricevis la preferan opinion, ĉar ĝi «konformiĝas al la ideoj de Le Mesl kaj de la komitato kaj superas ĉiujn aliajn projektojn». Tial, en atendado de io pli bona, la komitato decidis labori, akcelante «ĝian plibonigon, popularigon kaj agnoskon».

El raportoj de la komitato vidiĝas, ke ĝi intencis krei tian lingvon, kiu — laŭ la vortoj de Sotos-Ochando — donus al ĉiuj ĝin lernantaj samtempe bone analizitajn sciojn.

**Ch. Renouvier (1855)**

Malgraŭ ĉio, la estontaj vojoj de la evoluo de universala lingvo iom post iom pliklariĝis. Samtempe al la laboroj de la komitato de la Lingvista societo kaj eĉ antaŭ ĉi tiuj laboroj, donis sian opinion pri la problemo de universala lingvo konata franca filozofo Charles Renouvier[3].

Renouvier klare antaŭperceptis la vojojn de la plua krelaboro por universala lingvo: «la lingvo universala devas esti filozofia laŭ sia programo, empiria laŭ sia vortaro, t. e. ĝia vortaro devas esti prenita el la lingvoj vivantaj». Per tiuj kelkaj vortoj Charles Renouvier signalis la bazajn vojmarkojn por la pluaj esploroj kaj aspiroj pri la universala lingvo.

**G. Edmonds (1856)**

Post li George Edmonds en la jaro 1856 en Londono, eldonis sian skizon de universalaj alfabeto kaj gramatiko de lingvo, bazita sur klasifiko de ideoj[4].

---

[1] P. Stojan (40) registras jenan libron koncernantan internacian stenografion de tiu projektanto — C. Letellier, «Application de la théorie du langage que donne naissance la langue universelle...», Paris, 1855.

[2] Laŭ P. Stojan (40) aperis libro: — «P. Gagne, «Monopanglosse, langue univ.», Paris, 1858.

[3] Ch. Renouvier «La revue pbilosophique et religieuse», Paris, vol II p. 56-85 (avut, 1855).

[4] George Edmonds, «A universal alphabet, grammar and language, comprising a scientific classification of the radical elements of discourse», London—Glasgow, 1856.

**H. Parrat (1858)** Alia projekto de «simpligita lingvo» estis publikigita en la j. 1858 (34) de H. Parrat[1].

**F. Drojat (1857)** La sistemo de universala alfabeto de ideoj estis proponita de Drojat en la j. 1857 en libro sub titolo «Origina ideala alfabeto de ĉiuj lingvoj de la mondo [2].»

**De Rudelle (1859)** En la j. 1859 Lucien de Rudelle publikigas sian novan skizon de aposterioria lingvo «Pantos-Dimou-Glossa», konstruita sur la bazo de la lingvoj latina, romanaj kaj greka [3].

Simpla, racie kunmetita gramatiko estis sendube granda pluso de tiu ĉi lingvo. En multaj detaloj ĝiaj formoj estas similaj al la samaj gramatikaj formoj de la poste aperintaj aposterioriaj projektoj. Rilate la vortaron de tiu ĉi lingvo, estas rimarkinde, ke pro la alfabeto, malsimila al la normala latina alfabeto, la apartaj vortoj akiris kadukan kaj malfacile rekoneblan aspekton, ekz.: akvo (latine: aqua) — ako, kvalito (france: qualite) — kalitato. Pri la ekstera aspekto de la lingvo de de Rudelle oni povas juĝi laŭ la citita de la aŭtoro traduko de la unua frazo el «Telemako» (de Fenelon): «Potére ni konsolar dsam Kalipsoa dol eksito did Ylise.»

**Gablentz (1859—1860)** En la jaroj 1859—1860 aperis «Gavlensografio» de Gablenz, transformita de li je gavlensolalio, t. e. je lingvo parola[4]. Ĝia vortaro kaj ankaŭ la gramatikaj elementoj konsistas precipe el unusilabaj sonoj. Aparta alfabeto kaj ŝlosilo de la lingvo, kiu estis prilaborita por 33 lingvoj, devis servi por tradukoj en la lingvon de Gablentz kaj same por tradukoj el ĝi. La elpensaĵo de Gablentz montras certan komprenon pri la spirito de la lingvitstiko, ĝi estas profunde pripensita, sed malvera aprioria elirpunkto ne donis al la gavlensografio eblecon famigi kaj enhistoriigi per siaj sukcesoj la nomon de ĝia atŭoro.

**Mojsije Paic (1859)** En la j. 1859 M. Paic, el Zemun (Kroatio), eldonis sian ciferan pazigrafion kaj kune kun tio sistemon de sona lingvo[5].

La gramatika parto de la libro estis presita en lingvoj germana, franca, serba, greka, hungara.

En tiu ĉi sistemo estis uzitaj senescepte nombroj (16). La nombroj de 1 ĝis 999 signifis la gramatikajn formojn, kaj la numeroj pli grandaj ol 1000 — pazigrafiajn signojn por ideoj kaj konceptoj.

La kunigataj ideoj estis signitaj per la signoj de pluso aŭ minuso, ekz.: 3243 aĉeto-vendo, 3243+10—aĉetanto, 3243+101— aĉetantoj ktp. El sia pazigrafio M. Paic formis paroleblan lingvon tiamaniere, ke li anstataŭ la ciferoj metis literojn kaj anstataŭ la plus-minus-signoj— literojn m aŭ n, ekz.: 3243+10—aĉetanto — fegimanos, 3243+20—aĉetantino — fegimenos ktp. Estante facila laŭ la strukturo de sia gramatiko, tiu ĉi sistemo, simile al ĉiuj aliaj sistemoj de ciferaj pazigrafioj, posedis nekorekteblajn mankojn pro la unuformeco kaj malfacila memorebleco de siaj vortoj.

---

[1] H. J. F. Parrat, «Langue simplifiée», Porrentruy, 1858.

[2] François Drojat, «La maitresse clef de la tour de Babel. Alphabet primordial, phonétique, graphique ,idéal de toutes les langues du globe», 1857.

[3] Lucien de Rudelle, «Pantos dimou-glossa (ou Cosmoglossa), grammaire primitive d'une langue c mmune», Paris, 1858.

[4] H. von Gablens, «Sp acbwissenscbaftliche Fragmentez: 1 Deutscher Sc lüssdl zur Gavlensographie und Gavlensophonie oder Gavlensolalie», Leipzig, 1859—1860 (48).

Laŭ Stojan (40) en la j. 1865 en Dresden aperis nova eldono de la verko de Gablentz.

[5] Moses Paic, «Pasigraphie mittelst arabischer Zahlenzeichen», Semlin (Zemun 1859 (48). kaj liaj:

«System einer Universalsprache», Wien, 1864 (48).

«Pasilalion und Pasigraphion», Paris, 1864.

Al la sama tempo rilatas la pazigrafia sistemo de Sunderwall el Svedio, kiun citas Einstein (16). Pli guste la aperjaron de tiu ĉi sistemo montras Bollack (10), datumante ĝin per la j. 1862 kaj P. Stojan, datumante per la j. j. 1840 kaj 1872. Ĝiaj detaloj ĉe ni mankas. Sunderwall (1862)

Oni devas citi ankoraŭ projekton de cifera lingvo de D-ro Verdu[1], en kiu, simile al la sistemo de Paic, la respektivaj ciferesprimoj estis transponeblaj je lingvo sona. Verdu (1859)

P. Stojan (40) konsideras tiun aŭtoron identa kun A. de Vertus, vicprezidanto de la historia kaj arkeologia societo en Château-Thierry, kiu eldonis en la j. 1868, treege originalan projekton de «luna ideografio».

Ni konas nur la duan eldonon de tiu ĉi libro [5]. La unua luksa eldono, dediĉita al la klerigministro de Francio, ne cirkulis en la ĝenerala vendado. La aŭtoro celas pruvi, ke preskaŭ ĉiuj ideoj kaj konceptoj en ĉiuj ekzistantaj lingvoj originis el elementaj impresoj, ricevitaj de la luna disko, ĝia formo, aspekto, koloro ktp. Ĝenerale tio estas nur skizplano pri la kreo de lingvo, sed ne detale prilaborita projekto. La figuroj por la lunaj fazoj: ● (novluno), ☾ (la unua kvarono), ○ (plena luno), ☽ (la kvara kvarono), estas de li uzataj por transdono de apartaj ideoj kaj ankaŭ por la literoj kaj sonoj.

Okaza, tamen tre valora laŭ sia profunda pripensiteco estas la rilatanta al la sama tempo skizo de la programo por universala lingvo, farita de rusa diplomato kaj scienculo Aŭgusto Grimm.

La ideoj de Grimm estas al ni konataj ne laŭ liaj verkoj, sed laŭ unu lia letero el Konstantinoplo, datita la 10-an de januaro 1860 (8) (24). La valoro de tiuj ideoj, restintaj nekonataj al la plimulto de la samtempuloj kaj aspirantoj de l'universala lingvo, sin trovas en la escepta ekzakteco, montrita en la starigo de tiuj principoj, kiuj devus esti konsideraitaj ĉe la konstruo de artefarita universala lingvo. A. Grimm (1860)

Sed Grimm ne povis pensleviĝi ĝis la kompreno de la natura esenco de internacia aposterioria lingvo. Liaj ideoj estas ideoj por lingvo de miksita tipo, simila al la lingvoj naciaj, konstruita sur la bazo de latina lingvo, sed kun apriorie racionaligita vortaro kaj gramatiko.

En la sekvinta tempoperiodo laŭ tiuj ideoj estis konstruataj Volapük kaj aliaj al ĝi similaj lingvoj.

En la j. 1862 la artikoloj de S. P. Andrews kaj de E. B. Freeland, dediĉitaj al problemo de internacia lingvo estis publikigitaj en Ameriko, en novjorka ĵurnalo «Continental Monthly» [3]. Troviĝas informoj, laŭ kiuj S. Andrews eĉ prilaboris projekton de aparta lingvo «Alevato» [4]. S. P. Andrews (1862)

La fama itala matematikisto G. Bellaviti donis en la sama tempo traktaĵon pri la problemo de universala lingvo [5].

En la sama jaro 1862 publikigis de Lauture en Parizo hipotetikan (hipoteze bazitan) gramatikon de aprioria analitika lingvo [6]. De Lauture (1862)

---

[1] Dr. Verdu, «Essai sur une nouvelle numération parlée appliquée à un projet de langue universelle», Bordeaux, 1859.

[2] A. de Vertus, «La langue primitive sur l' idéographie lunaire. Principes des idioms anciens et modernes». Château-Thierry, 1868 (48).

[3] «Continental Monthly», New York, 1862, n-oj 5 kaj 6.

[4] «Rivista della Lingua Internazionale», 1909, n-oj 4 kaj 5.

[5] G. Bellaviti, «Pensieri sopra una lingua universale esu alcuni argumenti analoghi», en «Memoirie del instituto», Veneto, 1862.

[6] De Lauture, «Grammaire du télégraphe, hypothèse d' une langue analitique», Paris, 1862.

**Manuskriptaj projektoj (1850—1862)**

P. E. Stojan ([40]) citas ankoraŭ kelkajn aliajn, nepublikigitajn projektojn, kiuj restas al ni nekonataj kaj kiuj estis verŝajne ligitaj al la laboroj de la Lingvista societo, nome tiuj de: G a u t i e r — 1852, D e s c h a u x — 1858 kaj S i l b e r m a n n — 1858 el «Collège de France». La sama P. Stojan ([40]) citas ankaŭ nekonatan aŭtoron J. Gaugengil (1860 j.).

Necesas, ke ni notu ĉi-tie ankaŭ la manuskriptan projekton ([47]) de Karl R o s s l e r el Altenburg, kiu estis trovita inter la paperoj de la mortinta en la 1929 j. esperanto-pioniro en Odessa V. G e r n e t. Tiu ĉi manuskripto rilatas evidente al la j. 1862. La projekto prezentas rimarkindan aposteriorian escepton inter la aliaj tiutempaj projektoj. Ĝi prezentas modernigon de la latina lingvo. Ni citu ekzemplan tekston de tiu sistemo: «Mórta silénzium in imperial kastro. Caskúnum kovéncat assiàtos ut lor sóvia sét vicine. Grandim pàrte da civion ét soldatorum garda abàndonat orly matinon ses postam su bastiono» (Morta silento en imperiestra tendaro. Ĉio konvinkigas la sieĝatojn, ke ilia savo estas proksima. Granda parto de la civitanoj kaj de la soldata gardo lasas frumatene siajn postenojn sur la bastionoj).

Tiu sistemo estis ne pli malbona kaj rilate al kelkaj sistemoj eĉ pli bona, ol la modernaj sistemoj de la raciigita latina lingvo.

Apud la sistemoj filozofiaj — daŭris aperadi tuta vico da sistemoj de universala skribo-pazigrafio.

**S. de Mas (1863)**

S i n i b a l d o d e M a s, hispana scienculo kaj diplomato, publikigis en la j. 1863 sian sistemon de ideale harmonia pazigrafio el 2600 signoj, laŭ siaj formoj rememorigantaj la muziknotojn[1].

Krom la bazaj signoj, esprimantaj la ideojn, de M a s utiligis apartajn aldonajn signojn, kiuj estis skribataj sub la ĉefaj signoj kaj kiuj difinis la koncernajn gramatikajn formojn: genron, nombron, personon, tempon, modon ktp. La pozicio de la signoj sur tiu aŭ alia nivelo difinis la ideojn de: substantivo, adjektivo, verbo ktp. Entute, kiel diras Max Müller ([21]), de M a s faris pluan prilaboron de la ideoj de W i l k i n s, sed en sia laboro d e M a s firme kontraŭis la penson pri la kreo de universala parola lingvo. «Ideografio estas arto skribi per signoj, esprimantaj ideojn, sed ne sonojn de iu lingvo» — tiel li difinas la destinon de sia lingvo. La libro de d e M a s estis samtempe publikigita en Londono, Parizo kaj Leipzig. ([48])

Tamen P. S t o j a n ([40]) ne donas indikojn pri aliaj pablikigoj ekster la franca lingvo.

La tuta praktika apliko de la sistemo restis ĉe sola traduko de la unuaj 150 versoj de «Eneido», farita de la aŭtoro mem.

**Max Müller (1864)**

Juna, sed jam famiĝanta, angla scienculo kaj fiololgo M a x M ü l l e r en Oxford, en siaj «Novaj lecionoj de lingvistiko» ([21]) en la j. 1864 dediĉas al artefarita lingvo tre simpatiantajn kaj konvinkajn paĝojn. D-ro A l b e r t W i l d donas en la sama j. 1864, sur la paĝoj de unu ĵurnalo de München tre detalan historion de la pazigrafiaj sistemoj[2].

**J. Roux, J. Hunkele, A. Caumont (1865—1867)**

Poste, J. R o u x e n la j. 1865 publikigas sian sistemon de universalaj skribosignoj[3]. Similan projekton aperigas en la j. 1866 J. H u n k e l e e l Paderbom[4] ([10]), kaj A. C a u m o n t en la j. 1867 kun sia

---

[1] Sinibaldo de Mas, «L' idéographie». Mémoire sur la possibilité et la facilité de former une écriture générale etc., Paris, 1863 ([48]).

[2] A. Wild, «Ueber Geschichte der Pasigraphie» en «Chronik der Gegenwart», München, 1864.

[3] J. T. Roux, «Essai sur une langue universelle, un moyen proposé à tous les peuples de correspondre entre eux par des signes écrits», Sisteron (Basses-Alpes), 1865.

[4] Joseph Hunkele, «Scriptura universalis. Versuch einer kurzen Gemeinschrift für alle Völker», Paderbom, 1866.

projekto de cifera klasifiko de ideoj sin returnas al la analogiaj pensoj de L e i b n i t z[1].

En la listoj de P. S t o j a n (40) J. H u n k e l e ne estas registrita. C a u m o n t donas en sia libro 20 tabelojn en 8 lingvoj.

Pirro (1868)

Inter tiu nombro de apartaj aprioriaj kaj pazigrafiaj projektoj superiĝas la aposterioria projekto de P i r r o[2]. La ĉefaj tezoj, kiuj estas ligataj kun la bazo de la konstruataj aposterioriaj sistemoj, estis donitaj de la aŭtoro kun escepta klareco: «Ni akceptas neniun konatan lingvon, aŭ pli vere, ni akceptas ilin ĉiujn; ĉar ni elektas el ĉiu lingvo la vortojn plej konatajn kaj nepre tiujn kies elparolo postulas la plej malmultan penadon... lingvo latina donas la plejmulton da tiaj vortoj... la alfabeto estas farita el la sonoj komunaj al ĉiuj popoloj». Simplaj gramatiko kaj vortaro, kompletigita per la vortoj el lingvoj franca, itala, angla, germana kaj hispana, finformigas ĉi tiun, perfektan por sia tempo, sistemon. Kiel ĝia ilustra ekzemplo povas servi jena komenco de letero:

«Men senior. I sende evos un gramatik e un verb-bibel de un nuvo glot nomed universal-glot...»

La lernolibroj de la lingvo estis eldonitaj en germana, franca kaj angla lingvoj, sed ankoraŭ ne batis la horo por la triumfo de la ideoj de aposterioria lingvo.

Ree ni parolu pri pazigrafiistoj, sensukcese batalintaj por siaj ideoj.

A. Bachmaier (1852—1868)

Ellaborita jam en la j. 1852 projekto de pazigrafio de granda komercisto el München, A. B a c h m a i e r (en la germana enciklopedia vortaro de Brockhaus li estas erare nomita Bachmann) en tiu tempo akiras ioman sukceson (16). B a c h m a i e r utiligis por sia sistemo 10 cifersignojn, kiuj estas konataj al la tuta mondo, sed kiuj estas skribataj aŭ kiel en eŭropaj lingvoj — de maldekstre dekstren, aŭ kiel ĉe la araboj — de dekstre maldekstren, aŭ kiel ĉe la ĉinoj — de supre malsupren. Ili estas facile skribeblaj, telegrafeblaj kaj preseblaj. B a c h m a i e r esprimis ĉiun ideon per nombro. Difinitan artikolon li ne uzas. Por la nedifinita servas la cifero 1. La multenombron li montris per substreko de la nombro-ideo. La gradojn de l'komparo li signis per du punktoj metataj super la nombro-ideo, kaj la numeralojn vicajn — per la punktoj, metataj malsupre. La verbo estis uzata nur en infinitivo. La estonta tempo estis montrata per streko farita super la nombro, la pasinta — per trastreko de la nombro-ideo ktp. Por enkonduko de tiu ĉi tre facila pazigrafia sistemo en la vivon, formiĝis en München «Centra societo de pazigrafiistoj». Ĉin partoprenis tiaj unuaklasaj scienculoj, kiel posedanta 34 lingvojn profesoro R i c h t e r, fama egiptologo L a u t, D-ro A l b e r t W i l d kaj aliaj. G a b l e n t z, S i n i b a l d o d e M a s, M. P a i c estis honoraj anoj de la societo. Kelkaj registaroj ekinteresiĝis pri tiuj laboroj. La vortaroj de la nova pazigrafio estis preparataj por preso samtempe en 18 lingvoj, sed la monrimedoj ne montris sin sufiĉaj kaj la entrepreno de B a c h m a i e r fiaskis. La lernolibroj kaj vortaroj de la nova pazigrafio aperis nur en la j. 1868 kaj nur en la lingvoj franca, germana kaj angla[3].

A. Schmitt (1866)

A n t o n S c h m i t t jam en la j. 1835 komencis la prilaboron de projekto de «dinamika pazigrafio», celinta per la figurigo de karakte-

---

[1] Aldrick Caumont, «Langue universelle de l' humanité ou télégraphiee» alépr, Le Hâvre, 1867.

[2] Pirro, «Universal Sprache (Universalglot) mit Wörterbuch», Paris, 1868.

[3] Bachmaier, «Pasigraphisches Wörterbuch Deutsch—English—Französisch», Augsburg, 1868.

De la sama: «Pasigraphical Dictionary and grammar», Augsburg, 1870.

raj gestoj kaj movoj transdoni diversajn ideojn. Sed nur en la j. 1866 tiu ĉi libro de Schmitt estis publikigita[1]. Interalie en tiu ĉi libro ni trovas informojn pri tio, ke estis kunvokitaj du internaciaj kongresoj de pazigrafiistoj (vidu «Augsburger Allgemeine Zeitung», n-o 33 de 25. febr. 1854), kiujn partoprenis Max Müller, prof. Owen, Lepsius kaj aliaj, kaj kiuj kondukis inter si viglajn diskutojn pri la bazaj principoj de la konstruo de universala skriba lingvo.

**Pojattina (1870)**

Revuon de la ĝenerala evoluo de la pazigrafiaj ideoj ni trovas en raporto de Pojattina, eldonita en la j. 1870 en Wien[2].

Tiu raporto estas por ni speciale interesa, ĉar, verkita de la membro de Münchena Centra Pazigrafiista Asocio, ĝi rezumas gvidprincipojn de-la lastaj pazigrafiistoj:

1. La lingvo universala devas esti neŭtrala kaj tial ne iu nacia lingvo.
2. Krei lingvon artefaritan—facilan, esence interkonsentan kun la strukturo de la lingvoj naciaj, kun signoj nemikseblaj estas malfacile kaj eĉ entute neeble.
3. Tial-la lingvo universala devas esti prefere nur lingvo skriba— la pazigrafio.

Sed konsiderante la pazigrafion kiel bazon por la universala lingvo,— Pojattina tamen sugestas eblecon, ke ĝi fine transformiĝu en lingvon parolan. Pojattina promesis dediĉi al tiu problemo eĉ specialan duan raporton, pri kiu ni bedaŭrinde ne trovas iujn informojn[3].

La iluzio pri pazigrafio estis tiom forta, ke Pojattina asertis: «Antaŭ ol la pazigrafio ne sukcesos — ne povas ankaŭ la pazilalio esperi sian efektiviĝon».

Cetere — iagrada vero sendube troviĝis en tiuj asertoj. La pli postaj sukcesintaj mondlingvaj sistemoj: Volapük, Esperanto k. t. p. ankaŭ,porkomence estis uzataj nur por korespondaj rilatoj — do esence kiel pazigrafioj, kaj nur poste ili — ĉe plua kresko de sia adeptaro komencis esti uzataj ankaŭ buŝe, kiel pazilalioj. Sed Volapük kaj Esperanto ĉe sia apero mem jam estis tutprete uzeblaj ĉu skribe, ĉu parolforme. La pazigrafiistoj plej ofte ignoris neceson de tia paroleblo por siaj sistemoj, kaj zorgis preskaŭ ekskluzive pri la skriba sistemo.

**A. Boudevillain (1867)**

Estas menciinda ankoraŭ unu skiz-projekto de apriora «universala internacia lingvo» de A. Boudevillain, verkita ĉirkaŭ la j.1867[4]

La evoluinta bezono por faciligo de interkomunikado en kazoj specialaj kaŭzis, ke la pazigrafia ideo, vere ne por skribaj rilatoj, — estis akceptita kaj aplikita kelkfake.

**La internacia lumtura signalsistemo (1865)**

En la j. 1865 F. Julien en Parizo faris proponon pri unueca sistemo de universala lumsignalado por lumturoj[5]. Post kelka mallonga tempo, en iom ŝanĝita aspekto kaj mallongigita amplekso, lia propono fariĝas bazo de unu el la modernaj interkomunikiloj — pere de la internaciaj lumturaj signalsimboloj. Tio estis fakte starigo de universala neparola interkomunikila metodo. Analogiaj metodoj de signalado, kiel de la luma, tiel same de la sona, estis konataj eĉ al sovaĝuloj. Max Büchner en sia libro pri Kameruno rakontas, ekzemple,

---

[1] A. Schmitt, «Einfacher Plan zur Systematisierung verschiedener Spezial-Alphabete, eines Universal-Alphabets und einer Pasigraphie», Mainz, 1866 ([48]).

[2] Pojattina, «Eine Vorlesung über die Pasigraphie, ihre Berechtigung, ihr Werth und ihre Zukunft», Wien, 1870.

[3] Vidu L. Einstein, «Frühere Weltsprachenversuche» en «Rund um die Welt» (Zi vol lölik), Wien—Berlin 1888, № 7, p. 99—102 ([48]).

[4] A. Boudevillain, «Création d'une langue Int. Univ.», Gisors, 1867. Vidu: «Progreso», Paris, 1910, vol. III, pĝ. 637.

[5] Felix Julien, «Essai de langue universelle», Paris, 1865.

pri la ekzisto ĉe la negroj en Dualla de iu speciala «tambura» lingvo, per kiu en la virgaj arbaroj je distanco de multaj kilometroj oni interkomunikas diversajn informojn[1].

Ni citu ankoraŭ unu ekzemplon el la sama speco. En la j. 1871 en Francio estis presita, nun ĉie akceptita, la «Mara signala Kodo[2]», kiu entenis en siaj diverskoloraj signalaroj faktan kaj tute ĝustaloke akomoditan sistemon de pazigrafio (ne filozofian, sed empirian), se ni konsideros ĝin ne kiel parolan, sed perokulan interkomprenilon.

**La mara signala kodo (1871)**

La maraj signaloj havas por siaj ĉefaj elementoj: 1—larĝan rubandflagon, 5 rubandflagojn, 12 kvarangulajn flagojn kaj unu specialan flagon — simbolon de la kodo, per kiu oni informas pri la komenco de signalado. Ĉiu el tiuj 19 flagoj diferenciĝas de la aliaj kiel per sia koloro, tiel ankaŭ per sia desegnaĵo kaj signifas (krom la lasta, la 19-a) unu el la konsonantoj de la latina alfabeto. La kombinaĵoj el 2, 3, 4, flagoj (entute 78 642 kombinaĵoj) formas apartajn vortojn aŭ kompletajn frazojn. La signaloj el 2, 3, aŭ 4 flagoj en sinsekva ordo montras la direkton de la ŝipo, urĝajn kaj gravajn sciigojn, gradojn de la longitudo kaj latitudo, geografiajn nomojn, ĝeneralajn frazojn kaj nomojn de la ŝipoj (malsamaj por diversaj nacioj). En okazo de bezono la flagojn anstataŭas kombinaĵoj el senkoloraj signoj (rubandflago kaj kvarangula figuro) aŭ diversmaniere dismetitaj lumoj de diversaj koloroj. Similspecaj signalkodoj jam aperis pli frue en Britio (la unuaj en la j. j. 1818 kaj 1820) en Francio kaj Usono, sed nur la kodo de la j. 1871, unue akceptita de Britio kaj Francio, estis poste akceptita de ĉiuj aliaj regnoj, do fariĝis internacia.

Post la franca eldono de la kodo aperis ĝiaj eldonoj en aliaj lingvoj kaj baldaŭ sur ĉiu ŝipo troviĝis la vortaro de «universala mara lingvo».

Ni povus ĉi-tie ankoraŭ noti grandan nombron de aliaj simbol- kaj signal-sistemoj, uzeblaj ĉe diversaj okazoj kaj uzantaj por signalado plej diversajn objektojn. Tiamaniere povas esti kreata signallingvo de floroj, de muziknotoj, de sonorilsonoj, de poŝtmarkoj, de koloroj. Povas ekzisti speciala signalaro por fervojoj, por armeo, por skoltoj, por nokto (optiksignaloj), por telegrafado (kodoj).

P. S t o j a n (40) citas entute ĝis 90 verkojn, pritraktantajn diversajn simbol- kaj signal-sistemojn.

Tiuj sistemoj sendube troviĝas en intima parenceco kun la ideoj de universala lingvo kaj speciale kun la ideoj de pazigrafio, sed ĉiuj ili povas esti uzataj nur en specialaj kondiĉoj. Tiurilate ili ne kontentigas la postulon, kiun ni emas prezenti al la lingvo, servi por niaj bezonoj senpere per ordinara parolo aŭ skribado.

**A. Staffler (1869)**

En la j. 1869 en Innsbruck A. F. S t a f f l e r eldonas libron dediĉatan al problemo de la kreo de racia universala helpa lingvo[3]. La aŭtoro provizore donis kelkajn artikolojn, dediĉitajn al tiu ĉi projekto en diversaj periodaj publikigaĵoj. Kombinante 5 vokalojn kaj 20 konsonantojn, la aŭtoro ricevas 100 duliterajn silabojn por esprimo de ĉefid oj (la unua litero konsonanto, la dua—vokalo). Utiligante la matematikajn signojn: +, —, ×, :, la aŭtoro konstruas siajn vortaron kaj gramatikon. Kiel ekzemploj por tiu ĉi lingvo estas jenaj frazoj: «Sa om te Mandora?» (Ĉu vi komprenas la universalan lingvon?) kaj «Emi

[1] «Esperantisto», Nürnberg, 1892, n-o 8, pĝ. 118.

[2] «Code international des signaux à l' usage des bâtiments de toutes nations», Paris, 1871.

[3] Augustin Fr. Staffler, «Die Idee einer rationellen universal Dolmetscher-Sprache», Innsbruck, 1869 ([48]).

Nassa sehe oba bealla. Oizenda fazzo» — komenco de la preĝo «Patronia».

Holmar (1871—1874) En la j. 1871 franclingve en urbo Gratz estis publikigita projekto de tutmonda lingvo de iu Holmar[1]. En la j. 1874 verŝajne (34) la sama libro estis reeldonita anglolingve en Londono[2].

C. Stewart (1874) C. Stewart en la j. 1874 publikigas sian lernolibron de cifera lingvo[3]. Post 30 jaroj Stewart fariĝis sufiĉe distinga esperanta literaturisto kaj tradukisto de pluraj verkoj en Esperanton.

En la sama 1874 j. aperas tre serioza artikolo dediĉita al problemo de pazigrafio ,en la novjorka «Internacia Revuo[4]».

J. Dyer (1875—1906) Apud la projektoj pazigrafiaj daŭris aperi ankaŭ projektoj aprioriaj, parolaj. Unu el ili estis la «lingvo de lumo» de J. Dyer[5]. Tiu ĉi projekto, laŭ la ideo de sia aŭtoro, devis esti «per si mem instrua». Por tiu celo en la lingvo devis esti farita logika klasifiko de ĉio ekzistanta, de ĉiuj konceptoj kaj ideoj, kaj ankaŭ sistema klasifiko de ĉiuj sonoj, fareblaj el la vokaloj kaj konsonantoj. Klasifiko de ideoj proponita de Dyer, posedas certan kvanton da spriteco, sed samtempe ankaŭ da komplikeco. Laŭ la penso de Dyer, simila logika lingvo povas tute ne havi gramatikon. Ĉiuj necesaj variaĵoj de la ideoj povas esti formeblaj el la vortaraj elementoj.

En la j. 1889 Dyer en Londono reeldonis reverkita parton de sia laboro. Post la morto de Dyer, en la j. 1903 liaj amikoj A. Gottschling kaj H. P. Lakeman komencis publikigi la restintajn neeldonitajn verkojn de Dyer kaj eĉ formis societon por prilaboro kaj propagando de la lingvo de Dyer («Dyer-Lingua-Lucida Society») (8).

La sciigoj de Juŝmanov, ripetitaj de P. Stojan (40), ke en la j. 1903 estis prilaborita (aŭ publikigita) de Dyer aparta sistemo de nova lingvo «Lingva Lucida», estas verŝajne bazitaj per iu miskompreno.

Sertorio (1875) En la j. 1875 arkitekto G. Sertorio, celante unuecigon de la lingvoj, presis projekton de filozofia sistemo de universala gramatiko[6]. En la j. 1876 la sama aŭtoro en du broŝuroj, eldonitaj en Oneglia, disvolvis pli vaste siajn ideojn; kaj en la j. 1878 li eldonis en Porto Maurizio folieton, propagandantan la ideon de la Universala lingvo (40).

G. Ferrari (1877) Ferrari en la j. 1877 publikigas ampleksan kritikan analizon de diversaj sistemoj de la lingvoperfektigo, de filozofiaj projektoj, de universala alfabeto kaj stenografio (31).

Ni renkontas ĉe Ferrari citaĵojn ke jam en la j. 1871 en Modena li laboris pri ĝenerala problemo koncerne la starigon de universala lingvo.

La citata verko entenas samtempe skizon pri «Programma metodico di una lingua universale».

D-ro J. Damm (1876) En la j. 1876 D-ro Damm en Leipzig presis sian lernolibron de praktika pazigrafio[7]. Kun partopreno de Hogner post unu jaro tiu ĉi projekto estis reeldonita en Kopenhago danlingve. Tio estis la unua

---

[1] Holmar, «L' interprête universel ou langue pour toutes les nations de l' univers» Gratz, 1871.

[2] «New universal cipher language», London, 1874.

[3] C. Stewart, «International Correspondance by means of numbers etc.», London 1874.

[4] Artikolo de P. G. Hammerton «Pasigraphy» en «International Review», New York, 1874, vol. I, pĝ. 721.

[5] J. W. Dyer, «The Lingvalumina, or Language of Light», London, 1875.


[6] G. Sertorio, «Elementi di grammatica analitica universale», Porto-Maurizio 1875.


[7] D-ro J. Damm, «Praktische Pasigraphie oder die Kunst, mit allen Nationen korrespondieren zu können, ohne deren Sprache mächtig zu sein», Leipzig, 1876 (48).

okazo, kiam la ideoj pri universala lingvo estis publikigitaj en lingvo de malgranda nacio.

La sistemo de Damm (vidu ĝian skemon) posedas kompare tre malgrandan nombron da bazaj signoj, entute — 100. Sed ĉiu el 100 signoj de la unua vico, depende de la ĝin antaŭiranta cifero (de 1 ĝis 40) donas apartan diferencan ideon.

1-a vico de gramatikaj signoj (100):





2-a vico de gramatikaj signoj (7):



Tiamaniere, [1]akte sumiĝas nur 40×100=4000 bazaj ideografiaj signoj, konformaj al vortradikoj en niaj lingvoj.

En tiu rilato D a m m postsekvas al K i r c h e r, kiu similmaniere signis la vortojn kaj ideojn per kombinaĵoj el la romaj kaj arabaj ciferoj. Utiligmte la 7 signojn de la 2-a vico, oni povas fari el tiuj radikaj ideoj kaj konceptoj iliajn respektivajn logikajn kaj gramatikajn ŝanĝojn. Ĉiu el la signoj de la dua vico povas esti skribita super, sub, dekstre aŭ maldekstre de la ĉefa signo. Tiamaniere oni ricevas entute 4×7=28 ĉefajn gramatikajn formojn kaj variaĵojn.

Punkto, starigita maldekstre, supre, malsupre aŭ dekstre de la signo— signifas ŝanĝojn de la ĉefa ideo, kiuj estas konformaj al akuzativo, genitivo kaj ablativo. Horizontala streketo en la samaj lokoj signifas ŝanĝojn konformajn al: difinita artikolo, substantivo, adjektivo, adverbo ktp.

En tiu rilato ni ree trovas multon analogian kun kelkaj aliaj pli fruaj pazigrafiaj sistemoj, ekz. tiu de B a c h m a i e r.

En la enciklopedia vortaro de Larousse, el XIX jarcento [1], troviĝas **F. Reimann (1877)** informoj ke iu F. R e i m a n n estis elpensinto de internacia etimologia lingvo (langue internationale étymologique). Liaj respektivaj artikoloj: «Langue bréve, langue des nombres et la grammaire» estis presitaj en ĵurnalo «Courrier de l' Europe». La aŭtoro de la artikolo en la enciklopedia vortaro trovas sin devigita atentigi la publikon pri tiu ĉi «simpla, facila, mallonga kaj logika lingvo», sed vere nediskutebla el ĉiuj tiuj ecoj estas nur la mallongeco de tiu nova lingvo.

La alfabeto de tiu ĉi «simpla» lingvo konsistas el 42 literoj kaj 4 supersignoj. La gramatiko estas simpla kaj sen esceptoj, sed ne facile

---

[1] Larousse, «Grand Dictionnaire Universel», Paris, 1877, vol. XVI, pĝ. 1035

memorebla. Koncerne la sintakson la aŭtoro sin limigas per ĝeneralaj reguloj, ke «la frazojn ĉiu konstruu tiel, kiel en sia propra lingvo». Tiu ĝenerala regulo neeviteble kaŭzus multajn miskomprenojn en la okazo se oni serioze ekuzus ĉi tiun lingvon.

Aparte karaktera estas transskribo de la nombroj entute koincidanta kun la ideoj de L e i b n i t z. La ciferoj en sinsekva ordo de 1 ĝis 9 estas signataj per konsonantoj: d, v, l, m, n, ktp., la klasoj per vokaloj: 1 — i, 10 — e, 100 — a, 1000 — o, 10 000 — u. Tiamaniere oni ricevas: 333 — laleli, 450 010 — munode.

La plua prilaboro de tiu skizo, de tiu lingvoskemo ne estis farita. Nenie estis publikigita eĉ iu teksto en tiu ĉi lingvo.

**M. Glubokovskij (1880)**

Por fini la priskribon de la esplorata tempoperiodo, ni devas halti ĉe la unua presita projekto de rusa aŭtoro, kiu koncentrigis sian atenton por la problemo de universala lingvo. Tiu ĉi aŭtoro estis d-ro Matvej Nikanoroviĉ G l u b o k o v s k i j [1]. Kredeble li ne estis koninta la analogiajn fremdlingvajn verkojn kaj esplorojn. Almenaŭ en sia laboro li faras pri tio neniajn indikojn. La aŭtoro projektas la ideon de kombinitaj filozofia pazigrafio kun sona filozofia scienca lingvo. En tiu rilato tamen prezentas grandan intereson la treege ekzakta kaj klara, oni povus diri — «marksana», pensmaniero de la aŭtoro:

«La nunaj lingvoj esprimas la mondpercepton de niaj antaŭuloj kaj tial ili donas al ni ideojn malnoviĝintajn, malĝustajn kaj iafoje eĉ sensencajn. La lingvo, kiu estas produktaĵo de siaspeca 'mimetismo' — posedas eblecon akomodiĝi al diversaj cirkonstancoj kaj konservi en si la postsignojn de tiuj cirkonstancoj...»

M. N. G l u b o k o v s k i j ne opiniis sin kapabla memstare prilabori la tutan sistemon de la lingvo. Li skribas: «La vojo, kiun mi proponas por atingi ĉi tiun celon, estas kolektiva laboro de la pensuloj kaj scienculoj, unuvorte — de ĉiuj antaŭstarantaj homoj de nia tempo». Koncerne la konstruon de la lingvo mem, G l u b o k o v s k i j povis nur doni planan skemon por certaj principoj de la klasifiko kaj ilustracele prezentis en neplena prilaboro la klasifikojn por zoologio kaj botaniko.

Laŭ lia propono apartaj klasoj kaj specoj de la animala mondo povas esti figureblaj laŭ jena skemo: A — vertebrohavaj animaloj, B — senvertebraj, A [1] — klaso de la mamnutrantoj, A [2] — klaso de birdoj, A [3] — amfibioj, A [21] — flugantaj birdoj, — A [22] — piedirantaj birdoj, A[23] — naĝantaj birdoj, ktp.

Li skizas ankaŭ skemon por la derivo de la verbdevenaj substantivoj. Ekzemple, se cifero unu (1) antaŭ la litero signifas movon kaj cifero du (2) — sonadon, tiam 1 A [2] signifos — flugadon, 2 A[21]2/0 — grakadon (de: A [21]2 0—korniko).

Tiaspeca filozofia pazigrafio devus doni eblecon (en respektiva ŝanĝo de la pazigrafia signado per sona elparolo) formi paroleblan lingvon, ekz.: A=a (vertebrohava animalo), A [2]= a m (birdo), A [4] — a n (fiŝo), A [4] 2/2=a r j a m j a l (la unua variaĵo de orfiŝo) ktp.

Pluan prilaboron la projekto ne havis.

**Ceteraj pazigrafiistoj kaŭtoroj de sistemoj de universala lingvo en XIX. jarcento**

Krom la supre de ni cititaj projeketoj, sendube aperis multaj aliaj, ne ĉiam fariĝintaj konataj post la limoj de sia lando kaj nin ne atingintaj. Tiel ekz.: H. M o s e r ([24]) citas la laborojn de B a u m g a r t e n, J u h l e, H a s e m a n (citita sub la jaro 1880) kaj de v o n K a r l, kaj rilate la lastan diras ke lia projekto estas simila al pli

[1] «Vsemirno naučnyj jazyk, vozmojnostj i metod jego sozdanija». Izsledovanije M. N. Glubokovskago, Moskva, 1880 ([45]).

malfrua, publikigita en la j. 1884, projekto de filozofia pazigrafio, proponita de S. Baranovski. En la VIII. volumo de germana bibliografia vortaro (Allgemeines Bücher-Lexikon von W. Heinsius, VIII. Band, Leipzig, 1829, S. 408) ni trovis informojn ke iu A. O. Karl prilaboris vortaron de «prusa farmakopeo» kaj ankaŭ de historiaj, medicinaj kaj kemiaj esprimoj [1], sed pli detalajn informojn pri tiu ĉi verko ni ne sukcesis ricevi.

P. Stojan informas [2] ke en la broŝuro de Giuseppe Castelli «Il Pregindizio di una lingua universale» (1905, Roma, paĝo 19) estas dirite, ke la fama hungara geometro J. Bolyai, unu el la triopo. Lobaĉevskij — Bolyai — Riemann — fondintoj de la neeŭklida sistemo de geometrio, provis krei mondlingvon sur la bazo de sia gepatra lingvo hungara. Li eĉ preparis vortaron de tiu nova lingvo. La unua sciigo pri Bolyai, kiel mondlingvisto, venis verŝajne de germana matematikisto Stäckel profesoro de Universitato de Kiel, aŭtoro de studoj pri neeŭklida geometrio, kiu, esplorinte la manuskriptojn de Bolyai, trovis inter ili la projekton de mondlingvo.

Ni povas nomi ankaŭ aliajn konatajn projektojn de hungaraj pazigrafiistoj. Tiel István Kovàcshàzi en 1877 verkis pazigrafian sistemon «Pantographia» ([40]). Móz Jokai en 1872 en sia «Romano de proksima jarcento» esprimis ideon pri empiria pazigrafio. En la romano mem li citas 200 signojn jam nun internaciajn.

N. Juŝmanov [3] citas ankaŭ pazigrafiiston J. Bobula, sed sen iuj detaloj.

Aliparte P. Stojan ([40]) citas F. Besnard (Asay sur Cher, 1880), kiu kreis nepublikigitan apriorian lingvon.

Ni restas neinformitaj pri multaj aŭtoroj, cititaj de G. Ferrari ([31]) kaj laborintaj parte en la XVIII, parte en la XIX jarcentoj. Ĉi tiujn aŭtorojn ni eĉ ne citos, ĉar: 1. eĉ ne unu el ili eniris la zorge kunmetitajn en la j. 1889 listojn de prof. Kerckhoffs ([34]), kaj 2. Ferrari aldonis al la nomoj de la serĉantoj de universala lingvo stenografiistojn, gramatikistojn, teoriulojn de filozofia gramatiko ktp.

Krom la elpensintoj kaj aŭtoroj de la sistemoj de artefarita lingvo, multaj personoj, ofte gravaj sciencfakuloj, publike diris sian opinion dum la XIX jarcento, precipe dum ties dua duono, subtenante la ideon de universala lingvo. Fr. Nietzsche, en sia verko, rilatanta al la j. 1876-77, parolante pri la malfacileco de la lernado de multaj lingvoj, diris, ke «la homaro trovos la savon: estontece aperos nova lingvo, unue kiel speco de lingvo komerca, kaj poste kiel ĝenerala lingvo por kulturaj rilatoj... Por kio la scienco dum jarcentoj studis la leĝojn de la lingvo, se ne por utiligi ĉion necesan kaj valoran el ĉiu aparta lingvo [4]».

Aparte lakone kaj ekzakte formulas la ĉiam firmiĝantan konscion pri la neceso kaj neevitebleco de la alveno de universala lingvo, la franca ĵurnalisto E. de Girardin (1806—1881): «La universala lingvo komencos per tio, ke ĝi estos lingvo helpa kaj finos per tio, ke ĝi estos lingvo lasta kaj sola» ([10]).

---

[1] Karl A. O., «Wörterbuch zu Preuss. Pharmakopöe, in welchem alle Wörter der Pharmakopöe, sowohl d. eigenthüml. Bedeutungen in Wissenschaftl. Kunstsprache aufgeführt sind etc, Berlin, 1828.

[2] «Heroldo de Esperanto», Köln, n-o 50 (494), 14. 12. 1928, pĝ. 10 ([47]).

[3] «Mondo», Stockholm, 1926, n-o 2, pĝ. 49 ([47]).

[4] Fr. Nietzsche, «Menschliches-Allzumenschliches», Leipzig, 1903, I, pĝ. 250 [45]).

Estas ankoraŭ notinde, ke tiutempe jam komencis kreski la kompreno, ke la problemo pri universala lingvo ne estos solvata de iuj «supersociaj» aŭtoritatoj, ke tiun problemon ne iniciatos kaj ne solvos la registaroj. Similan iluzion povis havi L e i b n i t z kaj dum 200 jaroj liaj posteuloj. Sed jam en la j. 1870 la citita de ni N. P o j a t t i n a skribis: «Nuntempe oni ne atendu ke la registaroj faru iujn proponojn pri tiu temo, sed ni tamen atendu, ke ili esploru la provojn faratajn kaj subtenu la provon sukcesontan».

**La utopiistoj, Karl Marx kaj la II Kongreso de la I Internacio**

Proksimiĝis la momento, kiam, trapasinte la diversajn etapojn de sia evoluo, la ideo de artefarita universala lingvo el la regiono de retorta eksperimentado devis esti elportota al la vasta areno de porsocia apliko. Kaj ne okaze ĉi tiu momento koincidiĝis kun la momento, kiam naskiĝis la amasa internacia movado, kiam naskiĝis kaj estis kreita la laborista Internacio.

La unuaj pioniroj de la utopia socialismo, certe pensis pri internacia lingvo, sed ili havis nek tempon, nek neceson profunde esplori la problemon. Kaj tamen la universala lingvo, kiel ilo por tutmonda interkomunikiĝo de laboruloj, ŝajnis al ili senduba bono, al kiu oni devis celi.

Jam en multe pli frua epoko ĝeneralajn ideojn pri la problemo de racia lingvo diris T h o m a s M o r e en sia «Utopio» (1516) kaj la utopia socialisto D e n i s V a i r r a s s e d'A l l a i s en la utopia «Historio de Severamboj» (1677).

P. S t o j a n (40) erare nomas tiun lastan aŭtoron — D o n i V e r r a s.

A. S w i e n t o c h o w s k i [1] eĉ atentigas, ke la gramatiko kaj vortaro de la lingvo de severamboj, donataj de la aŭtoro, memorigas laŭ siaj sonoj esperanton. Same C h. F o u r i e r [2] kredis je la triumfo de la ideo de universala lingvo, kaj E. C a b e t en sia «Voyage en Icarie» (1842), donis gramatikon kaj vortaron de «ikaria lingvo», rimarkinda laŭ sia simpleco kaj logikeco.

Ankaŭ aliaj fantaziuloj-utopiistoj donis tiujn aŭ aliajn supozojn pri la demando de estonta racia lingvo. P. M a n t e g a z z a en sia romano «La 3000-a jaro», R o b i d a en la romano «Le Vingtiéme Siecle» (Paris, 1884) (47) montras la bazojn por la lingvo de la estonteco.

R o b i d a nomas tiun lingvon iom frivole «lingvosalato» kaj donas ĝian ekzemplon:

«La grammar e l'arte of sprichablar y scribir correctement».

La sama temo pli aŭ malpli arbitre estas tuŝita de H. W e l l s kaj de aliaj aŭtoroj de la modernaj utopioj.

La fantaziuloj kaj revuloj povis eĉ provi solvi la problemon kaj solvi ĝin per unu hako. Sendube tute alia, pli serioza estis la rilato al tiu ĉi problemo de la gvidanto, teoriulo kaj praktikulo de la internacia laborista batalo, K a r l M a r x. Pri tiu punkto A. Tom [3] skribas:

«M a r x vivis en la epoko, kiam la monda ekonomio ne atingis ankoraŭ tiun evolugradon, por, kun evidenta neceso, elvoki la nepran bezonon de internacia lingvo. Tiam estis farataj nur multenombraj provoj (ĉiam sensukcesaj) krei iagrade artefaritan internacian lingvon. Tial ni neniel mirus pri la nea rilato de M a r x al tiu ĉi problemo. Tamen, evidentiĝas, ke tiel ne okazis, sed M a r x, laŭ la citaĵo el unu

---

[1] A. Swientochowski, «Historio de utopioj», Rusa traduko el la pola, Moskva, 1910, pĝ. 50, 101, 158, 198, 397—398.
[2] Ch. Fourier, «Théorie de l' unite Universelle», Paris, 1841—43.
[3] Gazeto «Internacia lingvo», Moskva-Kazanj, 1926, n-o 13, pĝ. 2.

el liaj leteroj, ne montrante sian rilaton al la problemo de internacia lingvo (en tiu tempo oni parolis pri lingvo tutmonda), postulis de persono, kiu volus ĝin solvi, almenaŭ seriozan sciencan antaŭpreparon».

Kaj efektive en la letero de K a r l  M a r x datita la 24-an de februaro 1865 al la redaktoro de «Socialdemokrato» presita en la n-oj 16, 17 kaj 18 de tiu gazeto[1], kaj direktita kontraŭ la doktrino de P r o u d h o n (1809—1865), ni trovas jenan frazon: «Mi ne memoras la unuajn literaturajn provojn de P r o u d h o n. Lia laboro de lernanto pri la tutmonda lingvo montras, kun kia senceremonieco li sin ĵetis al la problemoj, por kies solvo mankis al li la plej elementaj scioj».

Jam nun post sistemigo en Moskvo de la tuta postrestinta arkiva materialo de K. M a r x kaj F. Engels estis trovitaj, nenie antaŭe publikigitaj notoj «Pri la germana ideologio», kiuj klare kaj senrezerve formulas la ideon de M a r x, ke la homoj «siatempe kapablos plengrade kontroli la lingvon»—produktaĵon de la homspeco»[2].

La ideo do principe kaj plenrajte estis akceptata, sed restis nefiksita la demando pri la metodoj de ĝia praktika efektivigo. Ke oni tuŝis la problemon kun granda atento kaj kun plena konscio pri ĝia graveco por la laborista klaso, montras ankaŭ rezolucio de la II. kongreso de I. Internacio, kunveninta du jarojn post la citita letero de M a r x, de la 2-a ĝis 7-a de septembro 1867, en Lausanne:

§ 4-a de la rezolucio pri la 4-a punkto de la tagordo de tiu ĉi kongreso tekstas:

«La kongreso opinias ke universala lingvo kaj reformo de ortografio estus komuna bonfaro kaj treege akcelus la unuiĝon kaj fratecon de la popoloj[3].»

La kongreso devis pridiskuti raporton pri «fonografio» de G u i l l a u m e, kiu raportis pri la dezirindeco de tia skribsistemo, kiu estus facile akirebla kaj komprenebla por ĉiuj, ĉar la nunaj neracie konstruitaj lingvoj haltigas la kulturan evoluon de la laboristoj[4].

La kongreso principe aprobis la ideojn de G u i l l a u m e, sed laŭ la propono de A l f r e d  A. W a l t o n, kompletigis la proponitan rezolucion per vortoj: «universala lingvo», kiuj forestis en la unua projekto de la rezolucio.

Post tia principa kaj teoria akcepto de la ideo de universala lingvo, estis necese montri nur ĝian praktikan efektivigeblecon.

La aperinta en la j. 1880 projekto de la lingvo «Volapük» faris la lastan kaj mankantan breĉon en la muro de malkredo kaj ignoro, per kiu la lingvistoj rigidemuloj kaj konservativuloj sin baris kontraŭ la ideo de artefaritebleco de la universala lingvo.

---

[1] Karl Marx, «La malriĉeco de filozofio — respondo al Filozofio de malriĉeco de Proudhon», rusa traduko de V. Zasuliĉ, Peterburg, 1919, pĝ. XXVII.

[2] «Arĥiv K. Marksa i F. Engelsa», Instituto de Marx kaj Engels, IV vol., p. 290, Moskvo 1929.

[3] Oscar Testut, «L' Internationale», Paris, 1871, III éd., pĝ. 131—132 ([45]).

[4] James Guillaume, «L' Internationale», vol. I, Paris, 1905, pĝ. 36 ([45]).


## VII

## LA UNIVERSALA LINGVO VOLAPÜK

Menade bal — püki bal!
(Al unu homaro — unu lingvon!)
J. M. Schleyer.

**La naskiĝo de la ideo de Volapük (1878)**

Kvindekjara katolika prelato Johann Martin Schleyer, en malproksima de la centroj bavaria vilaĝo, ĉirkaŭ la okdeka jaro de la pasinta jarcento, aŭdis plendon de sia najbaro pri tio, ke la letero, adresita al lia filo, loĝanta en Ameriko, revenis pro la netroveblo de la adresito ([25]). La kaŭzo por tio estis mallerta transskribo de la angla adreso kiun faris la germana kamparano. Kaj jen al la prelato venas ideo krei universalan skriban lingvon. Estas karaktere, ke la unua naskiĝinta ideo en la cerbo de novulo en la fako pri artefarita lingvo, estis ĝuste la ideo pri pazigrafio. Unue Schleyer decidas kunmeti sian sistemon de skriba lingvo el la ĉefaj lingvoj eŭropaj: germana, angla, itala, hispana kaj rusa — do ĝuste el tiuj, kiuj poste fariĝis bazo por la pluaj eksperimentoj en la fako de internaciaj lingvoj.



Johann Martin Schleyer

Provizore, en komenco de la j. 1878, li kreas «universalan alfabeton», taŭgan por transskribo de ĉiuj sonoj en ĉiuj lingvoj. Farante tion, li havas kiel tezon, ke «por la kristana Eŭropo unu alfabeto estas same bezona, kiel unu religio».

Estas dubinde pensi, ke Schleyer konis la antaŭekzistintajn penadojn por la kreo de universala alfabeto, kiuj estis farataj jam antaŭ du jarcentoj. Kaj liaj biografiistoj persiste asertas, ke ankaŭ la antaŭaj penadoj por la kreo de universala artefarita lingvo ne estis al li konitaj.

**La kreo de Volapük**

La universala alfabeto, prilaborita de Schleyer, estis ĉiel renkontita kun sufiĉa atento kaj ĉe la ekzaltita pastro naskiĝis penso: ĉu ne li estas vokita kaj destinita por starigo en la mondo de nova universala lingvo?

Dum iu sendorma printempa nokto «revelacio venis al li». Li eksentis sin destinita solvi la tuthomaran problemon. Tuj estis farita provizora

skizo de la gramatiko. La sekvintan matenon la laboro daŭris kaj la 31-an de marto de la jaro 1879 oni devas nomi naskiĝtago de Volapük. La pastro forgesis sian antaŭan ideon pri la kreo de universala lingvo sur la bazo de la lingvoj modernaj. La vortaro estas akomodata laŭ sia strukturo al la rapide-prilaborita, arta kaj peza gramatiko.

Por kontraŭi la mankojn kaj malfacilaĵojn de la lingvoj naciaj, Schleyer volis konstrui lingvon kun gramatiko absolute regula kaj raciigita.

Por pli bone kompreni la postsekvintan sukcesan ekfloron de Volapük, ni notu, ke en tiu lingvo-sistemo, same kiel en la aliaj postsekvintaj kaj kiel ankaŭ en Esperanto, — kvazaŭ koncentriĝis ĉiuj faroj, provoj kaj projektoj de la epokoj antaŭirintaj.

Volapük enhavis la karakterizilojn, kiuj povis doni al ĝi ecojn de sekreta lingvo, de kodo, de pazigrafio kaj eĉ de artefarita lingvo parola. Volapük donis samtempe ankaŭ internacian fonetikan alfabeton. Provoj solvi tiujn diversajn problemojn estis koncentritaj kaj unuecigitaj en la novaperinta lingvo-sistemo.

**La alfabeto kaj gramatiko de Volapük**

La alfabeto de Volapük konsistas el 28 literoj: 8 vokaloj — a, e, i, o, u, ä, ö, ü kaj 20 konsonantoj. Ĉiu litero estas ĉiam sammaniere prononcata, kaj estas legata tiel, kiel skribita. La akcento estas metata sur la lasta silabo de ĉiu vorto. La substantivoj deklinaciiĝas ĉiuj laŭ unu regulo.

| Ununombro: | Multenombro: |
|---|---|
| Nom. dom — de domo | Nom. doms — domoj, |
| Gen. doma— de domo, | Gen. domas— de domoj, |
| Dat. dome— al domo, | Dat. domes— al domoj, |
| Ak. domi— domon. | Ak. domis — domojn. |

La multenombro en ĉiuj kazoj estas formata per aldono de litero «s». La virina genro formiĝas per prefikso ji (ŝi)=ŝi: blod—frato, jiblod—fratino; gok — koko, jigok — kokino, aŭ per samsenca prefikso of.

La adjektivoj formiĝas per finiĝa afikso ik: gud — bono, gudik—bona; glet — grando, gletik — granda.

La komparativo ankaŭ formiĝas per specialaj sufiksoj. El la numeraloj kardinalaj (nombraj): bal — 1, tel — 2, kil — 3, fol — 4, ful—5 ktp. per specialaj afiksoj oni povas formi numeralojn vicajn, multoblajn, frakciajn, adverbajn ktp.

Same konstruiĝas ankaŭ ĉiuj derivaĵoj de la pronomoj: ob — mi, ol — ci, om — li, of — ŝi, kaj obs — ni, ols — vi, ktp.

Ĉiuj verboj konjugaciiĝas laŭ la sama regulo: la tempon montras prefiksoj, la personon — personaj pronomoj en la rolo de sufikso, ekz.:

Infinitivo: löfön=ami,
Nuntempo indikativa:
löfob — mi amas,
löfol — ci amas,
löfom — li amas,
löfof — ŝi amas,
löfobs — ni amas,
löfols — vi amas,
löfoms — ili amas,
löfofs — ili (virina genro) amas.

Aliaj tempoj formiĝas per prefiksoj aldonataj al la formoj de la nuntempo: ä — por la imperfekto, e — por la pasinto-perfekto, i — por

la pluskvamperfekto, o — por estonta tempo kaj u — por la estonta antaŭa tempo, ekz.:

älöfob — mi amis,
elöfob — mi estis amanta,
ilöfob — mi estis aminta,
olöfob — mi amos,
ulöfob — mi estos amonta.

Similmaniere formiĝas la subjunktivo kaj kondicionalo kaj pasiva formo.

El la same regulaj, sed abstraktaj kaj artefaritaj formoj konsistas la cetera parto de la gramatiko de Volapük.

**La vortaro**

Por la bazo de la vortara materialo de Volapük estis prenitaj la radikoj el la angla lingvo kaj ĝis ioma grado el la lingvoj latina, germana kaj franca. Tamen el la radikformoj, prenitaj el tiuj lingvoj restis tre malmulte da nekripligitaj kaj nekadukitaj . La vortoj ne finiĝas per la— siblantoj: s, ŝ, z, ĉ, por eviti la intermikson kun «s», montranta la multenombron. La radikoj ĉiuj laŭ ebleco estas unusilabaj kaj nepre komenciĝas kaj finiĝas per konsonanto. La litero «r» estas tute forĵetita «pro ĝia malfacila elparoleblo por ĉinoj, maljunuloj kaj infanoj».

Rezulte, estas preskaŭ neeble konstati, el kiaj lingvoj kaj vortoj estas prenitaj la vortoj de Volapük. Ekzemple:

El lingvo latina:
dol (dolor) — doloro,
nim (animal) — animalo;
el la germana:
vun (Wunde) —vundo,
bel (Berg) — monto;
el la angla:
nol (knowledge) — scio,
plim (compliment) — komplimento,
yel (year) — jaro ktp.

La ĉiuspecaj vortoj derivitaj formiĝas per afiksoj, aldonataj al la radikoj de la substantivoj.

Krom la difinitaj afiksoj, posedantaj difinitan sencon (kiel afiksoj por formigo de la virina genro aŭ de adjektivoj) ekzistas 17 afiksoj sen difinita signifo, ekzistantaj — tieldire — rezerve, por eventualaĵoj.

Jen estas, kiel ekzemplo, teksto el Volapük, kun traduko en Esperanton:

«Züpels mödik isibinoms in taladils valik lul. Alim, kele Volapük no binon pesevik okapälom püked at, if uksösekom timi stude püka at.» — Kalkuliĝis multaj adeptoj (de Volapük) en ĉiuj kvin partoj de la mondo. Ĉiu, kiu ne scias Volapükon, tamen komprenos ĉi tiun razon, se nur oferos tempon por lerno de tiu ĉi lingvo.

**La unuaj paŝoj de Volapük**

En gazeto, dediĉita al katolika poezio — «Ciona Harpo[1]», eldonata de S c h l e y e r, jam en la j. 1878 estis enpresataj notetoj pri tutmonda lingvo, kaj en majo de j. 1879 S c h l e y e r jam aperigas kiel apartan suplementon al «Ciona Harpo» sian skizon de gramatiko por tutmonda lingvo.

Pri la lingvo de S c h l e y e r aperis informoj en ĉiutaga gazetaro. La interesitoj esploras la projekton kaj trovas ĝin detale kaj ĉiuflanke prilaborita. Sian sperton de lingvisto (li konis preskaŭ 40 lingvojn)

---

[1] «Sionsharfe», Litzelstetten, 1879, März, n-o 33.

Schleyer utiligis, eble tute senkonscie, ĉe la prilaboro de sia lingvosistemo.

G. Banfi-Bauer el Kaposvar (Hungario), kiu verkis sian propran projekton de artefarita lingvo, trovis Volapükon ĉiurilate perfekta kaj adeptiĝis al ĝia movado. Post Banfi sekvis multaj aliaj personoj, vidintaj en la lingvo de Schleyer bonregulan, evolueblan sistemon. La amikoj de Volapük en la fino de la j. 1879 troviĝis, krom Germanio, ankaŭ en Aŭstro-Hungario, Usono ktp. En la j. 1880 aperis germanlingve apartalibre la unua lernolibro de la nova lingvo[1], havanta sur sia titolpaĝo jenan fierecan devizon: «Al unu homaro — unu lingvon».

Al tiu tempo la formoj de eventuale kreota artefarita universala lingvo jam tiom evidentiĝis, ke la pliparto de fakuloj, akceptante la eblecon de internacia helpa lingvo, komencis nei la alvenon de tiu lingvo sub la standardo de «unika, tutmonda».

Schleyer estis prozelito pri la universala. Li sciis nenion pri la antaŭa sperto tra jarcentoj. Kaj tial eĉ post 10 jaroj, kiam la plimulto de volapükistoj solene nomis sian lingvon—internacia lingvo de komerco kaj trafiko, Schleyer ĉiam subtenis la vidpunkton de sia komenca devizo: «Al unu homaro unu lingvo».

La konateco de Schleyer en la eklezia kaj literatur-gazeta mondoj donis al li grundon por sukcesa propagando de la nova tutmonda lingvo.

La nombro da lingvoamikoj konstante pligrandiĝis. «Ciona Harpo» jam ne povis priservi la interesojn de Volapük kaj komence de la jaro 1881 Schleyer entreprenis la eldonadon de «Volapüka folio[2]», kiu tuj trovis vastan abonantaron. Schleyer estis tipa sacerdoto de la katolika centralisma eklezio. La naskiĝintan movadon de Volapük li antaŭgarde enplektis per delikataj, sed kroĉaj retoj. Li estis ĝia «kreinto» kaj li lasis por si la kontroladon kaj ĉefgvidadon de la komune-tuthoma movado.

La 11-an de majo de la j. 1882, en vilaĝo Alberweiler, en Würtemberg fondiĝis la unua societo de volapükistoj. Samtempe Volapük penetris en Svedion kaj tie ankaŭ fondiĝis volapükista societo.

La nombro da volapükistoj kreskis kaj Schleyer fondis instituton de la de li komisiitaj gvidantoj de volapükismo en ĉiuj landoj kaj eĉ en apartaj provincoj kaj urboj. Kultura, tutmondsignifa entrepreno, dank' al malvasta spirito de Schleyer, en la XIX-a jarcento estis aranĝata kiel iu absurda kavalirordeno.

**La unua societo (1882)**

La 12-an de septembro de la j. 1882 en Würtemberg malfermiĝis la unua konferenco de adeptoj de la tutmonda lingvo, loĝintaj en najbaraj lokoj. Ĉirkaŭ 70 kunvenintoj solene aklamis la aperon de Schleyer.

Estis publikigataj ampleksaj vortaroj de Volapük. La movado venis sur grandan vojon. Kaj Schleyer pli kaj pli certiĝis pri dieca destino de sia laboro[3].

---

[1] J. M. Schleyer, «Volapük, die Weltsprache. Entwurf einer Universalsprache aller Gebildeten der ganzen Erde», Sigmaringen, 1880.

[2] «Volapükabled», Ueberlingen 1881—1908.

[3] Tre karakteriza estas jena epizodo. Iom malbonhumora Schleyer foje dum la vizito de fama volapükisto, «natur-kuracisto» R. Kniele ([25]) plendis al la lasta pri malbona traktado flanke de kelkaj personoj. Kniele rimarkis, ke interalie estas jam tempo enkonduki en Volapükon vorton «envio», kaj tiam Schleyer respondis: «Mi ne scias ĉu dio volus ke ni havu tiun vorton, mi ĝin ne kreis, faru ĝin vi mem». «Tiamaniere nokte la 24-an de februaro de la j. 1884 aperis la malserena vorto glöt» finas la rakonton pri la epizodo R. Kniele.

**La I-a Kongreso (1884)** La 26—27 de aŭgusto de la j. 1884 en Friedrichshafen estis kunvokita la unua universala kongreso de volapükistoj. La pliparto de la kongresanoj estis germanoj. La diskutoj kaj raportoj estis en lingvo germana. Dum tiu ĉi kongreso estis reprezentitaj ankaŭ lingvosistemoj, konkurantaj kun Volapük: pazilingua, per raporto de S. P i e r r e kaj projekto de «ideografio» per raporto de ties aŭtoro S. Baranovskij el urbo Ĥarkov. Por montri la malfacilaĵojn de la multlingveco, dum la kongreso estis aranĝita speciala vespero kun raportoj en 25 diversaj lingvoj.

S c h l e y e r entreprenis kelkajn vojaĝojn tra Germanio kun diverslokaj raportoj pri sia lingvo. Komencis aperi lernolibroj kaj ĵurnaloj, dediĉitaj al Volapük, en aliaj lingvoj. Speciale sukcesis Volapük en Nederlando.



August Kerckhoffs

En Francio, komence de la j. 1886, profesoro de Pariza supera komerclernejo A. K e r c k h o f f s tre ageme akcelis la sukceson de Volapük, fondis kursojn de Volapük en kelkaj superaj lernejoj de Parizo, eldonis ampleksan franc-volapükan gazeton[1] kaj fine organizis la francan societon por propagando de Volapük.

Al la fino de la j. 1886 la nombro de diplomitaj instruistoj de Volapük atingis ciferon 328. Al Volapüka movado aliĝis la scienculoj kun tiaj famaj nomoj kiel geografiisto kaj naturesploristo A l f r e d K i r c h h o f (25), memstare kunmetinta kaj eldoninta specialan lernolibron de Volapük. Ankaŭ Max M ü l l e r eldiris pri Volapük sian opinion, ke en la projekto de artefarita universala lingvo ekzistas nenio, kio kontraŭstarus la lingvosciencon. La franca ĵurnalo «Le Temps» en sia numero de la 16. januaro 1887 skribis: «Se iam universala lingvo estos akceptita de komercistaro — tiu lingvo estos sendube Volapük.» Dum sola jaro 1887 aperis 8 novaj volapükaj gazetoj. Fortega torento de la longe haltigata bezono de lingvo universala eliris sur la tersupraĵon — kaj la prelato S c h l e y e r arpenaŭ povis laŭ sia povo «reguligi» kaj «doni decan aspekton» al tiu de li kaŭzita movado.

**La II-a Kongreso (1887)** En la jaro 1887 de 6.—9. de aŭgusto en München estis kunvokita la II-a universala kongreso de volapükistoj. Ĝin partoprenis jam pli multaj kunvenintoj, kaj el multe pli granda nombro da landoj, ol ĉe la kongreso de la j. 1884. La malfacileco de la vortaro kaj elparolado kaŭzis tion, ke granda nombro da paroloj ree estis germanlingvaj.

La ĉefaj malperfektaĵoj de Volapük montriĝis pli kaj pli reliefe. La malfacileco de lernado, siaspecaj literoj kaj plena arbitreco en la kunmetado de la vortaro k. c. unuflanke kaj la despotismo kaj obstineco de S c h l e y e r aliflanke estis tiuj fenomenoj, kiuj minacis la aferon de Volapük.

[1] «Le Volapük», Paris, 1886—1889.

**Akademio de Volapük**

En la Kongreso de la jaro 1887 por direktado de la aferoj, rilatantaj la lingvokonstruon, estis elektita lingva akademio. Prezidanto de la akademio restis Schleyer, sed ĝia vera gvidanto estis ĝia direktoro, prof. Kerckhoffs. Dum tiu ĉi kongreso estis decidite konservi por Schleyer la rajton konfirmi la ordinare elektatajn gvidantojn de la volapükista movado.

**Skismo en la movado (1888)**

Sed tuj post tiu ĉi kongreso en la mondeto de volapükistoj komenciĝis internaj malkonsentoj kaj miskomprenoj[1]. En la jaro 1888 post la okazinta elekto de gvidanto por volapükista movado en Germanio, Schleyer malkonfirmis la elekton de eminenta volapükisto, prezidanto de Munĥena societo kaj organizinto de la II-a Kongreso, prof. Schnepper. Tion sekvis interbataloj, finiĝintaj per skismo en la Munĥena volapükista societo. Tra la tuta Germanio la volapükistoj, disorganizitaj per la agoj de Schleyer, dividiĝis je malsame pensantaj tendaroj.

Samtempe akriĝis la maturiĝanta konflikto inter Schleyer kaj la reformema akademio. Kerckhoffs rifuzis agnoski por Schleyer ties rajton de malakcepto por la akceptitaj de la akademio novaĵoj kaj reformoj en la lingvo. Multaj reformemaj volapükistoj forlasis la malvivan Volapükon kaj aliĝis al pli freŝaj kaj elastaj projektoj. En la j. 1888 volapükista societo de Nürnberg aliĝis al la internacia lingvo de D-ro Esperanto.

**La III-a Kongreso (1889)**

La akademio en la j. 1889 kunvokis la III-an volapükistan kongreson en Parizo. Schleyer rifuzis agnoski ĉi tiun kongreson. La kongreson tamen partoprenis ĉirkaŭ 200 plej bonaj reprezentantoj de volapükismo. Ĉiuj diskutoj kaj raportoj estis faritaj en Volapük. Tio estis kolosa eksperimento por tiu tempo. Sub la formo de Volapük sukcesis en la praktika ekzameno la principo de artefarebleco de internacia lingvo. Sed Volapük mem pluafoje akcentis siajn malperfektaĵon antaŭ tiu ĉi internacia, interesita pri ĝi kaj ĝin uzanta kunvenintaro.

Necesis reformoj. La kongreso sin montris unuanima kaj komisiis tiusence la volapükistan Akademion. Responde al tio Schleyer proklamis la parizan akademion eksigita kaj formis la novan. Li fondis novan tutmondan hierarkion de volapükistoj, kiun formis senatoroj kaj administrantoj por kontinentoj, apartaj landoj kaj urboj kaj fine por la plej etaj volapükistaj organizaĵoj.

En ĉiuj ĉi faroj ni povas observi striktan starigon de certa lingva feŭdismo — tute kontraŭa al la stariĝintaj en la tutmondo demokratiaj tendencoj.

Schleyer por sia laboro estis rekompencita de la papo per titolo de persona ĉambelano de lia sankteca papa moŝto.


La volapükista movado en tiu tempo atingis la plej supran gradon de sia progreso. En la jaro 1889 ekzistis 283 societoj kaj 25 volapükistaj gazetoj. Pli ol 1000 diplomitaj instruistoj estis dissemitaj tra la tuta mondo. La lernolibroj de Volapük ekzistis en 25 lingvoj. Antaŭ tiu ĉi jaro entute aperis en Volapük 384 libroj, broŝuroj kaj aliaj eldonaĵoj. Volapük estis instruata en kelkaj superaj lernejoj de Eŭropo (Paris, Wien, Bordeaux, Madrid, kelkaj en Italio), en Norda kaj Suda Amerikoj. Tre kompletan indekson de ĉiuj libroj kaj gazetoj pri la problemo de universala lingvo kaj ankaŭ eldonitaj en Volapük antaŭ la j. 1889, oni povas trovi en la «Jarlibro de diplomitaj volapükistoj» de Kerckhoffs (1889) ([34]).

---

[1] «Ein Wort zur Aufklärung. Den deutschen Volapükisten gewidmet vom Akademischen Weltsprachverein München», München, 1888 ([47]) — Rupert Kniele, «Ein offenes Wort zu den Münchener Vorgängen I, II, III», Ueberlingen ([47]).

**La socia konsisto de la volapüksta movado**

Grandan intereson prezentas la demando pri la sociaj konsistigaj elementoj de la volapükista movado. Kiuj estis la unuaj volapükistoj? Kiujn sociajn klasojn kaj rondojn ili reprezentis? Por tiuj demandoj ni havas klaran respondon. Volapük disvastiĝis, trovis realan subtenon kaj praktikan aplikadon ekskluzive en la rondoj de mezriĉa kaj eta burĝaro kaj inteligentularo. En la listo de la diplomitaj volapükistoj (1889) ni trovis eĉ ne unu laboriston. Pastroj, kuracistoj, instruistoj, komercistoj kaj inĝenieroj plenigas la tutan liston. Tia situacio estis tute natura. Sian unuan lernolibron kaj sian lingvon Schleyer antaŭdestinigis al «la klerularo de la tuta mondo». La alia gvidanto de la volapükista movado, prof. Kerckhoffs nomis Volapükon— internacia lingvo de komerco. Volapük arbitre kreita, sen sufiĉa atento de la reala vivo kaj de la ekzistantaj lingvotradicioj, posedanta, laŭ la fiera deklaro de la unua diplomita instruisto de volapük, Karl Lenze, 505.440 derivitajn formojn de unu verbo, dependanta ekskluzive de sia aŭtoro, — ne povis servi al la bezonoj kaj postuloj de laboristo, nesperta en la gramatikaj detalaĵoj, kaj bezonanta plian liberecon en la lingvo-uzado, ol tiu kiun prezentis Volapük.




Insigno de Volapük

La kreskanta laborista klaso bezonis por si interkomprenilon facilan, simplan, kun kutimaj formoj de konstruo. La simpatioj de la laboristoj devis esti por la ideo de universala lingvo. Tion atestas la rezolucio, akceptita dum la II-a Kongreso de I-a Internacio, sed tiuj simpatioj ne povis fariĝi io reala rilate la artefaritan, elpensitan, forŝiritan de la vivo Volapükon, des pli estratan laŭ absolutismaj metodoj de Schleyer.

Laboristaj kluboj kaj sindikatoj estus ĝojaj ekkoni Volapük kaj apliki ĝin, sed tute objektivaj kaŭzoj ne permesis al ili efektivigi siajn intencojn.

Certe ni rimarkas certajn signojn de interesiĝo pri la problemo de internacia lingvo ankaŭ en laborista gazetaro. En la j. 1884 en la socialisma verko de nekonata aŭtoro[1] estas atentata la granda signifo de la efektivigo de la universallingva ideo por la internacia movado de laborista klaso.

La 29-an de novembro de la j. 1884 R. Kniele, laŭ la invito de la sindikato de Heilbronn, tralegis en la loka domo de la sindikato raporton pri universala lingvo ([25]). La raporto estis tre varme akceptita, sed... post unu jaro, same kiel post 5 jaroj en la laborista centro de Heilbronn troviĝis inter la volapükistoj eĉ ne unu laboristo ([34]). Sed anstataŭ tio en la volapükista listo troviĝis la posedantoj kaj direktoroj de la Heilbronna fabrikejo de arĝentaĵoj, de la asekur-transporta oficejo k. c.

Oni povis nur esperi iujn ŝanĝojn en la tradicioj de la Volapük-organizo kaj evoluo. Kun kresko de la volapükistaro tiuj ŝanĝoj estus devintaj plidemokratigi la lingvon kaj ĝian organizon, estus devintaj plifaciligi ĝian ekuzon por la pli vastaj amasoj kaj ankaŭ por la laboristoj. Tamen tiuj ŝanĝoj neniam okazis.

---

[1] «Beiträge zur Lösung der sozialen Frage», Wien, 1884.

Ne estas malinteresaj ankaŭ la informoj pri porvolapüka movado en la absolutisma Rusio en la epoko de Aleksandro la III-a.

En tiu regno estis des malpli verŝajna kaj ebla iu utiligo de Volapük flanke de laboristoj, sed inter la rusa inteligentularo la nova movado tamen faris ioman progreson kaj al la momento, kiam en la jaro 1887 aperis Esperanto, la nombro de ruslandaj volapükistoj atingis kelkajn centojn.

Dum la unuaj jaroj de sia ekzistado Volapük disvastiĝis precipe inter la germane parolantoj. Ankaŭ en Rusion Volapük penetris pere de la ruslandaj germanoj. En la jaro 1882 en gazeto «Rigaer Tageblatt» de urbo Riga, aperis artikolo, rekomendanta Volapükon.

Schleyer indikis, ke en la jaroj 1884 kaj 1885 lernolibroj de lia lingvo disvastiĝis en Odessa, Riga kaj Tiflis. En la j. 1884 en Brno (tiama Aŭstrio) aperis la unua ruslingva broŝureto kun «mallonga gramatiko de universala lingvo» (47). Tiu ĉi kvarpaĝa broŝureto estis kunmetita de germanoj el la apudbaltaj provincoj, F. Waldmann kaj A. Slefocht. La 14-an de novembro de la j. 1885 en gazeto «Novoje Vremja» aperis propaganda artikolo de Ivan Ĥolin, kaj en la komenco de la j. 1886 pere de la eldonejo de A. S. Suvorin aperis la unua ruslingva lernolibro de la nova lingvo[1].



R. Kniele

En la j. 1886 kaj sekvintaj (ĝis la 1890) estis eldonitaj kelkaj lernolibroj en Moskva, Vjatka, Peterburg kaj Ĥarkov. Entute aperis en la rusa lingvo ĉirkaŭ 16 lernolibroj, vortaroj kaj libroj, dediĉitaj al la propagando de Volapük.

La 15-an de februaro de la j. 1886, en la instrua fako de la Moskva societo por akcelado de teknikaj sciencoj estis farita de Eŭg. Bik prelego pri Volapük. Tiun prelegon ĉeestis 600 aŭskultantoj. En Peterburgo energian propagandon faris inĝeniero V. K. Rosenberger. En la j. 1887 en Moskvo fondiĝis la unua kaj sola en Rusio societo volapükista (krom du societoj en Finnlando, en Raumo kaj Kuopio).

En la j. 1887 la ĝenerala nomaro de ruslandaj volapükistoj nombris 186 adresojn.

Kiom malfacila estis laboro de la rusaj pioniroj de volapüka movado, en la cirkonstancoj de absolutisma reĝimo, atestas tiaj citaĵoj el la libro de R. Kniele (25): «Tre granda alfluo el alilando de volapükaj libroj kaj lernolibroj interesigis la rusan policon kaj kaŭzis ĝiajn antaŭtimojn, ke tiu ĉi literaturo povus esti utiligota por propagando de revoluciigaj ideoj. Tio kreis pretekston por ke la polico metu diversajn barojn al disvastigo de Volapük.»

Por ricevi volapükajn ĵurnalojn el alilando, oni devis skribi specialajn petskribojn, impostatajn per taksmarkoj je 1 rublo 60 kopekoj, sed la nomaro da petantoj estis tiel granda, ke ŝajnis neeble doni al ĉiuj la permeson. La propono de inĝeniero Rosenberger referi pri la alilandaj eldonaĵoj en Volapük ne ricevis aprobon de la Ĉefa

[1] Volapük. Vsemirnij jazyk Ŝlejera. Izloĵenije voprosa. Grammatika s priloĵenijem slovarja, sostavil Iv. Ĥolin», S. Peterburg, 1886 (47).

cenzura komitato kaj la lasta komisiis al speciala cenzuristo Sankov ellerni la novan lingvon. Sed eĉ post tio multfoje la senditaj en Rusion volapükaj eldonaĵoj revenis al iliaj sendintoj en alilando kun noto «Refusé» (rifuzita).

**La malprogreso de Volapük**

Komence de la jaro 1889 la movado volapükista ekglitis malsupren kaj en baldaŭa tempo tute ĉesiĝis.



V. K. Ro.nberger

K e r c k h o f f s, obeante la proponojn de la Pariza kongreso, komencis prilaboron de reformoj. Li intencis simpligi la gramatikon, elĵetinte la superfluajn duoblajn afiksojn (ekzemple ji kaj of por formigo de viringenro), malgrandigi la kvanton da verbotempoj (6), ĉesigi la pluan kripligon de la vortoj, plisimpligi la vortfaradon.

La skismo inter la volapükistoj, manko de unu gvidanta centro, neebleco de laŭgrada plibonigo de la lingvo, sensenca lingva kaj organiza absolutismo de S c h l e y e r, kresko de diversopinieco—kondukis al detruo de la intencoj de K e r c k h o f f s. La societoj komencis likvidiĝi unu post alia. La gazetoj ĉesis sian ekzistadon, malaprobante la foreston de unuanima agado kaj la taktikon de S c h l e y e r.

**La laboro de la akademio**

Seniluziiĝinte pri la sukceso de la afero, K e r c k h o f f s en la jaro 1891 eksiĝis el la ofico de la direktoro de l'akademio. La lasta elektis kiel sian direktoron inĝenieron V. K. R o s e n b e r g e r el Peterburgo, kiu komencis gvidi ellaboron de tute nova sistemo de artefarita lingvo.

Multaj volapükistoj, malesperiĝinte pri Volapük, publikigis siajn proprajn projektojn de reformoj kaj de novaj lingvoj. Ĉiujn tiujn renegatojn S c h l e y e r eksigis el la listoj de volapükistoj. Post 10 jaroj, ĉirkaŭ la jaro 1900, de la brila volapükista movado restis, laŭ la sciigoj de volapükista adresaro, nur 159 personoj interkorespondantaj per Volapük.

**Volapük en la XX-a jarcento**

S c h l e y e r daŭre enkondukis en sian lingvon «plibonigojn» kaj «korektojn», farante ĝin pli kaj pli arbitra. Kelkaj adeptoj de Volapük, restintaj fidelaj, kiel pastro P i n t h el Luksemburgo, obeante la ordonojn de S c h l e y e r, daŭrigis publikigadon en la «plibonigita» Volapük, sed la legantoj de tiu materialo fariĝis ĉiam pli malmultenombraj.

En la j. 1904 stiria societo volapükista aperigis propagandan broŝuron por defendo de Volapük ([27]). En tiu ĉi broŝuro estas nomata tuta vico da avantaĝoj, kiujn havas Volapük kompare kun la aliaj sistemoj kaj Esperanto, kaj estas montrataj konsideroj, ke universalan lingvon ne estas eble konstrui sur la bazo de internacia vortmaterialo. Tio estis laŭ nia scio la lasta propaganda manifestacio de volapükistoj.

Cetere S t o j a n ([40]) citas ankoraŭ unu anoniman porvolapükan libreton[1], aperintan en la j. 1916 kaj speciale direktitan kontraŭ Esperanto.

Entute en Volapük aperis en diversaj jaroj, laŭ niaj ne tute kompletaj informiĝoj, 316 lernolibroj kaj propagandiloj en 28 lingvoj, 136 eldon-

[1] «Die Weltsprache—ein Ruf an die Gesamtmenschheit», Dresden—Leipzig, 1916.

aĵoj kun nura volapüka teksto, kaj dum la tuta tempo aperis 58 diversaj gazetoj.

P. Stojan ([40]) donas liston el 23 gazetoj kaj 93 lerniloj kaj libroj. En la j. 1908 formortis la lasta volapükista gazeto. Ĝis la j. 1912 ekzistis unu, tute seninflua volapükista societo. Ĝis sia morto mem, Schleyer restis malamika por ĉiuj aliaj projektoj de artefaritaj lingvoj. Li daŭrigis sian laboron pri la dika volumo de «korektita» Volapük kaj konsideris ĉiujn forlasintajn Volapükon siaj personaj ofendintoj.

**Kaŭzoj de ekfloro kaj de estingo de Volapük-movado**

Fininte mallongan trarigardon de la Volapüka historio, nepre necesas, ke ni provu iom analizi la kaŭzojn de ĝia rapida ekfloro kaj de ĝia same rapida estingo.

Kial inter la multnombro de antaŭirintaj Volapükon lingvoprojektoj neniu havis eĉ je unu procento da tia sukceso kaj da tia praktika apliko kiel Volapük? — Jena estas la unua demando.

La reformiĝinta, depost la mezepoko, socio de Eŭropo, kreskigante siajn internaciajn rilatojn, sentis bezonon de la internacia tutmonda ligilo. Plej avangardaj pensuloj de tiu socio meditis pri tiu problemo kaj faris koncernajn projektojn. La lingvo-scienco, plej malprogresa el ĉiuj sciencoj — ĝis nun pleje esploranta la estinton kaj tre malmulte atentanta la estonton, la lingvo-scienco, intime ligita kun la sociologio, kiu mem troviĝis en stato apenaŭ embria, — tiu lingvo-scienco ne povis doni iujn fiksajn leĝojn, kiuj difinus la faratan projektadon. Tial naskiĝis projektoj de pazigrafio kaj filozofaj aprioriaj lingvoj. Izoluloj — Leibnitz, Carpophorophilus, Schipfer, De Rudelle — provintaj krei lingvon sur bazo de la ekzistantaj naciaj lingvoj — nek povis argumenti sian pravecon, nek tiri al siaj ideoj la publikan opinion. Ili restis nur ignorataj profetantoj.

Rezulte la tuta mondlingva problemo estis eksperimente prilaborata de apartaj izoluloj, ne ligitaj per iuj komunaj principoj. Tial la tuta amaso da projektoj de la periodo antaŭvolapüka estas karakterizata per profunda individualismo-utopiismo de iliaj projektantoj. Kaj la individualismo estis unu el la kaŭzoj, kial neniu el tiuj projektoj povis sukcesi. Estis ankaŭ aliaj kaŭzoj: 2) malmultaj estis la projektoj detale ellaboritaj, posedantaj ĉiujn necesajn ecojn de la lingvo, posedantaj la necesan por praktika uzado esencan similecon al la naciaj naturaj lingvoj, kaj 3) neniu el la projektantoj, kreintaj «veran lingvon» — laŭkvante kaj laŭkvalite similan al la ekzistantaj naciaj lingvoj, montris sufiĉan persiston por daŭre propagandi sian projekton inter la vasta publiko. Sufiĉe vasta propaganda laboro farita de Maimieux, de Sudre kaj de Sotos Ochando ne povas esti konsiderata, ĉar temis pri projektoj de pazigrafio, de muziklingvo kaj de apriorie-filozofia sistemo, kiuj ĉiuj estis tro malsimilaj laŭkvalite al la lingvoj ekzistantaj.

Inter siaj antaŭuloj Schleyer estis ĉiurilate plej bonsukcesa:

1) Schleyer kreis detale ellaboritan lingvon, laŭesence similan al la naturaj lingvoj; laŭ sia strukturo Volapük estis perfekta, ĉar ĝi enhavis senrezerve aglutinan karakteron — pleje facilan kaj pleje akcepteblan ĉe vasta studado de fremda lingvo.

2) Schleyer bonsukcese povis aranĝi certan grundon por diskonigado de sia verko; lia gazeto «Sionsharfe» jam unu jaron antaŭ publikigo de la lingvo komencis ĝin propagandi. Tiu gazeto estis organo populara kaj ĝis tiu tempo al ĉiuj lingvo-projektistoj mankis ĝuste iu rimedo ligiĝi kun la vasta publiko kaj ne nur kun la interesiĝantaj pri la problemo fakuloj.

Volapük fariĝis populara. Certe en la jaro 1880 la bezono mem de internaciaj rilatoj — ĉe rapida kresko de ĉiaspeca trafiko — estis multe pli akre sentata ol en XVII., XVIII. kaj eĉ en la mezo de la XIX. jarcento.

Jenaj estis la kaŭzoj, kial Volapük ricevis subtenon kaj ekfloris. Ĝi estis subtenata de la burĝaj intelektulaj tavoloj. La laborista klaso, simpatianta al la lingvo, ankoraŭ ne venis al ĝi; sed se la Volapük-movado estus pluen vastiĝinta kaj kreskinta, se Volapük — ĉe daŭra internacia uzado—estus ricevinta pli taŭgajn ecojn, — sendube ankaŭ la laboristoj ne mankus inter la volapükistaro.

Kiaj do estis kaŭzoj de la malprogreso, de estingo de la Volapük-movado? Jena estas la dua demando.

La efektiviĝinta dum unu dekjaro praktikado kaj aplikado de Volapük elmontris ĝiajn esence lingvajn malperfektaĵojn.

Ĝia gramatiko estis tro ŝarĝita per superfluaj formoj, malfaciligantaj la lernon de la lingvo. Ĝia kompleta artefariteco rilate la elekton de gramatikaj formoj pligrandigis ĉi tiun malfacilecon. La kripligitaj vortoj de la eŭropaj lingvoj ankaŭ estis tre malfacilaj por lernado. Certe tiu kripligo atingis altan gradon, se eĉ la vorto propra «Portugalio» estis volapükigita kiel «Bodugän».

Tamen estus erare aserti, ke nur la esence lingvaj mankoj estis kaŭzo por estingo de Volapük-movado. Ŝajnas al ni, ke plej trafe la verajn kaŭzojn de tiu estingo malkovris Z a m e n h o f — aŭtoro de Esperanto, la lingvo sukcesinta post Volapük. Li diris dum sia parolado antaŭ la VII Universala Kongreso de Esperanto en Antwerpen, 21—VIII—1911: «Volapük pereis ĉefe pro unu grava eraro, kiun ĝi bedaŭrinde enhavis: absoluta manko de natura evoluipovo; kun ĉiu nova vorto aŭ formo la lingvo devis konstante dependi de la decidoj de unu persono aŭ de facile inter si malpaconta personaro. Kiel sur bastono, plantita en teron, novaj branĉoj kaj folioj ne povis nature kreski sur ĝi, sed devis esti konstante skulptataj kaj algluataj. Se ne ekzistus tiu eraro, kiun korekti oni bedaŭrinde ne povis, Volapük neniam pereus, kaj ni ĉiuj nun verŝajne parolus valapüke[1].»

Volapük estis projekto individueca. Sed tiu individueca projekto jam estis ekuzita de miloj da homoj. Tiu kolektiva uzado devis logike kaj neeviteble transformigi «individue kreitan» lingvon en lingvon kolektive uzatan kaj kolektive evoluigatan. Tamen Volapük neniam fariĝis lingvo kolektive evoluigata. Tion kontraŭstaris ne nur la principoj arbitraj de ĝia konstruo, tion kontraŭstaris la aŭtoro de la lingvo mem. Tial la lingvo, ekuzita de certaj progresemaj rondoj de la socio, suferis grandan streĉon inter la tendencoj de natura lingvoevoluo kaj la tendencoj de ĝia ĉef-organizanto S c h l e y e r. Al la burĝe-demokrata socio, bezonanta same demokratie evoluantan lingvon, estis prezentita lingvo laŭstrukture kaj laŭorganize reprezentanta malnovajn ĝenajn tradiciojn de la feŭda epoko. Jen kial pereis Volapük. Estis demando ne nur lingva. Estis demando ankaŭ sociologia.

**La morto de Schleyer (1912)**

En la jaro 1912 la 80-jara S c h l e y e r mortis, testamentinte la gvidadon inter la restintaj grandaĝaj ŝafoj de sia ŝafaro, al pastro S l e y m e r. Tiu ĉi lasta malfermis en Konstanz monumenton — marmoran tabulon kun reliefo kaj subskriboj en la volapüka kaj germana lingvoj — sur la domo, en kiu vivis, laboris kaj mortis J. M. S c h l e y e r.

---

[1] Esperantista dokumentaro. XVIII kajero. Sepa Universala Kongreso de Esperanto», Paris, 1912, p. 85 ([47]).

La entreprenita de Schleyer eldono de lia nova vortaro restis ne plenumita.

Sleymer eldonis broŝuron «pri la fama katolika inventinto[1]», pere de kiu la katolika eklezio volis utiligi por siaj celoj tiun famecon, kiun tiel aŭ alimaniere posedis Schleyer. La dissendita de Sleymer cirkulero, redaktita en Volapük: «Volapükanes valik», datita per majo de la j. 1913 kaj sin turnanta al la restintaj volapükistoj, estis la lasta eldonaĵo en Volapük. Kaj laŭ ĉio juĝante — ĝi restis sen respondo[2].

Jam kiel eldonoj por amatoroj devas esti taksataj la Volapüka gramatiko kaj vortaro (germanlingva), eldonitaj en la 1931 de D-ro Arie de Jong en Leiden (Holando). Naive sonas la parolojde por—volapüka propaganda folio klariganta pereon de Volapük per misteraj kaŭzoj; ĝi estas eldonita en la j. 1931. de iu tunisa arabo Salah Eddine Kemal, loĝanta en Horboden (Svisio).

En la fiasko de Volapük la afero de internacia lingvo ricevis ŝajne nekorekteblan baton. Sed la afero de lingvo internacia ne mortis. Ĝi reviviĝis — post du jardekoj de apenaŭa vegetado, ĝi en la formo de Esperanto atingis sukcesojn, multoble pli grandajn ol la iamaj sukcesoj de Volapük.

---

[1] Sleymer, «Ein berühmter katholischer Erfinder», en n-o 180 Collection «Volksaufklärung», Klagenfurt, 1913.

[2] «Discoussiones de Academia pro interlingua», 1913, t. IV, n-o 3, pĝ. 59 ([47]).

VIII

## ARBITRAJ PROJEKTOJ DE ARTEFARITA LINGVO POST VOLAPÜK (1880—1930)

Lingvo estas neniel organismo — ĝi estas difinita funkcio. Lingvoj artefaritaj estas ĉiuj pli malpli naturaj, la naturaj — pli malpli artefaritaj.
Ĉefa afero estas: akceli la evoluon de artefarita lingvo, eĉ se ĝi ne estus la plej perfekta.
Prof. Schuchardt (Graz).

Esploristoj-fantaziuloj, glorĉasantoj, enviintoj de Schleyer, seniluziiĝintaj volapükistoj, ĉiuj intermiksite daŭrigis publikigi ĉiam pli novajn kaj novajn projektojn de artefaritaj lingvoj de ĉiuj specoj kaj sistemoj.

La kreskanta nombro de tiuj projektoj instigas nin en estontaj ĉapitroj de tiu verko doni jam ne laŭtempan kronikon de la evoluo de la ideo de universala lingvo, sed dediĉi ĉiun apartan ĉapitron al apartaj specoj de la artefarita lingvo dum certa periodo. En tiu do ĉapitro ni pritraktos tiujn arbitrajn, profunde individuistajn-utopiistajn projektojn, kiuj aperis inter la jaroj 1880—1930; kaj inter tiuj arbitraj sistemoj ni traesploros unuavice la sistemojn de pazigrafio.

### PAZIGRAFIOJ

**S. Baranovskij (1884)** Stepan Ivanoviĉ Baranovskij, verkisto kaj inventisto, eksprofesoro de la rusa lingvo en la universitato de Helsingfors (1842—1863), fondinto de abstinenca movado en Finnlando, jam en la jaro 1853, en sveda gazeto «Finlands allmänna Tidning», publikigis siajn vidpunktojn pri la problemo de sistemo de universala skriba lingvo. En la jaro 1884 la sesdekokjara aŭtoro publikigis siajn ideojn per apartaj broŝuroj, aperintaj samtempe rouslingve[1] kaj franclingve. Per aperigo de tiuj broŝuroj la aŭtoro faris provon «inviti ĉiujn bonvole partoprenontojn al la laboro, necesa por la bono de la tuta homaro». Por la sama celo en aŭgusto de la j. 1884 Baranovskij partoprenis eĉ la kongreson de volapükistoj en Friedrichshafen.

La projekto de Baranovskij havis jenajn ĉefajn trajtojn: 40 bazaj signoj, figurataj per du linioj de diversa dislokigo kaj stridikeco, kombinataj en la plej multfazaj kombinaĵoj po ses signoj — povis esprimi entute ĝis $40^6$=4 096 000 000 da bazaj ideoj. La samaj signoj, metataj post la ses komencaj signoj (en ĉiama nombro el tri signoj) devis esprimi la gramatikajn finiĝojn kaj variaĵojn.

[1] Ideografija. Obŝĉij jazyk dlja vseĥ narodov, predlagajet Stepan Baranovskij, Ĥarjkov, 1884 (47).

Fakuloj de ĉiuj faksciencoj devus fari sciencan klasifikon, sin akomodante al la akceptitaj sesciferaj signokombinoj. La aliaj scienculoj fakuloj devus prilabori ideografiajn esprimojn por ideoj gramatikaj (por la finiĝaj kombinoj el 3 signoj). Per la anstataŭo de la ideografiaj signoj per kombinaĵoj el literoj, oni povus transponi la ideografiajn esprimojn je parolebla lingvo.

Kiel ilustraĵoj por tiuj teoriaj proponoj estis aldonitaj la ideografiaj signoj en ilia skriba kaj parola esprimado por apartaj cifernombroj, ekz. por la nombro 196 000 000 000 — la sona elparolo estus «muzuvu», kaj por 2 030 505 800 — «nurili-belebedalala».

En la j. 1886 en Parizo aperis kiel eldonaĵo de Laurousse traktaĵo de Agnus pri la problemo de universala, por ĉiuj unuavide komprenebla pazigrafio[1]. Agnus (1886)

P. Stojan (40) notas kun demandosigno, ke estis pli fruaj eldonaĵoj de la sama aŭtoro, rilatantaj al la jaroj 1870, 1874[2], tamen ili restas al ni nekonataj.

Rosental en la jaro 1886 eldonis projekton de «Rosentalografio[3]». Post Gablentz li estis la dua aŭtoro, aperiginta sian sistemon sub sia familia nomo. Rosental (1886)

En la jaroj 1887 kaj 1888 F. Friedrich publikigis[4] sistemon de universala ideografia skribo «Kokografio». Estis preparataj vortaroj de la sistemo (34), sed presitaj ili ne estis. F. Friedrich (1887)

Rusa literaturisto kaj tradukisto, Vsevolod Ĉeŝiĥin publikigis proponon de ideografio en iom alia speco — de ideografio cifera[5]. Ĉeŝiĥin skribas: «Se la ĉina skribo estus lernita en Eŭropo kaj fariĝus internacia skriblingvo de la tuta tradukita literaturo, tiam la problemo de tutmonda skriblingvo estus solvita por ĉies feliĉo.» V. Ĉeŝiĥin (1902)

Sed ĉar la eŭropanoj ne montras ian emon lerni la ĉinajn hieroglifojn, tial Ĉeŝiĥin proponis sufiĉe komplikan, ne prilaboritan ĝis fino sistemon de cifera pazigrafio, bazita sur: 1. principoj de cifera gramatika klasifiko, proponita de Philipp Reiff (1792—1872) laŭ kiu: substantivoj — 1, adjektivoj, — 2, pronomoj — 3, verboj — 4, adverboj — 5 ktp; 2. principoj de klasifiko de sciencoj, proponita de Aug. Comte.

Rezulte oni havus la esprimojn de jena formo: abato — IV6; abata rango — IV61; abatejo — IV62; abateto (karese-diminutiva nomo) — IV63; abatino — 2 I IV63 ktp.

En la jaro 1913 (Guérard(1) erare indikas la j. 1910) Ĉeŝiĥin publikigas sistemon «Nepo [6]», en kiu, aplikante komplete la gramatikon de Esperanto, li prenas ĉiujn vortojn en ties natura transskribo el la vortaro de ajna nacia lingvo. Ĉeŝiĥin do kreas tiamaniere en unu

---

[1] Agnus, «Langue Universelle sans étude pour communiquer immédiatement avec les étrangers», Paris, 1886.

[2] Agnus, «Clef des langues, dite langue universelle par l'ecriture». Paris, Larousse (?).

[3] Rosental, «Rosentalographia», Roma, 1886.

[4] F. Friedrich, «Begriffszeichen als Schrift für alle», Prag, 1887, kaj de la sama aŭtoro: «Kokographie im XIX. Jahrhundert», Zürich, 1888.

[5] Vidu artikolon de V. Ĉeŝiĥin, «Opyt vsemirnago pisjmennago jazyka ili cifrovaja ideografija», en la gazeto «Naŭĉnoje obozrenije»,Peterburg, 1902, n-o 10 (oktobro), pĝ. 147—166 (45).

[6] Vsevolod Ĉeŝiĥin, «Novyje varianty Esperanto. Nepo meĵdunarodnoje (Nepo international'a) i Nepo nacionalnoje (Nepo national'a)», 2-e izdanije, ispravlennoje i dopolnennoje. Petrograd 1919, kaj la sama eldono de la sama jaro en franca lingvo (47).

fojo tiom da novaj sistemoj Nepo, kiom da naciaj lingvoj ekzistas, ĉar la gramatikaj reguloj kaj elementoj de Esperanto estas egalmezure oportune akomodeblaj al ĉiuj tiuj lingvoj.

Tiel ekzemple, la frazo «venu, mi atendas», estas skribebla laŭ la sistemo Nepo en ĉiu el la 4 lingvoj: rusa, franca, germana kaj angla jene:

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| priĥoditj<br>venir<br>kommen<br>to come | u, | mi | ĵdatj<br>attendre<br>warten<br>to wait | as |

Sed Ĉ e ŝ i ĥ i n iras pli malproksimen kaj proponas krei «Nepon internacian», elektinte la vortojn el kvar ĉefaj lingvoj: franca, germana, angla kaj latina.

La malnatura kombino de la elementoj, prenitaj el diversaj lingvoj, faras ĉi tiun sistemon ankoraŭ pli malakceptinda.

Krome, Ĉ e ŝ i ĥ i n lasas tute netuŝita la problemon, kiamaniere la koncerna lingvoformo, prenita el tiu aŭ alia lingvo, estos prononcata. Ja, la reguloj de la prononcado en diversaj lingvoj tre distingeble diferenciĝas.

Eĉ se simila sistemo povus esti praktike uzata, ĝia uzo estus nur tiu de pazigrafio — por skribaj rilatoj.

En la franclingva eldono de sia lernolibro-ŝlosilo (1919) Ĉ e ŝ i ĥ i n donas ankaŭ sistemon de «Nepo ideografia» (Nepo Ideographie-a), en kiu la samaj finaĵoj kaj partetoj de la Esperanta gramatiko estas aldonataj al la bazaj ideografiaj hieroglifoj de la ĉina skribo.

**Aliaj pazigrafiistoj de a periodo 1901—1904**

Analogiajn ideojn pri la apliko de la ĉinaj hieroglifoj por universala skribo esprimis pli malfrue F. G i l b e r t[1]. Tamen ankaŭ lia propono altiris al si nenies gravan atenton.

Projekton de skriba lingvo konstruita sur logika bazo, publikigis C. H a a g en la j. 1902[2].

Ni donu kelkajn ekzemplojn el la signaro, proponita de C. H a a g: .I antaŭ; I. malantaŭ; ∸ super; ⊤ sub; I.I en, .I. fermita; ..I malfermita; 0 ne; × nedifinita; S difinita; k. t. p.

W. R i e g e r[3] en Graz en la j. 1902 per sia sistemo de ciferaj gramatikaj signoj returnigas nin al la projektoj de ciferaj gramatikaj formoj laŭ la tipo de H o u r w i t z aŭ M a t r a y a. R i e g e r esprimis per ciferoj nur gramatikajn formojn (8). La vortoj estis radikaj, prenitaj el la vortoj de iu difinita lingvo.

Do tiu sistemo povus esti adoptita ankaŭ al la lingvo Esperanto. La frazo «La lingvoj, kiel ĉiuj homaj kreaĵoj, restas absolute ne samformaj» estus tiaokaze transkribata tiel — «Lingvo 10, 8 ĉiu 10 kreo 10 homa 10, 77770030 resti samforma 10».

Kiel lastajn aŭtorojn de la pazigrafiaj projektoj de tiu periodo P. E. S t o j a n (40) nomas C. W a r n e r y[4] kaj Hugo d' A l e s i[5].

Per hektografo estis presita en la j. 1902, verko pri sistemo de internacia skribo «miografio», de iu argentinano A. C a s a r i c o[6].

---

[1] Friedrich Robert Gilbert, «Die Bilderschrift von China und Japan als internationale Weltschrift», Berlin-Leipzig-New York, 1924.

[2] Carl Haag, «Versuch einer graphischen Sprache auf logischer Grundlage», Stuttgart, 1902.

[3] W. Rieger, «Zifferngrammatik, welche mit Hilfe der Wörterbücher ein mechanisches Uebersetzen aus einer Sprache in alle anderen ermöglicht», Graz, 1902.

[4] C. G. Warnery, «Correspondance écrite universelle», Paris, 1904.

[5] Hugo d'Alesi, «Methode de Correspondance Int., la langue numerique», Paris, 1901

[6] «La Miografia — Sistema di Ecritura internazionale, A. Casarico», Cordoba, Rep. Argentina, 1902 (48).

Unu ekzemplero estis donacita de la aŭtoro al la germana ministerio por alilandaj aferoj. La sistemo de Casarico ankaŭ rememorigas la sistemon de Matraya kaj similas la sistemon de Ĉeŝiĥin, ekz. la vorto abatino estus=16²8.

Per tio ni elĉerpas la liston de pazigrafiaj projektoj, publikigitaj dum tiu tempo, se ni ne konsideros ankoraŭ unu sistemon, kiu atingis, —en tre malvastaj limoj, tre vastan aplikadon.

**La klasifika sistemo de Internacia Bibliografia Instituto**

Sub la nomo de tiu ĉi praktike utiligata pazigrafia sistemo ni konsideras la «bibliografian decimalan klasifikon de l'ideoj» — verkon, kiu estis finlaborita kaj publikigita de la Centra Oficejo de Bibliografio en Bruselo, Belgio, en la j. 1897[1].

La fundamentinto de tiu ĉi sistemo, usonano Melvil-Dewey havis kiel celon eltrovi la simpligitan sistematigon de la bibliotekoj sur la bazo de difinitaj ciferaj klasifikaj formuloj. Melvil donis por ĉiu ĉefa ideo difinitan ciferon; por ĉiuj proksimaj aŭ parencaj ideoj li donis kiel eble plej proksime starantajn ciferojn kaj samtempe al tio per aparta cifera sistemo esprimis la eldonjaron, kvanton da eldonitaj ekzempleroj, landon, urbon, aŭtoron, lingvon de la eldonaĵo ktp.

La tuta komplekso de homaj scioj estis de li dividita je dek grandaj klasoj, signitaj per 10 ciferoj de 0 ĝis 9. Ĉiu el tiuj klasoj, siavice, entenas en si 10 rubrikojn, signatajn ankaŭ per iu el ciferoj, de 0 ĝis 9 dekstre, post la cifero de la klaso. En ĉiu rubriko estas 10 sekcioj ktp. Kiel rezulton de tia klasifika sistemo ni ricevas ekzemple jenan ascendantan nomaron:

| | |
|---|---|
| 6 | — aplikataj sciencoj, |
| 61 | — medicino, |
| 612 | — fiziologio, |
| 612.3 | — digestado, |
| 612.31 | — buŝo, |
| 612.313 | — ŝalivaj glandoj, |
| 612.313.6 | — patologio de salivo, |
| 612.313.63 | — mikroboj de salivo. |

Tiametode oni povas klasifiki ĉiujn ideojn kaj konceptojn.

En grandaj bibliotekoj tiu ĉi sistemo tre faciligas la trovadon de serĉataj materialoj kaj per tio altigas la praktikan valoron de libraro. La sistemo de I. B. I. estas akceptita kaj konkeris por si decan pozicion en multaj eŭropaj grandaj bibliotekoj[2].

Provoj apliki iun klasifikan sistemon por la bibliotekoj estis faritaj eĉ pli frue. N. N. Ablov en sia tre interesa libro[3] indikas ĉirkaŭ 50 similajn klasifikajn sistemojn kaj en tiu nombro 15 sistemojn pure filozofiajn (de Platon, Aristoteles, Fr. Bacon, D'Alamber, Ampère, Aug. Comte ktp.).

Sed nur la sistemo de I. B. I. estis ĝisfine prilaborita[4] kaj trovis en certa grado ĝeneralan kaj internacian aplikadon.

---

[1] «Classification bibliographique decimal. Tables générales abregées». Office Central de Bibliographie», Bruxelles, 1897.

[2] La sistemon de klasifiko de I. B. I. estas proponite enkonduki en ĉiujn bibliotekojn de la Sovet-Unio.

[3] N. N. Ablov, «Klasifiko de libroj, ĝia historio kaj metodoj rilate al la klasifiko de sciencoj ĝenerale», Ivanovo-Voznesensk, 1921. (ruslingva).

[4] Plena listo de formuloj-indeksoj de I. B. I. entenas pli ol 2000 da dense presitaj paĝoj.

**J. Orsat 1910**

En la j. 1910 la tradukisto ĉe Pariza apelacia kortumo Joseph O r s a t publikigis sian proponon pri starigo de la ĉifro-sistemo[1]. Fakte la ideo de J. O r s a t estis la sama kiel tiu de R i e n z i (1840 j.). Ankaŭ li proponis prepari por ĉiu lingvo du vortarojn — en la unua ĉiuj vortoj (en alfabeta ordo) kun iliaj gramatikaj variaĵoj estus interpretataj per certaj nombroj; en la dua — ĉiuj nombroj laŭ ilia ordo — estus interpretataj per koncernaj vortoj en konforma gramatika formo.

Rezulte la franco kaj italo povus interpreti, ke «ni havas» estas esprimata per nombro 19; «vi havas» per nombro 20 k.t.p.

Do tiu propono ne enhavis ion orginalan aŭ ion seriozan. P. S t o j a n (40) komunikas, ke manuskripto de pli vasta vortaro post morto de la aŭtoro nun trovigas en la biblioteko de UEA.

**Aliaj antaŭ-militaj projektoj**

En hungara gazeto «La Verda Standardo»[2] ni trovas citojn de pazigrafiaj sistemoj: de G o t t w a l d kaj de P a z a r, kiuj rilatas al la j. j. 1907 kaj 1908.

S t o j a n notas el tiuj du aŭtoroj en sia verko (40) nur la lastan.

En la gazeteto de la sistemo «Ro»[3] ni trovas informon pri la projekto de ciferlingvo de E c k e l el Wien, kiu rilatas la jaron 1913. Komuniko pri tiu ĉi projekto estis presita en «Jena Volksblatt», sed aliajn informojn pri ĝi ni ne sukcesis ricevi. Povus esti ke la tuta ĉi tiu informo estas bazita sur miskompreno. En la j. 1913 prof. K. v o n P i r q u e t fakte eldonis en Wien broŝuron dediĉitan al la problemo de internacia cifera transskribo[4], sed la aŭtoro donis en ĝi nur ĝeneralajn tezojn pri la temo.

La ĉefa ideo de tiu verko estis starigo de certa internacia sistemo de silab-kombinaĵoj, kiuj servus al esprimo de diversaj nombroj.

Siavice tiuj nombroj — konforme al speciala kodo povus esprimi certajn — ofte komplikajn frazojn kaj ideojn. Rezulte: e-bi-sum-mia-lu — 305.684.638; blaomi — je la dekdua kaj 45 minutoj ktp. Resume — simila propono eĉ ne povas esti nomata ciferlingvo.

**J. Linzbach (1916—1930)**

En la j. 1916 en Petrogrado J a c o b L i n z b a c h publikigis tre seriozan verkon, dediĉitan al la ĝenerala klarigo kaj bazigo de la «principoj de filozofia lingvo»[5]. Krom la sistemoj de cifera klasifiko, de sonaj, lumaj kaj aliaj diversaj manieroj por transdono de la penso, en tiu ĉi libro estas pritraktataj ankaŭ kinematografiaj manieroj, per kiuj oni figuras sur la papero pensojn, figurojn, agojn k. c. La libro de L i n z b a c h, prituŝante plej diversflanke ĉiujn eblojn de la filozofia lingvo, samtempe montras la nekoincidiĝon inter niaj pensaj kapabloj kaj la teknikaj eblecoj por tiom granda superhoma entrepreno, kiu devus esti efektiva filozofia lingvo — la abocodo de la homa penso.

Kvin jarojn poste, en la j. 1921, en Reval, la sama aŭtoro provis ellabori pli komplete sistemon de filozofia «matematika ideografio». Kaj — kia stranga sorto trafis la projekton de «universala filozofia lingvo»! — la sola lernolibro de tiu ĉi sistemo estis eldonita en la aposterioria lingvo «Occidental» — internacie komprenebla en nekompareble plia grado ol la matematikaj formuloj de L i n z b a c h[6].

---

[1] J. Orsat, «Dictionnaire gramatical de la correspondance universelle chiffrée», Paris 1910. Vidu «Le Monde Espérantiste», Paris, 1911, № 3, p. 40; 1912 j. № 18, p. 93.

[2] Vidu: «La Verda Standardo», Budapest, 1909, pĝ. 82 (47).

[3] «World speech», Marietta, Ohio, USA, Sept. 1913, n-o 11 (47)

[4] Pr f. Klemens vcn Pirquet, «Telekaba», Wien, 1913. Vidu «La Verda Standard », Eger 1913, № 10 p. 155.

[5] J. Linzbach, «Principy filosofskago jazyka. Opyt toĉnago jazykoznanija». Petrograd, 1916 (47).

[6] Jacob Linzbach, «Transedent Algebra. Ideographic matematical. Experiment de un lingue filosofic». Reval, 1921 (47).

En la j. 1922 L i n z b a c h eldonis germanlingve du numerojn de speciala gazeto, dediĉita al la problemoj de la plua prilaboro de tiu ĉi sistemo[1].

La sistemo de L i n z b a c h ne estas parollingvo, sed pazigrafio. Kiel ekzemploj de ĝia signado povas servi: i — homo, $i_1$ — mi, $i_2$ — ci, $i_3$ — li; i —iu; (>i)—homego, (<i) — hometo, +i — mi, kun mi, —i — ne mi, sen mi, $i_1=i_2+x$ — mi estas maldekstre de vi, $i_0$ — embrio ktp.

Krom pure matematikaj esprimoj, L i n z b a c h estis devigita uzi tamen signojn de bild-klariga karaktero: martelo, amboso, kruĉo ktp.

En la j. 1930 J. L i n z b a c h e n Paris komencis per neperiodaj poligrafiitaj folioj publikigi sian pliampleksan franclingvan verkon «Ideographie Mathematique»(47).

La tuta verko, celanta esprimi esencon de la filozofia skriba lingvo, laŭ L i n z b a c h devos havi ĝis 1500 paĝoj presitaj. Neniel oni povas konsideri tiun ampleksan laboraĵon, kiel jam finpreta.

Kukel-Krajevskij (1921)

Ni parolu iom pri la projekto de simbola pazigrafio kaj lingvo, farita de petrogradano inĝeniero S. A. K u k e l-K r a j e v s k i j — «QJ» (ku-ĝi) (47).

Komencante sian laboron, K u k e l tute ne konis la rezultojn, atingitajn antaŭ li en la fako de la konstruo de internacia lingvo. Des pli nterese estas por ni priesplori la konsekvencajn etapojn en la evoluo de lia ideo.

Laŭ sia komenca ideo K u k e l volis ellabori ion similan al kon vencia proksimume-logika klasifikaĵo: 1. de terminoj de diversaj sciencoj kaj 2. de ĉiuj ideoj el la homa vivo ĝenerale.

K u k e l pensis, ke la plua evoluo de la skriblegscio iros la vojon «id ografian», kiam la figuritaj ideoj estos sendependaj de ilia sona transdono. Kiel bazon por sia intern cia simbola skribo li uzis 52 literojn de la latina alfabeto (26 minusklojn kaj 26 majusklojn) kaj 10 ciferajn signojn. Al ĉiu el la literoj konformiĝas difinita senca signifo: A — amo, B — posedaĵo, C — komenco, D — direkto, E — tero... a — mi (pronomo), b — ci, c — li... i —tie ĉi, j — jes (signo de jeso, aserto)... v — varmo, w — en, interne... z — prezo. Al tiuj alfabetaj signoj estis aldonataj 9 pluaj signoj por figuri la adjektivojn, verbojn en la pasinta, estanta kaj estonta tempoj, imperativo ktp.

La gramatikaj reguloj estas primitivaj: ekz., la pluralo estas figurata per aldona signo s: as — ni, bs — vi, cs — ili... la adjektivoj ne deklinacias.

Sed pli komplika estas la derivado de la ideoj, faritaj el la ideoj primitivaj (unuliteraj).

K u k e l intencis, same kiel N i c o l a s (vidu p. 121), el la kombinaĵoj de literoj, posedantaj difinitan simbolan sencon, formi vortojn, kies senco povus esti perceptebla laŭ la kunkonsekvenco (sed ne laŭ la logika kunkonformiĝo) de la ideoj.

Sed jam la vorto QJ mem, en kiu Q signifas ideon de ago, kaj J— penson, montras ke ne ĉiam laŭ la kunkonformiĝo de la ideoj oni povas veni al dezirata konkludo kaj ke QJ — devas signifi: skriblegscio.

Por fari ebla la sonan transdonon de siaj signoj, K u k e l donas al ĉiuj apartaj majuskloj kaj minuskloj de sia simbola skribo kaj ankaŭ al ĉiuj aldonaj signoj kaj ciferoj difinitajn sonajn prononcojn: A — a,

[1] «Mathematische Ideographie». Zeitschrift für exacte Logik und Linguistik Reval, 1922 (47).

B — ba, C — ca, a — aj, b — bi, c — ci, 1 — oi, 2 — ti, 3 — tri, 4 — kut...

Ne ekzistas presitaj eldonaĵoj, dediĉitaj al tiu ĉi sistemo. La manuskriptaj (ne eldonitaj) gramatiko kaj vortaro de la sistemo «Ku-ĝi» konserviĝis en 2—3 ekzempleroj. Pro la mallongo de la simboloj, la sistemo Ku-ĝi povus esti utiligebla kiel siaspeca telegrafa aŭ signala kodo.

Pretendi enpenetron en la amasan uzadon ĝi certe ne povis. Pli poste la aŭtoro mem ĉesis okupiĝi pri sia projekto.

**Lastaj postmilitaj projektoj**

Ni citu ankoraŭ jenajn aperintajn post la milito skiz-projektojn: ciferlingvon de arkitekturisto T h i e m e r — «Timerio»[1] kaj internacian skriban lingvon de J. E s p é d e M e t z[2].

En la bazon de la unua sistemo estis metita sistemo de klasifiko, identa al la internacia decimala bibliografia sistemo. Tiamaniere la frazo: «mi amas vin» per la signoj de T h i e m e r esprimiĝas «1 — 80— — 17».

La kritiko de la dua skizprojekto estas donita en «Mercure de France» (Paris, 1925, 1 okt., p. 236—237).

P. S t o j a n ([40]) komunikas pri laboroj de D-ro E d m u n d E r d m a n el Krakow en la fako de analitika ideografio[3], registrante tiun verkon en la fako «logistiko».

En ioma parenceco al la pazigrafiaj projektoj troviĝas ankaŭ la «lingvo de skoltoj» (Boy-scout language), ellaborita en la j. 1921 de la organizinto de la skolta movado — B a d e n-P o w e l l[4]. Tiu ĉi komunika sistemo konsistas el 900 signalaj signoj, destinitaj por transdono en longan distancon, sed ne por la buŝaj interrilatoj.

## GESTOJ KAJ NATURSONOJ

Ni devas diri kelkajn pluajn vortojn pri profesoro de Novrusia universitato en Odessa, Vikentij Gavriloviĉ S c h e r z l, traleginta en marto de la j. 1886 en la nomita universitato du prelegojn pri la temo: «Universala lingvo kaj gestado». En la sekvinta jaro sub la sama titolo aperis speciala broŝuro[5].

Submetinte al neiga kritiko Volapükon, S c h e r z l venas al konkludo, ke sola lingvo, kiu povus fariĝi internacia, estas lingvo de gestoj. Li skribis: «la lingvo ne estas denaska apartenaĵo de homo, pri la gestoj ni ne povas tion diri». Por pruvi li donas kiel ekzemplon grimacojn de infanoj: pro sala, amara kaj acida gustumo. Li montras, ke ĉe ĉiuj popoloj malrapida mallevo de horizontale rektigita brako signifas: malgranda, suprenlevo de la brako: granda; kliniĝo signifas respekton kaj salutsignon; tremado de la korpo — teruriĝon, timon ktp. Tia lingvo kompreneble bezonas neniun gramatikon kaj povas esti komprenebla sen ĝi. El sia neo de la parola universala lingvo S c h e r z l, tamen, volus fari escepton por la tiel nomataj interjekciaj kaj sonimitaj vortoj. Li vidas iajn respektivajn internaciajn formojn en la nomo de koturno (ruse — pérepel, litove — putnela, estone — tut pe lut, peruane — pukpuka) kaj en la sonoj, imitantaj la sonojn dummanĝajn: njam-njam, ĝam-ĝam ktp.

---

[1] Thiemer, «A numerial language Timerio», Berlin, 1921.

[2] J. Espé de Metz, «Methode de langue écrite internationale», 2-me édition, Paris, 1923.

[3] E. Erdman, «Prinzipien der allgem. analyt. Ideographie», Krakow, 1925 (samloke kaj samjare — la sama verko en pola lingvo).

[4] Vidu, «Linguo internaciona», Praha, VII, 1922, pĝ. 17.

[5] V. Scherzl, «Vsemirnij jazyk i ĵestikulacija», Moskva, 1887 ([45]).

Sed eĉ por la vortoj sonimitaj la argumentado de Scherzl ne vastiĝas pli ol ĝis starigo de jena demando: «Kiu ne komprenus frazon: 'mama ham-ham' (patrino manĝas), 'nini hi-hi' (infano ridas), 'tata bom-bom haŭ-haŭ' (patro batas hundon), 'miaŭ hap pipi' (kato kaptis birdon).»

Kiom ajn kompreneblaj estu similaj sonkombinoj, sur sola ilia bazo tamen ne estus eble konstrui lingvon universalan.

Thomas Aquinatus diris, ke la nomoj de aĵoj devas koincidi kun ilia naturo[1], sed diri tion signifas diri nenion, ĉar dume ne estas trovitaj la leĝoj por konformigi difinitajn sonojn al la naturo de difinitaj aĵoj. Scherzl havis en Rusio sian antaŭulon, kiu vere nur en la jaro 1890 konfesis siajn ideojn. Li estis Dmitrij Nikolajeviĉ Ĉernuŝenko, kiu fariĝis varma volapükisto de la j. 1886. En sia broŝuro[2] Ĉernuŝenko deklaris sian kredon je venonta frateco (je unuiĝo de regnoj kaj popoloj), kaj, celante tiun unuiĝon, li proponis kunvenigi internacian kongreson aŭ en Parizo, aŭ en Varsovio (palaco Lazienki). Ĉernuŝenko komunikas, ke jam en la j. 1864 li prilaboris projekton de universala lingvo, kaj donas bazajn tezojn de sia projekto:

**D. Ĉernuŝenko (1864)**

«La sono en la naturo estas al ĉiuj komprenebla kaj tial estas realigebla tia lingvo, kiu estus bazita per naturaj, komunaj al la tuta naturo, sonoj... Por montri, kie oni serĉu formojn por kunmeto de tutmonda lingvo, ni donu kelkajn ekzemplojn de literoj, prenitaj el la naturo, kion la filologoj nepre konsideru ĉe la kunmeto de la alfabeto de nova lingvo. 1. Ĉar ĉe ĉiuj popoloj infano ĵus naskiĝinta apenaŭ malferminte la buŝon, prononcas sonon 'a' tial tiu ĉi sono devas esti signita per signo, simila al homo. 2. En ĉiuj landoj la ŝafoj, blekante, prononcas sonon 'be'— do la sono b devus esti signata kun simileco al ŝafo. 3. Kiam hurlas la lupo, ĝi ĉiam krias: 'vu-vu', — tial la litero v estu figurita kun simileco al lupo. La hundo bojas per 'haŭ', tial la literon h oni figuru hundsimile...»

**La futurismo de la lingvo**

Ligite kun tiuj ideoj nepran intereson prezentas la ideoj kaj esploroj en la fako de la konstruo de nova lingvo, kiun entreprenis grupo de la rusaj poetoj-futuristoj, gvidata de Velemir Ĥlebnikov, kaj la analogia grupo de la italaj futuristoj, kiuj penis trovi transracian poezian lingvon, bazitan sur iuj sonkombinoj, kiuj transdonus difinitajn kaj identajn ideojn al ĉiu instinkte perceptanta tiujn soknombinojn[3].

Tiu ĉi ideo ne estas nova. Tia, ekzemple, estis la intenco de Letellier (vidu p. 85), siatempe severe kritikita de la Internacia lingvista societo.

Cetere ne solaj futuristoj rimarkis, ke apartaj literoj sonante havas propran karakteron, transformeblan al preskaŭ vortsignifo. Jam la konata rusa poeto-simbolisto Konstantin Balmont en sia libro «Poezio kiel sorĉo» indikas:

«A — estas unua fundamenta sono de malfermata hombuŝo, kiel M — tiu de la fermita. M — estas turmenta ĝemo de multo... Mola M, glata A, malluma M, klara A. Miela M, kaj A kiel abelo. En M — estas morta muĝo vintra, en A — granda varmo...

«Alia nia fundamenta vokalo estas O. O — estas gorĝo. O — sono de ĝojo...

---

[1] Vidu ĉe E. B. Taylor, «La prakulturo», Peterburg, 1896, vol. I, ĉap. 5. (ruslingve)

[2] D. Ĉernuŝenko, «Lekciji dla vsemirnogo jazyka volapüka. Stremlenije k miru, primirenije vraĵdujuŝĉiĥ i sojedinenije protivopoloĵnostej», Ĥarkov, 1890.

[3] «La Nova Epoko», Moskvo, febr. 1923, kajero kvina, pĝ. 19—25, artikolo de N. Nekrasov «Futurismo en nia lingvo».

«U — estas muziko de bruo, kaj U — krio de teruro. Sono obtuza kiel nubo kaj muĝo de kupraj tuboj...

«Kontraŭe al la kruda U, I — estas maldika linio... Krio, siblo, ĉirpo... I — estas sonvizaĝo de miro, timo...

«Lulo de lago estas aŭdebla en L, io mola, larma, — lekanto, liano, lilio... Helckula mola petolo, larma stelo, ŝancelo de la folioj, klino super la lulilo...

«R — estas rapida, ornama, terura, grava, tondra... R — estas unu el tiuj sorĉaj sonoj, kiuj partoprenas signifoplene en la lingvo de plej diversaj popoloj kaj en bruoj de la tuta naturo. Kiel Z, S kaj Ŝ estas aŭdeblaj ĉu en la homparolado, ĉu en siblado de serpento, ĉu en susuro de sekaĵoj, ĉu en siblo de svingoj, same R — partoprenas parolon de nia gorĝo kaj brusto kaj rikanadon de tigro kaj kveradon de turtino, kaj grakadon de korvo, kaj bruon ĉe bordo, grandioze krakantan, kaj ruladojn de tondro...

«Kaj vento estas V...» — ktp. —

Pli malproksimen venis alia rusa poeto, A. B j e l y j, kiu eĉ skribis simbolon poemon pri la naskiĝo kaj evoluo de la sono «Glossolalio», en kiu li jen trafe, jen dube penas trovi la komunan prafonton de la poezia stimulo en la naskiĝo de la sonoj ĉe ĉiuj popoloj.

Ĉe la italaj futuristoj, kiel F. T. Marinetti, kiuj kvazaŭ antaŭsentis la novajn mondajn kataklismojn, la futurismo de la lingvo estis kaŭzita pro bezono detrui la tro rigidajn malhelpantajn klasikajn formojn por krei la novajn taŭgajn por la novaj emocioj kaj agoj. Aperis la ideo «muzike» esprimi per la sonoj tion, kion nebuligis la senco de la vortoj.

Tamen la provoj krei «transracian» lingvon kondukis la futuristojn al konkretaj agoj. Rezultiĝis versoj, ne esprimeblaj per la sencaj vortoj, sed eble de kelkaj tamen percepteblaj laŭ la ekstera kaj sona impresoj, ekzemple:

«Dyr bul ŝĉel!
U bej ŝur!
Manĉ, manĉ!
Ĉi breo zo!»

Aŭ ĉe la itala poeto A. P a l a z e s c h i:

Bilobilobilobilobilo
    Brum!
Filofilofilofilofilo
    Flum!
Bilolu, filolu
    U!
Ne estas vere ke tio nenion signifas,
Tio signifas ion:
    Tio signifas,
Kiam iu, vortojn nescianta, kantas
Aĵon, aĵon tute vulgaran.
He! Bonege, ĝuste tio al mi plaĉas.

Laŭ la ideo de la futuristoj tiu ĉi stranga lingvaĵo devis esti do la vera natura mondolingvo por ĉiuj nacioj.

Ne forprenante siaspecan arogecon de la montritaj celadoj, ni devas tamen konstati, ke el similaj provoj krei naturan sonan lingvon dume ne povas aperi iu praktika rezulto. Ĉiuj ĉi provoj en opinio de la vasta publiko ricevas aspekton de ordinara futurisma originalaĵo kaj afekto.

## SISTEMOJ APRIORIAJ

Nun ni analizu la publikigitajn en tiu periodo projektojn de sistemoj de la lingvoj aprioriaj.

Profesoro C. Meriggi, en la j. 1884 aperigis sian projekton de «Blaia Zimondal[1]» (9). Sep jarojn dediĉis la profesoro por la detala prilaboro de tiu ĉi projekto, kiu havis kiel celon, per la kombino de literoj kaj silaboj transdoni difinitajn naturajn kunrilatojn inter la sonoj kaj transdonataj ideoj. **C. Meriggi (1884)**

Tiu ĉi problemo estis starigata jam de Platono kaj Leibnitz. Meriggi solvis ĝin jenmaniere: la sono a — esprimas la ideon: granda, alta, forta, blanka, antaŭen, etendiĝo; i — malgranda, delikata, meza, enhavaĵo; u — malserena, malproksima, estonta; p — forto, pezo, premo, bato; k — firmeco, fidindeco; l — likveco, fleksebleco, elasteco; r — bruo, rotacio, movado, rapideco ktp.

Poste venas kombinaĵoj: fl — likvaĵo, bl — parolo, kr — maŝinoj kaj iloj, kl — konstruaĵoj, klam — domo, klem — dormejo, klim — kabineto, klom — gastejo, blar — paroli, blaia — lingvo. Malgraŭ la spriteco de tiu ĉi sistemo, ĝi ne povis enradikiĝi kaj esti uzata. La aŭtoro mem baldaŭ komprenis tion kaj forlasis siajn ideojn. Kvaronjarcenton poste, en la j. 1911, aliĝinte al «Academia pro Interlingua», li aperigis broŝuron-alvokon kun peto subteni la novlatinajn projektojn de universala lingvo[2].

Konstruskizo por analoga filozofia lingvo, pli ĝuste — por filozofia gramatiko — estis kunmetita kaj en la j. 1888 publikigita de hispano L. Selbor[3]. Ĝi estis pure aprioria projekto, en kiu troviĝis eĉ specialaj apriorie akceptitaj «signoj por transdono de diversaj sonoj». Ĉiu signo kaj ĉiu sono havas sian propran sencon. Rezultiĝas el tio treege malsimpligita kaj komplika lingvo. Eĉ la kalkulado ne estas pli simpla, sed pli komplika, ol en la lingvoj naturaj. **L. Selbor (1888)**

Originaleca projekto de lingvo kun treege komplika alfabeto estis prilaborita en Brest de anonima aŭtoro, sin kaŝinta sub pseŭdonimo «Le-Dantec[4]». Tiu ĉi projekto posedas tre simplan gramatikon kaj vortaron, pruntitan el lingvo latina; sed la alfabeto, trikvarone konsistanta el renversitaj latinaj kaj eĉ greko-slavaj literoj, faras tiujn vortojn tute nerekoneblaj kaj la tekstojn de la lingvo malfacile legeblaj. **Le-Dantec (1885)**

En la j. 1909 en Paris en verko «La Lutte universelle» la sama aŭtoro insistis pri akcepto de lingvo simetria (10).

— E. Maldant en la j. 1886, en Parizo aperigas projekton — «Chabé-Abane[5]».

Maldant, konkludante el la tezo, ke ĉiuj naturaj lingvoj — estas treege ŝarĝitaj per ĉiuspecaj malregulaĵoj, opiniis ke universala raciigita **E. Maldant (1886)**

---

[1] Cesare Meriggi, «Blaia Zimondal — lingua universale», Pavia, 1884; de la sama: «Appendice all opusculo della Blaia Zimondal», 1888.

[2] Vidu: «Discussiones, Academia pro interlingua», Torino, 1911, t. II, n-o 4 pĝ. 107 (47).

[3] L. Selbor, «Studia Filologico sobre lengua universal», Madrid, 1888 (48).

[4] Panglossie ou langue universelle. Opuscule commencé 1845, termine en 1885 seulement et dedié à M. Charle Limousin, redacteur de journal de «Siècle», Brest, 1889 (48).

[5] Eugène Maldant, «Chabé-Aban, ou la langue naturelle». Grammaire avec exercices et vocabulaire, Paris, 1886. Artikolo de Th. Grimm en «Petit Journal», Paris, 22. sept. 1885.

Ni notu interesan agitan artifikon. La aŭtoro de tiu ĉi malmulte disvastigita projekto antaŭgarde ĉe la publikigo de la lernolibro presigis kvanton da diversaj kovrilpaĝoj kaj titolpaĝoj. Tial la lernolibro aperis samtempe per ĉiuj eldonoj, de la 1-a ĝis la 14-a.

lingvo povus esti nur lingvo, komplete artefarita. Sian tute apriorian lingvon M a l d a n t ial nomis lingvo natura (Chabé-Abane). Eĉ la alfabeto de tiu ĉi lingvo diferencas de la ekzistantaj alfabetoj. La vokaloj estis figuritaj per kurbaj linioj, la konsonantoj — per rektaj. La artefariteco de la lingvo montriĝas eĉ en la nomoj de la numeraloj: u—0, o—1, ob—2, oc—3, od—4, of—5, og—6, oa—10, oao—11, oba—20, oi—1000, ou—1 000 000. Tiamaniere por la nombro 469 882 554 finfine rezultiĝas mallonga, sed malmulte signifanta esprimo «odegalukekabefedad». Sammaniere arte estis konstruitaj ĉiuj ceteraj elementoj de la lingvo. Per nombro da afiksoj, konisistantaj el apartaj literoj, oni povas fari el la vortradiko la plej diversajn derivaĵojn. Ekzemple: di—prudento, adi—prudenta, edi—prudente pensanta, idi—komprenebla, odi—prudente, udi—malprudente. Estas malfacile trovi en tiu ĉi sistemo konsekvencon kaj logikecon de konstruo. Jam post la morto de M a l d a n t iu B o u r g o i n t L a g r a n g e komencis propagandi kaj perfektigi la sistemon Chabé-Abane ([8]). En sia broŝuro («Le Chabé», 1894) li asertas, ke la ĉefa valoro de tiu ĉi lingvo konsistas el tio, ke ĝi nenion prunteprenas el la lingvoj naturaj. Blaia-Zimondal kaj Chabé Abane — estas post Volapük la unuaj projektoj de artefarita lingvo, kiuj portis strangajn artefaritajn nomojn. La antaŭaj modestaj nomoj «universala lingvo» kaj «la lingvo de l'mondo », ne konformiĝis al la reklamaj bezonoj de XIX. jarcento.

**Chancerel (1889)**

E. D o r m o y en sia libro («Le Balta...» vidu pli malsupre) komunikas ke M a l d a n t havis kunlaboranton por ellaboro de la vortaro— iun C h a n c e r e l, kiu pli poste, en la j. 1889, ellaboris memstaran lingvosistemon «Oidapa», kiu ĝenerale similas la projekton de M a l d a n t.

**Ceteraj nekonataj aprioriaj projektoj de 1887—1891**

A. K e r c k h o f f s ([34]) citas ankoraŭ unu projekton de alia «natura» lingvo «Visona» de d-ro S i v a r t h a, eldonitan en Chicago[1].

Estu ankoraŭ citata la propono de H. M a r i n i[2] ([9]) havanta kiel, bazon kombinaĵojn el sonoj kaj sign j.

**D-ro Novodum (1896—1898)**

En la j. 1896 en Kiev aperis anonima skiz-projekto de d-ro N o v o d u m (pseŭdonomo). La aŭtoro donis al sia ne plene ellaborita projekto fanfaronan nomon «Prometeo-Kleriganto[3]». La aŭtoro projektis en du libroj analizi la bazajn punktojn en la strukturo de la nova lingvo: en la unua — pri simpla gramatiko, kiu «povos esti lernebla en daŭro de 5—10 minutoj», kaj en la dua — pri la psikofiziologio de sonoj, pri sistemo de radikoj kaj vortaro en filozofia lingvo. La logikaj tezoj de la aŭtoro estas originalecaj, sed ne konvinkigaj, ekz.: patro—p-aj, patrino — p-aja, filo — $^1/_2$ p-aj, filino — $^1/_2$ p-aja, nepo — $^1/_4$p-aj, nepino — $^1/_4$ p-aja ktp.

La dua libro aperis en Kiev kun la vera nomo de aŭtoro — d-ro Eŭgeno Gurin en la j. 1898. Ĝi estas dediĉita al elserĉo de la sufiksoj kaj prefiksoj necesaj por la universala lingvo. Devis aperi ankoraŭ pluaj libroj, sed ili restis ne publikigitaj.

En la j. 1928 la aŭtoro, persiste defendante siajn principojn, komunikis al ni, ke manuskripte estas preta la tria libro pri psiko-fiziologia analizo de la fleksioj kaj la kvara libro pri kunmeto de la vortaro sur bazo de 170—200 sonsimboloj.

---

[1] Dr. Sivartha, «Visona or Universal and Natural language», Chicago, 1887.

[2] «H. Marini, «Méthode rapide facile et certaine pour construire un idiome universel», Paris, 1891.

[2] D-ro Novodum, «Novyj meĵdunarodnyj jazyk «Prometej-Prosvetitelj», vypusk I, Kiev, 1896; vypusk II, Kiev, 1898 ([47]).

Ni havas informojn pri unu hispana projekto de aprioria lingvo, kunmetita de G u e r r e r o[1] kaj eldonita en la j. 1898 en Barcelono. Ĉiuj vortoj en tiu ĉi projekto estas divideblaj je 20 klasoj, tute arbitraj, ekz.: A 1 — povo, A 2 — faro, A 3 — penso, A 4 — ago, A 5— rezulto, B 1 — pasiva, B 2 — aktiva ktp. La vortfarado estas plene arta. Rezulte la monato aŭgusto en tiu ĉi sistemo ricevas nomon «yerndanin», ero — yer, epoko — yur, jaro — yarn, semajno — yirn tago — yorn, horo — yurn.

**A. J. Guerrero (1898)**

D-ro A. N i c o l a s, proksima kunbatalanto de prof. K e r c k h o f f s kaj vicprezidanto de la franca volapükista asocio, seniluziiĝinte pri Volapük, decidis en la j. 1889 prilabori sian propran sistemon «Spokil». Kelkaj apartaj broŝuroj, artikoloj, cirkuleroj, dediĉitaj al la nova lingvo estis publikigitaj de N i c o l a s ĝis la j. 1904, kiam aperis plena lernolibro kun vortaro de la lingvo «Spokil[2]». Dum tiu ĉi t mpo, laŭ la propra komuniko de N i c e l a s, lia projekto estis refarata «de supre ĝis malsupre preskaŭ 34 fojojn».

**D-ro A. Nicolas (1889—1904)**


D-ro A. Nicolas

La projekto de N i c o l a s ne estas projekto de filozofia lingvo, sed tamen ĝi posedas ĉiujn elementojn de lingvo aprioria, de la komenco ĝis la fino komplete arte elpensita. N i c o l a s, akceptante la neeblecon konstrui logike senriproĉan filozofian lingvon, opiniis tamen, ke el la kombino de literoj kaj silaboj, posedantaj difinitan simbolan sencon, li povos formi kunmetitajn derivitajn vortojn, kies senco retrospektiĝos ne tiom laŭforme, kiom laŭ la kunligiteco de la ideoj.

La gramatiko de la lingvo estas simpla same kiel ĝia vortaro. Ĝi estas konstruita sur arta bazo: per prefiksa aldono de konformaj vokaloj estas difinebla la aparteno de la vortoj al tiu aŭ alia kategorio: substantivoj (a), verboj (e), prepozicioj kaj konjunkcioj (i), adjektivoj (o), adverboj (u). La kalkulado estas jena: ba — 1, ge — 2, di — 3, vo — 4, mu — 5, fa — 6, te — 7, ki — 8, po — 9, nu — 10. Por elparoli iun nombron, konsistantan el kelkaj ciferoj, oni elparolas laŭvice ĉiujn ĝiajn ciferojn de maldekstre al dekstre, enmetante literon «l» sur la lokon de punkto aŭ komo, kiuj dividas la triciferajn grupojn; ekzemple: 1 345 796=bal-divomul-tepofal.

La vortaro estas konstruita de la aŭtoro tiamaniere, ke ĝi «rememorigu pri la naturo, montrante tiun aŭ alian frapantan econ kaj elektante situaciojn, kiuj, laŭeble, konformiĝu nur al objekto, pri kiu rememorigas la koncerna vorto».

---

[1] Antonio Julio Guerrero, «Metodo para la ensennaiza de Dey Daynd. El auxiliara idioma para todos. Ideado y construdo», Barcelona, 1898 ([48]).

[2] Vidu artilolon de d-ro A. Nicolas, «Spokil ou langue scientifique internationale» en «Bulletin de la Soc. de Med. pratique de Paris», Février, 1889; kaj de la sama: «Spokil-langue internationale. Grammaire, exercices, les deux dictionnaires». Maloine, 1904; k. aliaj eldonaĵoj de A. Nicolas ([47]).

Al ĉiu litero estas atribuata difinita grupa senca signifo, ekz. la litero «r» karakterizas jenajn ideojn: fermo, kaŝi, vesto, haŭto, litkovrilo, ĉirkaŭe... El tio kreiĝas ideoj pli diferencigitaj: rb — ideo de laboro, rg — ideo de energio, rk — ideo de cirklo kaj ideoj paralelaj: gr — ideo de gravuro kaj preso, kr — ideo de milito, ktr — ideo de elektro. Oni certe trovas en tiuj konstruaĵoj neniun logikan sistemon. Same estas neeble trovi en ili ion, kio faciligus «per kunrilato de l'ideoj» la memoreblon de apartaj terminoj. La elemantaj ideoj, atribuataj al iuj literoj kaj sonoj, ne povas servi kiel sufiĉa materialo por la konstruo de universala facile lernebla lingvo.

Post la j. 1904 la propagando de «Spokil» ĉesis.

F. Hilbe (1901) Certan intereson, kiel montrilon de aliformiĝo en la laboroj de la adeptoj de aprioriaj sistemoj, prezentas la projekto de F. H i l b e[1], iama profesoro de Volapük ([40]). La projekto de H i l b e konsistas el du kontraŭaj proponoj. De unu flanko la libro de H i l b e subtenas la ideon de la konstruo de parolebla ciferlingvo, bazita sur logika klasifiko de ideoj. La aŭtoro, tamen, praktike ne faras pli ol prilaboron de skemigita internacia metodo de ciferesprimoj, kiu, cetere, atingas eĉ la eblon esprimi (ekzemple per silabo q a r) milionan potencon de miliono. t. e. unuon kun 6 000 000 da nuloj.

Koncerne la detalan ellaboron de vortaro de la nova lingvo, aŭ de «la scienco de lingvistika kalkulado» (die sprachliche Rechnungswissenschaft), la aŭtoro prokrastigas la praktikan solvon de la demando ĝis kunvoko de kompetenta internacia komisiono, kaj dume proponas uzi alian internacian, preskaŭ pure aposteriorian sistemon de lingvo (Numerlingue), konstruitan simile al naciaj eŭropaj lingvoj.

El la granda amaso da vortoj, formeblaj per konformaj ciferesprimoj de lia lingvo, H i l b e proponas elekti nur tiujn, kiuj estas similaj al la konataj radikoj de naturaj lingvoj, kaj poste doni al ili tiun sencon, kiu apartenas al ili en tiuj naturaj lingvoj. Ĉe tiu elekto oni preferu la radikojn internacie konatajn aŭ komunajn al la pli granda nombro de lingvoj kaj popoloj. Tiamaniere ĉiu vorto esprimos samtempe iun ideon kaj iun nombron. Irante per malsama vojo, la aŭtoro alvenis al renaskiĝo de la ideoj de cifera numerado de ideoj, farita de B e c h e r kaj K i r c h e r. Ĉar en tiu procedo la reguloj de arta formado de ciferesprimoj nepre kontraŭstariĝas al ĝusta konservado de la principo de internacieco por la radikoj, tial rezultiĝas jenaj kripliĝoj: l i n v a n t o r o (inventeur — inventinto) l i n d e p ä n d ä n t e d (independence — sendependo, memstaro).

Tia kunmikso de aprioriaj kaj aposterioriaj principoj ne povis akceli praktikan sukceson de la proponita sistemo.

C. Dietrich (1902) En la j. 1902, en Dresden eksvolapükisto C. D i e t r i c h publikigis verkon, traktantan pri logika sistemo de aprioria lingvo-konstruo. Sian verkon D i e t r i c h[2] komencas per ĝenerala kritiko de Volapük, sed en Volapük D i e t r i c h kritikas nur ĝian «proksimecon» al naturaj lingvoj. En percepto de D i e t r i c h universala lingvo devas esti absolute neŭtrala kaj malsimila al ĉiuj ekzistantaj lingvoj. Tia artefarita lingvo devas esti «miraklo de la arteco pro siaj multenombraj

---

[1] Ferdinand Hilbe, «Die Zahlensprache. Neue Weltsprache auf Grund des Zahlensystems, mit einem anabhängigen Wortschatze von Millionen unveränderlicher Grundwörter», Feldkirch, 1898; alia plimalampleksa eldono aperis samloke en la j. 1901 ([40]).

[2] Carl Dietrich, «Grundlagen der Völkerverkehrssprache. Entwürfe für den Auf- und Ausbau einer denkrichtigen neutralen Kunstprache als zukünftige Schriftsprache eventuell auch Sprechsprache für den internationalen Verkehr», Dresden, 1902.

konsistigaj partoj, pro unueco kaj finiteco de siaj funkcioj. Plene ellabori ĝin povus nur kolektivo de scienculoj kaj logikistoj. D i e t r i c h nur donas ĝeneralan skizon de ĝia konstruo kaj de elementoj de ĝia gramatiko. Tio kaŭzas riĉnombrajn variaĵojn de apartaj konceptoj, tamen nesufiĉe ĝustajn, tute ne neriproĉeble logikajn kaj treege malfacile memoreblajn.

Por ekzemplo ni prenu radikon vet, kiu signifas ruĝan koloron (kune kun: vit — blanka, vat — flava, vot — blua ktp.).

El la radiko vet apartaj derivaĵoj donas jenajn proksimajn inter si ideojn: vieto — rozkolora, vaeto — skarlata, voeto — ultraviola, vueto — malhele ruĝa.

M. Talundberg (1904)


Laŭvice sekvas, en la de ni esplorata tempoperiodo, aprioria projekto de lingvo «erio[1]», kies aŭtoro, germana dramverkisto, sin kaŝis sub la pseŭdonimo M a n n u s T a l u n d b e r g (9).

La eldoninto de tiu ĉi libro K. W a s s e r l o o s estis sola defendanto de la ideoj de T a l u n d b e r g. Ĉefaj mankoj de Volapük kaj Esperanto, liaopinie, estis ilia simileco al la lingvoj naturaj.

Ion rimarkeblan aŭ originalan tiu ĉi projekto ne donas, krom notinda mallongeco de ĝiaj vortoj.

Lundström (1906—1908)

Grandan redukton de la principoj de aprioriaj sistemoj montras propono, traktanta ellaboron de universala lingvo, farita de Peter L u n d s t r ö m (P. Friedmann[2]), kaj trarigardita en ĝia manuskripto, en la j. 1907 de la Komitato de delegacio por akcepto de internacia lingvo. Presita tiu ĉi propono aperis nur en la j. 1908. Ĝia karaktera trajto estas tio, ke kune kun la aprioria gramatiko la vortara materialo estis elprenita per aposteriora metodo el ekzistantaj eŭropaj lingvoj. Sed la aprioria gramatiko, sin bazanta sur komplika «fiziologia» klasifiko de vokaloj kaj konsonantoj, kun formoj fremdaj al lingvoj eŭropaj (kiel ekz. dualo kune kun la ununombro kaj multenombro), estis tro arbitra, por ricevi ian sukceson. La skizo de L u n d s t r ö m pli detale ne estis ellaborita.



Peter Lundström

Wise (1907)

En la j. 1907 en la komisionon de la Delegitaro por akcepto de internacia lingvo sin turnis iu W i e s e el Filipinaj insuloj kun priskribo de teoriaj principoj por la konstruo de artefarita universala lingvo. La baza el tiuj principoj estis la nepra atento de aprioria postulo: «la vortoj identaj laŭ la senco devas esti identaj laŭ la formo». Ĉar W i s e donis nur ĝeneralajn teoriajn rezonaĵojn kaj ne prezentis konkretajn formojn de sia sistemo, tial la komisiono de la Delegitaro malakceptis la detalan esploron de lia projekto.

---

[1] Mannus Talundberg, «Perio — eine auf Logik und Gedächtniskunst aufgebaute Weltsprache», Elberfeld, 1904.

[2] P. L. Friedmann, «Pan-Arisch — Vorschlag zur Ausarbeitung einer internationalen Hilfssprache», Altona, 1908 (47).

**E. P. Forster (1908)**

En la sekvinta j. 1908 pastro Edward P. Forster (Usono) kun sia aprioria projekto «Ro» aperis kiel nova iniciatinto en la konstruo de la universala filozofia lingvo. Al tiu ĉi projekto estis dediĉita speciale eldonata de Forster (1908—1909) anglolingva monata folio[1]. De la j. 1912 tiu ĉi folio neregule aperis sub titolo «Monda lingvo» (World Speech), kiu krom la propagando de la lingvo celis komercan reklamon[2]. La tekstoj en «Ro», iutempe aperintaj en la nomita folio, frapas pro sia malfacileco kaj nekutimaj formoj.

Al ĉiu litero de la angla alfabeto konformiĝas iu difinita senco (ĉefideo). La vortoj, kiuj difinas la ideojn, sin formas el la kunmeto de literoj, karakterizaj por la «kunmetitaj» elementoj de la ideo. Ekzemple:

b — ekzisto, materio,
c — io reale ekzistanta,
d — spaco:

El la baza litero b oni povas ricevi jenajn derivaĵon: bod — universo, bodac — ĉielo, bodaf — nebulaĵo (astronomia), bodak — kometo, bodal — planedo, bodala — planedo Merkuro, bodam — luno, bodar — stelo, bodas — suno, bodeb — aero, bodec — atmosfero, bodef — nubo, bodek — vento, bodic — oceano, bodid — markolo, bodif — lago, bodob — kontinento.

Ellerni similan lingvon ne povus eĉ la aŭtoro mem. Eĉ laŭ la filozofiscienca vidpunkto tiu ĉi sistemo estas dube perfekta, kun granda rezervo.

La aŭtoro de tiu ĉi sistemo ĝis nun aperigas apartajn foliojn kaj broŝuretojn en sia lingvo. Inter ili ni devas indiki la aperon de anglo-ro'a vortaro en la j. 1919[3].

Krom la mallongtempe ekzistinta en la j. 1917 klubo de roistoj en Buenos-Aires, ni konas nenion el la praktikaj sukcesoj de Forster.

Lastatempe (de la j. 1926) Forster eldonas en Waverley (ŝtato de Orienta Virĝinio) ĉiumonatan folieton, renomitan «Roia» (tradukite: lingvisto-lingvoscienculo, el la kunmetitaj vortoj «Ro» — lingvo kaj «ia» — inventinto, aŭtoro).

**J. Croegaert (1908)**

En la gazeto «Progreso»[4] ni trovas informon, ke en la j. 1908, en Antwerpen J. E. Crogaert prilaboris projekton de universala simbola lingvo (Langue Universelle Symbolique). Croegaert transsendis al Couturat ĝeneralan konstruplanon de sia pure filozofia lingvo. Ne ekzistas presitaj verkoj, dediĉitaj al tiu ĉi projekto.

**De-Sarranton (1911)**

En la j. 1911 aperis profunde ellaborita laŭ scienca preciza tendenco projekto de aprioria sistemo «Molog»[5]. La aŭtoro — De Sarranton uzis en sia sistemo 16 vokalojn, 17 konsonantojn kaj tute arbitrajn formojn. La nombroj, ekzemple, estis skribataj: mo, bi, tri, fo.

**V. L. Gordin (1920)**

Projekto de «inventa lingvo Ao» estis prilaborita de pan-anarkiano V. L. Gordin — Beobi[6] en Moskvo, en la j. 1920.

La ideoj de Gordin pli bone sin montras en jena alvoko, aperinta en lia unua libro: «Ĉiuj kreu anarkion, ĉiuj parolu home, en Ao.

[1] «Ro» — 1908—1909, Cincinnati, Ohio, USA.
[2] «World Speech», 1912—1917, Marietta, Ohio, USA.
[3] Edward P. Forster, «Dictionary of Ro — the world language», Marietta, Ohio, USA, 1919.
[4] «Progreso», Paris, febr. 1909, n-o 12, pĝ. 751.
[5] De Sarranton, «Molog-project de langue artificielle», Cannes, 1911.
[6] 1'2'31'4 (Beobi). 0'12'''533'5'22 1'2'1'15'41'3. '1'3—'241'221'2'4''5. Ao—russkij slovarj ĉeloveĉestvo-izobretatelja.» (Ao — rusa vortaro de la homaron inventanto). Presita en eksterŝtata Aopresejo. 1-a jaro post invento de la homaro. (Moskvo 1920) ([47]).

Bojkotu la naturajn lingvojn, naciajn, ŝtatajn kaj internaciajn. Esperanto estas lingvo de internacia eŭropa imperialismo. Kreu la Pananarkion!»

Ao posedas 5 vokalojn: '1—a, '2—e, '3—o, '4—i, '5—u kaj 6 konsonantojn: 1—b, 2—c, 3—d, 4—f, 5—t, 0—z.

La tuta lingvo estas do skribata per ciferoj. Jen estas kelkaj ekzemploj de ĝia gramatiko [1]:

'1—'1 (a-a) — fari.
1'4 '1—'11 (bi-a-ab) — mi faras.
2'2 '1—'11 (ce-a-ab) — vi faras.
3'2 '1—'11 (de-a-ab) — ili faras.
1'2 '1—'31 (be-a-ob) — ni faris.
2'4 '1—'51 (ci-a-ub) — ci faros.
3'4 '1—'52 (di-a-uc) — li farus.
'1—'11—'4 (a-ab-i) — faranta.
'1—'42—'31—'4 (a-ic-ob-i) — farita.
'1'3—'53'53'141'22'5 o'12'3'3 — Ao estas konceptanaliza lingvo.

Konstatinte mem la gravajn mankojn de sia sistemo, G o r d i n komencis ĝian pluan prilaboron kaj post kvar jaroj, en 1924, aperigis novan formon de Ao, multe diferencan de la antaŭa [2].

Jen estas la nova alfabet› de Ao:

x — a, + — e, O — o, $\sqrt{}$-i, — - u, —' - ü
1-b, 2-c, 3-d, 4-f, 5-1, %-z.

En la nova strukturo de Ao estis tre detale prilaborita simboligo de ĉiuj mondkonceptoj, klasifiko de l' objektoj kaj ilia gradaro. Tamen tute originala ideologio de G o r d i n, dononta al ĉiuj aĵoj kaj aferoj tute specialan komprenon, kaj precipe absoluta netaŭgeco de la lingvo por la kutima vivo faris Aon neniel akceptebla kaj uzebla en la praktika vivo.

G. N i e l d el Marseille en la jaro 1927 publikigis eksperimentan provon de logika-aprioria lingvo Loga [3]. Ni citu ekzemplojn de tiu lingvo: Palovfat- mi amas la patron; pitldah-mi donas tion al li; pihlov promagard-mi amas promeni en ĝardeno. G. Nield (1927)

Ankoraŭ pri unu, evidente, aprioria projekto «Cosmolingvia» aperis notoj en la gazetaro [4]. La aŭtoro — Samuel H o r o w i c z el Krakow komponis lingvon el 600 vortoj kaj 60 reguloj. P. S t o j a n ([40]), notante tiun projekton, ne donas pri ĝi iujn detalaĵojn. G. Horowicz

## MIKSITAJ PROJEKTOJ

Krom la projektoj de pazigrafio, de filozofiaj kaj aprioriaj sistemoj de universala lingvo, praktike malakceptitaj jam de la tuta sperto de la du pasintaj jarcentoj — kelkaj esplorantoj sin direktis laŭ la kompare facila vojo de la hazarda kreo de lingvo, alfarante artan gramatikon al vortaro kaj inverse, miksante principojn aprioriajn kaj aposterioriajn, kreante la tiel nomatajn miksitajn sistemojn, tipe similajn al Volapük.

Senduba, kvankam nelongedaŭra sukceso de Volapük unuflanke, malkontentiga fina rezulto pro ĝiaj arbitre elektitaj formoj aliflanke, faris konvenan medion por la lingvoserĉadoj de apartaj aŭtoroj, sin direktantaj per siaj individuaj gustoj kaj preferoj.

[1] Pli detale vidu en «Kosmoglott», n-o 1—2 (19—20), jan.-febr. 1924, pĝ. 9—10, en artikolo de N. Nekrasov «Inventa lingvo Ao».

[2] 1+OIV (Beobi). Grammatika panmetodologiĉeskogo jazyka AO. Moskva, 1924.

[3] G. Nield, «Loga, experiment de une langue logic». Marseille, 1926.

[4] «Gosmoglotta». Wien, 1927. № 6 ([43], p. 100. Vidu «Heroldo de Esperanto», Koln, № 11 (507), 15 marto 1929 j.

Se Germanio en la unua tempo post Volapük donis preskaŭ ĉiam projektojn filozofiajn kaj aprioriajn, kontraŭe inter la franclingvaj aŭtoroj plejparte montriĝis tendenco krei lingvojn miksitajn.

Samtempe aperadis kiel projektoj detale prilaboritaj, tiel same ankaŭ projektoj, enhavantaj nur provizorajn tezojn — skizantajn la ĉefajn principojn por rekonstruo de Volapük. Kiel similspecajn ne detale ellaboritajn proponojn ni indiku la verkojn (³⁴) de hispano T. Escriche y Mieg[1], kaj de anonima aŭtoro N. Nag[2].

**S. Verheggen, Ch. Menet (1886)** En la j. 1886 en Francio estis publikigitaj du miksitaj projektoj: de S. Verheggen — «Nal-Bino[3]» kaj de Ch. Menet[4]. Tiuj ambaŭ projektoj staris sur tre malalta ŝtupo de teoria perfekteco. La unua el ili estis praktike neakceptebla jam pro la arbitra kaj nenatura konstruo de ĝia alfabeto: 24 vokaloj (!) kaj 24 konsonantoj. La dua estis imitaĵo al Volapük kun sola aldono, ke, por atingi grandan mallongecon, ĉiuj ĝiaj radikvortoj estis farataj unusilabaj kaj tiakaŭze elektitaj inter la vortoj arabaj, turkaj, volapükaj ktp.

Pro tiuj kaŭzoj la aŭtoroj de la nomitaj lingvoj ne povis esperi iun sukceson. Komprenante tion, Verheggen ligis siajn esperojn al internacia juĝantaro, konsistanta el reprezentantoj de registaroj aŭ el personoj, rajtigitaj de la adeptoj de internacia lingvo. Tiu ĉi juĝantaro devus elekti iun difinitan sistemon kaj per tio forigi la individuajn penadojn kaj simpatiojn de diversaj sistem-aŭtoroj.

**St. de Max (1887)** Kiel analogia rekonstruo de Volapük, kiu donas nenion novan, estis projekto, eldonita en la j. 1887 sub la aŭtora pseŭdonimo St. de Max[5]. Kerckhoffs nomas kiel aŭtoron de tiu ĉi projekto iun Streif.

**E. Dormoy (1887—92)** Ioman progreson kompare al Volapük prezentas la samtempe aperinta skiz-projekto de Dormoy «Le Balta», presita en la j. 1887, en «Le Moniteur de l'Exposition» kaj poste en la j. 1892, aperigita en aparta libro[6].

La gramatiko de tiu ĉi «interkonsentita» lingvo, kompare kun la gramatiko de Volapük estas multe pli simpligita kaj pli proksimigita al la esenco de modernaj lingvoj. Tio estis celo, kiun starigis por si Dormoy. Sed la vortaran materialon de Volapük li prenis laŭeble neŝanĝita, krom tiuj formoj, kiam la neceso de ŝanĝo estis kaŭzita de la karaktero de strukturo en la korektita gramatiko. En apartaj fojoj la vortoj de «Balta» estas eĉ pli artefaritaj kaj malpli naturaj, ol tiuj de Volapük. Eŭropo, Ameriko, Aŭstralio estas skribataj — en Volapük — Yulop, Melop, Talop, kaj en «Balta» — Lebalen, Lebolen, Lebulen.

Ne estante ĝisfine ellaborita, tiu ĉi projekto ne povis trovi kaj ne trovis simpatiantojn inter la volapükistoj.

**G. Bauer (1888)** En la jaro 1888 profesoro Gjuro Bauer (antaŭe Banfi), fama volapükisto, eldonis en Zagreb (Kroatio) sian projekton de lingvo «Spe-

---

[1] Tomas Escriche y Mieg, «La lengua universal», Madrid, 1888.

[2] N. Nag, «Observations sur la langue artificielle appellée Volapük», Fierenze, 1888.

[3] Seb. Verheggen, «Nal-Bino. Projet d'une langue universelle, simple, facile et harmonieuse», Liége, 1886.

[4] Charles Menet, «Grammaire élémentaire de la langue universelle», Paris, 1886.

[5] St. de Max, «Le Bopal — Essai de langue universelle. Grammaire, textes et vocabulaires», Paris, 1887.

[6] Emile Dormoy, «Le Balta — language international conventionnel», Tours, 1892.

lin [1]». Antaŭ tio, en la j. 1886 kaj 1887 kaj poste en apartaj broŝuroj; eldonitaj en Zagreb, Bauer komencis batalon kontraŭ Volapük kaj kontraŭ ĉiuj projektoj de aposterioria — eksperimenta speco (40). La germanlingva lernolibro de «Spelin» estis tradukita de Straus anglolingven kaj eldonita en New-York. En la j. 1892 en Zagreb aperis vortaro de «Spelin» (8). Per tio finiĝas la historio de tiu ĉi sistemo, celanta kombini la ĉefajn principojn de la konstruo kaj de sperto de Volapük kun tiuj de la filozofiaj sistemoj — kaj el 100 bazaj radikoj kaj 60 sufiksoj krei lingvon.

Aliel ne povis okazi, ĉar la «kombinatoriko» de la lingvo ĉe Bauer kaj lia prefero por derivitaj vortoj kaj kontraŭ la vortoj de internacia uzo alkondukis al kuriozaĵoj kiel jena: anstataŭ la ĝenerale konata internacia vorto «universitato» estis donata deko da aprioriaj derivaĵoj: spesapuv, mesapuv, gresapokul, grenokuv, grenocokul stakul ktp.

**Fieweger (1893)**

Alia projekto de perfektigita Volapük estas lingvo «Dil» de Fieweger [2]. Ial Fieweger trovis bezona prezenti sian sistemon de lingvo kiel elpensaĵon de neekzistinta doktoro Gül el Bagdad. En germana lingvo, aperis gramatiko kaj vortaro de la lingvo «Dil». Estis eldonita ankaŭ gramatiko de tiu ĉi lingvo en Volapük kaj en la lingvo «Dil» mem: «dil o med gutun koipeni fra nepez ze gloz doka Gül en Bagdad» (la 1-a eldono de la j. 1892). En la j. 1893 Fieweger eldonis 13 numerojn de ĵurnalo «Dil-oma». Esenca diferenco inter Dil kaj Volapük konsistas el tio, ke kiel Menet tiel same Fieweger prenis por la radikvortoj de siaj lingvoj ekskluzive vortojn unusilabajn kaj ke Fieweger krom tio forigis el la uzo majusklojn.

Apliko de tiuj reguloj al la nomoj de landoj kondukas al jenaj kuriozaĵoj: rop — Eŭropo, sic — Azio, cik — Belgio, cip — Egipto sem — Luksemburgo, meak — Meklenburgo-Ŝverino, meok — Meklenburgo-Strelico. Fariĝas komprenebla la opinio de Couturat kaj Leau (8), ke «en kelkaj rilatoj Dil estas perfektigita Volapük, sed en ceteraj rilatoj ĝi estas nur ties karikaturo».

**J. Guardiola (1893)**

Ankoraŭ malpli perfekta estas projekto de «Orba» de José Guardiola, eldonita germanlingve en Parizo [3]. Krom kelkaj organismaj mankoj, komunaj kun tiuj de Volapuük, malsufiĉa kono de la ĝeneralaj principoj en lingvokonstruo, kondukas Guardiola-n al multaj grandaj eraroj. Estas sufiĉe nomi la uzadon en «Orba» de la ekzistanta nur en lingvoj germana kaj slovena nelogika kunmeto de numeraloj, en kiuj la nomoj de unuoj antaŭiras la dekojn (ekz.: ein und zwanzig, éen in dvacet — laŭvorte: unu kaj dudek=dudek unu).

**Arnim (1896)**

Alia reformanto Arnim [4] celis, simile al E. Dórmoy, ĉiujn eblajn formojn de sia sistemo pruntepreni senpere el Volapük.

Arnim malakceptas la utiligon de internaciaj terminoj, ĉar: 1. ili dume estas malmultaj, 2. ili estas plursilabaj, 3. ili estas malsame prononcataj de diversaj nacianoj, kaj 4. en multaj lingvoj ili

---

[1] Georg Bauer, «Spelin — eine Allsprache auf allgemeinen Grundlagen der sprachwissenschaftlichen Kombinatorik aufgebaut», Agram (Zagreb), 1888.

[2] Fieweger, «Internationale Verkehrssprache Dil — oder bestes Verständigungsmittel zwischen den Nationen nach dem System des Dr. Gül in Bagdad», 1893 (47).

[3] Jose Guardiola, «Kosmal idioma. Gramatika uti nvve prata kiamso Orba. Universal Sprache — Grammatik einer neuen sprache Orba — gennant», Paris, 1893. (47)

[4] W. von Arnim. «Entwurf einer Verkehrssprache, genannt Veltparl». Oppeln, 1796. (47)

havas malsaman sencon. En tiuj 4 punktoj estas entenata la tuta argumentaro, kiun uzis la kontraŭuloj de aposterioriaj sistemoj. Ankoraŭ en la j. 1904 la restintaj volapükistoj batalis kontraŭ la aposterioriaj sistemoj per la samaj argumentoj [27]). Ĉe la ellaborado de sia projekto Arnim konsideris la kritikajn rimarkojn kaj reformproponojn de kelkaj eminentaj volapükistoj Beermann, Lederer kaj Rylski. Pluan ellaboron de sia sistemo kaj eldonon de kompletigaj verkoj Arnim dependigis d la rilato de la legantoj al lia unua eldonita laboro. En la okazo de sukceso li opiniis necesa fondi akademion de la lingvo, kiu povus direkti ĝian perfektigon. Sed tio sin montris superflua. Multpeza heredaĵo el la volapükismaj tradicioj, arbitraj reguloj de vortoderivado, ĝenanta kondiĉo de nepra unusilabeco de radikovortoj kaj de ĉiuj afiksoj — ne povis akceli sukceson de la lingvo. Kiel sola ekzemplo de la lingvo, kies ellaboro ne forlasis la limojn de skema skizo de la bazprincipoj, — estas la subtitolo de la libro de Arnim, donita en «Veltparl»: «Jekt una Zovparl, bevnazo namian Veltparl».

**Marchand (1898)**

En la j. 1898 monako-franciskano Marchand el Besançon (Francio) eldonis sian projekton de «Dilpok»[1]. Dilpok posedis sendube multe pli perfektan gramatikon ol Volapük, sed en ĝi estis konservitaj kelkaj mankoj de la lasta, ekz. la vokaloj — ä, ö, ü. La vortaro de Dilpok, celanta atingi eblan mallongecon, konsistas preskaŭ tute el vortoj unusilabaj kaj tial estas plene arbitra kaj malfacile memorebla. Diverstempe en tiu lingvo Marchand eldonis — lernolibron (Lernal), vort ron (vortal) kaj eĉ franc-dilpokan lernolibron de stenografio. Ĝis la j. 1908 abato Marchand kondukas propagandon por sia neenradikiĝanta projekto. Kiel kuriozaĵon, ni montru la publikigon en tiu ĉi lingvo de la romano de Bernardin de Saint-Pierre «Paŭlo kaj Virginio».

**L. Bollack (1899)**

En la j. 1899 pariza komercisto Leon Bollack[2] kreis sian lingvosistemon de miksita tipo kaj donis al ĝi nomon «Bolak», atribuinte por tiu ĉi celo al la vortoj «bo» kaj «lak» en sia lingvo signifon de «blua» kaj «lingvo».

Blua tiu ĉi lingvo estas nomita laŭ la koloro de la ĉielo — senfina kaj ĉirkaŭanta la tutan mondon.

Bollack enmetis en la aferon grandajn rimedojn. Dum la periodo 1899—1901 j., krom la franclingva, aperis ankaŭ liaj lernolibroj je kelkcent paĝoj en la lingvoj germana, angla, itala, hispana kaj ĉeĥa.

La gramatiko de Bolak teorie estas bone kunmetita, sed ĝenerale ĝi estas tro teoria kaj malfacile memorebla.

Ĉefa manko de la lingvo Bolak troviĝas en la principoj de konstruo de ĝia vortaro. Evidente sub la influo de la ideoj de De-Ria, Bollack kunmetis el literoj (entute 5 vokaloj kaj 14 konsonantoj) de sia lingvo, sekvante la koncernajn regulojn, ĉiujn eblajn prononceblajn vortkunmetojn, konsistantajn el 1, 2, 3, 4, 5 literoj. Ke la ideoj de De-Ria estis konataj al Bollack, montras respektiva subpaĝa noto en lia libro ([10]). Entute, escepte de malfacile prononceblaj literkombinoj, li ricevis 144 139 sonkombinojn kaj formojn. Krom tio, al

[1] Marchand, «Dilpok, manuel de conversation, refermant sous forme de phrases usuelles les radicaux de 25 000 mots», Besançon, 1898, kaj aliaj verkoj de la sama aŭtoro en lingvo «Dilpok».

[2] Léon Bollack, «La langue bleu Bolak — langue int. pratique», Paris, 1899 kaj ceteraj verkoj de L. Bollack ([45]) ([47]).

elektitaj kombinaĵoj, iom similaj al la formoj en iu natura lingvo, B o l l a c k donas similan sencan signifon. Tiamaniere «la vortoj prenitaj el vivantaj lingvoj, enmetiĝas en formojn, laŭregulajn por tiu ĉi vortaro».



Leon Bollack

En tiu rilato B o l l a c k sin montras antaŭulo de alia miksita aprioria-aposterioria projekto de ciferlingvo — «Numerlingue» de H i l b e, pri kiu ni jam parolis. Sed H i l b e elektas formojn kaj vortsencon precipe internaciajn, dum B o l l a c k prenas vortojn kaj ties ideojn el la plej diversaj, al li konataj lingvoj, kelkafoje eĉ el malvaste uzataj vulgaraj ĵargonoj, nur celante enmeti ĉiujn necesajn al la lingvo vortojn, en formojn, konsistantajn ne pli ol el 5 literoj. Apartaj vortoj en tiu procedo iafoje subiĝas al grandaj ŝanĝoj, ekz. bolv — bulvardo, tlaf — telegrafo, stit — konstitucio ktp.

Entute simila laŭprincipe al Bolack skiz-projekto de simpligita lingvo de miksita tipo estas indikata de C o u t u r a t kaj L e a u en ilia raporto al la Komitato de delegitaro por elekto de internacia lingvo([15]). Tiu ĉi projekto estis ellaborita de profesoro de navigado T h a ü s t en Toulon, en la j. 1889, sed ĝi neniam aperis presita kaj unuafoje estis tralegita dum la kunsidoj de la Komitato de delegitaro en oktobro de la j 1907. Tiu ĉi sistemo estas atentinda pro siaj 60 literoj. Elparoleblaj literkombinoj donas senfinan nombron da formoj (el 1 litero—58, el 2—3364, el 3—195 112 ktp.). Al la tiamaniere ricevitaj unusilabaj vortoj estas atribuata tute arbitra signifo. **Thaüst (1889)**

Kiel lastan reeĥon de la reformemaj movadoj inter la volapükistoj, ni konsideru la nefinitan projekton de A l b e r t H ö s s r i c h—«Tal». Principoj de konstruo de tiu ĉi lingvo estis priskribitaj de la aŭtoro en speciala ĵurnalo, aperinta entute en kvanto da 5 sinsekvaj numeroj[1]. La ĉefa celo de Hössrich estis atingi plejeblan mallongecon. Por tio la vortoj de lia lingvo estis ŝiritaj el diversaj lingvoj. La principon de internacieco de radikoj estis plene ignorata. Apartan malfacilaĵon prezentas la ekzisto en la alfaebto de tiu ĉi lingvo de 15 (!) vokaloj: 5 ordinaraj (a, e, i, o, u), 5 modifitaj (ä, ë, ï, ö, ü) kaj fine 5 nazaj (a, e, i, o, u—kun subsignoj identaj al tiu ĉe la franclingva «ç»). **A. Hössrich (1903)**

En la j. 1906 M a x W a l d aperigis lernolibron de sia monda «mallonglingvo» aŭ «Pan-kel», konsistanta, simile al la ĉina kaj kelkaj reformistaj projektoj, el unusilabaj vortoj[2]. **Max Wald (1906)**

La aŭtoro de Pankel, simile al F i e w e g e r, forigas la uzadon de majuskloj, eĉ por personaj nomoj. Ĉiuj ses eldonoj de lia lernolibro estis aperigitaj de la aŭtoro mem kaj estis dissendataj plejparte senpage. Kiel aspektas la lingvo, oni povas juĝi laŭ la jena frazo: «paora

---

1 «Talnovas». Monatsschritt für die Einführung und Verbreitung der allgemeinen Verkehrssprache Tal. Sonneberg, 1903—1904.

2 Max Wald, «Pan-kel—leichteste Kurzsprache für Weltverkehr». Gross-Beeren 1906; kaj aliaj eldonoj de la sama libro, ĝis la 6-a, en la j. 1920 ([47]).

oj za al nir âig jat olt nati pankelag», kio signifas: «povas esti, ke aŭdos vi jam ĉe la proksima mondekspozicio diversajn popolojn paroli la lingvon Pankel.»

E. Darde (1907)

Edgar Darde el Makejevka debutis en la jaro 1907 ĉe la kunveno de la komisiono de la Delegitaro kun sia manuskripta projekto de internacia lingvo «Logo»(15). La gramatiko de tiu ĉi sistemo prezentis per si imitaĵon de la Esperanta, sed la vortaro estis submetita al kelkaj reguloj. Laŭ la sistemo de Darde ĉiu vorto-radiko devis nepre komenciĝi kaj finiĝi per konsonanto, kaj en la limoj de la radiko post ĉiu konsonanto nepre sekvis vokalo, post tiu ree konsonanto ktp. En tiuj cirkonstancoj certe perdiĝis la ebleco konservi la internaciajn formojn por la vortoj-radikoj de la sistemo «Logo».

Jespersen (1907)

La komisiono de la Delegitaro esploris ankaŭ projekton-skizon de eklekta gramatiko, kiun proponis unu el la komisionanoj, prof. Jespersen(15). Kelkaj tezoj, logike senriproĉaj, sed fremdaj al la ekzistantaj lingvoj, de tiu ĉi skema gramatiko devigis la komisionon malakcepti la proponon de Jespersen.

La projekto de Joinville (Brazilio) (1908?)

Restis tute nekonata inter la mondlingvistoj ĝis la lasta mem tempo 44-paĝa germanlingva verketo, eldonita (kaj supozeble verkita) de Johann Welsch[1] en Joinville (S. Catharina, Brazilio). La libro lasas strangan impreson.

Mankas en ĝi iu montro de la eldonjaro. Preskaŭ duono el ĝi estas dediĉita al protokolo (sen-data) de la debatoj en «Silaklub» (volapüka Ĝielklubo) en Joinville.

Oni povas diveni, ke la libro rilatas al la 1908 j., ĉar post fondo de la «Silaklub» pasis dudek jaroj kaj ĝi estis fondita en la j. 1888. Efektive ni trovas ateston ĉe Kniele(25), ke en la j. 1888 en Joinville jena klubo estis fondita. Ankaŭ la nomon de la prezidanto de la rakontitaj en la libro debatoj — Thorman ni trovas en la j. 1889 en la listo de Brazilaj volapük-instruistoj.(34) Ĉar en postparolo de la libro estas citata la lingvosistemo Ido, aperinta en la j. 1907—08, do la j. 1908 ŝajnas ĝusta.

Post longa pritraktado — la klubo decidis provi kolektive krei novan lingvon. La dua parto de la libro donas ĝuste la «rezulton de tiu kolektiva laboro».

Vere, temas ne tiom pri la lingvo, kiom pri ĝia gramatika skizo abunde provizita per diversaj vort-ekzemploj en la nova lingvo, kiun, la postparolo de la libro mem nomas «reformita kaj reduktita «Volapük»

La sistemo posedis 13 vokalojn kaj 20 konsonantojn. Esence ĝi estas pli malperfekta kaj pli subjektiveca ol la Volapük mem. Ni citu nur jenan liston de vortoj: planeto-planet, tero-talet, Marso-malet, kometo-komet, Merkuro-mekut, Venuso-venut, Jupitro-yupit, aŭ: batojak (legu—ŝak), tranĉo—jek, piko—jik, frapo—jok.

La idea bazo de tiu projekto estis difinata per tio, ke ĝiaj aŭtoroj estis brazilaj germanoj, montrintaj certan kontraŭstaron al la latinigitaj nov-lingvo-projektoj (inter alie al Esperanto kaj Ido). Tial ili preferis vidi lingvon «absolute neŭtrala». Ne temis pri tio, ke la aŭtoroj de la nova lingvo ne sciis la lastajn progresojn en la kampo de la lingvoprojektado. Ili simple volis ignori tiujn progresojn.

La ideoj de la projektintoj evidente ne ricevis subtenon same en Brazilio, kiel en la eksterlando.

[1] J. Welsch, «Der Weg zur Weltsprache», Joinville (47).

Provon doni sistemon de science konstruita lingvo faris en la j. 1910 en Ekaterinburg V. V e n g e r o v[1].

V. Vengerov (1910)

La ĉefa principo, per kiu sin gvidis Vengerov, estas jena, per si mem traigita de la plej profunda individualismo: «nei ĉiajn tradiciojn en la nomelekto kaj ĉiufoje esprimi sian komprenon, sian internan animan mondon».

Nur post 17 jaroj, en la j. 1927, V. Vengerov aperigis plenan lernolibron de sia lingvo «OMO»[2], kiu konfirmis ĉiujn bazajn elirpunktajn erarojn de la aŭtoro.

Aldone al siaj antaŭaj proponoj, en sia lasta verko V e n g e r o v jam donas novan alfabeton kun simpligitaj literaj formoj.

La gramatikaj sistemoj de V e n g e r o v portas tre klarajn postsignojn de la gramatiko de Esperanto, sed la prenitaj el la lasta elementoj estas kripligitaj jen laŭ la formo, jen laŭ la senco aŭ signifo. La vortaro estas internacia, sed la elpensitaj kaj aprioriaj gramatikaj formoj faras apartajn vortojn kaj esprimojn malfacile aŭ tute ne rekoneblaj.

Kiel ekzemplo povas servi: n a c i o n o (anstataŭ la esperanta n a c i o), n a l e t r o (anstataŭ k a p i t a n o), a f e l e l o aŭ a f i n e l o (anstataŭ a v o).

Same en Rusio, en la j. 1911 A. K o v a l e v debutis per sia projekto de la adelfia lingvo (Lingw Adelfenzal)[3].

A. Kovalev (1911)

La projekto de K o v a l e v pretendas pli grandan sciencan perfektecon, ol Esperanto. Sed efektive, krom la forigo de la supersignitaj literoj, ĝi donas neniujn perfektigojn. El la 8 ĉefaj principoj, metitaj en la bazon ĉe la konstruo de tiu ĉi lingvo, evidentiĝas, ke la aŭtoro por la fontoj de sia lingvo prenis la lingvojn: anglan, germanan, rusan kaj francan kaj ke li celas tion, ke «ĉiu el tiuj naturaj lingvoj—trovu en la vortaro de helpa lingvo proksimume la saman kvanton da parencaj radikoj kiel la aliaj lingvoj».

Jam la sola sin gvido per tiu ĉi aprioria principo ne povas ne kripligi la vortaron de la lingvo de K o v a l e v. Kio koncernas la gramatikon, en ĝi la ĉefaj reformoj de K o v a l e v konsistas el la anstataŭo de la gramatikaj finaĵoj de Esperanto: ĉe la substantivoj — de o per a, ĉe la adjektivoj — de a per u, ĉe la adverboj — de e per o ktp.

Ekzemplaj tekstoj de tiu ĉi sistemo: dobru siera, utilu chosa, liberu denka (bona sinjoro, utila aĵo, libera penso).

En la j. 1914 A. K o v a l e v, vidante fiaskon de sia projekto, revenis al Esperanto kaj kun la sama facilanimeco provis fondi en Parizo novan framasonan ordenon de Lumporta frataro, por kies majstro li elektis sin mem.

Lingvon, celantan atingi maksimuman mallongecon kaj tiurilate estantan modifaĵo de Pankel, prezentas la projekto de A. B e u t h n e r «Manbab»[4] (Universala lingvo) kaj «Mangif» (Universala skribo).

A. Beuthner (1912)

En la j.j. 1912—1913 D-ro N. N e s m e j a n o v en Moskvo laboris pri la projekto de internacia lingvo «Viva»[5]. En la j. 1913 en

N. Nesmejanov (1913)

[1] V. I. Vengerov. «Projekt naučnago i mejdunarodnago jazyka, predlojennyj na rassmotrenije razliĉnym po specialnosti obŝĉestvam, uĉrejdenijam i ediniĉnym dejateljam», Ekaterinburg, 1910.

[2] V. I. Vengerov, «OMO — jazyk ĉeloveka. Uĉebnik vsemirnogo jazyka». Sverdlovsk, 1927.

[3] A. Kovalev, «Samouĉitelj Mejdunarodnago Nauĉnago Jazyka», Rostov na Donu, 1911.

[4] A. Beuthner, «Neue praktische Weltsprache Manbab und Weltschrift Mangif», Markneukirchen, 1912.

[5] N. A. Nesmejanov, «Mejdunarodnyj jazyk i motivirovannaja grammatika jazyka «Viva». — Internac ling i motivriv gramt linga «Viva», Moskva, 1913.

propra eldono de la aŭtoro aperis tre solida verko, dediĉita al la nova lingvo. Samtempe estis tradukitaj kaj preparataj al preso la samaj libroj en la franca, germana kaj angla lingvoj. N. Nesmejanov sin preparis defendi sian projekton ĉe la X. internacia kongreso de Esperanto, kiu devis okazi en aŭgusto de la j. 1914 en Parizo. Tamen la neatendita morto de N. Nesmejanov, trafinta lin antaŭ la finpreso de liaj alilingvaj eldonaĵoj, ĉesigis la pluan prilaboron kaj propagandon de tiu ĉi sistemo. La alilingva tipografia kompostaĵo estis disegita kaj la libroj ne aperis presitaj. En nia dispono konserviĝis nur la presprovaj folioj de la unuaj 10—15 presfolioj de ĉiu el la nomitaj kompostaĵoj.


Insigno de Viva

En sia libro D-ro N. Nesmejanov submetis al ĉiuflanka analizo kelkajn sistemojn kaj projektojn de universala lingvo, komencante de Volapük kaj transirante al Esperanto, Ido k. a.

La premisoj, starigitaj de Nesmejanov en la fundamenton de la konstruata lingvo, estas jenaj: 1. en ĉiuj okazoj la prefero estas donata al la vortoj de anglolingva deveno, 2. ĉiuj vortoj estas prenataj en la plej mallongaj formoj aŭ en formoj, arbitre mallongigataj de la aŭtoro de Viva. Tiuj du premisoj estas tute sufiĉaj por kripligi la internaciajn vortojn, por fari la lingvon malfacile komprenebla kaj malfacile elparolebla.

Ekzemplo: «Antik tempos do nat Homera livd hirt boy, ki pasturd so shafs on gras pasturs Parnasa. (En antikva tempo antaŭ la naskiĝo de Homero vivis knabo-paŝtisto, kiu paŝtis siajn ŝafojn sur la herbokovritaj paŝtejoj de Parnaso.)»

W. Beatty (1922)

Usonano W. Beatty en la j. 1922 en Washington eldonis detale ellaboritan sistemon de nova internacia lingvo «Qôsmiani»[1]. Rilate la vortaran materialon li celis konservi maksimumon de internacieco, sed kelkaj arbitraj gramatikaj tezoj nuligis ĉi tiun intencon.

Alfabeto de la lingvo konsistas el 40 literoj, por kelkaj el kiuj estas bezonaj specialaj signoj, kiujn posedas neniu presejo. La gradoj de komparo estas kvin, la verbaj finiĝoj entute — 81. La aspekto de la lingvo estas jena: «Me pensip qwin Mundlingwistes devip aprocoq proqsimeruq en proqsimeruq ar ecalines vicer recesop disteruq en disteruq abur ecalines sen inquna»...

En la j. 1926 Beatty simpligas la maloportunan alfabeton de sia sistemo kaj faras provon propagandi ĝin per gazeteto «Cosmian Bulletin».

Kunstovny (1927)

En novembro 1927 D-ro T. Kunstovny el Praha (Ĉeĥoslovakio), partopreninta kiel gasto la 10-jaran datrevenon de la Oktobra Revolucio en Moskvo, transdonis al la Societo por Kultur-rilatoj inter Sovet-Unio kaj alilando germanlingve verkitan projekton de internacia lingvo sub la titolo «Servasprache».

En la j. 1928 la aŭtoro eldonis tiun verkon. La vortaro estas ĝenerale prenita el la latina lingvo. La aŭtoro fiksas neniujn regulojn

---

[1] Wilbur M. Law Beatty, «Qôsmiani — The new international language», Washington, 1922.

ortografiajn. La tuta gramatiko estas fakte limigita per uzo de la multnombra finiĝo s. Sed el la manuskripto (47) videbliĝas, ke en realeco la sistemo estas tre arbitra kaj kompare kun la aliaj modernaj lingvosistemoj tre nesupera. Tion montru la ekzempla frazo: «Esploreiter desir selne yun tigr kel li ya bringe dai Indie».

**Finkonkludo pri la aprioriaj sistemoj**

Ni povus citi ankoraŭ pluan sufiĉe longan liston de certaj kaj necertaj aŭtoroj kaj projektoj mondlingvaj, pri kiuj ni eĉ ne scius, al kiu speco de la sistemoj ili apartenas.

Tiel ekzemple P. S t o j a n (40) citas proponojn, skizojn kaj projektojn: Le Median (A. Huart-Cannes, 1909), Homapar (Fazekas el Gyor, Hungario, 1913), Uropa (W. Donisthorpe, Guildford, 1913), bazita sur la latina vortaro kaj kun apriorie-filozofia vortaro; Parlamento (Perrier el Simier, 1918), Tersboca (M. Rothes, Zürich, 1912), Lips-Kith (J. Scarisbrick, London, 1919), Geoglott (J. Dononghue el Boston, 1916), IALA (W. C. Spratt, Jersey, 1924), OM (L. Vulda, Calcutta, 1925), Lingua Nazionale della Terra (S. Consoli, Catania, 1925) k. a.

Sed ni ne citos plu tiujn manuskriptajn projektojn, kiuj dum lastaj jaroj venis al niaj manoj. Ni eĉ strekis for el tiu eldono pluajn informojn pri diversaj bagatelaj provoj kaj projektoj, kiuj troviĝis en pli fruaj eldonoj de tiu ĉi verko. Ĉe registrado de similaj verkoj temas ne tiom pri scienca historia analizo, kiom pri amatora kolektado de artefaritaj lingvo-produktoj, kiujn fabriki el sia cerbo povas ĉiu deziranto. Ni lasas registron de ĉi-ĉiuj projektoj, provoj kaj skizoj, ĉar en la epoko, dum kiu ili aperis, la mondlingva movado jam estis tiel alten evoluinta, ke ĉio pli grava, ĉio pli interesa efektiviĝis ne en la verkaĵoj de izolulojoj, persiste konservantaj siajn individualismajn utopiistajn konceptojn, sed en certaj grupiĝoj de la mondlingvanoj,— pri kiuj ni parolos en sekvontaj ĉapitroj. Venis jam tempo, kiam oni povis ankoraŭ paroli pri iu ebla ŝanĝo kaj modifo en la progresintaj mondolingvo-sistemoj, sed kiam oni jam ne povis sur tiu kampo krei ion memstaran, originalan, ignorante la sperton de la pli fruaj projektoj.

Post tiuj niaj vortoj, — ŝajnas, ke ne estas necese longe esplori la kaŭzojn de la malsukceso de ĉiuj ĉi sistemoj arbitraj.

La sistemoj pazigrafiaj, projektitaj en la XX. jarcento, estis neniomgrade aŭ malmultagrade pli perfektaj ol la pazigrafioj el la XVII. jarcento. Sed — en la XX. jarcento fervoja, aŭtomobila, aera, telefona trafiko konstante kreskigis la internaciajn senpere — personajn rilatojn. Do la pazigrafiaj projektoj ankoraŭ malpli ol en la jarcento XVII. povis pretendi, ke ili sukcese plenumu la rolon de universala internacia interkomunikilo.

Koncerne la projektojn aprioriajn kaj miksitajn, kiuj estis parte ĉu pli bonaj, ĉu pli malbonaj ol Volapük, — ni devas konstati, ke ĉiuj ili estis arbitraj, individue kreitaj kaj tial ĉe plua sia evoluo plene dependaj de iu aparta individuo, de liaj bontrovoj kaj preferoj. Tiuj projektoj ne havis eblon esti akceptitaj kaj kreskigitaj per kolektiva uzado

Vere pluraj el la projektistoj revis pri kreo de iu aŭtoritata internacia institucio, kiu formigus detalojn de la lingvo-konstruo kaj reguligus ĝian evoluon, — sed tiuj revoj estis efemeraj. Antaŭ ol estu kreota simila aŭtoritata institucio necesis, ke la lingvoprojekto montriĝu praktike uzebla, montru sian evoluopovon.

La arbitreco de la aprioriaj kaj miksitaj sistemoj, la esence fantazia utopiismo de iliaj projektantoj — antaŭdestinis, ke adaptiĝi al libera evoluo, sen iu speciala reguligo libere evolui — kiel evoluas la naciaj lingvoj, tiuj projektoj ne povis. Tial ili ĉiuj devis fiaski.

## IX

## PROJEKTOJ DE UNIVERSALIGO, KOREKTADO KAJ REFORMADO DE LA LITERATURAJ LINGVOJ, MORTAJ KAJ VIVANTAJ (1880—1930)

La mondolingvo povas esti nur reala vivanta lingvo, kaj sekve povos triumfi nur per la superrego de tutmonda imperio... Lingvo ne povas esti fabrikata de unu homo.

Wilhelm Wundt (1832—1920).

En la nuntempa grand-imperialisma epoko la eventuala solvo de la problemo pri la universala internacia lingvo estas influata de du konsiderindaj faktoroj. La unua estas tute natura kontraŭstaro de ĉiu nacio al akcepto de iu fremdlingvo, lingvo de iu alia nacio por la rolo de la lingvo internacia, universale — deviga. La dua estas tendenco de la grandŝtatoj imperialismaj trudi sian lingvon, kiel destinitan por internacia uzo kaj adaptiĝo.

La samaj tendencoj antaŭenpuŝi uzadon de sia propra lingvo kaŭzis, ke la plejmulto el la scienculoj de la kapitalisma epoko, obeaj al la ĝeneralaj gvidideoj de la tempo, rilatis negative al ĉiuj provoj krei iun artefaritan lingvon, eĉ ne farante iujn specialajn profundajn esplorojn kaj ne kontrolante faktojn en la kampo de la mondolingvo-projektado.

Ĉe tia traktado de la problemo fariĝas kompreneble, kial post la j. 1880 komencis rapide plikreski la nombro de la proponoj, neantaj eblon krei kaj adopti iun artefaritan lingvon, kaj proponantaj por tiu rolo iun lingvon naturan, ĉu korektitan, reformitan, ĉu tute senŝanĝan.

Apud la projektoj, traktantaj pri akcepto de la lingvo de iu ekzistanta ŝtato kaj nacio, ni speciale menciu la projektojn pli idealismajn, kiuj rekomendis la akcepton de la latina aŭ la greka lingvo.

### LINGVOJ MORTAJ

Kelkaj pensuloj kaj scienculoj, konsiderante, ke universala lingvo povus esti nur lingvo neŭtrala, t. e. ne apartenanta al iu el la nuntempaj popoloj, venis al ideo utiligi por tiu rolo iun el la mortintaj lingvoj de malaperintaj popoloj.

P. S t o j a n (40) donas tutan liston el 70 verkoj, en pli aŭ malpli granda grado rilatantaj al tiu ĉi problemo.

Unuj proponis akcepti por la rolo de la universala lingvo—lingvon latinan aŭ antikvan grekan lingvon, grandaparte influintaj la modernajn kulturlingvojn kaj la modernajn sciencajn terminarojn.

Aliaj, komprenante ke la antikvaj lingvoj ne posedas vortojn por moderna vivbezonaro, opiniis necesa enkondukon en respektiva lingvo

de novaj terminoj, akomodinte al ili la tutan strukturon de la lingvo. De tio restis nur unu paŝo por konfesi la neceson provizore plibonigi la respektivan antikvan lingvon, antaŭ ol revivigi ĝin. Kaj tiun konfeson oni fakte faris.

Jam en la j. 1867 Le Hir komencis propagandi lingvon latinan, kiel internacian helpan lingvon[1], proponante fari kelkajn aranĝojn, faciligantajn ties lernadon.

R. Poincaré k. a.(1880)

Tute forgesita nuntempe estas projekto de lingvo internacia, konstruita sur la bazo de antikva greka lingvo, kies kunaŭtoro estas Raymond Poincaré, la nuna gvidanto de franca konservative-reakcia politiko. Pri tiu ĉi projekto rememorigis preskaŭ samtempe pariza gazeto «Opinion» kaj pariza korespondanto de «Berliner Tageblatt» (en januaro de 1927[2]). La ekzakta eldonjaro de la projekto ne estas indikita, sed laŭ la noto en la berlina gazeto, la libro aperis en Nancy post la naskiĝo de Volapük (1879) kaj antaŭ la eldono de la unuaj lernolibroj de Esperanto (1887). P. Stojan(40) montras kiel supozeblan (?) jaron de la publikigo de tiu libro — la 1879.

La gazeto citas plenan titolon de la libro[3] kaj komunikas kuriozajn sciigojn, ke, estante demandita en la fino de la j. 1926, R. Poincaré, unue kategorie neis sian partoprenon en la projekto. Nur antaŭokuligita broŝuro devigis lin rememori la revon de lia juneco. Ke tiu revo estis de li bone forgesita, atestas la fakto, ke ĝuste en la j. 1922, kiam li prezidis la francan ministraron, la registaro dekretis kelkajn malpermesojn, rilatantajn la disvastigon kaj propagandon de Esperanto.

Simpligita antikva greka lingvo

En la tempo mem de sukcesoj de Volapük, en la j. 1885 Iván Télfy proponis al la Hungara Akademio de sciencoj restarigi la grekan lingvon kiel lingvon internacian[4]. En la j. 1888, ankaŭ en Germanio aperas propagandistoj de la ideo akcepti por la rolo de internacia lingvo simpligitan kaj reguligitan lingvon de la antikvaj grekoj. Inter la aprobantoj de tiu ĉi ideo troviĝis interalie fama helenisto August Boltz[5], Joh. Flach kaj L. Kuhlenbeck(40).

La Grasserie (1907)

La Grasserie en la j. 1892 eldonis specialan traktaĵon, tuŝantan la problemon de kreo de internacia lingvo el antikvo-greka vortara materialo, kun aldonita raciigita kaj korektita gramatiko[6]. Post 15 jaroj, en la j. 1907 La Grasserie presigis, sub nomo «Apoléma», detale ellaboritan projekton de reformita greka lingvo[7], kiu en la sama j. 1907 estis pridiskutita en la Komitato de la Delegacio por elekto de internacia lingvo.

La vortoj de la lingvo «Apoléma» estas formataj el greklingvaj elementoj, penetrintaj en teknikajn kaj fakajn terminarojn de modernaj lingvoj, ekz. anthrop (renkontebla en la vortoj: filantropio, mizantropio) = homo, hipp (en la vortoj hipopotamo, hipodromo) = ĉevalo ktp. Simila lingvo povus esti ĝis certa grado komprenata de helenistoj, sed nur de ili. Ordinara homo en la plejmulto de greklingvaj

---

1 L. Le Hir, «Langue auxiliare universelle letrée ou voulgaire, la langue latine seule pouvant convenir comme langue auxiliare universelle», Saint Pol de Léon, 1867; 2-a eldono — Paris, 1878.

2 Vidu: «Esperanto-Praktiko», Berlin, 1927, n-o 2, pĝ. 41.

3 «L'ixesoire» par Paul Brouchot, Lucien et Raymond Poincaré, Chauquet en Nancy; v. noton de Gaston Philip en «Les Annales Polit. et Litt», Paris, 1913.

4 «Schola et Vita», Milano, 1928, n-oj 9—10, pĝ. 297.

5 Aug. Boltz, «Hellenisch, die allgemeine Gelehrtensprache der Zukunft», Berlin-Leipzig, 1888 (48).

6 La Grasserie, «De la possibilité et des conditions d'une langue internationale», Paris, 1892.

7 La Grasserie, «Langue internationale pacifiste ou Apoléma», Paris, 1907 (47).

terminoj, renkontataj en modernaj lingvoj, neniam rekonos nek konjektos ilian primarian sencosignifon.

**Simpligita lingvo latina**

Ĉe la elekto de iu antikva klasika lingvo por la rolo de internacia, oni certe devus preferi ne la grekan, sed latinan, kies vortoj estas pli internaciaj kaj pli multe konataj.

Detalan liston de koncernaj proponoj, faritaj per apartaj libroj aŭ en gazetartikoloj, donas P. Stojan(40) kaj Couturat kun Leau(8).

La prefero, donata al la antikva latina lingvo, estis natura reago kontraŭ la treega artefariteco kaj nenatureco de Volapük. Tre karakteriza en tiu ĉi rilato estas la ekzemplo de G. Hendersson, aŭtoro de tri aposterioriaj projektoj, kiu perdinte por iu tempo kredon je triumfo de artefaritaj lingvoj, dediĉis sian tutan energion al propagando de lingvo latina, kaj por tiu celo komencis en la j. 1890 eldoni specialan ĵurnalon «Phoenix seu Nuntius latinus internationalis» (London).


D-ro Raoul de la Grasseri

Sed ankaŭ inter la simpatiantoj de la lingvo latina estis multaj malkonkordaĵoj. Kelkaj el ili deziris vidi revivigita la klasikan latinan lingvon. Aliaj deziris vidi ĝin modernigita kaj kompletigita per mankantaj vortoj. La unuaj celis ion, praktike neefektivigeblan. La aliaj malgraŭvole stariĝis sur la vojon de novigo kaj reformado. La ĵurnalo de Hendersson ekzistis mallongan tempon (1890—92), sed ankaŭ post li estas renkonteblaj provoj krei periodajn eldonojn, dediĉitajn al lernado, praktikado kaj propagando de lingvo latina(8).

La enhavo de tiuj ĵurnaloj plej bone ilustras la neeblecon akomodi la antikvan latinan lingvon en ĝia nereformita stato por la bezonoj de internacia vivo. La tradukoj de internacia termino «generalo» per «militum tribunus», kaj de «miliono» per «decies centena miliis» (dek centoj da miloj) — estas neniel akcepteblaj por la moderna eŭropano kaj por moderna vivo.

Tiakaŭze la plejmulto el adeptoj de la latina lingvo konsideris necesa fari en ĝi tiujn aŭ aliajn reformojn, aldonojn kaj simpligojn, antaŭ ol ĝi rajtos pretendi la rolon de internacia helpa lingvo.

**F. Isly (1901)**

Unua tiaspeca projekto de reformita latina lingvo estis proponita de F. Isly en la j. 1901[1].

Isly celis la taskon, konservinte la fundamentajn trajtojn de la lingvo latina, forigi ĝiajn malfacilaĵojn. La solvo de tiu ĉi tasko koncentriĝis en konservo de la latina vortaro kaj en anstataŭo de komplika latina gramatiko per simpligita, kun triforma deklinacio por la tri genroj, kun unu formo de konjugacio ktp(8).

---

[1] Fred Ilsy, «Langue Ilsy (Linguum islianum). Projet de langue internationale», Paris, 1901.

Alia analogia projekto, unu jaron poste, estis publikigita de K. F r o e l i c h en Wien[1]. Ankaŭ en tiu ĉi projekto ĉio koncentriĝis en la simpligo de la gramatiko. La substantivoj havas nur du genrojn: v i r a n por viroj, popoloj, riveroj, ventoj kaj monatoj kaj i n a n por virinoj, arboj, urboj, landoj kaj insuloj. La deklinacio estas formata per prepozicioj. K. Froelich (1902)

Ni havas informojn ankaŭ pri alia samtempa projekto de universala latina lingvo, de E. F r a n d s e n, kiu estis eldonita en Wien[2]. Ankoraŭ pli frue en la j. 1901 en siaj verkoj F r a n d s e n propagandis la ideon de simpligita latina lingvo(40). E. Frandsen (1902)

Enhavoriĉan verkon, tuŝantan la problemon de la ebla utiligo de latina lingvo por la rolo de lingvo internacia, eldonis en la j. 1903 C h. A n d r é[3]. En sia libro A n d r é sumigas la tutan movadon, donas indekson de la tuta literaturo, aperigita pri la problemo kaj kvazaŭ preparas grundon por pluaj laboroj en la reformado de latina lingvo, kiu en postaj jaroj estis efektivigata de la restintaro de la iama Volapüka akademio — «Academia pro interlingua». Ch. André (1903)

Provencano Chillet el Cannes (Francio) sin kaŝinta sub pseŭdonimo de D-ro C o l o m b o, rekomendis en la jaro 1904 por universala uzo apartan komercan latinan lingvon [4]. La aŭtoro asertis, ke tiu ĉi lingvo estis de li konstruita laŭ la trovitaĵoj, elfositaj en la ruinoj de Pompei, kaj ke ĝuste per tiu lingvo parolis la romaj legionanoj, konkerante la mondon. Colombo (1904)

En la jaro 1903 konata itala profesoro de matematiko G. P e a n o donis teorion de sia «Latino sine flexione»[5], en kiu ne ekzistas gramatiko, kies vortaro laŭ ebleco estas preskaŭ tute latindevena kaj kies gramatikaj fleksioj estas anstataŭitaj per vortordo en la propozicio. En la jaro 1904 li aperigis sian komparan vortaron de internacia latino[6]. P e a n o argumentas per tio, ke nuntempe jam ekzistas sufiĉa nombro da vortoj komunaj por ĉiuj civilizitaj popoloj de la mondo, kiuj povus servi kiel fundamento por formigo de la tuthomara lingvo. G. Peano (1903—1904)

Philosophia, logica, mathematica, geometria, republica, moneta, calendario, algebra, cifra — estas la vortoj, transirintaj el la antikvaj lingvoj en ĉiujn modernajn lingvojn de Eŭropo. La ĉefan diferencon inter la lingvoj prezentas gramatikaj reguloj. Gramatiko, tiurilate, estas ne nur malmulte utila, sed, laŭ vidpunkto de P e a n o, eĉ tute malutila. Oni ja povas skribi ajnan frazon sen apliko de gramatikaj reguloj kaj fleksioj.

Fakte, P e a n o kaj liaj samideanoj, uzante tiun ĉi sistemon, verkis en ĝi kelkajn sciencajn, precipe matematikajn verkojn, kiuj sin montris, dank' al la komprenebleco de siaj terminoj, kompreneblaj ĉe la unua vido al ĉiu klera homo, konanta la nomitajn terminojn.

Kiel ekzemplon ni donu jenan citaĵon el la modernigita latino:

«Problema de lingua internationale es proximo ad solutione. Lingua definito per maximo de internationalitate, non es lingua artificiale;

---

[1] Karl Froelich, «Grammatik der Weltsprache. Reform-Latein, I. Teil, Formenlehre», Wien, 1902.

[2] Eduard Frandsen, «Grammatik des Universal-Latein (Neu-Latein), I. Teil (Formenlehre)», Wien, 1902.

[3] Ch. André, «Le latin et la probl`me de la langue internationale», Paris,1903 (47);

[4] D-r Colombo, «Latino Commerciale», Paris, 1904; ankaŭ vidu la gazeton «Esperanto», Dijon, 1905, n-o 10, artikolo de Ch. Lambert, «Simpligita Latino» kaj «Academia pro Interlingua», Torino, 1926, n-o 4, pĝ. 75 (47).


[5] Vidu artikolon de G. Peano «De Latino sine flexione» en «La Revue de Mathematiques», t. VIII, a. 1903.

[6] G. Peano, «Vocabulario de latino internationale comparato cum A. F. G. H. R. G. S.», Torino, 1904 (47).

suos elementos es plus diffuso et plus naturale, que in omni lingua natio nale».

(La problemo de internacia lingvo estas proksima al solvo. Lingvo, difinita per maksimumo de internacieco, ne estas lingvo artefarita; ĝiaj elementoj estas pli disvastigitaj kaj pli naturaj ol en ĉiuj naciaj lingvoj).

Sed se estas facile legi kaj kompreni la sistemon de P e a n o, estas nekompareble pli malfacile paroli kaj des pli skribi en la lingvo sen gramatiko kaj fleksioj. Senfina nombro da esceptoj, foresto de la firmaj reguloj, varieco de la ortografio — ĉiuj mankoj de la latina lingvo kaj de ĉiuj elemente evoluintaj naciaj lingvoj—estas granda obstaklo por ellerno de tiu ĉi lingvo.



Prof. G. Peano

Tiu ĉi revivigo de la aristokrateca mezepoka latina lingvo en nia XX-a jarcento devas vere sin mon tri ago egale maltaŭga kaj rekcia.

Kaj efektive la sistemo de P e a n o kaj al ĝi similaj havas tre limigitan nombron da adeptoj el la medio de sekaj scienculoj latinistoj, katolikaj pastroj ktp. Por la vastaj popolamasoj, kiuj bezonas teknike pli perfektan kaj laŭeble mekanikigitan interkomprenilon, la nereguligitaj formoj de la arkaika latino estas malakceptindaj kaj esence fremdaj.

SIMPLIGITAJ VIVANTAJ LINGVOJ

Nun ni venu al la projektoj adoptigi por internacia mondskala uzado iun el la lingvoj naciaj. Tiaj projektoj, kiel ni jam montris respegulis esence imperialisman ideologion. Tial, almenaŭ principe, ili povis esperi, ke pro la klaspolitika vidpunkto de imperialismo ili estos traktataj pli favore — ol la projektoj aliaj. Tamen tiu atendata oficiala favoro estis en ĉiu koncerna ŝtato des pli granda, ju pli malgrandaj estis la reformoj kaj ŝanĝoj, proponataj por tiu ŝtatlingvo.

A. Starĉevskij (1889) Ni komencu p r esploro de la projektoj,iom similaj al la ĵus priskribitaj sistemoj de simpligitaj mortintaj lingvoj. Ili estas simpligitaj sistemoj de lingvoj vivantaj, kaj la plej karakteriza sistemo de la simpligo estas «simpligita angla lingvo» de A. V. S t a r ĉ e v s k i j[1].

Gramatikon de ĉiu lingvo oni povas simpligi ĝis tre signifanta grado. Oni povas forigi multajn esceptojn el ĝeneralaj reguloj. Anstataŭ kelkaj formoj de deklinacio kaj konjugacio oni povas restigi nur unu formon, akomodinte al ĝi la konservitajn radikojn de la lingvo. Oni povas simpligi ortografion, enkondukinte konkordiĝon inter la skribo kaj elparolado. Sed tio tre kripligos, ŝanĝos la formojn de ĉiu lingvo kaj tiu reformita lingvo fariĝos preskaŭ ne rekonebla kaj tamen ĝi konservos kelkajn aliajn organismajn mankojn.

---

[1] A. F. Starĉevskij, «Nastojaŝĉij (ĵivoj) vsemirnyj jazyk», Peterburg, 1889 (47) kaj la germanlingva eldono: E. Startschewsky, «Die wahre (lebende) Weltsprache, autorisierte Uebersetzung von Mieskowski», St. Petersburg, 1890 (45).

S t a r ĉ e v s k i j unuavice simpligis la anglan ortografion kaj. por tio komplikigis la alfabeton, enkondukinte novajn literojn î kaj á En la sufiĉe simplan anglan gramatikon li ne bezonis enkonduki iujn gravajn ŝanĝojn, krom kelkaj reguloj pli ĝustigantaj ĝin. Sed kio estis la rezulto de tiuj ŝanĝoj ni povas vidi el du jenaj, tute samaj tekstoj el Thackeray: unua en la natura angla kaj la dua en la «vera simpligita internacia» lingvo de S t a r ĉ e v s k i j:

a) «G o l d s m i t h's f a t h e r w a s n o d o u b t t h e g o o d. D o c t o r P r i m r o s e, w h o m w e a l l o f u s k n o w. S w i f t w a s y e t a l i v e, w h e n t h e l i t t l e O l i v e r w a s b o r n a t P a l l a s, o r P a l l a s m o r e i n t h e c o u n- t y o f L o n g f o r d i n I r e l a n d».

b) «G o l d s m i t h's f a t h e r w o z n o d a u t t h e g u d. D o c t o r P r i m r o z, h u m w i o l l o f o s n o w. S w i f t w o z î e t a l i v, w e n t h i l i t t l O l i v e r w o z b o r n a t P a l l a s o r P a l l a s m e r, i n t h i c a u n t i o f L o n g f o r d i n I r l a n d».

S t a r ĉ e v s k i j ne sukcesis fari la anglan lingvon facile lernebla kaj komprenebla. La malfacilaĵoj de la angla elparolo ekzistas ankaŭ en lia projekto: la samaj literoj ĉe diversaj kombinoj sonas malsame, estas konservitaj la duoblaj konsonantoj ktp.

Aliflanke, la angla lingvo en la transformo de S t a r ĉ e v s k i j fariĝas nekomprenebla eĉ por angloj. Ĝi estas memstara lingva sistemo, postulanta apartan ellernadon.

**Aliaj projektoj por korekto de la angla lingvo (1888—1891)**

Preskaŭ samtempe al S t a r ĉ e v s k i j aperis alia projekto de reformita angla lingvo, farita de A. M. B e l l[1].

Rimarkindan flankon de tiu ĉi projekto prezentas tio, ke por simpligo de la angla lingvo B e l l proponas akomodi la ortografion al prononcado. Praktike tio kondukus al perdo de internacia aspekto ĉe tiuj vortoj, kies prononcado en la angla estas tute malsama al la internacia, ekz. ĉe la vortoj: n a t u r e, i n t e r n a t i o n a l ktp. Kreon de tiuj projektoj, celantaj raciigon de la naturaj lingvoj kaj akcelantaj izoligon de la ekzistantaj lingvoj, ni devas nomi, eĉ ne konsiderante ilian imperialisman esencon — de nura lingva vidpunkto — ago nepre reakcia kaj haltiganta la tendencojn de plua evoluo de la lingvoj al interanaciiĝo.

Kiel antaŭprepara etapo por B e l l en la prilaboro de tiu ĉi projekto estis ellaborita de li, en la j. 1865, projekto de alfabeto, konsistanta el 34 literoj, akomodita por la transskribo de ĉiuj lingvoj kaj unuavice la lingvo angla[2]. Tiu ĉi projekto altiris al si siatempe sufiĉan atenton kaj estis eĉ prezentita por esploro al la Brita registaro.

Ni havas ankoraŭ informojn pri alia samspeca projekto de komerca lingvo, farita de H. H a l e kaj rilatanta al la jaro 1890[3]. Pli postan verkon de la sama aŭtoro[4] citas H u g o S c h u c h a r d t[5]. S c h u c h a r d t analogiigas tiun lingvon al la angla ĵargono, uzata ĉe la interrilatoj de blankuloj kaj indiĝenoj en Kolumbio. Tiun eldonaĵon citas ankaŭ C o u t u r a t kaj L e a u(8). H. H a l e pli poste eniris la komisionon, esplorantan la problemon de internacia lingvo,

---

[1] A. M. Bell, «World English the Universal language», London, 1888.

[2] Alexander Melville-Bell, «Visible speech a new fact demonstrated», London and Edinburgh, 1865 (48).

[3] H. Hale, «An international Language», London, 1890.

[4] H. Hale, «An international idiom, a Manual or the Oregon Trade Language», London, 1894.


[5] Hugo Schuchardt, «Weltsprache und Weltsprachen», Strassburg, 1894 (45).

kiu estis starigita en la j. 1891 de la Amerika Societo por akcelado de sciencoj.

P. E. Stojan(40) notas tre koncize, ne donante ĉiujn detalojn, la verkon pri «kolonia lingvo» de Lentzer[1].

**E. Molee (1888—1904)**

Kiomgrade reakciaj kaj kontraŭaj al la internaciisma principo povas fariĝi la tendencoj en la fako de la prilaboro de artefarita lingvo— tion ilustras la ideoj de norvego-usonano Elias Molee. En la j. 1888 Molee faris skizan planon por tutamerika lingvo kun anglo-germana bazo[2]. Post 15 jaroj li publikigis detale prilaboritan sistemon de la lingvo «Tutonish»[3]. La celo de la lasta estis akceli reunuiĝon de la germanrasaj popoloj. Laŭ la penso de l' aŭtoro, aparta diplomatia konferenco de koncernaj registaroj devus akcepti tiun intergermanan lingvon. Molee intence limigas la rolon de universala lingvo kaj estas ema transformi ĝin je simpla ilo por hegemonio de unu nacio, aŭ nacigrupo. Li eĉ estis deziranta renkonti la aperon de analogia interlatinida lingvo, kondiĉe, ke tio ne ĝenu la popolojn anglo-germanajn.



Elias Molee

Kiel ĉefa materialo por la projekto «Tutonish» servis lingvo angla, sed kun granda almikso de elementoj prenitaj el lingvo germana. Por ilustri la aspekton de tiu ĉi perfektigita miksita lingvo, ni prenu la frazon: «dis sprak must bi so rein tutonish as mogli» (tiu ĉi lingvo devas esti tiom pure teŭtona, kiom eble).

Pli malfrue en la j. 1911, 1915 ktp. E. Molee(40) daŭrigis publikigadon de similaj projektoj, atribuante al ili ĉiufoje novan nomon.

**Pluaj reformprojektoj de la angla lingvo (1910—1930)**

En la j. 1913 la periodan ĵurnalaron de la tuta mondo trakuris sciigo, ke profesoro Brandley, tradukisto de la emeritula oficejo de Usono, eltrovis novan universalan lingvon[4].

Fakte tamen la koncerna propono estis publikigita jam en la j. 1910. La aŭtoro proponis akcepton de la angla lingvo kun simpligita fonetika alfabeto por la rolo de la lingvo universala.

Ni havas informojn pri plua analogia projekto de simpligita angla lingvo, kiun faris princo (?) Immanuil de Jerusalemo[5]. Esence, la projekto estas nur korekto de la angla ortografio, ne pli. Tamen la aŭtoro, celante la precizan transdonon de la sonoj per konformaj literoj, tiomgrade komplikigis la alfabeton de la angla lingvo, enkodukis tioman amason da novaj literoj kaj signoj, ke li eĉ ne havis eblecon eldoni sian libron per tipografia preso. La eldono de la prospekto-broŝuro, dediĉita al tiu projekto, aperis en Kairo litografiita.

---

[1] Lentzer, «Colonial English», London, 1891.

[2] Elias Molee, «Plea for an american language, or Germanic-English», Chicago, 1888.

[3] «Tutonish or anglo-german union tongue», Chicago, 1902; de la sama: «Tutonish — a teutonic international language», Tacoma, 1904.

[4] F. Braendle, «World-English — a new worldlanguage», Washington, 1910.

[5] Pr. Immanuil of Jerusalem, «Universal — the universal language», Cairo (1914?).

Al la sama ideo fari simpligitan anglan lingvon kun korektitaj gramatiko kaj ortografio — internacia interkomunikilo, venis en la j. 1924 usonano J. W. Hamilton[1]. Hamilton, simpligante la anglan skribon kaj akomodante ĝin al la formoj de viva parolo, esperis fari la anglan lingvon pli facile lernebla por la alilanduloj.

Spite al tio, ĝuste la angla ortografio (esence tre internacia) estas pli facile lernebla por la ceteraj eŭropanoj, ol la angla prononcado. Se oni povus reformi ne la ortografion, sed prononcadon de la angla lingvo, oni ricevus ion pli akcepteblan. Sed la lasta estas same neebla, kiel neeble estas, ke la ceteraj popoloj bone posedu la kripligitan anglan elparoladon.

En la jaro 1929 Berlina taggazeto «B. Z. am Mittag»[2] presigis sciigon pri nova mondlingva projekto «Panoptic English» de Prof. C. K. Ogden en London. Detaloj pri tiu ĉi projekto aperis en revuo «Psyche». Laŭ la sciigo «Panoptic English» estas konstruita sur scienca bazo kaj entenas nur 500 vortojn.

Similaj projektoj rapide ekfloras kaj same rapide malaperas. Supozeble, se ĉiu el la aŭtoroj konus sorton de siaj antaŭirintoj, ili multfoje pli serioze pripensus siajn agojn.

Ĉiuokaze ni havas tute freŝdatan projekton Anglic el la sama peco de profesoro de Uppsala Universitato R. E. Zachrisson. sLa ĉefa esenco de Anglic estas simpligita ortografio: anstata heigt—heit, buy—bie, Friday—Friedae. La sistemo ricevis vastan propagandon en Svedio. Kurso de Anglic en la j. 1930 estis presata en la gazeto «Stockholms Dagblad». Estas interese noti, ke la anglaj konservativaj scienculoj esprimis sian simpation al tiu projekto kaj ĉiuokaze deklaris, ke la sukceso de Anglic estas preferebla al sukceso de Esperanto[3].

Apud la projektoj reformi la anglan, tiun nacian lingvon, kiu pleje pretendas pri la pozicio de la mondlingvo, ne mankis ankaŭ reformaj projektoj de aliaj lingvoj.

**S. Bernard (1888)**

Projekton de simpligo de la lingvo itala, sub nomo «Lingua franca nuova», donis en la j. 1888 S. Bernard en Wien[4]. Tiu ĉi projekto, nesufiĉe decide forigas la difektojn, troviĝantajn en la itala lingvo. En la gramatiko estas konservitaj multaj neregulaj formoj kaj esceptoj. Kelkaj literoj laŭ la cirkonstancoj estas malsame prononcataj.

Ĉio notita malfaciligas la lernadon de la lingvo kaj senvalorigas ĝiajn realajn avantaĝojn(8).

**Reformita hispana lingvo**

Ni citu ankaŭ kelkajn projektojn reformi kaj perfektigi la lingvon hispanan. Unuan similan sistemon «Nuove-Roman» konstruis en la jaro 1897 profesoro J. Puchner[5]. La tuta tiu ĉi projekto prezentas per si nur ialoke korektitan hispanan lingvon, malgraŭ ĉiuj penoj doni al ĝi «delikatajn formojn de la italaj radikoj, belecon kaj ĝustecon de la franca gramatiko kaj mirigan simplecon de la angla lingvo.»

La libro de Puchner estas verkita en lia propra lingvo, sed laŭ la justa rimarko de Couturat kaj Leau(8) «tiun lingvon estas

---

1 J. W. Hamilton, «World English. — A suggestion that we simplify English as the International Language for the World», St. Paul, U. S. A. (1924?).

2 Berliner Zeitung am Mittag», Berlin, n-o 73, 6. apr. 1929.

3 Vildu «Heroldo de Esperanto», Köln, 6—II—1931, № 6 (666).Radio-debato inter W. Collinson kaj A. Lloyd James.

4 Bernhard, «Grammatik der Lingua Franca Nuova, einer ungleich der Volapük allen Nationen glcich gut verständlichen Universalsprache», Wien, 1888. 2-a eldono: «Welt-italienisch Franca«, Wien, 1891.

5 J. Puchner, «Grammatica di Nouve-Roman, Lingua universal», Linz. 1897.

same malfacile ellerni, kiel lingvon italan aŭ hispanan... krom por la personoj, kiuj jam posedas tiujn lingvojn».

Post 22 jaroj en San Salvador Gavidia Francisco ripetis provon de Puchner, publikiginte projekton «Salvador»[1]— lingvon, konstruitan sur malvaste hispanlingva bazo, kun nesufiĉe ellaboritaj gramatikaj reguloj kaj kun kripligita internacia transskribo, ekz.: oculto — okulo, correo — poŝto ktp.

Ankoraŭ unu projektinto Starrenburg el Valencia celis akomodi la hispanan lingvon por la rolo de la universala[2]. Li turnis sian ĉefan atenton al la simpligo de la gramatiko kaj, se ne laŭ la formo, do laŭ la ideo, kopias la gramatikon de Esperanto kaj Ido. La malampleksa bazo de la hispana lingvo ne donis al la projekto «Mundolingua» de Starrenburg tiujn elementojn de internacieco, kiuj estas posedataj en diversaj aliaj modernaj sistemoj de Internacia lingvo, ekz.: teniento anstataŭ lieutenant, setiembro anstataŭ septembro, abrilo anstataŭ aprilo ktp.

A. Lakide (1893)

En la j. 1893 en Peterburgo aperis broŝuro de A. Lakide kiu proponis por la lingvo universala korektitan francan lingvon[3]. La aŭtoro en la antaŭparolo de sia libro antaŭrimarkas, ke li ne kredas je la sukceso de universala lingvo, sed ke li «decidis fari tian lingvon, kiu nepre kontentigus la postulojn de facileco ĉe la lernado kaj per tio liberigus la varmajn mondlingvanojn de Volapük kaj Esperanto, tute ne taŭgaj por rapida kaj facila lernado».

La francan vortaron Lakide akceptas en ĝia kompleta tuteco, sed submetas ĝin al koncerna laŭfonetika simpligita transskribo. Rezulte, anstataŭ explication aperas espligason, anstataŭ qualité—qalit, kaj anstataŭ roi—simple ra.

Supozeble, apero de tiu projekto estis kaŭzita de la libro de J. Giro[4], kiu antaŭjare estis publikigita en Paris.

B. Bohin (1898)

Alia analogia projekto de simpligita franca lingvo estis aperigita en Francio en la j. 1898 de pastro Bohin[5]. Kiel ekzemplon, ilustrantan la lingvon, ni citu la frazon: «Le necesit, le concurans, lofr e le demand etr le loi des loi, ci gouvern le mond» (la neceso, la konkurenco, la propono kaj demando estas leĝo de la leĝoj, kiuj regas la mondon).

Tamen aliparte en tiu projekto estis fortaj ankaŭ la aprioriaj tendencoj. Ekzemple la monatoj estis nomataj: unbr, deundr, tribr, catbr k. t. p.

P. Stojan(40) citas iun Chapaz, kiu en la j. 1900 proponis «Langage instantane» — fonetike skribatan francan lingvon.

La projektoj de G. Henderson

Apartan pozicion meze de aliaj reformproektoj de la latina kaj modernaj lingvoj okupas la tri projektoj de Georgo Henderson, kies agadon, kiel tiun de propagandisto por lingvo latina, ni jam citis (vidu p. 136). Laŭesence tiuj projektoj estas pure aposterioriaj, se ne atenti la memlimigon de la aŭtoro: preni materialon por siaj projektoj el unu, aŭ, ekstremokaze, el du lingvoj.

---

[1] Gavidia Francisco, «Grammatica de idioma Salvador o sea un posible lengua internacional», San Salvador, 1909.

[2] Diego Starrenburg, «Gramatico di la Mundolingua», Valencia (1922?).

[3] A. Lakide, «Novyj vseobŝĉij jazyk Fransesin», S. Peterburg, 1893 (47).

[4] J. Giro, «Le français — langue universelle par la simplification de l'ortographie», Paris, 1892.

[5] Père Benjamin Bohin, «Syllabaire moderne universel, moral, industriel et commerciel. Pataiglob universel et Patois libres Nasiones», Bohinville (Orne), 1898.

Malgraŭ ĉiuj tiamaj sukcesoj de Volapük, H e n d e r s s o n sentis ĝian fiaskon neevitebla. Universala lingvo povas esti ellaborita, liaopinie, nur de konforma internacia korporacio de scienculoj kaj enkondukita en la vivon per interkonsento de apartaj nacioj. Dume li opiniis necesa priplani la eblajn formojn de tia monde aŭ eŭrope internacia lingvo, doni skizon de lingvo, kiu en estonteco povus esti submetota al la juĝo de koncerna sciencula korporacio. La unua tiaspeca projekto de H e n d e r s s o n estis lingvo «Lingua», aperigita en la j. 1888[1].

Por la bazo de la lingvo «Lingua» li prenis la radikojn el latina vortaro, transformatajn laŭ speciala regulo, kaj kiom eble simpligitan gramatikon similantan al la plej simpla en la mondo gramatiko de la lingvo angla. Sed kun ĉio tio H e n d e r s s o n konservas en sia projekto la tutan vicon da preskaŭ superfluaj malfacilaĵoj, ekzemple 9 vokalojn kun ties sonoj.

Por fari sian lingvon laŭeble plej riĉa, H e n d e r s s o n kompletigis la latinan vortaron per internaciaj terminoj de eksterlatina origino, ekz.: kafejo, bulvardo, bilo, budĝeto, sporto...

La avantaĝa prefero, kiun li donas en sia projekto al la lingvo latina, nepre malfaciligus lernadon kaj akiron de la nova lingvo, malhelpus al ĝi fariĝi vera eŭrop-internacia lingvo kaj alkondukus la rolon de la nova projekto al limigita rolo de lingvo interlatinida.

Kun sufiĉa tamen, senpartieco, preskaŭ samtempe al sia projekto de «Lingua», H e n d e r s s o n eldonis en la j. 1889, sub pseŭdonimo P. H o i n i x, novan projekton de la anglo-franca kompromisa lingvo «Anglo-franca»[2].

W. Fraustädter[3] rilatigas al la j. 1889 pluan, trian projekton de H e n d e r s s o n — «facila lingvo» (langue facile), kiu estas nur simpligo de la gramatiko kaj ortografio de la lingvo franca.

La projekto «Anglo-franca» estis intence kontraŭmetita al la tute artefarita Volapük. H e n d e r s s o n celis montri, ke la simpligitan universalan lingvon estas eble krei sur la bazo de iu el la ekzistantaj naturaj lingvoj. Por tiu baza lingvo li elektis la lingvon francan, kun ioma almikso de la elementoj, prenitaj el la angla. Pro tio en la «Anglo-franca» estas vortaro preskaŭ komplete prenita el la franca, dum la simpligita gramatiko estas ĉefe prenita el la angla.

Kiel ilustraĵo de tiu kombinita kaj tial ne unudevena lingvo povas servi jena frazo: «The peuples of the Orient trouv they selfs in an embarras encore more grand wen they voul to entam commercial relations with Europe...»

Iun sukceson ĉi tiu dulingva vermiĉelo tute ne havis kaj post tio H e n d e r s s o n en la jaroj 1890—91 sin turnas al energia propagando de lingvo latina por la internacia.

Pli poste, en la j. 1901, malentuziasmiĝinte pri la ebla triumfo de la nereformita antikva latina, H e n d e r s s o n denove refaras sian unuan skizon de «Lingua» je nova lingvo, nomita de li «Latinesce»[4].

Sufiĉa progreso en «Latinesce», kompare kun la «Lingua» sin montras precipe en la vortara materialo. Estis donita prefero al la vortoj internaciaj kontraŭ la samsencaj vortoj de la latina derivado.

---

[1]. G. Henderson, «Lingua, an International Language for purposes or commerce and science. General Outlines», London, 1888.

[2] P. Hoinix, «Anglo-Franca, an compromis Langue English-Francais for the facilitation of international communication», London, 1889.

[3] Werner Fraustädter, «Die internationale Hilfssprache», Husum, 1910 ([47]).

[4] V. artik. en lingvo «Latinesce»: «Latinised English the best lingua Franca» en la gazeto «The Referee» (London, January, 1901) kaj ĝian represon en la broŝuro «The lingua Franca of the Future» (May, 1902).

Kiel rezulto de tiu lingvo jen estas la unuaj strofoj de «Patro nia»: «Nostre patre qui esse in coele, sanctificate esse tue nomine, venu tue regne, fakte este tue voluntate»...

Ekkoninte la lingvon Esperanto, Hendersson, restinte principa propagandanto de la latina, tamen trovis kuraĝon skribi: «El ĉiuj projektoj de artefaritaj lingvoj Esperanto sendube estas la plej bona kaj mi estas konvinkita, ke se ĝi aperus pli frue ol Volapük, ĝi altirus al sia flanko ne nur la adeptiĝintojn al Volapük, sed ankaŭ milojn da aliaj personoj[1]».

D-ro Baumann (1915)

Inter aliaj similspecaj projektoj apartan lokon okupas la projekto «Wede» (Weltdeutsch) de D-ro Baumann, kiu proponis sian sistemon en la j. 1915 «por la lingva unuigo de la centreŭropaj kaj al ili amikaj ŝtatoj[2]. La ideon de la universala tuthomara lingvo oni jam ne unufoje trivialigis, celante transformi tiun lingvon je ilo de naciismo kaj nacia hegemonio.

Wede estas simpligita germana lingvo kun simpligita gramatiko, simpligita ortografio kaj kun la vortoj, kiuj malbonigas kaj kripligas la formojn de la viva germana lingvo.

Por personoj ne konantaj la lingvon germanan, la sistemo Wede restas fremda kaj nekomprenebla. Por la germanoj ĝi estas nenion rememoriganta karikaturo de ilia propra gepatra lingvo. Ĉiuj patriotismaj kaj ŝovinismaj idealoj de Baumann ne povas ŝanĝi ĉi tiun fakton.

En la j. 1925 Baumann publikigis novan analogian projekton «Weltpitshn». En la j. 1928 en München aperis nova verko de la sama aŭtoro «Oiropa pitshn».(40)

W. Ostwald (1916)

Same unu el la gravaj subtenantoj de Ido (reformita Esperanto), profesoro W. Ostwald en la j. 1916 ripetis la eksperimenton de D-ro Baumann kaj ellaboris samnoman projekton «Weltdeutsch», — universalan germanan lingvon[3]. En la gazeto «Vossische Zeitung» de la 29-a de septembro 1926 li skribis pri la bezono ellabori novan internacian lingvon.

K. Keyser (1918)

Originalan projekton de universala lingvo bazita per la skandinavaj lingvoj donis en la j. 1918 K. Keyser[4].

Interslavaj sistemoj (1908—1916)

I. Hoŝek, instruisto de ĉeĥa lingvo, eldonis en la j. 1908 lernolibron de intesrlava lingvo kun paralelaj ĝiaj tradukoj en ĉiujn ekzistantajn slavajn dialektojn [5].
Unu jaron pli frue Hoŝek dediĉis al la sama problemo alian libron en la germana lingvo.

Koncerne ĉiujn tiujn proponojn ni devas ripeti la samon, kion ni parolis supre koncerne la projektojn, celantajn ŝanĝi kaj simpligi la anglan kaj aliajn naturajn lingvojn.

Se tiuj simpligoj kaj ŝanĝoj estas radikalaj kaj profundaj, ili povas tiel malsamigi la primitivajn formojn de la lingvo, ke tiuj fariĝos nerekoneblaj. Sed se tiuj ŝanĝoj ne tuŝas la bazojn de la natura lingvo, la simpligo kaj plibonigo per ili atingitaj estos dube valoraj kaj ĉiel ne tre signifaj.

---

[1] G. Hendersson, «A new Art in the construction of an international Language», 1902.

[2] D-ro Baumann, «Wede — die Verständigungssprache der Zentralmächte und ihrer Freunde, die Neue Welt-Hilfs-Sprache», Münchеn, Kriegsjahr 1915.

[3] «Mondo», Stockholm, 1926, n-o 2, pĝ. 48; n-o 12, pĝ. 296.

[4] K. G. F. Keyser, «Universalspräket utkast till vetenskaplig Grammatik», Stockholm, 1918.

[5] Ig. Hoŝek, «Gramatika Obŝĉeslavjanskago jezika». Kromeriz, 1908.

H o ŝ e k simile al Krizaniĉ (vidu p. 78), celis kunmeti «interslavan parolon»., kiu povus unuigi ĉiujn slavajn lingvojn. Tial li ne okupis sin pri iuj apartaj, idealaj lingvoformoj. H o ŝ e k prenis por la bazo de la supozata tutslava lingvo lingvon slovenan kun latina alfabeto kaj la malmulte konatajn en alilando slovenajn lingvoformojn anstataŭis per pli konataj kaj prenitaj el aliaj fontoj, precipe el la lingvo rusa.

Tial konserviĝis la bazo de slovena lingvo, de tiu ĉi bazo estis forprenata ĉio superflua kaj al ĝi estis aldonata ĉio necesa, mankanta.

Esence tiuj eksperimentoj estis de sufiĉe modesta skalo. En la pli bona ŝanco, aldone al la jam ekzistantaj 11 literaturaj slavaj lingvoj oni ricevus unu pluan dekduan lingvon, faritan el la miksaĵo de la dekunu unuaj.

La tre interesa projekto de H o ŝ e k ne havis evoluon, nek progreson. La sama sorto trafis la aperintajn en la fino de la j. 1912 en Ĉeĥio projektojn de interslavaj lingvoj: de J. K o n e ĉ n y — «Slavina», alie titolita «Slava Esperanto»[1] kaj de E. K o l k o p — «Slovanŝtina»[2].

Ambaŭ tiuj projektoj prezentas per si nur skizojn — punktokonturojn de la ĉefaj principoj por la konstruo de tutslava lingvo[3].

P. S t o j a n(40) ankoraŭ citas laborojn sian propran kaj tiun de D. Ĉ u p o v s k i j, rilantajn al la sama fako, en la periodo de la j. 1913 ĝis 1916 (en Peterburgo).

## PROPONOJ PRI AKCEPTO DE IU NACIA LINGVO POR LA ROLO DE LA UNIVERSALA

La faritaj proponoj pri reformo de la naturaj lingvoj fakte ĝis nun ricevis neniun senteblan, praktikan sukceson. Eĉ la simpatioj por ebla universaligo de «sia» lingvo ne estis en koncernaj landoj kaj ĉe koncernaj aŭtoritatuloj sufiĉe fortaj — por povi iel antaŭenmovi similan lingvoreformadon. Kaj en aliaj landoj, krom apartaj izoluloj, ja neniu serioze subtenis «ne sian» lingvon, eĉ reformitan.

Ĉiuj similaj provoj estis esence kaŭzitaj de la ŝovinistaj imperialismaj tendencoj. Sed tiuj tendencoj tamen pli multe zorgis pri trudo de sia nacia «senŝanĝa lingvo» por la tutmonda uzado ol pri iu ebla reformado de «sia lingvo», por ke ĝi fariĝu pli facile uzebla de «ĉiuj».

Similaj proponoj pri trudo aŭ laŭinterkonsenta akcepto de iu nacia lingvo estis sufiĉe multaj. P. S t o j a n(40) donas konsiderindan nombron favore al la plej diversaj lingvoj. Tiel ekster la ĉefaj mondlingvoj por simila celo estis proponataj — la nederlanda (B e l, 1869), la dana (P. P a s s y kaj V. T h o m s e n, 1905) kaj eĉ... la malaja (C a r u s, 1909).

La kaŭzoj, kial tiuj proponoj povis neniel sukcesi, estis de ni jam montritaj en la fino de la II ĉapitro de tiu ĉi verko (vidu p. 24).

**Projektoj de la interkonsentoj por pluraj naturaj internaciaj lingvoj**

La neebleco interkonsenti pri akcepto de tiu aŭ alia natura lingvo kiel fakta lingvo de ĉiuj internaciaj rilatoj kaj la negativa rilato al la ideo de artefarita lingvo ĝenerale, de unu flanko — kaj pli kaj pli akra bezono de la tutmonda lingvo — de la alia, neunufoje naskigis penson pri kompromisa solvo de la problemo, per akcepto de pluraj, la plej gravaj lingvoj, kiel internaciaj kaj ĝenerale devigaj.

---

[1] Jozef Koneĉny, «Slavina», Praha, Nuole, 1912.
[2] Prof. Edm. Kolkop, «Slovanŝtina», Jeviĉko, 1912.
[3] «Ĉasopis Ĉeskych Esperantistŭ», Praha, 1913, n-o 1, pĝ. 5—7.

Franca scienculo G a i d o z[1] en la jaro 1899 proponis akcepti por tiu celo lingvojn francan, anglan kaj germanan, «al kiuj eble oni povus aldoni ankaŭ lingvon rusan».

Franca komercisto P a u l C h a p e l i e r[2] iom pli poste, evidente por plimalgrandigo de la elspezoj, ligitaj kun la lernado de la tri lingvoj, proponis malpligrandigi ĉi tiun nombron de la internaciaj lingvoj kaj akcepti kiel plenvalorajn nur la lingvojn francan kaj anglan. En ĉiuj lernejoj ĉiuj lernantoj lernus nur tiujn du lingvojn. La interlingva duumvirato forigus tiamaniere la necesecon de unu tutmonda lingvo.

Germana profesoro H. D i e l s[3], perdinte esperon je sukceso de la latina lingvo kaj kontraŭbatalante ĉi tiun proponon, subtenis la projekton de G a i d o z pri la kreo de la internacia triumvirato de la lingvoj: franca, angla kaj germana.

Sed interkonsento pri la akcepto de samvalora internacieco por kelkaj ĉefaj lingvoj ricevos ĉiam kontraŭstaron de la aliaj malgrandaj kaj mezgrandaj popoloj. Kaj krom tio, similaj lingvaj duumviratoj aŭ triumviratoj estus nur paliativo, provizora kaj malsukcesa haltigo por la solvo de la maturiĝanta problemo, necesiganta starigon de unu ĝenerala, internacia lingvo.

Bazita kaj neniiga respondo al la propono de D i e l s, kiel la plej respondeca el ĉiuj suprenomitaj, estis donita de C o u t u r a t en la ĵurnalo «Deutsche Revue[4]».

Aranĝi dum la imperialisma periodo similan interkonsenton por kelkaj lingvoj estas same ne eble, kiel aranĝi en ĝi iun ĝenerale akceptitan dividon de profitoj, merkatoj kaj kolonioj.

## SORTO DE EVENTUALAJ SIMILAJ PROJEKTOJ DUM LA ESTONTO

Ni ne povas garantii, ke ree ne troviĝu iu fantaziulo, kiu provos projekti: iujn reformojn en iu morta aŭ iu nacia lingvo por fari ĝin universala. Tamen el la tuta sperto de la pasinto ni povas ricevi garantion pri nepra jam antaŭdestinita malsukceso de ĉiu simila provo.

La latina lingvo kun ĉiu jardeko ĉiam pli kaj pli arkaiĝas. La reformita, por nuntempaj bezonoj adaptita, latina lingvo havus esence nenion komunan kun la latina lingvo—same antikva, kiel la mezepoka.

La efektivigita reformado de ĉiu nacia lingvo ŝirus la lingvon for de la popolo ĝin uzanta. Tio estas faro neebla. Samtempe la imperialisma antagonismo inter diversaj kapitalistaj ŝtatoj en la nuna periodo — garantias absolutan malsukceson de ĉiuj provoj, ke iu reformita nacia lingvo iĝu la lingvo universala.

Kaj ne nur ĉe la kapitalismo devas malsukcesi similaj provoj. Ankaŭ en la socio socialisma, en la kondiĉoj, kiam ĉiuj nacioj ricevos eblon por memstare evoluigi siajn kulturojn kaj siajn lingvojn, — tia trudo elekstere ne povas esti efektivigata sen tio, ke ne estu malkonfesita la principo mem de la nacia aŭtonomio kaj egaleco([43]).

---

[1] Vidu artikolon de H. Gaidoz, «Langues de l' Etat et langues nationales» en «Annales des sciences politiques», 1899, Juillet.

[2] Vidu la gazeton «Esperanto», Dijon, 1905, n-oj 11, 13, 15; kaj artikolon de V. Leseviĉ «Internacia lingvo por kulturaj rilatoj», en la gazeto «Russkaja Mysl», Moskvo, 1903, vol. VI, pĝ. 67—91.

[3] Lia parolado «Pri la internaciaj taskoj de universitato», farita en Berlina universitato la 3. VIII. 1906.

[4] Vidu apartan eldonon en esper. traduko: L. Couturat, «Ĉu unu lingvo internacia aŭ tri», Berlin, 1907.

El la dirito ni povas tiri konkludon, ke la problemo pri la lingvo internacia nepre ne povas esti solvita de la socio kapitalisma. De tiu vidpunkto absolute pravas W. W u n d t, filozofo de la epoko imperialisma, kies vortojn ni citis antaŭ la komenco de tiu ĉi ĉapitro. Sed tamen la estonta lingvo internacia, firmiĝonta en la socio de la estonto, povis ekĝermi en la epoko antaŭirinta. Ĝi ekĝermis dank' al penoj, laboroj kaj dank' al utopieca idealismo de apartaj izoluloj, provintaj centrigi en siaj lingvo-projektoj ne la esencon de iu aparta unu lingvo kaj popolo, sed la esencon de la tuta moderna tuthomara kulturo kaj de ĉiuj lingvoj de la mondo.

La utopiisma projektado kaj utopiista batalado por la Lingvo Internacia estis same utila kaj logike same necesa, kiel la utopiista sociala fantaziado de la grandaj utopiistoj Fourrier, Owen kaj Saint-Simon en la epoko de maturiĝanta klaskonscio de la proletaro.

---

X

## LA PROJEKTOJ DE RACIAJ INTERNACIAJ APOSTERIORIAJ LINGVOJ EL LA PERIODO 1880—1907

Internacia lingvo antaŭsignas grandan ekonomion en la elspezado de energio ĉe la homaj interrilatoj, kaj en tiu ekonomio de elspezo estas la esenco de civilizacio.

W. Ostwald

La plifortiĝo de intereso por la problemo de internacia lingvo kaj kontraŭstaro al la troaj artefariteco kaj originaleco — kondukis tuj post praktika elprovo de Volapük, al sistemeca, jam multamasa kreo de internaciaj aposterioriaj lingvoj.

Speciale karakteriza por tiu speco de la lingvo-projektoj estas la tendenco elekti la vortradikojn el formoj internaciaj, komunaj por tuta grupo de la lingvoj de civilizitaj popoloj. Apud tia radikaro el la jam ekzistanta en naturaj lingvoj internacia vorttrezoro — estis akceptata sistemeca (laŭpove internaciforma) gramatiko, sen iuj ŝanĝoj kaj esceptoj. Tia gramatiko donis al la lingvo-strukturo karakteron esence aglutinan, pleje facilan por studado kaj senpera aplikado.

**A. Volk kaj R. Fuchs (1883)**

A. Volk kaj R. Fuchs en la j. 1883 en Berlin publikigis unuan tiaspecan projekton[1]. La vortaro, kunmetita el la radikoj greko-latinaj kaj modernolingvaj kaj simpligita gramatiko estas bazoj de tiu ĉi monda lingvo.

Tamen la celado de la aŭtoroj kunligi kaj samspecigi la origine malsamajn vortarojn kaj gramatikajn elementojn de la lingvo kondukis al apero de kelkaj aprioriaj kaj komplikaj reguloj, superflue malfaciligaj por la lerno de la lingvo. Montriĝis maltrafa la enkonduko en la lingvon, krom la kvin ĝeneralaj ĉefaj vokaloj, ankoraŭ de du vokaloj modifitaj — ä kaj ö, samsonaj al la latinaj ae kaj oe. Kune kun tio, sekvante Carpophorophilus, (vidu paĝon 45), la projektaŭtoroj, por forigi la malklarecon en la elparolado de la similsonaj konsonantoj: v-f, g-k, b-p, d-t, konservis nur po unu el ili. Tio ŝanĝis la eksteran aspekton de la lingvo kaj faris kelkajn ĝiajn vortojn tute nerekoneblaj.

Ekzemple: il sat terribil specton = li estas terura por lin rigardi, le vent sat util la notora = la vento estas utila al la maristoj, le sim sat simil la gomona = la simio similas la homon.

---

1 A. Volk und R. Fuchs, «Die Weltsprache entworfen auf Grundlage des Lateinischen zum Selbstunterricht», Berlin, 1883.

En la j. 1875 projekton de tiel nomata «internacia novlatina lingvo» aperigas E. C o u r t o n n e[1] (⁴⁰). En la jaroj 1885 kaj 1887 en Nice aperis du pluaj lernolibroj de tiu ĉi lingvo: «populara»[2] kaj komerca.

E. Courtonne (1875—1885)

C o u r t o n n e laboris pri sia projekto, komencinte de la j. 1867. Unuatempe li vidis sian taskon en la minimuma nombro de la radikoj kaj ties anstataŭo per kiom eble granda nombro da vortoj deriveblaj. Sed poste, atentante la grandan nombron de la vortoj, komunaj al ĉiuj latınıdaj popoloj, li decidis krei interlatinidan aŭ novlatinan helpan lingvon.

C o u r t o n n e la unua uzis la esprimon «helpa lingvo» (langue auxiliaire), por pli ĝuste difini la rolon de internacia dua kaj aldona por ĉiuj, sed ne de sola, unika universala lingvo. Per sia naturo tiu ĉi projekto prezentas gravan paŝon antaŭen kompare al la projekto de V o l k kaj F u c h s. Sed la perfekta principo de la internacieco de la radikoj (eĉ se de nepre latinida origino) en granda grado estas nuligata de la alia, arbitra kaj nenatura principo — unusilabeco de la radikoj. Rezulte la vortoj de la lingvo fariĝis nerekoneblaj: ekz.: n f a n t o - infano, f m i l l a - familio, s v r a n o - suvereno ktp.

Por la traduko de la titolo «Pacifika poŝt-vaporŝipa kompanio» oni uzas mallongan, sed sufiĉe barbarisman formulon: «p a x-m a r-v a p-n a v-c o m p n o».

En la Berlina publika biblioteko troviĝas la eldonaĵoj de la verkoj de C o u r t o n n e, rilatantaj al la jaroj — 1881 kaj 1884.

La 7-an de majo de la j. 1883 C o u r t o n n e prezentis sian projekton al la Nice'a societo de natur- kaj historisciencoj. La komisiono, komisiita esplori la projekton, la 7-an de junio esprimis favoran opinion pri la esenco de la projekto.

Dank' al la zorgoj de tiu ĉi societo estis presita la lernolibro en la j. 1885 (kiu prezentas per si eltiraĵon el la bulteno de la societo). La societo decidis sin turni al ĉiuj sciencaj societoj de la latinidaj landoj, al universitatoj ktp, kun peto pri recenzo koncerne la esencon de la projekto de C o u r t o n n e. Samtempe la societo elektis specialan komisionon por «vulgarigo» (disvastigo) de la projekto. Sed respondis nur tri sciencaj institucioj(⁸). Tiu sensignifa rezulto instigis la komisionon fari proponon pri kunvoko de «internacia novlatina kongreso», sed la afero restis nur ĉe tiu propono.

P. Steiner (1885)

Trovi pli ampleksan internacian vortaran bazon provis la gimnazia instruisto en Zabern P. S t e i n e r[3]. Sian «pazilingvon» S t e i n e r komponis, laŭ ebleco, ekskluzive el la elementoj, komunaj al la plej gravaj kulturlingvoj: angla, franca kaj germana. Li tamen preferis la formojn de la unua. En tiuj okazoj, kiam iu vorto estis malsama en la nomitaj lingvoj, S t e i n e r prenis latinajn radikojn.

Estas sagaca kaj tre pravigita la tezo, laŭ kiu S t e i n e r turnis sian ĉefan atenton ne al la internacia elparolo, sed al la internacia skribformo de la vortoj en sia lingvo. Sed esti ĝis fino konsekvenca tiurilate S t e i n e r ne sukcesis. Ni renkontas en lia lingvo formojn kripligitajn, kiel a s h i u (âge)=aĝo, s h a n s h i r (changer)=ŝanĝi.

La gramatikaj formoj de la pazilingvo ne ĉiam estas sufiĉe simplaj: ekz., estas 4 finaĵoj por la substantivoj (por vira, ina, neŭtra genroj kaj por ideoj abstraktaj), 4 formoj de konjugacio. Tiuj komplikaj for-

[1] E. Courtone, «Langue Internationale ou nouvel essai d'un langue simplifice», Rouen, 1875.

[2] E. Courtonne, «Langue internationale néo-latine ou langage auxiliaire simplifié», Nice, 1885 (⁴⁵) (⁴⁸).

[3] P. Steiner, «Elementar-Grammatik nebst Uebungsstücken zur Gemein-oder Weltsprache — Pasilingua», Neuwied, 1885 (⁴⁷).

moj, sendube, malfaciligis la lernon de la pazilingvo kaj iafoje metis ĝin je pli malsupera situacio kompare al la pli fruaj aposterioriaj projektoj(8).

La unua libro de Steiner (1885) aperis sen vortaro, kiu estis eldonita nur en 1887. Klarigante en ĝi siajn principojn de la gramatika konstruo, Steiner interalie diras, ke tiu ĉi gramatiko povas esti akomodita al la radikoj de ĉiu liagvo kaj kiel ekzemplon li donas la preĝon «Patro nia» kun la pazilingvaj gramatikaj finaĵoj samtempe en la greka, latina, angla kaj franca lingvoj.

Por plua evoluigo de tiu ĉi tezo d-ro F. Lenz en sia broŝuro[1] donis laŭidee kaj laŭforme similan projekton de reformita hebrea lingvo «Pasilingua hebraica». Sed tio ne devas esti apogo por foje renkontata aserto ke Steiner donis nur ĝeneralan internacian gramatikon kaj tute ne donis internacian leksikonon.

Kelkaj germanaj scienculoj (Hans Moser kaj F. Lenz) teorie aprobis la sistemon de Steiner kaj eĉ provis propagandi ĝin. Sed iliaj provoj ne havis sukceson. Same malsukcese finiĝis la farita en la j. 1889 provo de Steiner eldoni ĵurnalon «Ta Pasifolia».

Eichhorn (1887)

En la j. 1887 en Bamberg estis eldonita anonima projekto de aposterioria «tutmonda lingvo»[2]. Ĝia aŭtoro — Eichhorn celis krei ĝin jam en la j. 1861(8). La ekkono de la ideoj de Grimm (v. p. 87) inspiris lin kaj tiam bazinte sin per lingvo latina kaj gramatiko simpligita, li decidis provi doni al la homaro novan ilon por internaciaj rilatoj. Li ne esperis sola fini la aferon de kreo de universala lingvo kaj konsideris sian projekton kiel siaspecan preparan planon.

La projekto, proponita de Eichhorn, ne estas libera de multaj pure aprioriaj tezoj. Tiel, ekz., li enkondukis tre neordinaran laŭ la originaleco postulon, ke en lia lingvo ĉiuj substantivoj estu dusilabaj, adjektivoj — trisilabaj, pronomoj — unusilabaj ktp. Interalie, laŭ lia projekto rezultiĝas, ke la interjekcioj (ĝenerale en ĉiuj lingvoj tre mallongaj) devas esti trisilabaj.

La alfabeto de la lingvo ne sufiĉe kontentigas la postulojn, starigatajn por la racia internacia lingvo. Estis enkondukitaj la modifitaj vokaloj ä, ö, ü kaj forigitaj, laŭ la ekzemplo de Volk kaj Fuchs, la parence sonantaj konsonantoj: b-p, v-f, g-k.

Kiel rezulto de tiuj artefaritaj tezoj la plimulto de la vortoj estas kripligita kaj perdas la rekoneblecon: bulkra (de la latina: pulchra) — belulino, dok (de la latina: docere) — instrui. La numeraloj estis tute artefaritaj: ak — 1, ek — 2, ik — 3, ok — 4, uk — 5, ök — 6 ktp. La aprioria gramatiko neniigis kelkajn plusojn de la aposterioria vortaro kaj en nesufiĉa grado superigis ĉi tiun sistemon, kompare al la lingvoj de miksita volapükida tipo.

«Esperanto» (1887)

En la sama j. 1887 en Varsovio, en lingvoj rusa[3], pola, germana, franca, angla aperis lernolibroj kaj vortaroj de «internacia lingvo», de anonima D-ro Esperanto[4].

En tre malmultaj paĝoj la aŭtoro sukcesis doni ĉion, kio plene formas la lingvon kaj kio necesas, por ke la lingvo efektive povu esti uzata. Dank' al la multenombra dissendo de tiuj eldonaĵoj al ĉiuj landoj kaj kontinentoj, tiu ĉi projekto baldaŭ fariĝis konata, konkeris

---

[1] Dr. Felix Lenz, «Pasilingua contra Volapük», Neuwied, 1887.

[2] «Die Weltsprache — ein neues versuche eine Universalsprache mit Zugrundelegung der lateinischen Wortstammen, zu bilden», Bamberg, 1887.

[3] Doktor Esperanto. «Meĵdunarodnyj jazyk», predislovije i polnyj učebnik. Varŝava, 1887 (47).

[4] Pri tio pli detale vidu la ĉapitron XII.

por si grandan nombron da adeptoj kaj altiris siaflanken multajn volapükistojn; tiel ekzemple jam en la jaro 1888 la volapükista societo de Nürnberg (fondita en la j. 1885) tutmembrare adeptiĝis al Esperanto.

Kelkaj lingvelpensintoj ankaŭ aliĝis la sistemon de D-ro E s p e r a n t o. Inter tiuj L. de B e a u f r o n t, laborinta (8) (laŭ lia aserto)— de la j. 1876 pri la projekto de lingvo «Adjuvanto», laŭ konstruo tre proksima al la sistemo de Esperanto, ankaŭ sin donis al la propagando de la lasta. En la plua historio de universala lingvo Esperanto jam trans kelkaj jaroj post la apero komencis ludi se ne unikan, do ĉiel la unuan kaj ĉefan rolon.

Al ĝia plua historio estas dediĉita aparta XII-a ĉapitro de tiu ĉi verko.

La 21-an de oktobro 1887 amerika filozofia societo (The American Philosophical Society), fondita de W. Franklin en la j. 1783, en sia kunveno en Philadelphia, konsiderinte la gravecon de la problemo de internacia lingvo, komisiis al aparta komisiono esplori la problemon de la scienca valoro de Volapük kaj de ĝia taŭgeco por la rolo de lingvo internacia. La 18-an de novembro 1887, la komisiono prezentis al la Societo sian unuan raporton[1], kiu malakceptis Volapükon kaj projektis propran aposteriorian skemon por la konstruo de artefarita lingvo. Amerika filozofia societo (1887)



L. Enstein, gvidanto de la unua esperantista societo en Nürnberg

Tiu ĉi skemo havas por ni grandegan valoron, ĉar ĝi entenas serion da gravaj tezoj, kies konservo estas nuntempe ĝenerale rekonita de ĉiuj laborantoj en la fako de universala lingvo. Tiuj tezoj temas ke:

1. Internacia lingvo devas esti konstruita sur la bazo el la elementoj de lingvoj arjaj (angla, franca, germana, hispana, itala, rusa).

2. La ortografio devas esti fonetika kaj al ĉiu litero devas ĉiam kunrespondi la sama sono, por ĉiuj popoloj egale facile prononcebla.

3. La nombro da vokaloj devas esti limigita per la kvin bazaj: a, e, i, o, u.

4. La literoj de internacia lingvo devas esti prenitaj el la latina alfabeto, atinginta la plej vastan uzadon kaj ĉiulokan disvastiĝon.

5. En la vortaron devas eniri unuavice «almenaŭ 1000 vortoj», komunaj al ĉiuj 6 suprecititaj lingvoj; tiu ĉi baza provizo da radikoj devos esti kompletigita per la terminoj teknikaj, sciencaj, komercaj kaj aferaj; en la plua evoluo de la lingvo kaj ĝia riĉiĝo, oni devas konsideri la samajn principojn, kaj la lingvo devos esti gvidata de specialaj internaciaj komitatoj, kiuj ludus rolon de Akademioj por perfektigo de la lingvo.

6. La gramatiko devos esti simpla kaj simila laŭ sia simpleco al la plej simpla natura gramatiko (de la angla lingvo); ĝi devas esti konstruita ne laŭ izola tipo, sed laŭ la tipoj de la gramatikoj de naturaj arjaj lingvoj.

La komisiono faris aldonan raporton al la kunsido de la Filozofia Societo la 6-an de januaro 1888. Tiutempe la komisiono ricevis eblecon ekkoni la projekton de «Pazilingvo» de S t e i n e r kaj la «Lingvon

[1] «Reports of the Committee, appointed October 21-st 1887 to examine into the scientific value of volapük presented to the American Philosophical Society. November 18-th 1887 and January 6-th 1888 (47).

Internacian» de D-ro Esperanto. La komisiono konstatis, ke tiu ĉi lasta projekto en la pleja grado konformiĝas al la principoj, kiujn la komisiono skizis en sia antaŭa raporto. La Amerika Filozofia Societo aprobis la raporton de sia komisiono, akceptis la 6-an de januaro 1888 konforman rezolucion, vaste sciigis pri siaj konkludoj la scienculajn rondojn de la Nova kaj Malnova mondoj kaj proponis kunvokon de tutmonda kongreso de sciencaj institucioj por solvo de la problemo de lingvo internacia.

Tiu ĉi invito estis akceptita de dudek societoj. Ĝi estis jam senduba progreso, kompare kun la rezultoj de la simila propono de Courtonne kaj de Nice'a scienca societo en la jaro 1885, sed tamen ĝi estis dume nesufiĉa por la sukceso de kunvokota kongreso.

La konkluda, lasta raporto de la komisiono estis farita la 8-an de decembro 1888[1]. Tiu ĉi raporto montras senduban sukceson de la ideoj, starigitaj de la komisiono, evidentigas la unuajn antaŭsignojn de la komenciĝinta disfalo de Volapük kaj seninterrompan kreskon de la nombro da projektoj de artefarita lingvo, kiuj sekvas la principojn de aposterioreco kaj estas bazitaj sur la strukturo de «arjaj lingvoj». La raporto plue diras, ke nur la Londona filologia societo, kune kun sia prezidanto A. Ellis opinias la problemon de internacia lingvo jam fine solvita per la apero de Volapük[2], kaj ke la Franca zoologia societo sin esprimas por la akcepto de iu natura lingvo por la rolo de l'internacia.

**La Amerika Asocio por antaŭenigo de la Scienco (1891)**

Analogian provon, post la malsukcesa komenco de la Amerika Filozofia Societo faris la unua respondinta al ĝia invito Amerika Asocio por antaŭenigo de la Sciencoj (American Association for the Advance of Sciences). En la j. 1891 ĝi elektis por la studado de la problemo komisionon, konsistantan el tri personoj. Unu el la komisionanoj, Brinton, antaŭe estis ano en la komisiono de la Am. Filozofia Societo. La alia estis Horace Hale, kiu aperigis en la j. 1890 en Londono libron, dediĉitan al la problemo de lingvo internacia (vidu p. 139). Sed tiu ĉi komisiono faris nenian raporton.

**J. Braakmann (1888)**

La publika alvoko de la Amerika Filozofia Societo ludis gravan rolon en la plua disvolviĝo de la ideoj pri la aposterioria universala lingvo. La plimulto de la aŭtoroj de tiuspecaj projektoj en siaj pluaj laboroj ĉiam penis konformigi siajn lingvokonstruojn konforme al la ĝeneralaj tezoj, starigitaj de la Amerika Filozofia Societo.

La unua tiaspeca projekto estis lingvoskizo «Mundolinco» de eks-volapükisto J. Braakman, publikigita holandlingve en la j. 1888[3] ([34]).

En la j. 1894 sub iom ŝanĝita titolo aperis en Noordwijk la 2-a eldono de tiu ĉi verko. La simpligita gramatiko donas al ĉi tiu lingvo multfojan similecon al la lingvo Esperanto, ekz. la frazo: «Digne Amico! Hodie mi fastos conesso con el nove universa linco (Digna Amiko! Hodiaŭ mi konatiĝis kun nova universala lingvo).» La vortara materialo estis prenita el la latina, sed kelkaj, maltrafaj kombinoj de sonoj kaj literoj kondukis al kripligo de la latinaj radikoj, ekz. linco, anstataŭ la latina lingua

---

[1] Vidu suplementon al la libro: L. Einstein, «Volapük und Lingvo Internacia», 1889.

[2] A. Ellis, «On the conditions of a universal language, in reference to the invitations of the American Philosophical Society of Philadelphia...» Suplemento al «Transactions of the Philological Society», p. 59—98, London, 1888 ([47]).

[3] J. Braakman, «El Mundolinco, systeem vor eine internationale reis of handelstaal», Hillegome, 1888.

(lingvo). La provo de la aŭtoro eldonadi en la j. 1889 en tiu ĉi lingvo ĵurnalon «Miso tempo»(34) finiĝis, videble, per malsukceso.

E. Lauda (1888)

Alia projekto, de E ŭ ĝ e n o L a u d a, «Kosmos» [1], estis farita kun celo krei lingvon «ekskluzive bazita per la internacia historie konstituiĝinta fundamento de la ekzistantaj lingvoj». Forigante la ideon pri utiligo de elementoj, prenitaj el diversaj lingvoj, L a u d a ĉerpas la tutan vortprovizon el la neŭtrala mortinta latina lingvo, sed depende de la postuloj de sia duone-aprioria gramatiko submetas ĝin al konforma refaro. Rezultiĝas kripligita lingvo latina, nesufiĉe komprenebla, nek simpla. La uzadon en tiu ĉi lingvosistemo de la terminoj internaciaj, sed ne de latina origino, la aŭtoro malpermesas.

J. Stempfl (1889—1894)

Du aposterioriajn projektojn, sur bazo de la latina lingvo, el kiuj la dua estas konsekvenca perfektiĝo de la unua — «Myrana» [2] kaj «Communia» [3] — donas en la jaroj 1889 kaj 1894 J. S t e m p f l — el Kempten (Bavario). Ankaŭ eksvolapükisto S t e m p f l, simile al E. L a u d a, protestas la troan artefaritecon de Volapük, sed li ne pretendas doni la komplete prilaboritan projekton de universala lingvo. Lia tasko estas nur skizi la vojpunktojn, laŭ kiuj povus esti farota tiu ĉi prilaboro (8). En detaloj de sia projekto S t e m p f l konservas la tri modifitajn vokalojn: ä, ö, ü. En la dua projekto, «Communia», la gramatiko estas multe pli simpla kaj ĝusta. La vortaro de «Myranna», ne estis eldonita, sed S t e m p f l certigis ke ĝi enhavos $^2/_3$ da latinidaj vortoj kaj $^1/_3$ da germanligvaj; alivorte li do rifuzis subteni la purecon de sia latinlingva vortara principo.

En sia dua projekto, en atendo de pli bona tempo, S t e m p f l proponis dume utiligi la latinan vortaron, modifinte la gramatikajn finiĝojn per facilaj kaj regulaj ŝanĝoj.

A. Browne (1889)

K e r c k h o f f s (34) citis unu pluan analogian, al ni restantan nekonata, skiz-projekton de internacia lingvo «Sermo» de A l f r e d B r o w n e [4].

La gazeto «Interpretor» (1889)

La volapükista movado komencis disfali. La aposterioriaj projektoj triumfis ĉiufronte. Eĉ «la unua instruisto de Volapük», K a r l L e n z e, malentuziasmiĝinte pri Volapük, decidis akceli la ellaboron de pli perfektaj formoj de universala lingvo kaj por tiu celo en la j. 1889 kun partopreno de kelkaj personoj, fondis specialan franc-, german-, anglolingvan gazeton «Interpretor» [5].

La limigita abonantaro, interesigita pri la problemoj koncernantaj la ellaboron de ĉefaj gvidprincipoj de la lingvo-konstruo, kondukis, jam, en la sekvinta j. 1890 al fermiĝo de la gazeto.

Pli poste, en la j. 1897, K. L e n z e prilaboris memstaran lingvosistemon «Zentralsprache» [6], sed ĝiaj detaloj restas al ni nekonataj. Pri la aposterioria projekto de L e n z e, rilatanta al la j. 1889, malgrandan noteton kaj citaĵon donas R o s e n b e r g e r [7]. Tiu ĉi projekto, evidente, apartenis al la reformitaj projektoj de la angla lingvo. Ĉu ĝi ne estas identa kun «Colonial english» de L e n t z e r de la j. 1891, kiun citas S t o j a n (40) (vidu p. 140)?

---

[1] E. A. Lauda, «Darf Volapük die Weltsprache werden? Kosmos, oder neueste Lösung des Weltspracheproblems auf internationalem und sprachhistorischem Boden», Berlin, 1888.

[2] J. Stempfl, «Myrana und die Weltsprache», Kempten, 1889.

[3] J. Stempfl, «Communia oder internationale Verkehrssprache», Kempten, 1894.

[4] Alfred Browne, «Sermo an international language», en «The Office» de 12. I. 1889.

[5] «Interpretor», Leipzig, 1889—90.

[6] Vidu «Mondo», Stockholm, 1926, n-o 2, pĝ. 46 (47).

[7] Vidu la gazeton «Progress», Petersburg, 1913, n-o 3, pĝ. 23 (47).

**J. Lott (1889)** Ankoraŭ unu grava volapükisto, J u l i u s L o t t, malentuziasmiĝinte pri Volapük, publikigis en la j. 1889 memstaran aposteriorian projekton de kompromisa lingvo [1]. La projekto de L o t t estas por ni speciale interesa, kiomgrade ĝi, en kontraŭtezo al la plimulto de siaj antaŭuloj, akcentas la preferan signifon de la vortaro, kompare kun la gramatiko, kaj dependigas de la elektita vortaro-materialo la elekton de alfabeto, diversaj reguloj de elparolado, de gramatiko kaj sintakso. L o t t, kiel S t e i n e r, opiniis, ke estas plej grave konservi en la universala lingvo skribitajn internaciajn formojn de la ekzistantaj internaciaj terminoj.

Plue, L o t t antaŭenigis por sia tempo treege kuraĝan devizon, sendube kunrilatantan al la tuta progreso de la moderna monda teknika civilizacio. L o t t skribis: «La internacia lingvo ne bezonas esti inventita — ĝi ekzistas. Oni nur devas kolekti ĉiujn ĝiajn vortojn kaj ordigi ilin.» Ne fidante tiurilate je la fortoj de iu sola individuo, L o t t intencis fondi «internacian societon de tutmonda lingvo». La proponatajn de li formojn de la lingvo li konsideris nur provizoraj kaj konservis en sia sistemo grandan flekseblecon. Kelkafoje en specialaj eldonaĵoj (1890 [2], 1899 [3]) en sian sistemon li enportis sufiĉe esencajn korektojn kaj ŝanĝojn.

Por la vortara bazo L o t t prenis la latinan lingvon, sed li ne hezitis kompletigi sian leksikonon ankaŭ per la vortoj nelatindevenaj, kiomgrade tiuj fariĝis internaciaj (ekz.: vagon, telegraph k. al.).

Al la projektoj de L o t t, oni devas atribui sufiĉan gradon de perfekteco. La sola obstaklo en la disvolviĝo de tiuj sistemoj estas ilia nedifiniteco kaj variebleco de iliaj formoj. La ideoj kaj principoj, kiujn sekvis L o t t, nuntempe havas siajn adeptojn kaj heredintojn en la modernaj novlatinaj sistemoj. En la jaroj 1892—1893, en Leipzig, kelkaj adeptoj de «Mundolingue» eldonadis gazeton «Le Kosmopolit». En la j. 1899, speciale por la vizitantoj de la Pariza mondekspozicio estis eldonita gramatiko kaj frazaro de tiu ĉi lingvo, kun la tekstoj en la lingvoj angla, franca, germana kaj itala.

**D-ro A. Liptay (1890)** En la j. 1890 aperis tre interesa verko de d-ro A. L i p t a y en hispana, franca kaj germana lingvoj [4].

L i p t a y, kiel L o t t, asertis ke oni ne devas inventi internacian lingvon, sed trovi ĝin, konstrui el la internaciaj elementoj, troviĝantaj en diversaj lingvoj. Akceptinte tiun tezon, li severe kritikas ĉiujn antaŭe kreitajn universallingvajn projektojn kaj montras siajn simpatiojn nur rilate la projekton de J. L o t t. Sed dum L o t t tamen donis pli aŭ malpli plene ellaboritan sistemon de lingvo, L i p t a y sin limigis per ĝenerala skizo de gramatiko de sia «katolika» (t. e. universala) lingvo kaj per starigo de kelkaj tezoj, ŝanĝeblaj en la estonto.

L i p t a y ne volis akcepti ideon, ke la sistemo de universala lingvo povas esti prilaborita de unu sola homo. Li opiniis necesa fari referendumon inter la personoj interesitaj, kunvoki specialan internacian kongreson kaj fine formi specialan internacian akademion por ellaboro de la lingvo.

---

[1] J. Lott, «Eine Kompromiss-Sprache als beste und einfachste Lösung des Weltsprache-Problems», Wien, 1889.

[2] J. Lott, «Un lingua internazional. Grammatik et Vocabular pro angleses, germanes, romanes et pro kultivates de tutmond», Viena, 1890.

[3] J. Lott, «Un lingue international pro le cultivat nations de tot mund», Vienna, 1899.

[4] Dr. Alberto Liptay. «Eine Gemeinsprache der Kulturvölker», Leipzig, 1891 ([47]). La hispanlingva eldono aperis en Parizo en la j. 1890, la franclingva samloke en la . 1892.

L i p t a y opiniis ebla ne fari iun gramatikon, kontentiĝante per la elementoj de vortaro kaj per difinitaj reguloj de vortordo. Tamen poste li devis forĵeti ĉi tiun intencon. Ĉiuokaze li penis kiel eble minimumigi ĉiujn gramatikajn regulojn.

La ideo de L i p t a y estis aprobita de la fama filologo M a x M ü l l e r, kiu konsilis al L i p t a y alkonduki la ellaboron de lia projekto ĝis fino kaj eltiri ĉiujn internaciajn radikojn el la vortaroj de la ekzistantaj lingvoj, sed, bedaŭrinde, la vortaro de la lingvo de L i p t a y restis neellaborita. La ĉefaj tezoj de lia sistemo estis evoluitaj ĝis logika fino jam en la XX. jarcento de la lingvistoj scienculoj, reformintaj la latinan lingvon (vidu ĉap. XI.).

Itala scienculo, direktoro de zoologia muzeo en Torino, d-ro D. R o s a, ekkoninte la projekton de H e n d e r s s o n («Lingua», vidu p. 143), decidis doni skiz-projekton de la konstruo de universala lingvo, kiu estus liberigita de la devo konservi la formojn de la mortinta latina. D-ro R o s a, volis krei tian lingvon: 1. por ke ĝin povu legi ĉiuj sciencistoj sen iu speciala preparo, aŭ traleginte nur kelkajn klarigajn liniojn, 2. por ke oni povu skribi en ĝi sen granda peno, traleginte kelkajn klarigajn paĝojn kaj ne bezonante novan vortaron (8). D-ro D. Rosa (1890)

Sekvinte la principojn, komunajn al L o t t kaj L i p t a y, d-ro R o s a konstruis sian projekton sur la bazo de internacia latina vortara materialo.

La amplekso de gazetartikolo, en kiun enmetis sian projekton d-ro R o s a [1], esceptis la eblecon de pli profunda prilaboro de tiu ĉi projekto. Rezultiĝis nur skizo de lingvo, sed skizo sendube serioza laŭ sia pripensiteco kaj idea tuteco. Kiel ekzemplo de tiu ĉi lingvo povas servi la jena teksto: «L e n o v l a t i n n o n r e q u i r e s p r o l e s u i a d o p t i o n a l i q c o n g r e s s. O m n e s p o t e r c u m l e s p r a e c e d e n t r e g u l a s, s c r i b e s s t a t i m i s t l i n g u a, e t i a m s i i l s v o l e s, c u m p a r v i n d i v i d a l m o d i f i c a t i o n e s (La novlatina ne bezonas por sia adopto iun kongreson. Ĉiu povas laŭ la antaŭdonitaj reguloj skribi tuj ĉi tiun lingvon, eĉ se li volas, kun iometaj individuaj modifoj)».

Citaĵon pri alia analogia projekto de G a s t é el Aix les Bains (Francio), kun la identa titolo «Nov latin» kaj rilatanta al la sama j. 1890, donas L. B o l l a c k (10). P. S t o j a n (40) tiun verkon ne registris. Estas supozoj, ĉu ĝi ne estas la projekto de d-ro R o s a? Gasté (1890)

Alispeca projekto, treege atentanta la solan gramatikon, estis prilaborita en la j. 1893 de F. M i l l [2]. F. M i l l kreis sian lingvon kiel antitezon kontraŭ Volapük. Li donis al ĝi eĉ konvenan titolon «Anti-Volapük». F. Mill (1893)

Tiu ĉi projekto prezentas per si simpligitan aposteriorian gramatikon, kiun oni povas akomodi al ĉiu lingvo. Al tiu ĉi gramatiko estas propraj la internaciaj, tiel nomataj gramatikaj radikoj: numeraloj, pronomoj, radikaj adverboj, prepozicioj kaj konjukcioj. La substantivoj, adjektivoj kaj verboj devis esti prenataj senpere el iu natura lingvo. Tiamaniere, la projekto prezentas per si priformigon de tio, kio estis planita de la aŭtoro de la Pazilingvo — S t e i n e r (1885).

Eĉ la eldonejo de tiuj verkoj de S t e i n e r kaj de M i l l estas la sama — H e u s e r en Neuwied.

---

[1] D-ro Daniele Rosa, «Le Nov-latin — international scientific lingua super natural bases», en «Bolletino dei Musei di Zoologia et Anatomia della R. Università di Torino», vol. V, n-o 89, 15. Okt. 1890.

[2] Fred. Mill, «Anti-Volapük oder die Mezzofanti-Sprache. Eine einfache internationale Grammatik als Schlüssel für alle Sprachen, gleichzeitig als telephonische Geheimsprache», Neuwied, 1893.

Laŭ tiu ĉi projekto ekzemple la rusa frazo: «Dom mojego otcá i djádi nahoditsja na uglu ulicy» (La domo de mia patro kaj onklo troviĝas ĉe la angulo de la strato), devus esti tiel skribita: «Li dom de mi otjez e de mi djadja esa la ugol de tsche uliza.» Evidente, tiu ĉi projekto ne postulis seriozan trakton. Por utiligi ĉi tiun «internacian» gramatikon, oni devus antaŭe ellerni la plej komplikajn vortarojn de ĉiuj popoloj. Krom tio, ĉe la eventuala praktika uzado de tiu ĉi projekto kreiĝus superfortaj obstakloj pro la problemoj de ortografio kaj elparolo. Ĉi tiun flankon Mill nek pripensis, nek antaŭvidis.

La samaj ideoj estis, kiel ni jam vidis, pli poste utiligitaj de V. Ĉeŝiĥin en lia projekto Nepo (1913 j. vidu p. 111).

**E. Heintzeler (1893)**

Alia projekto de universala novlatina lingvo aperis en la sama jaro en Stuttgart[1]. Ĝia aŭtoro — E. Heintzeler, simile al Lott kaj Liptay, opiniis necesa ne inventi internacian lingvon, sed elĉerpi ties elementojn el la ekzistantaj lingvoj. La ĉefan atenton, kontraŭe al Mill, li donis ĝuste al la vortaro, malmulte atentante la gramatikon kaj mallongiginte ĝin ĝis ebla minimumo.

Ĉar la plej granda nombro de internaciaj vortoj en la modernaj lingvoj estas de greko-latina deveno, tial estas tute nature, ke la vortaro de la nova lingvo estu kompletigata ĝuste per ĉi tiuj grekaj kaj latinaj vortoj. Sed, dum kelkaj aliaj aŭtoroj prenis la latinajn radikojn preskaŭ neŝanĝitajn aŭ malmulte modifitajn, E. Heintzeler prenis tiujn vortojn en la formoj, en kiujn ili elfandiĝis en la ekzistantaj, vivantaj naturaj lingvoj.

La aŭtoro komunikas en sia libro, ke li estis preparinta por preso vortaron de sia sistemo, sed ĝi neniam estis eldonita.

En la j. 1895 Heintzeller publikigis broŝuron pri la «science necesaj bazoj» de uzebla mondlingvo (40).

**La nekonataj projektoj de la jaroj 1888—1900**

Al la sama tempo rilatas plua serio da analogaj projektoj, parte presitaj, parte restintaj en manuskriptoj. En la arĥivejo de la volapükista Akademio, restinta post la morto de V. K. Rosenberger, troviĝis en manuskripto rilatanta al la j. 1893—projekto de internacia lingvo Lingua monde de la membro de la Akademio, usonano Edwin D. French. En la arĥivaj materialoj de la Peterburga societo esperantista «Espero», konserviĝis rilatanta al la sama tempo anonima manuskripta projekto «Projecto de una gramatica de la Lingua internazional» (47), enhavanta en si multe da trajtoj, similaj al tiuj de la projektoj de J. Lott. Ĉe V. F. Ŝmurlo troviĝas restinta al ni nekonata projekto «Parlo», de iu C. Rietmann, datita per la j. 1894.

P. E. Stojan (40) citas plurajn aŭtorojn kaj laborojn, restintajn por ni nekonataj: tiun de la hispano Ugarte[2], tiun de la j. 1900, eldonitan sub pseŭdonimo Umano[3] k. a. Ĉiuj-ĉi citoj estas tre koncizaj — sen montro de la enhavo.

**La reformita projekto de Esperanto (1894)**

Ĉiuj ĉi projektoj per sia multenombreco malebligis la sukceson de iu el ili. La afero de la lingvo Esperanto, kvankam tuj ricevinta certan nombron da adeptoj, malfacile konkeris la pluan fidon tie, kie ĝi estis kompromitita per la bankrotiĝo de Volapük kaj per multenombreco de aliaj konkurantaj projektoj. Kelkaj esperantistoj estis emaj klarigi

---

[1] E. Heintzeler, «Universala — Weltsprache auf Grund der romanischen Sprachen und des Latein», Stuttgart, 1893.
[2] Ugarte, «Proceso de la lengua Universal», Quadalajara, 1889.
[3] Umano, «Langage Humain», Bern, 1900.

tion per malperfekteco de la lingvo, kaj tial projektis diversajn plibonigojn.

Ne estante kontentigita de la formoj de la lingvo A. Grabowski, por pruvi facilan efektivigeblecon de esencaj reformoj, aperigis en la j. 1893, sufiĉe ampleksan antologion de esperantlingvaj versaĵoj, enportinte en la esperantan ortografion kelkajn tre esencajn ŝanĝojn [1].

Tre karakteriza estas la letero de Jan Janowski el Varsovio, datita la 1-an de aprilo (20. de marto) de l' j. 1893 ([47]), kun kiu ĝia aŭtoro sin turnis al la Peterburga societo esperantista kun kritiko de apartaj malperfektaĵoj de Esperanto kaj kun propono pri ilia korekto. La aliaj proponoj de la sama Janowski kaj ankaŭ de kelkaj aliaj esperantistoj estis presitaj en la eldonita tiutempe Nürnberga esperanta gazeto «Esperantisto».

Verŝajne, similaj, ne ĉiam publikigitaj, reformoproponoj estis tre multaj.

Pro premo de reformemuloj la aŭtoro de Esperanto, d-ro Zamenhof estis devigita entrepreni revizion de sia lingvo.

En la j. 1894 en tuta serio da artikoloj, presitaj en la gazeto «Esperantisto», li proponis konsekvencan sistemon de reformoj por Esperanto, kiu tamen, ĉe la balotado de la demando, estis malakceptita de la plimulto da esperantistoj.

La plimulto da esperantistoj, videble, akceptis la vidpunkton de Zamenhof, kiun li esprimis, laŭ la letero de Janowski ([47]), jam en la j. 1893: «Viaj pensoj en si mem estas tre bonaj, sed por fini la multenombrajn diskutojn pri la ŝanĝoj, ni ne plu presos (en la gazeto «Esperantisto») artikolojn pri tiu ĉi temo, ĉar tio ne havus finon kaj la legantoj restos malkontentaj.»

Gravan rolon en la malakcepto de la reformoj ludis L. de Beaufront, kiu protestis kontraŭ la rajto de la aŭtoro ŝanĝi la praktike utiligatan lingvon.

En la j. 1906 la projekto de Esperanto reformita de Zamenhof mem, laŭ iniciato de kelkaj reformemaj esperantistoj, estis eldonita per aparta eldonaĵo [2].

La plimulto da reformoj en tiu projekto havis siajn kiel pozitivajn, tiel ankaŭ negativajn flankojn ([9]). Nepra simpligo estis la forigo de la literoj kun supersignoj, sed tiu forigo iafoje kripligis la ĝenerale konatan internacian ortografion de kelkaj vortoj. La forigo de la deklinacio de l' adjektivoj estus ankaŭ senduba simpligo, se ni ne konsiderus la ioman kutimon por tiu ĉi formo ĉe la multa nombro da personoj, parolantaj la eŭropajn lingvojn.

Komparante la du samajn tekstojn de la unua strofo de «Patro nia» en ordinara Esperanto kaj en la Zamenhofa reformita projekto de la j. 1894, oni povas klarigi la ĝeneralan karakteron de la faritaj ŝanĝoj. En Esperanto: «Patro nia, kiu estas en la ĉielo», en la reformoprojekto: «Patro nue, kvu esten en cielo»...

La laŭvica novlatina projekto, destinata por la rolo de la helpa lingvo, estis eldonita en la j. 1895 de d-ro E. Beerman [3]. La vortaro de tiu ĉi sistemo estis prenita el internaciaj terminoj, renkon-

D-ro E. Beerman (1895—1907)

[1] «La liro de la esperantistoj», eldonis A. Grabowski, Nürnberg, 1893 ([47]).

[2] L. Zamenhof, «Pri reformoj en Esperanto, artikoloj publikigitaj en Nürnberga gazeto «Esperantisto», 1894, kaj represitaj per zorgado de E. Javal». Coulommiers, 1907 ([47]).

[3] D-ro E. Beerman, «Novilatiin, un esaaje de proformaar il Latiin a un lingue usaabil al internasionaal relasions de nostre tempor. Ein Versuch, das Latein zu einer für den internationalen Verkehr unserer Zeit brauchbaren Sprache weiterzubilden», Nordhausen, Leipzig, 1895.

tataj en la plej gravaj lingvoj de Eŭropo. La plimulto de la radikoj tiamaniere estas de latina (aŭ latinida) deveno. La simpligita analitika gramatiko, prezentanta per si ĉion la plej simplan, renkonteblan en iu ekzistanta lingvo, kumpletigas la vortaron. Tamen grandaj malfacilaĵoj de tiu ĉi lingvo kuŝas en ĝiaj komplikaj reguloj de akcentado kaj en la duoblaj vokaloj (vidu la titolon en la subpaĝa noto sur la 157).

Tiu ĉi projekto estis submetita al serioza analizo kaj kritiko flanke de Couturat kaj Leau (8). Post 12 jaroj, en la j. 1907, Beerman publikigis relaboritan projekton de sia lingvo [1], en kiu granda parto de ĝiaj bazaj malperfektaĵoj, kaj en tiu nombro la duoblaj vokaloj, estis forigitaj (9).

La komitato de la delegitaro por la akcepto de internacia lingvo en la j. 1907 ekzamenis la novan proponon de Beerman, sed malaprobis ĝin, pro ĝia granda, ne ĉiam bazita, preferado, donata al la latinidaj radikoj, kaj ankaŭ pro ĝia trograndigita gramatika reguleco, kiu malhelpas lernadon de la lingvo.

A. Nilson (1896—1899)

Kelkajn projektojn, aŭ pli vere, skizojn de universala lingvo, komencante de la j. 1896 ĝis 1899, prilaboris la unua sveda volapükisto A. Nilson. En la j. 1896 Nilson aperas kun la projektoskizo «La vest-eŭropish central dialect» (47). La ekzistantaj kelkaloke informoj, rilatigantaj ĉi tiun projekton al la j. 1890 (1) videble estas bazitaj per eraro. En la sama j. 1896, en iom ŝanĝita aspekto aperis en la mondon nova projekto de Nilson, nomata simple «Central dialekt» [2]. Fine en la j. 1899 Nilson refaras sian projekton de la «Okcident-eŭropa centraldialekto» por iom proksimigi ĝin al la prilaborita aposterioria projekto de la volapükista akademio [3].

Por ekzemplo de la lingvo povas servi jena frazo el la plej laŭtempe lasta projekto: «El auctor pretend un benevolent attention pour cecie sistem, car it es progressed from diligent etudi in volapük, esperanto, anglo-franca lingua...» (La aŭtoro pretendas por bonvola atento al tiu ĉi sistemo, ĉar ĝi progresis el diligenta studo de Volapük ktp...).

La aĝo de la aŭtoro (60 jaroj) malhelpis lin komenci la detalan prilaboron de la vortaro de sia lingvo. Li invitis la volapükistan akademion, «aŭ iun alian grupon da eminentaj lingvistoj» okupiĝi pri tiu ĉi afero, sed tiun inviton akceptis neniu.

Flanke de tiuj tri skizoj staras la kvara projekto de Nilson «Lasonebr» (Lasonebr — un transitional lingvo), rilatanta al la j. 1897, sed konata al ni nur laŭ la nomo. Tiu ĉi lingvo prezentis per si siaspecan provon eŭropigi kaj latinigi la antikvan hebrean lingvon, ĉe kio, malsame al la «Pasilingua hebraica» de F. Lenz en 1887, la ŝanĝon ricevis ne nur gramatikaj formoj de la antikva hebrea lingvo, sed ankaŭ ĝia fundamenta vortar-materialo.

La gazeto «Linguist» (1896—97)

En la jaroj 1896—97 en Hannover Max Wahren Rosenberger, Beerman k. a. komencis eldoni specialan gezeton «Linguist» [4], kiu celis «unuigi ĉiujn amikojn de mondlingvo en la komuna laboro» kaj atingi la finan starigon de tia lingvo. La gazeto aspiris ellabori tian universalan lingvon, kiu estus laŭ siaj elementoj en pleja grado natura kaj internacia. En la gazeto estis publikigataj artikoloj ne nur

---

[1] Prof. Ernst Beerman, «Die internationale Hilfssprache», «Novilatin», Leipzig, 1907.

[2] A. Nilson, «La Central dialekt», Gefle, 1896 (47).

[3] Aug. Nilson, «Il dialect Centralia», Gefle, 1899 (47).

[4] «Linguist», Hannover, 1896—1897.

en la lingvoj — franca, germana kaj angla, sed ankaŭ en ĉiuj artefaritaj lingvoj. La subtitolo de la gazeto: «sendependa gazeto de ĉiuj amikoj de internacia lingvo» — estis presata kiel en la nomitaj naciaj lingvoj, tiel ankaŭ en Volapük kaj Esperanto. Sed kiomgrade la kunlaborantoj de «Linguist» estis unuanimaj en formulado de siaj teoriaj celoj, tiomgrade ili estis profunde malsamideaj en la metodoj de ilia praktika efektivigo.

Iliaj ĉefaj malakordiĝoj disvolviĝis laŭ du linioj: unue, kian formon de internaciaj vortoj oni devas akcepti kiel esencan kaj gravan por la nova lingvo: ĉu sonan aŭ skribitan, kaj due, kiun el la principoj oni devas preferi ĉe la formigo de universala lingvo — ĉu maksimuman internaciecon kun la respektivaj malĝustaĵoj kaj malregulaĵoj de la vortoj kaj derivaĵoj, ĉu la eblan regulecon kaj simplecon de la gramatiko, iafoje konfliktanta kun la principo de internacieco. Kvankam la plimulto de la kunlaborantoj de «Linguist» staris sur la bazo de novlatinaj kaj latinidaj projektoj de universala lingvo, sed tiuj malakordiĝoj kondukis al tio, ke ili ellaboris neniujn difinitajn formojn de nova universala lingvo. Post 14 (P. S t o j a n (40) notas —24?) aperigitaj numeroj «Linguist» ĉesis aperi kaj ĝiaj kunlaborantoj revenis al la individua projektado de siaj propraj lingvosistemoj.


A. Grabowski

A. Grabowski (1896)

Kelkaj esperantistoj, malkontentaj pro la malakcepto de l'reformoj en la jaro 1894 kaj en ilia nombro E. W a h l en Reval (Tallinn) kaj A. G r a b o w s k i en Varsovio ankaŭ partoprenis la laborojn, de «Linguist». G r a b o w s k i en la jaro 1896 publikigis sur la paĝojn de «Linguist» sian «Reforma projecto»[1]. Forigante kelkajn formojn de Esperanto, celante ĉiam pli grandan naturecon de universala lingvo, G r a b o w s k i finfine ellaboris novan latinigitan projekton «analtic modern latin», sed jam baldaŭ li rezignas de ĉiuj penoj krei reformoprojektojn kaj ree sin donas entute al la propagando de Esperanto. En kio kuŝis la esencaj diferencoj de la projekto de G r a b o w s k i kompare kun Esperanto, oni povas vidi el jenaj ekzemploj: en Esperanto — a k c e n t o, n a c i o, d i r e k t o, ĉe Grabowski — a c s e n t, n a c i o n o, d i r e c t s i o n o...


A. Zakrzewski

A. Zakrzewski (1896)

Al la sama periodo (1896) rilatas ankaŭ alia reformprojekto de Esperanto — «Lingua internacional» de A. Z a k r z e w s k i[2]. Jam multe

---

[1] Vidu «Linguist», Hannover, 1896, n-o 3, pĝ. 39—46, «Reforma projecto» (47).
[2] Adam Zakrzewski, «Jezyk miedzynarodowy. Historja, Krytyka, Wnioski», Warszawa, 1905 (47).

pli malfrue, en la jaro 1905, tiu ĉi projekto estis publikigita de sia aŭtoro (restinta esperantisto) en la libro, dediĉita al la problemoj de historio kaj kritiko de internacia lingvo.

Dominan influon por la projekto de Z a k r z e w s k i faris la ideoj de d-ro R o s a (1890) kaj pro tio la tuta projekto pasas laŭ la vojoj de plejebla latinigo kaj romanigo de la fundamenta Esperanto.

**F. Kürschner (1900)**

Alia skiz-projekto de «universala lingvo» de F r. K ü r s c h n e r[1] prezentas per si en multaj rilatoj analogion al la projekto «Mundolingue» de J. L o t t (vidu p. 154). F r. K ü r s c h n e r diras, ke universala lingvo ne devas esti inventita, sed ke ĝi jam ekzistas en la multa nombro da internaciaj terminoj. La dominanta latinlingva deveno de ĉi tiuj internaciaj terminoj garantias la neŭtralecon de nova universala lingvo. «Lingua Komun», aperinta rezulte de la penadoj de K ü r s c h n e r enporti kelkajn reformojn en la lingvon Esperanto (8), estas ne nur pli latinigita, sed ankaŭ multe pli komplikigita formo de universala lingvo. La ĉefan malkontenton de K ü r s c h n e r kaŭzis tiu fakto, ke Esperanto posedas grandan nombron da derivitaj kaj kunmetitaj vortoj, kiuj povus esti anstataŭitaj per la internaciaj, eĉ ne ĉiam regule formitaj vortoj.

Por ekzemplo de tiu ĉi lingvo povas servi la unuaj vortoj de la preĝo «Patro nia»: «Padre nose, kuale tu ese in cielo, sante esa tue nomine, vena imperio tue...»

**La sistemo «Clarison» (1899)**

Ni notu ankoraŭ la konstruitan sur pure latinida fundamento projekton «Clarison» de anonima aŭtoro, rilatantan al la jaro 1899 kaj kies citon ni trovas en la gazeto «Progreso»[2]. La ĉefa atento ĉe la konstruo de tiu ĉi lingvo estis donita al kiel eble plej granda eŭfonio kaj muzikeco. Por tiu ĉi lingvo jena frazo estu ekzempla: «B a b i l o n o t i g r a n d i s a r e c a d i (Granda Babilono falis). P. S t o j a n (40) laŭsupoze notas kiel aŭtoron de tiu sistemo — H e n d e r s s o n(?).

**J. Hummler (1904)**

En la jaro 1904 projekton-skizon de novlatinida lingvo «Mundelingva» donis eksvolapükisto J. H u m m l e r[3] (8). En tiu ĉi skizo de la lingvo estas nenio rimarkinda kaj esence diferenca de la ceteraj, pli frue publikigitaj analogiaj projektoj. La preparitaj por publikigo plenaj gramatiko kaj vortaroj de tiu ĉi lingvo ne aperis (9).

**V. Hely (1905—1908)**

Iom aparte inter la ceteraj esence latinidaj projektoj troviĝas «projekto de gramatiko de lingvo internacia», proponita de V i c t o r H e l y en la jaro 1905[4].

La neprilaborita ĝis la fino projekto de H e l y posedis gramatikon en sia pli granda parto konstruitan sur la bazo de pure aprioriaj reguloj kaj principoj. La vortaron por sia lingvo H e l y intencis preni ekskluzive latindevenan, kompletigante ĝin per la en la latina lingvo mankantaj vortoj, kiuj jam fariĝis internaciaj, kiel: m i c a d o, s p o r t, t e l e g r a p h, a u t o m o b i l ktp.

Tiu ĉi projekto estas senduba paŝo malantaŭen al la tempoj, antaŭirintaj la laborojn de la Amerika Filozofia Societo, al la tempoj, kiam C o u r t o n n e, S t e i n e r kaj E i c h h o r n kreis siajn pro-

[1] Fr. Kürschner, «Die Gemeinsprache der Kulturvölker Lingua Komun auf Grund der in allen Kultursprachen verbreiteten internationalen Wörter», Orselina, Schweiz,1900.

[2] «Progreso», Paris, 1909, t. II, p 173.

[3] J. Hummler, «Mundelingva», Problem einer internationalen Verkehrssprache für alle Menschen. Auf lateinischer Grundlage kunstgefasste Grammatik mit Wörterbuch», Saulgau, 1904.

[4] V. Hely, «Esquisse d'une grammaire de la langue internationale conforme aux idées de Leibniz et aux meilleurs des plus récents programmes», Langres, 1905.

jektojn ĝuste sur la bazo miksanta la ambaŭ principojn: apriorian kaj aposteriorian.

En la jaro 1908 V. Hely aperis kun nova projekto de internacia interpretisto «El interpres international» [1]. En tiu projekto Hely enkondukis pli simpligitajn formojn de la lingvo kaj faris ilin pli internaciaj. Kiel modela teksto de la nova lingvo povas servi: «Nostre pater, qu ses in celum, tu nomen sit sanctifat: tu regnum sit adveniens...»

**H. Trischen (1906)**

Projekton de reformita Esperanto donas H. Trischen el Dresden [2]. Ĉiuj proponoj de Trischen havas provizoran karakteron.

Jen kelkaj ekzemploj el ili: la patro, del patro, lan patro, las patros, dels patros....

Eldonon de la vortaro de sia sistemo li prokrastis, atendante de la vasta publiko konsilojn kaj kritikajn notojn (9). Tiu ĉi vortaro neniam aperis.

**F. Greenwood (1906)**

Brita esperantisto F. Greenwood en la jaro 1906 proponis projekton de reformita Esperanto — «Ekselsioro» [3]. La bazaj korektoj, donitaj de Greenwood, celas plisimpligon de la gramatiko, forigon de la supersignoj kaj de la nepra akuzativo.

En la jaro 1906 Greenwood publikigas alian projekton de lingvo «Ulla», kiu prezentas per si simpligon de la angla [4]. Al apartaj literoj de tiu ĉi projekto Greenwood donas silaban validon, ekz.: anstataŭ la vorto exempla (ekzempla), li skribas simple: xmpla (x=ex, m=em),

Multokaze tiu ĉi nova projekto estas nur reveno al la sistemoj aprioriaj kaj miksitaj, ekz.: Ena — Anglio, Fraja — franca lingvo, Graja — germana lingvo ktp. Jen ekzempla teksto de Ulla: «Vus patra how este u ciele, sankted este dus noma, dux rex doma vene...»

**C. Spitzer (1907)**

Kiel vica tributo al la ideoj de la aprioria gramatiko, estis sistemo de C. Spitzer, malsukcese debutinta en la jaro 1907 antaŭ la juĝo de la Komitato de la Delegacio por akcepto de lingvo internacia [5]. Ĝia aŭtoro — germana komercisto — celis la eblan mallongecon de la lingvo; kaj kiel rezulto de tio, tute ne atinginte tiun mallongecon, kiu estis efektivigita en la projekto «Pan-kel» de M. Wald kaj en la projekto «Dilpok» de Marchand, — Spitzer kripligis la nacilingvajn vortojn ĝis nerekonebleco. Kiel ekzemploj de tiuj arbitre mallongigitaj vortoj en lia sistemo povas servi: sisma = sistemo,, fabra = fabriko.

**S. Hougthon (1907)**

Alia ne ekzaktforme ellaborita projekto, kiu permesas tro grandan arbitrecon en la vortoderivo ktp., estas projekto de usonano S. C. Houghton — «Master Language», ankaŭ prezentita al la Komitato de la Delegacio (15). Ne estis iuj eldonaĵoj en tiu ĉi lingvo. Kvankam por la bazo de la lingvo estas prenita la lingvo latina, sed en ĝi estas permesata samtempa paralela uzado de ĉiuj vortoj el aliaj lingvoj, kiuj ne havas la ekvivalenton en la latina. Tiamaniere la sistemo de Houghton por la ideo de «sinjoro» permesas samtempan uzadon

---

[1] Victor Hely, «L'Interprête international, formule pratique d'une langue auxiliare générale». Langres 1908 (47).

[2] H. Trischen, «Mondlingvo — provisorische Aufstellung einer internationalen Verkehrssprache», Dresden, 1906.

[3] Fr. Greenwood, «Ekselsioro, the new universal language for all nations», London, 1905 (47).

[4] Fr. Greenwood, «Ulla t ulo lingua ü otrs», London, 1906.

[5] C. Spitzer, «Parla ist die systematische Kurz.-Sprache für internationalen Verkehr», Heidelberg, 1907. Aliaj du verketoj de Spitzer, la lasta de 1910 j., estas notitaj ĉe Stojan (40).

de la vortoj: «Monsieur», «Senhor», «Herr», por la ideo de «ĉapelo» — «chapeau», «hat», «hut», «sombrero».

**Blondel (1907)**

Ankoraŭ unu projekto de novlatinida lingvo (nenie kaj neniam presita) estis prezentita al la Komitato de la Delegacio ([15]) de la profesoro de trafiko B l o n d e l, kiu siatempe akre atakis Esperanton antaŭ la Franca Asocio por avancigo de sciencoj [1].

Zorge prilaborita gramatiko, laŭ la atesto de C o u t u r a t kaj L e a u, estis nerefutebla avantaĝo de tiu ĉi projekto. Ĝia manko troviĝas en la tro granda konservado de la principo — latinida vortarpureco de la internacia lingvo, pro kio el la vortaro de tiu ĉi lingvo estis esceptitaj ĉiuj vortoj de nelatinida deveno.

**H. Molenar (1903—1910)**

El la amaso de la aposterioriaj projektoj de tiu tempo oni devas aparte noti la lingvon de bavaro, d-ro H. M o l e n a r — «Pan-roman», kiu poste (por akcenti ĝian universalan, ne nur latinidan karakteron) estis renomita «Universal». Unue en la jaro 1903 en Leipzig, en la gazeto «Religio de la Homaro» [2] aperas artikoloj, dediĉitaj al la sistemo «Panroman». Poste, ĝis la jaro 1909 aperas germanlingvaj propagandaj folioj, gramatiko, vortaro ([47]) kaj legolibro. En la jaro 1907 aperis presita gramatiko de «Universal» por italoj, hispanoj, francoj kaj angloj [3].

En la jaro 1907 d-ro M o l e n a r presas alvokon al la akademioj de ĉiuj landoj pri starigo de unu universala lingvo. En la jaro 1908 kun analogia alvoko li turnas sin al la registaroj de ĉiuj landoj. Certe, neniu registaro same kiel neniu akademio respondis la alvokon. En la jaroj 1907 kaj 1908 en München kaj Leipzig aperadis du gazetoj en la lingvo «Universal» [4]. La tria komencis aperi en la jaro 1910 en Lisabono. Formiĝis kvar grupoj de universalistoj. En la jaro 1909 estis farita provo fondi akademion de la nova lingvo kaj organizi en diversaj landoj ĝiajn reprezentejojn. Sed tiu ĉi movado ne ricevis pluan progreson. En la jaro 1912 d-ro M o l e n a r, sekretario de la «Internacia societo por batalo kontraŭ vakcinado» aperigis je la nomo de tiu ĉi societo prospekton en Universal.

M o l e n a r, sufiĉe influa, germana publicisto, gvidanto de kelkaj progresemaj periodaĵoj, daŭrigis ĝis la lasta, eĉ postmilita tempo publikigi en kelkaj el tiuj periodaĵoj siajn notojn kaj anoncojn en tiu ĉi lingvo. Per tio sin limas la tuta praktika apliko de tiu ĉi lingvo.

La ĉefa celado de M o l e n a r konsistis el tio, ke la lingvo fariĝu kiel eble plej unuspeca (homogena). El tio sekvis rezulto — la konscia limigo de la vortaro per la vorta materialo el sole latinidaj lingvoj.

La ekstera aspekto de tiu ĉi lingvo estas jena: «Patr nostr qui es in ziel ton nom es sanktifizet, ton regh vene, ton voluntat es fazet in ter kon in ziel».

**T. Lévêque**

Tre similas al Universal la projekto de T. L é v ê q u e. La broŝuro, enhavanta gramatikon de tiu ĉi sistemo, estis eldonita en Francio sen jarindiko [5]. P. S t o j a n ([40]) konjektas, ke tiu libro aperis tamen post la j. 1907. Aliaj laboroj dediĉitaj al tiu ĉi sistemo estas al ni nekonataj.

---

1 Blondel, «Sur la question de la Langue Internationale». Congrès de Grenoble, 1904. As. Fr. pour l'avancement des sciences.

2 Vidu: «Die Religion der Menschheit», März und Mai 1903.

3 H. Molenar, «Grammatik de Universal pro italiani, spanioli, francesi, anglesi, germani», Leipzig, 1907.

4 «Universal-Korespondenz, 1907, n-oj 1—12, München ([47]); «Humanitat, organ pro tut interesi humanitar e internazional», 1908, n-oj 1—4, Leipzig ([47]).

5 T. Lévêque, «Ling internacional Mondo», «Clef de Mondo», Villejuif (Seine).

Dum la periodo de la jaroj 1880 ĝis 1907 estis kondukata granda laboro en la rondoj, koncernaj al la afero de universala lingvo. La disfloro kaj bankrotiĝo de Volapük, naskiĝo, unuatempa vegetado kaj ekfloro de Esperanto ampleksas tiun ĉi periodon. La flankaj observantoj faris siajn konkludojn kaj juĝon pri la movado, ne profetante ties finan idealan formon. Kaj tiuj konkludoj, se faritaj sen partieca penso kaj sen antaŭjuĝo de reakciaj konservemuloj, en la granda plimulto estis favoraj por la ideo de universala helpa internacia artefarita lingvo. Eĉ ĉe la plej rigoraj kritikantoj [1], estis rimarkebla iu konscio pri ilia propra senpoveco kaj admiro por la elemente evoluanta, spite de ĉiuj argumentoj de la oficiala scienco, movado de la lingvo internacia.

Generala takso de la periodo 1880—1907

La tuta serio de apartaj broŝuroj, ĵurnalaj kaj gazetaj artikoloj de konataj kaj nekonataj laborantoj en la sfero de l'hompenso, estis dediĉita al la problemo de universala helpa kaj internacia lingvo. En la franca, germana, angla, hispana, rusa kaj eĉ kroata [2] lingvoj aperis presitaj de personoj, flanke starantaj de la senpera partopreno en la universallingva movado, kuraĝigaj konkludoj, kritikaj atentigoj, historiaj observoj kaj resumoj, plane skizantaj la pluan laboron sur tiu ĉi kampo.

Ni jam vidis, ke la plejmulto el la lingvo-projektintoj de tiu periodo ne fidis al siaj individuaj fortoj. Pli kaj pli ofte aŭdiĝis proponoj, ke la internacilingva problemo estu solvata kolektive de iu kolektiva institucio, ke kreiĝu ia internacia societo aŭ akademio por tiu celo.

Sed tiuj proponoj kaj alvokoj, faritaj de izoluloj lingvo-projektintoj, pri kiuj ni parolis en la antaŭirintaj ĉapitroj, restis sen necesa reeĥo. Tamen jam estis iuj kolektivaj fortoj, kiuj partoprenis organizite la mondolingvo-movadon, kaj provis direkti tiun movadon konforme al sia kolektiva kompreno.

Temas pri la rimarkeble kreskinta esperantistaro, pri la personoj grupiĝintaj ĉirkaŭ la fondita en la jaro 1900 Delegitaro por alpreno de la lingvo internacia kaj pri la daŭrinta sian ekziston Akademio de la jam ĉesinta doni iujn realajn vivsignojn—Volapük.

Pri la mondlingvaj laboroj faritaj en tiuj kolektivoj ni parolos en la sekvontaj ĉapitroj.

Doninte la ĝeneralan historion de la aposterioriaj projektoj de la periodo 1880—1907, ni venis proksime al la nuntempaj formoj de novlatinaj artefaritaj lingvoj. Celado konservi la naturajn formojn de la lingvo, kondukanta al ripetado de la esceptoj, malregulaj gramatikaj formoj kaj vortfarado de lingvoj naturaj, estis natura reakcio kontraŭ la abundeco de artefaritaĵoj kaj elpensaĵoj en Volapük. Volapük kaj ĝia akademio «Kadem bevünetik volapüka» estis faktaj fontoj por la serio da lingvoj portantaj supernaturan, superlatinigitan aspekton, kies esencon ni tuj komencos analizi.

---

[1] Karl Feyerabend, «Der Weltsprache-Schwindel», Heilbronn, 1888. — Richard Hamel, «Die reaktionäre Tendenz der Weltsprache-Bewegung», Halle, 1888. — Ch. A. Cingria, «A propos de la langue Esperanto, dit Langue Universelle», Genève (1906?) (47).

[2] Vidu traktaĵon de T. Maretić, «Misli o unijetnom svjetskom jeziku» en «Radovi Jugoslavenske Akademije», Zagreb, VIII, 1892, n-o 183.

## XI

## LA AKADEMIO DE LA TUTMONDA LINGVO VOLAPÜK KAJ ĜIAJ HEREDINTOJ — NOVLATINAJ PROJEKTOJ DE UNIVERSALA LINGVO (1893—1930)

Progreso estas vivo, halto estas morto.
(Devizo de la volapükista societo en Nürnberg, 1885).

En la jaro 1891 prof. Kerckhoffs eksiĝis el la posteno de direktoro en la volapükista akademio. En la jaro 1893 oni elektis novan direktoron — inĝenieron V. Rosenberger el Peterburgo.

Ĝis tiu tempo la volapükista akademio sukcesis montri sufiĉe firmajn celadojn por korekto kaj forigo de la mankoj, enhavataj en la lingvo. Multaj amendoj eniris en la eldonitan de la akademio «normalan gramatikon» [1], kiu tiamaniere fariĝis bazo por ĝiaj pluaj laboroj.

Malkontenta pri la laboroj de sia akademio, la aŭtoro de Volapük, J. M. Schleyer malagnoskis ĝin kaj en la jaro 1893 formis novan— obeeman ilon en siaj manoj. Kaj Rosenberger, liginte kun la restintaj akademianoj regulan korespondadon, proponis al ili komenci plenan revizion de Volapük kaj prilaboron de nova lingvo.

Idiom-Neutral (1898)

El Peterburgo de la 15-a de januaro 1893 ĝis la 15-a de majo 1898 estis forsenditaj 45 cirkuleroj de la prezidanto de la akademio al ties anoj [2]. En tiuj cirkuleroj, skribitaj en Volapük, per konsekvencaj proponoj kaj voĉdonoj estis ellaborita regula sistemo de aposteriora lingvo, nomita «Idiom-Neutral».

Kiel bazo por la laboroj de la akademio estis metita la principo, kontraŭa al la tuta strukturo de Volapük. La gramatiko subordiĝis al la vortaro. La ĉefa postulo starigata antaŭ la vortaro estis kiel eble plej internacia formo de la lingvaj elementoj.

Ĉiuj reformoj estis ellaborataj iom post iom. Estis forigita la principo de la unusilabeco en la radikoj de la lingvo. La litero «r» estis reakceptita por la uzo. La radikoj povis komenciĝi kaj finiĝi per ĉiu litero. Rezulte Idiom-Neutral el la iama Volapük konservis nur kelkajn ĝeneralajn principojn: 1. la neŝanĝeblon de la radikoj kaj gramatikaj elementoj, 2. foreston de la esceptoj, 3. fonetikan abocon kaj 4. la vortoderivadon pere de specialaj afiksoj.

Anstataŭ la 8 vokaloj de Volapük estis konservitaj nur 5 (a, e, i, o, u). La akcentregulo estis reformita: la akcento estis transmetita sur la vokalon antaŭ la lasta konsonanto. Tiamaniere la akcento en la vor-

---

1 «Glamat nomik u Noms stabik Volapüka», Paris, Kluböp kadema (1892?) (47).
2 «Kadem bevünetik Volapüka, Zülags», n-oj 1—45, S. Petersburg (47).

toj de Idiom-Neutral estis varie metata jen sur la lastan, jen sur la antaŭlastan silabon.

Ĉiuj vortoj de Volapük estis anstataŭitaj per novaj vortoj, pli internaciaj laŭ la formo.

La akademianoj donis grandan signifon al la malviva latina lingvo, kiun ili konsideris egalrajta kun la aliaj vivantaj lingvoj. Pro tio la nova lingvo aspektis iom tro latinigita. La rigore konsekvenca ortografio, precipe sekvanta la francan prononcadon, en la skriba lingvo malhelpis la rekoneblecon eĉ de tiuj vortoj, kiel ekz. nacio — n a s i o n.

Por ilustro ni donas akompanitan per traduko tekston de Idiom-Neutral, kiu montras grandan malsimilecon al sia prapatro — Volapük:

«Lingui artifisial es gruped in 3 grupi sekuant:

1. lingui in keli omni elementi es selekted sekuantu sert prinsipi filosofik nedependante da sirkumstans, eske ist elementi eksist in lingui natural, nov u ansian, u no;

2. lingui kontenant prinsipii filosofik, ma prendant formi mult eks lingui natural;

3. lingui konstrued eks elementi eksistant in lingui natural».

(Lingvoj artefaritaj estas grupigataj en 3 sekvantaj grupoj:

1. lingvoj, en kiuj ĉiuj elementoj estas elektitaj laŭ certaj filozofiaj principoj, nedepende de la cirkonstancoj, ĉu tiuj elementoj ekzistas en la naturaj lingvoj, novaj aŭ antikvaj, ĉu ne;

2. lingvoj, entenantaj filozofiajn principojn, sed prenantaj multajn formojn el la lingvoj naturaj;

3. lingvoj konstruitaj el elementoj ekzistantaj en lingvoj naturaj).

La ĝeneralajn laborojn de la Akademio gvidis R o s e n b e r g e r. Jam en la jaro 1895 en siaj cirkuleroj [1] li donas en Volapük projekton de nova gramatiko («Ployed glamata») kaj tekstajn ekzemplojn, posedantajn ĉefajn ecojn de nova lingvo, kiun R o s e n b e r g e r nomis «Lingu Internasionik». Apartaj tekstoj en tiu ĉi lingvo aperis ankaŭ aliloke, ekz. en la gazeto «Linguist», 1896, n-o 3 ([47]).

Post la jaro 1898 direktoro de la akademio estis elektita A. H o l m e s el Rochester (Usono). La polurado de apartaj lingveroj de la nova lingvo kaj laboro de la akademio estis daŭrigata sub lia gvido.

La ekzistinta de post la jaro 1889 peterburga grupo de volapükistoj, kies inspira prezidanto restis V. R o s e n b e r g e r, aliĝis al Idiom-Neutral.

En la jaroj 1902—1903 en la lingvoj: germana [2], angla kaj holanda aperis plenaj vortaroj de la «neŭtrala idiomo» kun mallonga gramatiko.

Akademiano B o n t o v a n B i j l e v e l t en Bruselo en la jaroj 1904—1905 organizis intensivan propagandon de la lingvo, presinte kelkajn propagandajn artikolojn en holandaj ĵurnaloj kaj rezulte fondis lokan grupon de idiom-neŭtralistoj.

Pluaj 3—4 grupoj formiĝis en aliaj lokoj. La esperantista societo de Nürnberg (volapükista de 1885 ĝis 1888) opiniis sia devo aliĝi al la nova lingvo.

En la jaroj 1906—1908 inĝeniero R o s e n b e r g e r en Peterburgo eldonis gazeton «Progres» [3] en Idiom-Neutral. En la jaro 1907

---

[1] Vidu: «Kadem bevünetik Volapüka», Zülag n-o 15 de 25. aprilo 1895 kaj n-o 16 de 30. aprilo 1895 ([47]).

[2] W. Rosenberger, «Wörterbuch der Neutralsprache (Idiom-Neutral)», Leipzig, 1902([47])

[3] «Progres», reviu internasional pro omni interesi de Idiom-Neutral, S. Petersburg, 1906—1908 ([47]).

B o n t o  v a n  B i j l e v e l t dum unu jaro aperigis gazeton «Idei international» [1], kie li enkondukis jam kelkajn korektajojn en la lingvon. Sian variaĵon de la korektita Idiom-Neutral B o n t o nomis «Lingua European». Ĝiaj ĉefaj diferencoj de Idiom-Neutral konsistas el la pli internacia formo de la ortografio kaj gramatikaj reguloj, ekz. n a t i o n anstataŭ n a s i o n. Kelkaj pluaj propagandaj folioj estis aperigitaj en lingvoj franca, germana kaj angla. En la rusa lingvo en Peterburgo aperis hektografita gramatiko en 16 paĝoj. Idiom-Neutral ne ricevis tiun sukceson, kiun deziris vidi ĝiaj kreintoj — la akademianoj idiom-neŭtralistaj.

La ĉefa kaŭzo estis, ke la lingvo internacia en manoj de la akademianoj restis certagrade retorta faraĵo ne aplikata kaj ne elprovata de la vasta publiko. Tiun pli vastan aplikon ĝenis parte la jam kreskinta kaj pli-fortiĝinta Esperanto — movado, parte — la malbona memoro restinta el la tempoj Volapükaj kaj parte—la limigita kolektivisma principo en la lingvo-kreado, kiu vere prenis la lingvo-evoluigon el la manoj de apar-ta persono, sed ne transdonis tiun kreadon al la praktika uzo, al la vasta publiko.

Ni kvazaŭ observas en Idiom-Neutral starigon de certa burĝe-demok-rata respubliko, de parlamento—anstataŭ la feŭda suverenec-estrado de S c h l e y e r dum la epoko de Volapük. Certe tio jam estis progreso, sed progreso ne sufiĉa. La artefarita lingvo povis kreski kaj pluen evolui ankaŭ nur artefarite, obeante certajn dekretojn de certa Akademio. Libera lingvoevoluo fakte forestis.

Serio da novaj projektoj, el la grupo de idiomneŭtralistoj mem, nur verdiktis fiaskon de la tuta sistemo. Trovante, ke Esperanto kaj al ĝi parencaj projektoj estas tro artefaritaj kaj dume tro malproksime sta-rantaj de la naturaj lingvoj, la eks-neŭtralistoj elektis vojon de plia latinigo de la lingvo.

La Delegacio por akcepto de internacia lingvo (1900)

Dum la internacia ekspozicio de la jaro 1900 en Parizo, inter la par-toprenantoj de multaj tiutempe kunvokitaj internaciaj kongresoj, nas-kiĝis ideo pri la starigo de internacia lingvo. Kelkaj tiuspecaj kongre-sanoj fondis «Delegacion por akcepto de internacia helpa lingvo». Kiel sekretario kaj kasisto de la delegacio estis elektitaj la parizanoj—profe-soroj L. L e a u kaj L. C o u t u r a t. En la membraron de la Dele-gacio povis esti akceptataj scienculoj kaj profesoroj de la superaj ler-nejoj kaj ankaŭ diversaj societoj, organizaĵoj kaj institucioj. La Dele-gacio celis instigi la proksiman internacian kongreson de Sciencakade-mioj esplori la problemon de internacia lingvo. Sed tiu kongreso en la jaro 1904 malakceptis la pridiskuton de tiu ĉi problemo, proklaminte, ke ĝin devus solvi la vivo mem. Tiam la Delegacio, kalkulanta en sia membraro ĉirkaŭ 1200 scienculojn kaj profesorojn el ĉiuj landoj kaj ĉir-kaŭ 300 societojn kaj organizaĵojn, decidis elekti specialan komisionon, al kiu ĝi komisiis la finan solvon de la problemo pri la elekto de unu in-ternacia helpa lingvo. En la jaro 1907 en Parizo okazis kongreso de la komisionanoj, elektitaj de la Delegacio.

Kelkaj aŭtoroj preparis siajn projektojn por prezento al la esploro de tiu ĉi komisiono. Apartaj sistemoj kaj projektoj de la lingvoj estis rapide netigataj kaj korektataj de siaj aŭtoroj, por esti prezentitaj en la plej bona kaj parada aspekto. Montriĝis la neceso fari korektojn ankaŭ en Idiom-Neutral.

Eĉ la iniciatinto de la «neŭtrala idiomo», V. K. R o s e n b e r-g e r en la jaro 1906 en sia gazeto proponis [2] enkonduki kelkajn reformojn

[1] «Idei international» — revue in lingua european, Bruxelles, 1907 (47).
[2] Vidu «Progres», S. Petersburg, n-o 5, 1906.

de la «neŭtrala idiomo» kun ĉefa celo fari ĝin ortografie pli internacia. Kiel rezulto de tiu ĉi propono sekvus, ke preskaŭ 12% da idiom-neŭtralaj vortoj devus ŝanĝi sian aspekton. Sed apartaj reformantoj kaj en ilia nombro E. de Wahl el Reval (nuna Tallinn) restis nekontentigitaj pro la limigiteco de ĉi tiuj reformoj. Wahl donis skizan projekton de siaj reformoj, kiun Rosenberger presis en la sekvinta numero (n-o 6, 1906) de sia gezeto. La akademiano Pinth el Luxemburg samtempe proponis analogian reform-projekton nomitan de li «Idiom Neutral reformed» [1].

En la jaro 1907 Rosenberger akceptis la plimulton el la proponoj de E. de Wahl kaj Pinth kaj turnis sin al la akademio de Idiom-Neutral kun propono akcepti la koncernajn reformojn (vidu «Progres», 1907, n-o 2). Sian novan projekton, plene presitan jam en unu el la sekvintaj numeroj de la gazeto, Rosenberger nomas «Proyekt de Idiom Neutral reformed 1907» [2].

Ĉefa gravaĵo en ĉiuj tiuj projektoj estas detruo de la principo: al unu sono kunrespondu unu litero. Laŭ la cirkonstancoj la sonon «k» povas esprimi la literoj «k, c, q, x»; la litero «g» en diversaj okazoj estas prononcata jen kiel «g», jen kiel «ĝ».

Per tio oni atingas plian internaciecon de la ortografio, sed samtempe oni perdas la simplecon de la gramatika konstruo.

Pli poste aperis ankaŭ aliaj projektoj de la modifo de Idiom-Neutral: en la jaro 1908 «Corintic» [3] de A. Miller kaj en 1909 «Idiom Neutral modifiket» de prof. J. Meysmans.

En serio de siaj artikoloj Meysmans [4] klare montris sian inklinon al la novlatinidaj projektoj.

El ĉiuj tiuj projektoj la Komisiono de la Delegacio havis eblecon esplori nur la primitivan Idiom-Neutral kaj la reformitan projekton de Rosenberger. Ĝi malakceptis tiujn projektojn samkiel la supernaturajn projektojn de novlatinistoj kaj elektis la latinidigitan projekton de reformita Esperanto, kiun poste oni nomis Ido. Tio certe ne povis kontentigi la aktivulojn de la idiom-neŭtralista akademio, jam dekkvin jarojn kritikintajn Esperanton kaj dum la sama tempodaŭro ellaborintajn siajn proprajn sistemojn.

**Fakta estingiĝo de Idiom-Neutral**

Ni jam konstatis la malkonkordon inter la socia menso de la XIX jarcento kaj la aŭtokrate feŭdaj pretendoj de Schleyer, kiuj kondukis al disfalo kaj estingiĝo de Volapük-movado. Tamen ni vidis, ke grupeto de Volapükistoj konservigis ĉirkaŭ la opozicianta al Schleyer Akademio. Tiu grupeto kreis sian novan lingvosistemon, principe kontraŭan al la sistemo de Schleyer. Nun ankaŭ tiu nova sistemo disfalis kaj ĝiaj lastaj adeptoj ĉu lasis por ĉiam la mondolingvan movadon, ĉu revenis al la antaŭekzistinta epoko de la individualista lingvoinventado.

Kiaj do estis la kaŭzoj de tiu fakto?

Certe en la j. 1906 la Esperanto-movado jam estis pli forta ol la movado por Idiom-Neutral. Sed ankoraŭ en la j. 1900 Esperanto apenaŭ vegetis, kaj Idiom-Neutral jam estis fakte preskaŭ finellaborita. Tiam do ĝi povis konkuri kaj eble eĉ ne sensukcese kun Esperanto. Kial do tiu konkuro ne donis ŝancojn al la iamaj akademianoj de l'iama Volapük?

---

[1] J. B. Pinth, «Idiom Neutral reformed», Neudorf (Luxemburg), Juli 1907.
[2] Vidu «Progres», 1907, n-oj 5—6 ([47]).
[3] Vidu artikolon de A. Miller «Provizora Gramatiko de Corintic» en la gazeto «Correspondance International», Carlisle, Anglia, 1908, n-o 7.
[4] En «Discussiones», Torino, 1909.

Ŝajnas, ke al tiu ĉi demando ni povas trovi respondon, utiligante certajn historiajn analogiojn. Fiaskis la principo de aŭtokrata feŭdalismo. Ĝin fiaskigis la burĝe-demokrataj tendencoj de la fino de XIX. jarcento. Sed tiu burĝe demokrata tendenco, propra al la estintaj akademianoj de Volapük, sukcesis anstataŭ la principo de diktatoreco de aparta persono — nur fiksi propran al ĝi principon de certa demokratia parlamento, konsistigata el la superaj tavoloj de la mondolingvistoj, kiuj anstataŭ S c h l e y e r nun devus zorgi pri reguligo kaj plua evoluigo de la lingvo.

La elementoj, formintaj la Akademion de l'estinta Volapük kaj de la nova Idiom-Neutral, ne povis kompreni, ke la internacia lingvo, kiun ili volis donaci al la homaro, devas fariĝi senrezerva propraĵo de la homaro, ne devas esti ĝenata en sia eventuala evoluo per iuj dekretoj kaj decidoj Akademiaj.

La lingvo—perfekte socia instrumento—samgrade ne povis esti propraĵo de unu persono, kiel propraĵo de iu aŭtokrata kolektiva centro, eĉ se tiu centro estus elektata laŭ la plej perfektaj demokratiaj metodoj.

Pro sia dependeco de la Akademio — Idiom-Neutral estis ĝenita en sia evoluo kaj en sia disvastiĝo. Tiàl ĝi restis en sia disvastiĝo multe pli malantaŭe kompare kun la pli senĝene evoluanta Esperanto. Kaj tial post kelkaj jaroj la akademianoj de Idiom-Neutral devis konstati, ke ilia provo estis plene fiaskinta.

Tiam okazis rea turniĝo en la sorto de la Akademio.

**G. Peano—direktoro de la akademio (1909)**

En la jaro 1908 la direktoro de la akademio A. H o l m e s rifuzis la pluan okupon de la posteno kaj anstataŭ li oni elektis profesoron P e a n o, kiu en la jaro 1909 en urbo Torino komencis eldoni novan gazeton [1]. Laŭ la iniciativo de P e a n o estis faritaj amendoj en la statuto de la akademio, kiu konservis sian laŭtan titolon, sed fakte fariĝis volontula societo, kie ĉiu persono, per kotizo de 10 frankoj jare, fariĝis akademiano kaj partoprenanto en la laboroj de la akademio. La ekzistinta de post la jaro 1887 akademio tiamaniere neniiĝis.



Insigno de Interlingua

La lingvo povis esti influata pli efike kaj pli demokrate de ĉiuj interesemuloj. Falis la aŭtokrata «ŝajne parlamente-demokrata» regado—de la iama Volapük-Akademio, kiu iam starigis sian aŭtokratecon anstataŭ la aŭtokrateco de S c h l e y e r — kaj kiu poste ne scipovis tiun aŭtokratecon lasi.

En la akademion sin ĵetis ĉiuj malsukcesintaj aŭtoroj kaj inventistoj. La nova «akademio» proklamis principojn de «la plej granda natureco» kaj de «tuja kompreneblecо», kaj lasis al siaj membroj-adeptoj liberecon en la uzado de kiu ajn sistemo de la lingvo.

La novlatinaj projektoj rapide gajnis preferatan pozicion en la akademio kaj venkis la ceterajn.

**«Interlingua»**

Kiel lingvo de la akademio anstataŭ Idiom-Neutral estis akceptita «Interlingua», fakte preskaŭ tute ne modifita primitiva sistemo de P e a n o — «Latino sine flexione». (vidu p. 137)

Por doni la eblecon fari diversajn variaĵojn, la ĉefaj reguloj de la lingvo, akceptitaj de la akademio, estas treege ĝeneralaj kaj preskaŭ tute ne tuŝas la gramatikajn problemojn. Ni donas plenan tekston de tiuj reguloj:

«Interlingua» havas la plej internacian vortaron kaj la plej mallongan gramatikon.

I. L a v o r t a r o

La akademio akceptas ĉiujn vortojn, etimologie komunajn al la vortaroj: angla, germana, franca, hispana, portugala kaj rusa.

---

[1] «Academia pro interlingua. Discussiones», Torino.

Kaj ĉiujn vortojn komunajn al la vortaroj angla kaj latina.
Kaj la internacian nomenklaturon, kiun oni uzas en botaniko, zoologio, kemio ktp.

II. O r t o g r a f i o

Ĉiuj internaciaj vortoj, enhavataj en la lingvo latina, konservas la formon de la latina radiko.
Estas permesite ŝkribi anstataŭ ph — f, anstataŭ th — t, anstataŭ oe kaj ae — e.
Estas permesite forĵeti la lastan vokalon en la vortoj, kiam tio ne kreas duban sencon.

III. F o n e t i k o

La elparolo de la latinaj vortoj estas laŭ la antikva latina.

IV. G r a m a t i k o

Estas permesite forigi ĉiujn ne necesaĵn gramatikajn elementojn.
Sufikso s formas multenombron.
Jam pli malfrue al tiu ĉi sufikso estis aldonitaj du pluaj sufiksoj: re —por infinitivo kaj to por la pasivaj participoj.

Resume — la ĉefa karakterizilo por Interlingua — kompare kun la ĝin antaŭrintaj artefaritaj lingvo-sistemoj — estas, ke ĝi plene konservis fleksian karakteron de la eŭropaj lingvoj. Certe per tio apartaj derivitaj lingvo-formoj akiris plian similecon kun la konformaj elementoj de la okcident-eŭropaj lingvoj, sed samtempe la lingvo fariĝis multoble pli malfacila por studado al personaj, ne konantaj la latinan aŭ la okcidenteŭropajn lingvojn. Ĝuste la aglutina karaktero de Esperanto kaj de aliaj similaj projektoj estis kaŭzo de ilia esenca facileco kaj struktura demokrateco. Tiu do faktoro en la lingvo-strukturo de Interlingua estis plene forigita.

R o s e n b e r g e r, konsiderante la arbitran modifon de la statuto de la idiomneŭtralista akademio kiel detruon de la principoj de ĝia funkcio, eksiĝis el ĝia membraro kaj rifuzis esti ĝia vicprezidanto.

P e a n o en la jaro 1909 eldonis multe kompletigitan duan eldonon de sia «Komuna vortaro de la eŭropaj lingvoj» [1].

**G. Pinth (1914)**

Pastro P i n t h el Luxemburg, iama volapükisto kaj idiom-neŭtralisto kaj idisto, kaj finfine fariĝinta akademiano de Interlingua, eldonis dum la jaroj 1911—1917 serion da lernolibroj en lingvo germana. [2] En la jaro 1914 P i n t h enportis kelkajn aldonojn kaj korektaĵojn en la bazan sistemon de P e a n o. Pro tio oni ne sen pruvo povas paroli pri la memstara lingvosistemo de P i n t h.

La gramatikoj de Interlingua aperis ankaŭ en franca kaj itala lingvoj. En Interlingua estis eldonitaj kelkaj vortaroj de diversaj aŭtoroj kaj kelkdekoj da apartaj broŝuroj kaj folioj. Ilia dominanta enhavo estis matematikaj kaj filologiaj traktaĵoj. La sola pli solida verko estas traduko de tragedio «Athalia» de J. Racine, farita de P i n t h [3].

Gazetoj, dediĉitaj al la novlatinaj sistemoj de la Interlingua tipo, krom «Discussiones», estis «Lingua internationale» (eld. de J. M e y s m a n s en Bruselo, 1911), «Revista Universale» de la jaroj 1911—1915 (eld. de B a s s o en Ventimiglia, Italio) kaj la forlasinta en la jaro 1910 sistemon Ido anglolingva gazeto «The international language» (eld. de G. M o o r e ĝis la jaro 1915 en Londono).

Konforme al siaj principoj la sistemo de Interlingua prezentas nenion nevarieblan kaj dum la tuta ekzisto de la akademio aperis novaj projektoj kaj variaĵoj de la novlatino, kaŝantaj sin sub la ĝenerala nomo de la akademia lingvo «Interlingua».

---

[1] G. Peano, «Vocabulario Commune ad linguas de Europa», Torino, 1909 (47).
[2] G. P. Pinth, «Die internationale Hilfssprache Interlingua», Luxemburg, 1911 (47).
[3] «Athalia» — tragedia de J. Racine in Interlingua ab J. Pinth, Luxemburg, 1912.

Kaj aliaflanke al «Academia pro Interlingua» aliĝis ĉiuj senescepte pli postaj projektantoj kaj simpatiantoj de la latino modernigita.

Tial en tiun ĉi ĉapitron ni metos ĉiujn pluajn projektojn de la Latino Moderna, ideologie kaj organize ligitajn kun la estinta Volapük-Akademio.

**Ŝkrabec (1908—10)**

Inter aliaj similspecaj projektoj la plej peza projekto de reformita latino estis la projekto «Eulalia» de slovena pastro Ŝ k r a b e c. La tuta tiu ĉi projekto kaj ĉiuj tekstoj en ĝi estis presitaj en la jaroj 1908—1910 en slovena katolika jurnalo [1].

En siaj unuaj artikoloj kaj notoj la aŭtoro kritikas Esperanton kaj komence de la dua duono de la jaro 1908 donas skemon kaj ekzemplojn de la teksto en Eulalia. Por tiu ĉi sistemo estas karakteriza treega abundo da supersignoj. La lingvo estas malgracia kaj lacigas per unusoneco de siaj formoj. Ekzemple: «Patre noijo quo éna vi iei coeloi sanctificáolue ie nomine tôje, advenieónus ie régno tóje...»

La nombro 32.678 estas skribata kaj prononcata en tiu ĉi lingvo terideciduimilli sexicenti septideciocti.

C o u t u r a t [2], kritikante ĉi tiun sistemon, komparas tiun ĉi esprimon kun la esperanto-ida: tridek dumil sescent sepdek ok.

**W. Moeser (1910)**



W. Moeser

Kiel provo modernigi la latinon, kun tamen tro forta influo de la antikva latina vortaro, estas la «duonlatino» (Semilatin) de W M o e s e r, kiu aperis publike sub pseŭdonimo «Aŭstriacus» [3]. En la j. 1912 li enportis en tiun projekton kelkajn korektaĵojn, kaj en la j. 1921 la sama aŭtoro publikigis alian projekton, en kiu kelkaj propraj ecoj de Semilatin estas akomoditaj kaj konformigitaj al la ĉefaj postuloj de la «Academia pro Interlingua» [4].

Kiel ekzemplo, ilustranta la ŝanĝojn, kiujn M o e s e r enmetis en la latinon, povas servi paralela traduko de jena frazo: «Sen okuloj ni ne povas vidi, sen oreloj ni ne povas aŭdi» — en la latino: «Sine oculis non possumus videre, sine auribus non possumus audire» kaj en Semislatin: «Sone okulos nos non po videre, sone aures nos non po audire». Ĉiuokaze estas multaj malfacilaĵoj en tiu ĉi projekto kaj rilate al la facilkompreneblo tiu ĉi sistemo estas multe pli malracia, ol la sistemoj Romanal kaj Latino sine flexione.

Certan sukceson vidis kelkatempe la simila al la projekto de M o e s e r, kaj al ĝi samtempa, projekto de «lingua perfect» de la membro de

[1] «Cvetje z vertov sv. Franciska», 1908 — n-oj 4, 5, 7, 8, 9,11, 12; 1909 — n- oj 1, 2; 1910 — n-o 5.

[2] «Progreso», Paris, I y., n-o 12, 1909, Febr., pĝ. 733.

[3] «Halblatein (Semilatin)». Ein neues Weltsprache-Projekt von Austriacus, Wien, 1910 (47).

[4] Wilfrid Moeser, «Interlingua in forma di Semilatin illustrad per cento exemplo», Wien, 1910 (47).

«Academia pro Interlingua», prelato A. H a r t l el Linz [1]. La specialaj ecoj kaj distingaĵoj de tiu projekto, samkiel de la aliaj, al ĝi analogiaj novlatinaj sistemoj, sin montras en kelkaj specialaj trajtoj de ortografio kaj en apartaj gramatikaj reguloj. Kiel detalo, en Lingua perfect la vortaràj latinaj formoj estas preferataj al la formoj internaciaj, ekz. anstataŭ «atako» (latinlingve — attactus) estis prenita vorto a t t a c t u, kies formo al ĉiuj nelatinistoj estas tute nekonata.

En la j. 1911 la germanlingva lernolibro de H a r t l estis tradukita en Idon kaj eldonita de eks-idisto kaj aŭstria antisemido H. K r e n n. La klubo de idistoj en Wien aliĝis al la sistemo de Lingua perfect. En la lingvo de H a r t l aperis kelkaj libroj kaj en ties nombro la «Vortaro kaj terminaro de atletiko». De la j. 1911 ĝis 1913 en Linz estis eldonata aparta ĵurnalo, dediĉita al la propagando de la lingvo Perfect [2].

En la j. j. 1919 kaj 1922 A. H a r t l eldonis du lernolibrojn de Interlingua, la unuan en la lingvo germana kaj la duan, speciale verkitan, en la novlatina lingvo. En tiu lasta eldonaĵo H a r t l jam komplete akceptis la bazan formon de «Latino sine flexione» [3].

**D-ro Ernsts (1910)**

Ĉiuj nomitaj novlatinaj projektoj fariĝis tiom proksimaj unu al alia, ke la aŭtoroj de iliaj apartaj variaĵoj eĉ ĉesis eldoni lernolibrojn de siaj sistemoj kaj rekte presis iun verkon aŭ instrulibron en sia dialekto de Interlingua.

Tiel, interalie, agis ankaŭ P e a n o por siaj unuaj laboroj, pri problemo de «Latino sine flexione». La samon faris en la j. 1910 d-ro E r n s t el Warburg, publikiginta du librojn en sia dialekto «Novi latine» [4]. La diferencoj de la projekto de d-ro E r n s t de la oficiala lingvo de l'akademio sin montras per apartaj malgravaĵoj, kiel ekz. la laŭ-kaza ŝanĝo de la difinita artikolo: nomin. — la, genit. — le, dativ. — li, akuzat. — lo.

**Ferranti (1911)**

Alia projekto de la sistemo de novlatina lingvo, en sia fundamento analogia al la principoj de Interlingua, estis anonime publikigita en la j. 1911 de la akademiano F e r r a n t i, sub la nomo «Simplo» [5].

La ĉefaj distingaĵoj de tiu ĉi sistemo estas simpligita ortografio, iuloke ŝanĝanta la latinajn formojn de la internaciaj vortoj, kaj simpligita gramatiko, kiun la aŭtoro en certa grado ne volas nei. F e r r a n t i konsideras sian projekton nur kiel ioman tributon por la afero de la ellaboro de universala lingvo. Por tiu celo la tuta eldonkvanto de la lernolibro de tiu ĉi lingvo estis senpage disvastigita inter la personoj, sin interesantaj pri la fako. Memstaran propagandon de sia sistemo la aŭtoro ne intencis fari kaj fakte ne faris.

**J. Bernhaupt (1912)**

Provon provizi la vortaran materialon de Interlingua per pli precizaj gramatikaj formoj faris en la j. 1912 J. B e r n h a u p t el Beiruth, eks-volapükisto [6].

**La Unio por la Latino internacia**

En la j. 1912 ĉe la gazeto «Revista Universale» eldonata en Ventimiglia (Italio), organiziĝis la Unio por la latino internacia — «Unione pro Latino Internationale» — pli poste en la j. 1913 novnomita «Unione pro Interlingua».

[1] Alois Hartl, «Auf zur Spracheinheit! Lehrbuch der Perfektsprache», Linz, 1910 ([47]).

[2] «Folio», Zeitschrift für allgemeine Sprachkenntnisse, Linz, 1911—13, n-oj 1—2 4 ([47]).

[3] Dr. Aloiso Hartl, «Interlingua, Manuale ad usu de omne natione», Linz, 1922 ([47]).

[4] Dr. Ernst, «La novi latine debet esse la future lingua internationalis». Warburg, 1911. De la sama: «De li construende interlingua» ([47]).

[5] «Simplo». Contributo al studios dil internatione Lingo. Roma, 1911 ([47]).

[6] Vidu la artikolon: «Gramatica de interlingua. Ein Projekt von Josef Bernhaupt» en la gazeto «Folio», Linz, n-o 10, 6. VI. 1912, pĝ. 74—78.

La membrokvanto de tiu ĉi Unio en la j. 1914 atingis la nombron 50. La nombro de la «akademianoj» en tiu jaro estis ĉirkaŭ 100.

Ĉe la Unio por la latino internacia formiĝis en la sama j. 1912 sub la gvido de J. M e y s m a n s — «Lingva komitato», kiu, ne forlasante la ĝeneralan tendencon de Interlingua, enportis kelkajn precizigojn en la strukturon de la lingvo. La novformita lingvo estis nomita «Interlatino». Oni publikigis en ĝi kelkajn broŝurojn [1] kaj en ĝi aperadis la gazeto «Revista Universale».

**La Akademio dum la mondmilito**

Dum la mondmilito, en la j. 1915, P e a n o publikigis en Torino trian eldonon de sia plena vortaro. Per tio li kvazaŭ faris la finkalkulon por la agoj de la akademio dum la periodo 1909—1914. La gazeto de la akademio «Discussiones» dum la milito ĉesis aperi.

En la j. 1917 la aferoj de la akademio venis al regreso. P e a n o proponis al la aŭtoro de la filozofia sistemo de universala lingvo, F o r s t e r, eldonanta en Usono mizeraspektan monatan ĵurnaleton por la lingvo «Ro», ke li fariĝu direktoro de la «Academia pro Interlingua» [2].

Per tio kvazaŭ plenumiĝus la plena ciklo de la ekzisto de la akademio: — nenatura, artefarita Volapük, supernatura Interlingua kaj ree superartefarita «Ro».

**Interlingua post la milito**

Post la milito, en la j. 1920—1921, P e a n o provis renovigi la ĉesintajn laborojn de la akademio. Per specialaj cirkuleroj li faris interligon kun la restantaj akademianoj. En la j. 1921 P e a n o anstataŭ la ĉesinta aperi gazeto «Discussiones», komencis eldonadi informan bultenon. En la j. 1923 rekomenciĝis la eldonado de gazeto, sed sen la subtitolo «Discussiones».

La nombro de la akademianoj sufiĉe rapide atingis la estintan, antaŭmilitan nivelon, kaj ĉe la j. 1927 ili sin nombris je pli ol kvar centoj, sed inter ili troviĝis granda procentaĵo da esperantistoj, idistoj kaj adeptoj de aliaj sistemoj.

**K. Pompiati (1918)**

Kun la finiĝo de la mondmilito kaj renoviĝo de la internaciaj rilatoj plivigliĝis ankaŭ la situacio en la tendaro de la partianoj de latino. Jam en la j. 1918 K a r l P o m p i a t i en Wien eldonis sian projekton de «Nov latin logui» [3]. Tiu ĉi projekto estis certa regreso kompare kun la aliaj sistemoj de interlingua kaj posedis grandparte apriorian gramatikon.

Kiel ekzemploj povas servi la vortoderivaĵoj en tiu ĉi lingvo: homi— homo; homo — viro; homa — virino; homoi au homelli — infano; homello — knabo; homella — filino; homelluli — ido; homia — homaro ktp.

**V. Martellotta (1919)**

En la j. 1919 itala prof. V. M a r t e l l o t t a eldonis detale prilaboritan projekton «Latinulus» [4]. La diferencoj inter tiu ĉi projekto kaj la aliaj sistemoj de Interlingua sin trovas en kelkaj gramatikaj reguloj, ekz. la finiĝoj de la substantivoj estas -s, por la multenombro -e; la nuntempo de la verboj finiĝas per -o, la adjektivoj per -a.

**Semprini (1922)**

Iom similaj ŝanĝoj en Interlingua, kun kelkaj aldonaj variaĵoj estis proponitaj de S e m p r i n i [5]. La unuonombro en lia projekto finiĝas per -e, la multenombro per -a, la genitivo per -s, la nuntempo de la ver-

---

[1] «Prima Epistola catholica de Sancto Johannes Apostolo — versione in Interlatino», Ventimiglia, 1913.

[2] La gazeto «World Speech», Marietta, Ohio, 1917, n-o 57.

[3] Karl Pompiati, «Die Neue Weltsprache Nov latin logui», Wien, 1918.

[4] V. Martellota, «Latinulus», Bari, 1919.

[5] «Academia pro Interlingua», 1922, n-o 3, pĝ. 16 ([47]).

boj same per -s ktp. En ĉiu alia, inkluzive la vortara, materialo S e m p r i n i akceptas la bazajn formojn de Interlingua sen ŝanĝoj.

**J. Rossello-Ordines (1922)**

Projekton de «Interlingua Systematic» kun aliaj gramatikaj variaĵoj donas J. R o s s e l l o-O r d i n e s el Palma de Mallorca. Ni konas kelkajn apartajn artikolojn en tiu ĉi lingvo, presitajn en la ĵurnalo «Kosmoglott» [1]. En la j. 1926 la aŭtoro eldonas mallongan gvidilon por lerno de tiu ĉi sistemo [2].

**W. Jezierski (1924)**

La ideo de Interlingua trovis sian vastiĝon precipe en la latinidaj landoj, ĉefe en Italio kaj parte en la regionoj de la katolika suda Germanio. Kune kun tiu fakto estas intereŝe noti, ke prof. W. J e z i e r s k i el Lida (Polio), en la j. 1924, eldonis en Interlingua du numerojn de ĵurnalo, dediĉita al la problemoj de mondlingvo [3]. En la j. 1925 J e z i e r s k i komunikis, ke li malfermas kurson de kosmoglotiko en la universitato de Poznan. Tamen tiu ĉi anonco ne ricevis iun faktan ateston.

**Van Diemen (1921)**
**L. Reverchon (1925)**

Restas al ni nekonataj la laboroj de van Diemen [4], kaj R e v e r c h o n [5], indikitaj de P. S t o j a n.

**Fibula (1925)**

Praktika apliko de Interlingua estis ĉiam ligita kun grandaj malfacilaĵoj por ĉiuj nesciantoj de la latina lingvo. Tio siavice kondukis al kripliĝo de la lingvo. Por laŭeble reguligi, pravigi similajn fenomenojn, anonima aŭtoro F i b u l a proponis en sia sistemo de «Latino viventi» [6] fari du ŝtupojn: unu — popularan kaj la duan — literaturan. La uzado de ĉi lasta estas ebla nur por personoj kun sufiĉa prepariteco kaj unuavice por latinistoj.

La provo krei du, tieldire «klasajn lingvojn»: lingvon de aristokrataro kaj tiun de demokratio, sendube estas tre karakteriza. La projekto mem de F i b u l a iujn ŝanĝojn en la sistemon de Interlingua ne enportas.

**A. Lavagnini (1923—1925)**

Pli komplikaj kaj malfacilaj por lernado estas la du novlatinaj projektoj de la itala magiisto kaj okultisto L a v a g n i n i — «Unilingue» (1923) [7] kaj «Monario» (1925) [8]. Utiligante la elementojn de la latina vortaro, L a v a g n i n i treege komplikigas la gramatikon, enkondukinte ekz. dualon en la konjugacion. E d e W a h l estas tute prava dirante, ke per sia projekto L a v a g n i n i sukcesis komplikigi la lingvon en ĝiaj verbaj formoj tiom, kiom ne estis komplikaj la antikvaj sanskrita, kelta kaj greka lingvoj [9].

L a v a g n i n i kunigis la propagandon de sia lingvo kun la agado de la Roma astrologia instituto kaj kun la okultisma ĵurnalo «Eklexi». En la j.1923—1924 oni eĉ faris provojn presi la ĵurnalon en Interlingua» [10].

Malsukcesinte en tiu provo, L a v a g n i n i dum la j. 1925—1926 eldonis en sia lingvo specialan folion [11]. Li fondis federacion por sia lingvo «Unilingual Federationi». Frapas la okulojn komerca subgrundo

---

[1] «Kosmoglott», Reval, 1922, noj 3—4, pĝ. 2—4 ([47]).

[2] J. Rosello Ordines, «Lingua international intelligibil sine studio ad prima visu», Palma de Mallorca ([47]).

[3] «Revista Universale» — periodico bimestrale scientifico litterare internationale e impartiale, Lida, 1924 ([47]).

[4] J. van Diemen, «Nove latina-systeem eener int. volkstaal» (Nederl), 1921.

[5] Leopold Reverchon, «Latin Simplifié», Neuchâtel, 1925.

[6] Fibula, «Latino viventi», Torino, 1925 ([47]).

[7] A. Lavagnini, «Corso pro Corrispondenza d'interlingue od Unilingue in sette lezioni», Roma, 1923 ([47]).

[8] Aldo Lavagnini, «Interlexico-monario italiano-francais-english-deutsch», Roma, 1926 ([47]).

[9] La ĵurnalo «Kosmoglott», Reval, 1925, n-oj 3—4, pĝ. 16—17 ([47]).

[10] «Eklexi» — Revista universal de synthesi vital, 1923, vol. II., n-o 12 ([47]).

[11] «Monario», Roma, 1925—1926 ([47]).

de tiu ĉi organizaĵo, kiu donis blufajn titolojn: «membroj subtenantoj», «meritaj membroj» ktp., kaj la diplomoj por tiuj titoloj, kiuj estis donataj por konforma pago de 10 000 kaj pli da dolaroj.

Interlingua dum la jaroj 1925—30

Per tio ni finas la observon de la teoria evoluo de la novlatinaj projektoj, kondukinta al preskaŭ unuforma universala lingvo sur la bazo de la modernigita latina lingvo.

Fundamenta verko, kiu resumas la rezultojn de tiu ĉi laboro, estas libro de usona sciencculo Roland G. Kent[1], publikiginta ĝin por defendi la ĝeneralan adopton de la modernigita latina lingvo, kiel lingvo por la internaciaj kulturaj rilatoj.



A. Lavagnini

Interlingua ĝuis kaj daŭris ĝui certan atenton en Italio. Klarigebla tio estas per la proksimeco de Interligua-formoj al la itala lingvo. Krome la altgrade kreskinta en Italio, post la 1922 j., nacia ŝovinismo kaj ital-romaňa patriotismo nature donis bonan grundon, por ke Interlingua estu konsiderata en Italio kiel nacia inventaĵo kaj kiel tia simpatie subtenata. Tiu subteno tamen montriĝis nur inter la klerularo kaj la lingvo-projektantoj, neniel koncernante pli vastajn amasojn.

Ankaŭ ĉe la plua agitado de Interlingua ni devas konstati aperon de diversaj proponoj pri lingvaj aldonoj, ŝanĝoj kaj korektoj, kiuj estas farataj de diversaj nelacigeblaj lingvoprojektistoj. Ordinare tiaj proponoj kaj projektoj jam ne estas publikigataj libroforme, sed estas presataj en la oficiala organo de la Akademio. Estonte ni jam ne citos ĉi-tiujn esence bagatelajn proponojn, kiuj fakte neniom influas la formon kaj la enhavon de Interlingua [2]. Post la j. 1927 Peano ĉesigis eldonadon de aparta organo de la Akademio kaj tiu organo kunfandiĝis kun nova revuo «Schola et Vita», eldonata de la membro de la Akademio N. Mastropaolo en Milano. Tiu nova revuo respegulas karakteran por Interlingua tendencon — esti praktike, internaciacele uzata en fakoj, kiuj interesas plejgrade la akademianojn: «Schola et Vita» konforme al sia nomo celas pritrakti, apud la problemoj ĝeneralaj speciale la problemojn de moderna pedagogio.

Aldone ni devas noti ioman nombron de interlingve verkitaj raportoj, referatoj ktp., traktantaj pri specialaj sciencaj temoj, kiuj estis diverstempe publikigitaj de diversaj aŭtoroj. Inter la aŭtoroj de tiuj referatoj ni citu, ekster G. Peano, speciale la direktoron de la Krakova observatorio Banachiewich, kiu publikigis dum la j. 1928—30 plurajn artikolojn astronomiajn en la, de li eldonata, revuo «Acta Astronomica». Same interlingvaj artikoloj aperadis en «Wiadomosci Matematyczni», revuo eldonata en Varsovio kaj en pluraj fakrevuoj italaj.

---

[1] Prof. Roland G. Kent, «Latin as the international auxiliary Language», Pensylvania, 1922.

[2] Ni nur citu ankoraŭ P. Lundstrom — la iaman aŭtoron de «Pan-Arish», kiu ankaŭ aliĝis al Interlingua kaj eksponis siajn reformkonsiderojn pri «Neolatino, vel latino simplificata». Vidu «Schola et Vita», Jul. 1928, p. 175—180 ([47]).

Interlingua en relative malmulta grado, sed estas uzata de certa kolektivo por siaj bezonoj. Certe tiu kolektivo estas malmultnombra. Peano mem konsideris Interlinguan ĉiam kiel lingvon de kleruloj kaj de sciencistoj. Por simpla popolano, ne konanta la latinan aŭ italan lingvon, Interlingua estas ne multe pli facila ol Volapük. Sed tamen grupo da kleruloj, scienculoj, matematikistoj ktp. interkonsentite ekuzis Interlinguan ĉe siaj internaciaj rilatoj. En tio troviĝis unu kaŭzo de ĝia daŭranta apliko kaj ekzisto. Estis ankoraŭ la alia kaŭzo de tiu apliko: Interlingua okupis en formoj de sia ekzistado pli altan ŝtupon ol la antaŭirintaj ĝin sistemoj, pri kiuj ni traktis ĝis nun. Volapük, la unua plene ellaborita lingvo-sistemo, en bonŝanca tempo aperinta, estis tro ligita kun la personeco de sia inventinto, tro dependis de tiu personeco. Volapük, kiel ni jam montris, kvazaŭ reprezentis en la domeno de la artefaritaj lingvoj la tradicion de absolutismo, fremda por la burĝa demokrata epoko. Volapük ne posedis eblon libere evolui.

Aliaj lingvo-sistemoj — ĉu ne estis ĝisfunde ellaboritaj, ĉu ne estis en sufiĉa grado propaganditaj, sed ĉiuj ili celis aŭ okupi la saman pozicion kiel Volapük, estrita de ĝia inventinto, aŭ celis, ke la lingvo-evoluo estu fiksata per iu grupo da aŭtoritatuloj, per iu Akademio.

La lingvo, plej sendependa, plej senĝena, plej demokratieca el ĉiuj teknikaj iloj en la uzo de ĉiu aparta persono — neniel povas esti estrata— ĉu de individuo, ĉu de iu institucio.

Tial tiuj lingvo-projektoj, suferis fiaskon kaj fakte atingis nenian gradon da vere reala apliko. Iliaj aŭtoroj kaj malgrandaj grupetoj da provizore-simpatiantoj ja ne povis esti konsiderataj.

Aliel statis la aferoj ĉe Interlingua. Konforme al siaj principoj kaj al la rondoj intelektaj, la lingvon aplikontaj, — la iniciatinto de Interlingua — Peano, limigante certagrade elekteblon de la vortara materialo per la latina lingvo, opiniis samtempe superflua kaj malutila iun pluan teorian reglamentigon de la lingvoformoj. Tial ĉirkaŭ Interlingua povis grupiĝi homoj kun diversaj specialaj ideoj, kondiĉe, ke ili havu unu komunan ideon pri la prefereco de la latina lingvo. Tial Interlingua evidentigas la tendencon pliriĉiĝi kaj evolui laŭ natura maniero, sen iuj specialaj akademiaj decidoj, dum la praktika aplikado, sekvante la saman vojon, kiel la aliaj naturaj naciaj lingvoj ([44]).

Tiu dua kaŭzo, pro kiu ĝis nun daŭras persisti kaj ekzisti Interlingua, eble permesus al ĝi atingi eĉ pli altan gradon de evoluo, se iom alia lingvo-materialo estus prenita por ĝia kreo. La klasika latino, la modernigitaj-ekskluzive aŭ preskaŭ ekskluzive-latinidaj lingvo-formoj ne estas tiu lingvo-materialo, kiu estus facile adoptebla al la bezonoj, al la povoj de la vastaj amasoj. Interlingua restas lingvo de kleruloj, klasikuloj kaj sciencistoj. Ĝi ne estas kaj ne havas ŝancon esti lingvo vastamasa. Tiun econ de la lingvo, destinita por kleruloj kaj ne por la vasta demokrata uzado, ankoraŭ plifortigas la fakto, ke laŭ sia strukturo—Interlingua decide rompas kun la aglutina tradicio, antaŭ ĝi jam fiksiĝinta en la lingvoj artefaritaj. Anstataŭ tiu principo aglutina Interlingua akceptas por si karakteron fleksian, permesantan ŝanĝon kaj modifon de la vort-elementoj ĉe ilia kunglui̇ĝo.

Tial la finan solvon de la internaci-lingva problemo, ekster la kadroj de izolitaj klasikuloj kaj sciencistoj, — ni devas serĉi ie aliloke kaj ne ĉe Interlingua — la sistemo de la estinta Volapüka Akademio, ne ĉe la sistemo kun eŭrop-fleksia karaktero, ne ĉe la sistemo, kiu provas konstrui sian estonton ne sur la bezono — kaj apliko-povoj de la vastaj popolamasoj, sed sur la ne fiksa socia bazo de, apartigita de la popolamasoj, supera tavolo de klerularo.

## XII

## ESPERANTO. LA DELEGITARO POR AKCEPTO DE INTERNACIA HELPA LINGVO. IDO KAJ SEKVINTAJ REFORMAJ PROJEKTOJ (1900—1930)

> Por ke la lingvo estu internacia ne sufiĉas nur nomi ĝin tia.
>
> (Devizo sur la 1-a lernolibro de «D-ro Esperanto» 1887).

**La deveno de Esperanto**

La aŭtoro de Esperanto d-ro L. L. Zamenhof naskiĝis en Bialystok, en la j. 1859, en pol-hebrea familio. Lia patro estis instruisto de fremdaj lingvoj. Pri la deveno de sia lingvo li rakontas en sia letero al N. Borovko, kiun ni ĉi tie mallonge citos [1].

Kiam ĝuste venis en lian kapon la penso pri internacia lingvo, li ne memoras. Liaj plej frutempaj rememoroj prezentas lin vivanta kun tiu ĉi ideo kaj por ĝi. La cirkonstancoj de lia infaneco tre akcelis la formiĝon de tiu ĉi ideo. Lia naskiĝa urbo estas enloĝata de kvar popoloj, kun kvar diversaj lingvoj: rusa, pola, germana kaj hebrea. Ĉiuj popoloj vivis en konstanta reciproka malamo. Kiel ekstera formo de tiu ĉi malamo estis batalo por sia gepatra lingvo kaj kontraŭ la lingvo de la najbaroj.

Jam estante knabo, li decidis, ke tiu ĉi situacio povus esti forigebla per kreo de iu neŭtrala lingvo, konstruita ne el la lingvoj vivantaj, naciaj. Antaŭ ĉio lia penso fiksiĝis al la revivigo de iu el la mortintaj lingvoj; sed baldaŭ li forlasis tiun revon kaj entreprenis konstruadon de artefarita lingvo.



D-ro L. L. Zamenhof

Estante en gimnazio kaj lernante la lingvojn, li konvinkiĝis, ke komplikeco de la gramatikoj de lingvoj naturaj estas peza kaj ne bezona. Li do komencis prilabori gramatikon simpligitan.

---

[1] «Lingvo Internacia», Uppsala, 1896, n-oj 6-7 ([47]).

Estis bezona ankaŭ vortaro. La grandiozeco de la afero fortimigis lin ĝis la tempo, kiam li komprenis, ke pere de afiksoj oni povas formi el la vorto-radiko multajn aliajn derivitajn vortojn kaj tio tre faciligas la laboron de la memoro.

Kio koncernas la konsiston de la radikoj mem, Zamenhof unuatempe pensis ke li povus fari ilin kiel eble plej mallongaj, do elpensi apriorie. Li eĉ komencis fari listojn da sinsekvaj literaj kombinaĵoj, kiel tion faris jam en la j. 1788 De Ria. Sed baldaŭ li forĵetis ĉi tiun penson, rimarkinte, ke la artefaritaj radikoj estas tre malfacile enmemorigeblaj. Li rimarkis, ke en la modernaj lingvoj ekzistas multaj vortoj internacie uzataj. Ilin li prenis por la bazo de sia vortaro.

Tiamaniere jam en la j. 1878, estante en la lasta klaso de la Bialystoka gimnazio, Zamenhof finis la provizoran prilaboron de sia projekto «Lingwe Universala». Kelkaj liaj samlernejaj kamaradoj eĉ lernis ĉi tiun lingvon, sed post la eliro el la gimnazio, ili kompreneble forlasis tiun entreprenon.

Studante en la universitato, Zamenhof dum sep jaroj ĝis la j. 1885 reprilaboris sian lingvon. Tio estis la plej malfacila periodo de lia vivo. Timante esti mokita aŭ rekonita kiel frenezulo, li parolis al neniu pri siaj laboroj, kaj en kaŝiteco, en soleco, li daŭre tradukis, verkis, pensis kaj ekzercis en sia lingvo.

Fine li eltrovis rimedon fari sian lingvon utila eĉ al tiuj, kiuj ĝin ne konis, konstruinte la vortojn el sendependaj kaj neŝanĝeblaj elementoj, tiel ke la tuta gramatiko eniris en la vortaron, kaj fariĝis eble analizi iun tekston de la nova lingvo per helpo de sola vortaro.

Fine, en la j. 1887 liaj lernolibroj aperis en la mondo sub la titolo «Internacia lingvo de d-ro Esperanto».

**La gramatiko de Esperanto**

La alfabeto de Esperanto konsistas el 28 literoj (en ties nombro 6 kun supersignoj).

Ekzistas en la lingvo severa regulo: al ĉiu litero kunrespondas unu difinita sono, al ĉiu sono — difinita litero.

La alfabeto estas kunmetita tiel, ke ĉiuj sonoj estas klare diferencaj kaj tute facile elparoleblaj.

La ellernado de la gramatiko kaj vortaro okazas tre rapide, kompare kun la lernado de vivantaj naciaj lingvoj.

La tuta gramatiko konsistas el 16 mallongaj reguloj, kiujn oni povas ellerni en duonhoro.

La gramatiko havas neniujn esceptojn.

La akcento estas metata ĉiam sur la antaŭlastan silabon.

La partoj de l' parolo diferenciĝas per finaĵa vokalo: la substantivo finiĝas per -o, adjektivoj per -a, adverboj per -e, verboj en infinitivo per -i.

Laŭ la severe unuforma sistemo ĉiuj partoj de l'parolo povas esti logike transformitaj je aliaj, se la senco de la radiko tion permesas. La formoj de deklinacioj, konjugacioj kaj de aliaj vortvariiĝoj estas konstantaj, minimumaj, sed tute sufiĉaj [1].

La deklinacio estas efektivigata per prepozicioj por la genitivo kaj dativo kaj per aldono de la finaĵo -n por la akuzativo.

La multenombro estas formebla per aldono de finaĵo -j.

---

[1] La franca lingvo posedas pli ol 2500 verbajn finiĝojn, kaj Esperanto nur 12 kaj tiuj 12 donas tiajn komplikajn verboformojn, kiel gerundio de la pasiva modo en estonta tempo.

Ekzemple:

| Ununombro | Multenombro |
| --- | --- |
| N. bona patro | N. bonaj patroj |
| G. de bona patro | G. de bonaj patroj |
| D. al bona patro | D. al bonaj patroj |
| A. bonan patron | A. bonajn patrojn |

La verboj en la konjugacio ŝanĝiĝas nur laŭ la tempoj. La tempo estanta finiĝas per -as, pasinta per -is, estonta per -os. La sama simpleco de la formoj estas rimarkebla rilate la numeralojn kaj aliajn parolpartojn.

**La vortaro de Esperanto**

La Universala vortaro de Esperanto [1] entenas entute 2600 radikojn kaj tiu ĉi kvanto estas tute sufiĉa por formado de 50—60 miloj da derivitaj vortoj.

Ĝenerale la vortaro de Esperanto, bezona por la praktika utiligo de la lingvo, ne superas 4—5 milojn da vortoj.

En kelkaj landoj oni faris ekzamenojn en specialaj komisionoj (interalie en la j. 1913, sub gvido de Tristan Bernard), en kiuj la antaŭe elektita teksto estis tradukata en plurajn lingvojn, kaj en ties nombro ankaŭ en Esperanton kaj poste estis retradukata de aliaj tradukantoj, ne konantaj la originalan tekston, en la lingvon de la originalo.

Per tiaj eksperimentoj oni konstatis, ke rilate la flekseblecon, diversecon de la nuancoj, ĝustecon de la traduko, Esperanta vortar-trezoro, sendube estas pli supera kompare kun la naciaj lingvoj.

La vortoj internaciaj, komunaj al ĉiuj lingvoj, kiel: atomo, aksiomo, barko, cirkulero, telegramo, telefono, tualeto, vagono — formas la vortaran bazon de la lingvo. Nur en la okazoj, kiam ne troviĝas konvena internacia termino, Zamenhof prenis la vortojn ne internaciajn, sed komunajn al la pli granda kvanto de la lingvoj. Al tiuj vortoj apartenas: marmoro, floro, anonco, emajlo, blinda, trotuaro, meblo k. a.

Nur relative malgrandan nombron da vortoj Zamenhof prenis senpere el la lingvo latina.

Ankoraŭ pli malgranda nombro da vortoj estis akceptita kun iomgrada arbitro.

Ĝenerale en Esperanto preskaŭ 40—60% da vortoj estas kompreneblaj por ĉiu ruso, sen lernado. Koncerne la popolojn latinidajn tiu ĉi procentaĵo altiĝas kaj atingas 80%.

Por derivado de la vortoj oni uzas afiksojn, en iu grado similaj al tiuj en la naciaj lingvoj, ekzemple: -in- estas sufikso, difinanta la virinan genron: viro, virino; patro, patrino; bovo, bovino. Id — signifas denaska posteulo: bovido, kokido. Ar — kolekto, grupiĝo de io: vorto, vortaro; vagono, vagonaro; arbo, arbaro; homo, homaro. Ist — signifas profesion aŭ konstantan, daŭran okupon: boto, botisto; lingvo, lingvisto, ktp.

La vasta eluzo de la derivigaj partetoj kondukas al tio, ke apartaj internacie-konataj terminoj estas anstataŭataj per terminoj derivitaj, internacie ne konataj (ekz. vortaro, anstataŭ leksikono); sed laŭ la vidpunkto de la demokratieco de la lingvo, facileco de ĝia lerno por la amasoj, la simila konstruo de la universala lingvo trovas por si certan justigon. Unu el la reguloj de la Esperanta gramatiko [2] tekstas: «La

---

[1] D-ro L. L. Zamenhof, «Fundamento de Esperanto», eldono kvinlingva, 6. eldono, Paris, 1925 ([47]).

[2] D-ro Esperanto, «Mejdunarodnij jazik», Varŝava, 1887, pĝ. 30—40, la 7-a ĝenerala regulo ([47]).

tiel nomataj fremdaj vortoj, t. e. tiuj, kiujn la plimulto de la lingvoj prenis el unu fremda fonto, estas uzataj en la lingvo internacia sen ŝanĝo, ricevante nur la ortografion de tiu ĉi lingvo; sed ĉe diversaj vortoj de unu radiko estas pli bone uzi senŝanĝe nur la fundamentan vorton kaj la ceterajn formi el tiu ĉi lasta laŭ la reguloj de la lingvo internacia».

Rezulte de tiu ĉi regulo en Esperanto estas renkonteblaj la vortoj kiel r e d a k t o r o (vorto internacia) kaj paralele al ĝi r e d a k t a n t o (derivaĵo de la radiko: redakti). Praktike la paralela uzado de tiuj vortoj neniel malhelpas. La eksperimento de la paralela uzado devas montri, kiu el la vojoj estas pli bona, ĉu la konservado de la konataj (kvankam malkonformaj al la gramatiko) internaciaj formoj, aŭ la uzado de la formoj malpli internaciaj, sed regule, konforme al la gramatiko, derivitaj.

**La bazaj ecoj de Esperanto**

Esperanto posedas esence la solan severe sekvatan regulon de la sintakso: konstrui la derivatajn vortojn kaj ankaŭ la frazojn, kun ties kombinoj, tiel, ke ĉio estu klara, logika, kaj komprenebla: alivorte, ĉiu vorto kaj ĉiu frazo devas esprimi ĉiam tiun sencon, kiu estas propra al la sencoj de iliaj apartaj eroj.

En Esperanto kompreneble ne povas esti transdoneblaj laŭvorte la idiotismoj de la naturaj lingvoj, samkiel ili ne povas esti transdoneblaj, pere de la laŭvorta traduko, en iun nacian lingvon.

Por ekzemplo ni donas jenan tekston en Esperanto:

«La estonta kulturo, por kiu batalas la proletaro, vere aspiras kaj realigos la ideon de la helpa lingvo internacia.»

Ĝenerale Esperanto kontentigas la jenajn bazajn premisojn neprajn por la facila ilo de la internacia interkompreniĝo.

1. Ĝi estas riĉa, vastampleksa kaj enhavas en si elementojn, ne nur donantajn esprimon al diversaj ideoj kaj konceptoj, sed ankaŭ garantiantajn la eblecon de plua riĉiĝo kaj evoluo.

2. Ĝi estas tre logika kaj ne havas idiotismojn kaj dialektajn esprimojn, proprajn al la lingvoj naciaj.

3. Ĝi estas facile lernebla, t. e. samtempe kun la posedo de la unua premiso, ĝi posedas ankaŭ:

a) esence aglutinan karakteron, kiam atribuo de tiu aŭ alia afikso al la vortradiko ne ŝanĝas la formon de la vortradiko kaj kiam ankaŭ la unuigo de du radikoj en unu vorton ne ŝanĝas ilin.

b) simplan gramatikon, senesceptan kaj senidiotisman;

c) bazan vortaron, facile akireblan kaj kompreneblan, konstruitan tiamaniere, ke, konforme al la ekzemploj de la naciaj lingvoj, oni povu per afiksoj kunmeti ĉiaspecajn necesajn vortformiĝojn kaj derivaĵojn.

4) Ĝi, same kiel Volapük, esence koncentrigis en si elementojn de la antaŭa projektado de sekret-lingvoj, kodoj de pazigrafio, universala alfabeto kaj pazilalio. Ĉiujn problemojn, ligitajn kun simila projektado ĝi solvis tute kontentige por la praktiko. Sed male al Volapük, individue-utopia projekto, Esperanto estis prezentita al la mondo pli kiel kodo, ol kiel jam finpreta lingvo. Z a m e n h o f speciale akcentis en sia unua lernolibro, ke tiun sistemon oni povas uzi tute sendepende de la nombro de la personoj ĝin konantaj. Z a m e n h o f genie antaŭvidis, ke nur la plua praktika uzado de lia sistemo povos fari el ĝi veran lingvon. Nek antaŭ Z a m e n h o f , nek post li — iu alia projektanto scipovis prezenti sian plenformitan lingvon — kiel kodon, eventuale, pro socia uzado kaj ĉe plua libera evoluo fariĝontan—vera lingvo. Bonsukcese la projekto de Z a m e n h o f estis la malplej utopiista inter la aliaj, el kiuj ĉiu pretendis tuj de l' komenco la saman trakton, kiel la naturaj naciaj lingvoj.

**La unuaj paŝoj de esperanto**

Tiuj ecoj donis al la lingvo eblon trovi tuj ĉe sia apero kelkajn amikojn, kiuj baldaŭ jam kapablis kontentige uzi la lingvon por korespondado kaj ĉe internaciaj rilatoj.

Sed kiel kaj kiamaniere esperanto sukcesis superi multnombron da similaj, ankaŭ aposterioriaj kaj relative ankaŭ bonaj, lingvo-projektoj?

Por tion kompreni ni notu ankoraŭ pliajn favorajn faktorojn por plua disvastiĝo de esperanto ([42]):

1) Zamenhof, estante mem produkto de politike kaj nacie premita regiono de la rusa Polio, kvazaŭ koncentris en sia menso la tutan energion kaj persiston, pri kiu nur povis revi la minoritata loĝanto de la iama rusa imperio. Tiun energion li uzis por efektivigi sian, laŭ li tre gravan — socian laboron, celantan egalecigon de la nacioj. Tiu energio kaj persisto kaŭzis, ke Zamenhof, ne laciĝante, fordonis dum jaroj sian tempon kaj monon por propagandi la novan lingvon kaj ĝin diskonigi. Tion li faris eĉ dum la krizaj momentoj, kiam la movado ŝajne malkreskis kaj kiam al ĝi ŝajne minacis pereo.




Insigno de Esperanto

2) Ĉe Zamenhof estis en intima kunvivado certa idealismo kun altgrada praktikismo rilate al la penadoj efektivigi sian revon. Tial tre lerte kaj antaŭvideme li aranĝis la propagandadon de Esperanto, eldonante la lernolibrojn samtempe en ĉiuj plej gravaj eŭropaj lingvoj kaj malavare dissendante ilin tra la tuta terglobo.

3) Esperanto aperis en Rusio—lando ideologie tre favora por la propagando de esperantismo ([41]), en lando ĝis tiutempe neniagrade tuŝita de la ĝenerala mondlingva propagando, kaj ankaŭ en relative malgranda grado tuŝita de la propagando de Volapük, kie propagando de Volapük estis krom tio ofte ĝenata. Por Esperanto en Rusio, almenaŭ dum la unuaj 7 jaroj, tiaj ĝenoj ne ekzistis. Rezulte, dum nuraj 2 jaroj post apero de la unua libro, en Rusio jam estis varbitaj 1000 esperantistoj — nombro sufiĉa por ke la lingvo internacia ekĝermu.

4) La momento, kiam aperis Esperanto kaj kiam ĝi komencis fariĝi konata en la mondo, kiel plene uzebla lingvo internacia, — tiu momento koincidis kun la periodo, kiam en Volapük-movado okazis plej gravaj bataloj, kiam plej akre kreskis la opozicio kontraŭ la lingva aŭtokrateco de S c h l e y e r. Z a m e n h o f, male al S c h l e y e r, deklaris, ke la internacia lingvo estas nenies propraĵo, kaj li mem rifuzis ĉiujn rajtojn de la lingvo-aŭtoro. Aldone Z a m e n h o f en tiu kriza por Volapük periodo plej klare kontraŭmetis al la arbitreco de la Volapük-konstruo principon de eltrovo de la internaci-lingvaj elementoj el la elementoj de la moderna eŭropa lingvaro. Pro tiuj du kaŭzoj certa nombro da opoziciantaj kaj malkontentaj volapükistoj, speciale eksterrusiaj kaj ĉefe en Germanio, pleje sentanta premon de S c h l e y e r, — venis tuj de l'komenco al Esperanto kaj kvazaŭ aranĝis iun fizikan ligon inter la vast-kreskinta Volapük-movado kaj la nova movado esperantista.

Sen ĉi-ĉiuj premisoj estas tre dube, ĉu la lingvo Esperanto sukcesus apud la aliaj konkurantaj sistemoj.

**Kresko de la movado de Esperanto ĝis la j. 1907**

Kaj tamen en la unua tempo la disvastiĝo de Esperanto estis tre malrapida. Volapük jam post naŭ jaroj de sia ekzisto havis en la j. 1889 25 gazetojn, kaj Esperanto post 11 jaroj, en la j. 1898, posedis apenaŭ 2 gazetojn: unu en Uppsala (Svedio) — «Lingvo Internacia», kiu estis anstataŭinta la fermitan pro persekuto de la rusa registaro «La Espe-

rantiston»[1], kaj alian en Francio, sub redaktado de L. de Beaufront[2].

Multaj kialoj komprenigas ĉi tiun malrapidecon de la disvastiĝo:

1) Entute nur relative ne granda—se eĉ socie la plej konscia—parto da volapükistoj aliĝis al Esperanto.

2) Schleyer daŭris persisti kaj ankoraŭ konservis apud si ioman nombron da volapükistoj.

3) Parto da volapükistoj, rompinte kun Schleyer, esperis sukceson de la laborado de la Volapük-Akademio.

4) Post fiasko de Volapük daŭre aperadis novaj projektoj de la lingvo internacia.

5) Ĉi-ĉio subfosis ĉe la vasta publiko fidon al la ideo de la lingvo Internacia.

6) La aŭtoro kaj la plej bonaj esperantistoj de la unua periodo loĝis en Rusio, kie pro kondiĉoj propraj al tiu lando, estis tre malfacile daŭre partopreni kaj despli aktive gvidi la internaci-skalan movadon.

Pro tiu lasta kaŭzo en la unuaj jaroj de la XX jarcento, kiam en Francio la esperantismo jam bone baziĝis, komenciĝis la translokiĝo de la centro de la esperantista movado al Francio. En Parizo kaj kelkaj universitataj urboj de Francio multaj scienculoj kaj profesoroj adeptiĝis al la esperantista movado kaj per siaj aŭtoritatoj levis la ŝanceliĝintan prestiĝon de la ideo de internacia lingvo, akcelante ties disvastigon.

De la j. 1905 la esperanta movado eniras en la rondon de la ĝenerale konataj mondaj movadoj. Ĉiujare estas aranĝataj tutmondaj kongresoj de esperantistoj kun nombro da partoprenantoj ofte superanta milon da personoj. Preskaŭ en ĉiu lando oni komencas kunvoki ankaŭ la naciajn kongresojn de esperantistoj. Komencas aperi specialaj gazetoj. Aplikon de Esperanto rekomendas kelkaj tutmondaj kongresoj kaj konferencoj. La internacia lingvo komencas penetri en la religiajn, politikajn kaj internaciajn organizaĵojn. La nombro de la esperantaj societoj en du-tri jaroj subite rapide kreskas. En la j. 1902 estis 38 societoj kaj 12 gazetoj, en la j. 1907—892 societoj kaj 64 gazetoj. La esperantistoj komencas formi organizaĵojn de profesiaj kaj specialaj tipoj. Lernolibroj de Esperanto jam troviĝas en la lingvoj de preskaŭ ĉiuj kulturaj popoloj de Eŭropo kaj Azio. En sia internacia organizo la esperantistoj starigas konstantajn internaciajn instituciojn: Lingvan Komitaton (kiu en la j. 1908 elektis sian Akademion), Konstantan Komitaton de Kongresoj, Centran Esperanto-oficejon en Parizo k. a. Aspektis, ke Esperanto jam triumfas decidan venkon sur la kampo de la batalo por la ideo de la universala helpa lingvo (42).

Speciale gravis la fakto, ke Esperanto evoluis tutlibere, simile al la naciaj lingvoj, ne ĝenate de iu ajn persono aŭ institucio. Tiu fakto adaptigis la lingvon al la demokratiaj, esence vast-amasaj, tendencoj de la epoko, faris la lingvon akceptebla por tiuj vastamasoj. Tiurilate en la movado esperantista kaj en ĝia iniciatinto montriĝis multe pli da socia prudento ol ĉe la kreintoj de Idiom-Neutral.

**La delegitaro por la akcepto de internacia lingvo**

En la j. 1900, dum la tutmonda ekspozicio en Parizo, estis organizita la delegitaro—konferenco de delegitoj por akcepto de internacia helpa lingvo. La laboro de la delegitaro konsistis el varbado, por siaj ideoj,

[1] Du trionoj de la abonantoj de «La Esperantisto» estis rusoj. La alian trionon donis germanoj kaj svedoj. Tial la malpermeso de abono por tiu ĉi gazeto en Rusio kondukis al ĝia ĉeso.

[2] «L'Espérantiste», organe propagateur de la langue internationale Espéranto, 1898—1907 (47).

inter la scienculoj kaj profesoroj tra la tuta mondo, kaj diversaj sciencaj kaj kulturaj organizaĵoj. En la lingvoj franca, germana, itala kaj rusa estis eldonitaj alvokoj (deklaroj) de la delegitaro. Regule, de la j. 1901 ĝis la j. 1907, aperadis la listoj de personoj, aliĝintaj al la delegitaro.

**La konsisto de la delegitaro**

Apartaj partoprenintoj de tiu ĉi entrepreno: Couturat, W. Ostwald, H. Schuchardt k. a. — en la broŝuroj kaj artikoloj, dediĉitaj al la problemo de internacia lingvo kaj en raportoj al diversaj sciencaj institucioj kaj konferencoj, penis interesigi la publikon pri la taskoj kaj laboro de la delegitaro.



L. Couturat

L. Couturat kaj L. Leau en la j. 1903 aperigis franclingve kapitalan verkon, traktantan la historion de la universala lingvo (8), en kiu estas indikitaj kaj analizitaj ĉirkaŭ 60 projektoj de la paroleblaj artefaritaj lingvoj. En la j. 1907 aperis suplemento al tiu ĉi libro (9), dediĉita al sistemoj, aperintaj, aŭ fariĝintaj konataj post la apero de la unua verko,

La fakta inspiranto kaj gvidanto de la delegitaro estis ĝia kasisto, profesoro de filozofio L. Couturat.

Dum la periodo inter la j.j. 1900—1907 okazis multaj ŝanĝoj en la kunrilato de la fortoj sur la areno de lingvo internacia. En la j. 1900 la lingvo Esperanto estis sistemo ankoraŭ malforta, malvaste uzata, kvankam la unua laŭ la disvastiĝo. En la j. 1907 oni jam povis konsideri Esperanton la sola praktika sistemo de lingvo internacia.

**La preparo de la kunsidoj de la komisiono**

Post la rifuzo de la Internacia kongreso de Scienc-akademioj — pro nekompetenteco — sin enmiksi en la solvadon de la problemo de lingvo internacia, la delegitaro, laŭ la propono de Couturat, decidis elekti komisionon por aprobo de la plej bona sistemo de lingvo internacia.

La delegitaro konsistis el malgranda nombro da reprezentantoj de kelkaj gravaj kaj parte eĉ de mondampleksaj organizaĵoj, kaj de grandega nombro da diversaj malgravaj societoj, kiuj ofte aliĝis al la delegitaro dank'al la energio de iu interesita persono. La unua kategorio de la societoj estis interesita pri la problemo kaj tial sendis kiel siajn reprezentantojn en la delegitaron personojn kun tuteŭrope konataj nomoj. Sed la pligrando de aliaj, ne tro signifaj organizaĵoj,sin tute ne interesis pri la problemo, deleginte por sia reprezentado personojn, starigintajn la demandon pri la aliĝo al la delegitaro, kaj poste eĉ forgesis pensi pri ĉio farita. Plimulto de similaj societoj, antaŭ la decida momento de la elekto de internacia lingvo, jam ĉesis havi iujn rilatojn kun la delegitaro.

Iom analogie formiĝis la cirkonstancoj rilate la 1200 scienculojn, kiuj aliĝis al la deklaro de la delegitaro. Krom la malgranda grupo da scienculoj, interesitaj pri la problemo, pri kiu ili jam okupis sin, — la alia plimulto da profesoroj kaj akademianoj donis sian subskribon por forgesi pri ĝi jam en la sekvinta tago.

Tial, kiam en la j. 1907 estis faritaj elektoj de la 16 membroj de la komisiono de la delegitaro, ilin partoprenis tre evidenta malplimulto de la delegitoj. En septembro de la j. 1907 en Parizo estis anoncita kunveno de la komisiono por la fina elekto de la plej bona sistemo de internacia lingvo.

La opinio de la plimulto sin klinis al tio, ke estos elektita Esperanto. La esperantistoj estis ĉefa apogo de la delegitaro, apogo morala kaj materie-financa. La plimulto de l' scienculoj kaj societoj, subskribintaj la deklaron, estis varbitaj de ĉiuloke dissemitaj esperantistoj. Couturat kaj Leau en sia «Historio de la universala lingvo» dediĉis al Esperanto tre simpatiajn laŭd-recenzajn paĝojn. La organize formiĝinta antaŭ tio grupo de la adeptoj de la latinigitaj kaj latinidigitaj sistemoj, kiu opiniis Esperanton maltrafa bastardo de la latin-german-slava deveno, jam antaŭe anoncis la delegitaron—partieca kaj la elektojn — komedio, kies rezulto estos la antaŭdecidita akcepto de Esperanto.

**La proponoj de Couturat kaj Ido**

Kaj fakte la antaŭdecideco en la agoj de la delegitoj sin montris, sed en pli originala formo, ol tion supozis la kruda antaŭsento de la novlatinistoj. Couturat kaj Leau detale analizas en sia suplementa historio (9) la reforman projekton de d-ro Zamenhof el la j. 1894, kiu estis siatempe malakceptita de la plimulto de esperantistoj. La ekkono de tiu ĉi projekto, kiu sin inklinis al latinigo, koincidas ĉe Couturat kun la momento, kiam li komencis pensi pri la eventualaj ŝanĝoj kaj korektoj en Esperanto. Lia menso, alkutimiĝinta al matematike ekzakta pensado, ne trovis unuformecon en la reguloj de la Esperanta vortoderivado. La presaj malhelpoj pro la supersignoj, instigis lin pensi pri la korektoj en la alfabeto de Esperanto. En la j. 1907, antaŭ la kunveno de la delegitara komisiono en Parizo, Couturat aperigis broŝuron, dediĉitan al la kritiko de la vortoderivado en Esperanto [1].

Laŭ la vidpunkto de la abstrakta logiko, la riproĉoj de Couturat sendube estis bazitaj. Tamen Couturat ĉe tio preterlasis konstati, ke Esperanto, simile al la plimulto de lingvoj naturaj, en sia vortoderivado orientiĝas ne tiom laŭ la postuloj de la absoluta logiko, kiom laŭ la postuloj de simpleco kaj klareco.

La esperantistoj, praktike uzantaj sian lingvon, ne sentis iujn troajn ĝenojn kaj maloportunecon en la uzado de siaj, ne ĉiam logike regulaj, vortoderivaĵoj.

En la sama tempo estis publikigita ankaŭ anonimaŭtora projekto de reformoj en Esperanto, samspirita al la broŝuro de Couturat kaj inklina al plia latinigo. Tiu ĉi projekto estis subskribita per pseŭdonimo «Ido» [2].

La broŝuro de Couturat estis dediĉita ĉefe al la kritika analizo de la Esperanta gramatiko kaj vortoderivado. Sed la anonima aŭtoro «Ido», konstatante la Esperantan gramatikon pli aŭ malpli kontentiga, sian ĉefan atenton turnis al la malkontentigaj flankoj de la vortaro. Li severe juĝis kaj kondamnis apartajn vortojn de Esperanto kiuj povus esti anstataŭitaj per la vortoj de pli granda internacieco.

Ekz., anstataŭ celo — skopo, anstataŭ lerta — alerta, anst. eraro — eroro ktp. Tiamaniere estis prikritikitaj pli ol 200 vortoj de la vortaro de Esperanto. Krom tio la aŭtoro postulis forigon de la supersignitaj literoj kaj nedevigan uzon de la akuzativo.

---

[1] Eldono en Ido: L. Couturat, «Studyo pri la derivado en la Linguo internaciona», II. edituro, Paris, 1910 (47).

[2] Ido, «Les vrais principes de la langue auxiliaire», 2 édition, Paris, 1909 (47).

Ambaŭ broŝuroj, de C o u t u r a t kaj de I d o, estis disdonitaj al ĉiuj delegitoj antaŭ la decida momento.

**La konsisto de la komisiono**

La komisiono de la delegitaro kolektiĝis en neplena nombro. Parto de la elektitoj forestis. Par to alsendis siajn anstataŭantojn, kion faris ankaŭ la esperantistoj—rektoro E. B o i r a c kaj ĵurnalisto W. S t e a d. Nur kelkaj partoprenis persone, kaj en ties nombro C o u t u r a t, L e a u, ambaŭ ne elektitaj, sed kooptitaj de la komisiono, profesoro B a u d o u i n d e C o u r t e n a y kaj kelkaj aliaj. La komisiono devis esplori ĉiujn ĝis tiam prilaboritajn projektojn, prezentitajn de ties aŭtoroj al la juĝo de la komisiono. Kelkaj aŭtoroj defendis siajn projektojn skribe ĉe la komisiono. Kelkaj gravaj projektoj, kiel B o l a k, I d i o m-N e u t r a l kaj aliaj havis siajn advokatojn en la personoj de siaj aŭtoroj aŭ ties reprezentantoj.



E. Boirac

**La reprezentanto de Esperanto**

La aŭtoro de Esperanto, D-ro Z a m e n h o f, elektis por sia reprezentanto la plej malnovan kaj la plej lojalan esperantiston de Francio, kiu siatempe rezignis publikigi sian propran projekton, multfoje insistintan pri la neŝanĝeco de Esperanto kaj voĉdone starigintan ĉe la internacia kongreso de esperantistoj en Boulogne s. M. deklaron pri la netuŝebleco de la Fundamento de Esperanto — L o u i s d e B e a u f r o n t, «la duan patron de Esperanto», kiel lin nomis la esperantistoj. C o u t u r a t, demandita pri la ebleco, ke Zamenhof estu anstataŭita per B e a u f r o n t, aprobis la elekton.

**Rezultoj de la laboroj de la komisiono**

Post kelkaj kunsidoj, supraĵeca esploro de la sistemoj, kaj en ties nombro de Esperanto, la komisiono, en neplena kvanto, ĉe foresto de multaj membroj esperantistoj, faris la rezolucion: «pro la granda disvastiĝo de Esperanto kaj de ĝiaj sendubaj avantaĝoj, oni akceptu Esperanton, sed kun la ŝanĝoj, proponitaj en la projekto de «Ido», samspirite al la libro pri la vortoderivado de C o u t u r a t».

Estis formita komitato, konsistanta el C o u t u r a t, B a u d o u i n d e C o u r t e n a y kaj L o u i s d e B e a u f r o n t, al kiu oni komisiis la efektivigon kaj priformigon de la afero, laŭ la decidoj de l' komisiono. Oni supozis, ke per tiu decido la komisiono akiros simpatiojn de esperantistoj, de reformistoj kaj de novlatinistoj. Sed la supozoj sin montris eraraj. La esperantistoj kaj ilia Lingva Komitato per granda plimulto rezignis akcepti iujn reformajn proponojn ([41]).

Kelkaj grandaj organizaĵoj, enirintaj la delegitaron, kaj ankaŭ pluraj eminentaj famaj personoj, protestis kontraŭ la decido de la delegitaro kaj rifuzis al ĝi sian partoprenon, opiniante ke la komisiono ne rajtas enkonduki la ŝanĝojn en la de ĝi akceptitan projekton [1]. Plimulto el ili jam forgesis pri sia iama aliĝo al la delegitaro. La plimulto de la membroj de l'komisiono rezignis akcepti la ĵus faraitan decidon. Esperantistoj F ö r s t e r kaj B a u d o u i n d e C o u r t e n a y deklaris la rapidecon de la decido kaj publike montris sian preferon al Esperanto primitiva, kontraŭ la reformita. Prof. P e a n o, ankaŭ kooptita al la komisiono, forlasis la delegitaron, por fariĝi prezidanto de «Academia pro Interlingua». Tiamaniere el la tuta komisiono

---

[1] «Délégation pour l'adoption d'une langue auxiliaire internationale. Protestation», Paris, 1908 ([47]).

restis nur Couturat, Leau, prof. Jespersen, kaj prezidanto de la delegitara komisiono prof. W. Ostwald, kiuj komencis la prilaboron kaj propagandon de la nova lingvo. La ricevita de W. Ostwald premio de Nobel, en sia ŝatinda parto, venis tra la manoj de Couturat por propagando de la nova sistemo. Per tio oni povas klarigi la sufiĉe grandan kvanton da ido-lernolibroj, eldonitaj en mallonga tempo kaj en diversaj lingvoj[1].

L. de Beaufront—la aŭtoro de Ido

En la sama 1908 j., en la mondo de esperantistoj okazis io neatendita. L. de Beaufront, prezidanto de la franca societo de esperantistoj, alvokis la esperantistojn unuiĝi ĉirkaŭ la delegitaro kaj akcepti ties reformitan lingvon. En la franca esperantista mondo maturiĝis skismo, akriĝis la interrilatoj, kreskis suspektemo. Kelkaj spritułoj komencis kompari la projektojn de «Ido» kaj de «Adjuvanto» (ne publikigita projekto de Beaufront, el kiu oni havis publikigitaj nur kelkajn tekstojn). La deduktoj estis neatenditaj: Ido kaj Adjuvanto sin montris tre proksimaj parencoj. Fine, en junio de la j. 1908 en la gazeto «L'Espérantiste» L. de Beaufront deklaris sin aŭtoro (aŭ almenaŭ kunaŭtoro) de la sistemo Ido kaj alvokis siajn sampensantojn rezigni de la primitiva Esperanto kaj aliĝi al la projekto de la delegitaro. Apartaj esperantistoj aliĝis al Beaufront; sed dum la sekvintaj reelektoj de la komitato de la Franca Societo esperantista, la kandidatoj de la reformistoj ricevis nur $^1/_{10}$ de la ĝenerala kvanto da voĉoj. Tiam Beaufront forlasis la esperantistan movadon.



Louis de Beaufront

La skismo en la Esperanta movado

La antaŭa interkonsento de Couturat kaj Beaufront rilate la antaŭdecidon de la deklaroj de l'komisiono, fariĝis do evidenta. La broŝuroj de Couturat kaj Ido, estante verkoj de la akuzanto kaj defendanto de Esperanto antaŭ la delegitaro, fakte kompletigis unu la alian kaj kreis la tutan sistemon de praktikaj konkludoj, koncerne la reformatan lingvon.

Kie do troviĝis la kaŭzoj de tia ofensivo kaj de tia taktiko flanke de Couturat kaj Beaufront—rilate al Esperanto?

Ni provis laŭeble detale kaj dokumentite respondi al tiu demando en la «Analiza Historio de Esperanto-Movado»([41]). Ĉi-tie do sufiĉos konstati, ke apud la motivoj personecaj estis ankaŭ certaj konsideroj sociaj.

Ni jam vidis en la antaŭirintaj ĉapitroj, kiel nature kreskis la pensoj ĉe diversaj lingvo-inventistoj, ke la evoluo de la lingvo devas esti reguligata per iu aŭtoritata institucio—kvazaŭ parlamento aŭ pli verdire, «la supera ĉambro», konsistanta el la aŭtoritata gvidantaro de la movado. Tiujn iluziojn pri la lingvo-reguligo laŭ metodoj de burĝedemokrata parlamentismo akceptis ankaŭ Couturat ([41]). Aliajn ideojn li eĉ fakte havi ne povis. Pro konsideroj specialaj Beaufront subtenis lin. Krome ja tiu idearo ankaŭ al li devis ŝajni sufiĉe natura. Ili ambaŭ ne komprenis la principaron de Zamenhof, ke la lingvo internacia ĉe sia konstante kreskanta disvastiĝo kaj praktika apliko neniomgrade bezonas iujn aŭtoritatajn reguligantajn instituciojn, ke la lingvo plej libere evoluos sur bazo de nura kolektivisma kreado.

La tuta entrepreno kun la Delegacio devas esti konsiderata en la Esperanto-movado, kiel respeguliĝo de la tendencoj de la teknikista

[1] Ada, «Rememoroj de Esperantisto», Sofia 1925, p. 72—73.

intelektularo — okupi la gvidantan rolon en la gvidado kaj reguligado de diversaj fakoj de la vivo socia, kiel reakcia ribelo de superaj tavoloj inter la mondlingvistoj—kontraŭ la esence vast-popola demokratia reĝimo en la Esperanta lingvopraktikado. Kaj tiu reakcia ribelo, direktita kontraŭ la amaso de esperantistoj, uzantaj sian lingvon kaj kontentaj de la rezultoj de tiu uzado, montriĝis nur same sensukcesa kaj senrezulta, kiel iu ajn alia reakcia ribelo, celanta konduki la socion al iu pli malalta grado de socia evoluiteco—ol la ŝtupo jam atingita.

Eĉ se Ido estis de la lingva vidpunkto teorie kelkgrade pli perfekta ol Esperanto, organize kaj socie ĝi estis nepra regreso. Tio solvis la rezulton de la postsekvinta rivalado inter Esperanto kaj Ido.

**La Ido-movado**

Unuopaj esperantistaj societoj en la latinidaj landoj aliĝis al Ido, apartaj societoj el Anglio kaj Germanio sekvis ilian ekzemplon. Kaj en ties nombro la societo de Idiom-neŭtralistoj en Nürnberg je la kvara fojo ŝanĝis sian titolŝildon. (vidu p. p. 103, 165)

La sistemo de la delegitaro konservis por si la nomon Ido.

Dank'al la energia propagando kaj abundaj monrimedoj, la disvastigo de la lingvo Ido estis entreprenita en vasta skalo, kvankam — por diri la veron — en la listoj de la idistaj organizaĵoj troviĝis «societoj», konsistantaj el du, tri personoj. Rapide aperantaj organizaĵoj samrapide ankaŭ malaperis. En la j. 1912 Ido, laŭ la informoj de idistoj, kalkulis preskaŭ 150 societojn en diversaj urboj. Tamen la nombro de la membroj de la tutmonda Ido-asocio al tiu tempo ne superis 600 personojn, kaj en la oficiala adreslibro de la interkorespondantaj idistoj estis enregistrita en la j. 1912 neplena milo da personoj.

Inter la popoloj de ne latin-germana deveno Ido tute ne disvastiĝis. En Rusio, ekzemple, fondiĝis nur 3—4 malfortaj Ido-organizaĵetoj.

Uzante la nomon «reform-esperanto», praktikante sian agadon inter la skismiĝintaj esperantistoj kaj trovante subtenon precipe en la latinidaj landoj, la lingvo Ido povis ekzisti per ecoj, ĉerpitaj el la sistemo Esperanto, kaj plenigi sian adeptaron preskaŭ ekskluzive el la nombro de la samaj esperantistoj ne kontentaj pri la principoj de Esperanto-evoluo kaj pri la gvidado de la Esperanto-movado.

La filozofiisto kaj matematikisto C o u t u r a t, sin montrinta talenta diplomato, montris ankaŭ la ecojn de bonega organizanto. C o u t u r a t estis redaktoro de la oficiala organo de idistoj — «Progreso» [1] kaj sekretario de la Ido-akademio, kaj — plej ĉefe — li estis la fakta gvidanto de la tuta Ido-movado.

Sed anstataŭ kompreni la sociajn kaj organizajn rezisto-kaŭzojn de la esperantistaj amasoj kontraŭ Ido (41), C o u t u r a t kaj kun li ankaŭ liaj samideanoj konjektis, ke Ido ne estas ankoraŭ sufiĉe perfekta kaj bezonas pluajn reformojn. Tial de la j. 1908 ĝis la j. 1913 per tuta serio da senĉese sekvantaj decidoj la Ido-akademio tre ŝanĝis la lingvon kaj ĝi fariĝis videble diferenca de Esperanto. Iom post iom Ido perdis multon el la simpleco, demokratieco kaj elementareco de la primitiva Esperanto kaj anstataŭ tio enkondukis novajn vortojn, escepto̧jn k. c. La lernolibroj kaj vortaroj el la unua ekzistoperiodo de Ido, pro multegaj ŝanĝoj kaj enkondukoj, fariĝis poste tute maltaŭgaj.

**La gramatiko de Ido**

Esence la principoj de la strukturo de Ido estas la samaj kiel tiuj de Esperanto. Multo — finaĵoj de la substantivoj, adjektivoj, adverboj

[1] «Progreso», oficala organo di la Delegitaro por adopto di Linguo helpanta internaciona, 1908—1910, Paris. Pli poste ĝis la j. 1914 samloke, kun subtitolo: «Oficala organo di l'Uniono di l'amiki di la Linguo Internaciona»; revuo sub la sama nomo komencis ree esti eldonata en Parizo en la j. 1931, sed jam nur kiel dumonata.

kaj de verbotempoj restis la samaj. Pli gravajn diferencojn prezentas el si ne pli ol 15% el la tuta gramatika kaj vortara materialo.

Kion tamen prezentas ĉi tiuj diferencoj kaj malsamaĵoj? La alfabeto de Ido posedas 28 literojn; la literoj supersignitaj forestas, ĉar estis forigita la principo de Esperanto: «al ĉiu litero — unu sono kaj inverse». En Ido la literaj kombinaĵoj ofte donas tute alian sonon. Por unu sono oni uzas 2 kaj eĉ 3 literojn.

La regulo de Esperanto — la akcento estas metata ĉiam sur la antaŭlastan silabon — estis konservita, sed troviĝas esceptoj: kelkafoje la akcento estas metata sur la lastan kaj sur la trian de la fino silabojn.

En la gramatiko estas multaj esceptoj. La substantivoj finiĝas per o, la adjektivoj — per a, sed la landnomoj finiĝas, simile al la adjektivoj, per a.

Ido-insigno

La akuzativo ne estas deviga. La nombro de afiksoj estis multigita. Pro tio nuanciĝis la vortoderivado, sed por la personoj, fremdaj al la lingvistiko, la lernado de Ido pro tio malfaciliĝis.

**La vortaro de Ido**

La vortaro de Ido malmulte diferencas de la vortaro de Esperanto. Jen la ordinara tendenco de la ŝanĝoj: anstataŭ la Esperanta butero — butro, anst. ĉevalo — kavalo, anst. lundo — lundio ktp.

Ĉar la vortoderivo en Ido estas starigata sur alian logikan bazon, tial multaj esperantaj derivitaj vortoj estis anstataŭitaj per novaj radikoj. Rezulte, oni, lernante Idon, devas lerni parkere preskaŭ duoblan kvanton da vortoj kompare kun Esperanto.

Iom post iom malproksimiĝante de Esperanto, Ido pli kaj pli limigis la rolon de la afiksoj, kiuj servas al personoj, lingvistike profanaj, kiel granda helpilo ĉe la ellerno de la vorta materialo.

| | |
|---|---|
| En Esperanto: | patro — patrino |
| en Ido: | patro — matro |
| en Esperanto: | varma — malvarma |
| en Ido: | varma — kolda |

La modela teksto, kiun ni donis por Esperanto (vidu p. 179) en Ido estas: «La futura kulturo, por qua kombatas la proletariaro, vere aspiras ed realigos la ideo di la internaciona linguo helpanta.»

Komparante ambaŭ tekstojn — Esperantan kaj Idan — oni povas facile koncepti la gradon de malsameco en la strukturo de tiuj du sistemoj.

La malgraveco de tiuj diferencoj estas pruvo, ke per la formoj de Esperanto la tasko ĝenerale estas korekte solvita kaj ke Esperanto estas tre proksima al la fina idealo de la universala helpa lingvo (44).

En tiu rilato oni devas konfesi, ke la sistemo Ido ne sukcesis doni ion tre novan aŭ esceptan. Oni ja povas anstataŭi unu formon per alia kaj unu vorton per alia, pli aŭ malpli konvena, sed ŝangi, rompi la principojn, sur kiuj estas bazita Esperanto, montriĝis tasko neebla.

En la j. 1913 Couturat anoncis, laŭ la decidoj de Ido-akademio, pri la komenco de la «unua» periodo de stabileco, dum kiu estos enkondukataj neniuj radikalaj ŝanĝoj en la oficialan sistemon de Ido.

Ĉiuj faritaj kaj farataj plibonigoj en Ido ne donis ĝis nun la deziritan rezulton: rapidan kaj decidan venkon kontraŭ Esperanto. La novlatinistoj ne senkaŭze nomas Idon lingvo de kompromisa tipo. Ido estas devigata halti sur la disvojiĝo, kaj multaj el la idistoj, simpatiantaj la latinigajn reformojn de la «Academia pro Interlingua», aŭ la unuavidan kompreneblecon de aliaj sistemoj, ŝiris siajn rilatojn kun Ido.

Tial el Ido-movado foriris tiuj «kolonoj» de la Ido-movado, kiel prof. J e s p e r s e n, redaktoro P. A h l b e r g kaj multaj aliaj.

Estis kvazaŭ certa sociala blindeco, kiu kaŭzis, ke tiuj multspertaj mondolingvistoj persiste atentis nur la lingvan fakon, ignorante konsiderojn sociajn kaj lingve-organizajn. Tamen lastatempe ankaŭ multaj idistoj komencas kompreni la siatempe faritan nepripensitan paŝon kaj revenas al Esperanto.

**La antaŭuloj de Ido**

Ido, kiel provo reformi Esperanton, havis kelkajn antaŭulojn, pri kiuj ni jam parolis en la X. ĉapitro. La plimulto de tiuj reformaj projektoj estis ligitaj al la epoko, kiam Z a m e n h o f mem en la j. 1895 projektis enkonduki kelkajn reformojn. La ĉefa celado de ĉiuj ĉi reformemuloj estis pli granda internacieco de la vortaro, simpligo de la gramatiko kaj forigo de la supersignoj.

Z a m e n h o f rilatis similajn provojn kun certagrada simpatio kaj ne kaŝis tion en siaj leteroj. Kaj en la unuaj ekzistojaroj de Esperanto, kiam la nombro de ĝiaj adeptoj estis malgranda kaj literaturo tre malriĉa, oni povis senĝene enkonduki apartajn ŝanĝojn. Tiel, ekzemple, la unua formo por la korelativoj t i a n, k i a n, estis poste reformita je t i a m , k i a m, ĉar evidentiĝis la ebla intermikso de tiuj korelativoj kun kelkaj aliaj, en ties akuzativa formo (kia-n, tia-n).

La pligrando de tiuj reformaj provoj lasis post si en Esperanto preskaŭ neniujn postesignojn; apenaŭ rimarkebla ilia influo estas en la pliofta uzo de formoj pli internaciaj, preferataj al la derivataj (redaktoro, anst. redaktisto k. a.).

Tute nerimarkeblaj pasis eĉ tiaj provoj, kiel provo de hispana esperantisto R. H u e r t a s, kiu en la j. 1890 en sia lernolibro de Esperanto[1], donis kelkajn regulojn, malsamajn de la reguloj de la originala Esperanto.

H u e r t a s anstataŭis la esperantajn literojn: j per y, kaj ĵ per j.

H u e r t a s forigis la akuzativon kaj ŝanĝis parton el la fundamentaj radikoj, tiel ekz.: anstataŭ lingvo, li skribis: linguo ktp.

Alia konata esperantisto P. B e r t h e l o t, sub pseŭdonimo V e r e m a, publikigis el la j. 1904 proponon pri la radikala reformo de la alfabeto de Esperanto[2].

Similaj proponoj estis farataj diverstempe ankaŭ de aliaj esperantistoj.

Ĉiuj ĉi reformaj projektoj en certaj punktoj koincidis, sed en la plimulto de la proponoj ili estis profunde malsamaj kaj dependis de la individuaj gustoj kaj simpatioj de siaj elpensintoj.

Per tio oni povas klarigi, ke samtempe kun la nombra kresko de la esperantista movado la plimulto de esperantistoj, praktike kontentaj pri Esperanto, komencis montri ĉiam pli fortan reziston al ĉiuj provoj reformi la lingvon. La novaj projektoj, kiuj en kelkaj detaloj povis esti eĉ pli perfektaj ol Esperanto, ne povis konkuri kun tiu lasta, ĉar la plimulto de ne teoriaj serĉemuloj, sed praktikuloj, restadis fidelaj al Esperanto.

Tio siavice instigis inter la teoriuloj celadon krei fine tian sistemon, kiu estu je tioma grado pli perfekta ol Esperanto, ke ĝia triumfa supereco fariĝu plej evidenta.

Ĉar ankaŭ al Ido oni povis veni kun la individua kritika esploro kaj ĉar ankaŭ Ido ne faris la mortan baton al la Esperanta movado,

---

[1] Rodriguez Huertas, «Gramatica, ejercicios y diccionario de la Linguo Internacia del Doctor Esperanto», Malaga, 1890 ([47]).

[2] M. Verema, «Fonetiko litera. Skizo pri kelkay konsonantoy», Ceret (Pyr. Or.), 1904 ([47]).

tial same post la j. 1907 oni povas rimarki grandan nombran kreskon de diversaj projektoj, kiuj celis perfektigi Esperanton kaj Idon.

R. de Saussure (1907—1930)

La ĉefa kaŭzigilo de la malkontento kaj malkonsento en la sistemo Esperanto estis ĝiaj 6 literoj kun la supersignoj. Sed la anstataŭo de tiuj literoj per iuj aliaj kondukis nepre kaj konsekvence al la ŝanĝoj en la vortaraj kaj gramatikaj elementoj.

Kiel ekzemplo por tiuj provoj reformi Esperanton kaj forigi ĝiajn supersignitajn literojn povas servi la reformaj projektoj de René de Saussure.

En la j. 1907, tuj post la publikigo de la broŝuro de Ido, R. de Saussure sub karakteriza pseŭdonimo «Antido» eldonis sian franclingvan projekton de la «Elementa gramatiko de internacia lingvo»[1] Tiu ĉi verko estis dediĉita al «nia glora majstro Zamenhof» kaj celis starigi iun mezan solvon inter la sistemoj de Esperanto kaj Ido.

La reformoj de Saussure intencis forigi la supersignojn kaj enkonduki kelkajn novajn sufiksojn. Ĉiuj ŝanĝoj, proponitaj de Saussure, estis tiaspecaj, ke ili povas esti lerneblaj en la daŭro de 30—40 minutoj. Iujn malhelpojn dum la legado de la teksto, kunmetita laŭ la sistemo de Antido, esperantisto ne renkontas.

La proponoj de Antido tamen estis akceptitaj nek de idistoj, nek de esperantistoj, kaj en la j. 1910 R. de Saussure eldonis kelkajn novajn verkojn dediĉitajn al defendo de la principoj de vortderivado en Esperanto kaj la «Sistemon de internacia fonetika alfabeto Antido n-o 2»[2]. Saussure akceptis la vidpunkton, ke la ideoj kaj konceptoj, transdonataj per vorto, dependas de la ĝenerala kunteksto de la frazo, de la loko, kiun la koncerna vorto en la frazo okupas, kaj li opiniis tute neebla atingi la kompletan ĝustecon de la vortderivado pere de simplaj afiksoj.

En kontraŭtezo al la konstatoj de Couturat, Saussure ŝtarigis siajn proprajn, konformajn al la komunaj formoj en la evoluo de la naturaj lingvoj: «La internacia lingvo devas kontentigi la du bazajn principojn: principon de neceso kaj principon de sufiĉo».

Defendinte la tezon, konstatantan, ke ĝenerale la principoj de la konstruo de Esperanto estas pli simplaj kaj akcepteblaj, ol la superraciaj tendencoj de Ido, Saussure opiniis la sola pluso de Ido ioman simpligon de la alfabeto kaj li donis en tiu rilato siajn proprajn proponojn, kiuj akcelus pli grandan konservadon de la bazaj formoj de Esperanto. Inter la projektoj: Antido n-o 1 kaj Antido n-o 2 oni povas observi certajn diferencojn; ekzemple en la unua la multenombro estas formata per finaĵo -i kaj en la dua per -n, la akuzativo en la dua projekto estas formata per prepozicio 'i' ktp., sed ĝenerale la fundamento de Esperanto en ambaŭ projektoj estas malmulte ŝanĝita.

La tezoj pri la derivado, ellaboritaj de Saussure, estis aprobitaj kaj akceptitaj de la Esperanta Akademio. Sed la proponita de li reformo de la alfabeto ne estis esplorita.

En la j.j. 1912 kaj 1913 de Saussure faris energian propagandon por la de li reprilaborita reformo de ortografio en Esperanto kaj por kelkaj ligitaj kun tio ŝanĝoj en la lingvo. Sian novan projekton li nomis «Lingvo Kosmopolita». Saussure eldonis eĉ gazeton dediĉitan al propagando de siaj ideoj. Poste, en la fino de la j. 1913

---

[1] «Elementala gramatiko de la lingwo internaciona kun exercaro di Antido», Genève, 1907 ([47]).

[2] «Teoria ekzameno de la lingvo Esperanto kun fonetika internacia alfabeto, sistemo Antido n-o 2», Genève, 1910 ([47]).

R. de Saussure rezignis de iuj reformoj en la gramatiko kaj vortaro de Esperanto kaj sin limigis per anstataŭo de la supersignitaj literoj sen supersignoj. La novan sistemon li nomis kiel la antaŭan «Lingvo Cosmopolita» (sed anstataŭ k li uzas c).

La praktika apliko de la nova ortografio restis en la limoj de kelkaj libroj, eldonitaj de R. de Saussure mem.

Noton, kiun donas prof. A. Guérard (1), pri tio ke en la j. 1913 Saussure prilaboris novan lingvoprojekton «Konkordia», oni devas konsideri ne pruvita.

Jam post la mondmilito en la j. 1919 R. de Saussure konstruis novan sistemon de lingvo «Esperantida», kiu prezentas per si variaĵon de liaj antaŭaj projektoj, koncerne la forigon de la supersignoj kaj ŝanĝon de kelkaj gramatikaj finaĵoj en Esperanto.

En la sama j. 1919 de Saussure komencis eldoni en Neuchâtel (Svisio) dumonatan folion «Internacia lingvo Esperantida».

Simile al la antaŭaj projektoj de Saussure, ankaŭ Esperantida estis submetita al senĉesa reformado. En la j. 1922 estis eldonita fundamenta lernolibro de Esperantida en tri lingvoj[1]. En la j. 1923 aperis la vortaro de Esperantida[2]. Saussure provis organizi propagandon de sia nova sistemo. Kelkaloke formiĝis grupetoj da «esperantidistoj», estis fondita «Akademio Esperantida», «Universala unio esperantidista» kaj eĉ «Tutmonda esperantidista katolika unio». Depost la j. 1925 katolika abato Zelezny en Planica (Ĉeĥoslovakio) eldonas esperantidistan gazeton «Internacia lingvo Esperanta». Ĉiujare aperas 4—5 numeroj.

Ni notu speciale, ke Zelezny, en sia batalo kontraŭ la klasika Esperanto, lastatempe uzas argumentojn, ke tiu lingvo estas lingvo de revoluciuloj, ke la verda stelo de Esperanto aliancis kun la ruĝa stelo, ke tiakaŭze necesas nun firmigi la blankan stelon de Esperantida ktp.

En la j. 1925 de Saussure en Bern eldonis gazeton «Teknika Revuo», en kiu li aplikis la sistemon Esperanto kun reformita ortografio. Tiun sistemon li nomis «Nov-Esperanto».

Siajn eksperimentajn eldonaĵojn en Nov-Esperanto R. de Saussure daŭrigas aperigi ĝis la lasta tempo mem.

**R. Brandt (1908)**

Profesoro de la Moskva universitato, Roman F. Brandt, laborinta pri la skizo de universala lingvo «Romanizat», publikigis en la j. 1908 projekton de kompromisaj reformoj por Esperanto-Ido. La informojn pri tiu projekto ni ricevis nur el unu sola raporto de la aŭtoro[3], dediĉita al tiu ĉi problemo, kaj el artikolo, presita en la gazeto «Progreso», junio 1909. Brandt proponis anstataŭi la esperantan finaĵon por la multenombro -j per litero -s, kaj por la verbaj finaĵoj enkonduki la literon -n. La ekstera formo de la lingvo estis submetita al pli seriozaj amendoj, ol ĉe Antido, sed jam post unu jaro R. Brandt rezignis sian projekton kaj fariĝis unu el la plej aktivaj partoprenantoj de la rusa Esperanto-movado. Interalie al la plumo de R. Brandt (pseŭdonimo Oresto Golovnin) apartenas kelkaj tradukitaj kaj originalaj esperantaj versaĵoj.

---

[1] Antido, «Fundamento de la lingvo Esperantida», Neuchâtel, 1922 (47).

[2] Antido, «Universala vortaro (trilingva) de la internacia lingvo Esperantida, duma eldono kun oficiala aldono», Bern, 1923 (47).

[3] Prof. R. F. Brandt. «O meĵdunarodnyĥ jazykaĥ voobŝĉe i v ĉastnosti ob Esperanto», Moskva, 1909, (45) (47).

Jam en la j. 1907 dano Th. Kornerup proponis al la esperantista Lingva Komitato fari skrupulan esploron en la aktualaj gramatiko kaj vortaro de Esperanto, kaj enkonduki tien konformajn korektojn[1]. La plej baza kaj konkreta en liaj projektoj estis ree forigo de la supersignoj kaj transskribo de la sonoj ŝ kaj ĵ per la duliteraj sj, zj, de la sono ĉ per g, de ĝ per gj. T. Kornerup (1907)

P. Stojan([40]) datumas sub la j. 1917 alian proponon de Kornerup, en kiu li parolas pri la ĝusta fikso de la gramatiko[2].

Konata belga esperantisto Jamin e, en la la j. 1908 publikigis kompromisan projekton «Mez-voio»[3]. Simile al la sistemo de Antido n-o 1 ankaŭ en tiu ĉi projekto estas la tuta atento turnita al la forigo de la supersignoj. Jamin (1908)



J. Jamin

En la sama j. 1908 projekton de reformita Ido proponis la franca idisto Duthil[4]. La plej ĉefa propono en tiu ĉi projekto estas neŝanĝeblo de la substantivoj kaj adjektivoj. Ĉiujn ŝanĝojn laŭnombrajn kaj kazajn oni ricevas el la ŝanĝo de l'prepozicioj, starantaj antaŭ la substantivoj. A. Duthil (1908)

En la j. 1909 en la maja numero de la gazeto «Progreso» (Parizo) aperis nova projekto de Duthil, momita de ĝia aŭtoro «Dutalingue», laŭ siaj gramatikaj formoj jam esence diferenca de la unua.

Tre kategoria en siaj reformoproponoj montras sin la projekto de Seidel, unu el la unuaj germanaj idistoj[5]. La projekto de Seidel nomiĝas projekto de reformita Esperanto. Por paralela komparo de tri lingvoj — Esperanto, Ido kaj Ispirantu (?) de Seidel povas servi la traduko de la titolo de la delegitaro: — a) en Esperanto: «Delegitaro por la adopto de universala helplingvo», b) en Ido: «Delegitaro por la adopto di universal helplingvo» kaj c) en Ispirantu: «Delegacionu por le aprenu di universale elpelingvu». A. Seidel (1909)

La bazaj ideoj de Seidel estis esprimitaj de li jam en la j. 1908 en la libro speciale eldonita antaŭ la IV. internacia esperantista kongreso en Dresden[6]. La reformo, kiun proponis Seidel, celas forigon de kelkaj literoj (h) kaj anstataŭon de iuj leteroj per aliaj, ekz. la esperantan e — per i, o — per u. Pro tio la ortografio de la lingvonomo estas «Ispirantu».

En la sama jaro 1909 Seidel reprilaboris sian projekton «Ispirantu» je sistemo «Ile»[7], kiu, laŭ la jena ortografio de la nomo de la delegitaro jam montras esencajn diferencojn de la unua lia projekto: «Delegitaro por l'adoptsione de universale helpilingue».

---

[1] «Proponoj al la Lingva komitato pri revizio de l'Esperanto, faritaj de Th. Kornerup», Hjöring, 1907.

[2] T. Kornerup, «Gram. med faste former, Grammaire fixée», Köbenhavn, 1917.

[3] «Mez-voio — Proponaro — Al nia Lingva Komitato kai al chiui anoi de la lingvo Esperanto», Februaro, 1908 (Bruxelles?) ([47]).

[4] A. Duthil, «Les determinatifs, les pronoms, le verbe dans la langue internationale, solution scientifique et définitive d' une des difficultés qui divisent les partisans de cette langue» (1908?).

[5] A. Seidel, «Reform-Esperanto, Abriss der Grammatik, Sprachproben und Wörterverzeichnis». Berlin, 1909.

[6] A. Seidel, «Weg frei für Esperanto. Das Weltsprachproblem vor dem Forum der Sprachwissenschaft», 1908 ([48]).

[7] A. Seidel, «Gramatiko di l' Ile. Nuva internaciona helplinguo kon multa texti e vortaro», Berlin, 1909.

La lernolibro de tiu ĉi sistemo estis eldonita en Ido. La intenco de S e i d e l, aperigi propran gazeton, ne estis realigita.

**R. Triola (1909)** Komence de la j. 1909 R o b e r t o T r i o l a, redaktoro de la ital-ida gazeto, prezentis en sia gazeto projekton de «Interlingue», alie nomata «Italico», kiu estis reformo de Ido proksimiganta ĝin al Interlingua kaj novlatinaj projektoj[1].

**H. Götze (1909)** En la sama 1909 jaro estis eldonita ankoraŭ unu reforma propono de H. G ö t z e[2]. La esenco de tiu ĉi reformo estis forigo de la supersignoj, ioma variigo de la restantaj literoj kaj pli granda skemigo de la gramatiko.

**C. Colas (1910)** Grandega kresko de la kvanto da reformprojektoj ne povis ne kaŭzi naturan incitiĝon inter la gvidantoj de la Idomovado, kiu tiamaniere ricevis tutan vicon da neatenditaj konkurantoj. C o u t u r a t en la gazeto «Progreso» submetis al la plej severa kritiko ĉiujn projektojn, celantajn la korekton de Ido, alvokis al unueco kaj al konformiĝo laŭ la decidoj de la delegitaro.

Ne mankis okazoj, kiam C o u t u r a t esprimis dubon pri la pureco de l' aspiroj de la aŭtoroj de kelkaj apartaj projektoj.

Lian ĉefan malkontenton kaŭzis la projekto de «Adjuvilo» de esperantisto C o l a s, kiu aperigis sian verkon sub pseŭdonimo «profesoro Esperema»[3]. C o l a s estis akuzita pri la deziro provoki la idistojn, kaj estas malfacile difini, kio pli incitis C o u t u r a t, ĉu tio, ke C o l a s restis post la publikigo de sia projekto esperantisto, ĉu tio, ke la projekto «Adjuvilo» montris aliajn vojojn por solvo de la lingva reformoproblemo, ol tiuj, kiujn proponis Ido, aŭ fine ĉu tio, ke pôr la nomo de sia projekto C o l a s elektis nomon «Adjuvilo», rememorigantan pri la projekto de B e a u f r o n t—«Adjuvanto», la antaŭulo de Ido.

**H. Sentis (1911—1928)** Alia franca esperantisto H. S e n t i s dum la j. j. 1911—1914 eldonis specialan litografiitan gazeton[4], kiu sin okupis pri la proponoj de diversaj reformoj de Esperanto.

En la j. 1912 H. S e n t i s publikigis en Grenoble versaĵaron «Por Esperanto» en ortografie ŝanĝita lingvo. Ankaŭ pli poste en la jaroj 1916—1928 S e n t i s daŭris labori en la sama kampo de ioma modifigo de Esperanto ([40]).

**Z. Romanski (1910)** Iom moderigitan projekton de reformoj en Esperanto proponis en la j. 1910 Z y g m u n t R o m a n s k i[5] el urbo Lwow. La ĉefa enhavo de lia projekto estis forigo de la supersignoj kaj parta latinigo de vortaro.

**F. Stephan (1912—1913)** Germana esperantisto F r i t z S t e p h a n, eksigita el la Germana esper. asocio pro trompaĵoj kaj juĝe akuzita, decidis subfosi la Esperanto-movadon kaj en la j. 1912 komencis eldoni specialan gazeton, kiu propagandis Esperanton «kun reformoj de D-ro W. Stelzner (?)»[6]. Tiu ĉi projekto prezentis simplan miksaĵon — vermiĉelon el diversaj elementoj de Esperanto kaj Ido. Aperis kelkaj lernolibroj en tiu ĉi

[1] «Revista di lingua Internazionale», 1909, n-o 3.
[2] Hermann Götze, «Die Weltsprache Esperanto, ihre Vorzüge und Mängel», Dresden, 1909.
[3] Prof. V. Esperema, «L' Adjuvilo, Langue auxiliaire internationale, basée sur le maximum d' internationalité, de simplicité et d' harmonie», Paris, 1910. Guérard indikas alian eldonjaron de la libro de Collas: 1908.
[4] «Esperanta evoluo», Grenoble, 1910—1914.
[5] Zygmunt Romanski, «Pasho al perfektigo de Esperanto», Lwow, 1910.
[6] «La Esperantano», monata internacia gaseto por propagando de la Mondlingvo Esperanto kun la reformi de D-ro W. Stelzner, Leipzig, 1912.

lingvo (de Kuhnert kaj Wagner — supozeble ambaŭ pseŭdonomoj de Stephan).

En la j. 1916 Stephan publikigis la lastan lernolibron de sia plibonigita Esperanto [1].

**«Ŝulerc» (1912)**

Kurioza projekto-parodio estis eldonita en la j. j. 1912 en Peterburgo en la rusa lingvo de P. Stojan, sin kaŝinta sub la pseŭdonimo de elpensita aŭtoro O. Ŝulerc kaj tradukisto Nikolajev[2].

La projekto de Ŝulerc prezentas el si demonstran transiron pere de kelkaj reformoj, faritaj en Ido, ree al Esperanto (ricevanta ĉe la aŭtoro la nomon «Idido»). Ke la tuta projekto estas kompleta groteskaĵo, tion atestas la nomo mem, atribuita al la aŭtoro. Post certa translokigo de la literoj ĝi donas esperantan vorton «ŝerculo».

**J. Barral (1910—1928)**

J. Barral en la j. 1910 prilaboris projekton «Nuv Esperanto», en kiu li eldonis en Berlino gazeton «Nuva Mondo» — internaciona et interreligyal revuo. Laŭ sia esenco tiu ĉi lingvo estas variaĵo de Ido. En la sama j. 1914 Barral publikigis en Ido libron, kiu traktis mallonge la historion de l' homaro [3], kaj en kiu la aŭtoro faris kelkajn dekliniĝojn de la oficiala sistemo de lingvo Ido.

Couturat atakis ĉi tiun libron per tia gala kritiko [4], kun kiu oni eĉ ne povas kompari la siatempan kritikon de Zamenhof kontraŭ la poemaro de Grabowski (vidu p. 157) aŭ kontraŭ la memvolaj korektaĵoj de la lingvo en la lernolibro de Huertas (vidu p.188). Rezulte, Barral tute forlasis Idon kaj en la j. 1914 aperigis jam tute novan projekton de «Federal» kaj «Union-sistem» [5].

En la j. 1923 J. Barral presigis skizon de «Federala lingvo», [6] kiu devus esti akceptita de la vivo mem kaj kiu devus esti pleje internacia laŭ sia vortara materialo kaj pleje simpla laŭ sia gramatiko.

La nova projekto de Barral estas granda proksimiĝo al la formoj de la novlatinaj kaj novlatinidaj sistemoj. Ekzempla teksto: «El organization de un federament internacional de states postula un linguo Internacional» (La organizo de internacia federacio de ŝtatoj postulas internacian lingvon).

**D-ro V. Tiĥomirov (1914)**

D-ro V. Tiĥomirov en Moskvo en komenco de la j. 1914 tuŝis la problemon de la reformoj en Esperanto [7]. La proponoj de Tiĥomirov havas tamen treege arbitran karakteron. Sufiĉos, se ni por ekzemplo indikos la proponitan novan vorton kvesto, anstataŭ la esperanta demando kaj Ida questiono, aŭ la novan vorton proletajro, anstataŭ la internacia proletariat ktp.

**Aliaj reformaj projektoj (1908—1914)**

Krom ĉiuj de ni cititaj projektoj, aperis ankaŭ aliaj, konataj al ni nur laŭ la nomoj de la projektoj aŭ de la aŭtoroj.

---

1 Fr. Stephan, «Leitfaden zur Erlernung der verbesserten Esperanto-Weltsprache», Leipzig, 1916.

2 O. Ŝulerc, «Novyj meĵdunarodnyj jazyk Idido», vypusk II (perevel s nemeckago Nikolajev), Peterburgo, (1912) (47).

3 Jean Barral, «Nova horizonti, itinerario dil Historio Universal», Leipzig, 1914(47).

4 «Progreso». Paris, 1914, p. 112—115.

5 J. Barral, «Elementos gramatikali dil linguo internacional e di sui dialekts «Tholzminden (1914?) kaj lian «Elementala Matematiks di la linguo int. e di lua dialekts», «Union Sistem», Berlin, 1914.

6 J. Barral, «La langue fédérale de la Société des Nations», Nice (1923?)(47).

7 Dr. V. V. Tiĥoirovm, «Alestokv pri evoluado de Esperanto kiel lingvo vivanta», Moskvo, 1914(47).

Ĉe S t o j a n (40) ni trovas indikojn pri: projekto de C h. L e m a i r e el Bruxelles — «Ilo» (1908), «Edilo» de A. H a u g g [1], «Linguo internationala» de E v a c u s t e s P h i p s o n (Croydon, 1908), «Mondea» de J. S c h e e f e r [2], «Reform-Esperanto» de R o d e t (1910 j.), «Reform-Esperanto» de P. D. H u g o n (1010 j.); «Esk» de M. S o n d a h l [3], «Medio» de O. N a c h t i g a l l (1911), neeldonitaj projektoj de P. E. S t o j a n mem — «Aryana» (1911), «Ariana» (1914) kaj «Amiana» (1919—1922); «Europeo» de C. A. B r a v o d e l B a r r i o [4].



Ch. Lemaire

Aldone al siaj menciitaj projektoj P. S t o j a n (40) modeste kaŝas sian aŭtorecon sub la pseŭdonomoj R a d o v i ĉ, R i b a u l b kaj P r a n i c k i por jenaj manuskriptaj projektoj: Spiranta kaj Lingua Franka (1911), Unita, Liana (1923), Eo (1925), Espo kaj Eo (1926).

G u é r a r d (1) citas al ni nekonatan proponon de D-ro G u l i a n o V a n g h e t t i, celantan interpacigi samtempe la sistemojn de Esperanto, Ido kaj Interlingua per la akcepto por la vortara bazo de la radikoj de Interlingua; kaj por la gramatika bazo — regulojn de Esperanto kaj Ido (1911). Tiamaniere rezultiĝis samtempe du projektoj «Latin-Esperanto» kaj «Latin-Ido».

**Unuiĝo por la starigo de mondolingva oficejo**

Ni notu ankoraŭ unu interesan entreprenon. Laŭ la iniciato de prof. W. O s t w a l d, en la j. 1911 en Bern, formiĝis unio, kiu celis kun partopreno de eŭropaj registaroj kunvoki konferencon por krei la internacian oficejon por la adopto de unu oficiala internacia lingvo [5]. Kelkaj tre aŭtoritataj personoj, precipe svisoj, partoprenis ĉi tiun organizaĵon,

La idistoj baldaŭ fariĝis gvidantoj de la afero kaj okupis postenojn de la sekretarioj de la unio. Rezulte la esperantistaj organizaĵoj komencis ignori la union kaj ĝiajn entreprenojn. La direktoro de la internacia poŝt-telegrafa oficejo, honora prezidanto de la unio, kaj kelkaj aliaj neŭtralaj personoj, partoprenintaj la laborojn de la unio, en la j. 1913 forlasis la organizaĵon. Malgraŭ tio, ĝuste antaŭ la komenco de la mondmilito, la ministro por eksteraj aferoj de Svisio komunikis al la reprezentantoj de la unio, ke la registaro konsentas demandi ĉiujn registarojn, ĉu ili trovas aktuala internacian kongreson de registaroj, traktontan la problemon de internacia lingvo. La subite eksplodinta milito malhelpis efektivigi ĉi tiujn planojn.

**«La Ponto»**

Jam antaŭ la formiĝo de tiu ĉi unio, samloke, en Bern, en la j. 1910 formiĝis organizaĵo, kiu celis la starigon de unu sola plano por ĉiuj kulturaj entreprenoj de la nuntempo, — nomata «La Ponto». «La Ponto» inter aliaj tezoj de sia laboro, konstatinte la valoron de internacia lingvo, decidis praktike utiligi la lingvon Esperanto kaj publikigis en tiu ĉi lingvo solidan verkon, temantan pri la bazaj principoj de sia estonta

---

[1] A. H a u g g, «Edilo — von Esperanto durch Ido zu Ilo, der Internaciona Linguo», München, 1909.

[2] J. S c h e e f e r, — «Mondea! Die neue Weltsprache. Unerreicht! Unübertrefbar! Neues system in einer Minute erlernbar!», Berlin, 1910.

[3] En «Ofitziala Bulteno de l'unio sotziokrata», Alagointas (Brazil). 1912—1913.

[4] Bravo del Barrio, «Europeo», Madrid, 1914.

[5] «Verband für die Schaffung eines Weltsprache-Amtes», Bern, 1911 ĝis 1914(47).



La partoprenantoj de la universala IX ido Kongreso en Sopron Hungario en la j. 1929.

agado [1]. Sed oni ne trovis rimedojn por efektivigi la tradukojn de tiu ĉi libro en la naciajn lingvojn. O s t w a l d oferis al «La Ponto», 100 000 markojn kun kondiĉo, ke ĝi akceptu kaj uzu Idon. Ido do fariĝis la lingvo de «La Ponto». En la j. 1913 «La Ponton», post la ĉeso de la subvencio de Ostwald, trafis bankrotiĝo kaj ĝia agado ankaŭ ĉesis.

**La evoluo de Ido-movado**

Juĝante la situacion de la praktika disvastiĝo de la ambaŭ konkurantaj sistemoj Esperanto kaj Ido, kiel laŭ la kvanto da lernolibroj, literaturaĵoj, specialaj eldonaĵoj, tiel ankaŭ laŭ la nombro de organizaĵoj kaj laŭ la nombro de apartaj adeptoj, ni devas konstati, ke la sistemo Ido estis disvastigita kaj aplikata almenaŭ dekoble pli malmulte ol la sistemo Esperanto [2].

Dum sia paralela ekzistado ambaŭ sistemoj — Esperanto kaj Ido, aplikataj de siaj adeptoj, daŭris evolui memstare kaj sendepende unu de la alia. La apero de Ido ne detruis la esperantan movadon, sed ankaŭ Esperanto ne sukcesis likvidi la reformistan movadon. La eblon de ioma progreso donis al la sistemo Ido la esperantistoj, kiuj forlasis pro ĝi la sistemon Esperanto en la unua tempo post la apero de Ido.

Nature Esperanto, kiel lingvo pli disvastigita kaj pli aplikita, havis pli da ŝancoj por sukcesa propagando. La ĉefa kerno de la idistaro estis formata el personoj esence malamikaj ne nur al la lingvo-formoj de Esperanto, sed ankaŭ al la «kaoso de ĝia evoluo», kiel estis traktata la «libera evoluo» de Esperanto. Do fakte ekzistis jam du frakcioj de la Mondolingvo-movado: la Esperanta-amasa, esence demokrata kaj la

---

[1] K. W. Bührer kaj A. Saager, «La organizado de la intelekta laboro per la Ponto», Ansbach, 1911.

[2] Vidu la ruslingvan broŝuron «Ido, tak nazyvajemyj naŭĉno usoverŝenstvovannyj esperaotn». (Ido, la tiel nomata science perfektigita esperanto), Moskva, 1923.



Partoprenantoj de la III-a Universala Esperanto Kongreso en Cambridge en la j. 1907.

Ido, de homoj principe fremdaj al la amasa lingvo-movado kun iu parlament-ŝajna gvidorgano.

La sistemoj Esperanto kaj Ido, originantaj el la sama radiko, nature estas proksimaj unu al la alia, kaj la personoj, kiuj posedas unu el la du sistemoj, facile komprenas la alian kaj post malgranda lerno povas ĝin ekposedi. La apartaj detaloj kaj ecoj en la konstruo de ambaŭ sistemoj estas traktataj diverse de diversaj personoj kaj havis subjektivajn defendantojn kaj kritikantojn.

Tial certe ni pravas, asertante, ke en tiu batalo pli gravis la personoj kaj sociaj konsideroj, sed ne konsideroj pure-lingvaj (41).

La morto de C o u t u r a t, okazinta pro aŭtomobila akcidento en aŭgusto de la j. 1914, faris tre senteblan baton al la tuta Ido-movado. Dum la mondmilito aperadis nur unu sola idista gazeto en Svedio[1].

Nur post la fino de l' milito komenciĝis ioma vigliĝo en la tendaro de Ido. En la j. j. 1920—1922 iutempe ŝajnis, ke la Ido-movado en kelkaj regionoj povos superi la Esperantan. Estis de la idistoj entreprenita sistema agitado, ligita kun la laŭdire efektiviĝinta akcepto de Ido flanke de speciala komisiono de la Komunista Internacio. Tamen la Ekzekutiva Komitato de Komintern faris specialan klarigon, ke tiu ĉi akcepto neniam estis decidita.

[1] «Mondo», Stockholm, 1912—1928, kiam ĝi anoncis sian transiron al la lingvo Novial.

Depost la j. 1921 estis aranĝataj internaciaj idistaj kongresoj. Ĉiun el ili partoprenis tre malmultenombra kongresanaro, de jaro al jaro malkreskinta [1].

**La reformprojektoj de la periodo 1919—1926**

Ĝis nun ni parolis nur pri la aŭtoroj, kies reformoprojektoj aperis jam antaŭ la j. 1914. La nombro de la reformemuloj tamen estis plenigata pere de ĉiam aperantaj novaj volontuloj. En la j. 1919 en Leipzig P. Völz[2] eldonis projekton de «plibonigita» Esperanto, multfaze simila al la reformoprojekto de Zamenhof el la j. 1894.

Redaktoro de la idista gazeto «L' Edukero», eldoninta en la j. 1923 en Ĝenevo gazeton «Defirs», Marcel Pesch, prilaboris en la j. 1923 novan projekton «Espido» — miksaĵon el Esperanto kaj Ido. La skizo de tiu ĉi projekto estis presita en la gazeto «Kosmoglott» [3]. N. Juŝmanov[4] datumas sub la j. 1920 neeldonitan projekton de esperantisto V. Ŝmurlo — «Esperido» aŭ «Ariadna lingvo» (Arling). Tiu ĉi projekto restas al ni nekonata, sed jam en la j. 1917. V. Ŝmurlo eldonis en Petrogrado esperantan informilon, kiu distingiĝas per kelkaj korektaĵoj en la lingvo Esperanto. Ĉi tiuj korektaĵoj multokaze estas profunde individuaj kaj kontraŭaj al la ĝen ralaj principoj de la konstruo de logika kaj simpla gramatiko. Ekz.: en Esperanto — «ne estas» kaj en la sistemo de Ŝmurlo — «nes».

Estas konataj ankaŭ aliaj reformprojektoj, pli aŭ malpli detale ellaboritaj.

La aŭtoro de unu plua projekto, kiu kombinis la simpligojn de la latina gramatiko kun la sistemo de Ido, estis membro de la Academia pro Interlingua, W. Schwarz el Lauenburg. Sola eldonaĵo en tiu ĉi sistemo estis poŝtkarto de la j. 1922, enhavanta la indekson de la proponataj gramatikaj ŝanĝoj (47).



D-ro Max Tolmey

En la gazeto «Kosmoglott» estis presita alia projekto de anonima aŭtoro «Aspiranto», kiu estas miksaĵo de principoj kaj elementoj de Ido kaj Occidental [5].

P. Stojan (40) komunikas [6] pri pluraj aŭtoroj kaj projektoj: T. Martineau kun neeldonita projekto «Monda linguo», 1924; D-ro M. Talmey el New York kun projekto «Arulo», 1924 [7]; E. F. Mac Pike el Chicago—«Synthetic Language», 1922; usonano Kulbacki «Esperanto plibonigita», 1925; Fred. C. Wingfield el Chicago — «Plibonigita Esperanto», 1926; manuskripta projekto «Universal» de Harley-Vamu (Harkov-Berlin), kiu rilatas al la j. 1925 kaj estas projekto de etimologie reformita Esperanto, k. a.

---

[1] En la VIII-a internacia kongreso idista, okazinta en Freiburg (Baden) en aŭgusto 1929, partoprenis nur ĉirkaŭ 30—40 personoj («Heroldo de Esperanto», n-o 39/535, 27. sept. 1929)(47).

[2] Paul Völz, «Ausführliche Grammatik des verbesserten Esperanto», Leipzig, 1919(48)

[3] «Kosmoglott», Reval, 1923, n-o 5, pĝ. 62—63, la artikolo «Espido, mixuro ek Esperanto ed Ido».(47).

[4] «Mondo», Stockholm, 1926, n-o 2, pĝ. 48(47).

[5] «Kosmoglott», 1924, n-o 1/2, pĝ. 8—9, artikolo «Un nowi Reform-Esperanto» (471)

[6] «Mondo», Stock olm, 1926, n-o 12, pĝ. 296 (47).

[7] Suplemento a Raporto XXVII, «Reflekti pri la Universala linguo e nova vorti», New York, 1925.

Anonime elpaŝis usonano H. E. R a y m o n d kun projekto «Esperido» [1] de la j. 1925. Jen estas ekzemplo de tiu ĉi sistemo: «Esperido estas facile lernu, facile legu kaj facile komprenu». Iom pli poste [2] H. E. R a y m o n d faris — laŭ metodo simila al tiu de R. d e S a u s s u r e — proponon pri unuecigo de Esperanto kaj Ido per starigo de nova sistemo Anglido. Ekzemple: ĉevalo (esp.) — kavalo (ido) — chevaliro (anglido); ĉiu — omna — yeda; vaporo — vaporo — stim.

Ĉiuj ĉi sistemoj diferenciĝas (kaj tre negrave) de Esperanto kaj Ido aŭ en siaj gramatikaj reguloj, aŭ en ortografio, aŭ en la principoj, laŭ kiuj estis kompilitaj la koncernaj vortaroj.

Ekzistas eĉ pli suprajaj reformoproponoj, kiel ekzemple sistemo «Ido avancit» de R o b e r t H a r d i n g el Londono, kiu proponas konservi la sistembazon de Ido, sed forigi la neprajn distingajn finaĵojn por la substantivoj, adjektivoj kaj por la estanta tempo de la verboj.

Sed dumtempe tiu ĉi sistemo sin montris presita nur en sola letero de H a r d i n g al E. d e W a h l [3].

Iun apartaforman reformon de la esperanta alfabeto provis enkonduki la gazeto «Unuigita Tuthomaro», en Hamburg, kiu konservis la supersignojn, sed enkondukis la literon x kaj duoblajn konsonantojn: «Kongresso», «Kollekto», «Kommunisto», «Orthographio» ktp.

En la j. 1930 — la renoviĝinta eldono de tiu gazeto lasis tiujn provojn kaj ekuzis la ortografion klasikan.

En Rusio eksidisto N. R u b i n i n projektis sian propran sistemon «Sintesal». Sola teksto de tiu sistemo aperis en Pariza revuo «Tolero» (februaro, 1931, N 29, p. 354).

Ankaŭ en la sama revuo estis prezentita la sistemo «Mundial» de brazila eksidisto F r. V. L o r e n z (vidu artikolon «Clave dil lingue internacionale Mundial» en «Tolero», 1930, p. 245, 259, 270).

En diversaj N-oj de la sama revuo ni renkontas plurajn similajn projektojn: Ido Novialisat de Tz., Ido Simpligata («Tolero», N 29, p. 352), Ido-Reformita (Tankerton, Kent) kaj multaj aliaj. Ĉi ĉiujn bagatelajn projektojn, en kiuj kelkfoje aperis presite nur po 1-2 paĝoj, eĉ ne eblas citi.

**La nuna stato de Idomovado**

La nombra kresko de la malmulte diferencaj laŭ sia esenco reformoprojektoj kaj proponoj instigis L. d e B e a u f r o n t kaj aliajn gvidantajn idistojn protesti kontraŭ la plua reformado en la lingvo kaj proponi ke oni daŭrigu la periodon de stabileco, starigitan en la j. 1913. Tiu ĉi propono estis voĉdonita en la fino de la j. 1924 en la Internacia Ido-unio. La voĉdonon partoprenis ĉirkaŭ 500 idistoj. En rezulto de la voĉdonado la periodo de la stabileco estis daŭrigita por pluaj du jaroj. Tamen granda parto de la voĉdonintoj (149 kontraŭ 270) sin montris dezirantoj de la pluaj reformaj esploradoj.

Post la milito 1914—1918 en Ido aperis nur diverstempe ĉirkaŭ 10 gazetetoj, kelkaj el ili — unufoje dum du kaj pli da monatoj, kun amplekso je 4—8 paĝoj de malgranda libra formato. Tiuj gazetoj ekzistas ne el la abonrimedoj, sed el diversaj subvencioj kaj donacoj. La apero de Occidental (v. p. 209) tre ŝanceligis la idistajn organizaĵojn. Multaj teoriuloj, kiuj siatempe foriris al Ido el la esperanta movado, nun lasis

---

[1] «Esperido» — The newlatin. — «A Child of Hope», Kalamazoo, Michigan, U. S. A. (kaj samloke analogia eldono — en Esperanto)(47).


[2] «Cosmoglotta», Wien, 1927, n-o 6(43), p. 100.

[3] «Kosmoglott», 1925, n-o 1/2, pĝ. 12.

la tendaron de Ido, pro la pli naturaspekta kaj teorie pli nuancigita Occidental [1].

La jaro 1926 estis kriza jaro por la Ido-movado. La ĉefaj Ido-gazetoj vidis la riskon de plena ĉeso, kaj inter la idistaro elkreskis fortaj skismaj tendencoj. Komencante de la j. 1927, la oficiala organo de la Ido-unio kaj de Ido-akademio «Mondo» dediĉis siajn paĝojn al liberaj diskutoj pri la reformoj en la lingvo kaj fariĝis organo de nova organizaĵo «Solimura» — de la societo de universala racia lingvo. En la gazeto komencis aperi, krom la artikoloj en Ido, ankaŭ artikoloj en aliaj novlatinaj kaj novlatinidaj internaciaj lingvoj. Kaj fine la nomita gazeto komence de la jaro 1929 transiris al la propagando de la nova lingvo, kreita de O. Jespersen — «Novial».

Pri la fakta skalo de la idista movado oni povas juĝi nur proksimume. En la plena tutmonda adresaro de la j. 1923, en kiu ne malpli ol duono de la tuta kvanto estas la t. n. «mortintaj animoj» kaj eĉ simplaj esperantistoj, estas enpresitaj la nomoj de 4000 idistoj. Tamen la membrokvanto de internacia Ido-asocio en la sama j. 1923 ne superis 600 personojn. La Tutrusia idista unio havis en aprilo de la j. 1923 73 membrojn kaj 47 kandidatojn. Pli postaj informoj ne estis publikigitaj de la ido-organizaĵoj.



L. de Beaufront (1925 j.)

Idisto Fr. Buckel en la j. 1930 komunikis [2], ke en la j. 1928 la progresiva frakcio de la idistaro (gvidata de Ahlberg el Stockholm) konsistis el 147 anoj kaj, la konservativa frakcio (gvidata de Noetzli el Zürich)—el 120 anoj. Fr. Buckel samloke malkovris la sekreton, ke la plejgranda nacia Ido-Asocio, la germana, havis en la j. 1926 nur 145 membrojn kaj ke la Internacia Unio de idistoj, kun centro en Parizo, havis en la j. 1930 apenaŭ 500 membrojn.

Dum la jaroj 1928—1930 la krizo en la Ido-movado fariĝis plej akra. La malforta movado frakciiĝis je progresemuloj, celantaj pluen reformi la lingvon, kaj konservativuloj, kontraŭaj al iuj pluaj reformoj. La idea gvidanto de tiu konservativa partio fariĝis — pro ironio de sorto—la patro de Ido mem, L. de Beaufront. En la komenco de la j. 1931 ekzistis nur unu konsiderinda dumonata ido-revuo «Progreso», eldonata en Parizo, sed ankaŭ tiu ĉi revuo estiĝis forte opoziciata de la ido-konservativuloj.

Samtempe kun tiu ĉi krizo de Ido aperis multaj novaj projektoj pri ŝanĝoj kaj reformoj en Esperanto kaj speciale en Ido.

**La kresko de la monda movado esperantista**


La praktika utiligo de Esperanto en tiu tempo daŭre kreskis.

[1] Gedem i N. Nekrasov, «Sovremennoe Ido-dvijenie» (La nuna Ido-movado), Izd. CK SESR, Moskva, 1928(45)(47).

[2] Folii di la Interrsistemal Uniono por Mondolinguo. Bayreuth, 1929—30.

Certan intereson prezentas la sube sekvantaj tabeloj, montrantaj la kreskon kaj disvastiĝon de la universala Esperanto-movado kaj ĉerpitaj el la fundamenta verko de S t o j a n ([40]):

Grafika tabelo pri kresko de la esperantistaro en tutmondo.




Grafika tabelo pri kresko de la esperantista gazetaro.




El tiuj ĉi tabeloj ni vidas, ke post malkresko dum la jaroj militaj, tuj post ĝia fino, la movado esperantista ree komencas plukreski.

Multe kreskis ankaŭ la literaturo de Esperanto. En la kapitala verko de P. S t o j a n ([40]) estas menciitaj 3 825 esperanto-eldonaĵoj, sed fakte aperis certe multe pli da esperanto-libroj. En la jaroj 1887—1928, laŭ S t o j a n, aperis entute 1568 esperanto-verkoj, lernaj kaj propagandaj en 50 diversaj nacilingvoj. Necesas rimarki, ke la lerna kaj propaganda literaturo ampleksas nur 40—50% el la tuta libraro, koncernanta Esperanton aŭ presita Esperante. Pri laŭjara kresko de la tuta tiu libraro oni povas juĝi laŭ statistika tabeleto, ellaborita de Esperantista Centra Oficejo en la j. 1910: en la j. 1889 estis 29 libroj, en la j. 1894—88 libroj, en la j. 1899—123 libroj, en la j. 1904—211 libroj kaj en la j. 1909—1 330 libroj.

Dum la mondmilito kaj post ĝi aparte grandiĝis publikigo de libroj pri sociaj ekonomiaj problemoj.

Por montri la nunan staton de la esperanto-movado, ni citu la oficialan statistikon esperantistan, kiu estas ĉiuokaze absolute fidinda kaj eĉ sendube multe ne kompleta.

La kalkulado, entreprenita en 1927—1928 de prof. D-ro J. Dietterle, direktoro de la Esperanto-Instituto por la Germana Regno en Leipzig, donis sekvantajn ciferojn:

En 120 diversaj landoj de ĉiuj kvin partoj de la terglobo, en 7209 lokoj de la mondo, ekzistas entute 126 575 registritaj esperantistoj. El ili 41 751 estas organizitaj en 1776 grupoj (inter ili 632 fakaj grupoj), 16 987 estas izole vivantaj en lokoj, kie ne estas grupoj, kaj 67 837 estas ekstergrupaj esperantistoj en lokoj, kie estas grupoj. Dum la jaro 1926 la grupoj okazigis 2531 kursojn de esperanto [1].

Kiomgrade tiu ĉi statistiko estas nekompleta, montras al ni la ciferoj pri Sovet-Unio. Por tiu ĉi lasta la statistiko de prof. Dietterle donas 425 lokojn, en kiuj ekzistas esperantistoj; 95 grupojn, 2.126 membrojn de tiuj grupoj, 1479 izole vivantajn esperantistojn en lokoj, kie ne estas grupoj, kaj 2 121 ekstergrupajn esperantistojn en lokoj, kie grupoj ekzistas. Dume samjara oficiala statistiko de Sovetrespublikara Esperantista Unio [2] montras 448 lokojn, en kiuj ekzistas membroj de tiu ĉi organizaĵo, 527 esperanto-grupojn kaj 16 066 organizitajn esperantistojn sur la teritorio de Sovet-Unio. Neorganizitajn ekstergrupajn esperantistojn la statistiko de SEU eĉ tute ne donas. Cetere ankaŭ ĝi mem estas tute ne kompleta.

Oni povas supozi, ke la cititaj statistikoj respegulas ne pli ol du trionojn de la vera situacio, tamen eĉ ili estas sufiĉe imponaj por konstati la forton de la movado esperantista.

---

[1] «Esperanto», oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Genève, n-o 335-336 (7-8), Julio-Aŭgusto 1928, pĝ. 134—156.

[2] «Bulteno de Sovetrespublikara Esperantista Unio», Moskva, n-o 11-12, Aŭgusto-Septembro 1927, pĝ. 101—106.

## XIII

## LA INDIVIDUALISTAJ PROJEKTOJ, KOMPROMISAJ INTER ESPERANTO KAJ LA FLEKSIAJ LINGVOJ ANGLO-ROMANAJ (1909 — 1930)

La plej bona internacia lingvo estas tiu, kiu estas plej facile akirebla por la plej-multo de homoj.

Prof. Jespersen

Post laŭeble detala priskribo de la evoluo de Volapük-Interlingua, de Esperanto kaj de la tuta serio de ĝiaj reformo-projektoj inter kiuj la plej ĉefa estis Ido, nun ni devas pritrakti ankoraŭ pluajn projektojn, devenantajn ankaŭ de la sama grundo Esperanto-Ido, sed celantaj trovon de la serĉata, plej perfekta eŭropa anglo-romana lingvo-sistemo.

De la lingva vidpunkto tiuj serĉadoj estis pravigeblaj, ĉar ili starigis originalan principon—eltrovi «la lingvon plej facilan por la plej-multo de l' homoj de okcident-eŭropa kulturo». Tamen aliel statis la afero de la socia vidpunkto.

Amasa Volapük-movado disfalis, kaj rezulte la standardo de la estinta Volapük-Akademio estis levita de Peano, kiu sukcesis ĉirkaŭ ĝi grupigi aron da homoj, revantaj pri internacia refirmigo de modernigita latino. Tiuj celadoj estis plene pravigeblaj laŭ vidpunkto de certaj sociaj—klerulaj, latinistaj rondoj.

Esperanto, heredinta certan parton de plej progresemaj volapükistoj, pluen evoluis kiel lingvo amasa, socie kaj kolektive kreata kaj pliriĉigata (44). Ido, kreita de superaj intelektuloj, forŝiris de tiu movado la homojn, pensantajn laŭ malpli demokrata kaj laŭ pli aŭtokrata maniero pri alcentrigo, de la internaci-lingvo-movado ĉe iu leĝdonanta aŭtoritata institucio. Ĉiuokaze ankaŭ la idistaro prezentis certan anaron, certe limiginta sin per la sociaj premisoj, laŭ kiuj ili konsideris la lingvo-organizon kaj evoluon.

La projektistoj, pri kiuj ni nun intencas paroli, ŝiriĝis for de Interlingua, de Esperanto kaj de Ido. Laŭ socia vidpunkto ili fakte revenis al la tradicioj de la individualista projektado, kiu forte floris kaj havis rajton flori antaŭ la periodo Volapük-Esperanto.

Certe, pluraj el tiuj projektoj, kiel ni vidos, sukcesis gajni iun nombron da adeptoj, sed en komparo kun la amas-movado de Esperanto aŭ kun limigite-sociklasa Interlingua — tiuj projektistoj troviĝis en multoble pli malfacila situacio. Trovi por siaj lingvoj iun pli vastan bazon ili neniel povis. Plejbonokaze per argumentado pri lingvaj detaloj, neniom per argumentoj socie kaj amase konvinkigaj — tiuj lingvoj sukcesis nur pluen frakciigi kaj sekciigi la Ido-movadon, kies adeptoj

grandparte ĉiam ankaraŭ konsideris siajn lingvo-formojn pli gravaj ol la rolon de praktika internacia lingvo, socie jam uzata, praktikata kaj pluen evoluigata.

Aldone tre karakteriza por konsiderinda parto el tiuj projektoj estas tio, ke la projektantoj sufiĉe kategorie rompis la striktan regulecon kaj la aglutinan tradicion de la artefaritaj lingvoj kaj, celante konservon de la internacieco por siaj lingvo-derivaĵoj, allasis ne nur diversajn esceptojn el siaj reguloj, malkonkordon inter la litero kaj la sono esprimata, sed eĉ certan ŝanĝon de la radikoformoj — depende de tio, kia afikso estas al tiu radiko aldonata.

Unua en la vico de tiuj projektintoj estis A. Michaux, prezidinto de la I-a internacia kongreso de esperantistoj en Boulogne-s.-M., kiu publikigis sub pseŭdonimo «A. M. Boningue» sistemon de la lingvo «Romanal» [1]. En la j. 1912 A. Michaux eldonis ĝeneralan traktaĵon pri diversaj sistemoj de Interlingua kaj pli precizigis la formojn de Romanal [2]. En la j. j. 1919 kaj 1922 aperis novaj eldonoj de tiu ĉi projekto, sub titolo «Anglo-latina helpa lingvo». La lasta el tiuj eldonoj havas antaŭparolon de prof. Peano [3]. A. Michaux 1909



A. Michaux

Certan intereson havas en si la fakto, ke en la j. 1917, dum la milito Michaux rekomendis sian projekton, kiel sistemon de Esperanto, purigitan de germanismoj kaj tial pli akcepteblan por la ŝtatoj de Entento.

La diferencoj inter la novlatinaj projektoj de la tipo de «Latino sine flexione» kaj sistemo «Romanal» estas unuavice en la plia internacieco de la vortoj de Romanal, en kiu forestas la latinaj vortoj arkaikaj, ne plu uzataj en la modernaj kulturaj lingvoj, kaj duavice — en tio, ke Romanal posedas certajn difinitajn gramatikajn regulojn.

En sia lasta libro A. Michaux penis meti limon inter la adeptoj de «la simpligata klasika latino», al kiu li alklasifikas la sistemojn de Peano, Basso, Hely kaj adeptoj de la «modernigita latino», al kiuj li, krom si mem, aldonas ankaŭ De Wahl kaj Meysmans.

Kiel ekzempla teksto de Romanal povas servi la traduko de jena frazo: «La plej bona helpa lingvo estas tiu, kiun povas facile kompreni la amerikanoj de la nordo kaj tiuj de la sudo — «Li meliori lingue auxiliari est ille, quel possan facilim comprendar li americanos del norde et illos del sude».

---

[1] «Romanal—Metode de international lingue(texteRomanal traducted en Franci)», Editor A. M. Boningue, Boulogne-sur-Mer, 1909(47).

[2] A. Michaux, «Etude de projets soumis a l'Academie pro Interlingua sur la Langue Universelle», Boulogne-sur-Mer, 1912(47).

[3] A. Michaux, «Romanal. Langue auxiliaire Anglo-Latine», Boulogne-sur-Mer, 1922(47).

**J. Slonimski (1910—1923)**

Certan intereson prezentas projekto de novlatinida lingvo de J. Slonimski, eldonita en la j. 1910 en Varsovio [1]. En la j. 1923 (P. Stojan (40) notas la j. 1924) aperis nova verko de la sama aŭtoro [2]. Ĝenerale tiu projekto estas iom mallerta imitaĵo de Romanal, sen ties bonkvalitoj kaj ankaŭ sen bonkvalitoj de Interlingua, kiu estas komprenebla almenaŭ por la latinistoj unuavide. P. Stojan (40) notas kun demando-signo (?), ke Slonimski, jam en la j. 1910 ellaboris projekton de «Linguo Romana Universali», sed ĝustecon de tio ni ne povas konfirmi. En la j. 1926 tiu projekto estis pluen perfektigita .[3]

**Del Monaco (1912)**

Al la jaro 1912 rilatas plua forte latinidigita projekto de universala lingvo «Fraternitat». La aŭtoro de tiu ĉi projekto estis Redento de li Baroni del Monaco. Ni renkontas en la gazetaro, dediĉita al la problemoj de universala lingvo nur apartajn notojn pri tiu lingvo [4]. Laŭ sia formo Fraternitat estas plej proksima al la sistemo Romanal, sed posedis tre simpligitan, ne ĉiam internacian ortografion, ekz.: jeolojik (geologia), esistanz (ekzisto) k. m. a.

**J. Weisbart (1909—1930)**

Germana idisto Weisbart prilaboris en la j. 1909 projekton de lingvo «Unial». De tiu ĉi projekto estas al ni konata nur litografe presita skizo de la gramatiko. La dissendita de Weisbart cirkulera letero al ĉiuj amikoj de internacia lingvo, esperantistoj kaj idistoj, kun alvoko unuiĝi ĉirkaŭ la nova sistemo «Lingue International—Unial» restis sen respondo.



J. Weisbart

Dum la sekvintaj du jaroj Weisbart laboris pri la plia koncizigo de sia projekto, al kiu li donis la nomon «Europal». [5]

Certan intereson havas la lastaj proponoj de J. Weisbart.

Weisbart kun tiuj siaj proponoj pri «mez-eŭropaj» lingvoformoj havis antaŭulon — W. Borgius, kiu eldonis en la j. 1911, laŭ la indikoj de Weisbart mem anoniman verkon «Sur la vojo al eŭropa lingvo» [6]. La pliparto el la konkretaj proponoj de Borgius poste estis praktike enkorpigitaj en la projekton «Medial».

Weisbart konstruis sian novan lingvon «Medial» sur la anglolatina bazo, sed por diferenco de la sistemoj de Interlingua li donis al sia lingvo koncizajn gramatikajn formojn.

---

[1] J. Slonimski, «Powszechny jezyk romanski—Linguo Romani Universale», Warszawa, 1910.
[2] J. Slonimski, «Jezyk neoromanski (Lingua neoromani)» Warszawa, 1923(47).
[3] «Mondo», Stockholm, 1926, n-o 12, paĝ. 296(47).
[4] La gazeto «Progress», Petersburg, 1913, n-o 2, pĝ. 14.
[5] J. Weisbart, «Europal. Kurze Grammatik und Begründung», Hamburg (1912?).
[6] «Auf dem Wege der europäischen Sprache», Berlin, 1911.

En la jaro 1923 aperis en germana lingvo la unua lernolibro de Medial, en nekomplete prilaborita aspekto [1]. En la j. 1925 W e i s b a r t eldonis plenan lernolibron, kiu estis presita kun teksto en sola Medial [2].

En la j. 1926 en Nürnberg komencis aperi en tiu ĉi lingvo dumonata folio «Unione».

Jen ekzempla frazo en Medial: «Le interlingue deva essir facil ed familier for tutos». — La internacia lingvo devas esti facila kaj gepatra por ĉiuj.

La provoj de W e i s b a r t instigi la novlatinistan akademion, ke ĝi agnosku lian lingvon samvalida al la sistemoj de Interlingua, fiaskis.

En komenco de la j. 1927 W e i s b a r t, entombiginte sian projekton, prepariĝis dediĉi siajn fortojn al laboroj pri la kreo de eŭrazia lingvo, pli facile lernebla por la japanoj kaj ĉinoj. Por varbado de kunlaborantoj por tiu ĉi celo li komencis eldoni en Esperanto en Nürnberg specialan organon «Mondolingvo». Tamen post la 2-a numero li ĉesigis ĝian aperadon.

Jam post 3 jaroj ni ree vidas W e i s b a r t kun nova projekto «Mundi Latin» [3].

La nombro de l'aŭtoroj, proponintaj po 3, 4 kaj eĉ pli da projektoj ĉiam kreskis.

**Sidni Bond (1910—1926)**

S i d n i B o n d, iama idisto, en la j. 1910 prilaboris projekton «Mondlingu». Tio estis kuraĝa proksimiĝo al sistemo de interlingua. Ne estas al ni konataj iuj eldonaĵoj en tiu ĉi sistemo, krom la noto en la gazeto de la novlatinista akademio [4]. S i d n i B o n d rezignis la neprajn finaĵojn, o, a, e por la substantivoj, adjektivoj kaj adverboj, sed ĉiuj liaj verboj finiĝas per a.

Ekzemploj: «Sol splenda. Nokt sequa jorn. Vesper esa pos jorn ed ante nokt. (Suno lumas. Nokto sekvas tagon. Vespero estas post tago kaj antaŭ nokto.)

En certaj okazoj B o n d preferas la germanajn radikojn al la latinaj, ekz. germanan v i n t e r, anstataŭ la latina h i e m e.

P e a n o nur duone aprobis la projekton de B o n d. En la j. 1912, S. B o n d, reprilaborinte sian projekton, aperigis ĝin sub la nova nomo «Omnez» [5]. Post unu plua jaro sekvis alia variaĵo de la sama projekto — «Domni» [6]. La diferencoj inter tiuj projektoj sin montras en diversaj variaĵoj, kelkafoje eĉ sufiĉe aprioriaj. Ekzemple, en la lasta projekto (Domni) la difinita artikolo havas formon «oin», tute fremdan al iu natura lingvo.

En la j. 1921 S i d n i B o n d transformis sian antaŭan sistemon «Domni» je nova sistemo «Optoez». La postsignoj de tiu ĉi sistemo restis en apartaj artikoloj de B o n d, presitaj en la gazeto «Kosmoglott» [7]. Optoez montras pli grandan proksimiĝon de B o n d al la tipo de anglolatina universala lingvo.

Kiam en la j. 1926 aperis eldonita nova libro de B o n d, la lingvo ricevis en ĝi jam kvinan nomon «Meso» [8].

---

[1] Josef Weisbart, «International Komun-lingue Medial», «Nürnberg, 1923?).

[2] Josef ed Betti Weisbart, «Ilustrat A-Be-Cedarie del Lingue Medial Europan», Nürnberg, 1925.

[3] Vidu «Tolero», Paris, 1930, n-o 21, p. 227.

[4] «Academia pro Interlingua. Discussiones», 1910, n-o 7, p. p. 195—196.

[5] Sidni E. Bond., «Omnez», Wellington, Sommerset, 1912.

[6] Sidni E. Bond, «Domni — Lingua International. Gramatik et specimenes», Wellington, 1913.

[7] «Kosmoglott», Reval, 1922, n-o 9, pĝ. 54—55([47]).

[8] Sidni E. Bond, «Meso. Gramatik et Specimenes», Wellington, Sommerset, 1926([47]).

La diferenco de tiu ĉi projekto de la sistemoj de Interlingua konsistas el kvanto da lingvelementoj de la angla deveno kaj el la pli koncizigitaj gramatikaj reguloj, prenitaj prefere el la lingvo angla.

Kiel ekzempla teksto de tiu ĉi lingvo estas jena frazo: «Te basi most bon por lingu international esti elementes latinal vivint en lingus modern» (La plej bona bazo por internacia lingvo estas latinaj elementoj, vivantaj en la modernaj lingvoj).

**La Kosmoglotiko — scienco pri universala artefarita lingvo**

Kun la nombrokresko de la projektoj de universala lingvo, kun apero de diversaj skoloj kaj tendencoj en tiu ĉi fako fariĝis pli kaj pli malfacile sin orienti inter ili.

Aperis aparta scienco — kosmoglotiko, kiu sin okupis per studo en la konstruo de la universalaj tutmondaj lingvoj, per difino de iliaj konsistigaj elementoj, de iliaj formoj kaj interrilatoj.

Interesan komparon inter la plej signifaj projektoj, rilate la frazkaj vortkonstruon k. ceter., donas speciala broŝuro, eldonita en la j. 1912 de la pli kaj pli favorema al novlatino franko-belga Ido-ĵurnalo «La Belga Sonorilo» [1].

**Neŭtralaj ĵurnaloj, dediĉitaj al la problemo de kosmoglotik**

Faritaj estis multfojaj provoj organizi la eldonadon de specialaj ĵurnaloj, dediĉitaj al ĝeneralaj problemoj de univesala lingvo. Kiel unua el tiuj ĵurnaloj estis eldonita en la j. 1908 de Adam Miller «Correspondense International» [2]. Pli poste en la j. 1912, en Essen, Rud. Hesse eldonis germanlingve ĵurnalon, dediĉitan al la artefaritaj lingvoj «Der Weltsprache-Freund» (Amiko de mondlingvo) [3]. Similan eldonaĵon en pli solida skalo penis efektivigi, en la sama j. 1912, redaktoro de Budapeŝta esperantista ĵurnalo A. Marich. Estis publikigita la 1-a numero de «Revue Cosmoglottique» [4], dediĉita al ĉiuj sistemoj de la artefaritaj lingvoj senescepte, sed pli ol la 1-an numeron la afero ne transpasis.



A. Marich

**La societo «Kosmoglott»**

En Rusio, kie la ideoj de interlinguistoj, favoraj por la latinidaj lingvoformoj, ne havis sukceson, fondiĝis en la j. 1916 (en Petrograd) la societo «Kosmoglott».

Ĝiaj fondintoj estis W. Rosenberger, prof. J. Baudoin de Courtenay, Vs. Ĉeŝiĥin, V. Ŝmurlo, P. Stojan, kaj E. Drezen. La celo de la societo estis kompara studo kaj studakcelo de la sistemoj de ĉiuj internaciaj artefaritaj lingvoj. En la j. j. 1916—17 la societo «Kosmoglott» montris intensivan agadon, faris serion da kunvenoj kaj organizis kelkajn prelegojn dediĉitajn al diversaj sistemoj de universala lingvo.

En la j. 1919, post la morto de W. Rosenberger, la gvidado de la societo transiris al meritplena kosmoglotikisto, esperantisto kaj eksakademiano de Volapük — V. Ŝmurlo.

En la j. 1924 V. Ŝmurlo kaj E. de Wahl renovigis la agadon de la societo «Kosmoglott» en Reval (nuna Tallin), kie E. de Wahl komencis eldonadi ĵurnalon «Kosmoglott» en sia propra lingvo «Occidental».

---

[1] «Comparaison des divers types actuels de langues internationales», articles extraits de la revue «La Belga Sonorilo», Bruxelles, 1912.

[2] «Correspondense International», mensual organe por liber discusione de problema de international lingue. Carlisle. Anglia 1908.

[3] «Der Weltsprache-Freund», Essen, 1912, n-oj 1—12.

[4] «Revue Cosmoglottique», 1912, n-o 1, Budapest (47).

**W. Rosenberger 1912**

Nun necesas iom paroli pri W. Rosenberger, kiu foririnte el la Akademio (v. p. 169), finis la memstaran ellaboron de nova projekto «Reform-Neutral», preninte por la elirpunktoj Idiom-Neutral kaj sian «Projekt reformed» (1907). La lernolibroj de tiu ĉi sistemo aperis en la j. 1912, samtempe en la germana, franca kaj angla lingvoj [1].

La ĉefaj diferencaĵoj de Reform-Neutral, kiel ankaŭ de reformita projekto de la j. 1907, kompare kun la primitiva Idiom-Neutral, konsistas el la akcepto de internaciaj formoj de ortografio kaj el la konforma komplikigo de la reguloj de l'elparolo. Ĝenerale, Reform-Neutral okupas mezan lokon inter la primitiva Idiom-Neutral kaj sistemoj de Interlingua.

Kiel tekstekzemplo de Reform-Neutral povas servi jena frazo: «Lingui artificial leplu nov abandone principe del scriptur severamente fonetical. E ili av reson! (La plej novaj artefaritaj lingvoj malakceptas la principon de severe fonetika skribo. Kaj ili estas pravaj!)»

La fidela al Rosenberger peterburga grupo de neŭtralistoj, konsistanta el 9 veteranoj de volapükismo, formis la fundamentan grupon de la «Reform-neutralistoj».

Rosenberger renovigis en la «praktika universala lingvo Reform-Neutral» [2] eldonadon de la ĉesinta aperi en la j. 1908 ĵurnalo «Progress».

**V. Petraŝeviĉ (1917—1918)**

Inĝeniero-metalurgo V. Petraŝeviĉ (pseŭdonimo V. Peviĉ), en la jaro 1917 publikigis la bazajn tezojn de internacia lingvo «Glot» [3], por kiu, ĝis ellaboro de sia propra vortaro, li rekomendis uzi la vortaron de Reform-Neutral.

En la projekto de Petraŝeviĉ troviĝas siaspeca arta premiso, kiu difinas ĝian diferencon de la aliaj analogiaj projektoj.

Petraŝeviĉ celis «anstataŭi la gramatikajn kategoriojn per kategorioj logikaj». «Tia anstataŭo», li skribas, «permesus al ni ne uzi arbitrajn gramatikajn regulojn kaj koncentrigi la studadon de internacia lingvo al studado de sola leksika materialo». Sian leksikan (vortaran) materialon Petraŝeviĉ kompletigas el vortoj, «kiuj prezentas maksimumon de konateco». Foresto de la tekstoj de tiu ĉi sistemo malhelpas la juĝon pri tio, en kiu grado kaj mezuro, post la detala prilaboro, tiu ĉi sistemo sin montrus facile komprenebla kaj lernebla. Sed kelkaj apartaj gramatikaj elementoj (kiel ekz. «ak» por «kaj» aŭ «i» por la verbo «esti») tute ne povis akceli la nomitan facil-komprenblecon.

Pli poste la aŭtoro refaris sian sistemon, celante pli internacian transskribon de kelkaj elementoj de la lingvo, ekz. «Glot» anstataŭ «Glott». Petraŝeviĉ eldonis en la j. 1918 hektografiitan broŝuron, dediĉitan al tiu ĉi iom refarita projekto [4].

**N. Juŝmanov (1917—1922)**

Oni ne rajtas ne atenti la projekton de N. Juŝmanov, konata rusa idisto, kiu jam en la j. 1917 ellaboris projekton de racia internacia lingvo «etem». La unuaj informoj en la gazetaro pri tiu ĉi sistemo estis presitaj en la j. 1922 [5].

Retenante sin sur la bazo de la novlatinidaj lingvoj, Juŝmanov, sin kaŝinte sub pseŭdonimo E. Firuzabadov, enkon-

---

[1] Francligva eldono: W. Rosenberger, «Cours de langue universelle pratique Reform Neutral», Leipzig, 1912 kaj samloke la eldonoj germana kaj angla([47]).

[2] «Progress», journal in Cosmolingue practical Reform-Neutral, Petersburg, 1912—14.

[3] V. Pevich, «Osnovy meĵdunarodnago jazyka 'Glot'»,, Petrograd, 1917([47]). la vortaron de «Reform-Neutral».

[4] Vidu artikolon «Glott de v petracevitc» en «Kosmoglott», Reval, 1922, n-o 9, pĝ. 51—52([47]).

[5] «Tolero», Paris, 1931, n-o 28, p. 334([47]).

dukis rigore fonetikan alfabeton, forigante la duoblajn literojn: idistajn ch kaj sh, kaj latinajn ph kaj th. Li ankaŭ forigis la majusklojn. La vortoj estis elektitaj laŭeble plej mallongaj, sed tiuj, en kiuj ne estas detruita la rekonebleco kaj internacia formo de la elektitaj radikoj.

«E-t-e-m» estas laŭ la difino de Juŝmanov ekonomio de tempo energio kaj rimedoj (ekonomi tempor, energi, medi). En certa grado tiu ĉi projekto estas reveno de Ido al Idiom-neutral de la Volapükista akademio [1].

A. Miller (1918)

A. Miller, la aŭtoro de la sistemo «Corintic» kaj redaktoro de la ĵurnalo «Correspondense international» en la j. 1908, eldonis en la j. 1917 alian projekton «Extra lingue» [2], en kiu li provas fari sintezon de la angla kaj latina lingvoj.

La Casuela (1922)

Unu plua projekto de universala lingvo «La Casuela» estis ellaborita de anonima aŭtoro, eksvolapükisto kaj esperantisto. La sole restintajn ekzemplojn de tiu ĉi lingvo oni povas trovi en la gazeto «Kosmoglott» [3]: «De ziente internacionala lingues cognita, la mas simpla e eleganta estaz sine dubito La Casuela». (El la cento da konataj internaciaj lingvoj la plej simpla kaj eleganta estas sendube La Casuela).

Ni konas nur presitan cirkuleron de la Anglo-Franca literatura oficejo, eldonitan en Paris en 1922 j. (47), franclingve (sen indiko de dato kaj loko de la eldono) kaj entenantan la bazojn de tiu ĉi sistemo.

Laŭ kelkaj siaj gramatikaj reguloj kaj laŭ sia ortografio, tiu ĉi projekto malsimilas la sistemojn de Interlingua kaj de Esperanto-Ido. La aŭtoro S. Voirol rekonis sian aŭtorecon jam en la j. 1927 [4].

Weferling (1923)

Idisto E. Weferling en la j. 1923 publikigis sian kompromisan sistemon «Unesal» [5], posedantan kelkajn perfektajn trajtojn, sed destinitan por la sama malsukceso, kiel la aliaj antaŭirantaj kompromisaj sistemoj. Jen ekzempla frazo laŭ tiu ĉi sistemo: «L'Alfabet absoluten deva esir fonetikal. To es tre fasilen realigebli sen tro grandi deformade del natural ortografi». (La alfabeto devas esti nepre fonetika. Tio estas facile realigebla sen tro granda ŝanĝo de la natura ortografio.)

Weferling informas nin pri sia alia projekto, rilatanta al la j. 1925, sed dume ne eldonita — «Pranskrit». Juĝante laŭ la donita tekstoprovo, la nomita projekto estas nur variaĵo de la primitiva «Unesal».

E. de Wahl (1900—1922)

En la j. 1909, post prilaboro de siaj ideoj en la perfektigo de «Idiom-Neutral» (vidu p. 167), E. de Wahl konstruis harmonian sistemon de universala helpa lingvo «Auli». La unua artikolo en tiu ĉi lingvo, komprenebla unuavide por ĉiuj scipovantaj ion el la latinidaj lingvoj, estis presita en la organo de la akademio jam en la j. 1909 [6].

La ĉefa ideo, kiu inspiris Wahl, estis provo starigi perfektan lingvon, ĉe kiu la internaciaj formoj de la derivitaĵoj estu atingataj per absoluta regula sistemeco.


Certe en tiu sia celado Wahl sukcesis pli ol iu ajn el aliaj projektistoj. Sed por atingi tiun kompromison inter la principoj de internacieco kaj reguleco — Wahl devis pagi karan prezon: lia lingvo ĉesis esti aglutinkaraktera. La formo de radikoj estas ŝanĝataj — laŭ certaj reguloj, sed tamen ŝanĝataj. Tiamaniere el radiko construct

[1] «Kosmoglott», 1922, n-o 6, pĝ. 1—2(47).
[2] «Academia pro Interlingua», 1921, n-o 1, pĝ. 3, Torino(47).
[3] «Kosmoglott», Reval, 1922, n-o 9, pĝ. 55—56.
[4] «Academia pro interlingua», Torino, p. 9.
[5] Erich Weferling, «Unesal Interlingu (Kompromis Esperanto-Ido-Occidental) kom baze por l'union de omni Mondelinguistes», Braunschweig (1923)(47).
[6] «Academia pro Interlingua — Discussiones», aŭgusto 1909, Torino, pĝ. 21—25 (47).

(konstru) estas derivata — construct-or, el radiko ama (am) — ama-t-or; el — vider-(vid) — vis-ibil, vis-ion, el pretend-(pretend) — preten-s-ion k. t. p.

Per tia sistemo estis kvazaŭ reguligita la «fleksieco» de la lingvo. Sed la ĉefaĵo—la lingvo fariĝis pli malfacila, la lingvo akiris okcident-eŭropan karakteron; la lingvo artefarita perdis sian aglutinan karakteron, kiu laŭesence — ne laŭforme — alproksimigis ĝin al la popoloj orientaj, orient-aziaj kaj turko-tataraj.

Artikoloj de Wahl en tiu ĉi lingvo aperis en la gazetoj «Lingua internationale»-Bruxelles, «Progress»-Peterburgo. Post tio la sistemo estis ree, aldone, nove prilaborita kaj en la j. 1922 en Reval (Tallinn) E. de Wahl komencas eldoni en sia lingvo, novenomita «Occidental», gazeton «Kosmoglott» [1].



E. Wahl

Ĝis la mezo de la j. 1924 tiu ĉi gazeto estis samtempe ankaŭ organo de «Academia pro Interlingua» kaj enhavis artikolojn en diversaj novlatinaj kaj novlatinidaj lingvoj. En la j. 1924 la gazeto sin fordonis ekskluzive al la propogando kaj defendo de la ideoj de la sistemo Occidental.

En la j. 1923 aperis mallongaj gramatikoj de Occidental en la lingvoj franca, germana, angla kaj rusa (en la lasta litografie multobligita) [2].

En la j. 1924 la Viena societo de idistoj kaj iom pli poste la grupo de idistoj en Brno (Ĉeĥoslovakio) ŝiris la kontakton kun Ido kaj transiris al Occidental.

Videblan sukceson alportis al Occidental la transiro de la pariza idista grupo, kun ties gvidanto M. de Guesnet. Lastatempe inter la protektantoj de la occidentalista movado aperis la nomoj de profesoroj J. Baudouin de Courtenay kaj d-ro Albert Guérard, prof. de Stanforda universitato en Kalifornio.

Lernolibroj kaj gramatikoj de la lingvo Occidental ĝis nun aperis en pluraj eŭropaj lingvoj. Tamen la ĉefa propagando estas farata inter idanoj kaj interlinguanoj. Plej bone statas la Occidental-propagando inter germanoj. Ankaŭ por germanoj estas verkita plej bona Occidental-lernilo [3].

Poligrafiitaj nacie-propagandaj bultenoj de Occidental estas eldonataj en Anglio, Francio, Svisio kaj Ĉeĥo-Slovakio. Kiel solaj literaturaĵoj libroformaj ekzistas en Occidental nur «Nationalism in Occident» de Rabindranath Thagore kaj «Paneuropan Manifest» de d-ro Coudenhove Kalergi.

La fleksia karaktero de Occidental, allasanta modifon de la lingvo-elementoj (radikoj kaj afiksoj), estas per si mem sufiĉe karakteriza, por ke tiu sistemo estu konsiderata, kiel sistemo esence okcident-eŭropa

---

[1] «Kosmoglott», jurnal de lingue international, 1922—1926, Reval, Estonia (47).

[2] E. de Wahl, «Occidental, unic natural, vermen neutral e max facil e comprensibil lingue por international relationes. Clef pour Français», Reval, 1922 (47).

[3] E. Pigal, — «Occidental. Die Weltsprache», Stuttgart, 1930.

kaj ne posedanta tiun plian ne nur eŭropan, internaciecon kaj demokratiecon de la strukturo, kiun donas enkonduko en la lingvon de la severa aglutinismo.

En la j. 1927 la eldonloko de la gazeto «Kosmoglott» estis translokita al Wien kaj kune kun tio la nomo mem de la gazeto fariĝis «Cosmoglotta». Al la sama momento rilatas la diplomatia paŝo de la occidentalistoj, kiuj celas, kontraŭmeti sian sistemon, kiel reprezentanton de la okcidenteŭropa kulturo, al Esperanto, kiel lingvo de orienteŭropaj kaj aziaj barbaruloj kaj bolŝevikoj.

Malgraŭ ĉiaj siaj ecoj, kiuj metas ĝin kvazaŭ inter la perfekta reguleca Esperanto kaj la perfekte natureca Interlingua, Occidental ne kapablas superi la individualismajn reformistajn tendencojn. Jam en la j. 1930 E. W a h l estis devigita interveni kun speciala respondo adresita al kelkaj Occidentalaj reformstioj — R a m s t e d t, C r e u x kaj aliaj [1].

Occidental kaj konsiderinda parto de similtendencaj projektoj certe respegulas la tendencojn de okcident-eŭropa imperialismo. Niaopinie tute prave en la № 10—12, 1930 j., de la Interlingua — gazeto «Schola et Vita» (Torino) — J. W e i s b a r t skribis, ke «Occidental aperas kiel lingvo de moderna imperialisma okcidento. Se la venkinta Entento en la j. 1918 volus konstrui iun Entento-lingvon — esence franco-anglosaksan, tiu lingvo komplete koincidus kun Occidental». Vere la occidentalistoj argumentas [2], ke E. W a h l estas laŭdevene nek anglo, nek franco. Tamen tiu argumento estas tre malforta, ĉar ne gravas la projektinto, sed gravas la sociaj rondoj kaj ideoj, kiuj kapablus havi simpatiojn por Occidental. Nu, certe tiajn simpatiantojn por Occidental, kontraŭmetata al esperanto, oni povas trovi nur inter la mensoj okcident-eŭropaj, imperialisme pensantaj.

**Cardenas (1921—1923)**

P. S t o j a n (40) informas pri la detale ellaborita sámspeca aposterioria projekto «Hom idyomo», eldonita en la j. 1921 kaj kies aŭtoro estas C. C à r d e n a s [3]. En la j. 1923 aperis alia lernilo jam en angla lingvo.

**Riedel kaj Scheffers (1923—1930)**

En la j. 1923 D-ro F. R i e d e l kaj O. S c h e f f e r s presigis en la gazeto «Kosmoglott» artikolon, dediĉitan al la principoj de universala lingvo kaj verkitan en la lingvosistemo «Uniti Langue» [4].

De post la j. 1929 ni renkontas tekstojn de tiu lingvo en la pariza revueto «Tolero».

En tiu ĉi projekto, bazita sur la latinaj elementoj, oni donas rimarkeblan rolon ankaŭ al la elementoj de la anglo-germana deveno.

En la j. 1930 R i e d e l kaj S c h e f f e r s publikigis poligrafiite verketon en sia «Uniti Langue» kun celo montri ke sur la bazo de la anglo-romana alianco estas kreebla lingvo «facile komprenebla por ĉiuj okcident-eŭropanoj [5].

**H. Milner (1927)**

Akceptinte principe la radikaron de Occidental, pastro M i l n e r, la aŭtoro de lingvoprojekto «Cosman» [6], prenis el tiu radikaro nur 70%

[1] E. Wahl, «Response pri li reformpropositiones» — poligrafiita broŝureto eldonita de Occidental-Buro (Chapelle, Suisse), Junio 1930.

[2] Vidu «Helvetia», organ del Suiss. Association por Occ. Chapelle, 1931, N 1—2.

[3] C. Cardenas, «Hom idyomo», Wien, 1921.

[4] «Kosmoglott», Reval, 1923, n-o 1, pĝ. 10-14, artikolo «Prinzipes de Mondelangue» (47).

[5] F. Riedel and Scheffers, «Uniti Langue, an International langue baset of de comun ites of de Germanic and Romanie langues», Dessau, 1930. Vidu ankaŭ «Schola et Vita», Milano, 1930, N 8—10, p. 315.

[6] «Cosman», lingue universal Pan-Europan, Pan-Asian, Pan-American, estandibl al prim vise ane studie par coll interessato.Edition L. Beer, printerie Karbitz apu Aussig, Checoslovaquia, 1927 (47).

da vortoj kaj por la resto prenis la radikojn el la plej ekstreme malsamaj lingvoj de la mondo: ĉina, araba, hindaj ktp. Al tiu ĉi miksita vortaro estas akomodita gramatiko kompromise-meza inter Esperanto-Ido kaj Occidental. Sed, krom la eblan plejan universalecon, la aŭtoro celis ankaŭ grandan harmonion kaj belsonecon de sia lingvo. Por pli facile konstrui la frazojn en la interrilatoj kun la ekstereŭropanoj, H. Milner permesas en sia lingvo konstrui la vortojn kaj frazojn laŭ specialaj «pidgin»-formoj, en ĉiu aparta okazo tute malsamaj. El la tuto sin formis lingvo, kiun ilustru la ekzemplo: «Nor pater, so du es in ciel, benedi'et sey tu nam. Tu regia veney, tu vole fiey, as in cosme (hien), sic as po terr.»

O. Jespersen (1728)

Profesoro Otto Jespersen, unu el la monde famaj vivantaj lingvistoj kaj scienculoj, kiu, simile al Max Müller aŭ W. Ostwald, ne malkuraĝis malkaŝe batali por la ideo de artefarita lingvo internacia, post sia foriro de Esperanto estis unu el la fondintoj kaj gravaj subtenantoj de la Ido-movado. Post multjara laboro por Ido li publikigis projekton de sia propra lingvo internacia, kiun li nomis «Novial» [1]. Novial laŭ sia strukturo okupas pozicion mezan inter la pli nature aspektanta Occidental kaj pli reguligitaj Esperanto kaj Ido. En sian projekton prof. Jespersen enmetis tiujn pliboniĝojn kaj ŝanĝojn, kiujn li ne sukcesis siatempe enkonduki en Idon. La ĉefaj karakterizaĵoj de lia lingvo estas: forigo de la literoj C kaj Z, foresto de supersignoj, komplikaj reguloj pri akcento, distingo de genroj per finaĵoj (-o—vira, -a—virina, -e—neŭtra), plurala finiĝo—s, genetivo formata per—n (la tiel nomata saksa formo de genitivo); tial la frazo «la laboro de viroj» — estas en Novial: «li homosen laboro». Krome ekzistas en la lingvo laŭvola akuzativo kun finiĝo -m, infinitivo, jen havanta simplan radikan formon, jen kun antaŭmetata parteto «tu» (lekte, aŭ tu lekte = legi) kaj analitikaj verbaj formoj. La vortaro plej parte konsistas el latinaj kaj latinidaj elementoj.



O. Jespersen

La propagandon de la lingvo komencis de la j. 1929 konduki la malnova idista gazeto «Mondo», eksorgano de la Idista Akademio, eldonata en Stockholm, kiu iom post iom forlasis Idon kaj transiris al Novial [2].

Por ekzemplo de teksto en Novial povas servi jena frazo: «Es inherant in li nature de lingue, natural o artifisiali, ke lu exista nur per e por homes, kel usa lu por tu komunika sen penses a altri persones», kio signifas: «Estas esenca en la naturo de lingvo, natura aŭ artefarita,

---

[1] Otto Jespersen, «Et Verdenssprog», Editeria: Pios Boghandel, Köbenhavn; de la sama aŭtoro: «An International Language», eld. George Allen and Unwin, Ltd., London, 1928; kaj: «Eine internationale Sprache», eld. Carl Winter, Heidelberg, 1928 (47).

[2] Vidu «Mondo», revue por li international auxiliari lingue, Stockholm, febr. 1929, n-o 2 (228) (47).

ke ĝi ekzistas nur per kaj por homoj, kiuj uzas ĝin por komuniki siajn pensojn al aliaj personoj.»

**G. Touflet (1928)**

Preskaŭ samtempe al la publikigo de la projekto de prof. O. J e s p e r s e n, aperis en Parizo, en formo de gazeto, informoj kaj gramatiko de nova lingvo «Novam» [1] eldonita de G. T o u f l e t. Tiu ĉi lingvo okupis same kompromise mezan pozicion inter Esperanto-Ido kaj Occidental kaj en multaj okazoj, simile al Novial, celis la amendojn de Ido. Inter la aliaj paraleloj, ekzistantaj inter Novial kaj Novam, sin altrudas en okulojn stranga kontraŭeco en la uzado kaj neuzado de la literoj K kaj C, S kaj Z. Tiel oni skribas en Novial: konsernant, kaj en Novam: consernant. Novial: siviliso, serti, fransa; Novam: sivilizo, serta ktp. En Novam estas renkonteblaj vortoj, similaj al: cener (germana — kennen) aŭ ercener (germana — erkennen). Same kiel Novial, Novam posedas multe da pronomoj, el kiuj kelkaj ludas fakultativan rolon. Nur la sistemoj de konjugacioj grave diferencas. La konjugacio de Novial estas analitika, kaj tiu de Novam sintetika: amer, aman, amed, amar, amud, hav amat, had amat ktp.



P. Ahlberg, redaktoro de la gazeto „Mondo“

Ekzempla teksto el Novam: «Cem me ruc-regardan super il tri pasat yari, it es onfasila de realizer ce tante multo reale efectueved en un compare tante breva tempo», kio estas «Kiam mi rerigardas la tri pasintajn jarojn, estas malfacile reale prezenti, ke tiel multe estis reale efektivigita en kompare mallonga tempo.»

**J. Jousten (1929)**

Ni notu ankoraŭ la aperon en 1929 de kompleta lernolibro de internacia lingvo «Mondik» de J o s. J o u s t e n el Freiburg [2].

Jen ĝiaj ekzemploj: «Essa kontent ko ti destino! Toprim pensen, dueto parlen! Le vort parlet, rest parlet!» — «Estu kontenta kun cia destino! Unue pensi, due paroli! La parolita vorto estas parolita».

**Aliaj projektoj**

G. O. D'H a r v e prezentis en franca broŝuro [3] sian «lerneblan en ok tagoj» sistemon «Romangle». La verketo enhavas nur gramatikan parton. La ortografio estas esence itala, pli komplika ol ĉe Esperanto kaj Ido. Fakte la sistemo plenrajte povas esti konsiderata, kiel unu el la kompromis-anglolatinaj sistemoj, malgraŭ tio ke en la eldonita lernilo forestis iu vortaro.

Nur laŭ nomo de aŭtoro d-ro Oka, profesoro de Tokia Alta normala lernejo kaj fama japana biologo, estis donita al ni informo pri manuskripta projekto, nenie publikigita — la sola projekto ellaborita en Japanio.

En aŭgusta N-o de japan-esperanta gazeto «La Revuo Orienta», j. 1931 ni trovis kelkajn detalojn pri tiu projekto, nomata «Zilengo», kiu estis ellaborita sur bazo de eŭropaj lingvoj kaj iom similis al Esperanto. Dum la tempo de sia projektado (ĉirkaŭ la 1890) d-ro Oka konis volapük-on, sed ne sciis ankoraŭ pri apero de Esperanto.

---

[1] «Novam», Gazeto Internasiona, Editoro: G. Touflet, Paris, 1928, 10 sinsekvaj numeroj (47).

[2] Lehrbuch der Internationalen Sprache «Mondik», bearbeitet von: Jos. Jousten. Antwerpen, 1929 (47).

[3] G. O. D'H a r v e, «Lu Panlingua Romangle», Bruxelles, 1930 (47).

Iu nekonata profesoro Levanzin prezentis en la revueto «Tolero» (1930, № 22, p. 224) anoncon pri kreo de societo «palia» (pan-anglolatin association), kiu devis celi propagandon de «susal» (spoken united states american language). La projektanto deklaris, ke dum 45 jaroj li laboris sur tiu kampo. Tamen pluajn sekvojn lia anonco ne havis.

La kelkfoje jam menciita revueto «Tolero» fariĝis dum la lasta tempo la ĉefa kampo, kie povis elmontri siajn sistemojn ĉiuj individualistaj projektantoj de la Mondolingvo. Apud la reformprojektoj de Ido kaj Esperanto — tie ni povas trovi tekstojn en Romanal, Novial, Occidental kaj ankaŭ en Mundi Latin (Weisbart), Auxiliar English (O. F. Fergusson), Evoluto (Sidni Bond), Simplat kaj en multaj aliaj sistemoj.

Tamen tiuj provoj kaj projektetoj, preskaŭ samnombraj kiel la legantaro kaj la kunlaborantaro mem de la «Tolero», ne povas nin interesi kaj ne prezentas iun gravaĵon por la ĝenerala mondolingva movado.

En la sistemoj Esperanto, Ido, Occidental, Novial, Interlingua kaj ĉiuj ceteraj ai iliaj parencaj, ni vidas du tute difinitajn kaj klare malsamajn direktojn; tiu de praktika facila aposterioria, demokratia laŭ sia karaktero Esperanto kaj tiu de la proksima al la natura latina lingvo, aristokrateca Interlingua — la lingvo de scienculoj kaj personoj, posedantaj la modernajn latinidajn lingvojn.

Ido kaj Occidental-Novial, ankoraŭ tro junaj, okupas inter tiuj du polusoj interan, kompromisan pozicion.

La cititaj kvin ĉefaj sistemoj enkorpigas en si ĉion, kion donis la aposterioria-natura metodo de la konstruo de universala lingvo.

La ceteraj projektoj prezentas per si apartajn variaĵojn kun malesencaj diferencoj. Sed la amatoroj-teoriuloj ne povas sin kontentigi per atingitaj rezultoj. Ili daŭre ellaboradas diversajn kompromisajn, sistemojn, en tiu aŭ alia grado similajn al la antaŭe publikigitaj kaj bazitajn sur la samaj principoj.

Per tio ni finu la traesploron de la sistemoj de artefaritaj universalaj lingvoj. Eĉ se iuloke aperis iu projekto de internacia artefarita lingvo, ĝi neniel povis doni ion novan, ion originalan, kio povus elstarigi tiun projekton el la vico de aliaj projektoj, kreitaj pli frue.

Simila opinio estis esprimita ankaŭ de internacia konferenco de la aŭtoroj kaj adeptoj de diversaj universallingvaj sistemoj, kiu kunvenis la 9-an de aŭgusto de la j. 1923 en Kassel.

La samon konstatis la konferenco de mondolingvistoj, kiu kunvenis en Marto 1930 en Ĝenevo.

La ideo de universala artefarita lingvo venis en sia evoluo ĝis la finaj punktoj de teoria prilaboro. La estonteco devas aparteni al la praktika efektivigo de tiu ĉi ideo kaj al ĝia enkonduko en la realan internacian vivon.

## XIV

## LA INTERNACIA VIVO KAJ INTERNACIA LINGVO (1907—1914)

> La penso de konservativuloj obstine asertas, ke Esperanto estas utopia entrepreno. La efektiva, naturleĝe evoluanta realeco ne rapidante, sed ĉiam pli certe renversas la opinion de la konservativuloj.
>
> M. Gorkij (1921).

La vera senco kaj valoro de la ekzisto de helpa internacia lingvo devas troviĝi ne en ĝiaj teoriaj avantaĝecoj, sed en la ebleco de ĝia praktika aplikado, en tiu reala utilo, kiun ĝi povas doni ĉe la internaciaj rilatoj.

Por la praktika trakto de la movado ne estas gravaj la rondetoj de la lingvo-amatoroj, la organizaĵoj idealiste-utopiaj, sed tiuj institucioj kaj organizaĵoj kiuj, persekutante iujn specialajn taskojn, efektivigas tiujn ĉi taskojn mondskale, uzante la internacian helpan lingvon.

**Disvastiĝo de la lingvo Esperanto kaj ĝia aplikado**

Al la j. 1914 — komenco de la granda «milito de popoloj», kiu detruis la internaciajn rilatojn inter la landoj, la esperantistoj kalkulis laŭ la oficialaj fontoj sur la tuta terglobo, preskaŭ 1800 lokajn organizaĵojn kaj centon da gazetoj, dediĉitaj al la esperantista movado, propagando, evoluo kaj pliriĉiĝo de la lingvo. Laboroj de la Esperantista Akademio, Lingva Komitato, de internaciaj kaj naciaj kongresoj, organizaj laboroj por kreado de naciaj kaj lokaj esperantistaj societoj kaj asocioj, la eksperimenta uzado de la lingvo ĉe internaciaj rilatoj de apartaj amatoroj-izoluloj — ĉio ĉi estis necesa etapo en la progreso de artefarita lingvo kaj ties konsekvenca transformiĝo el la retorta skema produkto de la abstrakta lingvosintezo je elasta, multforma kaj vivkapabla internacia, tuthomara dialekto, kiu estas uzata de multaj homoj, en multaj lokoj kaj en multaj fakoj de la homa vivo.

Post la libra ellaboro de la projekto, post la konstruiĝo de la gramatiko kaj vortaro, — la kresko de la movado kaj de ĝia adeptaro, ties organiziĝo kaj praktika aplikado de la lingvo — estas la dua etapo en la evoluo kaj realigo de la ideo de internacia lingvo.

Tio samtempe estas tiu ekzameno, kiun oni bezonas plenumi, por ricevi certecon je la taŭgeco kaj aplikebleco de la universala lingvo, je vivkapablo de ĝiaj konstrupovaj elementoj.

Diference de la aliaj projektoj kaj sistemoj, ĉi tiun ekzamenon la lingvo Esperanto dum la periodo de la j. j. 1887 — 1914 faris komplete. Ne ekzistas tia mondparto aŭ lando, kie ne ekzistus esperantistoj, kie oni ne povus aŭdi la esperantan parolon, kie ne troviĝus esperantista organizaĵo kaj kie ne aperus io eldonita en tiu artefarita kaj tamen vivanta, viva kaj evoluanta lingvo.

Ne estas rasoj kaj nacioj, kies anoj ne utiligus ĉi tiun lingvon. Ne troviĝas iu fako de la homa vivo, scienco aŭ de abstraktaj ideoj, kiuj ne estus almenaŭ unufoje pritušitaj en Esperanto. La esperanta gazetaro, literaturo, scienca kaj tradukita, kaj eĉ io el la literaturo originala — povas kuraĝe konkuri kun la gazetaro kaj literaturo de malgrandaj nacioj.

**La apliko de aliaj sistemoj**

La lastaj en tiu konkuro havas nur solan avantaĝon: sian longan ekziston kaj historian tradicion. Sed la longeco de ekzisto kaj honorinda historia tradicio ne estas ja argumentoj kontraŭ juneco kaj moderneco.

La plej granda parto el la internaciaj lingvoj restis projektaro tute neaplikita al la reala vivo. La apliko de la sistemoj de Interlingua ne eliris el la limoj de la rondo de rigoraj specialistoj kaj scienculoj.

La sistemo Ido, estante variaĵo de Esperanto, grupigis apud si personojn, kiujn ne kontentigis la stabileco kaj la maniero de socia evoluo de la lingvoformoj en Esperanto. Sed posedante adeptojn, nombrantajn dum sia plej favora florperiodo ne pli ol 10% de la tuta kvanto da esperantistoj, Ido ne povis eliri sur la arenon de la vasta praktika aplikado.

La superiĝo de Esperanto-disvastiĝo kaj uzado kompare kun la aliaj internacilingvaj sistemoj okazis, kiel ni jam montris, ne nur dank'al apartaj pure lingvaj ecoj, sed ankaŭ dank' al certa socie pravigita principaro, kiu estis metita en la bazon de la lingvo-organizo kaj la lingvo-evoluo.

Esperanto estas viva enkorpigo de la praktika ideo de internacia lingvo. Tio cetere ne signifas ke ĝi ne posedas iujn malperfektaĵojn kaj ke oni ne povus fari en ĝi iun perfektigon. Sed tiu perfektigo estas de la esperantistoj realigata ne per arbitra ŝanĝo de fundamentaj reguloj de la lingvo, sed per konstanta aplikado de la lingvo en la praktiko mem. Tiamaniere la reala vivpraktiko solvas ĉiujn diskutojn pri la eblaj aldonoj kaj korektigoj en la lingvo-formoj. Tiamaniere estas gardataj la interesoj de vasta publiko, postulantaj kiel eble plej grandan stabilecon de la ekzistanta, praktike jam uzata internacia lingvo.

**Praktika utiligo de internacia lingvo**

Post sia dua etapo, post la jam plenumita praktika ekzameno, la internacia lingvo devos leviĝi al la tria etapo — la etapo de praktika aplikado kaj utiligo por la bezonoj de la internacia tuthomara vivo.

Se en la dua etapo la internacia lingvo estas fakte nur celo, en la tria etapo ĝi ricevas pli modestan, sed pli propran rolon — de «rimedo»,

Komencante de la j. 1906, kelkaj internaciaj kongresoj akceptis tre favorajn por Esperanto rezoluciojn kaj rekomendis ĝian aplikon kaj lernadon.

La formoj de praktika uzado de internacia lingvo en tiu periodo konformiĝis al la specifika karaktero de etburĝaj demokrataj organizaĵoj de la antaŭmilita periodo.

«Universala Esperanto-Asocio», organizinta tra la mondo, en 1 300 homloĝataj lokoj, densan reton da siaj delegatoj, agentoj kaj konsuloj, estis la plej bona montrilo, resumanta jam efektivigitajn praktikajn rezultojn de la esperanta movado.

Por tre malalta jarkotizo UEA krom la senpaga dissendo al ĉiuj anoj de ampleksa jarlibro, organizis en internacia skalo vastan priservadon de la bezonoj de siaj anoj.


Kelkan tempon ĉe UEA ekzistis speciala laborista fako. De la j. 1922 la laboro de UEA en USSR ĉesis. Tio tre influis la ĝeneralan nombron de ĝiaj delegitoj kaj membroj.

**Esperanto en laboristaj kaj revoluciemaj rondoj**

Oni povas observi ankaŭ senduban kreskon de intereso al internacia lingvo, en la formo de ĝia konkreta realigo — Esperanto, flanke de la laboristaj kaj revoluciemaj organizaĵoj.

Ĵam en la j. 1905, ĉe la socialista kongreso de Pariza regiono, oni proponis rekomendi al la Internacia socialista oficejo en Bruselo, uzi por la oficiala korespondo la lingvon Esperanto. Tiu ĉi propono tamen estis malakceptita.

Du jarojn poste ĉe la internacia socialista kongreso en Stuttgart (1907) Jaurès kaj Vaillant laŭ la iniciativo de la socialista




La unuaj literaturaĵoj en Esperanto (1894 j.)

federacio de Aisne kaj kun la subteno de la delegitoj de Transvaalo, starigis la demandon pri «elekto de internacia lingvo por ĉiuj internaciaj socialistaj interrilatoj kaj por internaciaj kongresoj». La gvidantoj de la germana socialista partio fiaskigis la demandon «kiel nesufiĉe maturan». Estis eĉ tempo, kiam la gvidantoj de la germana socialdemokratio malpermesis al la partia gazetaro kaj speciale al sia centra partia organo «Vorwärts» skribi ion pri Esperanto.

Sed malgraŭ ĉiaj kontraŭstaroj, malgraŭ la malpermesoj de la gvidantoj, Esperanto trovis inter la laboristoj ĉiam pli grandan nombron da adeptoj kaj ĝuste en Germanio la «Germana Laborista Esperanto Asocio» jam en la j. j. 1911—1912 prezentis per si tre solidan organizitan forton, kiu nombris pli ol 30 lokajn grupojn kaj organizaĵojn.

Komencis naskiĝi ankaŭ profesiaj kaj fakaj esperantaj organizaĵoj.

**La laŭklasa diferenciĝo de la Esperanto-movado**

Komencante de la j. 1908, klariĝas la unuaj signoj de la laŭklasa diferenciĝo en la Esperanto-movado. Por unua fojo en diversaj landoj formiĝas la naciaj laboristaj sindikataj kaj socialistaj grupoj de esperantistoj, kiuj poste organiziĝas je internacia organizaĵo. Ĉe la internaciaj neŭtralaj kongresoj de esperantistoj iom post iom maturiĝas la

bezono krei apartajn fakajn kunvenojn, kie Esperanto estis jam ne celo, sed rimedo por efektivigo de kelkaj internaciaj taskoj kaj celadoj.

La milito de la j. 1914—1918 interrompis la pluajn klasajn kaj profesiajn organiziĝojn en la mondo de esperantistoj. La tutmonda




Esperantaj eldonaĵoj postmilitaj (1927 j.)

esperanto-movado estis disfendita de la ekbolinta milito je konsistigaj naciaj partoj. Post la milito oni devis konstati: en kiun direkton ŝin movos la disvastiĝo de la internacia lingvo, ĉu venis jam la tempo por transformi la «proproceladon» de Esperanto je rimedo por praktika internacia laboro kaj ĉu trovos por si lokon la ideo de internacia lingvo meze de la alproksimiĝantaj mondaj kataklismoj?

## XV

## POST LA MILITO (1919—1930)

Esperanto estas plej serioza provo—krei arteferitan lingvon, komunan por ĉiuj popoloj. La scienculoj de la tuta mondo, vidantaj pluan progreson de la scienco en kreskanta unueciĝo de la vastaj popol-amasoj, el kiuj la scienco ĉerpas la fortojn por sia plua disfloro, — devas aklami Esperanton kiel unu el la vojoj por fortigo kaj vastigo de simila unueciĝo.

Akademiano A. E. Fersman (1926).

**La internacia lingvo dum la milito**

Dum la milito de la j. 1914 ĝis 1918 esperantistoj kun granda peno gardis la antaŭajn rezultojn de la movado kaj siajn reciprokajn interrilatojn. La francoj kaj germanoj en la nombro de aliaj rimedoj por reciproka kulpigo kaj defendo eluzis Esperanton por la agitaj celoj en la neŭtralaj landoj [1]. La Universala Esperanto-Asocio priservis la organizaĵojn por helpo kaj konsolo de la militkaptitoj kaj vunditoj en la anglo-franco-germanaj koncentraj tendaroj.

**La internacia lingvo post la milito**

Sed jen venas la jaroj 1919 kaj 1920. La militaj bataloj ĉesas. Sur la pesiloj de la mondhistorio aperas novaj faktoroj. La problemoj, kiuj ankoraŭ antaŭnelonge estis solvataj en la malvaste loka, nur bonŝance en la nacia skalo, akceptas pli grandan akrecon, plian kategoriecon kaj fariĝas problemoj, kiuj malkvietigas la tutan mondon kaj la tutan homaron. Sin montris la fantomo de la nova decida lukto de la mondaj potencoj.

Certe ne en tiuj momentoj kaj ne en tiuj cirkonstancoj la internacia lingvo povis pretendi por sia fina akcepto.

Sed ĉial la bonfavoraj simptomoj montras aserte, ke la duagrade grava faktoro dum la decida batalo — lingvo internacia — fariĝos nepre grava faktoro post la venko, paciĝo kaj ĉe la rekonstruo de la nova vivo sur novaj bazoj kaj en ĝenerala tuthomara skalo.

Kune kun tio kreskas la interesiĝo pri Esperanto en la laborista amaso. En la jaro 1919 la kongresoj de la usona, portugala, hispana kaj franca konfederacioj de la laboro sin esprimis favore por la subteno de la lingvo Esperanto kaj por ĝia apliko ĉe la internaciaj rilatoj. La kongreso de la franca komunista partio en la j. 1921 akceptis rezolucion, kiu rekomendis lerni kaj apliki la lingvon Esperanto. La saman decidon akceptis la Internacio de la revoluciema instruistaro, Internacio de la militpartoprenintoj kaj invalidoj de la milito k. m. a.

La britaj sindikatoj (trade unions), kies lingvo pli ol iu alia nacia lingvo povas pretendi por la rolo de la internacia, ankaŭ ĉe sia kongreso en Scarborough en la jaro 1926 sin esprimis por la apliko de esperanto por la internaciaj rilatoj.

---

[1] Vidu—serion «Nova Esperanto Biblioteko», Deutscher Esperanto Dienst, Berlin 1917—18; gazeton «Internacia Bulteno», Berlin, 1915—1919; kaj «Comité d'initiative de patronage. Pour la France par l'Espéranto», Paris, 1915 ([47]).

Post la milito renaskiĝas precipe ne naciaj senkoloraj propagandaj esperanto-gazetoj, sed organoj de fakaj, profesiaj, politikaj kaj klasaj organizaĵoj.

La esperantistoj mem en granda plimulto ne rilatas la faktojn indiferente, sed aktive partoprenas ilin kaj akcelas la estonton per siaj scioj kaj per internacie akirita sperto.

**La revolucia esperantismo**

La unua laborista klubo esperantista estis fondita en la j. 1903 en Stockholm. Tiun ekzemplon du jarojn poste sekvis Frankfurt sur Main kaj poste aliaj Eŭropaj kaj ekstereŭropaj lokoj. Jam ĉe la 2-a universala kongreso en Ĝenevo okazis siaspeca kongreseto de la «ruĝuloj». En la jaro 1907 aperis la unua socialisma esperanto-gazeto «Internacia Socia Revuo», kaj en la jaro 1910 alia laborista organo «Arbeiter-Esperantist» en Germanio. La nova laborista esperantismo rezultis el aparta bezono por la laboristoj formi siajn proprajn metodojn de la apliko de Esperanto, ĉar la burĝaj metodoj estis por ili aŭ fremdaj aŭ eĉ tute malamikaj. La aŭtoro de Esperanto, al kiu oni ne povas ne atribui tre saĝan prognozon por la estonto de la kreita de li lingvo, skribis en la jaro 1910 jenan rimarkindan leteron al la redaktoro de la nova esperanto-organo laborista:

«La belan honoran ekzempleron de la 'Laborista Esperantisto' mi ricevis kun plezuro kaj mi sendas al vi mian sinceran dankon. Al la nova gazeto mi deziras plej bonan sukceson kaj mi esperas, ke la sukceso certe ne mankos, ĉar mi konas vian energion kaj laboremecon. La kampo, kiun vi elektis por via laborado, estas tre grava: eble por neniu en la mondo nia demokrata lingvo havas tian gravecon, kiel por la laboristoj, kaj mi esperas ke pli aŭ malpli frue la laboristaro estos la plej forta apogo de nia afero. La laboristoj ne sole spertos la utilon de Esperanto, sed ili ankaŭ pli ol aliaj sentos la esencon kaj ideon de la esperantismo[1].»

Ĉi tiujn vortojn brile pravigis la postmilita tempo, kiam la laborista esperantista movado firmiĝis je konstantaj, ĉiam pli kreskantaj organizaĵoj.

Tiuj organizaĵoj kreskis kaj evoluis en atmosfero, kiun oni ne povas nomi kvieta. Oftaj bataloj kaj interpuŝiĝoj, kiuj karakterizas la revolucian laboristan movadon en ties batalo kontraŭ la reformistoj, sin montris ankaŭ inter la laboristoj esperantistoj.

Sed tiuj bataloj, estante grava viviga elemento en la lingvo-uzo, almilitis por Esperanto firman lokon ĉe la laboristoj kaj montris internacie kaj praktike, ke la problemo mem de la internacia lingvo estas pli aŭ malpli solvita.

Krom la grandaj laboristaj esperanto-organizaĵoj en Germanio, Francio, Britio, formiĝas ankaŭ laboristaj esperanto-organizaĵoj en aliaj landoj: Ĉeĥoslovakio, Finnlando, Usono, Bulgario, Svedio, Norvegio, Italio, Hungario k. a.

En kelkaj landoj la esperanto-organizaĵoj estis por la laboristoj la sola pli aŭ malpli laŭleĝa formo de la organizo. En kelkaj landoj, kiel Jugoslavio, Grekio, Rumanio, fondiĝis nur apartaj laboristaj grupoj, sen formigo de tutlanda asocio.


Fariĝas fakto, ke la nombro de la esperantistoj kreskas el la fonto de la ĉiam pli novaj aliĝantaj laboristoj multe pli ol el la fonto de la aliĝantaj interklasaj intelektuloj.

---

[1] Vidu «La Socialisto», Wien, 1. IX. 1929, n-o 9, pĝ. 76.

La ideo de la tutmonda organizo ĉiam pli vaste evoluas kaj kreskas. Se en la jaro 1914 el la 7 tiamaj laboristaj esperanto-organoj nur unu estis pure internacia, en la jaro 1923 ekzemple ekzistis jam kvin gazetoj internaciaj kaj nur sep naciaj, lokaj.

En la jaro 1921, ĉe la XIII. Universala kongreso de Esperanto en Praha (Ĉeĥoslovakio), la revoluciemaj kaj la laboristaj kongresanoj fondis la «Sennaciecan Asocion Tutmondan». Post ok jaroj la nombro de la aktivaj membroj de tiu ĉi asocio atingis pli ol 6 500 en 42 landoj [1].




Tabelo de kresko de SAT-anaro

En pli ol 1 500 punktoj kaj urboj de la mondo troviĝis anoj de tiu ĉi asocio. Laboristoj, kiuj eniris la asocion, komencis per Esperanto pli aktive partopreni la faktan internacian laboristan movadon, kunligi sin kun la eksterlandaj kamaradoj kaj pli aktive senti la komunecon de la mondaj proletaj interesoj.

La ĉiusemajna organo de la asocio, «Sennaciulo», ĉiujare plikreskanta amplekse, estis disvastigita tra la tuta mondo. La fakto de la ekzisto kaj ĉiam kreskanta disvastiĝo de tiu ĉi asocio kaj de tiu ĉi organo, malgraŭ la plej malfavoraj cirkonstancoj, estis jam per si mem bona bazo por la estonto.

[1] «Jarlibro de SAT» Paris—Leipzig—Moskvo, 1929—1930, pĝ. 212 kaj 228.

Eĉ la skismo en la laborista esperanto-movado, kiu klare montriĝis en la j. 1929 kaj kiu en la j. 1930 kondukis al certa politike pli preciza apartiĝo de la revoluciema alo de SAT kaj de la naciaj- laboristaj Esperanto-asocioj for el la idealismaj kontraŭ-sociaj teorioj, postrestaĵoj de la antaŭmilita esperantismo kaj pacifismo, estas per si mem fakto pruvanta kreskon kaj esencan fortiĝon de la movado.

Nuntempe, en 1931, ekzistas jam propogandaj naciaj esperanto-asocioj laboristaj en sekvantaj landoj: Aŭstrio, Britio, Belgio, Francio, Alĝerio, Tunizio, Hungario, Germanio, Norvegio, Nederlando, Sovet-Unio, Svedio, Svisio, Finnlando, Latvio, Polio, Ĉeĥoslovakio [1]. Lastatempe fondiĝis ankaŭ proletaj esperanto-asocioj en Usono kaj Japanio. Naŭ el ili eldonas siajn proprajn persorganojn. Aperadas ankoraŭ pluraj informbultenoj laboristaj en esperanto, eldonataj de diversaj internaciaj institucioj kaj organizaĵoj per multobligo ne tipografia (ekzemple «Proleta Esperanta Korespondanto» en Berlin, diversaj bultenoj de proletaj ateistoj, de senŝtatanoj k. a.). Bonajn ŝancojn por sia plua disvolvo havas la eldonejo kaj la gazeto «Internaciisto», iniciatitaj de la klasbatala opozicio en SAT.

Inter la landaj laboristaj esperanto-asocioj la plej fortaj estas tiuj de Germanio kaj Sovet-Unio, havantaj ĉiu po kelkaj miloj da aktivaj membroj.

Esperanto en Sovet Unio

Ambaŭ tiuj ĉi asocioj — en la landoj, kie plej klaras la politike akraj sociaj bataloj — estas la ĉefaj subtenantoj de la formiĝinta «klasbatala opozicio en SAT». Kun ĉiu jaro pli grava kaj pli konsiderinda fariĝas la movado esperantista en Sovet-Unio [2].

En la antaŭmilita carista despotia Rusio ne ekzistis iu laborista organizaĵo esperantista. Nur post la Februara kaj ĉefe Oktobra revolucioj de la jaro 1917 la amasoj laboristaj vigle ekinteresiĝis pri la internacia lingvo. Sed tiun interesiĝon mortigis ofte la manko de la lernolibroj kaj ankaŭ la cirkonstancoj de la revoluciaj perturbadoj kaj de la civitana milito. La antaŭmilitaj eldonejoj de la esperantaj lernolibroj neniam eĉ povis prezenti tiun kolosan postulon por la lernolibroj kaj estas nenia miro, ke ĉiuj provizoj de la esperanto-lernolibroj estis plene elĉerpitaj.

La internacia ideologio de la bolŝevika revolucio estis ekstreme favora bazo por progresigo de la esperanto-movado. La rondetoj kaj grupoj esperantistaj preskaŭ ĉie havis helpon kaj subtenon el la flanko de la sovetaj kultur-klerigaj institucioj. En la jaro 1918 ĝis 1920 en Moskvo eĉ ekzistis speciala «Domo de Esperanto», tre oportuna kaj luksa nobela palaceto, plene prezentita en la disponon de Moskvaj esperanto-organizaĵoj por iliaj bezonoj. Nur la tiutempa pliakriĝo de la civitana milito, malsato kaj detruiĝo de la tuta ekonomia vivo malebligis, ke tiu treege favora situacio konserviĝu.

Stabila kaj seninterrompa disvolviĝado de l'esperanto movado en Sovet-Unio komenciĝis nur post la jaro 1922. La fondita en 1921, ĉe la III-a Tutruslanda Kongreso esperantista en Petrogrado, Sovetrespublikara Esperantista Unio iom post iom sukcesis koncentrigi ĉiujn realajn fortojn de la movado kaj ĝiajn disigitajn elementojn tiamaniere, ke ebliĝis laboro laŭ tute novaj metodoj kaj kun eksterordinara efekto. Inter la specialaj sukcesoj de Sovetresp. Esp. Unio oni povas citi la tutlande centralizitan organizsistemon, kiu ebligis laŭplanan agma-

[1] Jarlibro de SAT, 1929—1930, pĝ. 42.

[2] N. V. Nekrasov, «Tra USSR per Esperanto», Artikoloj «Rusa movado esperantista» kaj «Sovetlanda Esp. Unio», pĝ. 23—26. Eld. de «La Nova Epoko», Moskvo-Kazanjo, 1926.

nieron kaj ŝparadon de la resursoj, la grandan kaj bonegan eldonadon de la efika kaj science bazita propoganda literaturo, la senperan aplikadon de la lingvo por internacia laborista korespondado kolektiva, utiligata samtempe por gazetaro kaj por diversaj sociaj organizaĵoj, kaj precipe la konkeron de solida aŭtoritato por esperanto inter la diversaj sovetaj institucioj, kiel Akademio de la Sciencoj, Komunista Akademio, Popolkomisarejo de Poŝto kaj Telegrafo (kiu uzas Esperanton por surskriboj sur oficialaj poŝtmarkoj de Sovet-Unio) ktp.

**Rilato de la revoluciaj esperantistoj al aliaj sistemoj de la internacia lingvo**

La faktoj atestas la kreskon de la esperantista movado, kiu etendiĝas laŭvaste, altirante ĉiam pli grandajn amasojn da interesiĝantoj pri la internacia lingvo, ĝin studantaj kaj utiligantaj, — kaj kiu ankaŭ penetras profunden, donante al la movado mem novan kaj pli signifan sencon kaj pli altan socian valoron. La malamikoj kaj konkurantoj de Esperanto ne povas nei ĉi tiujn faktojn.

Tial inter la plej objektive pensantaj el ili pli kaj pli ofte aperas la demando pri la dezirindeco, ke dume, antaŭ la venonta mondkongreso de la registaroj kaj popoloj, oni uzu la plej disvastigitan, kvankam eventuale eĉ malpli perfektan, Esperanton.

Sed ĉar vice kun Esperanto ekzistas aliaj sistemoj de la universala lingvo, estas interese scii, kiel rilatas al la aliaj sistemoj la revoluciemaj esperantistoj. Kompletan respondon tiurilate ni trovas en la «Deklaracio», akceptita dum la internacia kongreso de la laboristaj esperantistoj en 1923 en Kassel:

«La problemo pri Lingvo Internacia por la batalanta proletariaro estas la problemo pri teknika interligilo kaj devas esti taksata ekskluzive kiel tiela.

La lingvo internacia, kiel ilo de interligo devas havi kaj havas materialan bazon en formo de la disvolviĝintaj internaciaj rilatoj de la moderna homaro.

De la vidpunkto de la revolucia materialismo — por la nuna momento grandan signifon prezentas vivrealigo de la ideo de lingvo internacia kaj tuja ĝia utiligo.

La revoluciemaj esperantistoj, starigantaj unuavicen ne la personajn preferaĵojn, sed la interesojn de sia klaso — unuiĝus ĉirkaŭ unu internacia lingvo, en la okazo, se tiu jam estus utiligata aŭ oficiale de la supera aŭtoritato estus enkondukita kaj destinita por utiligado.

Tamen, ĉe la nunaj kondiĉoj kaj ĉe paralela ekzistado de du aŭ eĉ kelkaj samformaj sistemoj de la internacia lingvo, kies interna proksimeco ne estas konata al la fremdaj homoj, estas neeble antaŭvidi oficialan intervenon de iuj mondaŭtoritatoj por definitiva solvo de la problemo, pri enkonduko en la vivon de unika sistemo de la lingvo internacia.

Tial definitivan solvon de la problemo pri vivrealigo de la unika lingvo internacia necesas en la nuna momento dependigi de ĉiam pligrandiĝanta bezono pri la lasta inter vastaj homamasoj kaj de ilia kreskanta konscio pri praktikaj rezultatoj, kiujn donas utiligado de la ekzistantaj sistemoj.

Relative malgranda je 10—15% diferenco en la materialoj gramatika kaj vortara de la sistemoj Esperanto, Ido kaj ceteraj modernaj internaci-aposterioriaj projektoj de Lingvo Internacia ne devus esti malhelpo por akcepto de unu el ili kaj ĝia utiligo por la internacia batalo kaj socikreado de la monda proletariaro.

En la nuna momento, ne havante eblecon sen interveno de komunagnoskita tutmonda leĝdonanta aŭtoritato konsideri iun sistemon de la lingvo internacia kiel unikan, — la revoluciemaj esperantistoj,

havante por la bazo de sia agado la interesojn de la internacia proletariaro, devas starigi kiel siajn taskojn:

a) kiel eble plej vaste popularigi la ideon de lingvo internacia;

b) praktike utiligadi kaj aplikadi en la internaciaj rilatoj Esperanton, akirintan plej grandan disvastiĝon, ĉiufake provitan, kaj kiu povas jam nun doni grandan utilon al la internaciaj rilatoj.»

Tiamaniere la baza celado de la revoluciaj esperantistoj estas ne universala lingvo per si mem, sed la ebla praktika kaj nuntempa ĝia utiligo.

Kaj ili montras tion ne nur pervorte, sed ankaŭ perage. La proletaj esperantistaj organizaĵoj nuntempe sin okupas ne tiom pri la propagando de Esperanto, kiom pri ĝia praktika uzado per organizo de interligo kaj korespondado kun la translimaj laboristoj. Ĉi tiun laboron alte taksas jam kelkaj gravaj internaciaj laboristaj institucioj.

**Rilato de laboristoj-esperantistoj al la Esperanta neŭtralismo**

La klasbatalaj laboristoj esperantistoj akceptis tre opozician, eĉ bataleman sintenon rilate la neŭtralan esperantistan movadon. Per tio ili celis antaŭ ĉio purigi siajn vicojn de la ŝanceliĝantaj, necertaj, plejparte interklasaj elementoj, kaj due la laboristaj esperantistoj eksentis sin sufiĉe fortaj por komenci la malkaŝan batalon kontraŭ ĉio, kio estas burĝeca kaj ekspluatema en la esperantista movado. Tio estis necesa por akre apartigi sian movadon de la burĝa.

Kontraŭ la senenhava pacifismo kaj idealismo de la neŭtralaj esperantistoj la proletaj esperantistoj starigis sian profundan komprenon de la internacilingva ideo en la vico de ĉiuj ceteraj aspiroj de la proletaro al sia tutmonda emancipiĝo. La jama lingva kaj stila supereco de la neŭtralaj esperantistoj nuntempe anstataŭiĝis per pli liberstila, natura kaj evoluema, riĉa lingvo ĉe la esperantistoj proletaj, kiuj paŝon post paŝo okupas la pozicion de la veraj gvidantoj de la praktika kaj elasta, vere monda kaj internacie klara Esperanto. Ankaŭ la vastaj teoriaj studoj, kiujn faras nuntempe plejparte la sovetiaj esperantistoj pri la lingvo-elementa kaj konstrua esenco de Esperanto, ilia penado seriozigi kaj bazigi ĉi tiun fkankon de la lingva vivo, alportas al Esperanto kun ĉiu tago pli kaj pli gravan apogon en ĝia rezisto al la skolastaj atakoj de la malvasteprofesiaj, dogmaj aŭ individualiste pensantaj lingvistoj.

**La revoluciema Ido-movado**

Apartaj revoluciemaj idistoj volis imiti la vojon de la revoluciemaj esperantistoj. Ili ankaŭ provis krei pure revolucieman idismon. Sed limigita nombro da idistoj, manko de materiaj kaj teknikaj rimedoj, ĉe la ĝenanta tradicio de la aŭtokrata lingvo-reguligo per iuj lingvocentroj, kiu ĝenis socian disfloron de la lingvo, ĉi ĉio neeviteble devigis la idistojn koncentrigi sian atenton precipe ĉe la propagando de sia lingvo kaj ĉe la kritikado de la tre konkuranta Esperanto.

En tiu rilato ne mankas kuriozaĵoj de tia speco, kiel jena[1]: sveda policisto kaj latva kaj svisa pastroj subtenas la «revolucian Ido-movadon.» Sekretario de la germana komunista Ido-organizaĵo samtempe estas ankaŭ sekretario de la neŭtrala germana Ido-unio (L a n t o s, 1923). Luksemburga idisto M e i e r - H e u c k e samtempe redaktas kaj eldonas «kun komunisma tendenco» la gazeton «Revuo internaciona» kaj partoprenas la konferencojn de pacifistoj, reprezentas la Ido-movadon dum la interkonsiliĝoj kun la usona milionulino M o r r i s kaj estas reprezentanto de la internacia neŭtrala Ido-unio (Uniono por la linguo internaciona) en Luksemburgo.

[1] «Sennacieca Revuo», Leipzig, 1924, n-o 7-8, pĝ. 13—14.

La lasta provo de l'idistoj, krei en Sovet-Unio fortan Ido-movadon, por tiamaniere restarigi la ŝancojn por reakiro de siaj malgajnitaj pozicioj en la Okcidenta Eŭropo, estis fiaskinta [1]. Ido ne trovis favoran humon por siaj semoj en tiu ĉi medio, sed per sia demarŝo ĝi nur plifortigis la rezistemon de l'esperantistoj kontraŭ ĉiuspecaj reformistoj kaj projektistoj de l'internacia lingvo kaj inokulis al Esperanto stabilan imunecon en ĝia organismo [2].

**Rilato al Esperanto-movado flanke de la burĝaj adeptoj de aliaj sistemoj**

Kaj se en tiu stranga situacio troviĝas la revoluciemaj idistoj, ne valorus multe paroli pri la ne revoluciemaj adeptoj de Ido kaj aliaj sistemoj de la universala lingvo, pri ilia rilato al Esperanto kiel faktoro socia.

La simpleco de Esperanto, socia demokrateco de ĝiaj evoluformoj, ĝia facileco por la amasa laboristo — jen la minaco al la stabiliĝinta burĝa kulturo. Ke en la esperanta movado venkas ne burĝa neŭtrala, sed revolucia laborista tendenco — tio estas al ili afero klara kaj por tio ili havas multegajn pruvojn.

Pli reliefe ĉi tiun timon al la revolucia esperantismo, al la revoluciiga forto de la universala lingvo, elŝiriĝinta el la kabinetoj de apartaj esploruloj en la amasojn, esprimas la aŭtoro de Occidental — E. de W a h l:

«Por mi estas klare: aŭ venkos la bolŝevismo kaj venkos la nova kulturo de Esperanto: aŭ bolŝevismo ne venkos kaj tiam triumfos la komplikaj naturaj lingvoj, kiuj konservas la elementojn de la 2000-jara eŭropa kulturo [3].»

La simpla kaj demokratia Esperanto, vaste uzata de la amasoj — estas por E. de W a h l kvazaŭ enkorpiĝo de revolucio kaj venko de la amasoj. La komplikaj kaj aristokratemaj novlatinidaj kaj novlatinaj projektoj (kaj en ilia nombro ankaŭ Ido, kiel havanta novlatinidan tendencon) estas simboloj de la konservado de la jugo de l'pasinteco, de la dominado de l'fortaj super la malfortaj, simboloj de la imperialisma politiko de aŭtokrata uzurpe-burĝa parlamentismo kaj de bonfarto de la kapitalisma vivo.

Penante altiri al sia lingvo la «aŭtoritatajn» kaj famajn scienculojn, ligitajn kun la hodiaŭa kapitalisma stato de la mondo, E. de W a h l per tiu akra kaj klara frazo por ĉiam baris por sia lingvo la simpatiojn de la laborulaj amasoj kaj de tiuj scienculoj kaj lingvistoj, kiuj klare vidas la rolon kaj signifon de la hodiaŭa revolucia movado de la proletoj. Por iom mildigi la maltrafan manovron, la redakcio de la occidentalista gazeto «Cosmoglotta» publikigis deklaron pri la «neŭtraleco» de sia lingvo, rilate al la klasa politiko. Same la deklaro de W a h l estas nomita kiel deklaro de persono, «ne reprezentanta oficiale la Occidental-union» [4]. Tiuj manovroj kaj kontraŭmanovroj de la malnovkulturuloj montras, ke sen subteno de la laboristaj amasoj neniu universala lingvo povas esperi iujn poziativajn rezultojn.

**Ĝeneralaj perspektivoj de la esperanto-movado**

La kreskado de la revolucia signifo de Esperanto estas jam bone konsiderata de la registaroj de burĝaj landoj.

En Polio, Hungario, Bulgario, Rumanio kaj en aliaj blankaj landoj la laboristaj esperanto-organizaĵoj estas ĉiel persekutataj. En kel-

---

[1] Gedem i N. Nekrasov, «Sovremennoe Ido-dviĵenie», Izd. CK SESR, Moskva, 1928.
[2] Prof. L. Ĵirkov, «Poĉemu pobedil jazyk Esperanto?», Izd. CK SESR, Moskva, 1930.
[3] «Kosmoglott», Reval, 1922, n-o 3, pĝ. 2.
[4] Vidu «Cosmoglotta», Mauer b. Wien (Aŭstrio), nov. 1929, n-o 66 (11), pĝ. 202.

kaj landoj oni punis eĉ pro la nura aparteno al Sennacieca Asocio Tutmonda, kaj la gazeto «Sennaciulo» estis malpermesata. Dum la registaro de P o i n c a r é en Francio (1922 j.) per speciala cirkulero estis malpermesita la instruado de Esperanto en lernejoj kaj universitatoj pro tio, ke ĝi estas la lingvo de revoluciuloj.

Sed la burĝaro havas nek forton, nek eblon por subpremi la movadon, kiu jam estas eliĝinta el la stato de infaneco. Krome, la burĝaro estas distordata per kontraŭdiroj, propraj al la kapitalisma sistemo. Ĝi ja mem ankaŭ sentas bezonon pri plisimpligo de la internaciaj rilatoj. Precipe akre tio ĉi estas konsciata de la malgrandaj ŝtatoj, kies lingvoj ne povas pretendi memstaran rolon en la komuna familio de lingvoj eŭrop-popolaj. Sed ankaŭ en Ameriko, kiu ŝajne malplej multe sentas bezonon pri iu alia lingvo, krom la angla, laŭ la iniciato de la milionulino A l i c e V. M o r r i s kreiĝis en 1923 speciala «Komitato pri Internacia Helpa Lingvo ĉe la Internacia Konsilantaro de Esploroj» (Committee on International Auxiliary Language of the International Research Council).

Internacia Radiokongreso akceptis Esperanton kiel internacian lingvon de la radiotelefonio. La kvanto da disaŭdigataj per radio Esperanto-lecionoj nuntempe jam superas tiujn de aliaj lingvoj kaj inter ili ankaŭ tiujn de la angla. Internacia poŝtunio permesis uzadon de Esperanto samrajte kun la aliaj naturaj lingvoj. Internacia kongreso de teknika gazetaro rekomendis al la sciencaj revuoj presigi Esperanto-resumojn de la artikoloj. Multaj gazetoj de la tuta mondo jam sekvis tiun ĉi rekomendon.

En la jaro 1922 la Ligo de Nacioj decidis pridiskuti la problemon pri la lingvo internacia kaj pri ĝia enkonduko en la lernejoj, tamen pro kontraŭagoj de la francaj delegitoj de la Ligo la problemo estis transdonita al scienca komisiono por prilaboro. Tie laŭ penoj de la reakciemaj sciencistoj ĝi estis enterigita ([41]). Tamen venos la tago, kiam estos ree iniciatita tiu ĉi problemo, sed jam ne ĉe la Ligo de Nacioj, kaj tiam ĝia solvo estos definitiva.

La estonteco malfermas antaŭ la esperantismo vastajn horizontojn kaj ebligas havi senkondiĉan certecon pri la definitiva triumfo de la ideo de la lingvo internacia.

Kaj tiu estonta lingvo internacia estos sendube unu el la bazaj elementoj, sur kiuj povos esti konstruata la estonta komuna lingvo de la unueca homara socio ([43]).

**Generalaj perspektivoj de la internacilingva scienco**

En la estonteco devas ŝanĝiĝi ankaŭ la karaktero de la tuta scienco pri la internacia lingvo, kiu devas eliri sur la larĝan vojon de la kolektiva kreado de la mondolingvo sur bazoj de la nova materialisma lingvoscienco. La utopismon de multenombraj individuaj projektistoj de artefaritaj lingvoj devas anstataŭi kunsolidigita praktika laboro super perfektigado kaj pliprofundigo de la pozicioj jam akiritaj por la lingvo internacia.

Anstataŭ la tendenca ambiciema lingvinventado per mizeraj fortoj de apartaj idealistoj, en la estonteco devas fondiĝi institucioj, kiuj objektive laborus super internacia terminologio por ĉiuj fakoj de la scienco, tekniko kaj vivo. Tiu ĉi laboro estos neelĉerpebla fonto por pliriĉigo de Esperanto, kiu jam nun povas esti konsiderata ne kiel projekto, sed kiel lingvo vivanta kun multenombra socio da ĝiaj uzantoj.

Inter la similaj institucioj oni povus jam citi ekzemple la Amerikan Asocion por Internacia Helpa Lingvo (IALA) en New-York kaj Interlingvistikan Oficejon en Budapest, fonditan dum la j. 1929. Se tiuj ĉi institucioj laborus laŭ la supre montrita objektiva maniero su-

per internacia terminologio, ili povus multon utilan fari por la tutmonda lingvo entute.

Tamen estas dube, ke tiuj institucioj, kreitaj en la burĝa socio, kapablus efektive sukcese plenumi tiujn taskojn, servontajn al la internacia lingvo de la estonto. Fakte krom statistikaj laboroj kaj eldono de fundamenta bibliografia verko ([40]) malmulton faris IALA. Kaj la Budapeŝta oficejo post unu jaro de ekzisto devis likvidiĝi, ĉar en sia celado ĝi ne ricevis la necesan subtenon de la individualistaj lingvoprojektantoj de la socio kapitalista. Multe pli grandajn esperojn ni povas havi al la katedroj de la mondolingvo, kiuj lastatempe estas fondataj ĉe la ŝtataj lingvo-sciencaj institucioj en Sovetio.

Sed ĉiuokaze, la Esperanto-movado neeviteble kaj senkondiĉe daŭros esti centro kaj bazo de la tuta laboro por la mondolingvo, kiel gravega kaj neanstataŭebla faktoro de la praktika popolamasa akcelado al ĝi, garantianta ĝian vivon, progresadon kaj triumfon. En la potenca Esperanto-movado akumuliĝas la tuta sperto de ĉiuj internacilingvaj projektoj. Ne riskante facilanime rompi siajn formojn, pli kaj pli firmigante la fundamenton, starigitan ankoraŭ de Zamehof, Esperanto facile proprigas al si ĉiujn taŭgaĵojn el aliaj sistemoj. Per sia aglutina strukturo ĝi cementigas admirindan lingvoponton inter Okcidento kaj Oriento.

## XVI

## LA NUNA ESPERANTO, LA ESTONTA LINGVO INTERNACIA KAJ LA LINGVO TUTMONDA

> Necesas ebligi al naciaj kulturoj evoluon kaj disvolviĝon, kun la disvolvo de ĉiuj iliaj potencoj, por krei la kondiĉojn al ilia kunfandiĝo en unu komunan kulturon kun unu komuna lingvo.
>
> J. Stalin (1930).

**Esperanto kaj la universala lingvo de la estonto**

Veninte al la fino de tiu ĉi verko, ni nun devas doni iun prognozon pri la maniero, per kiu la lingvo internacia pluen evoluos kaj influos la iaman, nepre starigotan lingvon universalan, tutmondan — la lingvon estontan, ununuran.

En la komencaj ĉapitroj ni jam montris, ke la lingvo estas nepra akcesoraĵo de la homa socio, tekniko kaj kulturo. La evoluo de la homa socio okazas sur bazo de evoluo de certa mastrumadtekniko. La pasinto kaj eĉ la nuna stato de tiu evoluo tre diferencas ĉe diversaj landoj kaj popoloj. Tial sociologie estas klarigebla la daŭranta ankoraŭ ekzisto de apartaj popoloj kun apartaj kulturoj kaj lingvoj.

La specialaj ecoj de la kapitalisma ekonomi-sistemo ne donas iun esperon, ke ĉe la kapitalismo povus okazi iu ĝenerala unuecigo de la mond-ekonomio, de la produktad-metodoj kaj produktad-tekniko en la mondo. La kapitalismo neeviteble postulas daŭran ekziston de landoj teknike pli alte progresintaj kaj de la landoj koloniaj aŭ duonkoloniaj kun pli malalta produktad-tekniko kaj kun pli intensa homeksplluatado.

Tial ni asertas, ke unueciĝo de la mondekonomio povas okazi tutmonde nur post renverso de la kapitalismo kaj post starigo en tutmondo de nova kolektivisma sociordo. Do ankaŭ nur en la epoko kolektivisma povos malaperi la lingvoj kaj kulturoj naciaj kaj stariĝi iuj universalaj komunehomaj kulturo kaj lingvo.

Tial pretendi, ke jam nun Esperanto, en siaj nunaj formoj, estas la estonta universala lingvo—estas nek saĝe, nek konforme al la sociologio.

**La evoluo kaj la rolo de naciaj lingvoj**

Lingvo evoluas sur bazo de evoluo de la ĝenerala kulturo kaj tekniko. Antaŭvidi senerare ĉiujn estontajn plievoluintajn formojn de kulturo kaj tekniko neeblas same, kiel neeblas senerare antaŭkonjekti ĉiujn formojn de la lingvo, uzotajn dum estonto.

Do, akceptinte la tezon, ke la nuna Esperanto ne estas la estonta universala lingvo, ni nun provu trovi al ĝi ĝustan titolon por la nuna epoko.

Por tion fari necesas antaŭe klare fiksi nian sintenon al la nun ekzistantaj naciaj lingvoj kaj al ilia plua disvolvo.

La nuntempaj — nacia kulturo kaj nacia lingvo en la grado de sia pleja disvolviĝo estas esence klaskulturo kaj klaslingvo de la nacieca burĝaro. Tamen la proletaro, batalante por starigo de sia klaspotenco kaj por starigo de sia kulturo, ne kreas novan kulturon kaj novan lingvon el nenio, sed transprenas kaj modifas konforme al siaj bezonoj la plej altajn atingaĵojn de la burĝara kulturo.

Jam nun en la periodo de degenero de kapitalismo ni observas ke apud la burĝaj kulturo kaj lingvo komencas rapide kreski kaj disvolviĝi elementoj de la kulturo kaj lingvo proleta. Tiuj novaj lingvoj, kreskigitaj sur la bazo de la kulturoj kaj lingvoj burĝaj, posedas la laŭformajn (eksterajn) naciajn diferencojn, proprajn al la diversnaciaj burĝaj kulturoj kaj lingvoj. Sed laŭesence ili jam estas internaciaj proletaj. Vere, en la proleta literaturo diverslingva oni trovas multe pli da komuneco kaj parenceco ol en la verkoj de diversnaciaj burĝaj verkistoj—malgraŭ la fakto, ke ankaŭ ili apartenas al la sama klaso.

Kaj ĝuste tiu unuecigo de la ideologia esenco-enhavo de la lingvoj ĉe la proleta diktatur-periodo kaj ĉe la socialismo estas tio, kio montras, ke venos la tempo, kiam ne nur laŭenhave, sed ankaŭ laŭforme la lingvoj unueciĝos.

Tia evoluvojo, sekvante kiun la proletaro heredas, utiligas kaj aliformigas komence—laŭesence, laŭenhave kaj poste ankaŭ laŭforme la lingvon de la burĝa kapitalisma periodo—estas tute natura kaj logike necesa. Nur sekvante tiun ĉi vojon, oni povas tiri al vasta konstrulaboro por starigo de nova sociordo vastajn popol-amasojn, kies sola lingvo restas kaj ankoraŭ longe restos nur ilia lingvo gepatra.

De tiu vidpunkto necesas fari konkludon, ke ni nepre ne rajtas esti malamikaj al la plua disvolvo kaj kreskado de la lingvoj naciaj, ke tia disvolvo kaj kresko, celanta doni al la lingvoj kaj kulturoj esence unuecan, internaciecan, socialisman enhavon, estas afero progresiga kaj necesa por plua disvolvo de la homaro al kultura kaj lingva unueco, efektiviĝonta dum plua disvolvo de la homa socio.

**La rolo kaj plua evoluo de artefarita lingvo internacia**

Sed ĉu akceptante tiun ĉi tezon ni konservas ankoraŭ iun lokon por Esperanto? Se la lingvoj naciaj devas esti ankoraŭ flegataj kaj kreskigataj, transformataj, ĉu la apero de internacia interkomunikilo Esperanto ne estis trofrutempa? Ĉu entute ĝi necesos por plua kultura kaj lingva progresigo de la homaro?

Jes, Esperanto estas nepre necesa faktoro por plua evoluo de la homaro. Jes. Esperanto jam nun estas necesa kaj konsiderinda faktoro. Fakte ja ni vidas, ke dume la «unuecigo laŭenhava» de la lingvoj malmulte progresigas ilian unuecigon laŭforman. Tia laŭforma unuecigo estas multoble ĝenata per ekzistanta lingva tradicio, diversaj lingvaj reguloj, malsamaj transskribsistemoj ktp.

Krome necesas plifaciligo de internaciaj rilatoj. Tiu neceso kreis kaj kreskigis Esperanton kaj donis al ĝi bazon por plua evoluo. Se ni konsideras Esperanton, kiel jam ekzistantan fakton (kaj kiel fakton ĝin neniu povas nei), — ni konstatas, ke la nuna epoko de poioma aliiĝo de la lingva kaj kultura enhavo, kies hegemono fariĝas anstataŭ la burĝaro — la proletaro, aldone estas karakterizata per ekĝermo kaj ekkresko de tute nova internacia interkomunikilo en formo de la lingvo internacia. Laŭenhave tiu lingvo, uzata por internaciaj rilatoj, povas nur respeguli tiun nivelon, kiun atingis la lingvoj naciaj. Lingvoj naciaj restas ĝis nun la ĉefa lingvoprodukto, bazita sur la jam atingita nivelo de la produktad-tekniko kaj de ĝenerala kulturo. La lingvo internacia laŭenhave ankoraŭ nenion povas aldoni al tiuj esencaj, internaj valoroj, enhavataj en la lingvoj naciaj. Sed dank' al sia univer-

zaleco, flekseblеco, facileco kaj reguleco — la lingvo internacia kvasaŭ ensorbas la tutan esencon, ĉion valoran el la lingvoj naciaj. Ĉiukaze la lingvo internacia entenas en si laŭforme ĉion por povi plengrade anstataŭi iun ajn el la lingvoj naciaj.

Neniu el la naciaj lingvoj kapablas plene anstataŭi iun alian nacian lingvon. Tro diferencaj estas la kondiĉoj de iliaj evoluoj kaj de iliaj uzomedioj. Esperanto laŭ sia formo, ne ligita per iuj tradicioj, sendiskute povas anstataŭi ĉiun el tiuj lingvoj, kaj tiu ĉi eco de Esperanto permesas al ni skizi ĝian eventualan rolon ĉe starigo de unulingva homaro en la estonteco.

Ne gravas, ke en la nuna periodo Esperanto, verdire, eĉ ne estas la ĝenerale akceptita lingvo internacia, ke en sia nuna formo Esperanto estas nur kondiĉa, tre facila kaj tre bone uzebla helpa internacia interkominikilo por tiuj, kiuj volas tiun interkomunikilon utiligi. La faktoj, ke Esperanto estas uzata de diversnaciaj multmilaj amasoj, ke ĝi evoluas en la tuta mondo, ke ĝi enhavas jam elementojn, prenitajn el diversaj lingvoj kaj necesajn por ĉiuj fakoj de la homa vivo kaj laborado, — tiuj faktoj permesas aserti, ke ĝuste Esperanto, pluen evoluanta, en certa grado helpos formigi tiun bazon, sur kiu elkreskos la estonta ĝenerale akceptota internacia lingvo.

Ankaŭ la lingvan enhav-evoluon de la kapitalismo al la socialismo ni observas ne nur en la lingvoj naciaj, sed same en Esperanto. En Esperanto, lingvo uzata speciale de plej progresemaj soci-tavoloj, — tiuj tendencoj al ekposedo de supernacia socialisma enhavo estas eĉ pli klaraj, pli okulfrapantaj, ol en la lingvoj naciaj.

**La lingva revolucio ĉe starigo de la Universala Lingvo**

Ni jam konstatis, ke la konservigaj, tradicie bazitaj faktoroj elmontras tendencon geni laŭforman unuecigon de la naciaj lingvoj, eĉ post kiam ili estos estrataj de la proletaro kaj post kiam ili ĉiuj iĝos esence proletaj, socialismaj.

Do antaŭmontriĝas neceso de certa lingva revolucio por levi la lingvo-evoluon al plua ŝtupo; kaj tiu revolucio estos efektivigita per vojo, skizita de la kolektiva kreado de nuna Esperanto.

Plua kresko kaj fortikiĝo de la internaciismaj kaj socialismaj elementoj en la lingvoj naciaj estos antaŭirata de plua internaciiĝo de la tutmonda ekonomio kaj de la mastrumadmetodoj.

Do konstante daŭros kresko de la bezono de la lingvo internacia. Tiun rolon la lingvoj naciaj — pro kaŭzoj al ili propraj — plenumi ne povos. Tiun rolon ili ne povos plenumi eĉ en la socialisma socio, kiel tion ni jam montris siatempe en la II-a ĉapitro.

Do konstante, kaj speciale en la periodo, kiam plene internaciiĝos la mondekonomio kaj kiam la proletaro ekposedos la potencon, — la nombro de esperantistoj daŭros kreski. Konstante pliriĉiĝante kaj ensorbante ĉiujn valorajn elementojn el la pluen evoluintaj lingvoj naciaj, la lingvo Esperanto fariĝos tiamaniere iom post iom, ĉiam en pli alta grado, la internacia lingvo de la homaro. En la epoko socialisma la kreskanta bezono de la lingvo por tutmondaj rilatoj kaj iom-post-ioma forigo de bezono—uzi la lingvon kun limigita ununacia apliko kaŭzos, ke iutage efektiviĝos la lingva revolucio, jam delonge antaŭpreparita.

La lingvo internacia tiutempa, kreskonta el la kerno de la nuna Esperanto, sur ĝia bazo disvolviĝonta, certe diferenca de la nunforma Esperanto, sed ensorbonta ĉiujn ecojn de la disvolviĝontaj naciaj lingvoj, tiu lingvo—multoble pli vaste uzata ol la nuna Es-

peranto — forpuŝos uzadon de ia naciaj lingvoj ankaŭ el la interne-naciaj rilatoj.

Tiam la lingvo internacia helpa fariĝos en siaj novaj formoj la lingvo universala tutmonda. Nek unu nacia lingvo — pro kaŭzoj de nacia limigiteco tiun rolon povos plenumi. Nur Lingvo Internacia, kreskinta el la kerno de la nuna, kolektive kreskigata, Esperanto, posedanta samgradan kaj eĉ pli altan ol la nuna Esperanto universalecon kaj flekseblecon de siaj konstruprincipoj — povos plenumi tiun taskon.

Plej bonajn pruvojn tiurilate donas al ni la observataj de ni faktoj de konstanta pliriĉiĝo de la lingvo internacia, konformiĝanta al ĉiuj bezonoj de la pluen evoluanta homa kulturo kaj tekniko. Do resume, Esperanto helpos al formigo de tiu bazo, kiu ĉe plua sia evoluo — laŭ vojoj montritaj, — servos por konstruo kaj ĝenerala akcepto de la internacia lingvo — komence helpa, ekzistanta apud la lingvoj naciaj, kaj poste universala, tutsola.

Eĉ la argumentoj kaj supozoj, kelkfoje esprimataj, ke ĉe plua disvolvo de la socio — la lingvoj naciaj sukcesos superi siajn naciekonservigajn elementojn, kaj rezulte — internaciiĝi anakŭ laŭforme — ne povas nuligi la rolon de Esperanto. Ĝi daŭros servi, kiel ilo por internaciaj rilatoj. Ĝi daŭros adaptiĝi al la internaciiĝontaj formoj de la naciaj lingvoj, tiujn formojn ensorbi. Ĝi nepre restos la plej internacia, plej ampleksanta, plej neŭtrala. Tial la pluen evoluinta internacia lingvo pli ol iu alia nacia lingvo, kiom ajn perfekta ĝi estus, — havos plejajn ŝancojn por fariĝi kerno de la universala internacia kaj poste unusola lingvo de la homaro.

Kompare kun la ardaj esperantismanoj ni traktas la rolon de Esperanto por la nunaj tagoj sendube tre modeste. Ni konsideras Esperanton en nuna ĝia formo tute ne kiel la estontan lingvon universalan, kiu ekstermos la lingvojn naciajn. Ni ne pensas, ke jam en la nuna momento la disvolviĝanta lingvo internacia rajtus kaj kapablus anstataŭi la lingvojn naciajn. Ni ne intencas konsideri la nunan Esperanton, kiel plej perfektan lingvon. Ni volonte lasas al Esperanto modestan servan rolon por internaciaj rilatoj.

Tia malvarmsanga traktado de la problemo estas al ni propra. Ĉe tia traktado oni ne rajtas nomi nin fanatikuloj kaj Don-Kiĥotoj. Ni scias realon kaj konsideras la aferojn reale.

Kaj tamen ni scias, ke nia lingvo pluen kreskos, pluen evoluos, kaj fine el ĝia kerno formiĝos la plej perfekta, la unusola lingvo de la socialisma epoko.

Tiu scio, ke ni laboras por la estonto, ke nia lingvo estas grate necesa socia faro, —tiu scio levas nin super la fantaziemaj utopiistoj. Kaj tiu scio anstataŭas por ni la naivan revadon de la unuaj utopiismanoj de l'mondlingvo kaj de la esperantismanoj de la komenca periodo de Esperanto.

---

## LISTO DE LA ĈEFAJ FONTOJ UZITAJ ĈE LA PREPARADO DE TIU VERKO


1) A. L. GUERARD. «A short history of the international language movement», London, 1922.
2) E. GROVES. «Pasilogia-an essay on universal language». Dublin, 1846.
3) DWIN RAY. «On some proposed universal language» en revuo «The Office». 1888.
4) Commercial Conference at Venice. «Report of the Delegate of the London Chamber of Commerce». London, 1923 (47).
5) Commitée on International Auxiliary language of the International Research Council. «Report of Progress». August, 1923, Washington (47).
6) League of Nations. «Esperanto as an international auxiliary language Report of the Gen. Secr. of the League of Nations». London, 1922 (47).
7) CHARMA. «Essai sur l'origine des langages». Hachette et C—ie, Paris, 1846.
8) L. COUTURAT et L. LEAU. «Histoire de la langue Universelle». Hachette et C—ie. Paris, 1903 (47). 2-a eld. Paris, 1907.
9) L. COUTURAT et L. LEAU. «Les nouvelles langues internationales». Paris, 1907 (47).
10) LÉON BOLLACK. «La langue bleue. Théorie complète». Paris, 1899 (45).
11) G. GAUTHEROT. «La question de la langue auxiliaire internationale». Paris, 1910 (47).
12) LAROUSSE. «Grand dictoinnaire universel du XIX siècle» (45).
13) A. BAILLET. «Jugemens des savants sur les principaux ouvrages des auteurs». Amsterdam, 1725, t. II, p. 288—289 (45).
14) E. LANTY. «La langue internationale-ce que tout militant ouvrier doit connâitre de la question». Paris, 1925 (47).
15) L. COUTURAT et L. LEAU. «Compte-rendu des travaux du Comité (15—24 Octobre 1907) de la Délegation pour l'adoption d'une langue auxiliaire internationale». Paris, 1907 (47).
16) L. EINSTEIN. «Geschichte der weltsprachlichen Versuche vom Leibnitz bis auf die Gegenwart». «Bayerische Lehrer-Zeitung». Nürnberg, 1885 (47).
17) Dr. A. WILD. «Ueber Geschichte der Pasigraphie und ihre Fortschritte in der Neuzeit». «Chronik der Gegenwart», München, 1864 (48).
18) Prof. J. M. SCHMID. «Von den bisherigen Versuchen eine allgemeine Schriftsprache einzuführen». Dillingen, 1807 (45).
19) CHR. G. BERGER. «Plan zu einer allgemeinen Rede und Schriftsprache für alle Nationen». Berlin, 1779 (45).
20) DER LORD MONBODDO. Werk von dem Ursprunge und Fortgange der Sprache übersetzt und abgekürzt von C. A. Schmid. Riga, 1785 (45).
21) MAX MÜLLER. «Vorlesungen über Wissenschaft der Sprache», II Serie, Leipzig, 1886. Zweite Vorlesung «Sprache und Vernunft» (38—87 S.) (45).
22) MORITZ CANTOR. «Vorlesungen über Geschichte der Mathematik», III Band, Leipzig, 1894-95, 84 Kap. S. 38—42 (45).
23) JOHANN SEVERIN VATER. «Versuch einer allgemeinen Sprachlehre (mit einer Einleitung über den Begriff und Ursprung der Sprache und einem Anhange über die Anwendung der allgemeine Sprachlehre auf die Grammatik einzelner Sprachen und auf Pasigraphie)». Halle, 1801 (45).
24) HANS MOSER. «Grundriss einer Geschichte der Weltsprache», Berlin-Neuwied, 1888 (47).
25) RUPERT KNIELE. «Das erste Jahrzent der Weltsprache Volapük». Ueberlingen, 1889 (47).
26) PROELS und SAPPL. «Die bisherigen Erfolge der Welthilfssprache Esperanto auf den ganzen Welt». III Auflage. Paulus Verlag, Graz, 1922 (47).

27) L. ZAMPONI. «Zur Frage der Einführung einer internationalen Verkehrssprache». Graz, 1904 (47).
28) Das Esperanto — ein Kulturfaktor. I—VII Band. Festsschrifte der Deutschen Esperanto Kongresse (47).
29) KARL LENZE. «Die Weltsprache und ihre Bedeutung für den Völker-verkehr». Leipzig, 1886 (47).
30) O. KNUTH. «Storia dei principali sistemi pasilinguistici anteriori al Volapük». «Volapükabled Tälik», Torino, 1888.
31) GAETANO FERRARI. «Monoglottica. Considerazioni storico, critico e filosofiche intorna alla di ricerca di una lingua universal». 2 ed. Modena, 1877.
32) V. ŜERCL (prof.). «Vsemirnij jazik i ĵestikulacija». Moskva, 1887 (45).
33) «Na putjaĥ k meĵdunarodnomu jaziku, sbornik statej». Moskva—Leningrad, 1926 (47).
34) PLOFED KERCKHOFS. «Yelabuk pedipedelas». Le Soudier, Paris, 1889 (47).
35) O. JESPERSEN. «Historio di nia linguo». Lüsslingen (47).
36) EDMOND PRIVAT. «Historio de la lingvo Esperanto». I kaj II parto.j 1887—1926. Leipzig, 1923—27 (47).
37) B. KOTZIN. «Historio kaj teorio de Ido». Moskvo, 1913 (47).
38) E. PRIVAT. «Vivo de Zamenhof». London, 1920 (47).
39) A. ZAKRZEWSKI. «Historio de Esperanto de 1887—1912». Warszawa, 1912 (47).
40) P. STOJAN. «Bibliografio de internacia lingvo». Genève, 1929 (47).
41) E. DREZEN. «Analiza historio de Esperanto-movado». Leipzig—Moskvo, 1931.
42) E. DREZEN. «Zamenhof». Leipzig—Moskvo, 1929.
43) J. STALIN. «Kulturo nacia kaj internacia». Leipzig—Moskvo, 1930.
44) E. DREZEN. «La vojoj de formiĝo kaj disvastiĝo de la lingvo internacia». Leipzig—Moskvo, 1929.

LA CITITAJ ELDONAĴOJ TROVIĜAS EN:

45) Moskva publika biblioteko de la nomo de Lenin.
46) Biblioteko de la I-a Moskva ŝtata Universitato.
47) Biblioteko de la aŭtoro de tiu-ĉi verko
48) Prusa ŝtata biblioteko en Berlin.

## ALFABETA NOMARO DE LA PERSONAJ NOMOJ, CITITAJ EN LA VERKO

(per ciferoj estas montritaj la paĝoj, en kiuj troviĝas koncernaj notoj)


A.

Ablov, N. N. 113
Ahlberg P. 199
Agnus 111,
d'Alambert, J. 113
Aleksandro III 105
d'Alesi, Hugo 112
Ampère 54, 113
Andre, Ch. 137
Andreä 35
Andrews, S. P. 87
Arago 81
Aristoteles 113
Arnim, W. von 127
Atheneis 40

B.

Bachmair, A. 89
Bacon 33, 43, 113
Baden Powell 116
Baillet, A. 33, 43, 231
Balmont, K. 117
Banachiewiz 174
Banfi-Bauer, G. 101
Barailon 55
Baranovskij, S. 95, 102, 110
Barral, J. 193
Barthélemy 56
Basso, U. 169
Baudouin de Courtenay, J. 184
Bauemker, C. 29
Bauer, G. 101, 126
Baumann, A. 144
Baumgarten 94
Bazin 76
Beatty, W. 132
Beaufront, L. de 151, 157, 181, 184, 198, 199
Beauzée 53
Becher, J. 33, 36, 37, 43
Beck, Cave 36
Beda, Venerabilis 40
Beermann, E. 128, 157
Bel 145
Bell, A. M. 139
Beobi 124
Berger, Chr. 51, 231
Bermonville 44
Bernhaupt, J. 171
Berthelot, P. 188
Bernard, S. 141
Besnard, F. 95
Besnier 35
Beuthner, A. 131
Bibliander (Buchmann) 32
Bik, Eug. 105
Bjelyj, A. 118
Blondel 139
Bobula, J. 95
Bonin, B. 142
Bogdanov, A. 8
Boirac, E. 184
Bollack, Leon 128, 231
Boltz, A. 135
Bolyai, J. 95
Bond, S. 205, 213
Bonto van Bylevelt 165
Borgius, W. 204
Borovko, N. 61, 176
Boudevillain, A. 90
Bourgoint-Lagrange 120
Boville, Ch. 33
Boyle 43
Boyli, H. Robert 43
Braakman, J. 152
Brandt, R. 190
Bravo del Barrio, C. A. 194
Breandle 140
Bredshaw, James 77
Breithaupt, Chr. 41
Brinton 152
Brosses, Ch. de 54
Brouchot, P. 135
Browne, A. 153
Bruno, G. 29
Buchmann 32
Budet 63
Burja, Abel 67
Burmann 66
Burnet, Thomas 34
Burnouf 81
Busch, J. 51
Butet 63
Büchner, Max. 90

C.

Cabet, E. 96
Campanella 33, 43
Caramuel von Lobkowitz 44
Cardenas 210
Carnot 56
Carpophorophilus 46, 148

Carus 145
Casarico, A. 112
Caumont, Aldrick 88
Chamberlaine, N. 49
Chambry 64
Chancerel 120
Changeux, P. J. 51
Chappelier, Paul 146
Chapaz, I. M. 142
Chappellier, Paul 146
Charma 79, 231
Chillet (D-ro Colombo) 137
Chofin, D. S. 51
Cingria, A. 163
Cirilo 16
Colas, C. 192
Collange, Gabr. 888
Colombo, D-ro 137
Comenius, J. A. 29, 30
Comte, August 79, 113
Condillac 51
Condorcet 51
Consoli, S. 133
Court de Gebelin 48
Courtonne, E. 149
Couturat, L. 146, 182—196, 231
Creux 210
Crogaert, J. E. 124
Cromwell, O. 42
Cumerdei, B. 78

Ĉ.

Cernuŝenko, D. N. 117
Ceŝiĥin, Vsevolod 111

D.

Dalgarno 39, 42, 85
Damm, D-ro J. 92
Dantec, Le 119
Darde, E. 130
De-Cornel 55
De-Gerando 58
De-Lauture 87
Del-Monaco 204
Delormel 54, 85
De Mas, Sinibald 88
De Max, St. 126
Denis, de L. P. 73
Denis Vairrasse 96
De Ria 59, 128
Ders 62
De Rudelle 86
Descartes, René 26, 28, 31, 35
Deschaux 88
De Vertus, A. 87
Dewey, Melvil 113
D'Harve, G. O. 212
Diels, H. 146
Dietrich, Carl 122
Digbeus, P. 36
Donisthorpe, W. 133
Dononghue, J. 133
Dormoy, E. 120, 126
Douet, Jean 35
Dumont de Bonneville, F. M. 58
Duthil, A. 191
Dwin-Ray 231
Dyer, J. W. 92

E.

Edmonds, G. 66, 85
Eichhorn 150
Einstein, L. 151, 231
Ellis, A. 152
Engels, F. 8, 97
Epstein, F. 4
Erdman, E. 116
Ernst, D-r 171
Escriche y Mieg, Tomas 126
Espé de Metz, J. 116
Esperema, D-ro 192

F.

Faber, J. 71,
Faiguet de Villeneuve 49, 85
Fazekas, J. 133
Ferranti 171
Ferrari, Gaetano 92, 232
Fergusson, O. F. 213
Feyerabend, K. 163
Fibula 173
Fieweger 127
Firmas Péries 58, 68
Flach, J. 135
Folengo, Th. 27
Fontana, A. 79
Forster, E. P. 124, 172,
Fourier, C. 20, 63, 96
Frandsen, E. 137
Freeland, E. 87
French, E. D. 156,
Friedman, P. (P. Lundström) 123
Friedrich, F. 111
Frisch, J. 62
Froelich, K. 137
Fuchs, R. 148

G.

Gablentz 68
Gaevsky, V. kaj B. 81
Gagne, P. 85
Gaidoz 146,
Gajewski, W. kaj B. 81
Galenus, Claudius 26
Garat 57
Gasté 15
Gati, Istvan 70
Gaugengil 88
Gautier 88
Gavidia 142
Gebelin, Court de 48
Gerando, De 58
Gerber, F. A. 71, 72
Gerezad, Francis Tanvel 144
Gibbon, Westy 36
Gigli, M. 70
Girardin, E. de 95
Gisbert, Lope 82
Glubokovskij, M. N. 94
Gordin, B. L. 124
Gottschling, A. 92
Gottwald 114
Grabowski 157, 159
Greenwood, F. 161
Grimm, A. 87
Grosselin, Aug. 73
Grotefend, H. F. 58
Groves, E. 76, 131

Götze, H. 192
Guardiola, José 137
Guerard, A. L. 209, 231
Guerrero, Antonio Julio 121
Guesnet, M. de 209
Guillaume, J. 97
Gurin, Eug. (D-ro Novodum) 120
Gül, D-ro 127

H.

Haag, Carl 112
Hale, H. 139, 152
Hamilton, J. 141
Harding, R. 198
Harivel, Le 76
Harowicz, S. 222
Harris, J. 33, 77
Hartl, A. 171
Hartlib, Samuel 36
Haseman 94
Haugg, A. 194
Heintzeler, E. 156
Hely, V. 160
Henderson, G. 136, 142, 160
Henricy, Kazimir 84
Henslowe, W. H. 74
Herkel, J. 78
Herpain, S. 73
Hesse, R. 206
Hetz, A. 66
Hilbe, Ferdinand 122, 129
Hildegardis 26
Hoessrich, A. 129
Hoĥlov, N. 3
Holmar 92
Holmes, A. 168
Hoŝek, I. 144
Houghton, S. C. 161
Hourwitz, Zalkind 64, 85
Howe, S. G. 76
Huertas, R. 188
Hugo, Herman 33, 35
Hugo, Victor 81
Hugon, P. D. 194
Humboldt, A. 81
Hummler, J. 160
Hunkele, Joseph 88

Ĥ.

Ĥlebnikov, V. 117
Ĥolin, I. 105

I.

Iljin, N. S. 76
Immanuil of Jerusalem 140
Isly, F. 136

J.

Jamin 191
Jan III, Sobieski 30
Janowski, J. 157
Jaurés 216
Jespersen, O. 130, 202, 211, 232
Jevons, Stanley 29
Jezerskij, F. 120
Jezierski, W. 173
Johano-Filipo (episkopo) 37
Jokai 95
Jonain, P. 76
Jones, William 49
Juhle 94
Julien, Felix 91
Jungmann 78,
Justell, H. 35
Juŝmanov, N. 197, 207

K.

Kalmar, G. 50
Karl, A. O. 95
Karl, von 94
Katarino, la II-a 59
Kazinczy, Ferencz 17
Kent, R. G. 174
Kerckhoffs 102, 153, 164, 232
Keyser, K. 144
Kircher, A. 33, 36, 41, 43, 64
Kirchhof, Alfred 102
Kniele, Rupert 101, 104, 130, 231
Kochanski, Adam 30
Kolkop, E. 145
Komensky, Jan Amos 29, 30
Koneĉny, J. 145
Kopitar, B. 78
Kornerup, T. 191
Kovacshazi, Istvän 95
Kovalev, A. 111
Krachenberger, Hans 16
Krizaniĉ, J. 78, 145
Kuhlenbeck, L. 135
Kukel-Krajevskij, S. A. 115
Kulbacki 197
Kunstovny, O. T. 132
Küschner, F. 160

L.

Labbé, F. 43, 44
La Fayette 69
Lagrange-Bourgoint 120
La Ĝrasserie 135
Lakeman, H. P. 92
Lakide 142
Lamanski 78,
Lamartine, A. 81,
Lambert, J. H. 48
Lamy, Bernard 45
Lantos 223
Laromiguièrre, P. 70
Larousse 64, 231
Lauda, E. 153
Laut, egiptologo 89
Lauture, de 87
Lavagnini, A. 173
Lawth 77
Leau, L. 182 185, 231
Le Dantec 119
Lederer 128
Le Harivel 76
Leibnitz 29, 31, 40
Lemaire 194
Le Mesl 73, 85
Lenin, V. I. 24
Lentzer 140, 153
Lenze 153, 232
Lepsius 90
Leseviĉ, V. 146
Letellier, C. A. 82, 85

Le‘ellier C. 85
Levanzin 2 2
Léréque, T. 162
Lich'enstein, D-ro 83
Lindau 69
Linzbich, J. 114
Liptay, A. 154
Lock 48
Lopez Martinez, Pedro 83
Lorenz, F. V. 198
Lo t, J. 1 4
Low h 111
Ludevig, J. P. 62
Lulli Raymundi 29
Lundström, Peter (P. Friedmann) 123, 174
Luther 16

M.

Mac Pike, J. T. 197
Maggazini 69
Maimieux, J. 31, 55, 68, 85
Majar, M. 78
Majer, M. 33
Maldant, Eugeno 119
Mantegazza 96
Marbot 81
Marchand 128
Marich. A. 206
Marinet.i, F. T. 118
Marini, H. 120
Marr, N. J. 3, 15
Martelotta, V. 172
Martineau, J. T. 197
Mar inez Lopez, Pedro 83
Marx, Karl 7, 96
Mas, Sinibaldo de 88
Matraya, Giuseppe 72
Mau ertuis 47
Max, St de 126
Meier Heucke 223
Melvil-Devey 113
Monet, Charles 126, 128
Mersen e 28, 35
Meriggi, Cesare 119
Mesl Le 73, 85
Metodo 16,
Meysmans, J. 167, 169 172
Michaelis 34, 48
Michaux, A. 203
Mill, F. 155
Milier, A. 167, 206, 208
Milner, H. 210
Moeser, W. 170
Mohyieddin 140
Molee, E. 27
Molenar, H. 162
Monboddo, L rd 53, 231
Morath, J. V. 57
More, Thomas 96
Morris, A. V. 225
Moser, H. 150, 231
Moussaud 63
Müller, Max 9, 34, 42, 43

N.

Nachtigall, O. 194
Nag, N. 126
Näther, J. Z. 65
Nekrasov, N. 3
Nesmejanov, N. 131
Nettesheim, A. V. 29
Newton 48
Nicolas. D ro A. 115, 121
Nield, G. 125
Niethammer, F. J. 67
Nietzsche, F. 95
Nikolao I. 79
Nilson, A. 158
Nodier, Ch. 43, 79
Nos radamus 27
Novodum (d-ro E. Gurin) 120

O.

Ochando Sotos, Bonifacio 81, 85
Odojevskij V. F. 79
Ogden, C. K. 141
Oka, D ro 212
Orsat, J. 114
Ostwald, W. 144, 148, 182, 195
Owen, prof. 40

P.

Paiĉ, M. 86
Palazeschi, A. 118
Panini 21
Parrat, H. J. E. 86
Pascal 29
Passy, P. 145
Pazar 114
Peano, G. 137, 168, 172, 184
Perrie 133
Pesh, M. 197
Petraŝeviĉ, V. 207
Peviĉ, V. 207
Phipson, E. 194
Pierre, S. 102
Pinth 106, 167, 169
Pirquet, K. v. 114
Pirro 88
Platono 67, 113
Plutarĥo 67
Pogodin 78
Poincare, R. kaj L. 135
Pojattina 90, 96
Pompiati, K. 172
Porele, Peter 41
Pranicki 194
Prieur, de la Marne 62
Prieur, Philippe le 62
Prinjatjelj 78
Proudhome 97
Puchner, J. 141

R.

Radiŝĉev 59
Radoviĉ 194
Raimond, H. E. 198
Ramboss n 83
Rams edt 210
Reiff, Rhilipp 111
Reimann, F. 93
Renou 73
Renouvier, Ch. 85
Rethy, Andreo 71
Renzi, A. 74
Reverchon, L. 173
Ria, de 59, 128

Ribaulb 174
Richeri, L. 74
Richter, prof. 89
Riedel, F. 210
Rieger, W. 112
Riem, A. 68
Rietmann, C. 156
Robida 96
Romanski, Z. 192
Rosa, D. 155
Rosenberger, V. K. 105, 164—169, 207
Rosenhein 69
Rosental 111
Rossello-Ordines, J. 173
Rothes, M. 133
Roux, J. T. 88
Rössler, K. 88
Rubinin, N. 198
Rudelle, Lucien de 86

S.

Sankov 106
Sapel, G. 78
Sarant n, de 124
Scarisbrick, J. 133
Saussure, R. de 189
Scheffers, O. 194, 210
Schellenberg 65
Schipfer, J. 74, 78
Schleyer, J. M. 98—109, 164
Schmid, C. A. 67
Schmid, J. M. 231
Schmitt, A. 89
Schnepper, prof. 103
Schott, Gaspar 39
Schuchardt, prof. H. 139, 182
Schwarz, W. 197
Schwenter 62
Scott, Lady Sophie 71
Seidel, A. 191
Selbor, L. 119
Semprini 179
Sentis, H. 192
Sertorio 92
Sethward 34
Sicard, R. A. 55, 69
Silberman 88
Sivartha, D-ro 120
Skrabec 170
Skyttius 34
Slefocht, A. 105
Sleymer 108
Sl nimski, J. 204
Soave, Francesco 49
Solbrig, David 47
Sondahl, M. 194
Sotos-Ochando, Bonifacio 81, 85
Soulte 81
Spencer 79
Spicelius 33
Spiridoviĉ, E. (A. Tom) 96
Spitzer, C. 161
Staffler, A. 91
Stalin, J. 24, 227, 232
Starĉevskij, A. 138
Starrenburg, D. 142
Stäckel 95
Stead, W. 184
Stein 68
Steiner, P. 149
Stelzner, W. 192
Stempfl, J. 153
Stephan, F. 192
Stowart, C. 92
Stojan, P. 4, 145, 193, 194, 232
Straus 127
Sturmius, Joh. Christ. 44
Sudre, J. F. 80
Sunderwall 87
Sureau, Jos 57
Suvorin, A. 105
Swift 77
Szilagyi, Denes 4

Ŝ.

Ŝercl, V. 116, 232
Ŝmurlo, V. F. 197
Ŝulerc, O. 793
Ŝwictochowski, A. 96

T.

Talmey, M. 197
Talundberg, Manus 123
Tankerton 198
Tartalea 33
Tartaglia, Nicolo 32
Testut, Oscar 97
Télfy, I. 135
Thaüst 129
Thevenot, Jacques 45
Thiemer 116
Thomas Aquinatus 117
Thomsen 145
Thorman 130
Tgransar 61
Tiĥomirov, V. 193
Touflet, G. 212
Tom, A. (Spiridoviĉ) 96
Tomiĉ, P. 78
Top, Alex. 32
Touze 81
Tracy, Destutte de 69
Traygia, D. J. 62
Triola, R. 192
Trischen, H. 161
Trithemius, J. 41
Tz. 198

U.

Ugarte 156
Umano 156
Uppendorf, J. 44
Upperdorf 44
Urquhart, Thomas 36

V.

Vaillant 85, 216
Vairrasse, Denis 96
Van-Diemen 173
Vanghetti, G. 194
Vater, J. S. 58 231
Verema 188
Verheggen, S. 126
Vengerov, V. 131
Verdu, D-ro 87
Vertus, A. de 87
Vesin, Ch. Fr. 41
Vico, G. B. 53

Vidal, E. T. 76, 85
Villiers, Jean 35
Vinaverde y Domineck 82
Vives 27
Voirol, S. 208
Volk, A. 148
Volney 34, 67
Voltaire 46, 53, 59
Voss(ius), Isaac 40
Völz, P. 197
Vulda, V. 133

W.

Wagner 19
Wald, Max 129
Waldmann, F. 105
Wahl, E. von 159, 167, 208, 224
Walton, Alfred A. 97
Warnery, C. G. 112
Weferling, E. 208
Weisbart, J. 204
Wells, H. 96
Wellsch, J. 130
Wild, Abert 89, 231
Wilkins, J. 32, 42, 85
Will 47
Wingfield, F. C. 197
Wise 123
Wolke, C. H. 61
Wood, Antoine 43
Worcester, Marquis of 41
Wren, Christophe 43
Wundt, W. 134

Z.

Zachrisson, R. E. 141
Zakrzewski, A. 159, 232
Zakrzewski, A. 232
Zamenhof, L. L. 67, 107, 157, 176—201
Zamponi 232
Zefaniah 26

## ALFABETA NOMARO DE LA LINGVOJ, PROJEKTOJ KAJ LABOROJ

(per ciferoj estas montritaj la paĝoj, en kiuj troviĝas koncernaj notoj)


A.

Adelfenzal lingw 131
Adjuvanto 185
Adjuvilo 192
Alfabeto universala 33
Algebro logika 29
Angla lingvo 20, 22
Angla reformita 77, 138
Anglo-franca 143
Anglo latine 203
Anglic 141
Antido 189
Anti-Volapük 155
Apolema 135
Amiana 194
Ao 124
Apoléma 135
Ariana 194
Ariadna lingvo 197
Argot 19
Arulo 197
Aryana 123
Auli 208

B.

Balajbalan 27
Balta 126
Baŝkira lingvo 12
Blaia Zimondal 119
Bolak (blua lingvo) 128, 184
Bopal 126
Boyscott language 116

C.

Casuela 208
Central dialekt 158
Centralia 158
Chabe-Aban 119
Clarison 160
Clef des langues 69
Colonial English 140
Communia 153
Cosman 210
Cosmian 132
Cosmoglossa (Pantos-Dîmou-Glossa) 86
Cosmoling-Via 125
Cosmopolita 190

Ĉ.

Ĉina lingvo 112
Ĉuvaŝa lingvo 12

D.

Dana lingvo 145
Dil 127
Dilpok 128
Domni 205
Dutalingue 191

E.

Edilo 194
Ekselsioro 161
Eo 194
Esk 194
Esperantida 190
Esperanto 103, 150, 176—201, 214—230
Esperanto plibonigita 197
Esperido 197, 198
Espido 197
Espo 194
Etem 207
Eulalia 170
Europal 204
Europeo 194
Evoluto 213
Extra lingue 208

F.

Filozofia lingvo 32, 114, 119
Franca lingvo 20, 74
Fransezin 142
Fraternitat 204

G.

Gavlensographie 86
Gavlensolalie 86
Genigrafia italiana 72
Germana lingvo 16, 20, 22
Germanic English 140
Gesta lingvo 40, 116
Geoglot 132
Glot 207
Glott 207

Grammaire fixée 191
Greka lingvo 14, 135

H.

Harmonia linguarum 37
Hebrea lingvo 14
Hemi-Pasigraphie 76
Hispana lingvo 20
Homapar 133
Hom-idyomo 210
Homographie 71
Hungara lingvo 17

I.

Iala 133
Ideografio 67, 110
Ideografio luna 87
Ideografio matematika 114
Idido 193
Idiom-Neutral 164—168, 184
Idiom Neutral modifiked 167
Idiom Neutral reformed 167
Ido 183—201, 215, 222—224
Ido Novialisat 198
Ido Reformita 198
Ikaria lingvo 96
Ile 191
Ilo 194
Interlingua 168—176, 184, 202, 215
Interlingua systematic 173
Ispirantu 191
Itala lingvo 20
Italico 192
Ixesoire 135

J.

Japana lingvo 22

Ĵ.

Ĵargono 19

K.

Karela lingvo 12
Kodo 33
Kodo marsignala 91
Komunika lingvo 74
Korea lingvo 35
Kosmalidioma 128
Kosmos 153
Kriptografio 33
Kuĝi 115

L.

Language Humain 156
Langue federale 193
Langue nouvelle 49
Lasonebr 158
Latina lingvo 14, 136
Latinesce 143
Latin-Esperanto 194
Latin-Ido 194
Latino Commerciale 137
Latino Internationale 171
Latino Macaronico 27
Latino viventi 173
Latino sine flexione 137
Latinulus 172
Lengua Universal 81
Liana 194
Lingua european 166
Lingua franca 143
Lingua franca nuova 141
Lingua Franka 194
Lingua Geral brazilica 18
Lingua Internacional 159
Lingua internazional 154, 156
Lingua komun 160
Lingua Lucida 92
Lingua Nazionale della Terra 133
Lingua 143
Lingua primaeva 32
Lingue international 154, 204
Linguo internationala 194
Linguum islianum 136
Lingvo-salato 96
Lips-Kith 133
Logo 129
Lugar 73
Lumtur-signaloj 91
Luna ideografio 87

M.

Malaja lingvo 145
Manbab 131
Mangif 131
Master-Language 161
Medial 204
Median 133
Medio 194
Meso 205
Mimika lingvo 40
Miografia 112
Moloz 124
Monda lingvo 197
Mondik 212
Monario 173
Mondlingvo 161
Mondlingu 205
Mondo 162
Monopanglosse 85
Mundelingva 160
Mundial 198
Mundi-latin 205
Mundolinco 152
Mundolingua 142
Myranna 153

N.

Nal-Bino 126
Nederlanda lingvo 145
Neo-Latino 174
Neo-Latine 156
Nepo 111
Noématopasigraphilalie 58
Novam 212
Novial 211
Novilatiin 157
Novi latin 158
Novi latine 171
Nov Latin 155
Nov Latin logui 172
Numerlingue 122

Nuove Roman 141

O.

Occidental 114, 198, 206, 209
OM 132
Omnez 205
OMO 131
Optoez 205
Orbidaie 76
Oregon Trade Language 139

P.

Pan-Arish 123
Panglossie 119
Pankel 129
Panoptic English 141
Pan-Roman 162
Pantos-Dîmou-Glossa 86
Parla 161
Parlo 156
Pasigraphion 86
Pasilalion 86
Pasilingua 102, 149
Pasilogie 66, 83
Pazigrafio 31, 33, 55, 65
Pazilalio 67
Pazitelegrafio 58, 68
Perio 123
Perfekt-lingua 171
Phonaritmon 76
Pidgin-English 11
Plibonigita Esperanto 197
Poligrafio 41, 64
Prometeo kleriganto 120

Q.

Qôsmiani 132

R.

Reform-Esperanto 157, 194
Reform-latein 137,
Reform-Neutral 207
Ro 124, 172
Romani Universale 204
Romanal 203
Romangle 212
Romanizat 190
Rosentalographia 111
Rusa lingvo 20
Rus-ĉina lingvo 11

S.

Salvador 142
Sanskrita lingvo 14,17
Seĥleraj 61
Sekretaj skrib-sistemoj 33
Semilatin 170
Sermo 153
Serve 132
Severamba lingvo 96
Signala mara kodo 91
Signaloj por lumturoj 91
Signal-sistemoj 91
Simplat 213
Simplo 171
Sintesal 198
Slava lingvo 16, 78, 144
Slavina 145
Slovanŝtina 145
Solresol 101
Spelin 127
Spiranta 194
Spokil 121
Steganographia 33
Stenografio internacia 33
Susal 212
Sveda lingvo 20
Sylabaire Moderne Universelle 142
Synthetic Language 197

Ŝ.

Ŝumera lingvo 14

T.

Tal 129
Tersboca 133
Timerio 116
Tutonish 140
Tutslava lingvo 123

U.

Ulla 161
Unesal 208
Unial 204
Unilingue 173
Unita 194
Uniti-langue 210
Universal 140, 156, 162, 197
Universala 156
Universalglot 89
Universal-sprache 51
Universal-spraket 144
Uropa 135

V.

Veda lingvo 17
Veltlang 128
Visona 120
Viva 131
Volapük 98—109

W.

Wede (Welt-deutsch) 144
World English 139, 140, 141

Z.

Zilengo 212
Zimondal Blaia 119

ENHAVO

Antaŭparolo . . . . . . . . . . 3
I. Lingvo, ĝia rolo kaj evoluo . . . . . . . . . . 7
II. La arta reguligo de la lingvoevoluo . . . . . . . . . . 15
III. La unuaj provoj kaj projektoj de la universalaj lingvoj gis XVIII jarcento . 26
IV. La XVIII. jarcento kaj projektoj de tiu epoko . . . . . . . . . . 45
V. La projektoj de la periodo 1800—1850 . . . . . . . . . . 63
VI. La projektoj el la periodo 1850—1880, antaŭirintaj la aperon de Volapük . 80
VII. La universala lingvo Volapük . . . . . . . . . . 98
VIII. Arbitraj projektoj de artefarita lingvo post Volapük (1880—1930) . . . . 110
Pazigrafioj . . . . . . . . . . 110
Gestoj kaj natursonoj . . . . . . . . . . 116
Sistemoj aprioriaj . . . . . . . . . . 119
Miksitaj projektoj . . . . . . . . . . 125
IX. Projektoj de universaligo, korektado kaj reformado de la literaturaj lingvoj—mortaj kaj vivantaj (1880—1930) . . . . . . . . . . 134
Lingvoj mortaj . . . . . . . . . . 134
simpligitaj vivantaj lingvoj . . . . . . . . . . 138
Proponoj pri akcepto de iu vivanta lingvo por la rolo de la universala . . . . . . 145
Sorto de eventualaj similaj projektoj dum la estonto . . . . . . . . . . 146
X. La projektoj de raciaj internaciaj aposterioriaj lingvoj el la periodo 1880—1907 . . . . . . . . . . 148
XI. La Akademio de la tutmonda lingvo Volapük kaj ĝiaj heredintoj—novlatinaj projektoj de universala lingvo (1893—1930) . . . . . . . . . . 164
XII. Esperanto. La delegitaro por akcepto de internacia helpa lingvo. Ido kaj sekvintaj reformaj projektoj (1900—1930) . . . . . . . . . . 176
XIII. La individualistaj projektoj, kompromisaj inter Esperanto kaj la lingvoj anglo-romanaj (1909—1930) . . . . . . . . . . 202
XIV. La internacia vivo kaj internacia lingvo (1907—1914) . . . . . . . . . . 214
XV. Post la milito (1919—1930). . . . . . . . . . . 218
XVI. La nuna Esperanto, la estonta lingvo internacia kaj la lingvo tutmonda . 227
Listo de la ĉefaj fontoj, uzitaj ĉe preparado de tiu verko . . . . . . . . . . 231
Alfabeta nomaro de la aŭtoroj kaj de la lingvosistemoj . . . . . . . . . . 233, 239

BIBLIOTEKA NARODOWA BN

BIBLIOTEKA NARODOWA
BN

750
500/628841/687

Ant. Nauk.
12.X.87. Wa-wa
- 450,- zł